

# **Islanda antologio**

**Kompilis  
Eysteinn Sigurðsson**

**Novembro 2000**

## Enhavo

Enhavo .....	2	Jón Vídalín: .....	155
El la Libro de ekloĝo.....	5	El Libro de predikoj.....	155
Ari la saĝa: .....	10	El Kristnaska prediko .....	155
El la Libro de Islandanoj .....	10	El prediko por la dimanĉo inter la Novjartago kaj la Epifano.....	156
Völuspá .....	12	La historio pri Finna la antaŭvida .....	158
Hávamál .....	23	Björn Halldórsson:.....	161
El Hávamál .....	34	Printempo .....	161
El Helgakviða Hundingsbana II .....	38	Eggert Ólafsson: .....	161
Þrymskviða .....	46	Saluto al Islando .....	161
Hjálmskviða .....	53	Sub sunplena bluĉielo .....	161
Snorri Sturluson: .....	55	Sveinbjörn Egilsson: .....	162
El Snorra-Edda.....	55	„Vita varia“.....	162
La vojaĝo de Þór al Útgarda-Loki.....	55	Strofo .....	163
La kanto pri Grotti.....	63	Björn Gunnlaugsson: .....	163
El Heimskringla .....	68	Pri la vivo .....	163
Ólafur la sankta kaj liaj fratoj.....	68	Jón Þorláksson: .....	164
Arnljótur gellini .....	70	Memore al pasero .....	164
El la Sagao de Egill.....	73	Sigurður Breiðfjörð: .....	166
La batalo en Vinerikejo.....	73	Gronlandaj strofoj.....	166
La ĉagreno de Egill post siaj filoj .....	77	Strofoj.....	166
El Grettis saga .....	84	Bjarni Thorarensen: .....	167
La mortigo de la fratoj Grettir kaj Illugi .....	84	Pralando de glaci' .....	167
La travintrado en Reykjahólar.....	88	Festena verso .....	167
La mortigo de Grettir kaj Illugi.....	91	Belas ja la blua stel' .....	168
El la Sagao de la Eyrbyggjar.....	96	La vintro .....	168
Komenca parto (mallongigita) .....	96	La vintro .....	170
La mirindaj eventoj en Fróðá .....	103	Oddur Hjaltalín .....	172
El la Sagao de Laxdælir .....	113	Jónas Hallgrímsson:.....	174
La sonĝoj de Guðrún Ósvífursdóttir .....	114	Fino de vojaĝo .....	174
El la Sagao de Njáll.....	117	Ho, kiom ĉarmas.....	176
La bruligo de Njáll.....	117	Kanto de Islandanoj .....	176
El la Sagao de Eiríkur la ruĝa .....	127	Am' de patrino.....	177
Renkonto kun indiĝenoj en Vinlando.....	127	Saluto el fremdlando.....	178
La unupiedulo .....	130	El epitafo .....	178
En la verma maro .....	130	El la poemo Al s-ro Paúl Gaimard.....	179
Auðunn kaj la urso .....	131	Island' feliĉa land' .....	179
Rakonteto de Óttar la nigra .....	138	Blanka vi bela Island' .....	181
Rakonto pri Torstejn la Kelketo .....	139	Printempa saluto .....	182
La rakontoscia Islandano .....	142	La insuleto de Gunnar.....	183
La strofoj de Bjorn Violono .....	143	La knabino en la turo .....	185
Einar Sigurðsson: .....	144	El amuzletero.....	187
Poemo pri staltrogo de Kristo .....	144	Magnús Grímsson:.....	190
Stefán Ólafsson: .....	145	Blua ond' .....	190
Bela knabin' .....	145	Islandaj popolarakontoj .....	190
Bjarni Gissurarson: .....	145	La diakono en Myrká.....	190
Pri komparo al la suno .....	145	La animo de mia Johano .....	193
Hallgrímur Pétursson: .....	148	La animo de mia Jón.....	195
El la Pasiona psalmaro .....	148	Tute senvestigu vin!.....	197
El la 27-a psalmo .....	148	Loftur, la sorĉisto.....	199
El la 35-a psalmo .....	148	La foka felo.....	204
El la 44-a psalmo .....	149	La preĝeja konstruisto de Reyn .....	205
La 48-a psalmo.....	149	La knabo, kiu ne volis loĝi kun feoj .....	205
Pri la necerta tempo de la morto .....	152		

„Ni trenu, kaj ni trenu“.....	206	Popolpoemeto .....	273
Dekok-infana patro en feomondo.....	206	Rid' el koro levas sin .....	273
La rakonto pri Lanvolvulo .....	208	Mond' falseca .....	273
Senkornulino .....	210	Vesperigās .....	273
La talera bareleto.....	212	Ne riproĉu ulon ni .....	274
Deveno de Drangey <sup>1</sup> .....	213	En menso vivas la pase' .....	274
La fratoj de Bakki .....	214	Dormu bonetul' de mi.....	274
La rakonto pri Helga kaj ŝiaj fratinoj .....	218	Di' al mi donis .....	274
Fermiĝis frape pordo ĉe la kalkanoj.....	221	Marŝo de infanoj .....	275
Kontrakto kun Satano.....	223	Forta kaj feliĉa ben' .....	275
Pri Pastro Eirikur, la sorĉisto .....	223	Saluto de elmetita infano .....	275
Du islandaj popolrakontoj.....	232	Laŭ norm' nokt' post tago iras.....	275
Ulfhildur – la feino.....	235	Ni festenu bone jen .....	276
La diabletfajfilo.....	238	Songĝoemo .....	276
„Nun mi ja ridus, se mi ne estus morta“.....	239	Ploras ŝafido .....	276
Benedikt Gröndal:.....	240	Infanetoj ludas ja .....	277
El la Mortvojbatolo .....	240	Sivalin kaj la korvo.....	277
Steingrímur Thorsteinsson: .....	246	La ofero .....	278
Cigna kanto en stepo .....	246	Hannes Hafstein:.....	279
Printempa instigo .....	247	Mi amas vin, ŝtormo .....	279
Ĉe flu' rivera .....	248	Ĉion amas tre la Sun' .....	279
Vi, blua montejo.....	249	Ni elviŝu grandajn vortojn .....	280
Matthías Jochumsson:.....	249	La kurego.....	281
La islanda nacia himno .....	249	Mi sur ĉeval' rapide .....	282
Al la virinoj.....	249	Viro kaj virino .....	282
Novjara himno .....	251	Pruntedono.....	282
Ekstazo.....	252	Priskribo de virino .....	283
Mia patrino.....	252	Kalumniado (Parafrazo).....	283
Rigardo al ĉarma islanda pejzaĝo.....	254	Ofte dum lumecaj noktoj helaj.....	283
El la Ombrulo.....	255	Tra l'ondoj de la vivomar' .....	284
Jón Thoroddsen:.....	257	Gestur Pálsson: .....	284
Strofoj pri korvo.....	257	La almozulino .....	284
Silvio .....	258	Hanso balanca.....	285
En bela val' .....	259	Grimo la komercisto mortas .....	289
Printempo.....	259	La ribelo en la bieno Brekka.....	305
Bela deklivo .....	260	Einar H. Kvaran:.....	309
El la romano Viro kaj virino .....	260	Pardono.....	309
Grímur Thomsen:.....	266	Seka vetero .....	315
La islanda kanto .....	266	Esperoj.....	320
Kordmagio .....	266	Þorgils gjallandi:.....	337
Minaco en dezerto .....	267	Hejmosopiro .....	337
Sunhejmosablo .....	268	Guðmundur Friðjónsson: .....	343
Kristján Jónsson: .....	268	La malnova fojnostako .....	343
La fantomo .....	268	Jón Trausti: .....	353
Frosta sur la tero .....	269	La marlupo.....	353
Strofo .....	270	Þorsteinn Erlingsson: .....	360
Hjálmar Jónsson:.....	271	La ter' ornamojn stebas .....	360
Morto de homo.....	271	La heredaĵo .....	360
Proksime je la morto .....	271	La kondiĉoj.....	361
Malakriĝas mia plum' .....	271	Nokto .....	362
Páll Ólafsson: .....	272	La bildo.....	363
Bark' de vivo likas jam .....	272	Bondola kasa.....	364
Strofo .....	272	Stephan G. Stephansson: .....	375
Strofoj el diversaj fontoj: .....	272	Mara magio.....	375
Lulkanto .....	272	Ĉu trans ter' aŭ ĉielo.....	376
Venas lumo .....	273	El Paŭzo de batalo .....	377

Káinn (Kristján N. Júlíus) .....	383	Karulin' ekdormu ni .....	398
La regemulo .....	383	Dormu, dormu, mia flor' .....	399
Nova lulilkanto.....	383	Lulkanto.....	399
Örn Arnarson: .....	383	Hejmsopiro .....	400
Tiam mi estis juna .....	383	Funebro.....	400
Multe kostas .....	386	Einar Benediktsson: .....	401
Maro, blua maro.....	386	Jen alportas de l'Temp' .....	401
Jakob Thorarensen: .....	386	La granda tago .....	402
Renaskiĝo.....	386	Prujno .....	404
Guðmundur Guðmundsson: .....	391	Oceano.....	404
Printempa feino .....	391	Ora nubo .....	407
Hulda:.....	391	Stefán frá Hvítadal:.....	410
Arbara kvieto .....	391	Erla .....	410
Se estus mi Aŭrora .....	391	Dipatrino.....	411
Sigurður Sigurðsson frá Arnarholti:.....	393	Davíð Stefánsson: .....	412
Hodiaŭ.....	393	Iris mi sola .....	412
Jóhann Gunnar Sigurðsson: .....	394	Panjo volas ekdormi .....	413
Printempa saluto.....	394	Abba-labba-lu .....	413
Vesperpreĝo .....	394	Abalabalaŭ.....	414
Mi amis .....	394	Lumu, lumturoj!.....	415
Jóhann Jónsson: .....	395	Eksilentis la ŝpiniloj.....	415
Sopiro.....	395	La grundo dormas .....	415
Postperda sopiro.....	396	La forĝejestro.....	416
Jón Thoroddsen:.....	397	Sigurbjörn Sveinsson:.....	418
La perlo .....	397	Trans la riveron.....	418
Jóhann Sigurjónsson: .....	398		

## El la Libro de ekloĝo

En la kroniko, kiun verkis Beda pastro la sankta, estas menciita tiu insulo, kiu nomiĝas Thile kaj surlibre estas dirite ke kuŝas sestagan veladon al nordo de Britujo; tie li diris ke ne venas tago dumvintre kaj ne nokto dumsomere, kiam la tagoj estas plej longaj. Pro tio saĝuloj opinias ke Islando estas nomita Thile, ke estas tiel multloke en la lando, ke la suno brilas dum la noktoj, kiam la tagoj estas plej longaj, sed estas tiel en multaj lokoj dumtage, ke oni ne vidas la sunon, kiam la noktoj estas plej longaj. Sed Beda pastro mortis sep cent tridek-kvin jarojn post la enkarniĝo de nia Dio, laŭ kio estas skribita, kaj pli ol cent jarojn antaŭ ol Islando estis enloĝata de Norveganoj.

Sed antaŭe ol Islando estis ekloĝata el Norvegujo estis tie la homoj, kiujn Norveganoj nomas Papoj; ili estis kristanaj, kaj oni opinias, ke ili devenis el okcidento trans la maro (t.e. el Irlando, norvega parolturno), ĉar troviĝis post ili irlandaj libroj, sonoriloj kaj episkopaj sceprotoj kaj ankaŭ aliaj objektoj, laŭ kiuj oni povis diveni, ke ili estis Okcidentuloj. Preter tio estas menciata sur anglaj libroj ke tiutempe oni veturis inter la landoj. — — —

Tiel diras saĝaj homoj, ke el Norvegujo ĉe Staður estas septaga velado okcidenten al Horn en la orienta Islando, sed el Snæfellsnes, kie estas plej mallonga, estas kvartaga velado okcidenten al Groenlando. Sed estas dirite, se oni veladas el Bergeno direkte okcidenten al Hvarf en Groenlando, ke tiam oni iras duontagan veldaddistancon sude de Islando. El Reykjanes en la suda Islando estas kvintaga velado suden al Jölduhlaup en Irlando, sed el Langanes en la norda Islando estas kvartaga velado norden al Svalbardi (Spicbergeno) je la fino de la maro.

Tiel estas dirita, ke iuj viroj iros el Norvegujo al la Faraoj insuloj; kelkaj diras ke estis la vikingo Naddoddur; ili estis ventpelataj okcidenten en la maron kie ili trovis grandan landon. En la orientaj fjordoj ili suprengrimpis altan monton, de kie ili rigardis multloken, ĉu videblis fumo aŭ aliaj signoj de homa loĝado, kaj tion ili ne vidis. Ili reiris en la aŭtuno al la Faraoj insuloj; kaj kiam ili forvelis de la lando falis multe da neĝo sur montojn, kaj pro tio ili nomis la landon Snæland (Neĝlando). Ili tre laŭdis la landon. — — —

Viro estis nomita Garðar Svavarsson, el sveda deveno; li iris serĉi Snæland laŭ la konsilo de sia antaŭvidebla patrino. Li surbordiĝis oriente de la orienta Horn; tie estis haveno tiutempe. Garðar veladis ĉirkaŭ la landon, kaj eltrovis ke ĝi estas insulo. Dum la vintro li restis norde en Húsavík ĉe Skjálfandaflói, kaj konstruis tie domon. En la printempo, kiam li estis preta surmaren, ŝiriĝis for de li viro en boato, kiu nomiĝis Náttfari, kaj sklavo kaj sklavino. Li loĝigis sin poste en loko nomita Náttfaravík (Golfeto de Náttfari). Garðar tiam iris al Norvegujo kaj tre laŭdis la landon. — — — Post tio oni nomis la landon Garðarshólmur (Insuleto de Garðar), kaj estis tiam arbaro inter montoj kaj marbordoj.

Flóki Vilgerðarson nomiĝis viro; li estis granda vikingo; li iris serĉi Garðarshólmur. — — — Kun Flóki estis surŝipe tiu bienulo kiu nomiĝis Þórólfur, alia estis Herjólfur. Faxi nomiĝis Sudinsulano (Hebrid-insulano) kiu estis tie sur la ŝipo. Flóki kunportis tri korvojn surmaren, kaj kiam li liberigis la unuan ĝi forflugis reen; la dua flugis aeren kaj denove ŝipen; la tria antaŭenflugis en la direkton kie ili trovis la landon. Ili alvenis el oriente ĉe Horn kaj veladis laŭ la suda bordo. Sed kiam ili veladis okcidenten preter Reykjanes kaj malfermiĝis la fjordo, tiel ke ili vidis Snæfellsnes, tiam diris Faxi:

– Tio certe estas vasta lando, kion ni trovis; ĉi-tie estas grandaj riveroj.

De tiam ĝi estas nomita Faxeós (nuntempe Faxaflói). Flóki kaj liaj ŝipanoj veladis trans Breiðafjörður kaj surbordiĝis kie nomiĝas Vatnsfjörður ĉe Barðaströnd. Tiam la fjordo estis plena da fiŝoj, kaj pro okupiteco pri fiŝkaptado ili ne atendis kolekti fojnon, kaj mortis la tuta ilia brutaro dum la vintro. La printempo estis iom malvarma. Tiam Flóki supreniris altan monton kaj vidis norden trans la montoj fjordon plenan da arkta glacio; pro tio ili nomis la landon Islando (Glacilando), kiel ĝi de tiam nomiĝas. Flóki kaj liaj kunuloj intencis foriri dum la somero kaj estis pretaj mallonge antaŭ la vintro. Ili ne sukcesis veladi preter Reykjanes, kaj la boato ŝiriĝis for de ili, kaj sur ĝi Herjólfur; li alboridiĝis tie kie nun nomiĝas Herjólfshöfn (Haveno de Herjólfur). Flóki restis dum la vintro en Borgarfjörður, kaj ili trovis Herjólfur. La venontan someron ili veladis al Norvegujo. Kaj kiam oni demandis pri la lando, tiam Flóki mallaŭdis ĝin, sed Herjólfur rakontis pri avantaĝoj kaj difektoj tie, sed Þórólfur diris, ke falas butero de ĉiu herbero en la lando kiun ili trovis; pro tio oni nomis lin Þórólfur butero.

Björnólfur nomiĝis viro, sed alia Hróaldur; ili estis la filoj de Hrómundur Gripsson; ili forlasis Þelamörk (regiono en Norvegujo) pro hommortigoj kaj loĝigis sin en Dalsfjörður en Fjalir. La filo de Björnólfur estis Örn, la patro de Ingólfur kaj Helga, sed la filo de Hróaldur estis Hróðmar, la patro de Leifur.

La ĵurfratoj Ingólfur kaj Leifur iris militadi kun la filoj de Atli jarlo la svelta el Gaular, Hásteinn kaj Hersteinn kaj Hólmsteinn. Ili bone interkonsentis, kaj reveninte hejmen ili decidis kuniri denove la sekvantan someron. Sed en la vintro la ĵurfratoj invitis la filojn de la jarlo al festeno. Je tiu festeno Hólmsteinn ĵure deklaris, ke li edzinigos Helga, la filino de Örn, aŭ neniun alian virinon. Oni ne tre ŝatis tiun ĵuron, sed Leifur ruĝiĝis videble, kaj li kaj Hólmsteinn ne disigis amike kiam finiĝis la festeno.

En la printempo la ĵurfratoj preparis sin por militado kaj intencis renkonti la filojn de Atli jarlo. Ili troviĝis ĉe Hísargafi; tie Hólmsteinn kaj liaj fratoj tuj ekis batalon kontraŭ Leifur kaj liaj kunuloj. Sed kiam ili jam bataladis dum iom da tempo alvenis Ölmóður la olda, la filo de Hörða-Kári, parenco al Leifur, kaj subtenis lin kaj Ingólfur. En tiu batalo Hólmsteinn estis mortigata, sed forfuĝis Hersteinn.

Post tio Leifur kaj la aliaj iris militadi. Sed dum la venonta vintro Hersteinn iris al Leifur kaj ties grupo intence mortigi ilin, sed ili informiĝis pri lia vojaĝo kaj kolektis trupon kontraŭ li. Estiĝis ankoraŭfoje granda batalo, kaj tie Hersteinn estis mortigata. Post tio venis multnombre al la ĵurfratoj iliaj amikoj el la regiono Firðafylki. Tiam estis sendataj homoj al Atli jarlo kaj Hásteinn por proponi repaciĝon, kaj oni interkonsentis je tio, ke Leifur kaj Ingólfur pagis siajn posedaĵojn al ili.

Sed la ĵurfratoj preparis grandan ŝipon, kiun ili havis, kaj iris serĉi la landon, kiun Hrafna-Flóki (Korv-Flóki) trovis kaj kiun oni tiam nomis Islando. Ili trovis la landon kaj restis en Álftafjörður la pli suda. Al ili ŝajnis ke la lando estis pli bona sude ol norde. Ili restis unu vintron enlande kaj reiris tiam al Norvegujo.

Post tio Ingólfur aranĝis iliajn havaĵojn por ekloĝo en Islando, sed Leifur militadis okcidenten. Li atakis en Irlando kaj trovis tie grandan subteran enloĝejon. Li eniris ĝin, kaj estis mallume tie ĝis lumiĝis el glavo kiun unu viro portis. Leifur mortigis tiun viron kaj forprenis la glavon kaj multe da mono de li; post tio oni nomis lin Hjörleifur (Glav-Leifur). Hjörleifur militadis multloke en Irlando kaj havigis al si multe da mono; tie li kaptis dek sklavojn, kiuj nomiĝis Dufþakur kaj Geirröður, Skjaldbjörn,

Halldór kaj Drafdittur; pliaj ne estas nomitaj. Sed post tio Hjörleifur reiris al Norvegujo kaj renkontis sian ĵurfraton, Ingólfur. Li antaŭe estis edzinigita Helga, la fratino de Ingólfur.

Tiun vintron Ingólfur okazigis grandan oferfestenon por la paganaj idoloj kaj serĉis bonon por siaj futuraj sortoj, sed Hjörleifur neniam volis oferi. La aŭguro indikis al Ingólfur ke li iru Islandon. Post tio ambaŭ el la du bofratoj preparis sian ŝipon por vojaĝo al Islando; Hjörleifur portis sian militkaptajon surŝipe, sed Ingólfur iliajn komunajn posedaĵojn, kaj ili forvelis surmaren kiam ili estis preparitaj.

Tiun someron, kiam Ingólfur kaj liaj kunuloj iris por ekloĝi en Islando, Haraldur la belhara jam estis dek-du jarojn reĝo en Norvegujo; tiam jam pasis de la komenco de tiu mondo ses mil vintroj kaj sep dekoj kaj tri vintroj, sed de la enkarniĝo de nia Dio okcent jaroj kaj sep dekoj kaj kvar jaroj. Ili veladis kune, ĝis kiam ili vidis Islandon; tiam ili disigiĝis.

Kiam Ingólfur vidis Islandon li metis enmaren siajn honorseĝajn kolonojn por sia bonfarto; li diris ke li loĝigos sin tie kie ili surbordiĝos. Ingólfur albordiĝis tie kie nun nomiĝas Ingólfshöfði (Terkapo de Ingólfur), sed Hjörleifur estis pelata okcidenten laŭlande. – – – Hjörleifur albordiĝis ĉe Hjörleifshöfði (Terkapo de Hjörleifur), kaj estis tie fjordo tiutempe, kaj la fjorda malfermaĵo estis ĉe la terkapo.

Hjörleifur konstruigis tie du halojn, kaj unu el la ruinoj longas dek-ok klaftojn sed alia dek-naŭ. Hjörleifur restadis tie dum la vintro. Sed en la printempo li volis semi; li havis unu bovon, kun ĝi li igis la sklavojn tiri la plugilon. Sed kiam Hjörleifur kaj la aliaj estis ĉehale, tiam Dufþakur ekkonspiris ke ili mortigu la bovon kaj diru ke urso ĝin mortigis, sed poste ili ataku Hjörleifur kaj al aliajn dum ili serĉos la urson. Post tio ili rakontis tion al Hjörleifur. Kaj kiam ili iris por serĉi la urson kaj disigis sin en la arbaro, tiam la sklavoj atakis ilin unuope kaj mortigis ĉiujn, samnombre al si mem. Ili forfuĝis per iliaj edzinoj kaj moveblaĵoj kaj la boato. La sklavoj iris en la insulojn, kiujn ili vidis enmare sudokcidenten, kaj restis tie dum iom da tempo.

Vífill kaj Karli estas nomitaj du sklavoj de Ingólfur. Ilin li sendis okcidenten laŭ la bordo por serĉi siajn honorseĝajn kolonojn. Sed ventante al Hjörleifshöfði ili trovis Hjörleifur morta. Tiam ili reiris kaj rakontis al Ingólfur tiun novaĵon; li malĝojiĝis pro la



mortigo de Hjörleifur kaj la aliaj. Post tio Ingólfur iris okcidenten al Hjörleifshöfði, kaj vidante Hjörleifur morta li diris:

– Maldece finiĝis ĉi-tie por noblanimulo, mortigata de sklavoj, kaj mi vidas ke tiel finiĝos ĉiu kiu rifuzas oferi al la idoloj.

Ingólfur igis ke oni enterigu Hjörleifur kaj liajn kunulojn, kaj aranĝu pri ilia ŝipo kaj havaĵoj.

Ingólfur tiam supreniris la terkapon kaj vidis insulojn kuŝante sudokcidente en la maro; la ideo frapis lin, ke ili forfuĝis tien, ĉar la boato ne estis tie; tiam ili iris serĉi la sklavojn kaj trovis ilin en loko nomita Eiði en la insuloj. Ili estis manĝantaj kiam Ingólfur kaj lia trupo venis al ili. Ili ektimis kaj forkuris en ĉiujn direktojn. Ingólfur mortigis ĉiun el ili. Nomiĝas Dufþaksskor (Ravineto de Dufþakur) kie li mortis. Pliaj sin ĵetis el klifoj, kie estis nomata laŭ ili poste. Vestmannaeyjar (Insuloj de Okcidentuloj) oni nomigas la insulojn de tiam, ĉar ili estis Okcidentuloj. Ingólfur kaj lia trupo forportis la edzinojn de la mortigitoj; ili tiam reiris al Hjörleifshöfði; tie Ingólfur restadis la duan vintron. Sed la sekvantan someron li vojaĝis okcidenten laŭ la maro. La trian vintron li restadis sub Ingólfsfjall (Monto de Ingólfur) okcidente de la rivero Ölfusá. Je tiu tempo Vífill kaj Karli trovis liajn honorseĝajn kolonojn ce Arnarhváll (nun en la mezo de Rejkjaviko, tie staras statuo de Ingólfur), trans la montebenaĵo.

Ingólfur iris en la printempo trans la montebenaĵon; li ekloĝis tie kie liaj honorseĝaj kolonoj albordiĝis; li loĝis en Rejkjaviko; ankoraŭ troviĝas tiuj honorseĝaj kolonoj tie en la ĉefa halo. Sed Ingólfur posedprenis la landon inter Ölfusá kaj Hvalfjörður (Balena fjordo). – – –

Ingólfur estis la plej fama el ĉiuj ekloĝantoj, ĉar li alvenis ĉi-tien al neloĝata lando kaj estis la unua kiu faris sian hejmon enlande; tion aliaj ekloĝantoj faris laŭ lia ekzemplo. La edzino de Ingólfur estis Hallveig Fróðadóttir, la fratino de Loftur la olda; ilia filo estis Þorsteinn, kiu fondis la juĝan kunsidon en Kjalarnes, antaŭ ol oni starigis la parlamentan Alþingi. La filo de Þorsteinn estis Þorkell luno, leĝodiristo (la ĉefa kaj sola oficulo en la antikva respubliko, li recitis laŭte la leĝojn en la Alþingi), kiu estis unu el la plej belkonduktaj paganuloj pri kiuj oni konas ekzemplojn. Li portigis sin en sunradion en sia mortiga malsano kaj transdonis sin en la manojn de tiu dio kiu kreis la sunon; li ankaŭ vivis tiel pure kiel tiuj kristanoj kiuj plej bone kondukas.

## **Ari la saĝa:**

### **El la Libro de Islandanoj**

Sed kiam Islando estis multloke enloĝata, tiam unu orienta viro (t.e. el Norvegujo) alportis ĉi-tien la unua leĝojn el Norvegujo, li nomigis Úlfjljótur. --- Úlfjljótur loĝis oriente en Lón. Sed tiel estas dirite, ke Grímur kaproharo estis lia ĵurfrato, tiu kiu priesploris tutan Islandon laŭ lia konsilo antaŭe ol oni starigis la Alþingi. Sed al li donis ĉiu homo enlande moneron pro tio, sed li poste donis tiujn monojn al paganaj temploj.

Alþingi (la leĝdona parlamento en Þingvellir) estis fondata laŭ la konsento de Úlfjljótur kaj ĉiuj enlandanoj tie kie ĝi nun estas, sed antaŭe estis kunsido en Kjalarnes, tiu kiun Þorsteinn, filo de Ingólfur ekloĝanto – la patro de Þorkell luno, la leĝodiristo – havis kaj tiuj potenculoj kiuj venis tien. Sed unu viro ekziliĝis pro la murdo de sklavo aŭ ekssklavo, tiu kiu havis landon en Bláskógar (Bluaj arbaroj, nun Þingvellir). --- Tiu lando poste fariĝis komuna posedaĵo, kaj ĝin la enlandanoj tenis por uzado por la Alþingi. Pro tio permesiĝas al ĉiu ajn kolekti brullignon en arbaroj tie kaj uzi la stepojn kiel paŝtejo por ĉevaloj. ---

La lando, kio nomiĝas Groenlando, estis trovata kaj enloĝata el Islando. Eiríkur la ruĝa nomiĝis viro el Breiðafjörður, kiu iris tien de ĉi-tie, kaj ekloĝis tie kie de tiam estas nomita Eiríksfjörður (Fjordo de Eiríkur). Li donis nomon al la lando, kaj nomis ĝin Groenlando (Verdlando), kaj diris ke homoj pli volonte iros tien se ĝi havas bonan nomon. Ili trovis tie homajn loĝejojn, kaj oriente kaj okcidente en la lando, kaj partojn el boatoj, kaj prilaboritajn ŝtonojn, laŭ kio oni eksciis ke tie loĝis samspecaj homoj kiel tiuj kiuj enloĝis Vinlandon kaj Groenlandanoj nomas Skrælingjar (t.e. Eskimoj). Sed tio okazis, ke li ekloĝis la landon, kvardek vintrojn aŭ kvindek antaŭe ol la kristana religio venis ĉi-tien en Islandon. ---

Reĝo Ólafur, filo de Tryggvi, la filo de Ólafur la filo de Haraldur la belhara, enkondukis kristanismon en Norvegujo kaj Islando. Li sendis ĉi-tien enlanden pastron, kiu nomiĝis Þangbrandur kaj predikis kristanismon al homoj kaj baptis ĉiujn

adeptintojn. Sed Hallur en Síða, filo de Þorsteinn, baptiĝis frue, kaj Hjalti, filo de Skeggi, el Þjórsárdalur, kaj Gissur la blanka, filo de Teitur, la filo de Ketilbjörn el Mosfell, kaj multaj aliaj altranguloj; sed estis tamen pli multaj kiuj kontraŭstaris kaj rifuzis. Sed kiam li jam restadis ĉi-tie dum unu vintro aŭ du, tiam li foriris kaj antaŭe li mortigis ĉi-tie du virojn aŭ tri, kiuj misfamigis lin. Sed li rakontis al la reĝo Ólafur, kiam li venis orienten, pri ĉio kio malhelpis lin ĉi-tie, kaj tre malopiniis ke ĉi-tie iam ajn enkondukos kristana religio. Sed li tre kolerigis pro tio, kaj intencis igi vundigataj aŭ mortigataj niajn samlandanojn, kiuj tiutempe estis tie oriente. Sed la saman someron venis tien el ĉi-tie Gissur kaj Hjalti, kaj elminaciigis ilin de la reĝo, kaj promesis al li sian pritrakton denove, ke oni akceptos la kristanan religion, kaj esprimis sian opinionon ke tiel fariĝos.

Sed la venontan someron ili iris el oriente, kaj tiu pastro kiu nomiĝis Þormóður, kaj alvenis en Vestmannaeyjar. — — — Sed ili tuj iris al la ĉeflando kaj poste direkte al Alþingi, kaj aranĝis ke Hjalti restu en la Laugardalur (Varmakva valo) kun dekunu viroj, ĉar li antaŭe fariĝis ekzilanto la pasintan someron en Alþingi pro idolblasfemo. Sed la kaŭzo de tio estis ke li elparolis en Lögberg (la ĉefa parolada loko en Alþingi) tiun strofparton:

Mi ne volas moki la idolojn,  
sed hundino ŝajnas al mi Freyja.  
(*Freyja, unu el la diinoj en la Asreligio.*)

Sed Gissur kaj lia grupo iris ĝis ili atingis la lokon ĉe la lago Ölfusvatn kiu nomiĝas Vellankatla, kaj de tie ili sendis mesaĝon al la Alþingi ke alvenos al ili ĉiuj iliaj subtenantoj, ĉar ili informiĝis ke iliaj malamikoj intencos armile malhelpi ilian alvenon parlamenten. Sed antaŭ ol ili foriris de tie venis tien rajdante Hjalti kaj tiuj kiuj restis kun li.

Sed post tio ili rajdis en la parlamentan lokon, kaj antaŭe venis al ili amikoj kaj parencoj iliaj, kiel ili petis. Sed la paganuloj kolektiĝis plenarmitaj, kaj estis ege proksime ke la du grupoj interbatalus.

Sed en la dua tago post tio Gissur kaj Hjalti iris al Lögberg kaj ekparolis tie pri sia komisiono. Estas dirite ke estis bonegaj iliaj paroladoj. Sed pro tio rezultis ke ĉiu homo atestantigis alian, kaj ambaŭ disrompis la leĝajn ligojn kun la alia, la kristanoj kaj la paganoj, kaj foriris je tio de la Lögberg. Tiam la kristanoj petis Hallur en Síða ke li

eldiru ilian leĝaron, tiun kiu sekvu la kristanan religion. Sed li senigis sin de tio, pagante al Þorgeir la leĝodiristo por ke li eldiru, sed li tiam ankoraŭ estis pagana.

Sed post kiam ĉiuj estis en siaj budoj, tiam li ekkuŝis sin, Þorgeir, kaj sternis sur sin sian pelton kaj kuŝis la tutan tagon kaj la postan nokton kaj elparolis neniun vorton. Sed la venontan matenon li ekstaris kaj elsendis alvokon ke ĉiuj iru al la Lögberg.

Sed tiam li komencis sian paroladon, kiam ĉiuj estis tie, kaj diris ke ŝajnas al li ke fariĝas malbona situacio se ĉiuj homoj ne estus ligitaj de la samaj leĝoj ĉi-lande, kaj li multmaniere instigis ke tiel ne okazu, kaj diris ke el tio sekvos malamikeco, tre verŝajne kaŭzonte tiajn batalojn ke la lando sekve fariĝos neloĝata. Li rakontis pri tio, ke reĝoj el Norvegujo kaj el Danujo malamikis kaj interbatalis longtempe, ĝis la landanoj decidis ke ili pacigu, kvankam ili ne volis tion mem. Sed tiu decido kaŭzis ke post mallonga tempodaŭro ili donis altvaloraĵojn al unu la alia, kaj restis paco dum ambaŭ vivis.

– Sed nun ŝajnas al mi racie, li diris, – ke ni ankaŭ ne lasu decidi tiuj kiuj volas plej opozicii, sed kompromisu tiamaniere inter ili ke ambaŭ ricevos ion, kaj ni havos unu leĝaron kaj unu religion. Ni trovos ke estos la vero, ke disrompante la leĝaron ni ankaŭ disrompos la pacon.

Sed li finis sian paroladon je tio, ke ambaŭ partoj konsentis obei al unu leĝaro, tiu kiun li eldiru. Tiam estis decidate en leĝoj ke ĉiuj homoj devos esti kristanaj, kaj baptitaj tiuj kiuj antaŭe estis nebaptitaj en la lando; sed pri elmetado de beboj daŭrige validu la antikvaj leĝoj, kaj pri manĝado de ĉevalviando. Estu permesata oferi al la idoloj sekrete, se oni volas, sed puninda per trijara ekzilo se atestantoj ĉeestas. Sed post kelkaj vintroj oni aboliciis tiun paganecon kiel la aliajn. – – – Tio okazis – – – mil vintrojn post la naskiĝo de Kristo laŭ popola kalkulado.

*(Eysteinn Sigurðsson)*

## Völuspá

1 Aŭskulton mi petas  
de dioj sanktaj,  
de altaj, nealtaj  
filoj de Heimdallr;

Vi celas, Valföör,  
al rakontoj praaj,  
la plej antikvaj,  
kiujn mi memoras.

2 Memoras mi gigantojn,  
naskitajn en pratempo,  
kiuj fruepoke  
min nutris eduke;  
naŭ memoras mondojn  
mi kaj naŭ radikojn,  
ankoraŭ dum sin kaŝis  
Mondarbo sub tero.

3 Antaŭ mondiĝo  
mastris malesto,  
mankis sablo  
kaj malvarmaj ondoj,  
ter' ne troviĝis  
nek ĉielvolbo,  
vako estis vasta  
kaj herbo nenie,

4 Ĝis landojn levis  
la filoj de Bur,  
ili, kiuj formis  
la faman Miðgarðr;  
suno el sudo  
sur salajn ŝtonojn  
brilis, kaj grundon  
garnis herboj.

5 Diŝjetis suno,  
de luno kompano,  
el sud' per man' dekstra  
radiojn ĉielvaste,  
ne sciis suno  
irejojn siajn,  
ne sciis luno  
potencon sian,  
ne sciis steloj  
staciojn siajn.

6 La regaj potencoj,  
dioj supersanktaj,  
tiam siajn tronojn

ascendis por konsiloj;  
al nokto kaj ties idoj  
ili nomojn donis,  
matenon ili nomis  
kaj tagomezon,  
postmezon kaj vesperon  
por nombri la jarojn,

7 Ĝis tri alvenis  
el tiu trupo,  
fortaj kaj favoraj  
Asoj al la maro,  
trovis sur bordo  
Askr kaj Embla,  
feblajn, senfortajn  
kaj sortomankajn.

8 Ĉi tiuj nek spiron  
nek racion havis,  
ne harojn, ne parolon,  
nek belan aspekton;  
spiron donis Óðinn,  
racion Hæmir,  
harojn Lóðurr  
kaj belan aspekton.

9 Kunvenis Asoj  
sur Iðavöllr,  
starigis altajn  
sanktejojn, templojn,  
forĝejojn faris  
ornamaĵojn modlis,  
prenilojn formis  
kaj instrumentojn.

10 Gajaj sur herbkampo  
ludis damludon.  
El or' faritaĵoj  
al ili ne mankis,  
ĝis venis potencaj,  
gigant-devenaj,  
tri junulinoj  
el Jötunheimar.

11 Memoras ŝi l'unuan  
batalon en la mondo,

kiam kontraŭ Gullveig  
ili lancojn alpikis,  
kaj en hal' de Hár  
ŝin brule mortigis,  
trifoje bruligis  
la trifoje naskitan,  
ofte, refare,  
ŝi tamen vivas.

12 Ili nomis ŝin Heiðr  
kie ajn ŝi venis,  
sorĉistino trompema,  
magion ŝi aplikis,  
sorĉis ajnloke,  
la diojn frenezigis,  
ĉiam ŝi ravis  
malpiajn virinojn.

13 La regaj potencoj,  
dioj supersanktaj,  
tiam siajn tronojn  
ascendis por konsiloj,  
ĉu la Asoj suferu  
grandajn perdojn,  
aŭ ĉu la dioj  
ricevu rebonigon.

14 Alĵetis Óðinn  
lancon super l' armeo,  
estis jam milito  
l'unua en la mondo;  
rompita estis  
remparo diurba,  
kampon trakuris  
Vanir sorĉpove.

15 La regaj potencoj,  
dioj supersanktaj,  
tiam siajn tronojn  
ascendis por konsiloj,  
kiu per falsoj  
l'aeron difektis  
aŭ promesis doni  
Freyja al la gigantoj.

16 Þórr sola batalis,

ŝvelinta pro kolero,  
li neofte malfaremas  
je tiaj eventoj;  
ĵuroj rompiĝis,  
promesoj sanktaj,  
ĉiuj kontraktoj  
antaŭe faritaj.

17 Arbon mi konas,  
nomiĝas Yggdrasill,  
altarbo, priverŝata  
per koto blanka;  
el tio venas roso  
falanta en valojn,  
staras ĉiam-verda  
ĉe la Fonto de Urĉr.

18 Devenas junulinoj,  
multon sciantaj,  
tri el tiu fonto,  
kiu sub arbo kuŝas;  
leĝojn ili establis  
kaj sortojn de homoj,  
longojn determinis  
por vivdaŭro ilia.

19 Pri aŭdpovo deponita  
de Heimdallr ŝi scias,  
kie ĝi teniĝas  
sub la sankta altarbo;  
riveron ŝi vidas  
kote kaskadi  
ĉe l' deponaĵ' de Óðinn.  
Scias vi jam – aŭ ĉu?

20 Solis ŝi ekstere  
je ven' de l' antikva  
Antaŭtimul' de l' Asoj,  
li l' okulojn enrigardis.  
Kion vi serĉas?  
Kial instigas?  
Scias mi, kie  
vi kaŝis l' okulon,  
en la plej fama  
Fonto de Mímir!  
Med-trinkas li matene



el tie kie kuŝas  
la deponaĵ' de Valföðr.  
Scias vi jam – aŭ ĉu?

21 Elektis por ŝi Herföðr  
ringojn kaj kolĉenojn,  
ŝi redonis saĝvortojn,  
magiajn antaŭdirojn,  
vidis vast-vaste  
super ĉiuj mondoj.

22 Ŝi vidis valkiriojn  
el distanc' venintajn,  
pretajn alrajdi  
al la regno de Gotoj;  
Hildr tenis ŝildon,  
kaj Skögun samfare,  
Gunnr kaj Göndul  
kaj Geirskögun.

23 Mi vidis finsorton  
de Baldr, sanganta,  
dio fatsufera,  
filo de Óðinn,  
staris kreskinta  
alte super kampoj,  
svelta kaj belega  
visko fatala.

24 El tiu arbkreskaĵo,  
tiele maldika,  
mortiga lanc' fariĝis  
en la man' de Höðr;  
ekploris Frigg  
en Fensalir  
pro l'aflikto de Valhöll.  
Scias vi jam – aŭ ĉu?

25 Ĉeniton ŝi vidis  
ĉe Hveralundr  
al Loki alsimilan,  
la ruz-artifika,  
sidas tie Sigyn  
nun ĝojomanka  
apude de l'edzo.  
Scias vi jam – aŭ ĉu?

26 El orient' rivero  
tra venen-valoj fluas  
de glavoj plen-plena,  
nomiĝas Slíðr.

27 Disde la suno  
ŝi halon vidis,  
starantan sur Náströnd  
kun pordo kontraŭ nordo;  
gutoj de veneno  
tra fumtruo falas,  
privolvas tiun halon  
spinoj de serpentoj.

28 Ŝi tie vidis vadi  
tra rapidaj fluoj  
de ĵuroj rompintojn  
kaj murdemulojn,  
kaj tiujn ruz-logintajn  
edzinojn de aliaj,  
suĉas tie Níðhögg  
korpojn kadavrajn,  
disŝiras homojn Lupo.  
Scias vi jam – aŭ ĉu?

29 Sur teramaso sidis  
harpon lud-frapante  
de gigantin' paŝtisto,  
Eggbér gajogesta,  
super tiu kriis  
sur arbo pendumila  
koko helruĝa,  
kies nom' estas Fjalarr.

30 Kriis super la Asoj  
Gullinkambi,  
kiu heroojn vekas  
ĉe Herjaföðr;  
sed alia kriis  
el sub la tero,  
fulgruĝa koko  
en la haloj de Hel.

31 Bojas laŭte Garmr  
antaŭ Gnipahellir;

rompiĝos kateno  
kaj la Lup' elkuros;  
multon mi scias,  
futuraĵon mi vidas,  
la juĝon elfinan  
pri venkemaĵoj.

32 Fratoj interbatoj,  
fariĝos murdintoj,  
nevoj pritrompos  
siajn proprajn parencojn,  
misas en mondo,  
adultoj ege oftas,  
glavtempas, hakiltempas,  
fendiĝas ŝildoj,  
ventblovas, lupsvarmas,  
antaŭ fal' de l'mondo,  
neniu homo  
alian indulgos.

33 La filoj de Mímir  
libere disvagumas,  
detru' anonciĝas  
per la akra Gjallarhorn;  
Heimdallr laŭtblovas,  
tenas kornon alte,  
konsultas Óðinn  
la kapon de Mímir.

34 Tremas Yggdrasil,  
frakseno tamen staras,  
l'antikva arbo ĝemas  
kaj gigantoj liberiĝas;  
de timego suferas  
ĉiuj uloj ĉe Hel,  
ĝis konsumas tiun  
parenco de Surtr.

35 Kio pri la Asoj?  
Kio pri la elfoj?  
Muĝtremas Jötunheimr,  
kunsidas la Asoj,  
ĝemas nanoj  
antaŭ ŝtonpordegoj,  
reĝoj de rokoj.  
Scias vi jam – aŭ ĉu?

36 Bojas laŭte Garmr  
antaŭ Gnipahellir;  
rompiĝos kateno  
kaj la Lup' elkuros;  
multon mi scias,  
futura mi vidas,  
la juĝon elfinan  
pri venkemaj dioj.

37 El orient' veturas  
Hrymr ŝildportanta,  
turniĝas Jörmungandr  
demon-furioze;  
ondrapas serpento,  
kriega aglo,  
ŝiras kadavrojn Niðfölr,  
Naglfar liberflosas.

38 El orient' navigas  
Kil' kaj trans la maron  
venas la hord' de Múspell  
sub gvido de Loki;  
kuniras demonoj  
ĉiuj post la Lupo,  
ilin akompanas  
la frato de Býleistr.

39 El sudo venas Surtr  
kun detruil' de branĉoj,  
ekbrilas sunlumo  
sur lia militglavo;  
gigantoj stumblas,  
en morton paŝas homoj,  
kaj ĉielo fendiĝas.

40 Bojas laŭte Garmr  
antaŭ Gnipahellir,  
rompiĝos kateno  
kaj la Lup' elkuros;  
multon mi scias,  
futura mi vidas,  
la juĝon elfinan  
pri venkemaj dioj.

41 Tiam de Hlín

dua aflikt' okazas,  
kiam Óðinn iras  
por batali kontraŭ l' Lupo,  
kaj la brila mortiginto  
de Beli kontraŭ Surtr,  
tiam mortfalos  
de Frigg la ĝojo.

42 Tiam venas Viðarr  
la granda fil' de Sigföðr,  
por batali kontraŭ  
la kadavraĵo-besto;  
per ambaŭ manoj  
li puŝas sian glavon  
al Lupo en la koron  
por venĝi la patron.

43 Venas tiam la glora  
filo de Hlóðyn,  
iras fil' de Óðinn  
batali la Serponton,  
en kolero frapas  
la protektant' de Miðgarðr,  
tiam ĉiuj homoj  
de l' Tero pereos,  
paŝas paŝojn naŭ  
la filo de Fjörgyn,  
mortvundita, tamen  
certa pri famo.

44 Suno nigriĝas,  
sinkas ter' en maron,  
la brilantaj steloj  
de l' ĉiel' malaperos.  
Furioze fajro  
englutas la Mondarbon,  
altegaj flamoj  
ĝis ĉiel' atingas.

45 Por la dua foj' ŝi vidas  
el maro leviĝi  
la teron renaskitan  
kaj freŝe verdan;  
falas kaskadoj,  
flugas aglo supre  
de l' monto kaj serĉas

fiŝojn por kapti.

46 Kunvenas la Asoj  
sur Iðavöllr  
kaj pri la Serpento  
potenca diskutas;  
memoras tie ili  
pri gravaj eventoj  
kaj pri l'antikvaj  
runoj de Fimbultýr.

47 Tie sur herbejo  
denove ili trovos  
mirindajn lud-tabulojn  
el oro faritajn,  
kiujn ili posedis  
en la tempo de l'prao.

48 Portos agroj  
nesemite grajnon,  
malĝojoj ĉiuj foriĝos  
je reveno de Baldr;  
Höðr kaj Baldr  
reloĝos en dihalo,  
antaŭe detruita.  
Scias vi jam – aŭ ĉu?

49 Halon ŝi vidas  
pli helan ol suno,  
el oro konstruitan  
starantan sur Gimlé;  
tie la meritaj  
homoj loĝos  
kaj por eterne  
feliĉon ĝuos.

50 Tiam la potenca  
alvenos por sia regno,  
tiu, kiu regos  
ĉion altdomine.

51 Venas tie la nigra  
drako flugante,  
la brila, de malsupre,  
el Niðafjöll,  
Flugas super kampoj

Niðhögr, portante  
kadavrojn en flugiloj.  
Nun je fin' ŝi sinkos.

*(Baldur Ragnarsson, reviziita traduko, antaŭe en  
Islandaj Pravoĉoj, Malmö 1964.)*

## Hávamál

1 Antaŭ ol pordon  
pasi en domon,  
taksu la kaŝojn,  
atentu la kaŝojn;  
ne multe vi scias,  
ĉu malamiko  
sidas sur benko embuske.

2 Sanon, gemastroj!  
Serĉis vin gasto!  
Kie li sidu kaj kiel?  
Li sentos inciton,  
se sur staplo da ligno  
li devos eldiri mesaĝon.

3 Li varmon bezonas,  
se li venis en domon  
kun kruroj fridaj de frosto.  
Veston kaj manĝon  
la viro bezonas,  
se li vagis sur monto kaj marĉo.

4 Akvon kaj tukon  
li trovi bezonas,  
se plaĉe vi petis al tablo,  
decan afablon  
vi devas montri  
kun parolo kaj lerta silento.

5 Vartu la scion,  
se vaste vi vojas,  
vi hejme vin helpas facile;  
flankrigardojn vi spertas,  
se vi scias nenion  
dum kune kun saĝaj vi sidas.

6 Pri propra scio

pavu neniŭ,  
prefere montru sin meza;  
se vi dece senfrazo  
domon alvenas,  
vi ne mankon de scio sentas.

7 Viro singarda,  
gaste veninta,  
sidas kaj takse observas,  
uzas l'okulojn,  
ankaŭ l'orelojn,  
tiel sin tenas la saĝa.

8 Feliĉa li,  
kiu laŭdajn vortojn  
aŭdas inter la homoj;  
vi tamen ne konas,  
ja kio sin kaŝas  
ene de ies brusto.

9 Feliĉa li  
kiu lernis mem  
juston kaj virtojn de l'vivo;  
ĉar misan konsilon  
multaj prenis  
laŭ urĝo de iu alia.

10 Pli bonan pezon  
ne portas viro  
ol multe da sana saĝo;  
ĝi en fremda korto  
pli karas ol oro,  
konsolo de senhavulo.

11 Pli bonan pezon  
ne portas viro  
ol multe da sana saĝo;  
pli aĉan voj-nutron  
vi ne kunprenas  
ol tro da trinko biera.

12 Ne bonas, kiel  
ja kredas multaj,  
biero por viro, vere;  
ju pli li trinkas  
des pli li trenas



de l'kapo la simplan saĝon.

13 Ardeo de forgeso  
gvatas drinkrondon,  
ĝi ŝtelas de l'viroj la saĝon;  
en ĝiaj plumoj  
mi perdis la sensojn  
gaste en domo de Gunnlöð.

14 Ebria mi iĝis,  
eĉ ege ebria,  
foje ĉe saĝa Fjalar;  
plej bona festo,  
se vi fine ĝin lasas  
sobra kun sanaj sensoj.

15 Saĝa kaj inda  
estu reĝido,  
sen timo li tiru la glavon;  
ĝoja, bonvola  
la viro sin tenu  
tute ĝis tago morta.

16 La povra ulo  
penas por vivi,  
evitas vokojn al lukto;  
sed aĝo ne donas  
al iu pacon,  
eĉ se ne gajnis lin glavo.

17 Gapas stultulo  
gaste veninta,  
jen mutas kaj jen murmuras;  
se gluto da trinko  
glitis tra-gorĝe,  
senhalte li brue babilas.

18 Scias nur viro  
kiu vaste vagis  
kaj multe en landoj migris,  
kial li bone  
bridu la langon  
kaj sciu kion li scias.

19 Medon ne ŝparu,  
sed multon ne trinku,

diru la decan aŭ mutu;  
neniu povas  
riproĉi vin, ke vi  
frue finas por dormi.

20 La vora viro  
sen volo moderi  
manĝas al si amarojn;  
ofte al viro  
la ventro kaŭzis  
ridon en gajaj rondoj.

21 Grego ĝust-hore  
hejmen ekiras  
kaj lasas la grasan greson;  
viro malsaĝa  
scias neniam  
mezuron de sia stomako.

22 Povrulo, mem  
mise kreita  
ĉiam je ĉiu ridas;  
li konas ne, kion  
li koni devus,  
proprajn misojn kaj mankojn.

23 Viro malsaĝa  
sin vekas dumnokte  
kaj pensas pri propraj zorgoj;  
li lace sin levas  
de l'lito matene,  
kaj zorgoj lin pezas plu.

24 Viro malsaĝa  
vante kredas  
je ĉiuj afablaj flatoj;  
li tute ne vidas,  
ke teksas retojn  
al li liaj lertaj kunuloj.

25 Viro malsaĝa  
vante kredas  
je ĉiuj afablaj flatoj;  
tamen li trovas  
en tingo starante,  
ke mankas apogaj pledoj.

26 Viro malsaĝa  
sentas sin saĝa  
sola en sia angulo;  
li tute ne trovas  
taŭgan respondon,  
se fremdaj faras demandon.

27 Viro malsaĝa,  
se li sidas kun homoj,  
prefere fermu la buŝon;  
ĉar lian nescion  
sentas neniun,  
se li sian buŝon bridas.

28 Saĝa li,  
kiu scias demandi  
kaj peri informon plu;  
ne eblas kaŝi  
jam kio disiĝis  
kaj estas inter la homoj.

29 Vortoj diritaj  
de viro klaĉema  
ne faras al iu fidon;  
lango rapida  
pene bridebla  
ofte alvokas veojn.

30 Ne metu al iu  
mokan rigardon,  
se ofte li iras gastin;  
sentas sin saĝa,  
kiu sidas sen taŭzoj,  
ĉar neniun metis demandojn.

31 Sentas sin saĝa,  
kiu savis sin for  
gasto mokinta gaston;  
li tute ne konas,  
kiun li mokis  
kaj ĝenis malĝustan viron.

32 Multaj amikoj  
senmanke fidelaj  
ĝis ili ĉe-estas festenon;

eterna malpaco  
povas ekesti,  
se gasto kverelas gaston.

33 Taŭge manĝu  
matenan manĝon  
antaŭ ol iri gaste;  
vi tiam ne sidos,  
malsate enuos  
kaj povas apenaŭ paroli.

34 Kurbas la vojo  
al vantaj amikoj  
eĉ se laŭ strata strio;  
sed rekta, senbara  
al bonaj amikoj,  
eĉ se en vasto sovaĝa.

35 Jam decas adiaŭ,  
vi devas ne resti  
tro longe en unu loko;  
kara sin turnas  
en teda, se iu  
ne lernis forlasi benkon.

36 Loĝo pli bonas,  
eĉ budo eta,  
en hejmo vi mastras mem;  
kun paro da kaproj  
kaj kovro ŝnurtraba  
vi ne devas migre almozi.

37 Loĝo pli bonas,  
eĉ budo eta,  
en hejmo vi mastras mem;  
sargas la koro,  
se kline vi devas  
almozi por ĉiu manĝo.

38 De viaj armiloj,  
viro, sur kampo  
ne iru eĉ unu paŝon;  
vi tute ne scias,  
ĉu sur via vojo  
vi devos vin glave gardi.

39 Ne tiel bonvolan  
viron mi vidis,  
ke ne li akceptis donacon,  
nek tiel malzorgan,  
pri sia havaĵo,  
ke ne danke li prenis pagon.

40 Sian havaĵon  
zorge ŝparitan  
la viro ne kovu en kesto;  
vi planas ĝojigon,  
sed prenas ne indaj,  
ofte ne iras laŭ plano.

41 Per armiloj kaj vestoj  
amikon ĝojigu,  
ĉar tiujn li povas porti;  
per donoj egalaj –  
daŭraj amikoj,  
se akordas aliaj rilatoj.

42 Al via amiko  
vin montru amike,  
decas dono por dono;  
ridon por rido  
reen prezentu,  
falson faru por falso.

43 Al via amiko  
vin montru amike,  
kaj tiel al ties amiko;  
tamen amiki  
al ties malamiko  
ne konvenas al vera amiko.

44 Se vi konas amikon,  
al kiu vi fidis  
kaj volas de li favoron,  
vi devas komuni  
kaj doni donacojn  
kaj ofte iri lin gastu.

45 Se vi konas alian,  
sed kiun vi dubas,  
kaj volas de li favoron,  
plaĉe parolu

kaj pensu false  
kaj falson frapu per falso.

46 Kaj plue pri kazo,  
en kiu vi dubas,  
kaj kaŭzon donis por dubo,  
ŝercu kun li  
kaj ŝajne amiku,  
donu egalajn donojn.

47 En mia juneco  
mi migris sola,  
vage mi perdis la vojon;  
riĉo min trafis,  
mi trovis kunulon,  
homo ĝojigas homon.

48 La mildaj kaj fortaj  
fartas plej bone,  
ne ofte malbonon bredas;  
viro ne taŭga  
timas ĉion,  
avaras, se devas doni.

49 Vestojn miajn  
mi metis jen sur  
du lignajn virojn ĉe vojo;  
indaj uloj  
ili fariĝis,  
hontas homo nuda.

50 Velkas pino  
en vasto sola,  
ŝirmas nek ŝelo nek pingloj;  
same la viro  
sola sen amo,  
kial li vane vivu?

51 Fajro brulas  
ĉe falsaj amikoj  
kvin tagojn da tempo ĝoja,  
la ardo velkas  
ĉe veno de l'sesa,  
kaj mortas amikaj sentoj.

52 Multon doni

ne devas la viro,  
ofte la eta efikas;  
per tranĉo da pano  
kaj trinka restaĵo  
mi havis homan kuniĝon.

53 Etaj flusoj,  
etaj faloj,  
etaj eĉ multaj mensoj;  
ne ĉiuj laŭ sorto  
en saĝo egalas,  
estas ja ambaŭ specoj.

54 Meze saĝa  
sin montru la viro,  
neniam li super-saĝu;  
plej belan vivon  
vivas la viro,  
se iom pri ajn li scias.

55 Meze saĝa  
sin montru la viro,  
neniam li super-saĝu;  
malofte li ĝuas  
la ĝojojn de l'vivo,  
se li sorbis tro multe da scio.

56 Meze saĝa  
sin montru la viro,  
neniam li super-saĝu;  
kiu ne scias  
pri sia sorto,  
pace kaj plene vivas.

57 Brulo sen baro  
brulas ĝis cindro,  
fajro plu faras fajron;  
de viro al viro  
venas la scio,  
ĝi haltas ĉe homevitulo.

58 Frue vin levu,  
se alian vi volas  
je vivo kaj riĉoj rabi;  
ne lupu kuŝanta  
lumbon akiras

nek viro dormanta venkon.

59 Frue vin levu  
se farmojn vi gardu  
kaj ordon en kampo kaj korto;  
multon fuŝas  
malfrua leviĝo,  
urĝa, – duone riĉa.

60 Ŝarĝon da ligno  
kaj ŝelon tegmentan  
viro taŭgu por taksi;  
kaj kvanton da ligno,  
kiom por hejti  
dum daŭro de duon-jaro.

61 Lavita kaj sata  
venu al tingo  
eĉ se en aĉaj vestoj;  
pantalon' kaj ŝuo  
ne lasu vin honti,  
ankaŭ ne ĉevalo,  
eĉ se kripla.

62 Kun klino malgaja  
gvatas sur-borde  
aglo al olda maro;  
jen tiel matene  
en tingo la viro,  
se mankas pleda apogo.

63 Demandi kaj diri  
devas la viro,  
se strebas nomiĝi saĝa;  
unu scias,  
ne aŭdu dua,  
se tria, jam tuta mondo.

64 La saĝa viro  
sian potencon  
uzas kun deco kaj digno;  
ofte li trovas  
ke inter bravuloj  
neniu sin sentu plej supra.

65 Ofte vortojn



vante diritajn  
viro pente pagis.

66 Longe tro frue  
multloke mi venis,  
tro tarde en lokoj aliaj;  
jen medo finiĝis,  
jen, male, ne pretis,  
la teda malofte trafas.

67 Kelkfoje al tablo  
trudis min oni,  
eĉ se mi sentis min sata;  
aŭ pendis du klaboroj  
ĉe kara amiko,  
kaj manĝis mi unu el ili.

68 Fajro bonfaras  
al filo homa,  
kaj vido de l'varma suno;  
kaj sian sanon  
li savas bona  
kaj vivas sen korpa kripla.

69 Sed ne tute mizera  
sin sentu la kripla;  
iuj pri filoj fieras,  
iuj pri parencoj,  
iuj pri riĉo,  
iuj pri fama faro.

70 Prefere vivi  
ol velki sen vivo,  
se viva, vi bredas brutojn;  
mi vidis bruli  
bieno riĉula,  
karba korpo ĉe porde.

71 Lamulo bridas,  
sen brako vi paŝtas,  
se surda, vi taŭgas batali;  
blindo pli bonas  
ol bruli sur fajro;  
morta ne multe taŭgas.

72 Bonvenas filo

malfrue naskita,  
eĉ post la forpaso de patro;  
staras ne ofte  
ŝtono ĉe vojo,  
sen ke ĝin faris filo.

73 Du en komuna armeo,  
la lango kostis kapon,  
post kovro mantela  
sin kaŝas mano.

74 Nokto ‘stas ĝojo,  
se la nutron vi fidas  
kaj velas kun etaj jardoj;  
sin turnas aŭtuna nokto;  
dum kvin tagoj  
vetero ŝanĝiĝas,  
eĉ pli en plena monato.

75 Ne povas kredi,  
kiu ne vidis  
la frenezan emon al oro;  
unu estas riĉa,  
unu malriĉa,  
vi tiun ne tial riproĉu.

76 Mortas brutoj,  
mortas fratoj,  
mortos vi mem same;  
sed via nomo  
neniam mortos,  
se bonan famon vi flegis.

77 Mortas brutoj,  
mortas fratoj,  
mortos vi mem same;  
sed io nepre  
neniam mortos:  
la monda juĝo pri morta.  
*(Erling A. Haugen)*

## El Hávamál

*Hávamál (Paroloj de l’Altulo, t.e. Óðinn) estas komuna nomo de kelkaj poemoj kaj poemeroj, entute 164 strofoj, de diversaj aŭtoroj en la antikva tempo. La enhavo*

*plejparte transdonas sciindaĵojn kaj saĝajn konsilojn kaj klare respegulas la pensmanierojn kaj vivopiniojn de la plej bone kulturaj homoj en Norvegujo kaj Islando en la antaŭkristana periodo.*

1 Enrigardu  
antaŭ ol eniri,  
zorge kaj atente.  
ĉar oni ne scias  
ĉu malamikoj  
sidas sur la benkoj.

3 Varmon bezonas  
enirinto  
kun genuo frosta.  
Manĝon kaj veston  
bezonas viro  
transirinta monton.

4 Akvon bezonas  
veninto al manĝo,  
viŝtukon kaj bonvenon,  
amikan konduton,  
parolon kaj aŭskulton,  
se haveblas tio.

5 Saĝon bezonas  
multvojaĝanto.  
Facilas hejme ĉio.  
Ridindiĝas  
nesciulo  
sidanta kun saĝulo.

7 La atenta gasto,  
veninta al manĝo,  
atentas kaj silentas,  
aŭskultas orele,  
rigardas okule,  
jen konduto saĝula.

12 Ne tiel bonas  
kiel dirate  
vino al viroj.  
De menso perdas  
kun plia drinkado  
viro kontrolon.

15 Silenta kaj atenta  
estu viro  
kaj brava en batalo.  
Ĝoja kaj gaja  
li ankaŭ estu  
ĝis la fina morto.

16 Viro malsaĝa  
kredas sin vivi  
batalon evitante.  
Sed ne indulgas  
lin maljuneco,  
kvankam lancoj indulgas.

20 Manĝegulo  
ne tenante prudenton  
manĝas sin al morto.  
Ridigas saĝulojn  
manĝegemo  
de viro malsaĝa.

21 Scias brutaro  
kiam hejmeniri,  
kaj el paŝtejo iras.  
Sed malsaĝulo  
scias neniam  
finon de manĝado.

23 Viro malsaĝa  
maldormas dum nokto  
kaj ĉion cerbumas.  
Tial lacas  
li en mateno.  
Samas kiel antaŭe.

24 Viro malsaĝa  
kredas ĉiujn  
ridantojn amikoj.  
Li ne komprenas  
mokajn parolojn,  
sidanta kun saĝuloj.

29 Multajn vortojn  
sensencajn diras  
neniam-silentanto.  
Lango rapida

sen haltigo deca  
oftigas malbonon.

34 Malrekta vojo  
al malamik' kondukas,  
kvankam ĉefvojo.  
Sed al amiko,  
kvankam ekstervoja,  
rektvojo kondukas.

35 Indas foriri,  
gasto ne restu,  
samloke ĉiam.  
Plaĉulo tedas  
sidanta tro longe  
sur alies benkoj.

36 Havi farmejon,  
kvankam malgrandan.  
viron mastrigas.  
Kaprino kaj ĉambro  
malriĉe tegita  
superas almozpeton.

37 Havi farmejon,  
kvankam malgrandan,  
viron mastrigas.  
Sangas ties koro  
kiu devas peti  
manĝon por ĉiu fojo.

42 Al amiko  
oni estu amiko,  
donaco pro donaco.  
Ridon je rido  
viroj transdonu,  
sed falson je mensogo.

52 Doni multon  
ne ĉiam nepras  
por rikolti laŭdon.  
Per pano duona  
kaj kruĉo neplena  
akiris mi amikon.

54 Saĝon serĉu

ĉiuj viroj,  
ĝi neniam troas.  
Pleje ĝuas  
vivon viroj  
sciantaj multon.

56 Saĝon serĉu  
ĉiuj viroj,  
ĝi neniam troas.  
Sorton sian  
neniu pripensu,  
senzorgas do la menso.

76 Brutaro mortas,  
mortas parencoj,  
ankaŭ vi mortas.  
Sed bona fam'  
al akirinto  
mortas neniam.

*(Baldur Ragnarsson; Norda Prismo, 3, 1956.)*

## El Helgakviða Hundingsbana II

*La poemo kiel tuto estas iom fragmenta, strofoj certe perdiĝis, kaj disajn strofojn oni provis kunligi per prozaj pecoj. Tiu parto de la poemo, kiu ĉi tie estas tradukita, estas ties ĉefa kaj plej bela parto, kaj priskribas la tragedian sorton de la geamantoj, Sigrún kaj Helgi. Antaŭ la unua strofo ĉi-tie estas rakontite en prozo, ke Högni, patro de Sigrún, ŝin donis al la reĝo Höðbroddur, unu el la filoj de Granmar, sed tion aŭdinte ŝi serĉas la heroon Helgi, sian amanton, kaj petas lian helpon. La trad.*

14 Rajdis Sigrún  
al reĝo brava,  
iris viziti  
indan Helgi,  
salutis kise  
kapon subkaskan.  
Tiam princon  
prenis ekamo.

Diris Sigrún:

16 Post batalo  
trakto fia

min proponis  
por venkinto.  
Por mia amo  
mi evitis  
volon de l'patro  
kaj tial timas.

Diris Helgi:

18 Ŝajniku surdon  
al sento kolera  
de via patro  
kaj parencaro.  
Vi, virgulino,  
vivu ĉe Helgi,  
genton vian  
li vere ne timas.

Helgi tiam kolektis grandan ŝiparon kaj velis al Freka-roko... Filoj de Granmar same kolektis armeon. Alvenis multaj reĝoj. Tie estis Högni, patro de Sigrún, kaj liaj filoj, Bragi kaj Dagur. Estis granda batalo, kaj falis ĉiuj filoj de Granmar kaj ĉiuj estroj kun ili, krom Dagur, filo de Högni, kiu estis indulgita kaj faris ĵurojn de lojaleco al Völsungar. Sigrún iris sur la batakampon kaj tie trovis reĝon Höðbroddur tuj antaŭ morto. Ŝi diris:

25 Ne kuŝos Sigrún  
el Seva montoj,  
reĝo vunda,  
ĉe via brusto.  
Vivon finis  
filoj de Granmar,  
grizaj hordoj  
hurlas avide.

Trovinte Helgi ŝi tre ĝojis. Li diris:

26 Kun variforma  
vi, feliĉo  
rompis fidon,  
Fatoj kaŭzas.  
Matene falis  
ĉe Freka-roko  
patro kaj frato  
per mia mano.

28 Kuŝas kampe

karaj gentuloj  
plej multaj viaj  
senvivaj jam.  
Vanis malhelpi  
ĉar via belo  
al lukto pelis  
potenculojn.

Ploris tiam Sigrún. Li diris:

29 Ne ploru, Sigrún,  
sorton eviti  
eĉ ne povas princoj.

Diris Sigrún:

Mi volus ilin  
vivaj, tamen  
kun vi brakumiĝi.

Helgi edzinigis Sigrún, kiu naskis al li filojn. Helgi ne atingis maljunecon. Dagur, filo de Högni, oferis al Óðinn por la venĝo de la patro. Óðinn donis al li sian lancon. Dagur trovis Helgi, sian bofraton, kie nomiĝas Fjöturlundur (Kateno-arbaro). Li trapikis Helgi per la lanco. Tie falis Helgi, sed Dagur rajdis al Seva-montoj kaj rakontis pri la okazintaĵoj al Sigrún:

30 Malvola vek  
veon, fratino,  
devigite  
mi dolĉan larmigos.  
Falis matene  
en Kateno-arbaro  
princo supera  
plej el ĉiuj  
kaj kiu staris  
sur koloj reĝaj.

Diris Sigrún:

31 Vin punmordu  
manaj ĵuroj,  
kiujn al Helgi,  
ho, vi donis  
ĉe la luma  
Lago de l'Brilo  
kaj ĉe l'frosta



Fronto de l'Maro.

32 Ne velojn de l'ŝipo  
dum via vojaĝo  
plenigu vento,  
favora tamen.  
Ne kuru ĉevalo  
dum via fuĝo  
de mortintencaj  
malamikoj.

33 Malakru glavo  
altsvingata  
krom se kapon  
ĝi vian volas.  
Venĝo venus  
sur vin pro l'murdo,  
se estus vi lupo  
en lokoj arbaj,  
ekster havoj  
kaj horoj gajaj,  
sen ia manĝo  
krom mortaj korpoj.

Diris Dagur:

34 Freneza vi estas  
kaj ekster saĝo,  
ke fraton vian  
vi fatmalbenas.  
Sola Óðinn  
mizeron kaŭzis,  
ĉar inter bofratoj  
li fajron flamigis.

35 Pente proponas  
ruĝajn ringojn  
frato sola  
kaj sanktajn ejojn,  
duonan landon  
pro larma doloro  
por vi, reĝino,  
kaj viaj filoj.

Diris Sigrún:

36 Trista mi sidos  
en Seva-montoj  
longajn tempojn  
sen trovi vivon,  
krom se ekbrilus  
bando reĝa,  
alkurus venka  
ĉevalo de Helgi,  
kun ora brido  
en brakojn miajn.

37 Same teruris  
reĝo mia  
la malamikojn  
kaj membrojn samgentajn  
kiel pro lupo  
lerte kuras  
kaproj el montoj  
mortotime.

38 Tiom superis  
princojn Helgi  
kiom gracia  
cedro kardon  
aŭ cervido  
en volvo rosa,  
kiu pli alte  
iras ol bestoj  
ĉiuj, kaj kornoj  
kronas ĉielon.

Oni faris tombon de Helgi. . . Sklavino de Sigrún vespere preterpasis la tombon kaj vidis, ke Helgi rajdas al la tombo kun multaj viroj. Diris sklavino:

40 Ĉu trompas okuloj,  
ke mi trupon vidas  
mortulan, aŭ finas  
Mondfinan Batalon,  
ke vi ĉevalojn  
vunde spronas, –  
aŭ ĉu la bravuloj  
reveni rajtis?

Diris Helgi:

41 Ne trompas okuloj,

ke vi kredas vidi  
nek Fin' de l'Mondo  
malgraŭ spektaklo,  
aŭ ke ni ĉevalojn  
vunde spronas,  
nek la bravuloj  
reveni rajtis.

Sklavino iris hejmen kaj diris al Sigrún:

42 Eliru Sigrún  
el Seva-montoj  
se vi trupestron  
pretas trovi.  
Vakas tombo.  
Venis Helgi.  
Gutas pikoj.  
Petas reĝo,  
ke vi de l'vundoj  
verŝojn baru.

Sigrún iris en la tombon al Helgi kaj diris:

43 Nun mi ĝojas  
pro nia renkonto  
kiel malsataj  
korvoj je flaro  
de batalkampaj  
korpoj varmaj,  
aŭ rosumitaj  
je ruĝo matena.

44 Mi volas kisi  
kapon mortan  
antaŭ ol ruĝan  
kirason vi ĵetu.  
Haroj de Helgi,  
prujnoplennaj!  
Korpon maskas  
mortoroso,  
manoj frostaj  
de mia reĝo!  
Kiel vin, kara,  
save servi?

Diris Helgi:

45 Sola vi, Sigrún  
el Seva-montoj,  
kaŭzas, ke reĝon  
kovras sango,  
vi ploras, pura,  
kun pezaj larmoj,  
suneca, sudeca,  
al dormo iranta,  
sangruĝaj falas  
sur reĝan bruston,  
brulan, frostan,  
ploroplenan.

46 Prete ni trinku  
pezajn vinojn,  
kvankam ni perdis  
amon kaj landojn.  
Langon levu  
por morna lamento  
neniu je vido  
de l'vundoj sur brusto.  
Nun reĝino  
eniris tombon,  
virino nobla  
vizitis mortulon.

Sigrún faris kuŝejon en la tombo:

47 Ĉi tie, Helgi,  
taŭgan mi faris  
kuŝejon dolĉan  
por dormo nia.  
ĉe brusto via  
mi volas ripozi,  
kiel, se vivus  
viro, mi farus.

Diris Helgi:

48 Nun sopiro  
peza foras  
sur promesaj  
Seva-montoj,  
kiam ĉe velka  
vango vi dormas,

en tombo lumas  
filino de Högni,  
veke viva  
virtulino.

49 Jam urĝas rajdi  
laŭ ruĝaj vojoj  
ĉevalon palan  
tra pintaj krutoj.  
Mi jam transpasu  
Ponton de l'ĉielo  
antaŭ ol koko  
krios batalon.

Helgi kaj liaj akompanantoj rajdis for, sed Sigrún kun la sklavino iris hejmen. Sekvan vesperon Sigrún petis la sklavinton gardostari ĉe la tombo. Sed je noktiĝo, kiam Sigrún venis al la tombo, ŝi diris:

50 Veninta estus  
edzo brava,  
se intencus veni  
el vasta mortejo.  
Mi perdis l'esperon  
pri repaso reĝa  
post kiam agloj  
arbe ripozas  
kaj homa hordo  
sonĝojn serĉas.

Diris sklavino:

51 Ne tiom frenezu  
nokte, ke sola  
vi iru domon  
de fantomoj.  
Estas pli fortaj  
fiaj dum nokto  
spektro ol tage  
je suno, reĝino.

Sigrún vivis mallonge pro sopiro kaj ĉagreno.

**Klarigoj:**

**Völsungar**, nomo de gento de antikvaj herooj kaj heroinoj, al kiu apartenis Helgi Hundingsbani (mortiginto de Hundingur; pri tio rakontas pli frue la poemo).

Sigrún estis **valkyrja**, t.e. superhoma virino, kiu elektis al si mortigotojn en batalo. La „valkyrja“ povis ŝanĝi sian eksteran formon laŭplaĉe (el tio variforma en la str. 26.) flugante super batalantoj.

**Filoj de (reĝo) Granmar**, reĝo Höðbroddur kaj liaj fratoj.

**grizaj hordoj**, lupoj.

**Fatoj**, supernaturaj estaĵoj, kiuj decidis pri la sortoj de l'homoj.

**Óðinn** (de **óður**, poezio, ĉar li donis al poetoj ilian arton), la plej supera dio de la norda mitologio.

**Fjöturlundur** signifas „arbar(et)o de la Kateno.“

**kiu staris sur koloj reĝaj**, kiu venkis reĝojn.

**Mondfina Batalo**, la Ragnarök („la juĝo pri la dioj“) aŭ laŭ alia legmaniero Ragnarökkur („krepusko de la dioj“, „Götterdämmerung“). Tiam en grandega batalo ĥimeroj kaj gigantoj venkas la diojn kaj iliajn homajn kunbatalantojn; al ĉi tiuj apartenas Helgi; vidante lin kaj lian sekvantaron la sklavino ekpensas ke la horo de la Lasta Batalo jam venis.

**rosumitaj je ruĝo matena**, la malvarma nokto kovras la korvojn per roso, ili do ĝojas vidante la venon de la tago.

**antaŭ ol ruĝan/kirason vi ĵetu**, la kiraso estas ruĝa de sango.

**mortoroso**, sango.

**sangruĝaj falas**, t.e. la larmoj de Sigrún. – Inter la strofoj 48 kaj 49 la poeto imagas ke pasas la nokto, kaj frumatene Helgi devas reiri al la „vasta mortejo“, t.e. Valhöll, bieno de Óðinn.

**ruĝaj vojoj**, la orienta ĉielo ruĝumita de la apero de la suno.

**pintaj krutoj**, krutegaj vojoj de la ĉielo.

**Ponto de l'ĉielo**, la ĉielarko.

**antaŭ ol koko/krios batalon**, la koko Gullinkambi (Orkrestulo) matene vekas la mortajn heroojn en Valhöll por la ĉiutaga interbatalo de sinamuzo. Komence de Ragnarök tiu koko ankaŭ donas la batalsignalon.

**vasta mortejo**, Valhöll.

**domo de fantomoj**, la tombo.

*(Baldur Ragnarsson, Norda Prismo, I, 1958.)*

## Þrymskviða

tio estas Poemo pri Þrymr

1 Kolero kaptis,  
Sving-Toron je trovo,  
ke mankis martelo  
post dormo dura,  
barbon li skuis  
kaj bukklajn harojn,  
serĉe pripalpis  
plankon Ter-Filo.

2 Kaj jene parolis  
Toro tujvorte:  
„Aŭdu min, Loki,  
kion mi diras,  
okazis ŝtelo  
sen precedento:  
martel' estas rabita!“

3 Alpaŝis ili kune  
korton de Freyja,  
kaj jene parolis  
Toro tujvorte:  
„Ĉu vi alpruntus  
plumveston flugilan  
por mian retrovi  
martelon ŝtelitan?“

Diris Freyja:

4 „Al vi mi alpruntus  
eĉ se el oro,  
volonte donus  
eĉ se el arĝento.“

5 Ekflugis Loki

– zumeĝis tra plumoj, –  
ĝis jam eksteris  
lokaron de l' dioj  
kaj jam eniris  
la Giganto-landon.

6 Sidis sur altaĵo

Þrym gigant-reĝo,  
plektis orŝnurojn  
por siaj hundoj,  
tondis kolharojn  
al siaj ĉevaloj.

Diris Þrym:

7 „Kio pri la dioj?  
Kio pri la elfoj?  
Kial vi alvenis  
sola Gigant-landon?“

Diris Loki:

8 „Misiras ĉe la dioj,  
misiras ĉe la elfoj;  
ĉu vi ŝtelkaŝis  
martelon de Toro?“

Diris Þrym:

9 „Mi la martelon  
de Toro ŝtelkaŝis  
ok verstojn profunde

en firma tero.  
Neniu ĝin trovos  
nek rekiros,  
se mi ne havos  
Freyjan por edzino.“

10 Ekflugis Loki,  
– zumegis tra plumoj, –  
ĝis jam eksteris  
Giganto-landon  
kaj jam eniris  
lokaron de l' dioj.  
Toron li renkontis  
en kortomezo,  
kiu lin alvortis  
tuj jenparole:

11 „Ĉu rezult' egalas  
vian flugpenadon?  
Diru en aero  
vian novaĵon.  
Ofte al sidanto  
rakontoj misiras  
kaj same al kuŝanto  
mensogoj sin trudas.“

Diris Loki:

12 Rezulto egalas  
al flugpenado;  
Brym havas martelon,  
giganto-reĝo.  
Neniu ĝin trovos  
nek rekiros,  
se li ne havos  
Freyjan por edzino.“

13 Alpaŝis ili kune  
korton de Freyja,  
kaj jene parolis  
Toro tujvorte:  
„Surmetu vi, Freyja,  
robon nuptofestan;  
veturu ni du  
al Gigant-mondo.“

14 Koleris tiam Freyja



kaj nazoblovis,  
tremis tratute  
tereno de l' dioj,  
rompiĝis la granda  
kolĉen' de Brisingoj:  
„Min vi ja trovos  
la plej alvirema,  
se mi kunveturos  
al Giganto-mondo.“

15 Baldaŭ la dioj  
sidis kunvene  
kaj ĉiuj diinoj  
venis porparole,  
pri tio diskutis  
dijoj potencaj,  
kiel akiri  
ree martelon.

16 Diris tiam Heimdal,  
plej blanka el dioj,  
antaŭvidema  
kiel Vanoj ĉiuj:  
„Vestu ni Toron  
per nupta robo,  
portu li la grandan  
kolĉenon Brisingan.

17 Sur lian zonon  
ni pendigu ŝlosilojn  
per virinaj vestoj  
ni kovru genuojn,  
sur bruston ni metu  
larĝajn ŝtonojn,  
kaj sur la kapon  
vestpinton ornaman.“

18 Tiam diris Toro,  
plej forta el dioj:  
„Min la dioj nomus  
fie virineca,  
se mi nuptorobon  
akceptus porti.“

19 Diris tiam Loki,  
filo de Laufey:

„Silentu, Toro,  
kaj tenu vian buŝon.  
Okupos tuj gigantoj  
la diajn lokojn,  
se vi ne martelon  
ree akiros.“

20 Ili tiam Toron  
vestis nuptorobe,  
surmetis la grandan  
kolĉenon Brisingan,  
ŝlosilojn pendigis  
sur lian zonon,  
kovris genuojn  
per vesto virina,  
kaj larĝajn ŝtonojn  
metis sur bruston,  
vestpinton ornaman  
sur kapon lian.

21 Diris tiam Loki,  
filo de Laufey:  
„Mi vin akompanu  
kiel servistino,  
ni duine veturu  
al Gigant-mondo.“

22 Haste estis kaproj  
hejmen pelitaj,  
al tiriloj ligitaj,  
rapide ili kuru.  
Fendiĝis rokoj,  
brulis tero fajre,  
veturis Gigant-mondon  
filo de Odin.

23 Diris tiam Þrym  
al siaj servistoj:  
„Ekstaru kaj benkojn  
molkovru per pajlo.  
Nun al mi portatas  
Freyja por edzino,  
filino de Njörð  
el Noa-Kampoj.

24 Paŝas miajn kampojn

orkornaj bovinoj,  
nigraj virbovoj,  
plezur' de giganto;  
objektojn valoregajn  
mi posedas grandkvante,  
sole mi nun sentas  
la mankon de Freyja.“

25 Jam frue en vespero  
ili jam alvenis,  
biero sur la tabloj  
abundis por gigantoj.  
Li sola manĝis bovon,  
kaj ok salmojn,  
ĉiujn bongustaĵojn  
konvenajn por virinoj,  
trinkis edzo de Sif  
tri bovlojn da biero.

26 Diris tiam Þrym,  
giganto-reĝo:  
„Kie nuptulino  
pli akre mordis?  
Ne vidis mi virinon  
pli larĝe mordi  
kaj tiom eltrinki  
da biero forta.“

27 Pretis respondi  
servistin' sagaca,  
kiu vortojn trovis  
al demando de l' giganto:  
„Neniom manĝis Freyja  
dum ok noktoj,  
tiom ŝi deziris  
al la nuptofesto.“

28 Levis li vualon  
ĉar deziris kisi,  
sed forsaltis fluge  
laŭlonge de la halo.  
„Kial estas akraj  
la okuloj de Freyja?  
Ŝajnas ke tie brulas  
fajro plej ardega.“

29 Pretis respondi  
la servistin' sagaca,  
kiu vortojn trovis  
al la demando de l' giganto:  
„Neniom Freyja dormis  
dum ok noktoj,  
tiom ŝi deziris  
al la nuptofesto.“

30 Envenis la aĉa  
fratino de l' giganto,  
kiu kuraĝis  
peti nuptopagon:  
„Demanu viajn ringojn,  
ruĝe orajn,  
se volas vi havi  
miajn amojn,  
miajn amojn  
kaj korfavoron.“

31 Diris tiam Prym,  
giganto-reĝo:  
„Alportu la martelon  
por konfirmi la nupton,  
metu la Rompanton  
sur genuojn de l' virino,  
sanktigu nian nupton  
per la man' de Vár.“

32 Ŝvelis jen ĝojego  
en brusto de Tor',  
kiam la kuraĝa  
rekonis la martelon.  
Unue al Prym  
li mortfrapon faris,  
kaj tutan lian genton  
li morte disbatis.

33 Mortfrapis li la oldan  
fratinon de l' giganto,  
kiu nuptopagon  
kuraĝis peti;  
ŝi batojn ricevis  
anstataŭ mono,  
kaj frapojn de martelo  
anstataŭ ringoj.

Tiel fil' de Odin  
martelon reakiris.

*(Baldur Ragnarsson, La Tradukisto 26, 1997).*

## Hjálmarskviða

*La poemo de Hjálmar estas verkita en Islando kredeble en la 12-jarcento. Ĝi ne troveblas en la manuskripto de la Edda poemoj, kvankam ĝi forme kaj teme tute apartenas al ili. La herooj Örvar-Oddur kaj Hjálmar la Kuraĝa batalas kontraŭ vikingoj, el kiuj unu aspiris al la reĝidino en Upsalo (Uppsala en Svedujo), la fianĉino de Hjálmar. Ili sukcesas venki la vikingojn, sed Hjálmar ricevas fatalan vundon. Mortante li eldiras la poemon, li pensas pri sia amatino, kiun li neniam revidos, li rememoras ilian lastan renkonton kaj la gajajn tagojn en la hejmo de la patro, kaj finas salutante la korvon kaj la aglon, kiuj alflugas por ŝirmanĝi lian korpon. Tiu ĉi mallonga poemo havas belan elegian tonon kaj elspiras profundan sopiron kaj malĝojon. La traduko konservas la originalan aliteracion komence de akcentsilaboj. La trad.*

Oddur:

1 Kio al vi, Hjálmar?  
Haŭto mortpalas,  
certe febligas  
vin lezaj vundoj;  
kasko fenditas  
kaj dura kiraso;  
vidas mi vivon  
vin forlasi.

Hjálmar:

2 Dekses vundojn  
kaj veston taŭzitan  
mi havas, kaj vidon  
volvis nigreco;  
koron enkuris  
klingo glava,  
akra rapiro  
pinte venena.

3 Kvin mi havis  
kulturkampojn,  
sed min tedis  
terlaboroj;  
nun mi kuŝas

kontraŭ morto,  
vundita glave  
sur Griz-insulo.

4 Trinkas en halo  
de l'hejmo patro  
bieron noblaj  
eskortuloj;  
lacigas viglajn  
virojn drinkado,  
sed min glavspuroj  
spasme turmentas.

5 Forlasis mi  
la lume belan,  
brilevestitan  
tronulinon.  
Veriĝos diroj  
drastaj ŝiaj,  
ke mi revenos  
post venko neniam.

6 Forlasis mi  
allogajn kantojn  
de junulinoj  
pro luktoj armilaj;  
pene rapidis  
forvelante  
lastan fojon  
de amikoj miaj.

7 Movu de mano  
ruĝan ringon,  
portu al larma  
filino de l'reĝo;  
knedos ŝian  
koron ĉagreno,  
ke ne mi venos  
denove Upsalon.

8 Korvo grake  
de granda arbo  
flugas kaj aglo  
akompanas;  
al aglo alta  
mi donas propran

predon kaj mian  
sangon salan.

*(Baldur Ragnarsson, Norda Prismo, 4, 1957.)*

## **Snorri Sturluson:**

### **El Snorra-Edda**

#### **La vojaĝo de Þór al Útgarða-Loki**

La komenciĝo de tiu ĉi rakonto estas ke Öku-Þór iris kun siaj virkaproj rajdante kaj kun li la dio kiu nomiĝas Loki. Je la vespero ili venas al iu bienulo kaj tranoktas tie. Sed en la vespero Þór prenis ambaŭ siajn virkaprojn kaj buĉis ilin. Oni senhaŭtigis ilin kaj portis al kuirpoto. Sed kiam la viando estis kuirita Þór eksidis por nokta manĝo kun siaj kunuloj. Þór ankaŭ invitis por la manĝo la bienulon, lian edzinon kaj iliajn infanojn. La filo de la bienulo nomiĝis Þjálfi, sed la filino Röskva. Tiam Þór metis la haŭtojn de la virkaproj iom for de la fajro kaj diris ke la bienulo kaj liaj kunuloj ĵetu la ostojn sur la haŭtojn de la virkaproj. Þjálfi, la filo de la bienulo, tenis la femuran oston de la virkapro kaj detranĉis de ĝi la viandon per sia tranĉilo kaj rompita la oston ĝis medolo.

Þór restis tie dum la nokto. Sed je antaŭtagiĝo li leviĝis kaj vestis sin, prenis la martelon Mjöllnir kaj levis ĝin kaj konsekris la virkaprajn haŭtojn. La virkaproj leviĝis kaj tiam unu el ili lamiris per malantaŭa piedo. Tion Þór rimarkis kaj opiniis ke la bienulo aŭ liaj hejmanoj neracie agis pri la ostoj de la virkapro. Li rimarkis ke la femura ostoj estas rompita. Ne estas necese detale rakonti pri tio: ĉiuj povas scii kiel timigita la bienulo estis kiam li vidis ke Þór malsuprenigis siajn brovojn ĝis malsupre de la okuloj. Sed laŭ tio, kion la bienulo vidis de la okuloj, li pensis ke li mortfalus nur pro la rigardado de Þór. Þór pli fiksis sian premon al la martela tenilo, tiel ke la falangartikoj blankiĝis, sed la bienulo agis kiel oni povas atendi, kaj ĉiuj liaj geservistoj kriis fortege, petis indulgon kaj proponis rekompence ĉiujn siajn posedaĵojn. Sed vidante ilian timon Þór ektrankviliĝis kaj akceptis por repaciĝo iliajn infanojn, Þjálfi kaj Röskva, kaj per tio ili fariĝis devigaj geservantoj de li kaj post tio ili ĉiam sekvas lin.

Tie li lasis siajn virkaprojn kaj komencis la vojaĝon orienten, al Jötunheimar kaj ĝis la maro, kaj tiam li transiris la profundan maron. Sed atinginte al la bordo li

surbordiĝis kaj kun li Loki, Þjálfi kaj Röskva. Irinte mallongan tempon ili atingis la randon de granda arbaro. Ili iradis la tutan tagon ĝis mallumo. Þjálfi estis plej rapidira el ĉiuj. Li portis la proviantsakon de Þór, sed restis nur malmulte da provianto.

Kiam jam mallumiĝis ili serĉis tranoktejon kaj trovis loĝejon, tre grandan. Ĉe la fino estis pordo, egale larĝa kiel la loĝejo. Tie ĉiu elektis sian dormlokon.

Sed meze de la nokto ekestis granda tertremo. La tero sub ili ekskuiĝis kaj la domo tremis. Tiam Þór ekstaris kaj instigis siajn kunulojn al bonaj agoj, ili serĉis en la domo kaj trovis flankdomon dekstre meze de la loĝejo kaj tien ili iris. Þór eksidis en la porda aperturo, sed la aliaj estis pli interne, kaptitaj de timo, sed Þór fikse tenis la martelan tenilon kaj intencis sin defendi. Tiam ili ekaŭdis grandan tumulton kaj bruon.

Sed kiam alproksimiĝis la tagiĝo Þór iris eksteren kaj vidis ke iu viro kuŝas malproksime al li en la arbaro, kaj tiu ne estis malgranda. Li dormis kaj forte ronkis. Tiam Þór ekkomprenis la eventojn de la nokto. Li surmetas sian fortpliigan zonon kaj lia diforto pliiĝis. Kaj en sama momento tiu viro vekigis kaj tuj leviĝas, sed tiam oni diras ke Þór ekcedis je sia intenco bati lin per la martelo kaj demandis lin kiel li nomiĝas, sed tiu nomiĝis Skrýmir.

– Sed mi ja ne bezonas demandi pri via nomo. Mi scias ke vi estas Ása-Þór. Sed kien vi fortiris mian ganton?

Tiam Skrýmir etendis la manon kaj prenis sian ganton. Tiam Þór vidas ke tion li uzis dum la nokto kiel dormejon. Sed la flankdomo estis la dikfingro de la ganto.

Skrýmir demandis ĉu Þór deziras ke liaj sekvantoj iru kun li. Þór diris ke jes. Tiam Skrýmir prenis sian proviantsakon, malligis ĝin kaj volis tagmanĝi sed Þór en alia loko kun siaj sekvantoj. Tiam Skrýmir proponis ke ili kunigu siajn manĝaĵojn, sed Þór konsentis pri tio.

Tiam Skrýmir kunligis ilian tutan provianton en unu pakaĵo kaj metis ĝin sur sian dorson. Li iris antaŭe dum la tago kaj faris grandajn paŝojn, sed malfrue en la vespero Skrýmir elektis por ili tranoktejon sub granda kverko.

Tiam Skrýmir diris al Þór ke li volas ekkuŝi por dormi.

– Sed vi prenu la proviantpakaĵon kaj preparos por vi noktomanĝon.



Poste Skrýmir ekdormis kaj ronkis forte, sed Þór prenis la proviantpakaĵon kaj volis ĝin malligi. Sed kvankam tio ne ŝajnas kredebla li ne sukcesis malligi iun nodon nek movi iun rimenfinon tiel ke ĝi estu malpli fiksa ol antaŭe.

Kaj kiam li vidas ke lia penado ne donas ian rezultaton li ekkoleris, kaptis la martelon Mjöltnir per ambaŭ manoj kaj antaŭenigis unu piedon tien kie Skrýmir kuŝis kaj bategas lin sur la kapon, sed Skrýmir vekigis kaj demandas ĉu folio falis sur lian kapon aŭ ĉu ili jam manĝis kaj estas pretaj por enlitiĝi. Þór diras ke ili do iros por dormi. Ili iris sub alian kverkon. Verdire ne estis tiam sekure iri por dormi.

Sed meze de la nokto Þór aŭdas ke Skrýmir ronkas kaj dormas firme, tiel ke tondris en la arbaro. Tiam li ekstaras kaj iras al li, levas la martelon rapide kaj fikse kaj batas per ĝi meze sur lian verton. Li sentas ke la martela fino eniĝas profunde en la kapon. Sed sammomente Skrýmir vekigis kaj diras:

– Kio estas nun? Ĉu iu glano falis sur mian kapon, aŭ kion vi faras, Þór?

Sed Þór iris rapide malantaŭen kaj respondis ke li ĵus vekigis, diris ke estas meznokto kaj ankoraŭ tempo por dormi. Tiam Þór pensis ke se li havus okazon bati lin la trian fojon li poste neniam plu vidus lin. Poste li ekkuaŝis kaj atentis ĉu Skrýmir ankoraŭfoje firme endormiĝas.

Sed nelonge antaŭ tagiĝo li aŭdas ke Skrýmir verŝajne jam endormiĝis, ekstaras kaj kuras al li, levas la martelon plenforte kaj batas sur la suprenturnitan vangon. Tiam la martelkapo eniĝas ĝis la tenilo. Sed Skrýmir eksidis, frotis la vangon kaj diris:

– Ĉu iuj birdoj sidas en la arbo super mi? Mi ekpensis, vekigante, ke ia rubo el la branĉetoj falis sur mian kapon. Ĉu vi maldormas, Þór? Estas jam horo por ekstari kaj vesti sin, sed vi jam ne bezonas iri longan distancon por atingi la fortikaĵon Útgarður. Mi aŭdis ke vi flustris inter vi ke mi ne estas homo malgranda laŭ staturo, sed vi ja vidos pli grandajn homojn se vi eniros en la fortikaĵon Útgarður. Nun mi donos al vi konsilon: Ne pretendu pri grandaj kvalitoj viaj. La korteganoj de Útgarða-Loki certe ne toleros fanfaronadon de tiaj etuloj. Sed alia alternativo estas ke vi iru returne kaj mi opinias ke estas pli bone por vi preni tiun alternativon. Sed se vi volas daŭrigi vian vojaĝon tiam iru orienten, sed mi devas iri norden, al la montoj kiujn vi nun povas vidi.

Skrýmir prenas la proviantpakaĵon kaj ĵetas ĝin sur sian dorson kaj turnas sin transverse de ili, en la arbaron. Kaj ne estas menciite ke la azoj esprimis deziron pri tio ke ili rerenkontiĝu sanaj.

Þór iras antaŭen kun siaj kunuloj kaj daŭrigas sian iradon ĝis tagmezo. Tiam ili vidis fortikaĵon situantan sur iuj kampoj kaj streĉis malantaŭen siajn kapojn antaŭ ol ili sukcesis vidi supren. Ili iras al la fortikaĵo, kaj la fortikaĵa pordego estis fermita per krado. Þór ekpuŝis la kradon sed ne sukcesis ĝin malfermi. Sed kiam ili estis klopodantaj eniri, ili sukcesis trarampi inter la kraderoj kaj tiamaniere eniĝi. Tiam ili ekvidis grandan palacon kaj iris tien. La pordo estis malfermita. Tiam ili eniris kaj vidis tie multajn homojn sur du benkoj; plej multaj estis tre grandaj. Poste ili iris antaŭ la reĝon Útgarða-Loki kaj salutis lin. Sed li malrapide rigardis al ili, rikantis kaj diris:

– Vi certe ne havas malgravajn novaĵojn por diri el tiel longa vojaĝo, aŭ ĉu estas alie ol mi supozas? Ĉu tiu ĉi etulo jam estas Öku-Þór? Sed vi certe estas pli granda ol ŝajnas al mi. Aŭ en kio la anoj de via grupo disponas pri lerteco? Neniu estu ĉi tie inter ni kiu ne scias iaspecan arton aŭ disponas pri scio pli granda ol plej multaj aliaj homoj. Tiam diras tiu kiu iris plej malantaŭe kaj nomiĝis Loki:

– Mi scias arton, en kiu mi estas preta al konkurso, ke neniu ĉi tie povas pli rapide finmanĝi sian manĝaĵon ol mi.

Tiam diras Útgarða-Loki:

– Tio ja estas arto, se vi tion plenumos, kaj ni provu konkurson en tiu ĉi arto; kaj li vokis ke tiu kiu nomiĝas Logi antaŭeniru sur la planko kaj provu konkurson kontraŭ Loki.

Tiam oni alportis iun trogon kaj metis ĝin sur la plankon kaj plenigis ĝin je viando. Loki eksidis ĉe unu fino sed Logi ĉe la alia, kaj ambaŭ manĝis kiel eble plej rapide kaj renkontiĝis meze de la trogo. Loki tiam jam manĝis la viandon ĝis la ostoj. Sed Logi estis manĝinta la viandon kune kun la ostoj kaj ankaŭ la trogon. Nun ĉiu opiniis ke Loki perdis la ludon.

Tiam Útgarða-Loki demandas kion la juna viro povas ludi. Sed Þjálfi diras ke li provos konkurson en kurado kontraŭ iu kiun Útgarða-Loki elektos.

Tiam Útgarða-Loki diras, ke tio estas bona arto, kaj aldonas ke estas granda avantaĝo ke li facile povas rapidi se li praktikas tiun arton. Sed poste li rapidis preparigi

la konkurson. Tiam Útgarða-Loki ekstaras kaj eliras, kaj tie estis bona kurejo sur ebena kampo. Poste Útgarða-Loki vokas iun etulon, nomata Hugi, kaj petis lin kuri en konkurso kontraŭ Þjálfi. Tiam ili faras la unuan kuradon, kaj Hugi estas tiom antaŭ Þjálfi ke li povas ektorni sin kontraŭ li ĉe la kureja fino.

Tiam diris Útgarða-Loki:

– Vi certe bezonas, Þjálfi, pli streĉi viajn fortojn se vi venku en la ludo, sed tamen estas vere ke ne venis ĉi tien homoj kiuj ŝajnas al mi pli kapablaj kuri pli rapide ol tiel.

Poste ili denove faras alian kuradon. Kaj kiam Hugi atingas la finon de la kurejo kaj li returnas sin tiam estis longa pafdistanco de sago ĝis Þjálfi.

Tiam diris Útgarða-Loki:

– Ŝajnas al mi ke Þjálfi bone kuras laŭ la kurejo, sed nun mi jam ne kredas ke li venkos en la ludo, sed nun tio montriĝos kiam ili faros la trian kuradon.

Tiam ili ankoraŭ faras kuradon. Hugi kuras ĝis la fino de la kurejo kaj returnis sin, kaj tiam Þjálfi ankoraŭ ne atingis la mezon de la kurejo. Tiam ĉiuj diras ke estas finite pri tiu ĉi ludo.

Poste Útgarða-Loki demandas al Þór kiajn artojn li volas montri al ili, ĉar oni ja tiel multe rakontas pri liaj grandaj faroj.

Tiam Þór diris ke li preferas fari konkurson en trinkado kontraŭ iu.

Útgarða-Loki diras ke tio tute eblas, iras en la palacon kaj vokas sian manĝotablan serviston, petas ke li alportu la punpokalon de kiu la korteganoj kutimas trinki. Poste venas la manĝotabla servisto, portanta la pokalon, kaj donas ĝin al Þór.

Tiam Útgarða-Loki diris:

– El tiu ĉi kornpokalo oni opinias bone trinkite se post unu trinkado nenio restas el la enhavo, sed kelkaj fintrinkas el ĝi en du trinkadoj. Sed neniu estas tiel senenergia trinkanto ke li ne sukcesas fintrinki la enhavon en tri trinkadoj.

Þór rigardas la kornpokalon kiu ne ŝajnas al li granda, sed ĝi tamen estis iom longa. Sed li tre soifas, ektrinkas kaj englutas multe kaj pensas ke li ne bezonas pli ofte sin klini por ektrinki el la pokalo. Sed kiam li ne povis pli longe reteni la spiron kaj haltigis la trinkadon li rigardis en la kornpokalon, kaj ŝajnis al li ke ne estas granda diferenco kiel alte atingas la enhavo en la pokalo kompare al antaŭe.

Tiam Útgarða-Loki diras:

– Bone oni trinkas kaj ne tro multe. Mi ne kredus, se oni tion al mi rakontus, ke Ása-Ðór ne trinkus pli da trinkaĵo. Sed tamen mi scias ke vi certe volas trinki de ĝi la duan fojon.

Ðór ne respondas al tio, levas la kornpokalon al sia buŝo kaj pensas ke li nun povos trinki pli ol la unuan fojon, kaj li trinkadas ĝis kiam li ne povas plu reteni la spiron. Kaj ankoraŭ li vidas ke la malsupra fino de la kornpokalo ne tiom supreniĝas kiom li deziras. Kaj kiam li forigis la kornpokalon de sia buŝo, ŝajnis al li ke malpli malsupreniĝis la supraĵo de ĝia enhavo ol la antaŭan fojon. La spaco ĝis la rando estis nur sufiĉe granda por ke facile estu porti la pokalon.

Tiam Útgarða-Loki diras:

– Kio nun malhelpas, Ðór? Ĉu vi nun ne konservas por la lasta trinkado pli da trinkaĵo ol konvene estas al vi? Ŝajnas al mi, se vi nun trinku je la tria fojo de la kornpokalo, ke tiu ĉi trinkado estos la plej granda. Sed vi ja ne estos ĉi tie nomata tiel granda homo inter ni kiel la Azadioj nomas vin, se vi ne montras pli da kapabloj pri aliaj artoj ol montriĝis pri tiu ĉi.

Tiam Ðór estis kolera, albuŝigas la kornpokalon kaj ek-trinkas kiel eble plej fervore. Sed kiam li rigardis en la pokalon tiam montriĝis ke ĉi tiun fojon li atingis la plej grandan diferencon. Kaj tiam li reliveras la kornpokalon kaj ne volas trinki pli.

Tiam Útgarða-Loki diras:

– Estas jam evidente ke via forto ne estas tiel granda kiel ni supozis. Sed ĉu vi volas provi pli da ludoj? Oni nun povas vidi ke vi ne atingos ion ajn per tio ĉi.

Ðór respondas:

– Mi ja povus ankoraŭ provi kelkajn ludojn. Sed estus ŝajninta al mi strange, kiam mi estis hejme kun la Azadioj, se tiaj trinkaĵoj estus nomataj malgrandaj. Sed kiun ludon vi nun volas proponi al mi?

Tiam Útgarða-Loki diris:

– Multaj junuloj faras ion, kio ne estas rigardata grava: levi mian katon de la tero. Sed mi ne estus menciinta ion tian al Ása-Ðór, se mi ne estus vidinta ke vi ne estas tia potenculo kiel mi pensis.

Poste kato, griza kaj iom granda, kuris sur la plankon de la salono. Sed Þór iris kaj prenis per sia mano meze sub la katon kaj ekleviis. Sed la kato kurbigis sian korpon same alten kiel Þór levis la manon. Kaj kiam Þór streĉis sin kiel eble plej supren, leviĝis unu piedo de la kato. Kaj Þór ne havis pli da sukceso en tiu ludo.

Tiam Útgarða-Loki diris:

– Tiu ĉi ludo ja finiĝis tiel kiel mi pensis. La kato estas iom granda, sed Þór estas malalta kaj malgranda kompare al la granduloj kiuj restas ĉi tie ĉe ni.

Tiam Þór diris:

– Tiel malgranda vi nomas min, sem tamen iu antaŭeniru kaj luktu kun mi. Nun mi estas kolera.

Tiam Útgarða-Loki rigardas al la benkoj kaj diras:

– Mi ne vidas ĉi tie tian homon ke li ne opinius bagatelo lukti kun vi.

Kaj ankoraŭ li diris:

– Unue vi voku ĉi tien la maljunulinon mian guvernantinon, Maljuneco, kaj Þór luktu kun ŝi se li volas. Ŝi ja faligis virojn kiuj ne ŝajnis al mi malpli fortaj ol Þór estas.

Poste eniris en la salonon iu maljunulino. Tiam Útgarða-Loki diris ke ŝi ekluktu kun Ása-Þór.

Detala rakonto ne estas necesa: Ju pli firme Þór batalegis des pli fikse ŝi rezistis. Tiam la maljunulino komencis utiligi artifikojn, tiel ke Þór preskaŭ rulfalis; la luktado fariĝis tre severa kaj ne daŭris longe ĝis kiam Þór falis sur unu genuon.

Tiam Útgarða-Loki intervenis kaj petis ilin ĉesigi la luktadon kaj diris poste ke ne havas sencon ke Þór luktu kun pli da anoj de lia kortego. Tiam jam alproksimiĝis la nokto. Útgarða-Loki kondukis Þór kaj liajn kunulojn al sidloko, kaj ili tranoktis je bona prizorgo en lia palaco.

Sed matene, kiam tagiĝis, Þór kaj ĉiuj liaj kunuloj leviĝas kaj estas pretaj al foriro. Tiam Útgarða-Loki iris al ili kaj ordonis ke oni surtabligu manĝon por ili. Estis riĉa regalo de manĝaĵoj kaj trinkaĵoj. Sed post la manĝado ili preparas sian foriron. Útgarða-Loki akompanas ilin kaj iras kun ili el la fortikaĵo. Sed je ilia disiĝo Útgarða-Loki demandas al Þór kion li opinias pri sia vojaĝo aŭ ĉu li iam ajn renkontis iun kiu estas pli potenca ol estas li, Útgarða-Loki.

Pór diras ke tion li ja ne diros ke li ne havis grandan malhonoron en iliaj interrilatoj, – sed tamen mi scias ke vi min nomos netaŭgulo kaj tion mi malbone toleras.

Tiam Útgarða-Loki diris:

– Nun mi diros al vi la veron, kiam vi jam eliris el mia fortikaĵo: dum mi vivos kaj havos sufiĉe da potenco vi neniam plu eniros en ĝin. Kaj tion mi scias ke vi neniam estus enirinta en ĝin, se mi antaŭe estus sciinta ke vi disponas pri tiel granda forto; sed vi preskaŭ kaŭzis al ni grandan embarason. Sed ĵongladon mi faris al vi. La unuan fojon estis mi, kiun vi renkontis en la arbaro. Kaj kiam vi devis malligi la proviantsakon tiam mi estis liginta ĝin per sorĉdrato, sed vi ne eltrovis kie ĝin malfermi. Sed poste vi batis min per la martelo tri batojn kaj la unua estis plej malforta kaj tamen tiel forta ke ĝi estus mortiginta min se ĝi estus min atinginta. Sed kie vi vidis ĉe mia palaco bazalton kaj en ĝi tri kvarangulajn valojn, el kiuj unu estis plej profunda, tio estis la postsignoj de via martelo. La bazalton mi metis kiel ŝirmilon kontraŭ la batoj, sed tion vi ja ne vidis.

Tiel ankaŭ estis pri la ludoj en kiuj vi konkuris kun miaj korteganoj. Unue kion Loki faris; li estis tre malsata kaj manĝis rapide sed tiu, kiu nomiĝis Logi, estis trompofajro kiu ne bruligis pli malrapide la trogon ol la viandon. Sed kiam Þjálfi faris konkurson en kurado kun Hugi, tio estis mia menso, kaj Þjálfi ja ne disponis pri la ebleco esti pli rapida ol ĝi. Sed kiam vi trinkis el la kornpokalo kaj vi opiniis ke malrapide malsupreniĝas la supraĵo de la enhavo, tiam ja estas certe ke okazis tia miraklo pri kiu mi ne kredus ke ĝi povus okazi. Unu fino de la kornpokalo estis en la maro, sed tion vi ja ne vidis. Sed nun, kiam vi venos al la maro, vi vidos kiel multe vi trinkis de la maro. Tion oni nomas malalta maro.

Kaj ankoraŭ li diris:

– Kaj ankaŭ mi ne opiniis pli malgrave kiam vi levis la katon kaj tiam, por diri la veron, ĉiuj – tion vidante – timis kiam vi levis de la tero unu el ĝiaj piedoj. Sed tiu kato estis Miðgarðsormur, kiu ĉirkaŭas ĉiujn landojn, kaj ĝi apenaŭ estis sufiĉe longa por ke la vosto kaj la kapo atingu la teron, kaj tiel alten vi atingis ke tiam restis mallonga distanco ĝis la ĉielo. Sed ankaŭ estis granda miraklo pri la luktado, kiam vi rezistis tiel longe kaj nur falis sur la genuon de unu kruro, luktante kun la virino Maljuneco, ĉar neniu estis tia ke la maljuneco ne fine faligis lin. Kaj nun estas vere ke ni disiĝu, kaj

estas pli bone por ambaŭ rilatantoj ke vi ne venu plu renkonte al mi. Mi ja ankoraŭ alian fojon defendos mian fortikaĵon per tia aŭ alia magio, tiel ke vi ne ekhavos ian potencon super mi.

Sed aŭdinte tiun parolon, Þór ekkaptis la martelon kaj levis ĝin, sed kiam li volis bati per ĝi li nenie vidis Útgarða-Loki. Tiam li ekiris returne al la fortikaĵo kun la intenco ĝin detrui. Tiam li vidis tie kampojn, vastajn kaj belajn, sed nenian fortikaĵon. Li do retroiris kaj daŭrigis sian vojon ĝis kiam li denove atingis Þrúðvangar.

*(Ólafur S. Magnússon)*

## **La kanto pri Grotti**

Kial oro estas nomita faruno de Fróði?

Ties origino estas tiu ĉi historio. Filo de Odino (*Óðinn*) estis *Skjöldr* (Ŝildo), de kiu devenas la Ŝildidoj. Li havis rezidejon kaj regis landon, kie nun nomiĝas Danlando, sed en tiu tempo ĝi nomiĝis Gotlando. Skjöldr havis filon, kiu nomiĝis *Friðleifr*, kiu regis la landon post li. La filo de Friðleifr nomiĝis Fróði. Li transprenis la reĝecon post sia patro en tiu tempo, kiam imperiestro Aŭgusto establis pacon tra la tuta mondo. Tiam Kristo estis naskita. Sed tial ke Fróði estis la plej potenca el ĉiuj reĝoj en la Nordaj landoj, la paco estis al li atribuita tra tuta regiono, kie la dana lingvo estis parolata kaj estis ĝi nomita de la Nordanoj la paco de Fróði. Neniu homo faris malutilon al alia, eĉ se li trovis la mortiginton de sia patro aŭ de sia frato, ĉu liberan, ĉu malliberan. Ankaŭ en tiu tempo ne troviĝis ŝtelistoj aŭ rabistoj, tiel ke certa ringo de oro dum longa tempo kuŝis sur la montebenaĵo de *Jalangr*.

Reĝo Fróði akceptis inviton al Svedujo, ĉe tiu reĝo, kiu nomiĝis *Fjölnir*. Tie li aĉetis du sklavinojn, kies nomoj estis *Fenja* kaj *Menja*. Ili estis grandaj kaj fortaj. En tiu tempo estis trovitaj en Danlando du muelŝtonoj tiom grandegaj, ke ne troviĝis iu tiom forta, ke li povus ilin movi. Sed tian kvaliton havis la muelŝtonoj, ke ili elmuels kion ajn ordonitan de la muelisto. Tiu muelilo nomiĝis *Grotti*. *Hengikjöftr* („pendanta buŝego“, sendube giganto) estis tiu nomita, kiu donis al reĝo Fróði la muelilon.

Reĝo Fróði igis konduki la sklavinojn al la muelilo kaj ordonis al ili elmuels oron kaj pacon kaj prosperon por Fróði. Li permesis al ili ne pli longan ripozon aŭ dormon ol dum kiom longe silentis la kukolo aŭ kiom longe daŭras unu kanto. Estas

dirite, ke tiam ili kantis poemon konatan kiel la *Kanto de Grotti*. Kaj antaŭ ol finiĝis la kanto ili elmuelis armeon kontraŭ Fróði, tiel ke en tiu nokto alvenis marreĝo nomita *Mýsingr* kaj mortigis Fróði, kaptante grandan predon. Tiam la paco de Fróði trovis sian finon.

Mýsingr prenis kun si Grotti kaj ankaŭ Fenja kaj Menja kaj ordonis al ili elmueli salon. Kaj en la mezo de la nokto ili demandis ĉu al Mýsingr ne tedas la salo. Li petis ilin mueli plu. Ili muelis ankoraŭ mallongan tempon antaŭ ol enmariĝis la ŝipoj, kaj estis lasita turnakvo en la maro, kie la maro enfluas la muelŝtonan truon.

Tiam la maro iĝis sala.

1 Nun estas venintaj  
al la reĝaj domoj  
du antaŭsciaj  
Fenja kaj Menja.  
Ili ĉe Fróði  
filo de Friðleifr,  
virinoj fortaj,  
sklavine servas.

2 Ili al muel-kesto  
estis irigitaj  
por movi muelŝtonojn  
laŭ ordono de la reĝo;  
ripozon li malpermesis  
kaj plezuron same  
ĝis ili aŭdigis  
kanton sklavinan.

3 Ili bruigis daŭre  
muelilon krian:  
„Keston ni plenigu,  
ŝtonojn ni lev-turnu.“  
Pelis li virinojn  
al muelado plua.

4 Kantis ili kaj svingis  
la ŝtonojn rapid-kurajn  
ĝis domanoj reĝ-servaj  
en dormon falis.  
Tiam diris Menja,  
veninta al laboro:



5 „Riĉon ni muelu  
por reĝo Fróði,  
muelu ni prosperon  
per muelil' pacdona.  
Sidu li sur oro,  
dormu li sur lanugo,  
maldormu li feliĉe,  
tiam laboro bonas.

6 Neniu en ĉi regno  
kaŭzu malutilon,  
nek misaĵon faru,  
nek al iu morton,  
nek kontraŭ mortiginton  
de sia frato glavon  
levu akraklingan  
por hako de venĝo.“

7 Sed li ne parolis  
alion ol ĉi tion:  
„Dormon vi ne havu  
ne plian ol kukolo  
aŭ pli longan ol daŭras  
unu mia kanto.“

8 „Vi agis ne prudente,  
vort-amik' de homoj,  
kiam vi aĉetis  
viajn sklavinojn, Fróði.  
Vi elektis nian forton  
kaj nian aspekton muskolan,  
sed neniom demandis  
pri nia deveno genta.

9 Dura estis Hrungnir  
kaj patro lia,  
tamen pli ol ili  
fortega estis Þjassi,  
Iði kaj Aurnir,  
niaj parencoj,  
fratoj de mont-gigantoj,  
de ili ni devenas.

10 Ne estus veninta  
Grotti el grejs-monto,  
nek tiu dura roko

el la tero mem  
nek estus muelinta  
tiel la gigantino,  
se ni ne scius  
pri tio tute.

11 Dum vintroj naŭ  
ni kunludantinoj  
elkreskis potenciaj  
en tero sube.  
Ni grandajn taskojn  
plenumis volonte,  
movis platmonton  
el sia sidloko.

12 Ni rulis rokojn  
sur gigantejojn,  
skuiĝis tero  
pro tiuj pafoj;  
post tio ĵetis  
ŝtonegojn flugantajn,  
pezegajn rokojn,  
kiujn homoj prenis.

13 Kiam ni poste  
en landoj de Svedoj,  
du antaŭsciaj,  
en batalon marŝis,  
ursojn defiis,  
kaj ŝildojn rompis  
tra griz-kirasan  
armeon vadis.

14 Ni reĝon forpelis,  
subtenis alian,  
donis helpon  
al la bona Guttormr.  
Ne estis kvieto  
ĝis la falo de Knui.

15 Tiel ni daŭrigis  
dum tiuj sezonoj,  
fariĝis famaj  
pro agoj heroaj.  
Tie ni per akraj  
lancoj elfluigis

sangon el vundoj  
kaj ruĝigis glavojn.

16 Nun estas ni venintaj  
al la reĝaj domoj,  
tenataj en sklaveco  
sen ia kompatato.  
Koto manĝas plandojn  
kaj frido supre,  
muelŝtonojn ni turnas,  
tristas ĉe Fróði.

17 Manoj ripozu,  
ŝtonoj staru senmovaj,  
mian taskon mi faris,  
finiĝu mizero.  
Laboras manoj,  
mankas ripozo  
ĝis trovas Fróði  
la faron sufiĉa.

18 Brakoj de herooj  
estu akraj pintstangoj,  
armiloj sangruĝaj.  
Vekiĝu, Fróði!  
Vekiĝu, Fróði,  
se volas vi aŭdi  
niajn kantojn,  
rakontojn antikvajn.

19 Fajron mi vidas  
oriente de la urbo,  
batalaj signoj  
militon aŭguras.  
Alvenos armeo  
ĉi tien baldaŭ  
kaj de la reĝo  
urbon bruligos.

20 Ne tenos vi plu  
la tronon de Hleiðra,  
ruĝajn ringojn  
nek egajn muelŝtonojn.  
Ni kaptu pli forte  
la tenilon, virino,  
ne nin varmigas

sango de mortigitoj.

21 Forte muelis  
filino de mia patro,  
ĉar vidis ŝi la finon  
de multaj homoj.  
Saltis subteniloj  
for de la muelkesto.  
Muelegu ni plue!

22 Muelegu ni plue!  
Filo de Yrsa,  
ido de Hálfðan,  
venĝos pro Fróði.  
Estos li nomita  
ŝia filo kaj frato.  
Ambaŭ ni tion scias.“

23 Muelis virinoj,  
pliigis siajn fortojn,  
agis la junaj  
en furiozo.  
Tremis la stangoj,  
kolapsis kesto,  
rompiĝis duparten  
la peza ŝtono.

24 Filino de giganto  
vortigis jene:  
„Ni jam muelis, Fróði,  
ĝis fina halto,  
jam plene servis  
je la muelado.“

*(Baldur Ragnarsson, La Tradukisto 26, 1997).*

## El Heimskringla

### Ólafur la sankta kaj liaj fratoj

Reĝo Ólafur konkeris la regnon kiu antaŭe apartenis al la kvin reĝoj kaj prenis garantiulojn de terposedantoj kaj bienuloj. Li kolektis impostojn el Valoj en nordo kaj en diversaj lokoj en Heiðmörk kaj poste reiris al Raumaríki kaj tiam okcidenten, al Haðaland. Tiun vintron mortis Sigurður sýr, lia bofrato. Poste reĝo Ólafur veturis al

Hringaríki, kaj Ásta, lia patrino, aranĝis grandan festenon por li. Tiam Ólafur portis sola titolon de reĝo en Norvegujo.

Oni rakontas ke kiam reĝo Ólafur estis en la festeno ĉe sia patrino, Ásta, ŝi kondukis al li siajn infanojn kaj montris ilin al li. La reĝo metis Guttormur, sian fraton, sur sian genuon, sed sur la alian genuon Hálfdan, sian fraton. La reĝo rigardis la knabojn. Li faris grimacojn kaj rigardis ilin kolere. Tiam la knaboj ektimis kaj preskaŭ ploris.

Poste Ásta portis al li sian plej junan filon, kiu nomiĝis Haraldur, tiam tri jara. La reĝo faris grimacojn kaj kolere rigardis lin, sed la knabo rigardis supren, kontraŭ li. Tiam la reĝo ektiris la harojn de la knabo, sed reage la knabo ektiris al la reĝo la mentonan barbon.

Tiam la reĝo diris:

– Venĝema vi ja estos, parenco mia.

Alian tagon la reĝo estis promenanta ekstere en la tereno de la bieno kune kun sia patrino, Ásta. Tiam ili venis al iu lago. Tie estis ludantaj la knaboj Guttormur kaj Hálfdan, filoj de Ásta. Ili estis konstruintaj grandajn bienojn kaj grenejojn kaj havis multajn bovojn kaj ŝafojn. Tio estis ilia ludo. Mallongan distancon for, apud la lago, ĉe iu argila golfeto estis Haraldur; li havis tie lignajn splitojn el kiuj multaj flosis apud la bordo. La reĝo demandis lin kio tio estas. Li diris ke tio estas liaj militŝipoj. Tiam la reĝo ridis kaj diris:

– Eble foje tiel okazos, parenco mia, ke vi gvidos ŝipojn.

Poste la reĝo vokis al si Hálfdan kaj Guttormur. Tiam li demandis al Guttormur:

– Kion vi volus havi en plej granda kvanto, parenco mia?

– Grenkampojn, li diris.

– Kiel vastajn grenkampojn vi volus havi?

Li respondis:

– Tion mi volus ke tiu ĉi duoninsulo, kiu elstaras el la laga bordo, estu plenesmita de greno ĉiusomere. – Sed tie troviĝis dek bienoj.

La reĝo respondis:

– Tie povus ja kreski multe da greno.

Tiam li demandis al Hálfdan kion li volus havi en plej granda kvanto.

– Bovinojn, li diris.

La reĝo demandis:

– Kiom da bovinoj vi volus havi?

Hálfdan diris:

– Kiam ili irus al la lago por trinki ili staru kiel eble plej dense tute ĉirkaŭ la lago.

– Grandajn bienojn vi ambaŭ volas havi. En tio vi similas al via patro.

Poste la reĝo demandis al Haraldur:

– Kion vi volus havi en plej granda kvanto?

Li respondis:

– Servistojn.

La reĝo diris:

– Kiom da servistoj vi do volus havi?

– Tiom ke ili povus je unu manĝo formanĝi ĉiujn bovinojn de mia frato.

La reĝo ridis kaj diris al Ásta:

– Ĉi tie vi estas edukanta estontan reĝon, patrino.

Oni ne mencias pli el ilia interparolo.

## **Arnljótur gellini**

Þóroddur kaj lia kunulo vojaĝis longe tra dezertiĝintaj arbaroj. Iun vesperon ili atingis al iu bieneto kaj eniris tie. En la domo viro kaj virino sidis ĉe fajro. La viro nomiĝis Þórir, li diris ke la virino, kiu tie sidas, estas lia edzino kaj ke la bieneto apartenas al ili. La bienulo invitis ilin resti tie, kion ili akceptis. Li diris al ili ke li iris tien pro tio ke li fuĝis el la regiono pro hommortigoj. Oni bone regalis Þóroddur kaj lian kunulon. Ili manĝis ĉiuj kune ĉe la fajro. Poste oni aranĝis dormlokojn sur benko por Þóroddur kaj lia kunulo, kaj ili ekkuŝis por dormi. Ankoraŭ flamis en la fajrejo.

Tiam Þóroddur vidis ke eniras viro el alia domo; li neniam antaŭe vidis tiel grandan homon. Tiu viro portis skarlatruĝajn vestojn, ornamitajn per orfadenoj, kaj estis majesta laŭ aspekto. Þóroddur aŭdis ke li riproĉas la gemastroj pro tio ke ili akceptis gastojn sed apenaŭ havas sufiĉe da nutraĵo por si mem.

La dommastrino respondis:

– Ne estu kolera, frato, malofte tio okazis. Prefere faru utilan helpon al ili, ĉar por tio vi estas pli kapabla ol ni.

Ĵóroddur aŭdis ke oni nomas tiun grandan viron Arnljótur gellini kaj ankaŭ ke la dommastrino estas lia fratino. Ĵóroddur estis aŭdinta pri Arnljótur kaj ankaŭ ke li estas granda vojrabisto kaj krimulo.

Ĵóroddur kaj lia kunulo dormis dum la nokto ĉar ili estis lacaj pro la irado.

Sed kiam ankoraŭ restis triono el la nokto venis Arnljótur, petis ilin leviĝi kaj ekprepari sian forvojaĝon. Ĵóroddur kaj la alia tuj leviĝis kaj vestis sin. Oni donis al ili tagmanĝon. Poste Ĵórir donis skiojn al ili ambaŭ.

Arnljótur forvojaĝis kun ili. Li surmetis skiojn. Ili estis kaj larĝaj kaj longaj. Sed tuj kiam Arnljótur ekpuŝis la grundon per la skibastono li estis longan distancon for de ili. Tiam li atendis kaj diris ke ili tute ne atingos ien ajn tiamaniere kaj petis ilin suriĝi sur la skiojn ĉe li. Tion ili faris. Ĵóroddur estis pli proksima al Arnljótur kaj tenis sin al lia zono, sed la kunulo de Ĵóroddur tenis sin al li. Tiam Arnljótur skikuris tiel rapide kiel estante sola.

Ili venis al iu ŝirmkabano kiam estis pasinta triono el la nokto, eniris en ĝin, ekbruligis tie fajron kaj kuiris manĝon por si. Sed kiam ili estis manĝantaj Arnljótur petis ke ili ne forĵetu ion el la restaĵoj de la manĝaĵo, nek ostojn nek pecetojn. Arnljótur prenis el sia tuniko teleron el arĝento kaj manĝis el ĝi. Sed kiam ili jam estis sataj Arnljótur kolektis la restaĵojn de la manĝaĵo. Poste ili preparis sin al enlitiĝo.

En unu fino de la domo estis subtegmentejo sur transversaj traboj. Arnljótur kaj la du aliaj supreniris en la subtegmentejon kaj ekkuŝis tie por dormi. Arnljótur havis grandan lancon, orumitan malsupre de la pinto, sed la tenilo estis tiel alta ke oni apenaŭ atingis la radikon de la pinto per la mano; ĉe la zono li portis glavon. Ili estis kunportintaj en la subtegmentejon kaj siajn armilojn kaj vestojn. Arnljótur petis ambaŭ siajn kunulojn ne fari bruon; li kuŝis plej proksime al la enirejo al la subtegmentejo.

Nelonge poste eniris en la domon dek-du viroj. Estis komercistoj survoje al Jamtaland kun siaj varoj. Enirante en la domon ili faris multe da bruo kaj estis gajaj. Ili faris grandan fajron por sin varmigi. Sed manĝante ili elĵetis el la kabano ĉiujn ostojn. Poste ili preparis sin por dormi kaj ekkuŝis sur la benkojn apud la fajro. Sed ili ne estis longe dormintaj kiam venis al la kabano granda gigantino. Enirinte ŝi forte balais ĉirkaŭ

si, prenis la ostojn kaj ĉion, kion ŝi opiniis manĝebla, kaj enbuŝigis ĝin. Poste ŝi kaptis la viron kiu troviĝis plej proksime al ŝi, tute disŝiris lin kaj ĵetis sur la fajron. Tiam la aliaj vekiĝis, kvazaŭ el malbona sonĝo, kaj rapide ekstaris, sed ŝi mortbatis ilin, unu post la alia, ĝis kiam nur unu restis vivanta. Li kuris sub la subtegmentejon kaj vokis, petante pri helpo, se io troviĝus en la subtegmentejo kio povus helpi al li. Arnljótur etendis sin al li kaj kaptis lin je la ŝultroj kaj eklevis lin en la subtegmentejon. Tiam la gigantino iris al la fajro kaj ekmanĝis la virojn kiuj jam estis rostitaj.

Tiam Arnljótur leviĝis, kaptis sian lancon kaj per ĝi trapikis la gigantino inter la ŝultroj, tiel ke la pinto eliĝis tra la brusto. Ŝi rapide ekmoviĝis, kriegis laŭte kaj elkuris el la kabano; la lanco elglitis el la mano de Arnljótur kaj ŝi forkuris kun ĝi. Arnljótur eligis el la kabano la kadavrojn de la mortintoj, reordigis la pordon kaj ĝian kadron, ĉar ĉion ĉi la gigantino estis rompinta kiam ŝi elkuris tra la pordo. Poste ili dormis dum la restaĵo de la nokto.

Kiam lumiĝis ili leviĝis kaj manĝis sian tagmanĝon; sed post la manĝado Arnljótur diris:

– Nun ni disiĝos ĉi tie. Vi iru laŭ la sledaj postsignoj de la komercistoj kiuj venis ĉi tien hieraŭ, sed mi volas serĉi mian lancon. Mi havos rekompence ĉion kion mi opinias valora el la posedaĵoj de la komercistoj. Vi, Þóroddur, esprimu mian saluton al reĝo Ólafur kaj diru al li ke li estas tiu kiu mi pleje deziras renkonti. Sed li certe ne opinios mian saluton valora je io ajn.

Poste, levinte la arĝentan teleron, li viŝis ĝin per la tuko kaj diris:

– Donu tiun ĉi teleron al la reĝo kaj diru ke ĝi estas mia saluto.

Poste ili preparis sin al forvojaĝo kaj disiĝis. Þóroddur kaj lia kunulo ekvojaĝis kaj kun ili tiu el la grupo de la komercistoj kiu restis vivanta. Þóroddur daŭrigis sian vojaĝon ĝis kiam li venis al reĝo Ólafur en Kaupangur kaj rakontis al li pri ĉiuj eventoj el lia vojaĝo, esprimis al li la saluton de Arnljótur kaj donis al li la arĝentan teleron.

La reĝo diris ke estas bedaŭrinde ke Arnljótur ne venis al li. – Kaj estas granda domaĝo ke tiel nobla homo kaj grandanima eniĝis en malbonajn agojn.

*(Ólafur S. Magnússon)*



## El la Sagao de Egill

### La batalo en Vinerikejo

*La ĉefa heroo en tiu sagao estas Egill Skallagrímsson. La ĉi-tiea parto rakontas pri batalo en Anglujo inter la angla reĝo Aðalsteinn kaj la invadinta skota reĝo Ólafur. Tiu batalo estas historia fakto; ĝi okaziĝis ĉ. la jaro 937 – laŭ la sagao en areo nomita de ĝi Vinerikejo ĉe la rivero Vina. Egill kaj lia frato, Þórólfur, kun siaj ĉ. 360 kunbatalantaj vikingoj, estas dungitaj soldatoj en la armeo de Aðalsteinn. La grafoj Hringur kaj Aðils el Kimrujo estas en la armeo de Ólafur kun siaj trupoj. En la antaŭa tago Egill kaj Þórólfur gvidis siajn trupojn kontraŭ tiujn de Hringur kaj Aðils. En tiu batalo Þórólfur mortigis Hringur, sed Aðils fuĝis en la arbaron.*

Reĝo Aðalsteinn restis la antaŭan nokton en la jam menciita kastelo, kaj tie li informiĝis, ke jam okaziĝis batalo sur la erikejo; li tuj preparis sin, kaj la tuta armeo, kaj veturis norden en la erikejon; tiam li havigis al si ĉiujn novaĵojn detale, pri tio kiel tiu batalo finiĝis. Venis tiam renkonte al la reĝo la fratoj, Þórólfur kaj Egill; li dankis ilin bone pro ilia konduto kaj pro la venko kion ili akiris, li promesis al ili sian plenan amikecon; ili restis tie ĉiuj kune dum la nokto.

Reĝo Aðalsteinn vekigis sian armeon jam frue matene. Li parolis kun siaj estroj kaj ordonis kiel oni aranĝos la armeon. Li metis sian propran kolonon plej antaŭe, kaj post tio li metis en la pinton de tiu kolono la plej taŭgajn batalistojn. Tiam li diris, ke Egill estru tiujn trupojn – sed Þórólfur, li diris, – estru siajn proprajn batalistojn kaj tiujn aliajn trupojn, kiujn mi ordonos ĉe li. Tiu estu la dua kolono en mia armeo, kiun li estru, ĉar la Skotoj kutime estas movemaj en kolonoj; ili kuras tien kaj reen, kaj ekaperas en multaj lokoj. Ili ofte fariĝas danĝeraj, se oni ne atendas pri tio, sed restas cedemaj sur la batalkampo se oni kontraŭrigardas ilin.

Egill respondis al la reĝo: – Mi ne deziras, ke mi kaj Þórólfur disiĝos en batalo, kvankam mi ŝatus, ke oni ordonus nin tien, kie la plejfortuloj estas bezonataj kaj la plej akra kontraŭstaro okazos.

Þórólfur diris: – Ni lasu la reĝon decidi kie li deziras lokigi nin. Ni servu lin laŭ kio li ŝatus. Mi povas ankaŭ preni vian lokon se vi deziras.

Egill diris: – La ordono estas via, sed tiun dividon mi ofte pentos.

Nun la armeo aranĝis sin en kolonojn laŭ la ordonoj de la reĝo, kaj oni eklevis standardojn. La reĝa kolono staris sur la kampo ĝis la rivero, sed la kolono de Þórólfur iris pli supre, ĉe la arbaro.

Reĝo Ólafur ekordigis sian armeon, kiam li vidis ke Aðalsteinn jam ordigis la sian. Li ankaŭ faris du kolonojn, kaj li lasis ke lia standardo kaj la kolono, kiun li mem estris, staris kontraŭ reĝo Aðalsteinn kaj lia kolono. Tiam ambaŭ havis tiel grandajn armeojn, ke estis neniua diferenco inter ilia multnombreco, sed la alia kolono el la armeo de Ólafur forveturis pli proksime al la arbaro, kontraŭ la trupojn estratajn de Þórólfur. La ĉefoj tie estis skotaj grafoj. Tie estis granda homaro, plejparte Skotoj.

La kolonoj nun alproksimiĝis unu la alian, kaj fariĝis baldaŭ furioza batalo. Þórólfur tre forte atakis kaj portigis sian standardon laŭ la arbaro kaj intencis tiel antaŭenakiri, ke li alvenos flanken de la reĝa kolono. Ili portis ŝildojn antaŭ si, sed la arbaro estis dekstre; ili ĝuis ŝirmadon de ĝi. Þórólfur atakis tiamaniere, ke malmultaj el liaj batalantoj estis antaŭ li, sed dum li estis la plej neatendante, tiam kuras tie el la arbaro grafo Aðils kaj la trupo sekvanta lin; ili tuj lancis multajn halebarojn samtempe sur Þórólfur, kaj li estis mortigata tie ĉe la arbaro, sed Þorfinnur, kiu portis la standardon, retiris sin ĝis kie la trupoj estis pli multnombraj, sed Aðils atakis ilin kaj fariĝis granda batalo. Tiam Skotoj eklaŭtis venkokrion, ĉar ili mortigis la ĉefon.

Sed kiam Egill aŭdis tiun krion kaj vidis ke la standardo de Þórólfur reiris, ŝajnis al li evidente ke Þórólfur ne sekvis mem. Li kuris tien inter la kolonoj. Li tuj informiĝis pri tio kio okazis kiam li renkontis siajn batalantojn. Li tiam tre instigis la trupojn al kuraĝa atakado. Li estis la plej antaŭa en la fronto. Li portis glavon nomitan Naður enmane. Li tiam antaŭenbatalis kaj frapis al ambaŭ flankoj kaj mortigis multajn homojn. Þorfinnur tuj portis la standardon post li, sed la armeo sekvis la standardon. Fariĝis tie la plej arda batalo. Egill bataladis antaŭen ĝis kiam li atingis grafon Aðils. Ili ne interfrapis dum longa tempodaŭro antaŭ ol Aðils mortiĝis kaj multaj batalantoj ĉirkaŭ li, sed post lia morto la trupoj fuĝis, kiuj antaŭe sekvis lin, sed Egill kaj liaj trupoj ĉasis ilin kaj mortigis ĉiun kaptiton, ĉar estis sencele peti indulgon de ili. Sed la skotaj grafoj ne longe plu rezistis; kiam ili vidis siajn aliajn kunbatalantojn fuĝante, ili rapide forkuris.

Sed Egill kun siaj trupoj tiam celis al tie, kie restis la reĝa kolono, kaj atingis ĝin el la flanko, tiel ke ili tre baldaŭ kaŭzis tie grandnombran mortigadon. Tiam malordiĝis

la kolono kaj konfuziĝis. Multaj el la batalantoj de Ólafur ekfuĝis, sed la vikingoj eksonis venkokrion. Sed kiam al reĝo Aðalsteinn iĝis konstatite, ke konfuziĝis la kolono de reĝo Ólafur, tiam li instigis sian batalantaron kaj antaŭenportigis standardon; li fortege antaŭenatakis tiel ke la trupoj de Ólafur cediĝis kaj la mortitoj multnombriĝis. Reĝo Ólafur mortiĝis tie kaj la plejparto de la armeo alvenigita de li, ĉar oni mortigis ĉiujn kaptitajn fuĝantojn. Reĝo Aðalsteinn ĝuis tie grandan venkon.

---

Reĝo Aðalsteinn foriris el la batalo, sed liaj batalantoj ĉasis la fuĝantojn. Li rajdis reen al la kastelo kaj ne tranoktis ĝis tie, sed Egill ĉasadis la fuĝantojn kaj mortigis ĉiun ajn li kaptis.

Post tio li reiris kun siaj batalantoj, kaj alvenis la batakampon, kie li trovis sian mortintan fraton. Li suprenlevis la kadavron kaj lavis ĝin; post tio li kostumis ĝin laŭkutime. Ili fosis tombon kaj metis Þórólfur en tie kun ĉiuj liaj armiloj kaj vestoj. Poste Egill ĉirkaŭmetis orajn braceletojn sur ambaŭ liajn brakojn antaŭ ol foriri; fine li alportis ŝtonojn al la tombo kaj kovris per humo. Egill tiam verkis strofon:

Iris, kiu ne timis,  
energivigla grafmortiginto,  
kuraĝa mortis – en granda –  
Þórólfur – tumulto de Óðinn.  
La tero rekreskos – sed mi devas –  
ĉe Vina super mian  
– estas morta doloro – kovri  
funebnon – bonegan fraton.

Kaj li denove verkis:

Oriente mi amasigis  
faligitajn ĉe batakamplimoj,  
furioze batalis dum atakis  
mi Aðils per la blua Naður.  
La juna Ólafur faris ŝtalan  
tondron kontraŭ la Angloj;  
Hringur – la kovroj ne malsatis –  
daŭrigis armilan kunvenon.

Post tio Egill kaj liaj kunuloj iris al reĝo Aðalsteinn, kaj li piediris al antaŭ kie la reĝo sidis kaj drinkis. Regis tie laŭta ĝojo. Kaj vidante, ke Egill jam alvenis, la reĝo diris ke oni malplenigu la honorajn sidlokojn kontraŭ li mem, kaj diris, ke Egill sidu tie.

Egill sidiĝis tie kaj metis la ŝildon ĉe siaj kruroj. Li portis kaskon surkape kaj metis la glavon surgenue kaj jen tiris ĝin el la glavingo, jen puŝis ĝin reen. Li sidis rekte sed klinis la kapon antaŭen. Egill estis grandtrajta envizaĝe, fruntlarĝa, brovgranda, la nazo nelonga sed tre dika, la barbgrundo larĝa kaj longa, la mentono mirinde larĝa kaj same pri la makzeloj, koldika kaj ŝultrolarĝa multe pli ol aliaj viroj, krudaspekta kaj kruelmiena kiam li koleriĝis. Li estis belstatura kaj pli alta ol la plejmultaj homoj, la haroj lupgrizaj kaj densaj; li frue kalviĝis. Sed dum li sidis tiel, kiel jam priskribite, li mallevis unu el la brovoj malsupren sur la vangon, sed levis la alian supren al la harradikoj. Egill estis nigrokula kaj malhelbrova. Li ne volis drinki kvankam oni alportis tion, sed li jen levis, jen mallevis la brovojn.

Reĝo Aðalsteinn sidis sur sia trono. Li ankaŭ havis glavon surgenue, kaj kiam ili ambaŭ jam sidis tiel dum ioma tempodaŭro, la reĝo elingis la glavon kaj tenis oran braceleton de sia brako, pezan kaj grandan, kaj pendigis ĝin sur la glavpinton, ekstaris kaj iris sur la plankon kaj etendis trans la fajron al Egill. Egill ekstaris kaj elingis la glavon kaj iris sur la plankon. Li metis la glavon en la arkon de la braceleto kaj prenis al si, reiris al sia sidloko. La reĝo residiĝis sur sian tronon. Sed residiĝante, Egill tiris la braceleton sur sian brakon; je tio liaj brovoj denove enordiĝis. Li malsuprenmetis la glavon kaj la kaskon, kaj akceptis animalkornon, kiun oni portis al li, kaj drinkis el ĝi.

*Notoj pri la du strofoj: La du strofoj en la teksto estas verkitaj en la originalo laŭ la antikva skandinava metro „dróttkvætt“. Ĉiu verso tie enhavas internan rimon, kaj ĉiuj du versoj estas kunligitaj per aliteracio. Ambaŭ eroj devis esti preterlasitaj en la traduko. – La malfacilaj postuloj de la metro ankaŭ kaŭzis, ke la skaldoj kutime uzis tre nekutiman vortordon en tiaj versaĵoj. Ili ankaŭ uzis multe la t.n. „kenningar“, t.e. dupartaj kunmetitaj metaforoj multe kultivataj en la antikva norvega, kaj precipe la islanda poezio, kaj bazitaj sur la antikva skandinavia mitologio. Tiujn du karakterizaĵojn la tradukinto penis konservi ĉi-tie. Sekvas iom da klarigoj.*

*1-a strofo: Grafmortiginto, kiu ne timis, iris energivigla en granda tumulto de Óðinn, kuraĝa Þórołfur mortis. La tero rekreskos super mian bonegan fraton ĉe Vina, estas morta doloro, sed mi devas kovri funebbron. – Grafmortiginto, Þórołfur – Óðinn, la plej supra dio en la As-religio, – tumulto de Óðinn, batalo – Vina, rivero.*

*2-a strofo: Mi amasigis oriente faligitojn ĉe batalkamplimoj, (mi) batalis furioze dum mi atakis Aðils per la blua Naður. La juna Ólafur faris ŝtalan tondron kontraŭ la Angloj; Hringur daŭrigis armilan kunvenon, la korvoj ne malsatis. – Oriente, oriente trans la maro, en Anglujo (norvega parolturno) – ĉe batalkamplimoj, sur la batalkampo, – Naður, la glavo de Egill – ŝtala tondro, ŝtalo: armilo; ŝtala tondro: batalo – armila kunveno, batalo – la korvoj ne malsatis, estis multe da manĝaĵo por ili (kadavroj).*

*(Eysteinn Sigurðsson)*

## La ĉagreno de Egill post siaj filoj

*En tiu parto de la sagao Egill maljuniĝis kaj fariĝis farmisto en sia bieno Borg. Sekvas ĉi-tie lia poemo, Filperdo, verkita nekrologe post liaj du filoj. Oni notu ke temas tie pri poemo unika inter tiaj postmortaj verkoj; la temo ne estas la vivkariero de la mortintoj, sed la propraj sentoj de la poeto. Li sentas obstinan venĝdeziron kontraŭ la dio de la maro, kaj li eĉ ribelas kontraŭ Óðinn mem, la plej supera el la asaj dioj, kvankam li finfine pardonas lin pro liaj donacoj al si: la poetan talenton kaj virecan kuraĝon.*

Böðvar, filo de Egill, estis tiam plenkreska. Li estis tre promesa junulo, belaspekta, grandstatura kaj forta, kiel estis Egill kaj Þórólfur je lia aĝo. Egill amis lin multe. Böðvar ankaŭ tre amis sian patron.

Okazis iun someron, ke ŝipo de komercistoj venis en la Blank-Riveron. Estis tie starigita merkato. Egill aĉetis tie multe da porkonstrua ligno kaj ĝin transportigis hejmen. Tion faris liaj bienservistoj sur okremila boato, kiun posedis Egill. Estis iufoje, ke Böðvar petis permeson iri kun ili. Ili permesis tion. Li tiam iris kun la servistoj al la merkatloko Vellir. Ili estis ses sur la okremila boato. Kiam ili estis pretaj por hejmeniro, ili devis atendi la altmaron, kaj povis ekiri nur malfrue en la vespero. En la nokto ekfuriozis sudokcidenta ventego, kiun kontraŭdirektis la forfluo de la tajdo. Fariĝis tiam ondegaj sur la fjordo, kiel okazas ofte en tiaj cirkonstancoj. Finiĝis tiel, ke la boato enprofundiĝis kaj dronis ili ĉiuj. La sekvantan tagon la dronintoj elmergiĝis. La kadavro de Böðvar albordiĝis je la terlango Einarsnes, sed kelkaj kadavroj atingis ĝis la suda fjordbordo, kaj tien alportiĝis ankaŭ la boato. Ĝi estis trovita apud la bordroko Reykjarhamar.

Tiun saman tagon Egill eksciis pri la okazaĵo kaj tuj forrajdis por serĉi la kadavrojn. Li trovis la kadavron de Böðvar albordiĝinta. Li levis ĝin ĉevalen, fiksitis ĝin inter siaj genuoj kaj rajdis kun ĝi al la terkapo Digranes, ĝis la tombaltaĵo de Skallagrímur, sia patro. Li malfermigis la tombon kaj kuŝigis Böðvar apud Skallagrímur. Poste oni refermis la tombon; estis jam vespero, kiam oni estis finintaj tion. Post tio Egill rajdis hejmen al Borg. Veninte tien li tuj iris al tiu alkovo, kie li kutimis dormi. Li enkuŝiĝis kaj riglis la pordon de interne. Neniu kuraĝis diri al li vorton.

Estas dirite, ke kiam oni entombigis Böðvar, Egill estis vestita ĉi tiel: La kruringoj estis streĉe ĉirkaŭlaĉitaj al la kruroj. Li surhavis ruĝan kirtelon el kotona

drapo kun strikta superparto, laĉita flanke. Laŭ onidiro la korpo de Egill ŝvelis tiom en lia ĉagreniĝo, ke la kirtelo krevis for de li kaj same la kruringoj.

Egill ne malfermis la alkovon dum la sekvanta tago. Nek manĝon nek trinkon li akceptis. Tiun tagon kaj la postan nokton li enlitis. Neniu havis la kuraĝon lin alparoli.

Sed la trian matenon, tuj je heliĝo, lia edzino, Ásgerður, donis ĉevalon al iu viro, petante lin rajdi plej impete okcidenten al Hjarðarholt (bieno, kie loĝis Þorgerður, filino de Egill, la plej aĝa el liaj infanoj) kaj rakonti al ilia filino, Þorgerður, ĉiujn okazaĵojn; li atingis tien meze en la posttagmezo. Li diris ankaŭ al Þorgerður, ke Ásgerður petas ŝin iri plej urĝe suden al Borg.

Þorgerður igis onin seli por si ĉevalon kaj petis la akompanion de du viroj. Ili daŭrigis sian rajdadon dum la vespero kaj dum la nokto ĝis ili venis al Borg. Þorgerður tuj eniris la sidoĉambregon. Ásgerður salutis ŝin kaj demandis, ĉu ili jam manĝis vespermanĝon.

Þorgerður respondis per alta voĉo: – Nenian vespermanĝon mi manĝis kaj nenion mi ekmanĝos antaŭ ol ĉe Freyja (unu el la diinoj, ŝi ne intencas manĝi ĝis post sia morto). Mi ne scias pli bonan elirvojon ol tiun de mia patro. Mi ne deziras postvivi miajn patron kaj fraton.

Ŝi alpaŝis la alkovon kaj vokis: – Patro, malfermu la pordon, mi volas, ke ni ambaŭ iru la saman vojon.

Egill malriglis la pordon. Þorgerður surpaŝis la alkovoplankon kaj riglis la pordon. Ŝi kuŝiĝis en alian liton, kiu estis tie.

Tiam diris Egill: – Bone vi decidis, filino, ke vi volas akompani vian patron en la morton. Grandan amon vi montras al mi. Kiel estas atendeble, ke mi deziras vivi post tia perdego?

Post tio ili silentis iom da tempo. Tiam diris Egill: – Kio estas, filino, ĉu vi maĉas ion?

– Maĉas mi dulson (manĝebla, salgusta speco de algo), ŝi diras, – ĉar mi opinias, ke per ĝi mi pli malbone fartos ol antaŭe. Mi opinias, ke alie mi tro longe vivos.

– Ĉu ĝi malbonfartigas onin? diras Egill.

– Tre, ŝi diras, – ĉu vi deziras gustumi?

– Ĉu tio valoras? li diras.

Iom poste ŝi vokis kaj petis pri trinko. Oni donis al ŝi akvon.

Tiam diris Egill: – Estas tiel, ke ĉiam pli soifas tiu, kiu manĝas dulson.

– Ĉu vi deziras trinki, patro? ŝi diras.

Li akceptis kaj trinkis gluteme la trinkaĵon; ĝi estis en korno. Tiam diras Þorgerður: – Nun ni estas trompitaĵ. Tio estas lakto.

Tiam Egill mordis pecon el la rando de la korno, tiom, kiom atingis liaj dentoj, kaj forĵetis la kornon.

Tiam diris Þorgerður: – Kion ni faru nun? Fiaskinta estas nia plano. Nun mi proponas, patro, ke ni daŭrigu nian vivon, tiom, ke vi povos verki memorpoemon post Böðvar, sed mi fiksos ĝin per tranĉo de runoj sur lignaĵon. Poste ni mortu, se ni deziros. Malbaldaŭ verkos, mi opinias, via filo Þorsteinn tian poemon post Böðvar, sed ne decas, ke li ne estu primemorigita, ĉar apenaŭ ĉeestos ni la funebran feston.

Egill diras, ke estas tre neprobable, ke li nun povas verki, eĉ se li klopodos, – sed mi tamen volas provi, li diras.

Egill estis havinta filon, kiu nomiĝis Gunnar kaj ankaŭ mortis iom antaŭe. Kaj estas tia la poemo:

1 Malfaĉile  
movi langon,  
levi vekton  
vers-pesilan,  
min evitas  
Óðin-a predo,  
el mens' ĝin preni  
pene mi provas.

2 El menso tardas  
veni la Trovo  
gajiginta  
filojn de Frigg,  
la frua gajno  
el mond' de gigantoj,  
ĉar min premas  
ŝarĝo peza.

3 Ĉar mia gent'  
al fino falas,  
ve, kiel arboj

ventfrapitaj.  
Ĝoji ne povas,  
kiu portas  
filon el morna  
lito de morto.

4 Mi menci  
tamen morton  
de la patro,  
patrino povra.  
Lignon por versoj  
el vortotemplo  
mi por mi portas  
kun freŝaj frondoj.

5 Brute breĉon  
batis la maro  
en muro genta  
de l'generinto.  
Vakas vaste  
oscedante  
ondfarita  
fendo post filo.

6 La mar' min monstre  
malbontraktis,  
mankas al mi  
miaj amatoj.  
La mar' dismordis  
ligilon gentan,  
fortan fibron  
for de mi falĉis.

7 Se eblus venĝi  
vire per glavo,  
morto batus  
bierfaranton,  
se eblus frapi  
fraton de ventoj,  
mi kurus kontraŭ  
ĉi reĝo kaj Rán.

8 Sed mi sentis  
min senfortulo  
venĝon fari  
al filmurdinto.



Ĉiu ja povas  
vidi de povra  
oldulo fatan  
forlasitecon.

9 Multon mara  
reĝ' de mi rabis,  
peze pensi  
pri l' malapero  
frua de l' filo.  
For la ŝirma  
ŝildo de l' gento  
sur vojo gaja.

10 Mi scias certe,  
ke l' filo tiam  
tute ne tenus  
sin poltrone,  
kiam taŭgus  
al li la aĝo  
armi la manojn  
militiste.

11 Li plej aprecis  
la vortojn patrajn,  
kvankam ĉiuj  
kontraŭ mi pledis,  
plej kompleze  
hejme li helpis,  
pleje pretis  
min apogi.

12 Ofte tranĉas  
la koron tristo,  
manko de miaj  
filoj amaras.  
Batalbruon  
kreski mi kredas,  
notas pluron  
kaj primeditas,

13 kiu alia  
kuraĝulo  
firme ĉe mia  
flanko starus?  
Obstinon skerme

sturmi mi devus,  
mi singardemu  
amikojn perdinte.

14 Kiun fidus  
mi, senfila,  
ve, jam restis  
preskaŭ neniuj;  
nigranima  
gentfalganto  
fratkadavron  
por ringoj vendas.

15 Oni diras:  
Filon perditan  
kompensi povas  
neniu sen naski  
novan idon,  
valore indan  
al la frato  
formortinta.

16 Ŝaton al homa  
hord' mi ne havas,  
malgraŭ ke multaj  
pacemon montras.  
Fil' de mi kaj de l'  
vivkunulino  
scivole venis  
domon Óðin-an.

17 Sed biermarĉa  
bienulo  
staras morne  
sur mia mano.  
Vane mi volas  
teni rekte  
teron de l' masko,  
ĉaron de l' menso,

18 post ol lia frat'  
per febra fajro  
furioza  
el mond' forflagris,  
li vivis virte,  
riproĉevite,

tute senkulpe  
laŭ mia kono.

19 Mi memoras,  
kiam levis  
en dian domon  
amiko de Gotoj  
la arbon gentan  
de mi kreskintan,  
la branĉon gentan  
de mia edzino.

20 Mi longe amikis  
la Lancreganton,  
lin mi fidis  
sekursente,  
ĝis la amiko  
de l'veturiloj,  
faranto de venkoj  
ĉi fidon fendis.

21 Oferadoras  
mi kontraŭ volo  
fraton de Vili,  
reganton de Valhöll.  
Tamen venis de  
amik' de Mímir  
al mi konsol'  
en granda ĉagreno.

22 Lupmalamiko  
lukti lerta  
donis al mi  
arton altan,  
pruntis al mi  
povon pretan  
por malkovro  
de perfiduloj.

23 Min ŝarĝas ŝultre,  
ke staras tie  
sur tera lango  
fratin' de l'lupo,  
mi tamen min tenas  
sinrege, serene,  
sen tristo morda

atendas morton.

Egill ĉiam pli bonfartiĝis dum la progreso de la verkado kaj fininte la poemon, li prezentis ĝin al Ásgerður kaj Þorgerður kaj al siaj geservistoj. Li tiam ellitiĝis kaj sidiĝis sur la ĉefsidlokon. Tiun ĉi poemon li nomis Filperdo. Post tio Egill okazigis funebran feston post siaj filoj laŭ malnova kutimo. Sed kiam Þorgerður reeriris hejmen, Egill adiaŭis ŝin per donacoj.

## Klarigoj

En la poemo kelkaj „kenningar“ estas laŭvorte tradukitaj kaj bezonas prilumigon.

**1. Óðin-a predo**, la poezio. Óðinn estis la estro de la dioj en la pranorda mitologio. Li ruze havigis al si la magian trinkaĵon, kiu faris ĉiun poeto, kiu ĝin gustumis.

**2. La Trovo gajiginta filojn de Frigg**, la magitrinkaĵo de la poezio, la poezio mem. Frigg estis la edzino de Óðinn kaj patrino de multaj el la dioj. – La frua gajno el mond’ de gigantoj, ankoraŭ la trinkaĵo de poezio. La trinkaĵo estis origine konservata de iu giganto.

**7. Bierfaranto**, la dio de la maro. Laŭ la mitologio li estis de giganta deveno, sed tamen ofte invitis la diojn al festoj. En tiuj festoj ĉio fariĝis per si mem, ankaŭ biero, pro tio „bierfaranto“. – Frato de ventoj, la mardio. – Rán, la nomo de lia edzino.

**14. Nigranima...ventas**, kiu akceptis monkompenson („ringojn“) pro la morto de parenco, tiel neglektante la venĝodevon, tiu rifuzas ŝirmi sian parencaron kaj estiĝas ĝia malamiko.

**16. Domo Óðin-a**, Valhöll, la palaco de mortigitoj en batalo, regataj de Óðinn.

**17. Biermarĉa bienulo**, la dio de la maro. – **Tero de l’masko**, vizaĝo, kapo; **ĉaro de l’menso**, kapo. Jen du vortbildoj uzataj flank-ĉe-flanke por esprimi la saman ideon. Laŭ ĉiuj aliaj samspecaj vortbildoj „ĉaro de l’menso“ devus signifi „brusto“, ĉar tie loĝis la menso laŭ la antikva kredo, sed certe oni povas atenti tion de Egill Skallagrímsson, ke li sentis la unua el ĉiuj poetoj, ke oni pensas per la cerbo, sed por fari tiun novecan vortbildon pli komprenebla, li klarigas ĝin per alia, pli travidebla vortbildo.

**18. kaj 19.** Ĉi tie temas pri Gunnar, la filo de Egill, kiu mortis iom antaŭ Böðvar.

**19. Amiko de Gotoj**, Óðinn, tiel nomita, ĉar la Gotoj (en Gotland, Svedujo) lin aparte adoris. – La arbo genta, la branĉo genta, la filo.

**20. Lancreganto, amiko de veturiloj, faranto de venkoj**, Óðinn.

**21. Frato de Víli, reganto de Valhöll, amiko de Mímir**, Óðinn.

**22. Lupmalamiko, Óðinn**. – **Arto alta**, la poezio.

**23. Fratin’ de l’lupo**, Hel, la regantino de tiuj, kiuj mortis pro malsano kaj maljuneco; la morto mem.

*(Baldur Ragnarsson (teksto); Baldur Ragnarsson kaj K. Kalocsay (poemo), Voĉo de Islando, V, 1960.)*

## El Grettis saga

### La mortigo de la fratoj Grettir kaj Illugi

*Grettir pasigis la lastajn jarojn de sia elpeliteco sur la rokinsulo Drangey en la fjordo Skagafjörður; lia pli juna frato, Illugi – 18-jara – estis kun li. Oni komisiis al krudulo, Þorbjörn öngull – la „hoko“ – iri al la insulo kaj mortigi Grettir. Magiscia maljunulino, edukintino de Hoko, prisorĉis pecegon de ligno, kiun ŝi ĵetis sur la maron; ĝi alboridiĝis sur la insulo, kie Grettir ĝin trovis serĉante brullignon. Kiam li hakis ĝin,*

*la hakilo desaltis de sur la ligno sur lian femuron. La vundo ne saniĝis kaj fariĝis mortiga.*

Nun estu rakontate pri tio, ke Grettir tiel malsanis, ke li ne povis stariĝi. Illugi flegis lin, sed Glaumur, la sklavo, devis gardostari. Li multe grumblis pro tio, dirante, ke li timas pri sia vivo, eĉ kiam nenio minacas. Tamen, li eliris, sed kontraŭvole. Kiam li venis al la ŝnurŝtuparo (kiu pendis de sur la alta insulo) li parolis kun si mem, dirante, ke li ne suprentiru la ŝtuparon. Baldaŭ li ekdormemis kaj kuŝiĝis kaj dormis la tutan tagon, ĝis Þorbjörn alvenis al la insulo kun siaj akompanantoj. Ĉi tiuj ekvidas, ke la ŝtuparo ne estas suprentirita. Tiam diris Þorbjörn: „Ŝanĝiĝis ilia kutimo, ke ili ne gardopaŝadas kiel ordinare, kaj eĉ pendas la ŝtuparo. Povas esti, ke okazos pli grandaj aferoj dum nia vojaĝo ol ni antaŭe supozis. Nun ni rapidu al la kabano ne perdante la kuraĝon. Ni konsciu, ke ni devas taŭgi ĉiu laŭ plejblo, se ili estas sanaj.“ Post tio ili supreniris sur la insulon kaj ĉirkaŭrigardis. Ili ekvidis viron, kiu kuŝis proksime al la suprenirejo kaj ronkegis. Þorbjörn rekonis, ke estas Glaumur kaj frapis lin per la manŝirmilo de sia glavo sur la orelon kaj ordonis al la fiulo vekigi – „kaj certe ne tiu estas envianda, kiu donas sian vivon al via fido.“ Glaumur alrigardis dirante: „Nun ili volas fari kiel ordinare. Aŭ ĉu vi kredas troa mian liberon, ke mi kuŝas ĉi tie en la malvarmo?“ Hoko diris: „Ĉu vi estas freneza ne vidante, ke viaj malamikoj estas venintaj kaj mortigos vin ĉiujn?“ Tiam Glaumur ne diris plion, sed ekkriis laŭ sia plenpovo, rekonante la homojn. „Ĉesigu tuj la kriojn,“ diris Hoko, „kaj informu nin pli ilia loĝejo, alie mi tuj mortigos vin.“ Tiam eksilentis Glaumur, kvazaŭ trempita en akvon. Þorbjörn diris: „Ĉu la fratoj estas en kabano, aŭ kial estas ke ili ne ĉirkaŭpaŝadas?“ „Tio ne estas tiel facila“ diras Glaumur, „ĉar Grettir estas malsana kaj baldaŭmorta, sed Illugi flegas lin.“ Hoko demandis pri la sanstato de Grettir kaj kio estis okazinta al li; Glaumur rakontis pri tio, kiel Grettir vundiĝis. Tiam ridis Hoko kaj diris: „Vera estas la pradirajo, ke fidamikoj estas la plej fidindaj, kaj ankaŭ tiu, ke malbone estas havi sklavon kiel fidamikon, kiel vin, Glaumur, kaj estas vi fiinde perfidinta vian mastron, kvankam li ne estas bona.“ Multaj riproĉis lin pro lia malfideleco kaj batadis lin preskaŭ senkonscia kaj lasis lin tie. Sed ili rapidis al la kabano kaj frapis forte sur la pordon. Tiam diris Illugi: „Frapas nia virŝafo, frato,“ li diras. „Kaj frapas forte,“ diras Grettir, „kaj senindulge.“ Kaj tiumomente rompiĝis la pordo. Tiam Illugi ekkaptis siajn

armilojn kaj baris la pordon, tiel ke ili ne povis eniri. Ili interbatalis dum longa tempo, kaj povis ili nur lancpiki, sed Illugi senpintigis ĉiujn lancojn. Kaj vidante, ke ili ne povis antaŭeniĝi, ili grimpis sur la tegmenton kaj ĝin trarompis. Tiam Grettir leviĝis sur la kuŝejo, kaptis lancon kaj elpikis inter trabojn. Tie kontraŭis lin viro kun nomo Kárr, kaj trapikiĝis li tuj. Hoko petis ilin esti singardaj kaj ne elmeti sin kontraŭ pikojn – „ĉar ni ja povos ilin venki, se ni prudentos.“ Ili malfiksis la finojn de la ĉeftrabo kaj ĝin premegis, ĝis rompiĝo. Grettir povis nur duonstari sur la genuoj. Li kaptis sian sabron. Kaj tiumomente ili saltis en la ruinon, kaj ekis forta batalo. Grettir frapis per la sabro kontraŭ iun Vikar, trafante sur lian maldekstran ŝultron kaj tranĉis rekte tra la ŝultroj ĝis eliĝo sub la dekstra flanko, tiel ke la homo tratanĉiĝis tute, kaj falis la du korpopartoj malsupren sur Grettir. Tial li ne povis levi la sabron sufiĉe rapide. Kaj en tiu momento Porbjörn la Hoko pikis lin inter la ŝultrojn farante al li gravan vundon. Tiam diris Grettir: „Senŝirma estas la dorso, dum la frato ne gardas.“ Illugi ĵetis tiam sur lin ŝildon kaj defendis lin tiel brave, ke ĉiuj laŭdis lian bravecon. Grettir parolis al Hoko: „Kiu gvidis vin sur la insulon?“ Hoko diris: „Kristo montris al ni la vojon.“ „Sed mi konjektas,“ diris Grettir, „ke la fia virinaĉo, via kvazaŭpatrino, montris ĝin al vi, ĉar ŝiajn konsilojn vi certe fidas.“ „Tio ne gravas,“ diris Hoko, „kiun ni fidis.“ Nun lanĉis ili fortan atakon, sed Illugi defendis ambaŭ ilin bravege, sed Grettir estis tiam tute senpova, kaj pro vundoj kaj malsano. Tiam ordonis Hoko, ke ili ĉirkaŭfermu Illugi per ŝildoj, – „ĉar neniam mi trovis lian egalulon inter liaj samaĝuloj.“ Tion ili faris kaj alpremis lin per traboj kaj armiloj, ĝis li ne plu povis sin defendi. Tiam ili povis kapti lin. Li estis iom vundinta la plej multajn, kiuj estis en la atako, sed mortiginta tri el la kunuloj de Hoko. Post tio ili paŝis al Grettir. Li tiam estis falinta vizaĝ-al-tere. Li ne povis sin defendi, ĉar li jam estis ĉe morto pro la piedvundo. Lia femuro estis tiom infektita, ke la absceso jam invadis la intestojn. Ili faris al li tiam multajn vundojn, sed aŭ ne sangis aŭ nur malmulte. Sed kiam ili kredis, ke li estas mortinta, kaptis Hoko la sabron, buŝante, ke sufiĉe longe li ĝin portis. Sed Grettir estis ĉirkaŭfingrinta forte la tenilon, tiom, ke ĝi ne estis eltirebla. Ili tirpenis multaj laŭvice, sed vane. Estis ok, kiuj provis tion, sen rezulto. Tiam Hoko diris: „Kial ni domaĝu la banditon? Metu lian manon kontraŭ tabulon.“ Tion farinte, ili dehakis la manon ĉe la pojno. Tiam malfirmiĝis la fingroj kaj malfiksiĝis de la tenilo. Tiam kaptis Hoko la sabron per ambaŭ manoj kaj hakis per ĝi

sur la kapon de Grettir. Estis fortega frapo, tiel ke la sabro ne ĝin eltenis kaj breĉiĝis mezakraĵe. Vidante tion, ili demandis pro kio li difektis tiel bonan armilon. Respondis Hoko: „Des pli ĝi rekoneblas, se iu demandos.“ Ili diris, ke ne estis necesa lia faro, ĉar la homo estis jam mortinta. „Plio tamen farendas,“ diris Hoko. Li tiam hakis du- aŭ trifoje sur la kolon de Grettir, antaŭ ol la kapo disiĝis. „Nun mi scias porcerte, ke Grettir estas senviva, kaj estas ni mortigintaj grandan heroon,“ diris Þorbjörn. „Ni prenu kun ni la kapon, ĉar mi ne volas perdi la monon oferitan por lia mortigo. Ili tiam ne povos ne vidi, ke ja mi estas la mortiginto.“ Ili petis lin agi laŭ sia bontrovo, sed ne estis aprobemaj, ĉar al ĉiuj ŝajnis malnobla lia faro. Tiam Hoko parolis al Illugi: „Estas granda domaĝo, ke vi, kiu bravulas tiom, trafis en tian malsaĝaĵon, akompani ĉi tiun banditon al liaj krimfaroj, kaj pro tio fariĝi senrajta kaj mortigenda.“ Illugi respondas: „Ni atendu kun eldiroj ĝis post la kunveno de Alþingi (la juĝ- kaj leĝdona ĉef-sembleo de la lando) en la somero; tiam montriĝos, kiuj senrajtiĝos. Nek vi, nek la virinaco, via edukintino, juĝos tie pri tiuj ĉi aferoj, ĉar estas viaj sorĉfaroj kaj malicmagio, kiuj mortigis Grettir, kvankam vi ankaŭ armilis sur lin, kiam li jam estis tuj antaŭ morto, kaj tiel aldonis hontan fiagon al fimagio.“ Tiam diris Hoko: „Brave vi parolas, sed ne estos tiel. Mi volas montri, ke mi domaĝas vian bravulecon, kaj ne mortigi vin, se vi ĵuros, ke vi ne venĝos kontraŭ iu, kiu partoprenis ĉi tiun aliron.“ Illugi diris: „Ĉi tion mi estus konsiderinta, se Grettir estus povinta sin defendi, kaj estus vi lin venkintaj honore kaj brave. Sed nun neniel probablas, ke mi volu savi mian vivon, fariĝante tiel egale malnobla, kiel vi. Estas facile por mi diri kun rapido, ke neniu malutilos al vi tiom, kiel mi, se mi vivos, ĉar malfrue mi forgesos, kiel vi mortigis mian fraton. Preferas mi multe pli la morton.“ Tiam Þorbjörn interkonsiliĝis kun siaj kunuloj, ĉu ili donu vivon aŭ ne al Illugi. Ili diris, ke li estru pri la agoj, ĉar estis li, kiu gvidis la aliron. Hoko diris, ke li ne deziras teni gardon kontraŭ tiu viro, kiu neniajn ĵurojn volas fari. Kiam Illugi eksciis, ke ili decidis mortigi lin, li ekridis: „Nun vi decidis ion pli plaĉindan!“ Ili kondukis lin, kiam pli heliĝis, al la orientparto de la insulo kaj morthakis lin tie. Ĉiuj laŭdis lian bravecon kaj opiniis lin malsimila al siaj samaĝuloj.

*(Baldur Ragnarsson, Voĉo de Islando, V, 1960.)*

## La travintrado en Reykjahólar

Grettir venis al Reykjahólar ĵus antaŭ komenciĝo de la vintro. Li petis al Þorgils permeson pri travintrado en lia hejmo.

Þorgils diris ke manĝaĵo estos al li libera kiel al aliaj liberaj homoj, – sed ne troviĝas ĉi tie nur frandaĵoj.

Grettir diris ke tio ne kaŭzos malfacialaĵojn.

– Estas ankaŭ alia malhelpo, diris Þorgils. – La ĵurfratoj Þorgeir kaj Þormóður, kiuj ne estas rigardataj tre pacemaj, venos kaj loĝos ĉi tie dum la vintro. Mi ne scias kiel konvenas al vi resti kune, sed ili ĉiam rajtas resti ĉi tie kiam ili tion deziras. Vi ja ankaŭ rajtas resti ĉi tie se vi volas, sed neniu el vi havos la rajton kvereli aŭ fari malbonon unu al la alia.

Grettir diris ke li nepre ne iniciatos kverelon kun iu ajn, precipe ĉar tio tiel gravas al la mastro.

Nelonge poste la ĵurfratoj venis hejmen. Ne fariĝis bonaj interrilatoj inter Þorgeir kaj Grettir, sed la agoj de Þormóður estis neniel kritikindaj. Þorgils, la mastro, diris al la ĵurfratoj ĉion la samon kion li jam diris al Grettir. La rilatantoj tiel respektis Þorgils ke neniu eldiris riproĉajn vortojn unu al la alia, kio tamen ne signifis ke ili reciproke havas amikajn pensojn unu al la alia. Tiel pasis launua parto de la vintro.

Oni diras ke Þorgils posedis insulojn kiuj nomiĝas Ólafseyjar. Tiuj insuloj situas en la fjordo dek-unu kilometrojn de la duoninsulo Reykjanes. En unu el la insuloj Þorgils havis bonan virbovon kiu paŝtiĝis tie. Oni ankoraŭ ne iris al la insulo por albordigi ĝin. Þorgils ofte parolis pri tio ke li deziras ekhavi la virbovon antaŭ la Kristnasko.

Estis iun tagon ke la ĵurfratoj planis iri por venigi la virbovon, se aldoniĝus la tria viro por helpi pri la tasko. Grettir proponis ke li iru kun ili, kion la ĵurfratoj akceptis. Poste ili iris tri kune per dekremila boato. La vetero estis malvarma kaj vento blovis el nordo. Ili ekveturis de la boathaveneto ĉe Hvalshaushólmur. La vento iom pliiĝis. Ili atingis la insulon kaj prenis la virbovon.

Tiam Grettir demandis ĉu ili preferas enboatigi la virbovon aŭ teni la boaton, ĉar estis granda ondoplaŭdego apud la insulo. Ili petis lin teni la boaton. Li staris apud la mezo de la ŝipo ĉe la flanko rigardanta for de la bordo. La ondoj plaŭdis ĉe liaj ŝultroj,



sed li tenis tiel fikse ke la boato ne moviĝis. Þorgeir levis la malantaŭan parton de la virbovo sed Þormóður la antaŭan parton kaj kune ili enboatigis ĝin. Poste ili eksidis por remi. Þormóður remis en la antaŭa parto, Þorgeir meze sed Grettir en la malantaŭa parto de la boato kaj ili ekremis sur la fjordon. Kiam ili jam preterpasis Hafraklettur ekestis ŝtormo.

Tiam Þorgeir diris:

– La malantaŭa boatparto ŝajnas tute ne antaŭeniĝi.

Grettir respondis:

– La malantaŭa parto ja ne restos senmova se oni bone remos en la antaŭa parto!

Tiam Þorgeir tiel fikse premis la remilojn ke ambaŭ remilingoj foriĝis. Tiam li diris:

– Ne igu la boaton halti dum mi reordigos la remilingojn.

Tiam Grettir fikse tiris la remilojn dum Þorgeir ordigis la remilingojn. Sed kiam Þorgeir volis ekremi, montriĝis ke jam tiel eluziĝis la remiloj ke Grettir disrompis ilin ĉe la boatrandoj. Þormóður diris ke pli bone estas malpli energie remi kaj nenion rompi. Grettir ekkaptis du trajojn, kiuj kuŝis en la boato, kaj hakis kavojn en la pavezojn kaj poste forte ekremis tiel ke ĉiu lignaĵo krakis. Sed ĉar la boato estis fortika kaj la remantoj energiaj, ili fine atingis al Hvalshaushólmur.

Grettir demandis ĉu ili preferas iri hejmen kun la virbovo aŭ surbordigi la boaton. Ili preferis surbordigi la boaton. Ili suprentiris la boaton kun la tuta glacikovrita marakvo kiu troviĝis en ĝi. Sed Grettir kondukis la virbovon kiu tre malfacile antaŭeniĝis, rigida, grasa kaj spireganta. Sed kiam Grettir atingis ĝis proksime al la bieno Tittlingsstaðir la virbovo kapitulacis pri la irado.

La ĵurfratoj eniris en la domon ĉar neniu el la rilatantoj volis helpi al la alia pri lia tasko. Þorgils demandis pri Grettir, kaj la ĵurfratoj informis kie ili disiĝis de li. Tiam Þorgils sendis virojn kontraŭ lin kaj kiam ili atingis proksime al Hellishólar ili ekvidis viron iranta kontraŭ ilin, portanta virbovon sur la dorso. Estis Grettir, kaj li portis la virbovon. Ĉiuj miris pri lia grandega forto. Þorgeir sentis envion al Grettir pro lia granda forto.

Iun tagon post Kristnasko Grettir iris sola al la banfonto. Tion Þorgeir sciis kaj diris al Þormóður:

– Ni iru kaj provu kiel Grettir reagos se mi atakos lin kiam li eliros el la banfonto.

– Tiu ideo ne plaĉas al mi, diris Þormóður, – kaj vi ekhavos nenian bonon de li.

– Mi tamen volas iri, diris Þorgeir.

Li ekiris malsupren laŭ la deklivo kaj tenis alte la hakilon. Tiam Grettir iris supren de la banfonto kaj kiam ili renkontis unu la alian, Þorgeir diris:

– Ĉu estas vere, Grettir, ke vi foje diris ke vi neniam forfuĝos de unu kontraŭulo?

– Tion mi ja ne memoras kun certeco, diris Grettir, – sed ĝis nun mi ne forfuĝis longan distancon de vi.

Tiam Þorgeir suprenlevis la hakilon. Sammomente Grettir saltis sub Þorgeir kaj ĵetegis lin teren.

Tiam Þorgeir diris al Þormóður:

– Ĉu vi devas trankvile stari apude kiam tiu ĉi diablo faligas min sub sin?

Tiam Þormóður ekprenis la piedojn de Grettir kaj intencis ektiri lin de sur Þorgeir sed sen sukceso. Li havis sabron ĉe sia zono kaj volis ĝin elingigi. Tiam Þorgils, la bienulo, alvenis kaj petis la ĵurfratojn resti trankvilaj kaj lasi Grettir en paco. Ili agis laŭ tio kaj ŝajnis ke tio estis ŝerco. Ne okazis – laŭ tio kion oni scias – pli da interkolizioj inter ili. Oni opiniis ke Þorgils havis grandan rezultaton en tiu ĉi afero sukcesante trankviligi tiajn furiozulojn.

Sed je la komenciĝo de la printempo ili ĉiuj foriris. Grettir iris al Þorskafjörður. Oni demandis lin kiel plaĉis al li la travintrado kaj manĝaĵo en Reykjahólar.

Li respondis:

– Tio estas la loko kie mi plej ĝojis pri mia manĝo, tiujn fojojn kiam mi sukcesis ĝin atingi.

Poste li daŭrigis sian iradon okcidenten, trans la montojn.

— — —

En la somero Þorgils Arason rajdis al la asembleo de la parlamento, Alþingi, kun granda sekvantaro. Tie kunvenis la ĉefoj de la diversaj landpartoj. Baldaŭ Þorgils kaj la leĝodiristo, Skafti Þóroddsson, renkontis unu la alian kaj ekbabilis kune.

Tiam Skafti diris:

– Ĉu estas vere, Þorgils, ke vi havis en via hejmo dum la vintro tiujn tri virojn, kiuj estas rigardataj la plej grandaj perfortuloj kaj ĉiuj juĝitaj krimuloj, kaj ke vi sukcesis tiel trankviligi ilin ke neniu el ili faris malbonon al la aliaj?

Þorgils diris ke tio estas vera.

Skafti diris:

– Tio ja estas signo de grandanimeco. Aŭ kian karakteron ŝajnas ĉiu el ili havi, aŭ ĉu ĉiu el ili disponas pri multe da braveco?

Þorgils diris:

– Ili ja estas ĉiuj bravuloj. Sed mi opinias ke du el ili scias timi. Tamen en diferenca maniero, ĉar Þormóður estas religiema kaj timas Dion, sed Grettir tiel timas mallumon ke li ne irus ien ajn, kiam estas mallume, se li ĉiam povus agi laŭ sia bontrovo. Sed mi pensas ke Þorgeir, mia parenco, ne scias ian specon de timo.

– Vi certe priskribis ĝuste la karakteron de ĉiu el ili, diris Skafti. Poste ili ĉesigis la interparolon.

*(Ólafur S. Magnússon)*

## **La mortigo de Grettir kaj Illugi**

Grettir estis tiel malsana pro sia vundo ke li ne povis ekstari. Illugi sidadis ĉe lia lito sed Glaumur devis gardostari. Li ankoraŭ multe protestis kaj diris ke ili certe timas perdi la vivon kvankam nenio okazas. Li tamen eliris el la kabano, sed kontraŭ sia volo. Kaj kiam li venis al la ŝtupetaro li diris al si mem ke li ne suprentiros ĝin. Li nun fariĝis tre dormema, ekkuŝis kaj dormis la tutan tagon, ĝis kiam Þorbjörn venis al la insulo. Þorbjörn kaj liaj sekvantoj ekvidis ke la ŝtupetaro ne estas suprentirita.

Tiam Þorbjörn diris:

– Tio ja estas io neatendita, neniu gardanto videbla kaj la ŝtupetaro preta por nia supreniro. Eble epektiviĝos pli gravaj eventoj dum nia vojaĝo ol ni unue pensis. Nun ni rapidu al la kabano, kaj ni ne igu mankon de kuraĝo malhelpi nin. Ni sciu kun certeco, ke se ili estas sanaj, ni nepre bezonas ke neniu el ni ŝparu siajn fortojn en la batalo.

Poste ili supreniris sur la insulon kaj ĉirkaŭrigardis. Tiam ili vidis ke iu viro kuŝas proksime al la loko de supreniro kaj ronkas laŭte.

Porbjörn ekkonis ke tio estas Glaumur, iris al li kaj frapetis lian orelon per la tenilo de la glavo kaj diris al la kadukulo ke li vekigu, – kaj vere tiu ne estas en bona situacio kies vivo dependas de via fidindeco.

Glaumur suprenrigardis kaj diris:

– Estas same kiel ordinaro! Aŭ ĉu vi opinias ke mi havas tro multe da libereco kvankam mi kuŝas ĉi tie en la malvarmo?

Porbjörn diris:

– Ĉu vi estas tiel stulta ke vi ne perceptas ke viaj malamikoj jam venis kaj mortigos vin ĉiujn?

Tiam Glaumur nenion diris sed ekkriis tiel laŭte kiel li povis, kiam li ekkonis la virojn.

– Vi havas nur du alternativojn, diris Porbjörn, – ke vi aŭ eksilentu kaj montru al ni kiel atingi vian kabanon aŭ mi tuj mortigos vin.

Tiam Glaumur silentis, kvazaŭ oni estus subakviginta lin.

Porbjörn diris:

– Ĉu la fratoj estas en la kabano, aŭ kial ili tute ne estas videblaj ĉi tie?

– Tio estas facile klarigebla, diris Glaumur, – ĉar Grettir estas malsana, jam proksima al morto, kaj Illugi sidas ĉe lia lito.

Porbjörn demandis pri la sanstato de Grettir kaj kio okazis al li. Glaumur rakontis kiel okazis kiam Grettir vundiĝis.

Tiam Porbjörn ridis kaj diris:

– Vera estas la antikva esprimo ke malnova amikeco plej bone eltenas kiel ankaŭ la alia ke malbone estas havi sklavon kiel intiman amikon, esprimo kiu bone taŭgas pri vi, Glaumur, kiu tiel honte perfidis vian mastron, kvankam li ne estas bona.

Multaj el la aliaj insultis lin pro lia malfidelo kaj bategis lin, ĝis kiam li estis preskaŭ kripla, kaj igis lin kuŝi. Poste ili iris al la kabano kaj frapegis la pordon.

Tiam Illugi diris:

– La virŝafo Hösmagi frapas la pordon, frato.

– Kaj frapas iom forte, diris Grettir, – kaj malmilde.

Kaj sammomente la pordo disrompiĝis. Tiam Illugi kaptis siajn armilojn kaj kuris por defendi la enirejon tiel ke Þorbjörn kaj liaj sekvantoj ne sukcesis eniri. Ili faradis atakojn kaj nur povis utiligi la lancojn kies ĉiujn tenilojn Illugi sukcesis dishaki.

Kaj vidante ke ili atingas nenion daŭrigante tiamaniere ili kuris sur la tegmenton de la kabano kaj rompis truon en ĝin. Tiam Grettir ekstaris, kaptis lancon kaj ĵetis ĝin inter trabojn. La lanco trafis Kár, domanon de Halldór el Hof, kaj traĝis tra lia korpo.

Þorbjörn diris al siaj kunuloj ke ili agu singarde kaj ne tro endanĝerigu sin mem, – ĉar ni povas venki ilin se ni agos racie.

Ili forigis la terstriojn ĉe ambaŭ finoj de la tegmenta ĉeftrabo kaj hakadis ĝin ĝis kiam ĝi rompiĝis. Grettir kuŝis sur la genuoj kaj ne povis pli leviĝi. Tiam li kaptis la sabron kiu estis aparteninta al Kár la pli aĝa. En sama momento liaj malamikoj saltis malsupren sur la plankon de la kabano, kaj tuj ekestis granda batalo. Grettir hakis per la sabro al Víkar, sekvanto de Hjalti Þórðarson. La sabro atingis la maldekstran ŝultron de Víkar, kiam li saltis sur la plankon kaj traŝiris liajn ŝultrojn ĝis lia dekstra flanko, tiel ke ŝiriĝis lia trunko, kiu falis en du partoj sur Grettir. Tiam li ne povis suprenlevi la sabron tiel rapide kiel li volis. Kaj tion utiligis Þorbjörn öngull kaj pikis Grettir inter la ŝultroj; el tiu fariĝis granda vundo.

Tiam Grettir diris:

– Nuda estas la dorso de ĉiu kiu ne havas fraton.

Tiam Illugi ĵetis ŝildon super lin kaj poste defendis lin tiel brave ke ĉiuj laŭdis lian defendadon.

Tiam Grettir demandis al Þorbjörn öngull:

– Kiu gvidis vin survoje en la insulon?

Þorbjörn respondis:

– Kristo gvidis nin.

– Sed mi divenas, diris Grettir, – ke la mizera virinaĉo, via guvernintino, gvidis vin, ĉar certe vi fidis al ŝiaj konsiloj.

– Ne plu faras iun diferencon por vi al kiu ni fidis, diris Þorbjörn.

Ili faris fortajn atakojn, sed Illugi brave defendis ilin ambaŭ, sed Grettir tute ne estis plu batakapabla kaj pro vundoj kaj pro malsano.

Tiam Þorbjörn öngull ordonis al siaj sekvantoj ke ili portu ŝildojn al Illugi, – ĉar mi ĝis nun neniam trovis lian egalulon, kvankam li estas tiel juna.

Ili faris tion kaj tiel malvastigis lian spacon per lignaj traboj kaj armiloj ke li ne povis plu sin defendi. Tiam ili sukcesis lin aresti kaj tenis lin. Li jam vundis plej multajn el la partoprenantoj de la atako kaj mortigis tri el la sekvantoj de Þorbjörn.

Poste ili iris al Grettir. Tiam li estis jam falinta antaŭen. Do kiaj ajn defendaj agoj ne plu eblis al li, ĉar li ankaŭ jam estis proksima al morto pro la vundo. La tuta femuro kaj la malsupra parto de la ventro estis kovritaj de pusoplenaj ulceroj. La atakantoj ankoraŭ multe vundis lin, ĝis kiam malmulte aŭ tute ne sangis.

Sed kiam ili pensis ke li jam mortis Þorbjörn öngull ekkaptis la sabron kaj diris ke Grettir jam sufiĉe longe portis ĝin. Sed Grettir estis tiel forte preminta la fingrojn al la tenilo ke ĝi ne malfiksiĝis. Tiam multaj el la viroj aliris por helpi, sed vane. Ok viroj provis antaŭ ol ili ĉesigis la klopodojn, sed ankaŭ vane.

Tiam Þorbjörn öngull diris:

– Kial indulgi la kulpulon? Metu lian manon sur la trabon tie.

Kaj farinte tion ili forhakis lian manon ĉe la manradiko. Tiam la fingroj rektiĝis kaj foriĝis de la sabra tenilo. Tiam Þorbjörn öngull prenis la sabron per ambaŭ manoj kaj hakis per ĝi en la kapon de Grettir. Tio fariĝis tiel fortega hako ke la sabro ne eltenis tion, kaj forrompiĝis meze de ĝi parto el la tranĉrando. Kaj vidante tion oni demandis kial li detruis tiel bonan armilon.

Þorbjörn öngull respondis:

– Tiam oni des pli facile konos ĝin, se iu demandos pri ĝi.

Ili diris ke tiu hako ne estis necesa ĉar Grettir jam antaŭe estis mortinta.

– Li havu tamen pli da hako, diris Þorbjörn öngull.

Poste li hakis sur la kolon de Grettir du- aŭ trifoje, antaŭ ol foriĝis la kapo.

– Nun mi scias kun certeco ke Grettir jam mortis, diris Þorbjörn öngull.

Tiamaniere mortis Grettir, la plej granda bravulo kiu vivis en Islando. Kiam oni mortigis lin mankis unu vintro por ke li fariĝu 45 jara. Li estis 14 jara kiam li mortigis Skeggi, sed tio estis lia unua mortigo, kaj tiam ĉio evoluis al bono por li ĝis kiam li luktis kun la sklavo Glámur. Tiam li estis dudek jara. Sed kiam oni juĝis lin al elpeliteco li estis 25 jara. Li vivis 19 jarojn kiel elpelito kaj ofte estis en granda danĝero, sed ĉiam

bone tenis sian kredon laŭ eblecoj en liaj vivkondiĉoj. Plej multajn el la eventoj en sia vivo li antaŭvidis kvankam li ne sukcesis eviti sian sorton.

– Ĉi tie falis pro niaj faroj granda heroo, diris Þorbjörn. – Ni nun kunportu lian kapon al la bordo, ĉar mi ne volas perdi la monsumon kiun oni promesis pagi pro lia mortigo. Tiam oni ne povos dubi pri tio ke mi estas tiu kiu mortigis Grettir.

La aliaj diris ke tio estu laŭ lia decido sed ne esprimis entuziasmon, ĉar ili ne opiniis tiun agmanieron deca.

Tiam Þorbjörn öngull diris al Illugi:

– Estas granda fatalo pri tia bravulo kia vi estas ke okazis al vi la malsaĝaĵo eniĝi en fiagojn kun tiu ĉi elpelito kaj tiamaniere fariĝi krimulo kiun kiu ajn povas mortigi sen risko pri puno.

– Somere, kiam la asembleo de la parlamento, Alþingi, estos finita, vi scios kiuj tiam estos jam juĝitaj elpelitoj. Sed nek vi nek la virinaĉo, via guvernintino, juĝos pri tiuj ĉi aferoj, ĉar via sorĉado kaj aliaj malpiaĵoj mortigis Grettir, kvankam vi uzis armilojn kontraŭ li, kiam li jam estis proksima al morto.

Tiam Þorbjörn öngull diris:

– Kuraĝe dirite, sed tamen ne laŭ la vero. Sed mi volas montri ke mi bedaŭrus vian morton kaj tial mi volas proponi al vi ke vi tenu vivon se vi ĵuros fidelecon al ni kaj ne venĝos al iu el ni kiuj partoprenis en la ĵus faritaj agoj ĉi tie.

Illugi diris:

– Tio povus esti afero por diskuti se Grettir estus havinta eblecojn sin defendi kaj se vi estus venkintaj lin en honesta batalo. Sed nun oni ne povas atendi de mi ke mi elaĉetu mian vivon farante repaciĝon kun fihomo kia vi estas. Detaloj ne estas necesaj, sed neniu fariĝos al vi pli aktiva pri malamikaj faroj ol mi, se mi vivos, ĉar mi ja ne forgesos kiamaniere vi mortigis Grettir. Mi multe pli preferas morti.

Tiam Þorbjörn interkonsiliĝis kun siaj sekvantoj, ĉu ili igu Illugi teni vivon aŭ ne. Ili diris ke li decidu pri ĉiaj faroj, ĉar li gvidis ilian vojaĝon. Þorbjörn öngull diris ke li nevolonte riskos ke li kaj liaj sekvantoj estu en konstanta danĝero pri venĝo de tiu ĉi viro kiu rifuzis ĵuri al ili fidelecon aŭ ĝin promesi.

Kaj kiam Illugi eksciis ke ili intencas lin haki tiam li ridis kaj diris:

– Nun vi decidis laŭ mia prefero.

Kiam eklumiĝis ili kondukis Illugi pli orienten en la insulo kaj hakis lin tie. Ĉiuj laŭdis lian bravecon kaj opiniis lin malsimila al siaj egalaĝuloj. Poste ili entombigis ambaŭ fratojn en la insulo, sed la kapon de Grettir ili kunportis kun si kaj ĉion valoran de armiloj kaj vestoj.

Porbjörn öngull ne igis la sabron esti inter la objektoj kiuj dividiĝu inter ili. Li portis ĝin dum longa tempo post tio ĉi.

Ili kunportis Glaumur kiu konstante plendis. Dum la nokto la vetero trankviliĝis. Matene ili forremis de la insulo. Porbjörn öngull surbordiĝis en loko, kie li opiniis plej konvene, sed sendis la boaton al Björn.

Kiam ili estis en proksimaĵo de la bieno Ósland Glaumur komencis tiel intense plendegi ke ili ne havis emon plu kunporti lin kaj mortigis lin tie, sed li laŭte ploris antaŭ ol oni lin hakis.

Porbjörn öngull daŭrigis sian vojaĝon hejmen, al Viðvík, kaj opiniis ke li havis bonan sukceson en tiu ĉi vojaĝo.

*(Ólafur S. Magnússon)*

## El la Sagao de la Eyrbyggjar

*El la islandaj sagaoj Eyrbyggja saga povas esti rigardata kiel la ĉefa rakonto el la duoninsulo Snæfellsnes. Ĝi pritraktas eventojn el la periodo de ĉ. 880 ĝis 1031. Ĝi estas verkita iom frue en la 13-a jarcento.*

### **Komenca parto (mallongigita)**

Ketill la platnaza estis komence en servo al reĝo Haraldur la belhara. Ketill konkeris la Hebridajn Insulojn kaj fariĝis mem ilia ĉefo. Li sukcesis repaciĝi kun la eminentuloj tie sed ne zorgis pri servo al reĝo Haraldur. Pro tio la reĝo uzurpis sub sin ĉiujn posedaĵojn de Ketill en Norvegujo.

Björn, filo de Ketill, sukcesis perforte reakiri la posedaĵojn de sia patro kaj forpeli la intendantojn de tiuj posedaĵoj kiuj servis al la reĝo. Pro tio la reĝo tre ekkoleris kaj juĝis Björn elpelito el Norvegujo kaj deklaris ke kiu ajn rajtas mortigi lin sen ke tio estas rigardata kulpo. Poste li sendis kelkajn el siaj herooj kaj komisiis al ili



mortigi lin se ili lin trovos. Sed la amikoj de Björn avertis lin. Björn en rapideco eniĝis en sian velŝipon kun sia familio kaj ĉiuj kunportebaj posedaĵoj.

Pro tio ke la vintro estis proksima li tamen ne forlasis Norvegujon sed veliris suden laŭlonge de la marbordo ĝis la insulo Mostur. La tiea ĉefo, Þórólfur, akceptis lin kun ĉiuj liaj hejmanoj. Tie Björn Ketilsson restis kaŝe dum la vintro.

Þórólfur estis granda eminentulo kaj impone malavara. Li gardis tie sur la insulo Þór-templon kaj estis granda amiko de la dio Þór. Li estis grandstatura kaj forta, belaspekta, kun granda barbo. Tial oni nomis lin Mostrarskegg (Mostrar – genitivo de Mostur, skegg – barbo). Li estis la plej nobla homo en la insulo.

En la printempo Þórólfur donis al Björn bonan ŝipon kun ŝipanoj kaj ili veliris okcidenten en direkton al la parencoj de Björn.

Sed kiam reĝo Haraldur aŭdis ke Þórólfur Mostrarskegg estis doninta azilon al Björn Ketilsson – lia forpelito – li sendis al li iujn el siaj servistoj kun la ordono ke li aŭ forlasu la landon aŭ metu ĉiujn siajn aferojn sub juĝo de la reĝo.

Tio estis dek jarojn post kiam Ingólfur Arnarson ekloĝis en Islando. La vojaĝo de Ingólfur estis jam tre fama kaj tiuj, kiuj venis el Islando, diris ke tie estas bonaj vivkondiĉoj.

Þórólfur Mostrarskegg aranĝis grandan oferfestenon kaj petis konsilon de sia amiko, Þór, ĉu li repaciĝu kun la reĝo aŭ serĉu por si alian sorton. La respondo de Þór estis ke li iru al Islando.

Post la oferfesteno Þórólfur havigis al si grandan ŝipon kaj enŝipigis ĉiujn siajn kunportebajn posedaĵojn. Liaj domanoj kaj multaj el liaj amikoj ankaŭ enŝipiĝis kun li. Li malkonstruis la templon kaj enŝipigis plej multajn el ĝiaj lignaĵoj kaj la teron de sub la loko kie Þór (t.e. la skulptaĵo de Þór) estis troviĝinta.

Poste Þórólfur ekveliris. Li ricevis konvenan venton, trovis la landon kaj veliris okcidenten laŭlonge de la suda marbordo kaj preterpasis Reykjanes. Li enmarigis ambaŭ fostojn el sia honorseĝo kiu antaŭe estis lokita en la templo. Sur unu el la fostoj troviĝis skulptaĵo de Þór. Li deklaris ke tie en Islando li konstruos domon kie Þór surbordigos la fostojn. Kiam la fostoj enmariĝis ŝajnis al la ŝipanoj ke ili ekdrivas iom rapide en direkton al la pli norda fjordo. Ili ekveliris norden, okcidente de Snæfellsnes kaj en la fjordon. Ili vidis ke la fjordo estas treege larĝa kaj longa kun grandaj montoj

ambaŭflanke. Þórólfur donis nomon al la fjordo kaj nomis ĝin Breiðafjörður (la Larĝa Fjordo).

Li alboridiĝis ĉe proksimume la meza suda flanko de la fjordo, enmarigis la ankron en golfeto kiun ili poste nomis Hofsvogur (Templa Golfeto). Poste ili esploris la ĉirkaŭaĵon kaj eltrovis ĉe la pinto de iu duoninsulo ke Þór jam surboridiĝis tie kune kun la fostoj. Tiun duoninsulon Þórólfur poste nomis Þórsnes (la Duoninsulo de Þór). Li faris grandan bienon ĉe Hofsvogur kaj nomis ĝin Hofstaðir (La Bieno de la Templo). Tie li ankaŭ konstruigis grandan templon.

Þórólfur nomis la duoninsulon inter Vigrafjörður kaj Hofsvogur Þórsnes. Sur tiu duoninsulo troviĝas monto. Je tiu monto Þórólfur tiel multe kredis ke li deklaris ke tien neniu nelavita homo rajtas rigardi kaj ke nenion oni pereigu en la monto, nek bestojn nek homojn. Tiun monton li nomis Helgafell (la Sankta Monto) kaj kredis ke tien li iros, kiam li mortos, kaj ĉiuj parencoj de li, loĝantaj sur la duoninsulo.

Sur la pinto de la duoninsulo, kie Þór estis surboridiĝinta, li igis fari ĉiujn juĝojn kaj starigis tie provincan asembleon. Tie estis tiel sankta loko ke li nepre ne volis ke oni malsanktigu la kampon tie, nek per sangverŝado en bataloj nek oni rajtis tie eligi ekskrementon; por tio oni uzis certan rifon kiu nomiĝis Dritsker.

Björn Ketilsson estis velirinta al la Hebridaj Insuloj. Kiam li tien atingis lia patro, Ketill la platnaza, estis jam mortinta, sed tie li retrovis siajn gefratojn.

Li rimarkis ke liaj gefratoj havas jam alian religion ol li. Tion li opiniis signo pri malgrandanimeco ke ili rifuzis la religion de siaj parencoj. Pro tio li ne deziris daŭre resti kun ili. Li tamen restis dum la vintro ĉe sia fratino, Auður, kaj ŝia filo, Þorsteinn.

Sed kiam liaj gefratoj sentis ke Björn ne volas resti inter ili, ili nomis lin Björn la orientpensa.

Björn restis du vintrojn en la Hebridaj Insuloj. Poste li kun sia ŝipanaro veliris al Islando. Ili eniris en Breiðafjörður kaj kontaktis kun Þórólfur Mostrarskegg. Laŭ lia konsilo Björn faris al si bienon inter Stafá kaj Hraunsfjörður kaj loĝis en Borgarholt en Bjarnarhöfn.

Þórólfur Mostrarskegg edziĝis kiam li jam estis iom maljuna. Lia edzino nomiĝis Unnur. Ŝi naskis al li filon kiu nomiĝis Steinn. Tiun sian filon Þórólfur dediĉis al Þór kaj nomis lin Þorsteinn.

Þórólfur kaj Unnur ankaŭ edukis alian knabon kun la nomo Þorsteinn, kiun Þórólfur nomis Þorsteinn surtur, sed sian filon li nomis Þorsteinn þorskabítur (moruomordanto).

Þórólfur Mostrarskegg mortis en sia bieno Hofsstaðir.

Þorsteinn þorskabítur heredis la bienon Hofsstaðir kaj fariĝis grandbienulo. Li edziĝis al Þóra, filino de Ólafur feilan. Þorsteinn havis ĝenerale sesdek servistojn, kaj li bone zorgis ke ĉiam estu sufiĉe de manĝaĵoj por la multaj domanoj. Li estis ofte fiŝkaptanta kune kun iuj el siaj servistoj. Li starigis la bienon Helgafell kaj translokgis sian bienon tien. Li ankaŭ starigis bienon en la duoninsulo proksime al Hofsstaðir. Tiun bienon li donis al sia parenco Þorsteinn surtur.

Þorsteinn þorskabítur havis filon kiu estis nomata Börkur la dika. Somere, kiam Þorsteinn estis 25 jara, lia edzino, Þóra, naskis al li alian filon kiu ricevis la nomon Grímur. Tiun filon Þorsteinn dediĉis al Þór, diris ke li fariĝu templestro kaj tial nomis lin Þorgrímur. Aŭtune de la sama jaro Þorsteinn iris al Höskuldsey por fiŝkaptado.

Iun vesperon en la aŭtuno la ŝafoprizorganto de Þorsteinn iris al ŝafoj norde de Helgafell. Li vidis ke la norda flanko de la monto malfermiĝas. Li vidis grandajn fajrojn en la monto kaj aŭdis grandan bruadon kaj ĝojon, kaj kiam li aŭskultis, ĉu li distingas iujn vortojn, li aŭdis ke tie oni bonvenigas Þorsteinn þorskabítur kaj liajn ŝipanojn, kaj oni diris ke li eksidu sur la honorseĝon kontraŭ sia patro.

En la vespero la ŝafoprizorganto rakontis al Þóra, edzino de Þorsteinn, pri tiu ĉi vizio. Ŝi ne montris multe da entuziasmo, sed diris ke eble tio estas antaŭsigno pri pli grandaj eventoj.

Sekvantan matenon venis viroj el Höskuldsey kun la novaĵo ke Þorsteinn þorskabítur dronis dum fiŝkaptado kune kun siaj ŝipanoj. Tion oni opiniis granda domaĝo.

Þóra daŭre tenis sian bienon. Viro, nomita Hallvarður, fariĝis prizorganto de la bieno. Ili ekhavis kune filon, kiu nomiĝis Már.

La filoj de Þorsteinn þorskabítur edukiĝis ĉe sia patrino kaj estis bonpromesaj junuloj. Þorgrímur estis ilia gvidanto en ĉio kaj fariĝis templestro kiam li havis sufiĉe da aĝo por tio.

Þorgrímur edziĝis al Þórdís Súrsdóttir en Dýrafjörður. Tien li iris al siaj bofratoj, Gísli kaj Þorkell. Þorgrímur mortigis Vésteinn Vésteinsson en aŭtuna festeno en Haukadalur. Sed alian aŭtunon, kiam Þorgrímur estis 25 jara kiel lia patro, tiam Gísli Súrsón, lia bofrato, mortigis lin en aŭtuna festeno en Sæból. Kelkajn tagojn poste Þórdís, edzino de Þorgrímur, naskis filon kiu estis nomata Þorgrímur laŭ sia patro.

Iom poste Þórdís edziniĝis al Börkur la dika, frato de Þorgrímur, kaj ekloĝis kun li en la bieno Helgafell. Tiam Þorgrímur, ŝia filo, iris al Álftafjörður kaj estis edukata tie ĉe Þorbrandur. Li estis iom impertinenta dum sia juneco kaj estis pro tio nomata Snerrir kaj poste Snorri.

Snorri Þorgrímsson estis 14 jara kiam li iris al eksterlando kun siaj duonfratoj, Þorleifur kimbi kaj Þóroddur. Börkur la dika, lia onklo, donis al li kvin dekojn da arĝento por la vojaĝo. Ili ekhavis konvenan venton dum la vojaĝo kaj atingis Norvegujon aŭtune. Ili restis en Rogaland dum la vintro. Snorri restis ĉe Erlingur Skjálǵsson en Sóla, kaj Erlingur faris bone al li ĉar estis antikva amikeco inter la antaŭaj parencoj de ili, Hörða-Kári kaj Þórólfur Mostrarskegg.

La sekvantan someron ili vojaĝis al Islando kaj iom malfruiĝis, ĉar la vetero estis malkonvena kaj kelkfoje severa. Ili atingis Hornafjörður mallonge antaŭ la komenciĝo de la vintro.

Sed kiam ili preparis sin por la longa vojaĝo surlande montriĝis esti granda diferenco inter la ekipaĵo de Snorri kaj Þorleifur kimbi. Þorleifur aĉetis la plej bonan haveblan ĉevalon. Li havis tre ornamitan, elegantan selon. Li havis bonan glavon kaj orumitan lancon, malhelbluan tre orumitan ŝildon kaj ĉiuj liaj vestoj estis elegantaj kaj zorge faritaj. Li ankaŭ por tiu ekipaĵo elspezis la tutan restaĵon de mono kunportita por la vojaĝo. Sed Snorri portis nigran mantelon kaj rajdis sur bona nigra ĉevalino. Li havis malnovan preskaŭ eluzitan selon kaj la armiloj ne estis de speco eleganta. La ekipaĵo de Þóroddur estis inter tiuj du.

Ili rajdis okcidenten tra Síða kaj Fletir kaj tranoktis en Álftafjörður.

Poste Snorri rajdis al Helgafell kaj volis resti tie dum la vintro. Börkur ne montris multe da entuziasmo al tiu ideo, kaj oni ridis pri la ekipaĵoj de Snorri. Börkur esprimis ke Snorri malbone agis elspezante sian tutan monon.

Estis iun tagon frue en la vintro ke dek-du viroj, tute armitaj, eniris en la domon en Helgafell. Inter ili estis Eyjólfur la griza, parenco de Börkur. Li loĝis en Otradalur en Arnarfjörður.

Sed kiam oni demandis ilin pri novaĵoj tiam ili rakontis pri mortigo de Gísli Súrsson kaj de tiuj kiuj mortis pro liaj faroj antaŭ ol li falis mortinta. Aŭdante tiujn novaĵojn Börkur tre ĝojis kaj petis Þórdís kaj Snorri ke ili bone akceptu Eyjólfur, tiun homon kiu nuligis tiel grandan honton de ili kaj iliaj parencoj.

Snorri ne montris entuziasmon pri tiuj novaĵoj, sed Þórdís diris ke tiam ili estas bone akceptataj, – se kaĉo estas donata al la mortiginto de Gísli.

Börkur respondis:

– Mi ne intermiksos min en aferoj de manĝoj.

Börkur aranĝis ke Eyjólfur sidu en la honorseĝo kaj liaj kunuloj proksime al li. Ili igis siajn armilojn apogiĝi al la planko. Börkur sidis pli interne ol Eyjólfur kaj tiam Snorri.

Þórdís enportis kaĉotrogojn kaj kulerojn el korno, kaj kiam ŝi metis tion antaŭ Eyjólfur falis kulero el ŝia mano. Ŝi klinis sin kaj prenis la glavon de Eyjólfur kaj pikis per ĝi en lian femuron, sed la tenilo haltis ĉe la tablo; el tio fariĝis granda vundo. Börkur ekpuŝis antaŭen la tablon kaj batis al Þórdís. Snorri ekpuŝis Börkur tiel ke li faletis, prenis la brakon de sia patrino kaj sidigis ŝin ĉe sia flanko kaj diris ke la ĉagrenoj, kiujn ŝi jam havas, sufiĉas kvankam ŝi ne estas batata. Eyjólfur ekstaris kaj liaj kunuloj kaj ili apogis unu la alian.

La fino de tiu ĉi afero estis ke Börkur transdonis al Eyjólfur la rajton mem juĝi pri kompenso pro tiu ĉi afero, kaj li postulis multe da mono pro la vundo. Poste li foriris. Pro tio ĉi fariĝis malbonaj interrilatoj inter Börkur kaj Snorri.

En la printempa asembleo Snorri postulis de Börkur la heredaĵon de sia patro. Börkur respondis ke li pagos al li la heredaĵon, – sed mi ne emas, li diris, – dividi la bienon Helgafell, sed mi vidas ke ne konvenas ke ni posedu kune la saman bienon, kaj tial mi volas elaĉeti vian parton el la bieno.

Snorri respondis:

– Mi opinias plej juste ke vi taksu la bienon je tia prezo kiel plaĉas al vi sed ke mi decidu kiu el ni elaĉetu la bienon.

Börkur pripensis tiun ĉi aferon kaj opiniis ke Snorri ne havas sufiĉe da mono por elpagi la bienon, se li devus tuj pagi la tutan sumon, kaj taksis la duonon de la bieno je ses dekoj de arĝento, sed tamen forigis el la aĉeto la insulojn ĉar li opiniis ke li povos ricevi ilin je malalta prezo. Sekvis ankaŭ la kondiĉo ke la prezo estu tuj pagata sen ke la aĉetonto prunteprenu monon de aliaj por la aĉeto, – kaj nun vi tuj elektu, Snorri, diris Börkur, – tion kion vi deziras.

Snorri respondis:

– Oni ja povas rimarki, onklo Börkur, ke vi opinias ke mankas al mi mono kiam vi taksas la bienon Helgafell je tiel malalta prezo, sed mi elektas por mi la bienon hereditan de mia patro je tiu ĉi prezo kaj etendu al mi la manon kaj transdonu al mi la bienon.

– Tio nur povos okazi, diris Börkur, – kiam ĉiu monero de la prezo estas pagita.

Snorri diris al sia duonpatro, Þorbrandur:

– Ĉu mi transdonis al vi iun monsumon aŭtune kaj petis vin ĝin konservi por mi?

– Jes, diris Þorbrandur kaj prenis la monsumon de sub sia mantelo.

Tiam oni kalkulis la arĝenton kaj pagis por la bieno ĉiun moneron de ĝia prezo, kaj tiam ankoraŭ restis el la monsumo konservita de Þorbrandur ses dekoj de arĝento.

Börkur akceptis la monon kaj transdonis al Snorri la bienon.

Poste Börkur diris:

– Vi montriĝis havi pli da arĝenta mono ol mi pensis. Mi deziras ke ni aranĝu tiel ke la interrilatoj inter ni fariĝu pli bonaj ol ili estis dum certa tempo, kaj mi volas proponi al vi la avantaĝon ke ni kune loĝu en Helgafell ĝis kiam vi havos pli da brutaro ol vi nun havas.

Snorri respondis:

– Vi havu ĝuon de via brutaro kaj foriru el Helgafell.

Devis okazi laŭ la volo de Snorri.

Sed kiam Börkur estis jam preparinta sian foriron, Þórdís antaŭenpaŝis kaj nomis al si atestantoj pri tio ke ŝi disiĝas de sia edzo, Börkur, kaj menciis kiel kaŭzon ke li

batis ŝin kaj ke ŝi ne deziras estonte toleri batojn de li. Tiam oni dividis iliajn posedaĵojn kaj Snorri estis en la dividado reprezentanto de sia patrino ĉar li estis ŝia heredonto. Tiam Börkur elektis por si la alternativon, pri kiu li pensis ke iu alia devas elekti, ricevi malmulte da mono por la insuloj.

Post tio ĉi Börkur foriris el Helgafell al Meðalfellsströnd kaj loĝis unue en Barkarstaðir inter Orrahvoll kaj Tunga. Poste li transloĝiĝis al Glerárskógar kaj loĝis tie ĝis maljuneco.

*(Ólafur S. Magnússon tradukis kaj kompilis.)*

## **La mirindaj eventoj en Fróðá**

En la sama somero, kiam oni enkondukis kristanecon per leĝo en Islando, venis al Snæfellsnes ŝipo el Dublino. Plej multaj el la ŝipanoj estis el Irlando kaj la Hebridaj Insuloj sed malmultaj skandinavaj. Ili restis dum granda parto el la somero ĉe Rif kaj atendis tie konvenan venton por velveturi en la fjordon ĝis Dögurðarnes. Multaj homoj iris al la ŝipo por komerci kun la ŝipanoj.

En la ŝipo estis virino el la Hebridaj Insuloj kiu nomiĝis Þórgunna. La ŝipanoj diris ke ŝi havas tiajn objektojn kiuj certe estas maloftaj en Islando.

Sed kiam Þuríður, dommastrino en Fróðá, aŭdis tion ŝi nepre volis vidi la objektojn ĉar ŝi estis vantanima kaj ornamiĝema. Ŝi iris al la ŝipo, renkontis Þórgunna kaj demandis ĉu ŝi havas iajn eksterordinarajn tre specialajn vestaĵojn por virinoj. Ŝi diris ke ŝi ne havas iajn objektojn por vendi, sed aldonis ke ŝi havas objektojn kiujn porti decas en festenoj kaj en societo kun aliaj personoj. Þuríður petis permeson vidi la objektojn, kaj tion Þórgunna permesis al ŝi. Þuríður trovis la objektojn belaj kaj tre taŭgaj en solenaj okazoj, sed ŝi ne trovis ilin tre valoraj.

Þuríður esprimis la deziron aĉeti la objektojn, sed Þórgunna ne volis ilin vendi. Tiam Þuríður proponis ke Þórgunna restu en Fróðá ĉar ŝi sciis ke Þórgunna estas kapabla, kaj ŝi pensis ke ŝi povos atingi de ŝi la objektojn je bona okazo.

Þórgunna respondis:

– Mi opinias bone iri por resti ĉe vi, sed vi sciu ke mi ne emas multe pagi por mia restado, ĉar mi ja bone kapablas labori. Ankaŭ ne ĝenas min labori se mi ne devas fari krudan laboron. Mi volas mem decidi kiom mi elspezas el la mono kiun mi havas.

Þórgunna parolis iom severe pri tiu ĉi afero, sed Þuríður tamen deziris ke Þórgunna restu en Fróðá. Tiam oni elŝipigis la posedaĵojn de Þórgunna. Tio estis granda, ŝlosita kofro, kiun ŝi havis, kaj alia pli malgranda. Tiujn objektojn oni transportis al Fróðá.

Kaj kiam Þórgunna venis por sia restado en Fróðá ŝi petis ke oni montru al ŝi la liton en kiu ŝi dormu. Oni donis al ŝi lokon en la pli interna parto de la ĉefa ĉambro. Tiam ŝi malfermis la kofron kaj elprenis el ĝi litaĵojn, tre zorge faritajn. La liton ŝi kovris per anglaj vualoj kaj silka tuko. Krome ŝi elprenis el la kofro litkurtenon kaj ankaŭ baldakenon. ĉio ĉi estis tiel bonkvalita ke oni ne opiniis sin esti vidinta ion egalan.

Tiam Þuríður, la dommastrino, diris:

– Bonvolu taksi al mi la litaĵojn.

Þórgunna respondis:

– Mi ja ne kuŝos en pajlo nur por plaĉi al vi, kvankam vi estas multe por luksaĵoj.

Tion Þuríður ne ŝatis kaj ne menciis post tio ĉi aĉeton de la objektoj. Þórgunna laboris ĉiutage pri teksado kiam ŝi ne bezonis labori pri sekigado de fojno; sed tio estis ŝia laboro somere kiam estis seka vetero, kaj ŝi farigis al si rastilon kiun ŝi volis uzi sola.

Þórgunna estis grandstatura virino, dika kaj alta, tre korpulenta kun nigre bluaj okuloj kaj brunaj longaj haroj; ŝi havis ĉiutage bonajn manierojn kaj eniris la preĝejon ĉiutage, antaŭ ol ŝi komencis labori, sed ŝi nek estis facila en interrilatoj kun aliaj nek parolis multe ĉiutage. Oni opiniis ke Þórgunna estas jam pli ol kvindek jara, kaj tamen ŝi estis tre vigla.

Je tiu tempo Þórir la lignokrura jam loĝis en Fróðá kaj ankaŭ Þorgríma sorĉistino, lia edzino, kaj la interrilatoj inter ŝi kaj Þórgunna ne estis tre bonaj.

Kjartan, la filo de la gemastroj, estis la sola el la domanoj kun kiu Þórgunna volis havi rilatojn, kaj ŝi tre amis lin, sed li estis iom indiferenta al ŝi kaj ŝi ofte fariĝis



malbonhumora pro tio. Kjartan estis tiam dek-tri aŭ dek-kvar jara, jam alta kaj brava junulo laŭ aspekto.

La somero estis iom malseka, sed dum la aŭtuno estis ofte seka vetero. Tiam statis tiel en Fróðá ke la herbo de la tuta kulturita kampo estis jam falĉita kaj preskaŭ la duono de la fojno jam seka. Tiam venis bela tago – trankvila kaj hela – tiel ke neniu nuboj estis videbla sur la ĉielo.

La bienulo, Þóroddur, leviĝis frue en la mateno kaj dividis taskojn inter la gelaborantoj. Kelkaj transportis la fojnon al la fojnejo, kelkaj faris fojnstakojn, sed la virinoj ricevis la taskon sekigi la fojnon kaj oni dividis taskojn inter ili. La tasko de Þórgunna estis sekigi fojnon kiu sufiĉus kiel dumvintra furaĝo por unu bovo. La laboro bone progresis dum la tago.

Sed frue en la posttagmezo leviĝis nigra, dika nubojn supren laŭ la ĉielo en nordo super la monto Skor. La nuboj baldaŭ transiris la ĉielon ĝis ĝi estis super la bieno. Oni timis ke eliĝos pluvo el la nuboj. Þóroddur petis ke oni kunrastu la fojnon, sed Þórgunna daŭrigis sekigi la sian, ĝin turnante. Ŝi ne komencis ĝin kunrasti kvankam ŝi ricevis instrukciojn pri tio.

La densa nuboj rapide antaŭeniĝis kaj kiam ĝi troviĝis super la bieno Fróðá fariĝis tiel mallume ke oni ne vidis ion ekster la kampo kulturita kaj apenaŭ povis distingi inter siaj manoj. El la nuboj eliĝis tiel multe da pluvo ke tiu fojno, kiu ankoraŭ estis plata, tute malsekiĝis. La densa nuboj ankaŭ baldaŭ foriĝis, kaj heliĝis la ĉielo. Tiam oni rimarkis ke estis falinta sango sur la teron dum la pluvado.

Vespere fariĝis denove bona sekvetero, kaj sekiĝis baldaŭ la sango el la tuta fojno escepte el tiu kiun Þórgunna estis sekiginta. Ĝi ne sekiĝis, kaj neniam sekiĝis la rastilo kiun ŝi estis teninta.

Puríður demandis al Þórgunna kion ŝi opinias ke tiu ĉi mirindaĵo signifas. Ŝi diris ke tion ŝi ne scias, – sed ŝajnas al mi probable, ŝi diris, – ke tio ĉi antaŭdiras la morton de iu el la domanoj ĉi tie.

Vespere Þórgunna iris hejmen. Ŝi iris al sia lito kaj demetis la sangajn vestojn. Poste ŝi ekkuŝis en la lito kaj multe ĝemis. Oni rimarkis ke ŝi estis malsaniĝinta.

Tiu ĉi ekpluvo falis nenie ekster Fróðá.

Þórgunna ne volis gustumi iun manĝaĵon en la vespero. Sed sekvantan matenon, Þóroddur, la bienulo, iris al ŝi kaj demandis pri ŝia malsano, kaj kio ŝi opinias ke estos la fino de ĝi. Ŝi diris ke laŭ ŝia opinio ŝi ne ekhavas pli da malsanoj.

Poste ŝi diris:

– Mi opinias vin la plej saĝa homo en tiu ĉi bieno, ŝi diris, – tial mi volas diri al vi kiujn instrukciojn mi volas fari pri la havaĵoj, kiuj restas al mi, kaj pri mi mem, ĉar ja tiel okazos kiel mi diras, ŝi diris, – kvankam vi ne opinias multon rimarkinda pri mi, mi divenas ke nebone taŭgos agi kontraŭ la instrukcioj kiujn mi nun faras. La komenciĝo de tio ĉi estis tia ke mi divenas ke la fino povos fariĝi fatala se oni ne forte klopodos tion eviti.

Þóroddur respondis:

– Tre verŝajne vi pravas pri tio ĉi. Mi ankaŭ volas promesi al vi, li diris, – ke mi ne agos kontraŭ viaj konsiloj.

Þórgunna diris:

– Estas mia instrukcio ke mi volas ke oni portu min al Skálholt, se mi mortos pro tiu ĉi malsano, ĉar estas mia antaŭsento ke tiu loko estos dum sufiĉe longa tempo plej multe adorata en tiu ĉi lando. Ankaŭ mi scias, ŝi diris, – ke tie jam troviĝas pastroj por kanti por mi decan meson okaze de mia enterigo. Mi volas peti vin ke vi transportigu min tien. Vi havu el miaj posedaĵoj tiom kiom necesas por ke vi ne perdu pro tio ĉi. Sed el miaj posedaĵoj nedividitaj Þuríður ekhavu mian skarlatan mantelon. Mi agas tiel por ke ŝi ne tre bedaŭru ke mi aranĝas pri miaj aliaj posedaĵoj laŭ mia bontrovo. Sed mi volas ke vi prenu – rekompence por la elspezoj kiujn vi havos pro mi – tion kion vi volas aŭ kio plaĉas al ŝi el tio kion mi por tio donas. Mi havas ringon el oro kaj ĝi iru al la preĝejo kun mi, sed mian liton kaj litkurtenon mi volas ke oni bruligu en fajro, ĉar ili ne estos utilaj al iu homo, kaj mi ne diras tion ĉi pro bedaŭro pri tio ke iu ĝuus uzon de tiuj objektoj, se mi scius ke ili povus esti utilaj al iu, sed nun mi parolas tiel firme pri tio ĉi, ŝi diris, – ĉar mi ne deziras havi respondecon pri la granda malfeliĉo kiu certe okazos se oni en iu rilato ne agos laŭ miaj instrukcioj.

Þóroddur promesis agi laŭ ŝiaj petoj. Post tio ĉi la malsano de Þórgunna pliiĝis. Nelonge poste ŝi estis mortinta. La kadavron oni unue portis en preĝejon kaj Þóroddur igis fari ĉerkon por ĝi.

La sekvantan tagon oni portis la litaĵojn eksteren laŭ aranĝo de Þóroddur; oni alportis lignaĵojn por fari fajron. Tiam Þuríður, la mastrino, aliris kaj demandis kion li volas fari al la litaĵoj. Li diris ke li intencas ilin bruligi en fajro laŭ instrukcio de Þórgunna.

– Tion mi ja ne volas, ŝi diris, – ke tiaj trezoroj estu bruligataj.

Þóroddur respondis:

– Ŝi multe diris pri tio ke oni nepre ne agu kontraŭ ŝia instrukcio.

Þuríður diris:

– Tion ŝi nur diris pro envio. Ŝi ne volis ke iu ajn havu utilon el la litaĵoj. Tial ŝi donis tiun instrukcion. Sed ne estos iuj sekvoj de tio kvankam oni ne agos tute laŭ tio kion ŝi diris.

– Mi ja ne scias, li diris, – ĉu tio evoluos en alia maniero ol ŝi antaŭdiris.

Poste ŝi ĉirkaŭbrakis lian kolon kaj petis ke li ne bruligu la litaĵojn. Tiam ŝi tiel firme petis lin ke li fine cedis kaj ili aranĝis tiel ke Þóroddur bruligis la matracojn kaj kusenojn sed ŝi prenis por si la litkovrilon kaj vualojn kaj la tutan baldakenon, sed tamen neniu el la du estis kontenta.

Post tio ĉi oni ekpreparis transporton de la kadavro kaj havigis fidindajn virojn por plenumi tiun taskon. Þóroddur liveris du bonajn ĉevalojn por la transporto. Oni envolvis la kadavron en lintukon, sen ĝin ĉirkaŭkudri, kaj oni metis la kadavron en ĉerkon.

Poste la transportantoj de la kadavro ekiris laŭ la ordinaraj vojetoj en direkton suden trans Valbjarnarvellir. Tie ili devis transiri tre malsekajn marĉojn, kaj ofte falis teren la ĉerko. Ili venis al la rivero Norðurá kaj transiris ĝin ĉe Eyjarvað; la rivero estis profunda. La vetero estis ekblovega, jen neĝado, jen pluvado.

Finfine ili atingis en Stafholtstungur la bienon Nes la pli malsupran kaj petis permeson tranokti tie, sed la bienulo ne volis ion fari por ili. Sed pro tio ke la nokto estis jam proksima ili ne opiniis bone daŭrigi la vojaĝon ĉar ili ne supozis esti saĝe transiri la riveron Hvítá dum nokto. Ili prenis la ekipaĵojn de siaj ĉevaloj kaj portis la kadavron en stalon; poste ili iris en la ĉambron, demetis siajn vestojn kaj intencis resti tie dum la nokto sen manĝo, sed la domanoj enlitiĝis en taglumo.

Sed kiam oni jam enlitiĝis aŭdiĝis granda bruo el la provizejo. Tiam oni iris por sciiĝi ĉu ŝtelistoj eniris en la domon. Kaj irinte al la provizejo oni vidis tie grandan virinon. Ŝi estis nuda, portis neniun vestaĵon. Ŝi estis okupata pri kuirado de manĝo. Sed tiuj, kiuj ŝin vidis, tiel ektimis ke ili tute ne kuraĝis alproksimiĝi al ŝi.

Sed kiam la transportantoj de la kadavro eksciis tion ĉi ili iris kaj vidis kiel situas. Tie Þórgunna jam troviĝis kaj ĉiuj opiniis plej saĝe ne alproksimiĝi al ŝi. Kaj kiam ŝi jam estis fininta la laboron, kiun ŝi volis fari, ŝi portis la manĝaĵon en la ĉambron kaj metis ĝin sur tablon.

Tiam la transportantoj de la kadavro diris al la bienulo:

– Eble finfine vi bedaŭros, antaŭ ol ni disiĝos, ke vi ne volis ion fari por ni.

Tiam kaj la bienulo kaj la dommastrino diris:

– Ni ja volas doni al vi manĝaĵon kaj fari al vi kian ajn servon kiun vi bezonas.

Kaj tuj kiam la bienulo proponis sian servon, Þórgunna eliris el la ĉambro kaj poste el la domo kaj post tio oni ne vidis ŝin.

Poste oni faris lumon en la ĉambro, forigis de la gastoj ĉiujn malsekajn vestojn kaj donis al ili sekajn anstataŭe. La gastoj eksidis ĉe la tablo kaj faris krucoŝignon super sia manĝo sed la bienulo aranĝis ke oni aspergu konsekritan akvon tra la tuta loĝejo. La gastoj manĝis sian manĝaĵon, kiu ne kaŭzis malbonon al iu kvankam Þórgunna ĝin kuiris. Ili dormis dum la nokto kaj fartis bone.

En la mateno ili preparis sian vojaĝon kaj bone sukcesis, sed kie ajn oni aŭdis pri tiu ĉi evento plej multaj opiniis plej saĝe fari al ili ĉiujn servojn kiujn ili bezonas. Post tio ĉi ili glate daŭrigis sian vojaĝon.

Kaj veninte al Skálholt oni transdonis la objektojn kiujn Þórgunna donacis al la preĝejo tie. La pastroj ĝoje akceptis ilin. Tie oni enterigis Þórgunna, sed la transportintoj de la kadavro reiris hejmen kaj havis facilan vojaĝon.

En Fróðá estis granda sidoĉambro kaj flanke de ĝi fermebla lito laŭ la tiama kutimo. Ceterflanke de la sidoĉambro estis du ĉeloj, unu ĉe ĉiu flanko. Unu estis plena de sekigita fiŝo kaj la alia de faruno. Oni ekbruligis fajrojn ĉiuvespere en la sidoĉambro laŭ tiama kutimo. Oni sidadis ĉe la fajroj antaŭ ol komenci la manĝadon.

La saman vesperon, en kiu la transportintoj de la kadavro revenis hejmen, sidante ĉe la fajroj en la sidoĉambro, oni vidis sur la paneltegita muro de la domo ke jam leviĝis duona luno. Tion ĉiuj domanoj povis vidi. Ĝi ĉirkaŭiris tra la domo en direkton kontraŭan al sunirado. Ĝi ne malaperis dum oni sidis ĉe la fajroj.

Þóroddur demandis al Þórir la lignokrura kion tio antaŭdiras. Þórir diris ke tio estas fatala luno.

– Sekvos tion ĉi morto de homoj, li diris.

La samo ripetiĝis tie dum tuta semajno ke fatala luno eniĝis en la domon unu vesperon post la alia.

La sekvanta evento estis ke la ŝafgardisto eniris en la domon tute silente. Li parolis malmulte kaj malbonhumore se li ion diris. Ŝajnis al la domanoj probable ke li estas ensorĉita ĉar li evitis homojn kaj parolis al si mem; tio daŭris dum certa tempo.

Sed kiam estis pasintaj du semajnoj de la vintro, la ŝafgardisto hejmenvenis iun vesperon, iris al sia lito kaj sin kuŝigis en ĝin. Sed matene, kiam oni venis al li, li estis mortinta. Oni entombigis lin tie ĉe preĝejo. Baldaŭ post tio ĉi ekestis granda fantomado.

Iun nokton Þórir la lignokrura eliris por siaj necesajoj kaj de la pordo en alian direkton. Kiam li volis eniri denove li vidis ke la ŝafgardisto troviĝas antaŭ la pordo. Þórir volis eniri sed la ŝafgardisto ŝajnis ne voli ke li faru tion. Tiam Þórir volis forfuĝi sed la ŝafgardisto postkuris lin kaj ĵetis lin al la pordo. Pro tio li malsaniĝis sed tamen atingis sian liton; lia korpo fariĝis en multaj lokoj malhelblua. Pro tio li malsaniĝis kaj baldaŭ mortis. Oni ankaŭ entombigis lin ĉe preĝejo. Post tio ĉi oni ĉiam vidis ilin kune, la ŝafgardiston kaj Þórir la lignokruran. Kaj pro tio ĉi la domanoj nature estis kaptitaj de multe da timo.

Post la morto de Þórir unu el la servistoj de Þóroddur malsaniĝis. Li kuŝis tri noktojn en lito, antaŭ ol li mortis. Poste mortis unu post la alia ĝis kiam ses homoj estis jam mortintaj. Tio estis ĉirkaŭ la komenciĝo de la advento, sed en tiu tempo oni tamen ne fastis en Islando.

La ĉelo, en kiu estis konservataj la sekigitaj fiŝoj, estis tiel plenplena ke oni ne povis malfermi ĝian pordon; la amaso da fiŝoj atingis supre la transversan trabon kaj oni devis uzi ŝtupetaron por preni fiŝon el la amaso. Vespere, kiam oni sidis ĉe la fajroj en

la sidoĉambro, okazis ke oni aŭdis ke iu ŝiras fiŝon, sed kiam oni volis tion esplori troviĝis tie nenio vivanta.

Okazis en la vintro, ĵus antaŭ Kristnasko, ke Þóroddur, la bienulo, iris al la Duoninsulo por transporti hejmen sian stokon da sekigitaj fiŝoj. Iris kune ses viroj en dekremila boato kaj ili restis for de hejme dum la nokto.

Okazis en Fróðá la saman vesperon, kiam Þóroddur kaj liaj kunuloj foriris de hejme, ke kiam oni faris fajrojn en la sidoĉambro oni vidis ke foka kapo eliĝas el la fajra kavo. Unu el la domaninoj estis la unua kiu vidis tiun eventon. Ŝi prenis lignan bastonon, kiu kuŝis en la porda aperturo, kaj batis per ĝi la kapon de la foko. Ĝi pli supreniĝis ĉe la bato kaj rigardis supren al la baldakeno de Þórgunna. Tiam unu el la servistoj aliris kaj batis la fokon. Ĝi supreniĝis pli kaj pli ĉe ĉiu bato ĝis kiam aperis la naĝiloj, tiam la servisto svenis kaj falis planken. Ĉiuj ĉeestantoj ektimis.

Tiam alkuris la junulo Kjartan, levis grandan martelegon kaj bategis per ĝi la kapon de la foko; tio fariĝis granda bato, sed la foko skuis la kapon kaj ĉirkaŭrigardis. Tiam Kjartan faris al ĝi unu baton post la alia en la kapon, kaj tiam la foko iom post iom malsupreniĝis, kvazaŭ Kjartan estus malsuprenbatita stangeton. Li batis ĝis kiam la foko tiom malsupreniĝis ke li povis fermi per batoj la aperturon en la planko super ĝia kapo, kaj tiel okazis dum la vintro ke ĉiuj aperaĵoj plej timis Kjartan.

En la mateno, kiam Þóroddur kaj liaj kunuloj ekiris de la Duoninsulo kun la sekigitaj fiŝoj, ili ĉiuj pereis en la maro antaŭ Enni. La boato, kune kun la sekigitaj fiŝoj, drivis tie ĝis la bordo, sed oni ne sukcesis trovi la kadavrojn.

Sed kiam oni en Fróðá aŭdis tiun novaĵon, Kjartan kaj Þuríður, lia patrino, invitis siajn najbarojn al funebra festeno en Fróðá. Uni utiligis la porkristnaskan bieron en la funebra festeno.

Sed la unuan vesperon de la festeno, kiam ĉiuj gastoj estis jam sidiĝintaj, eniris en la sidoĉambro Þóroddur, la bienulo, kaj liaj kunuloj, ĉiuj ĝishaŭte malsekaj. Oni ĝojis pri la alveno de Þóroddur ĉar tion oni opiniis bona antaŭsigno; en tiu tempo oni nome kredis ke tiam oni bone akceptas homojn ĉe la mardiino Rán, kiam dronintoj en maro venas al sia funebra festeno, sed en tiu tempo ne estis tute ekstermita la antikvaĵo kvankam homoj estis baptitaj kaj nominale kristanaj.

Ĵóroddur kaj liaj kunuloj iris laŭlonge de la ĉefĉambro, sed ĝi estis kun du pordoj. Ili iris al la sidoĉambro, sen akcepti ies saluton. Ili eksidis ĉe la fajro, kaj tiam la domanoj forlasis la sidoĉambro, sed Ĵóroddur kaj liaj kunuloj restis tie sidantaj ĝis kiam la fajro preskaŭ estingiĝis. Okazis tiel ĉiuvespere, dum daŭris la funebra festeno, ke ili venis kaj eksidis ĉe la fajroj. Oni multe parolis pri tio ĉi en la festeno. Kelkaj divenis ke tio ĉesos post la fino de la festeno.

La invititoj iris hejmen post la funebra festeno, sed oni trovis la restadon en la loĝejoj iom enua post ilia foriro.

En la vespero, kiam la invititoj estis foririntaj, oni ekbruligis fajron kiel ordinare. Sed kiam la fajro jam brulis, Ĵóroddur eniris kun siaj kunuloj; ili estis ĉiuj malsekaj. Ili eksidis ĉe la fajro kaj komencis premsekigi siajn vestojn. Tuj kiam ili estis eksidintaj eniris Ĵórir la lignokrura, sekvata de siaj ses kunuloj, ĉiuj kovritaj de tero. Ili ekskuis siajn vestojn kaj ĵetis el ili koton al Ĵóroddur kaj liaj kunuloj. La domanoj, nature, forkuris el la ĉambro kaj en tiu vespero ili devis esti sen lumo kaj varmigaj ŝtonoj kaj sen kio ajn per kio ili povus havi utilon de la fajro.

Sekvantan vesperon oni faris fajron en alia ĉambro, esperante ke la mortintoj ne iros tien. Sed tiu espero ne plenumiĝis, ĉar ĉio okazis en sama maniero kiel la antaŭan vesperon. Ambaŭ grupoj venis por sidi ĉe la fajro.

La trian vesperon Kjartan konsilis ke oni faru longan fajron en la ĉefĉambro kaj ankaŭ alian fajron por kuirado en alia ejo. Tion oni faris kaj aranĝis tiel ke Ĵóroddur kaj liaj kunuloj sidu ĉe la longa fajro sed la domanoj ĉe la malgranda. Tiu aranĝo daŭris dum la tuta kristnaska tempo.

Je tiu tempo oni aŭdis pli kaj pli da bruo el la amaso de sekigitaj fiŝoj. Oni povis aŭdi, tage kaj nokte, tiajn sonojn kvazaŭ oni ŝiras sekigitan fiŝon de la haŭto.

Baldaŭ oni devis preni el la amaso sekigitajn fiŝojn por manĝo. Unu el la domanoj supreniris sur la fiŝamason; li vidis ke sur la amaso eliĝas supren iu vosto; ĝi similis al bruletigita bovovosto. Ĝi estis kovrita de mallongaj fokoharoj. La viro sur la fiŝamaso ekkaptis la voston kaj tiris ĝin kaj petis aliajn pri helpo. Tiam kelkaj, viroj kaj virinoj, supreniĝis kaj ektiris la voston, sed vane. Ĉiuj opiniis ke la vosto estas morta. Kaj kiam ili tiris kiel eble plej intense, la vosto eliĝis el iliaj manoj, tiel ke sekvis la haŭto el la manplatoj de tiuj kiuj plej firme tiris, sed poste oni ne rimarkis plu la voston.

Tiam la sekigitaj fiŝoj estis suprenportataj, kaj en la malsupra parto de la amaso ĉiu fiŝo estis jam ŝirita de la haŭto, tiel ke ne troviĝis ia karno en ĝi, sed nenio vivanta estis trovebla en la amaso.

Post tiuj ĉi eventoj malsaniĝis Þorgríma, la sorĉulino, edzino de Þórir la lignokrura. Ne pasis longa tempo ĝis kiam ŝi mortis. La saman vesperon kiam ŝi estis enterigata oni vidis ŝin kune kun sia edzo, Þórir. Post kiam oni vidis la voston pliĝis la malsaniĝoj inter la domanoj, kaj tiam mortis pli da virinoj ol viroj. Tiun fojon ses el la domanoj mortis, unu post la alia, sed kelkaj forfuĝis pro la fantomado.

Aŭtune estis restintaj tridek geservistoj en la bieno. Mezvintre dek-ok el ili estis mortintaj, kvin forfuĝintaj, sed sep restantaj en la bieno.

Sed post kiam tiuj ĉi strangaj eventoj estis daŭrintaj iom da tempo, okazis iun tagon ke Kjartan iris al Helgafell por interkonsiliĝi kun sia onklo Snorri, la templestro. Li petis pri konsiloj de li kion fari por ke ĉesu tiuj eventoj. Tiam jam restis en Helgafell pastro kiun Gissur la blankaestis sendinta al Snorri, la templestro. Snorri sendis la pastron al Fróðá kun Kjartan kaj ankaŭ sian filon Þórður katon kaj ses aliajn virojn. Li konsilis bruligi la baldakenon de Þórgunna kaj poste voki al pordtribunalo ĉiujn mortintojn kiuj fantomis. Post tio la pastro devis fari diservon, konsekri akvon kaj konfesigi la domanojn.

Poste ili ekrajdis al Fróðá. Survoje ili petis najbarojn kuniri kun ili. Ili atingis al Fróðá en la vespero antaŭ la Kandelmeso kiam oni ĵus ekbruligis la fajrojn. Tiam Þuríður, la dommastrino, jam estis kaptita de malsano en sama maniero kiel tiuj kiuj jam mortis.

Kjartan tuj eniris en la domon kaj vidis ke Þóroddur kaj liaj kunuloj sidas ĉe fajro kiel ili kutimis. Kjartan malsuprentiris la baldakenon kaj eniris la halon, kie brulis la fajro, prenis el ĝi ardaĵon, eliris kun ĝi el la domo kaj forbruligis la tutan litekipaĵon kiu estis aparteninta al Þórgunna.

Post tio ĉi Kjartan vokis al pordtribunalo Þórir la lignokruran sed Þórir kato vokis la bienulon, Þóroddur, pro tio ke ili iras tra la loĝejoj sen permeso kaj kaŭzas morton kaj malsanojn al la domanoj. Oni vokis al la tribunalo ĉiujn kiuj sidis ĉe la fajro.



Poste oni kunvokis membrojn al la tribunalo kaj faris la akuzojn; oni aranĝis pri la tuta afero same kiel en asembleaj tribunaloj. Atestoj estis farataj, aferoj pritraktataj kaj juĝataj.

Sed post kiam oni eldiris juĝon al Þórir la lignokrura li ekstaris kaj diris:

– Mi jam sidis dum eblecoj estis por tio. – Poste li eliris tra la pordo kie ne troviĝis la tribunalo.

Tiam oni eldiris la juĝon al la ŝafoprizorganto. Kiam li tion aŭdis li ekstaris kaj diris:

– Mi ja foriros nun, kaj ŝajnas ke tamen estus estinta pli dece pli frue.

Sed kiam Þorgríma, la sorĉulino, aŭdis eldirita sian juĝon ŝi ekstaris kaj diris:

– Mi ja restis dum eble estis.

Ĉiu ricevis sian juĝon, unu post la alia, kaj ĉiu – aŭdinte sian juĝon – ekstaris kaj eliris dirante ion, kaj estis aŭdeble laŭ ĉies vortoj ke ili kontraŭvole foriras.

Poste oni juĝis la bienulon, Þóroddur. Aŭdinte sian juĝon li ekstaris kaj diris:

– Ĉi tie ni ne estos en paco, do ni ĉiuj forfuĝu.

Poste li eliris.

Post tio ĉi Kjartan kaj liaj kunuloj eniris. Tiam la pastro portis konsekritajn akvon kaj objektojn tra ĉiuj ejoj de la bieno. Sekvantan tagon li kantis ĉiujn preĝojn kaj celebris meson, kaj post tio ĉia fantomado tute ĉesis en Fróðá, kaj la sanstato de Þuríður ekpliboniĝis, tiel ke ŝi tute resaniĝis.

En la printempo, post ĉiuj ĉi mirindaj eventoj, Kjartan dungis geservistojn por sia bieno. Li loĝis kiel bienulo en Fróðá dum longa tempo kaj estis rigardata granda bravulo.

*(Ólafur S. Magnússon)*

## El la Sagao de Laxdælir

## La sonĝoj de Guðrún Ósvífursdóttir

Viro nomiĝis Ósvífur Helgason. Li estis saĝulo kaj loĝis en Laugar en Sælingsdalur. Lia edzino nomiĝis Þórdís kaj estis filino de Þjóðólfur la malalta.

Ilia filino nomiĝis Guðrún. Ŝi estis la plej bonpromesa el virinoj kiuj edukiĝis en Islando, kaj laŭ aspekto kaj laŭ inteligenteco. Guðrún estis eminenta virino, kaj en tiu tempo ĉio kion havis aliaj virinoj estis rigardata infanaĵo kompare al tio kion ŝi havis. Ŝi estis tre saĝa virino kaj bone sciis esprimi sin per vortoj. Ŝi estis malavara virino.

Gestur Oddleifsson loĝis en Hagi en Barðaströnd. Li estis eminenta homo kaj saĝulo. Li antaŭvidis multajn aferojn kaj estis en bona amikeco kun ĉiuj eminentuloj, kaj multaj ricevis konsilojn de li. Li rajdis ĉiusomere por ĉeesti la kunvenojn de la parlamento kaj tranoktis en Hóll. Foje ankoraŭ okazis ke Gestur rajdis al la parlamento kaj tranoktis en Hóll. Li ekiris frue en la mateno, ĉar la vojaĝo estis longa. Li intencis en la vespero iri al Þykkvískógur kie loĝis lia bofrato, Ármóður. Lia edzino estis Þórunn, fratino de Gestur. Iliaj filoj estis Örnólfur kaj Halldór. Gestur rajdis dum la tago el Saurbær kaj atingis al Sælingsdalslaug kaj restis tie iom da tempo.

Guðrún ĝojis pro la veno de Gestur, ŝia parenco, kaj afable salutis lin. Gestur bone akceptis ŝian saluton kaj ili ekparolis kune. Ili kaj estis saĝaj kaj bone sciis esprimi sin. Sed kiam jam estis iom frue en la tago, Guðrún diris:

– Mi volus, parenco mia, ke vi rajdu al ni hodiaŭ vespere kun via tuta grupo de akompanantoj. Tio estas ankaŭ la volo de mia patro, kvankam li faris al mi la honoron igi min fari tiun komisionon, kaj ankaŭ ke vi tranoktu ĉi tie ĉiufoje kiam vi rajdas okcidenten aŭ de okcidente.

Gestur respondis afable al tio kaj diris ke ŝi kuraĝe faris sian komisionon, sed diris ke li tamen rajdos laŭ la jam planita vojo.

Guðrún diris:

– Mi multe sonĝis pasintan vintron, sed estas kvar sonĝoj kiuj kaŭzas al mi multe da ĝeno, sed neniu ĝis nun tiel klarigis ilian signifon ke plaĉas al mi, kaj tamen mi ne petas pri tio ke ili estu klarigataj favore al mi.

Tiam Gestur diris:

– Rakontu al mi viajn sonĝojn. Eble mi povos iom klarigi ilin.

Guðrún diris:

– Ŝajnis al mi ke mi troviĝas ĉe iu rivereto, kaj mi portis sur la kapo faldkufon kiu ŝajnis ne tiel bone taŭgi al mi, kaj mi havis emon ŝanĝi ĝin, sed multaj konsilis ke mi ne faru tion. Sed mi ne aŭskultis tion kaj mi forprenis la kufon de mia kapo kaj ĵetis ĝin en la rivereton, kaj tiu ĉi sonĝo ne estis pli longa.

Kaj ankoraŭ Guðrún diris:

– La komenco de la dua sonĝo estis ke ŝajnis al mi ke mi troviĝas ĉe iu lago. Ŝajnis al mi ke jam estas arĝenta ringo sur mia mano kaj ke ĝi apartenas al mi kaj bone taŭgas. Ĝi ŝajnis al mi granda trezoro, kaj mi intencis longe teni ĝin. Kaj sen ke mi tion antaŭvidis la ringo subite glitis de mia mano en la akvon, kaj poste mi neniam vidis ĝin. Tiu perdo ŝajnis al mi multe pli granda ol oni povus pensi, ĉar mi nur perdis unu objekton.

Gestur nur respondis:

– Tiu sonĝo ne estas malpli grava.

Ankoraŭ Guðrún diris:

– Tio estis mia tria sonĝo ke ŝajnis al mi ke mi portas oran ringon sur la mano kaj ke ĝi apartenas al mi, kaj ŝajnis al mi ke la perdo estas rekompencita. Mi ekpensis ke mi pli longe ĝuos tion ĉi ringon ol la antaŭan. Sed tiu ornamaĵo ne ŝajnis al mi des pli taŭgi al mi, ĉar oro estas pli valora ol arĝento. Poste ŝajnis al mi ke mi falos kaj mi volis apogi min per la mano, sed la ora ringo puŝiĝis al iu ŝtono kaj rompiĝis je du pecoj, kaj ŝajnis al mi ke sangas el la pecoj. Ŝajnis al mi pli simili al malĝojo ol perdo, kiam mi poste portis ilin. Tiam mi ekpensis ke kreaĵo estis en la ringo, kaj kiam mi poste rigardis la pecojn tiam ŝajnis al mi ke mi vidas pli da kreaĵoj sur ili, kaj tamen ŝajnis al mi ke ĝi ankoraŭ ne estus rompita se mi estus pli bone gardinta ĝin, kaj tiu sonĝo ne estis pli longa.

Gestur respondis:

– Ne estas finitaj la sonĝoj.

Kaj ankoraŭ Guðrún diris:

– Tio estis mia kvara sonĝo ke ŝajnis al mi ke mi portas sur la kapo kaskon el oro, multe ornamitan per juveloj. Ŝajnis al mi ke tiu trezoro apartenas al mi. Sed la ĉefa malavantaĝo estis ke ĝi ŝajnis al mi tro peza, ĉar mi preskaŭ ne povis porti ĝin, kaj mi tenis la kapon oblikva, kaj tamen mi ne kulpigis la kaskon pri tio kaj ne intencis forigi

ĝin, sed tamen ĝi renversiĝis de mia kapo en la fjordon Hvammsfjörður, kaj post tio mi vekigis. Nun ĉiuj ĉi sonĝoj estas jam rankontitaj al vi.

Gestur respondis:

– Mi klare vidas kion tiuj ĉi sonĝoj signifas, sed vi verŝajne trovos miajn klarigojn monotonajn, ĉar mi preskaŭ sammaniere klarigos ilin ĉiujn. Vi havos kvar edzojn, kaj mi supozas ke kiam vi estos edziniĝinta al la unua vi ne tiel ŝatos lin. Kiam ŝajnis al vi ke vi portas grandan faldkufon sur la kapo kaj ke ĝi ne tiel bone taŭgis al vi tiam vi ne amos lin multe, kaj kiam vi forprenis la kufon de via kapo kaj ĵetis ĝin en la akvon tiam vi foriros de li. Tion oni nomas ĵetita en la maron kiam oni lasas sian posedaĵon kaj ne akceptas ĝin.

Kaj ankoraŭ Gestur diris:

– Tio estis via dua sonĝo ke ŝajnis al vi ke vi portas arĝentan ringon sur la mano. Tiam vi estos edzino de alia bonega viro. Tiun vi multe amos kaj ĝuos mallongan tempon. Ne estus kontraŭ mia antaŭsento se vi perdos lin tiamaniere ke li dronos, kaj mi ne havas pli por diri pri tiu sonĝo. Tio estis via tria sonĝo ke ŝajnis al vi ke vi portas oran ringon sur la mano. Tiam vi havos la trian edzon. Tiu ne estos des pli valora ĉar vi trovis la metalon pli malofta kaj multekosta, sed mi povus kredi ke en tiu tempo jam regos nova religio kaj ke tiu via edzo estos jam adepto de tiu religio, sed mi pensas ke ĝi estos multe pli altnivela ol la nun reganta. Sed kiam ŝajnis al vi ke la ringo rompiĝas je du pecoj, parte pro via senzorgo, kaj sango eliĝas el la pecoj, tiam tiu via edzo estos mortigata. Tiam vi opinios ke vi vidas plej bone la krevajojn kiu estis en tiu geedzeco.

Kaj ankoraŭ diris Gestur:

– Tio estis via kvara sonĝo ke ŝajnis al vi ke vi portas sur la kapo kaskon el oro, ornamitan per juveloj, kiu fariĝis al vi malfacile portebla. Tiam vi havos la kvaran edzon. Tiu estos plej granda homo kaj multe pli eminenta ol vi. Kaj kiam ŝajnis al vi ke la kasko renversiĝas en la fjordon Hvammsfjörður tiam li falos en tiun saman fjordon en la lasta tago de sia vivo. Mi ne havas pli por diri pri tiu sonĝo.

La vangoj treege ruĝiĝis al Guðrún dum la signifo de la sonĝoj estis klarigata al ŝi, sed ŝi ne diris iujn vortojn pri tio ĝis kiam Gestur estis fininta sian parolon.

Tiam Guðrún diris:

– Vi trovas pli belajn antaŭdirojn en tiu ĉi afero se ĝi estus aliamaniere preparita al vi de mi, sed tamen havu dankon pro tio ke vi klarigis la signifon de la sonĝoj. Sed multon oni povas atendi se ĉio ĉi plenumiĝos.

*(Ólafur S. Magnússon, Voĉo de Islando, V, 1960.)*

## El la Sagao de Njáll

### La bruligo de Njáll

Flosi preparis sian iradon de oriente kiam du monatoj restis ĝis la komenciĝo de la vintro, kaj kunvokis al si ĉiujn siajn trupanojn, tiujn kiuj estis promesintaj al li kuniri. Ili havis po du ĉevalojn kaj bonajn armilojn. Ili venis ĉiuj al Svínafell kaj restis tie dum la nokto. Flosi aranĝis ke oni frue okazigu diservon en la dimanĉo; poste li iris por manĝi. Li ordonis al ĉiuj siaj hejmanoj kion ĉiu el ili laboru dum lia foresto. Poste li iris al siaj ĉevaloj.

Flosi kaj liaj trupanoj rajdis unue okcidenten al la sablejo. Flosi petis ilin ne rajdi tiel rapide en la komenco kaj diris ke tamen ĉe la fino estos kontraŭe. Li petis ĉiujn atendi se iu bezonos resti. Ili rajdis ĝis Skógahverfi kaj venis al Kirkjubær. Flosi petis ĉiujn trupanojn eniri en la preĝejon por preĝi. Tion ili faris. Poste ili surĉevaliĝis kaj rajdis direkten al la montaro kaj poste ĝis la lagaro Fiskivötn. Ili rajdis iom okcidente de la lagaro kaj poste okcidenten al la sablejo, tiel ke la glaciejo Eyjafjallajökull estis maldekstre de ili, poste malsupren al Goðaland kaj tiam al la rivero Markarfljót. Ili atingis ĉirkaŭ la tria horo en la dua tago de la semajno al Þríhyrningshálsar kaj atendis ĝis la mezo de la vespero. Tie kunvenis la tuta grupo escepte de Ingjaldur el Keldur.

La filoj de Sigfús tre riproĉis lin, sed Flosi petis ilin ne riproĉi Ingjaldur, dum li ne ĉeestas. – Sed tamen ni poste rekompensu al li.

Nun restas rakonti ke Grímur kaj Helgi iris el Bergþórshvoll al Hólar – tie oni edukis infanojn por ili – kaj diris al sia patro ke ili ne revenos hejmen en la vespero.

Ili restis en Hólar la tutan tagon. Tien venis malriĉaj virinoj kaj diris ke ili jam iris longan distancon. Grímur kaj Helgi demandis ĉu ili povas diri iujn novaĵojn. Ili diris ke ilis scias neniujn novaĵojn, – sed ni povas rakonti ion strangan.

Grímur kaj Helgi demandis kiu strangaĵo tio estas, kaj petis ilin ne kaŝi tion. La virinoj diris ke tiel estu:

– Ni venis el Fljótshlíð, kaj ni vidis ĉiujn filojn de Sigfús rajdantaj, tute armitaj, direkte al Þríhryningshálsar, kaj estis dek-kvin viroj en la trupo. Ni ankaŭ vidis Grani Gunnarsson kaj Gunnar Lambason; en ilia trupo estis kvin viroj kaj iris en la saman direkton. Kaj oni povas diri ke jam estas ĉio en moviĝo.

Helgi Njálsson diris:

– Tiam Flosi certe jam venis de oriente, kaj ili ĉiuj iras renkonte al li, kaj ni, mi kaj Grímur, estu tie kie estas Skarphéðinn.

Grímur diris ke tiel estu, kaj ili ekiris hejmen.

Tiun saman vesperon Bergþóra diris al siaj geservistoj:

– Nun vi elektu por vi manĝaĵon hodiaŭ vespere, tiel ke ĉiu havu tion kion li plej deziras, ĉar ĉivespere mi por la lasta fojo portos manĝaĵon al miaj geservistoj.

– Tio ne estu, diris tiuj kiuj ĉeestis.

– Tio tamen estos, ŝi diris, – kaj mi povus multe pli rakonti pri tio se mi volus, kaj signo pri tio estos ke Grímur kaj Helgi venos hejmen antaŭ ol oni estos finmanĝintaj hodiaŭ vespere, kaj se tio plenumiĝos tiam pli multe plenumiĝos el tio kion mi diras.

Poste ŝi metis manĝaĵon sur la tablon.

Njáll diris:

– Strangan vidaĵon mi vidas nun. Ŝajnas al mi ke mi vidas tra la tuta ĉambro, kaj estas kvazaŭ la muroj de ambaŭ finoj estas foriĝintaj sed sango kie ajn sur la tablo kaj manĝo.

Ĉiuj miris pri tio escepte de Skarphéðinn. Li petis ke oni ne esprimu malĝojon nek kondutu strange, tiel ke aliaj rimarku tion. – Ĉar ni estas en pli alta grado sub kritiko ol aliaj, kaj ne senmotive.

Grímur kaj Helgi venis hejmen antaŭ ol oni finis la manĝadon, kaj pro tio oni tre ektimis. Njáll demandis kial ili revenas tiel baldaŭ, sed ili diris tion kion ili estis aŭdintaj. Njáll petis ke neniu ekkruŝu kaj ĉiu estu singarda.

Nun Flosi parolis al siaj trupanoj:

– Nun ni rajdos al Bergþórshvoll kaj estos tie antaŭ la horo de enlitiĝo.

Tion ili faris. En la altaĵo, sur kiu staris la bieno, estis valetoj. Tien ili rajdis, ligis siajn ĉevalojn kaj restis tie ĝis malfrue en la vespero.

Flosi diris:

– Nun ni iru al la bieno en densa grupo; ni iru malrapide kaj rigardu kion ili faras.

Njáll kaj liaj filoj kaj Kári staris ekstere kun ĉiuj domanoj. Ili estis preskaŭ tridek en la grupo.

Flosi haltis kaj diris:

– Nun ni rigardu kion ili faros, ĉar ŝajnas al mi ke ni neniam povos venki ilin se ili staros ekstere.

– Tio estos granda honto por ni, diris Grani Gunnarsson, – se ni ne kuraĝus alproksimiĝi al ili.

– Tio ne okazos, diris Flosi, – kaj ni alproksimiĝos kvankam ili staros ekstere, sed la prezo, kiun ni tiam devos pagi, estos ke multaj el ni ne povos rakonti kiuj venkos.

Njáll diris al siaj trupanoj:

– Kiom da trupanoj vi opinias ke ili havas?

– Ilia trupo estas kaj granda kaj brava, diris Skarphéðinn. – Sed pro tio ili nun haltas ke ili pensas ke ne estos tiel facile al ili venki nin.

– Tio ne estas la kaŭzo, diris Njáll, – kaj mi volas ke ĉiuj eniru en la domon, ĉar montriĝis malfacile venki Gunnar en Hlíðarendi, kvankam li estis sola, sed ĉi tie la domoj estas fortikaj, kiel ankaŭ estis tie, kaj ili ne havos sukceson.

– Tio ne estas komparebla, diris Skarphéðinn. – La malamikoj de Gunnar estis eminentuloj kiuj havis tian pensmanieron ke ili preferis reiri ol bruligi lin en la domo, sed tiuj ĉi ne hezitos uzi fajron kontraŭ ni se ili ne sukcesos alimaniere, ĉar ili faros ĉion por venki nin. Ili pensas, kaj verŝajne prave, ke se ni eliĝos el tio vivantaj, tio estos ilia

morto. Mi ne havas emon doni al ili okazon sufoki min per fumo kiel vulpon en kaverno.

Njáll diris:

– Nun kiel ofte, miaj filoj, vi ne volas aŭskulti miajn konsilojn, sed kiam vi estis pli junaj vi agis alimaniere, kaj tiam estis pli bone.

Helgi diris:

– Ni agu laŭ la volo de nia patro. Tio estos plej bona por ni.

– Pri tio mi ne estas certa, diris Skarphéðinn, – ĉar nun li estas proksima al sia morto. Sed mi ja povas fari tiun komplezon al mia patro bruli en la domo kun li, ĉar mi ja ne timas la morton.

Poste li diris al Kári:

– Ni estu kune, bofrato mia, tiel ke neniu el ni forlasu la alian.

– Tion mi ankaŭ volas, diris Kári, – sed se nia sorto estos alia tiam tio devas efektiviĝi kaj ne estos ŝanĝebla.

– Venĝu por ni, sed ni venĝos por vi, diris Skarphéðinn, – se ni restos vivantaj.

Kári diris ke tiel estu. Poste ili ĉiuj eniris en la domon kaj starigis sin ĉe la pordoj.

Flosi diris:

– Nun ilia morto ja estas certa, ĉar ili jam eniris en la domon. Nun ni iru kiel eble plej rapide al la domo kaj formu densajn grupojn ĉe la pordoj, kaj ni zorgu ke neniu sukcesu forkuri, nek Kári nek la filoj de Njáll, ĉar tio estus nia morto.

Nun Flosi kaj liaj trapanoj iris al la domoj kaj ĉirkaŭis ilin por garantii ke neniu sukcesu forkuri tra eventuala kaŝpordo. Flosi iris al la fronto de la domoj kun sia trupo. Hróaldur Össurason kuris al la loko kie estis Skarphéðinn kaj puŝis sian lancon al li. Skarphéðinn forhakis lian lancon de la tenilo kaj hakis al li. La hakilo atingis la ŝildon, tiel ke ĝi premiĝis al Hróaldur, sed la supra parto de la hakilo tranĉando atingis lian vizaĝon kaj li tuj falis malantaŭen mortinta.

Kári diris:

– Bone trafite kiel ĉiam, Skarphéðinn. Vi estas la plej brava el ni.

– Tion mi ne scias, diris Skarphéðinn, tordis la buŝon kaj rikanis.



Kári, Grímur kaj Helgi plurfoje pikis per siaj lancoj tra la porda aperturo kaj vundis multajn el la trupanoj de Flosi, kiuj ne sukcesis en la kontraŭagoj.

Flosi diris:

– Jam okazis granda perdo al nia trupo, multaj estas vunditaj sed tiu mortigita kies helpon ni plej bezonis. Nun estas klare ke ni ne sukcesos venki ilin per armiloj. Multaj el vi ne batalas tiel brave kiel vi antaŭe promesis, kaj nun ni devas trovi alian rimedon. Nun ni havas du alternativojn kaj neniu el ili estas bona. Unu alternativo estas foriri sen pli da agoj, kio signifus al ni la morton, la alia estas alporti fajron kaj bruligi ilin en la domoj, sed tiam ni havos grandan respondecon antaŭ Dio, ĉar ni estas mem kristanoj. Tamen tiun alternativon ni devas elekti.

Nun ili alportis fajron kaj faris grandan flamon antaŭ la pordo.

Tiam Skarphéðinn diris:

– Vi ja flamigas fajron, knaboj. Ĉu vi preparas vin al kuirado?

Grani Gunnarsson respondis:

– Tiel estu, kaj pli varman fajron vi ja ne bezonas por varmigi al vi.

Skarphéðinn diris:

– Vi rekompencas al mi laŭ via merito, ĉar mi ja venĝis por via patro, sed vi pli alte taksas tion kio malpli rilatas al vi.

Nun la virinoj verŝis selakton en la fajron kaj estingis ĝin.

Kolur Þorsteinsson diris al Flosi:

– Mi ekpensas rimedon. Mi vidis ke troviĝas plafono en la halo sur traboj, kaj tie ni enportu la fajron, kaj ni ekbruligu per la stako de fikreskaĵo kiu troviĝas malantaŭ la domoj.

Poste ili prenis la stakon de fikreskaĵo kaj ekbruligis ĝin. Tiuj kiuj estis en la domoj rimarkis la fajron nur kiam la tuta supra parto de la halo estis en flamoj. Tiam Flosi kaj liaj trupanoj faris grandajn flamojn antaŭ ĉiuj pordoj. Tiuj virinoj, kiuj troviĝis en la halo, malbone toleris la varmon.

Njáll diris al ili:

– Estu trankvilaj kaj ne igu ilin aŭdi ke vi timas, ĉar tio ja estas nur ekneĝado kiu mallonge daŭros, kaj pasos longa tempo ĝis alia simila. KREDU ankaŭ ke Dio estas kompatema, kaj li ne igos nin bruli kaj en tiu ĉi mondo kaj en alia.

Per tiaj vortoj li parolis al ili kaj aliaj ankoraŭ pli kuraĝigaj. Nun ĉiuj domoj komencis bruli.

Tiam Njáll iris al la pordo kaj diris:

– Ĉu Flosi estas tiel proksima ke li povas aŭdi miajnvortojn?

Flosi diris ke li povas aŭdi.

Njáll diris:

Ĉu vi volus akcepti repaciĝon kun miaj filoj aŭ permesi eliron al iuj el la domanoj?

Flosi respondis:

– Repaciĝon kun viaj filoj mi ne volas akcepti, kaj nun okazu fino al niaj interrilatoj, kaj ni nur foriros de ĉi tie kiam ili ĉiuj estos mortintaj, sed mi volas permesi eliron al virinoj, infanoj kaj servistoj.

Tiam Njáll reeniris kaj diris al la domanoj:

– Nun eliru ĉiuj al kiuj oni tion permesas, kaj vi eliru, Þórhalla Ásgrímsdóttir, kaj kune kun vi ĉiuj, al kiuj oni permesas eliron.

Þórhalla diris:

– Alia fariĝas nun la disiĝo de mi kaj Helgi ol mi ĝis nun pensis, sed tamen mi instigos miajn patron kaj fratojn ke ili venĝu pro la murdoj kiuj ĉi tie okazas.

Njáll diris:

– Vi certe agos bone, ĉar vi estas bona virino.

Poste ŝi eliris kaj multaj sekvis ŝin.

Ástríður el Djúpárbakki diris al Helgi Njálsson:

– Eliru kun mi, kaj mi ĵetos virinan mantelon super vin kaj kaptukon.

Komence Helgi protestis, sed poste li tamen faris tion pro iliaj petoj. Ástríður volvis tukon al lia kapo sed Þórhildur metis la mantelon super lin, kaj li eliris inter ili.

Poste Þorgerður Njálisdóttir kaj Helga, ŝia fratino, eliris kune kun multaj aliaj.

Sed kiam Helgi eliris Flosi diris:

– Estas ja alta virino kaj kun grandaj ŝultroj kiu iras tie. Kaptu ŝin kaj tenu ŝin!

Sed kiam Helgi tion ĉi aŭdis li forĵetis la mantelon. Li estis kaŝinta glavon sub la brako, kaj li hakis al unu el la truĉanoj de Flosi. Forhakiĝis la malsupra parto de la ŝildo kaj piedo de la viro. Tiam Flosi alvenis kaj hakis al la kolo de Helgi, tiel ke la kapo tuj foriĝis. Poste Flosi iris al la pordo kaj diris ke Njáll kaj Bergþóra venu por paroli kun li. Tion Njáll faris.

Flosi diris:

– Mi volas permesi al vi ke vi eliru, ĉar vi ne meritas ke vi brulu en la domo.

Njáll diris:

– Mi ne volas eliri, ĉar mi ja estas maljuna kaj mi ne bone taŭgas por venĝi por miaj filoj, sed mi ne volas vivi kun honto.

Flosi diris al Bergþóra:

– Vi eliru, mastrino, ĉar mi tute ne volas ke vi brulu en la domo.

Bergþóra diris:

– Juna mi estis donata al Njáll. Mi promesis al li ke sama estu la sorto de ni ambaŭ.

Poste ili ambaŭ eniris.

Bergþóra diris:

– Kion ni nun faru?

– Ni iru al nia lito, diris Njáll, – kaj ekkuŝu.

Tiam Bergþóra diris al la knabo Þórður Kárason:

– Vi estu portata eksteren, vi ne brulu en la domo.

– Sed vi promesis al mi, avino mia, diris la knabo, – ke ni neniam disiĝu, kaj tiel estu. Sed ŝajnas al mi multe pli bone morti kun vi ol vivi sen vi.

Poste ŝi portis la knabon al la lito.

Njáll diris al sia bienintendanto:

– Nun vi rigardu kie ni ekkuŝas kaj kiel mi aranĝas pri ni, ĉar mi ne intencas foriri el tiu loko, kiel ajn plagos min fumo aŭ brulo. Tiam vi scios kie vi serĉu niajn ostojn.

La bienintendanto diris ke tion li faros. Oni estis buĉinta virbovon antaŭ nelonge kaj ĝia haŭto kuŝis en la halo. Njáll diris al la bona intendanto ke li kovru ilin per la bovhaŭto, kaj tion li promesis fari. Poste Njáll kaj Bergþóra ambaŭ ekkuŝis en la lito.

kaj metis la knabon inter si. Ili faris krucosignon al si kaj al la knabo kaj transdonis sian spiriton al Dio, kaj tio estis la lasta kion oni aŭdis de ili. Tiam la bona intendanto prenis la haŭton kaj kovris ilin per ĝi kaj poste eliris. Ketill el Mörk akceptis lin kaj kondukis lin eksteren. Li detale demandis pri sia bopatro, Njáll, sed la bienintendanto rakontis ĉion kio okazis.

Ketill diris:

– Granda malĝojo estas al ni ke ni kune havas tiel grandan malfeliĉon.

Skarphéðinn estis vidinta kiam lia patro ekkuŝis kaj vidis kiel li aranĝis pri si.

Tiam li diris:

– Nia patro frue enlitiĝas kaj tio ja estas natura, li jam estas maljuna.

Tiam Skarphéðinn, Kári kaj Grímur prenis la brulantajn lignaĵojn kiuj falis malsupren kaj ĵetis ilin eksteren al la malamikoj, kaj tio daŭris iom da tempo. Sed la malamikoj ĵetis lancojn en la domon al ili, sed ili kaptis la lancojn en la aero kaj reĵetis ilin eksteren.

Flosi petis siajn trupanojn ĉesigi la ĵetadon de lancoj, – ĉar ĉia batalado per armiloj kontraŭ ili estos malfacila al ni. Vi atendu ĝis kiam la fajro venkos ilin.

Ili agis laŭ tio. Baldaŭ la trabegoj komencis fali el la tegmento.

Skarphéðinn diris:

– Nun mia patro verŝajne estas mortinta, kaj nek aŭdiĝis de li ĝemo nek tuso.

Poste ili iris al la fino de la halo. Tie unu fino de la transversa trabo estis falinta malsupren; ĝi estis multe brulinta en la mezo.

Kári diris al Skarphéðinn:

– Vi saltu eksteren ĉi tie kaj mi helpos al vi, sed mi tuj saltos post vi, kaj tiam ni ambaŭ sukcesos forkuri se ni agos tiamaniere, ĉar la tuta fumo iras ĉi tien.

Skarphéðinn diris:

– Vi saltu unue sed mi saltos tuj post vi.

– Tio ne estas konsilinda, diris Kári, – ĉar mi facile povos eliĝi en alia loko se mi ne sukcesos ĉi tie.

– Tion mi ne volas, diris Skarphéðinn, – vi saltu unue sed mi tuj sekvos vin.

Kári diris:

– Estas la devo de ĉiu homo savi sian vivon, dum ebleco estas por tio, kaj tion mi ja faros, sed se ni nun disiĝos ni neniam plu vidos unu la alian, ĉar se mi elsaltos el la fajro tiam mi ne havos emon reensalti en ĝin, kaj tiam ĉiu el ni iros sian vojon.

– Tio ĝojigas min, diris Skarphéðinn, – ke se vi sukcesos forkuri, bofrato mia, tiam vi venĝos por ni.

Poste Kári prenis brulantan lignaĵon per la mano kaj kuris laŭlonge de la transversa trabo. Tiam li ĵetis la lignaĵon malsupren de la tegmento, kaj ĝi falis malsupren al tiuj kiuj troviĝis ekstere. Ili rapide flankenkuris. Tiam Kári kun ĉiuj siaj vestoj kaj haroj flamantaj eksaltis de la tegmento kaj rapidis laŭ la direkto de la fumo.

Tiam iu, kiu troviĝis tie proksime, diris:

– Ĉu homo saltis de la tegmento?

– Tio ne estis, – diris iu alia, – sed Skarphéðinn ĵetis al ni brulantan lignaĵon.

Poste ili ne plu havis iujn suspektojn pri tio.

Kári kuris ĝis kiam li venis al iu rivereto. Li saltis en ĝin kaj estingis la fajron en siaj haroj kaj vestoj. De tie li kuris, kaŝita de la fumo, al iu kavo kie li ripozis; poste ĝi estis nomata Kavo de Kári.

Nun restas rakonti pri Skarphéðinn, ke li kuris sur la transversan trabon tuj post Kári. Sed kiam li atingis la lokon, kie la trabo estis plej multe brulinta, ĝi rompiĝis sub li. Skarphéðinn ekstaris kaj tuj faris alian provon. Li saltis supren laŭ la muro. Tiam trabo el la tegmento falis sur lin, tiel ke li refalis malsupren.

Tiam Skarphéðinn diris:

– Estas jam antaŭvidebla la fino.

Poste li iris laŭlonge de la flanko muro. Gunnar Lambason saltis sur la muron kaj vidis Skarphéðinn.

Tiam li diris:

– Ĉu vi nun ploras, Skarphéðinn?

– Tiel ne estas, diris Skarphéðinn, – sed tio ja estas vera ke doloras la okuloj.

Sed ĉu estas kiel ŝajnas al mi, ĉu vi ridas?

– Tiel ja estas, diris Gunnar, – kaj mi neniam ridis ĝis nun, post kiam vi mortigis Þráinn ĉe Markarfljótt.

Skarphéðinn diris:

– Tiam mi donos al vi memoraĵon.

Poste li elprenis el sia zona ledsaketo maĉdenton kiun li estis hakinta el Þráinn kaj ĵetis ĝin al Gunnar. Ĝi atingis la okulon, tiel ke ĝi tuj elkaviĝis kaj moviĝis al la vango. Tiam Gunnar falis de sur la tegmento. Poste Skarphéðinn iris al sia frato, Grímur. Ili tenis sin reciproke manon en mano kaj travadis la fajron. Sed kiam ili atingis la mezon de la halo Grímur falis malsupren, mortinta. Tiam Skarphéðinn iris al la fino de la domo. Tiam aŭdiĝis granda krakado kaj la tegmento rompiĝis kaj falis malsupren. Skarphéðinn fiksiĝis inter la tegmento kaj la domfino, tiel ke li ne povis movi sin de tie.

Flosi kaj liaj trupanoj restis ĉe la fajroj ĝis la mateniĝo. Tiam venis al ili iu viro, rajdanta sur ĉevalo. Flosi demandis lin kiel li nomiĝas. Li diris ke li nomiĝas Geirmundur kaj estas parenco de la filoj de Sigfús.

– Estas granda faro kiun vi plenumis, li diris.

Flosi respondis:

– Oni kaj nomos tion granda faro kaj malbona faro. Sed tamen tio, kio jam okazis, ne estas ŝanĝebla.

– Kiom da eminentuloj mortis ĉi tie? diris Geirmundur.

Flosi respondis:

– Ĉi tie mortis Njáll kaj Bergþóra kaj ĉiuj iliaj filoj, Þórður Kárason, Kári Sölmundarson kaj Þórður liberigito (ekssklavo). Sed estas ankaŭ aliaj kiujn ni ne konas.

Geirmundur diris:

– Vi diras ke mortinta estas tiu kiu sukcesis forkuri; mi ja parolis kun li hodiaŭ matene.

– Kiu do? diris Flosi.

– Kári Sölmundarson, diris Geirmundur. – Mi kaj mia najbaro, Bárður, trovis lin. Bárður pruntis al li sian ĉevalon. Liaj haroj estis forbrulintaj kaj ankaŭ la vestoj.

– Ĉu li portis iujn armilojn? diris Flosi.

– Li portis la glavon Fjörsváfnir, diris Geirmundur, – kaj unu el ĝiaj tranĉrandoj estis bluiĝinta, kaj ni diris ke ĝi certe moliĝis, sed li respondis ke li ĝin malmoligos en la sango de la filoj de Sigfús kaj la aliaj brulmurduloj.

Flosi diris:

– Kion li diris pri Skarphéðinn kaj Grímur?

Geirmundur respondis:

– Li diris ke ambaŭ estis vivantaj kiam li forlasis ilin, sed tamen li diris ke ili nun certe estas mortintaj.

Flosi diris:

– Vi diris al ni novaĵojn kiuj ne antaŭdiras trankvilecon kaj pacon al ni en plej proksima estonto, ĉar sukcesis liberiĝi tiu viro kiu en ĉiuj rilatoj preskaŭ egalas al Gunnar el Hlíðarendi. Nun vi tion sciuj, filoj de Sigfús kaj aliaj trupanoj de ni, ke tiel grandaj estos la sekvoj de tiu ĉi bruligado ke multaj pro tio perdos sian kapon, kaj multaj perdos ĉiujn siajn posedaĵojn. Mi havas la antaŭsenton ke neniu el vi, filoj de Sigfús, kuraĝas resti en sia bieno, kaj tio ne estas mirinda. Mi volas nun proponi al vi ĉiuj ke vi iru al mia bieno oriente kaj ke ni ĉiuj havu la saman sorton.

Ili dankis al li kaj diris ke tion ili akceptos.

*(Ólafur S. Magnússon, Voĉo de Islando, V, 1960.)*

## El la Sagao de Eiríkur la ruĝa

*Tiu sagao rakontas pri Eiríkur la ruĝa, la trovanto kaj unua loĝiganto en Groenlando. En la ĉi-tieaj partoj temas pri tio, kiam du ŝipoj veturis en la jaro 1004 el Brattahlíð, la bieno de Eiríkur en Groenlando, al la t.n. Vinlando, kiun la vikingoj trovis kaj estis en la bordo de Nordorienta-Ameriko, verŝajne en la norda parto de Novlando. La estro de unu el la ŝipoj estis Þorfinnur Karlsefni; lia kunulo estis Snorri Þorbrandsson. La alian ŝipon estris du Islandanoj, Bjarni Grímólfsson kaj Þórhallur Gamlason. Freydís estis eksteredza filino de Eiríkur la ruĝa, la edzino de unu Þorvarður.*

### Renkonto kun indiĝenoj en Vinlando

Nun oni rakontu pri Karlsefni, ke li ŝipvojaĝis suden antaŭ la lando kaj ankaŭ Snorri kaj Bjarni kun sia grupo. Ili veturis longe kaj tutvoje ĝis kiam ili alvenis unu riveron kiu elfluis el la lando kaj trans unu lagon en la maron. Estis multaj sablaĵoj, kaj nur eblis ŝipveturi en la riveron je tajda alfluo. Karlsefni kaj liaj kunuloj enveturis la estuaron kaj nomis ĝin Hóp.

Ili trovis tie surlande memsemitajn tritikkampojn kie estis malaltaĵoj, sed vinberarbetojn ĉie kie estis pli proksime al la arbaroj. Ĉiu rivereto estis plena da fiŝoj.

Ili faris fosojn kie la lando kaj la plej alta tajdo kunvenis, kaj kiam la tajdo forfluis estis hipoglosoj en la fosoj. Estis multe da cervoj en la arbaro, de ĉiuj specoj. Ili restis tie duonmonaton kaj plezurigis sin kaj renkontis nenion. Ili kunportis sian brutaron.

Kaj unu matenon, frue, ĉirkaŭrigardante, ili vidis grandan nombron da kajakoj, kaj oni svingis lignopecojn surkajake, kaj sonis simile al grendrasilo, kaj la svingado estis laŭsunire.

Karlsefni diris: – Kion tiu signifu?

Snorri Porbrandsson respondis al li: – Eble tio estas signo de paco, kaj ni prenu blankan ŝildon kaj portu ĝin kontraŭe. – Kaj tion ili faris.

Tiam ili remis pli proksime kaj miris pri la tieuloj, kaj suriris la bordon. Ili estis nigraj homoj kaj malicaspektaj, kaj havis krudan hararon surkape; ili havis grandajn okulojn kaj larĝajn vangojn. Ili restis dum mallonga tempo kaj miris pri tiuj kiuj estis tie, kaj post tio remis for kaj suden ekster la terlangon.

Karlsefni kaj liaj kunuloj starigis loĝejojn supren de la lago, kaj estis kelkaj domoj proksime al la lago, kaj aliaj pli malproksime. Ili restis tie la tutan vintron. Neniam neĝis, kaj la tuta brutaro mempaŝtiĝis.

Sed kiam printempigis ili vidis unu matenon frue, ke grandnombra kajakaro remiĝis elsude ekster la terlangon, tiel multaj kiel se oni semis lignokarberojn sur la lagon; oni denove svingis la lignopecojn el ĉiu boato. Karlsefni kaj liaj kunuloj tiam montris la ŝildojn, kaj kiam ili renkontiĝis ili okazigis foiron inter si, kaj tiu popolo plej deziris ruĝajn teksaĵojn. Kontraŭ tio ili donis peltaĵojn kaj tutgrizajn felojn. Ili ankaŭ volis aĉeti glavojn kaj lancojn, sed tion Karlsefni kaj Snorri malpermesis.

La indiĝenoj akceptis trionulne longan pecon de ruĝa teksaĵo por nova felsako kaj ligis ĝin ĉirkaŭ la kapon. La foiro daŭriĝis dum iom da tempo.

Tiam malmultiĝis la teksaĵo ĉe Karlsefni kaj liaj kunuloj, kaj tiam ili tranĉis ĝin tiel malgrandpece ke ne estis plu ol transfingro, kaj la indiĝenoj tamen donis tiel multe kiel antaŭe por ĝi, aŭ plu.



Tiel okazis ke unu bovo, kiun Karlsefni kaj lia grupo posedis, kuris el la arbaro kaj muĝis laŭte. Tio timigis la indiĝenojn, kaj ili kuris en la kajakojn kaj remis poste suden ekster la landon. Nun ili ne montris sin dum tri semajnoj entute.

Sed kiam tiu tempodaŭro jam pasis ili vidis ke venas el sude granda nombro da indiĝenaj boatoj, tiel kiel granda torento venas. Tiutempe la lignopecoj estis svingataj kontraŭsunire, kaj ĉiuj ululis laŭtege.

La grupo de Karlsefni prenis ruĝan ŝildon kaj portis kontraŭe. La indiĝenoj elboatiĝis, kaj post tio ambaŭ alproksimiĝis kaj ekbatalis. Estis granda pafado, ĉar la indiĝenoj portis ŝtonĵetilojn.

El la flanko de Karlsefni oni vidis ke la indiĝenoj metis sur stangon iun tre grandan pilkon, preskaŭ kiel ŝafa stomako kaj laŭvideble blukolora, kaj ĵetis ĝin el la stango super la batalantaron de Karlsefni, kaj sonis malbele kie ĝi surteriĝis. Je tiu kaj Karlsefni kaj la tuta lia grupo timiĝis, tiel ke ili deziris nenion pli ol fuĝi, kaj ili retiris sin supren laŭ la rivero ĉar ŝajnis al ili ke la armeo de la indiĝenoj venis el ĉiu flanko, kaj ili ne haltis ĝis kiam ili alvenis kelkajn rokojn, kie ili plejforte kontraŭbatalis.

Freydís venis el la domo kaj vidis ke ili cedis, kaj vokis: – Kial vi fuĝas antaŭ tiuj fiuloj, tiaj fortuloj kiuj vi estas, ke ŝajnas al mi ke vi povus buĉi ilin kiel brutaron? Kaj se mi havus armilojn, ŝajnas al mi ke mi povus batali pli bone ol ĉiu ajn el vi.

Ili tute ne atendis pri ŝiaj vortoj. Freydís volis sekvi ilin, kaj estiĝis pli malfrua ĉar ŝi estis graveda. Ŝi tamen iris post ili en la arbaron, sed la indiĝenoj sekvis ŝin. Ŝi trovis unu mortitulon; tiu estis Þorbrandur Snorrason, kaj staris plata ŝtono en lia kapo. La glavo kuŝis seninga ĉe li; ŝi prenis ĝin kaj preparis por defendado.

Tiam la indiĝenoj alvenis ŝin; ŝi tiam tiris la mamon el sub la vestoj kaj batis ĝin per la seninga glavo. Pro tio la indiĝenoj timiĝis kaj forkuris en la boatojn kaj forremis.

Karlsefni kaj liaj kunuloj trovis ŝin kaj laŭdis ŝian bonŝancon. Du homoj mortis el la flanko de Karlsefni sed granda nombro el la indiĝenoj. La grupo de Karlsefni estis superfortita, kaj ili iris post tio al siaj loĝejoj kaj bandaĝis siajn vundojn kaj pripensis kia homamaso estis kiu bataladis kontraŭ ili el la lando. Ŝajnis nun al ili ke la sola batalantaro estis tio kio venis el la boatoj, sed ke la alia estis vidotrompo.

La indiĝenoj ankaŭ trovis mortitulon kaj kuŝis hakilo envunde. Unu el ili prenis la hakilon kaj hakis arbon, kaj tiam unu post la alia, kaj ŝajnis al ili ke ĝi estis trezoro

kaj ege akra. Poste unu prenis ĝin kaj hakis ŝtonon, tiel ke la hakilo disrompiĝis, kaj tiam ĝi ŝajnis al ili neuzebla, ĉar ĝi ne eltenis la ŝtonon, kaj ili forĵetis ĝin. – – –

## **La unupiedulo**

Estis unu matenon, ke la grupanoj de Karlsefni vidis supre de nuda placo en la arbaro iun makulon kiu rebrilis kontraŭ ili, kaj ili kriis al ĝi. Ĝi moviĝis, kaj estis unupiedulo, kaj ĵetiĝis al la riverflanko, je kiu ilia ŝipo kuŝis.

Porvaldur, la filo de Eiríkur la ruĝa, sidis ĉe la direktilo, kaj la unupiedulo pafis sagon en lian malsupran ventron. Porvaldur eltiris la sagon kaj diris: – Estas grasa mia ventro. Ni trovis landon de bona fekundeco, sed tamen mi apenaŭ ĝuos ĝin. – Porvaldur mortis sekve de tiu vundo iom poste.

La unupiedulo tiam kuris for kaj denove suden. La grupo de Karlsefni postkuris ĝin, kaj vidis ĝin de tempo al tempo. Ili vidis ĝin lastfoje kiam ĝi kuris en unu golfeton. Tiam Karlsefni kaj liaj kunuloj reiris. – – –

## **En la verma maro**

Bjarni Grímólfsson kaj liaj samŝipanoj estis forpelataj en la Irlandan maron, kaj ili venis en verman maron, kaj tre sinkis la ŝipo sub ili. Ili havis tian boaton kiu estis ŝmirita per fokgudro, ĉar tio ne difekteblas de marvermo. Ili iris en la boaton, kaj tiam ili eltrovis ke ĝi ne taŭgos por ĉiuj.

Tiam Bjarni diris: – Ĉar la boato ne portos plu ol la duonon de nia grupo tiam estas mia konsilo ke ni lotu pri homoj en la boaton, ĉar tio ne estu laŭ altrangeco.

Al ĉiu ŝajnis ke tio estas tiel noblanime proponite ke neniu volis protesti. Ili faris tiel ke ili lotis pri la homoj, kaj estiĝis la loto de Bjarni kaj la duono de liaj kunuloj iri en la boaton, ĉar la boato ne portis pli multajn.

Sed kiam ili estis en la boato diris unu islanda viro, kiu tiam estis surŝipe kaj estis sekvinte Bjarni el Islando: – Ĉu vi intencas, Bjarni, disiĝi de mi ĉi-tie?

Bjarni diris: – Tiel devas nun esti.

Li respondis: – Alion vi promesis al mia patro, kiam mi foriris de Islando kun vi, ol ke vi disiĝu tiel de mi, kiam vi diris ke la sama estu la sorto de ni ambaŭ.

Bjarni respondis: – Kaj ankaŭ tio ne estu tiel; iru ĉi-tien en la boaton sed mi iros sur la ŝipon, ĉar mi vidas ke vi volonte vivos.

Bjarni tiam reiris surŝipen sed tiu viro enboaten, kaj post tio ili veturis sian vojon, ĝis kiam ili atingis Dublinon en Irlando kaj rakontis tie tiun historion. La plej multaj homoj supozis ke Bjarni kaj la homoj, kiuj restis kun li sur la ŝipo, estas mortintaj en la verma maro, ĉar neniu sciigis pri ili post tio.

*(Eysteinn Sigurðsson)*

## Auðunn kaj la urso

Estis homo, nomita Auðunn, Okcidentfjordano laŭ deveno kaj nebonhava. Li vojaĝis eksterlanden de la Okcidentaj Fjordoĵoj kun la helpo de bonstata bienulo, Þorsteinn, kaj ŝipestro Þórir, kiu ĝuis la gastamon de tiu Þorsteinn dum la vintro. Auðunn ankaŭ estis tie, laborante por Þórir, kaj ricevis salajre ĉi tion: la veturon eksterlanden kun la ŝipestro kiel prizorganto. Irante sur la ŝipon Auðunn lasis post si la plejparton de sia mono por sia patrino, tiom kiom estis konsiderata sufiĉe por ŝia vivteno dum la tri venontaj jaroj. Ili nun ekvelis for kaj havis bonan transiron, kaj pasigis Auðunn la vintron kun la ŝipestro Þórir, kiu posedis bienon en Mæri en Norvegujo. La sekvintan someron ili velis al Groenlando, kaj tie trapasigis la vintron.

La rakonto diras kiel Auðunn aĉetis tie urson de granda valoro, por kiu li donis sian tutan havaĵon. La sekvintan someron ili returnis al Norvegujo, ĝuante bonegan transiron. Auðunn kunprenis sian urson, kaj estis lia plano vojaĝi suden al Danujo, iri antaŭ la reĝon Sveinn kaj donaci al li la beston. Tiel ke, atinginte la sudan parton de Norvegujo, kie loĝis tiam portempe la norvega reĝo, li forlasis la ŝipon, kunprenante la urson, kaj luis por si enloĝejon.

Baldaŭ estis dirite al reĝo Haraldur ke urso de granda valoro estis veninta en la landon, kaj ke tiun posedas Islandano. La reĝo sendis por li senprokraste, kaj kiam Auðunn venis antaŭ la reĝon li salutis ĉi tiun kun estimo. La reĝo afable akceptis lian saluton kaj diris:

– Ĉu estas vere ke vi posedas urson de granda valoro?

Li respondis ke li ja posedas ian beston.

– Ĉu vi estus preta vendi al mi la beston, diris la reĝo, – je la sama prezo kiun vi donis por ĝi?

Li respondis:

– Mi ne volas tion, Via Moŝto.

– Ĉu vi do volas ke mi donu al vi tiun prezon duoblan? diris la reĝo. – Tio estus ankaŭ pli justa, ĉar vi ja pagis por ĝi vian tutan havaĵon.

– Mi ne volas tion, Via Moŝto, li diris.

La reĝo diris:

– Ĉu vi do volas ĝin donaci al mi?

– Ne, Via Moŝto, li respondis.

La reĝo diris:

– Kion vi do volas fari pri ĝi?

– Iri al Danujo, li diris, – kaj ĝin donaci al reĝo Sveinn.

– Ĉu estas eble, demandis reĝo Haraldur, – ke vi estas tiel malsaĝa ke vi ne aŭdis pri la malpaco kiu regas inter niaj du ŝtatoj? Aŭ ĉu vi kredas tioma vian bonsorton ke vi sukcesos finiri vian vojon kun valoregaĵo, dum aliaj, kun urĝaj komisioj, trapenas nur post difektoj?

– Via Moŝto, respondis Auðunn, – vi havas la potencon ordoni, sed tamen mi agos ne alie ol mi decidis.

Tiam diris la reĝo:

– Kial do ne lasi vin iri laŭ via deziro? Sed reveninte, iru diri al mi kiel rekompencis vin reĝo Sveinn pro la urso. Povas esti ke vi estas homo de bonsorto.

– Tion mi promesas, diris Auðunn.

Li daŭrigis sian vojon suden laŭ la bordo kaj orienten al Vík, kaj de tie al Danujo. Je tiu tempo li estis elspezinta sian tutan monon kaj estis devigita almozpeti manĝaĵon, kaj por si kaj la besto. Li iris renkonti la intendanton de la reĝo, homon nomitan Áki, kaj petis lin pri nutraĵo, kaj por si mem kaj la urso.

– Ĉar mi volas, li diris, – donaci ĝin al reĝo Sveinn.

Áki diris ke li vendos al li nutraĵon se li deziras tion. Auðunn diris ke li ne havas monon por pagi, – sed mi ŝatus, li aldonis, – ke efektiviĝos tiu mia intenco, konduki al la reĝo la urson.

Áki diris:

– Mi donos al vi nutraĵon kaj loĝejon, laŭ via bezono, ĝis vi atingos la reĝon, sed kiel repagon mi postulas duonan posedon pri tiu besto. Vi povas rigardi la aferon tiel ke la urso nur mortos en viaj manoj, ĉar vi bezonas konsiderindan provizon kaj via mono estas elspezita, kaj tiukaze vi havos nenian profiton de via besto.

Je pripenso ŝajnis al Auĉunn ke la vortoj de la intendanto enhavas multe da pravo, tiel ke ili interkonsentis pri tio, ke li donu ĝis duono la beston al Áki, kaj ke la reĝo poste arbitru pri la tuto.

Venis jen ilia vico iri antaŭ la reĝon, kion ili faris kaj staris antaŭ lia tablo. La reĝo cerbumis pri tio, kiu povas esti tiu homo kiun li ne konas kaj ekparolis tiel al Auĉunn:

– Kiu vi estas? li diris.

– Mi estas Islandano, Via Moŝto, li respondis, – kaj estas antaŭ nelonge veninta el Groenlando, kaj ankoraŭ pli ĵuse el Norvegujo. Estis mia intenco donaci al vi ĉi tiun urson, kiun mi aĉetis per mia tuta havaĵo, sed nun mi trovas min en la embaraso ke mi ne plu posedas la beston krom duone, – kaj diris al la reĝo kio okazis inter li kaj Áki, la intendanto.

– Ĉu tio estas vera, Áki, kion li diras? demandis la reĝo.

– Tiel estas, tiu respondis.

– Kaj ĉu vi trovis tion konvena, post kiam mi levis vin range, albari kaj malhelpi la iron de homo kiu estis klopodanta alporti al mi tian mirindan beston, por kiu li estis doninta sian tutan havaĵon, kiam eĉ reĝo Haraldur, kiu estas nia malamiko, trovis tion deca tralasi lin en paco? Kiel honeste estis tio viaflanke! Estus ja laŭmerite ke mi ordonu vian mortigon, sed tial ke mi ne faros tion vi senplue forlasu la landon, neniam por reveni sub miajn okulojn. Sed al vi, Auĉunn, mi dankas kvazaŭ vi donacis la beston tutan. Kaj restu ĉi tie kun mi.

Li akceptis tion kaj restadis kun reĝo Sveinn por kelka tempo.

Iam post tio Auĉunn diris al la reĝo:

– Nun mi ŝatus foriri, Via Moŝto.

La reĝo respondis, iom nevarme:

– Kion do vi deziras, se vi ne deziras pluresti kun ni?

– Pilgrimi suden mi deziras, aljenis Auĉunn.

– Se ne estus tiel feliĉa via vojelekto, eldiris la reĝo, – mi ja sentus min ofendita de via deziro foriri.

La reĝo donis al li grandan kvanton da arĝento, kaj ekiris Auĉunn suden kun pilgrimantoj celantaj Romon. La reĝo aranĝis pri lia vojaĝo kaj petis lin viziti sin je lia reveno.

Li nun daŭrigis sian vojon ĝis li atingis al Romo, kaj kiam li estis restinta tie tiom longe kiel li deziris li komencis sian reiron. Tiam atakis lin grava malsano, dum kiu li terure malgrasiĝis. Elĉerpiĝis nun la tuta mono, kiun la reĝo donis al li, tiel ke li alprenis la manieron de almozulo, almozpetante sian nutraĵon. Li tiam fariĝis kalva kaj mizeraspekta.

Li revenis al Danujo je Pasko, al la loko kie tiam troviĝis la reĝo. Li ne kuraĝis vidigi sin kaj restis en la preĝeja transepto, esperante renkonti la reĝon je lia alveno en la preĝejon vespere. Sed vidante la reĝon kun la korteganoj pompe vestitaj, li plue ne kuraĝis vidigi sin. Kaj kiam la reĝo iris por la bankedo en la halon, Auĉunn ekmanĝis eksterdome, kiel estas la kutimo de pilgrimintoj al Romo, dum ili ankoraŭ ne formetis bastonon kaj sakon.

Je noktiĝo, kiam la reĝo iris al la vesproj, Auĉunn intencis renkonti lin, sed se la perspektivo estis senkuraĝa antaŭe, ĝi fariĝis ankoraŭ pli malbona, ĉar nun estis ebriaj la korteganoj. Kaj tamen, kiam ili eliris el la preĝejo, la reĝo rimarkis homon, al kiu ŝajne mankis la memfido por paŝi antaŭen kaj lin alparoli. Kaj kiam la korteganoj estis reenirantaj en la halon la reĝo turniĝis kaj eldiris:

– Nun paŝu antaŭen tiu kiu deziras ricevi de mi aŭdiencon, ĉar mi kredas ke tia homo alestas.

Tiam Auĉunn elpaŝis, sin ĵetante antaŭ la piedojn de la reĝo, kiu povis apenaŭ lin rekoni. Sed tuj kiam li sciis kiu estas tiu, li prenis lian manon kaj lin bonvenigis, dirante:

– Kiel vi ŝanĝiĝis post kiam mi vidis vin lastfoje, – kaj kondukis lin post si en la halon. Kaj kiam la korteganoj vidis lin ili ekridegis, sed la reĝo diris:

– Vi prefere ne priridu lin, ĉar li pli antaŭzorgis por sia animo ol faris vi.

Tiam la reĝo preparigis por li banon kaj donis al li vestojn, kaj restis Auĉunn kun li nun.

Estas rakontite ke iun tagon en la printempo la reĝo proponis al Auĉunn resti kun si ĝis la fino de lia vivo, promesante doni al li rangon de reĝa pokalisto.

– Dio vin rekompencu, Via Moŝto, diris tiam Auĉunn, – pro la multaj honoroj kiujn vi bonvolus doni al mi, sed mi ja preferus reiri al Islando.

– Tio ŝajnas al mi stranga elekto, diris la reĝo.

– Mi ne povas plu ŝtopi la buŝon de mia konscienco, ĝuante kun vi ĉi tie tiajn honorojn, diris Auĉunn, – dum mia patrino devas iri la vojon de almozulino tie fore en Islando, ĉar jam nun estas elĉerpita la provizo kiun mi lasis por ŝi hejme je mia foriro.

– Jen vi diris bonajn vortojn kaj indajn al homoj, respondis la reĝo, – kaj pruvigis vi bonsortulo. Estas tio la sola motivo por via foriro kiu ne malplaĉus al mi. Sed plurestu kun mi ĝis la ŝipoj estas velopretaj.

Li faris tion.

Iun tagon, malfrue en la printempo, reĝo Sveinn alpaŝis malsupren al la ĝetoj, kie ŝipoj estis esplorataj finprezare por vojaĝoj al multaj landoj, al la Baltikaj landoj aŭ Germanujo, Svedujo kaj Norvegujo. Li kaj Auĉunn venis al tre bela ŝipo, kiun homoj estis pretigantaj. La reĝo demandis:

– Kion vi opinias pri ĉi tiu ŝipo, Auĉunn?

Li respondis:

– Ĝi estas tre bela, Via Moŝto.

La reĝo diris:

– Ĉi tiun ŝipon mi volas donaci al vi rekompence pro la urso.

Auĉunn dankis al li pro la donaco laŭ sia kapablo.

Kiam ioma tempo estis plupasinta kaj la ŝipo jam fariĝis preta, reĝo Sveinn ekparolis al Auĉunn, dirante:

– Ĉar vi nepre deziras foriri mi ne provos persvadi vin kontraŭe. Sed mi aŭdis ke via lando estas neriĉa je bonaj havenoj, ke la bordoj estas dezertaj multloke kaj danĝeraj kontraŭ ŝipoj. Nun povus okazi ke vi rompus vian ŝipon, ĝin perdante kaj vian tutan havaĵon. Tiakaze malmulto montrus ke vi faris viziton al reĝo Sveinn, portante al li donacon valoregan.

Tion dirinte, la reĝo donis al li ledan saketon, plenan de arĝento, – kaj estus vi ne tute senhava, eĉ rompinte vian ŝipon, dum vi ankoraŭ pritenas tion ĉi. Tamen, pludiris la reĝo, – povus okazi ke vi perdus ankaŭ ĉi tiun monon, kaj estus tiam malmulta la rikolto de via vizito al reĝo Sveinn, al kiu vi portis donacon valoregan.

Tion vortinte, la reĝo detiris ringon de sia brako kaj ĝin donis al Auðunn, dirante:

– Eĉ se vi estus tiel malfeliĉa rompi la ŝipon kaj perdi la arĝenton, vi tiel ne estus tute senhava, sukcesinte saviĝi sur la bordon, ĉar multaj portas oron sur si mem en kazo de ŝiprompiĝo, kaj estos klare ke vi faris viziton al reĝo Sveinn se vi savis la ringon. Sed mi konsilas al vi ne fordoni la ringon, krom se vi konsideros vin tiom ŝuldanta favoron al iu eminentulo, al tiu donacu la ringon, ĉar bone konvenas al altranguloj akcepti tian. Kaj benu vin la feliĉo!

Nun li ekvelis maren kaj venis al Norvegujo, kie li portigis ĉiujn siajn varojn surborden, kaj nun bezonis pli da helpo por tio ol je la unua fojo, kiam li venis al Norvegujo. Li faris viziton al reĝo Haraldur, tenante sian promeson, kiun li donis al li antaŭ sia ekiro al Danujo, kaj salutis lin ĝentile.

La reĝo akceptis afable lian saluton.

– Sidiĝu, li diris, – kaj trinku kun ni.

Li faris tiel.

Tiam demandis reĝo Haraldur:

– Kiel vin rekompencis reĝo Sveinn pro la urso?

Auðunn respondis:

– Tiel ke li ĝin akceptis.

– Ankaŭ tiel mi estus vin rekompencinta, diris la reĝo. – Kiel plue li vin rekompencis?

– Lin donis al mi arĝenton por mia pilgrimo, respondis Auðunn.

– Al multaj donas por pilgrimoj arĝenton reĝo Sveinn, kaj tiel same por aliaj aferoj, diris la reĝo, – kaj ne estas nepre ke oni portu al li valorajn donacojn por tio. Kion plian li donis?

– Li proponis fari min sia pokalisto, diris Auðunn, – kaj doni al mi multajn honorojn.



– Jen li bone parolis, diris la reĝo. – Tamen li estus doninta al vi plion, ĉu ne?

– Li donis al mi komercistan ŝipon kaj tiajn varojn kiuj vendiĝas la plej bone ĉi tie en Norvegujo.

– Tio estas ja bela ago, diris la reĝo, – ankaŭ tiel mi estus vin rekompencinta. Ĉu li bontraktis vin iel plue?

– Li donis al mi ledan saketon plenan da arĝento, dirante ke mi ne estos senmona, ĝin tenante, eĉ se rompiĝus ĉe Islando mia ŝipo.

– Tio estis noble farita, diris la reĝo, – kaj io kion mi ne estus farinta. Mi estus konsiderinta nin egalaj, doninte al vi la ŝipon. Ĉu li rekompencis vin plue?

– Efektive li faris al mi ankoraŭ plian rekompencon, Via Moŝto, diris Auðunn. – Li donis al mi ĉi tiun ringon kiun mi portas sur la brako, dirante ke povus okaze tiel turniĝi la aferoj ke mi perdus mian tutan monon, kaj tamen, li diris, mi ne estus senhava se mi nur estus konservinta la ringon. Kaj li postulis ke mi neniam ĝin delasu, krom se mi konsiderus min tiel ŝuldanta favoron al iu eminentulo ke mi dezirus ĝin donaci al li. Kaj nun mi tian trovis, ĉar estis en via potenco senigi min je ambaŭ, la urso kaj mia propra vivo; tamen vi permesis al mi pluri en paco, dum eble aliaj ne estus farinta tiel.

La reĝo akceptis lian donacon plej afable, kaj donis li al Auðunn bonegajn donacojn rekompence antaŭ ilia disiĝo. Auðunn uzis sian monon por la transiro al Islando kaj sen plia prokrasto ekvelis en la somero; li estis konsiderata homo de bonsorto la plej favora.

*(Baldur Ragnarsson, Islandaj Pravoĉoj, Malmö 1964.)*

### **Notoj:**

La Okcidentaj Fjordoĵoj konsistigas la nord-okcidentan parton de Islando.

Sveinn Úlfsson estis reĝo super Danujo 1047-1076. „Sveinn Úlfsson estis la plej belaspekta inter viroj; al ĉiuj li estis supera laŭ staturato kaj forteco kaj elstarulo laŭ lerteco kaj ĉiuj bonkapabloj. Ĉiuj kiuj lin konis estis unuanimaj pri tio ke li estis dotita per ĉiuj tiuj aferoj kiuj eminentigas unu homon.“ (El Heimskringla, sagaoj pri la norvegaj reĝoj, de Snorri Sturluson.)

Haraldur Sigurðarson estis reĝo super Norvegujo 1046-1066. „Li starigis komerclokon en Oslo kaj sidrestis tie oftfoje, ĉar estis facile tie pri la akirado de necesajoj, vasta kamparo ĉirkaŭe. Estis tie ankaŭ tre taŭge pri gardado kontraŭ la Danoj, kaj same pri atakoj kontraŭ Danujo.“ (Heimskringla.)

## Rakonteto de Óttar la nigra

### (Óttars þáttur svarta)

Estis homo islanda nomita Óttar. Li estis poeto bona. Li estis iom da tempo en la kortego de Ólafur la reĝo de Svedoj. Li tiam verkis amepopeon pri Ástríður, filino de Ólafur reĝo de Svedoj. Tiu poemo tre misplaĉis al reĝo Ólafur la sankta.<sup>1</sup> Tiu poemo estis preskaŭ ne sen aludoj. Sed kiam Óttar venis al Norvegio tiam Ólafur la sankta lin arestigis kaj lasis lin ĵeti en karcero (mallumejo) kaj intencis lin lasi mortigi.

La poeto Sighvatur estis bona amiko de Óttar. Li iris nokte al la mallumejo. Kaj tien veninte li demandis kiel Óttar fartis. Óttar respondas kaj diras ke li antaŭe ofte estis pli ĝoja. Tiam Sighvatur petis lin deklami la poemon kiun li verkis pri Ástríður. Óttar deklamis la poemon tiel kiel petis Sighvatur.

Kaj kiam la deklamo de la poemo estis finita tiam Sighvatur diris: „Tre cinika estas tiu ĉi poemo kaj ne estas strange ke la reĝo malŝatas ĝin. Nun ni ŝanĝu tiujn strofojn en kiuj estas plej maldecaj vortoj. Poste vi verku poemon alian pri la reĝo sed li postulos ke vi deklamu la poemon antaŭ ol vi estos mortigita. Nun kiam vi findeklamis la unuan poemon vi ne ĉesigu la deklamadon sed komencu deklami la alian kiun vi verkis pri la reĝo kaj deklamu tiel longe kiel vi povos.

Óttar tiel faris kiel Sighvatur diris. Li verkis dum la tri noktoj, kiujn li pasigis en la mallumejo, epopeon pri la reĝo Ólafur. Kaj kiam Óttar jam estis tri noktojn en la mallumejo tiam la reĝo Ólafur kondukigis lin antaŭ si.

Kaj kiam Óttar venis antaŭ la reĝon li salutis al Ólafur sed la reĝo ne resalutis lin sed diris al Óttar: „Nun konvenas ke vi eldiru vian poemon kiun vi verkis pri la reĝino antaŭ ol vi estos mortigita, ĉar la reĝino devas aŭdi la laŭdon kiun vi verkis pri ŝi.“

Ástríður, la reĝino, sidis sur la trono ĉe la reĝo kiam ili, la reĝo kaj Óttar, interparolis. Óttar eksidis sur la planko antaŭ piedoj de la reĝo kaj deklamis la poemon. La reĝo ruĝiĝis kiam li deklamis. Kaj fininte la poemon Óttar ne ĉesigis sian deklamadon sed ekeldiris la epopeon kiun li verkis pri la reĝo, sed korteganoj de la reĝo ekkriis kaj diris ke la mokulo silentu.

Sighvatur tiam diris: „Supozeble la reĝo havus povon lasi mortigi Óttar kiam li tion volas kvankam li deklamos tiun poemon antaŭe kaj ni bone aŭskultu la poemon ĉar estas inde aŭdi laŭdon pri nia reĝo.

La korteganoj silentis kiam ili aŭdis la vortojn de Sighvatur sed Óttar deklamis la epopeon ĝis fino. Post tio Sighvatur laŭdis la epopeon kaj diris ke ĝi estis bone verkita.

Reĝo Ólafur tiam diris: „Estas plej bone, Óttar, ke vi akceptu vian kapon tiu ĉi foje pro la epopeo.“

Óttar respondis: „Tiu donaco ŝajnas al mi bonega kvankam la kapo ne estas bela.“

Ólafur, la reĝo, deprenis orringon de sia brako kaj donacis ĝin al Óttar.

Ástríður, la reĝino, glitigis fingran orringon sur la plankon al Óttar kaj diris: „Prenu, poeto, fajron tiun kaj ĝin tenu.“

Ólafur, la reĝo, diris: „Okazis ke vi ne tute povis kaŝi vian amikecon al Óttar?“

La reĝino respondas: „Vi ne povas akuzi min, mia moŝto, kvankam mi volas rekompenci mian laŭdon samkiel vi vian laŭdon.“

La reĝo respondas: „Estu tiel ĉifoje, ke mi ne akuzu vin pro tiu donaco sed tamen vi ambaŭ sciu ke via amikeco ne plaĉas al mi de nun pro la versaĵo kiun Óttar verkis pri vi.“

Nun Óttar longe restadis ĉe la reĝo alte taksita. Tiu epopeo nomiĝas Kapliberigo, kiun Óttar verkis pri la reĝo Ólafur, pro tio ke Óttar akceptis sian kapon kiel repagon pro la poemo.

<sup>1</sup> Ólafur la sankta, reĝo de Norvegio, edziĝis iom poste kun la princino Ástríður.

*Kristján Eiríksson, La Tradukisto 11, 1992.*

## **Rakonto pri Torstejn la Kelketo**

La sekvanta rakonto troviĝas en malnova islanda manuskripto, nomita *Flateyjarbók*, skribita fine de la 14-a jarcento. Tiaj mallongaj, memstaraj rakontoj temas pri islandaj homoj sed okazas plej ofte ekster Islando, precipe ĉe la kortegoj de la norvegaj kaj danaj reĝoj en la antikva tempo. Plej multaj estas konservitaj en la sagaoj pri tiuj reĝoj, verkitaj de islandaj homoj. La reĝo nomita en la sekvanta rakonto estas la norvega reĝo *Olaf Tryggvason* kiu pereis en la jaro mil en batalo sur sia ŝipo *Ormurinn langi*, Longa Drako (aŭ Serpento). La kromnomo de Torstejn estas en la islanda *skelkur*, signifanta „timeto“. (*Rim*. En la traduko Torstejn respondas al la demando de la reĝo, ĉu li ne timis pro la krioj de la demono,

ke la lasta krio kaŭzis ĉe li „kelketon tian“, tio estas kelketan timon. Mi do elektis la vorton *kelketo* por transdoni minimumigan signifon de la islanda vorto *skelkur*, kaj lasas al la kunteksto klarigi la sencan; krome la vorto *kelketo* kelke similas al sono de la islanda vorto, *elk / elk.*) *La trad.*

Estas dirite, ke reĝo Olaf iris viziti riĉajn bienulojn en tiu parto de sia regno, kiu nomiĝas Víkin (la regiono ĉirkaŭ Oslo-fjordo). Li venis al bieno nomita Rejna kun multaj homoj kaj akceptis tie bonan regalon. Kun la reĝo estis islanda homo nomita Torstejn Torkelsson (filo de Torkel), kiu aliĝis al la sekvantaro de la reĝo en la antaŭa vintro. En la vespero, dum la antaŭnokta trinkado de biero, reĝo Olaf ordonis, ke neniu iru sola al la neceseja domo dum la nokto, sed petu akompanon de sia samlitano, se li bezonos iri, se ne, okazus iu misaĵo.

Dum la vespero oni trinkis multe da biero kaj je forpreno de la trinkotabloj la homoj pretigis sin por dormado. Kaj kiam iom pasis la nokto, vekigis Torstejn la Islandano kaj sentis bezonon iri al la necesejo, sed lia samlitano tiom profunde dormis, ke Torstejn ne volis lin veki. Li do iras el la lito kaj surmetas siajn ŝuojn kaj dikan felmantelon kaj iras al la necesejo. Ĝi estis granda domo, tiel ke dek unu homoj povis sidi laŭvice je ambaŭ flankoj. Li sidiĝas sur la plej antaŭan sidlokon, kaj kiam li sidis jam kelkan tempon li vidas, ke demoneto elvenas sur la plej malantaŭan sidlokon kaj tie sidiĝas. Torstejn tiam diras: „Kiu tie alvenis?“ La demono respondas: „Ĉi tien alvenis Torkel la Maldika, kiu falis kadavro kun reĝo Harald Batalodento.“ „De kie vi venis nun?“ diris Torstejn. Li diris ke li ĵus venis el infero. „Kian novaĵon vi povas diri el tie?“ demandis Torstejn. La alia respondas: „Pri kio vi volas demandi?“ „Kiuj plej brave eltenas la turmentojn en la infero?“ „Neniu pli brave,“ diris la demono, „ol Sigurd la Dragon-mortiginto.“ „Kian turmenton li havas?“ „Li prizorgas la fajron de forno brulanta,“ diris la fantomo. „Tion mi ne konsideras granda turmento,“ diras Torstejn. „Tiel ne estas,“ diris la demono, „ĉar li mem estas bruligata.“ „Tio do estas multa,“ diris Torstejn, „sed kiuj plej malbrave eltenas turmentojn?“ La fantomo respondas: „Starkad la Maljuna plej malbrave eltenas, ĉar li tiom laŭte kriaĉas, ke al ni demonoj tio estas pli doloriga turmento ol la plej multo alia, tiel ke ni neniam povas ripozi pro liaj krioj.“ „Kiun turmenton li do havas,“ diris Torstejn, „kiun li tiel malbrave eltenas, tiom forta homo kia li estis laŭdire?“ „Li havas maleolan fajron.“ „Tion mi konsideras ne tiom multa,“ diras Torstejn, „por tia fortulo kia li estis.“ „Tio ne estas ĝuste taksita,“ diris la

fantomo, „ĉar elstaras el la fajro nur la piedplatoj.“ „Tio ja estas multa,“ diris Torstejn, „kaj krii vi laŭ lia maniero unu krion.“ „Tion mi faru,“ diris la demono. Li tiam malfermegis la buŝaĉon kaj eligis akran krion, sed Torstejn levmetis la mantelrandojn sur sian kapon. Li sentis ektimon pro tiu krio kaj diris: „Ĉu li krias tiel la plej akre?“ „Tute ne estas tiel,“ diris la fantomo, „ĉar tiu estis la krio de ni, la demonetoj.“ „Kriu iom laŭ la maniero de Starkad,“ diris Torstejn. „Tion mi bone povas fari,“ diris la demono. Li tiam komencas krii por la dua fojo tiom akrege, ke al Torstejn ŝajnis nekredeble ke tia malgranda demono povas eligi tioman kriegon. Torstejn faras tiam kiel antaŭe, ke li volvis la felon ĉirkaŭ sian kapon, sed tamen li tiom timis ke li perdis la konscion kaj ne sciis pri si mem. Tiam demandis la demono: „Kial vi nun silentas?“ Torstejn respondis, kiam li regajnis la konscion: „Tial mi silentas, ĉar mi miras pro tio ke tiomega krivoĉo troviĝas en vi, estanta ne pli granda demono ol al mi ŝajnas. Aŭ ĉu tiu estas la plej alta krio de Starkad?“ „Tute ne estas tiel. Tiu estas,“ li diris, „lia plej malalta krio.“ „Ne prokrastu tion pli longe,“ diras Torstejn, „kaj aŭdigu al mi la plej altan krion.“ La demono tion konsentis. Torstejn tiam pretigis sin tiel ke li kunfaldis la felon kaj forte ĝin volvis ĉirkaŭ sian kapon kaj tenis ĝin per ambaŭ manoj. La fantomo estis movinta sin direkte al Torstejn tri sidlokojn je ĉiu krio, kaj estis tiam nur tri inter ili. La demono tiam disegigis terure la makzelojn kaj renversis la okulojn, kaj komencis krii tiom akrege ke por Torstejn tio transiris ĉiun malmoderon, kaj en la sama momento sonoris la preĝeja sonorilo sur la bieno, kaj falis Torstejn senkonscia sur la plankon, sed la demonon tiom surprizis la sonoro ke li plonĝis en la plankon, kaj estis aŭdebla por longa tempo la kriado el la tero. Torstejn baldaŭ rekonsciiĝis kaj ekstaris kaj iris al sia lito kaj enkuŝiĝis.

Sed je mateniĝo, kiam leviĝis la homoj, la reĝo iris al la preĝejo kaj ĉeestis sanktan meson. Poste oni sidiĝis ĉe la manĝotabloj. La reĝo ne estis aparte afabla. Li ekparolis. „Ĉu iu homo iris sola en la nokto al la neceseja domo?“ Torstejn tiam ekstaris kaj sin ĵetis antaŭ la piedojn de la reĝo kaj diris ke li malobeis lian ordonon. La reĝo respondas: „Ne estis tio tiom granda ofendo kontraŭ mi, sed montras vi tion, kio estas pri vi Islandanoj dirita, ke vi estas tre memvolemaj, sed ĉu vi vidis ion strangan?“ Torstejn tiam rakontis pri la tuto kio okazis. La reĝo demandis: „Kial vi opiniis tion utila ke li krii?“ „Tion mi diru al vi, sinjoro. Ŝajnis al mi klara, ĉar vi jam avertis ĉiujn

homojn iri tien solaj, kaj la fripono elaperis, ke ni ne disiĝos sen misiĝo, sed mi supozis ke vi vekigis, sinjoro, kiam li krios, kaj opiniis mi ke mi estos savita se vi ekscios, kio okazas.“ „Tiel ja estis,“ diris la reĝo, „ke mi vekigis kaj sciis mi jam kio okazas, kaj ordonis mi la sonorigon, ĉar mi sciis ke nur tiel vi estos savita. Sed ĉu vi ne timis, kiam la demono komencis krii?“ Torstejn respondas: „Mi ne scias, kio tio estas, la timo, sinjoro.“ „Ĉu estis nenia timo en via brusto?“ diris la reĝo. „Estis ja tiel,“ diris Torstejn, „ke la lasta krio kaŭzis ĉe mi kelketon tian.“ La reĝo respondas: „Nun ni plilongigu vian nomon kaj nomu vin Torstejn la Kelketo post nun, kaj akceptu ĉi tiun glavon kiun mi donas al vi por aŭtentigo de la nomo.“ Torstejn dankis al li. Estas dirite, ke Torstejn fariĝis kortegano de reĝo Olaf kaj estis kun li ĉiam poste, kaj falis li sur Longa Drako kun aliaj bravaj homoj de la reĝo.

*Baldur Ragnarsson, La Tradukisto 26, 1997.*

## La rakontoscia Islandano

Iam somere okazis ke Islandano venis al reĝo Haraldur en Norvegio kaj petis de li engastigon. La reĝo demandis ĉu li povoscias iun fakon. Li diras ke li scias rakontojn. Tiam diris la reĝo ke li prenos lin, sed li devus distri kiam ajn kaj kiu ajn li petus. Kaj li faras tion, kaj la korteganoj fariĝas amikecaj al li. Ili donacas al li vestojn, kaj la reĝo donacas al li batalilojn.

Nun pasas la tempo ĝis kristnasko. Tiam malĝojiĝis la Islandano, kaj la reĝo demandas pri la kaŭzo de tio. Li diras ke li nur estas ŝanĝhumora.

– Tiel ne estas, diras la reĝo, – kaj mi volas diveni tion. Mi kredas ke viaj sagaoj jam finiĝis kaj vi trovas malbone ne povi rakonti dum la kristnasko.

– Estas ĝusta via diveno, diras li. – Unu rakonto restas, kiun mi ne kuraĝas rakonti ĉi tie, ĉar estas via vojaĝrakonto al Konstantinoplo.

La reĝo diris:

– Tiu estas la rakonto kiun mi plej ŝatus aŭdi, kaj vi ne distru ĝis kristnasko, ĉar oni devas nun labori. Sed en la unua kristnaska tago vi komence rakontu mallongan parton de tiu rakonto, kaj mi aranĝos tiel ke ĝi daŭros egale longe kiel la kristnasko.

Dum la kristnasko la korteganoj multe trinkas, tiel ke oni nur mallonge povas ĝui distraĵon, kaj vi ne ekscios, dum vi rakontos, ĉu al mi plaĉas bone aŭ malbone.

Nun tiel okazas ke Islandano rakontas kaj komencas en la unua kristnaska tago. Post mallonga tempo la reĝo petas lin ĉesi. La korteganoj nun ektrinkas, kaj multaj parolas pri tio ke estas kuraĝaĵo ke Islandano tion rakontas, kaj kiel tio plaĉus al la reĝo. Iuj trovas ke li bone rakontas, aliaj ne taksas tion same bone.

Tiel okazis dum la kristnasko. La reĝo estis postulema ke oni aŭskultu bone. Kaj laŭ la reĝa aranĝo finiĝis la rakonto kaj la kristnasko samtempe. Kaj en la dektria vespero, kiam la rakonto jam finiĝis antaŭe en la sama tago, diris la reĝo:

– Ĉu vi ne estas scivola, Islandano, kiel al mi plaĉas la rakonto?

– Mi timas, sinjoro, diras li.

La reĝo diris:

– Al mi plaĉas tre bone, kaj nenie malpli ol la ĉirkonstancoj permesas, aŭ kiu instruis la rakonton al vi?

Li respondas:

– Mi kutimis en Islando iri al Alþingi en ĉiu somero, kaj tiam mi lernis ĉiufoje iom el la rakonto, kiam Halldór Snorrason rakontis.

– Estas do ne strange ke vi bone scias, diris la reĝo, – kaj tio fariĝos al vi feliĉon, kaj estu bonvena resti ĉe mi, kaj tio al vi rajtas kiam ajn vi deziras.

La reĝo donacis al li bonajn varojn, kaj li fariĝis elstara homo.

*(Stefán Sigurðsson)*

## La strofoj de Bjorn Violono

*Bjorn Violono (Fiðlu-Björn) probable vivis en la dua parto de la 16-a jarcento, sed ĉiuj fontoj pri li havas legendan aspekton. La sekvanta poemo estas nomita aŭ La strofoj de Bjorn Violono (Vísur Fiðlu-Bjarnar) aŭ Poemo de tristo aŭ malĝojo (Raunakvæði). En iuj manuskriptoj ĝi havas la subtitolon „Poemo kantita el roko“ sed legendo diras, ke Bjorn Violono aŭdis la poemon kantatan el roko aŭ ŝtono (verŝajne aludo al feoj) kaj do ne verkis ĝin mem. Tiu ĉi poemo estas la sola de Bjorn Violono kiu estas konservita.*

Similas mi al birdo,

kiu senpluma kaŭras,  
rampas tuj en ŝirmejon,  
el vento provas eskapi,  
perdas kanton kaj naĝon,  
sian ĝojon faligas.  
Tiel hom' mateniĝe  
kantas pri kordoloro.

Similas mi al la ŝipo,  
kiu sen teno kuŝas,  
sola ĉe l' maro malvarma,  
ne trovas lokon ripozan,  
leviĝas alte la ondoj,  
muĝas la plaŭdaj frapoj.  
Tiel hom' mateniĝe  
kantas pri kordoloro.

Similas mi al la domo,  
kiu sur kruta deklivo  
staras kaj baldaŭ falos,  
muroj dise rompiĝos,  
kurbas fostoj malnovaj,  
tremas traboj salonaj.  
Tiel hom' mateniĝe  
kantas pri kordoloro.

Similas mi al la harpo  
kiu inerte kuŝas,  
kordomanka kaj vaka,  
pasis for la ludanto,  
kovras ĝin fulgo nigra,  
mankas la homa tuŝo.  
Tiel hom' mateniĝe  
kantas pri kordoloro.

*(Baldur Ragnarsson, La Tradukisto 25, 1997).*

**Einar Sigurðsson:**

## Poemo pri staltrogo de Kristo

Nokton benis milda bel',  
prilumis teron dia stel',  
suferas homoj en malhel'  
sen kon' de amo Lia.  
Mi vartas vin per lulokanteto pia.



Betleĥem estis la naskej'  
de l'beb' kiu vundojn flegis plej,  
mesaĝo venis el altej'  
pri Li, savonto nia.  
Mi vartas vin per lulokanteto pia.  
*(Baldur Ragnarsson)*

## **Stefán Ólafsson:**

### **Bela knabin'**

Bela knabin',  
ŝi amis min  
en la Island' malvarma,  
suferas mi  
pro, mia di',  
perdo de l'amo ĉarma.

Nobla knabin'  
lokigis sin  
alie ol mi ŝatis,  
feliĉo for,  
malĝojas kor',  
ĉagren' min forte batis.

Estas al mi  
konflikt', ke ni  
disiĝi triste devas,  
se mortus mi,  
bonfartu vi,  
pri vi mi sola revas.

*(Stefán Sigurðsson; Agorde, 1991.)*

## **Bjarni Gissurarson:**

### **Pri komparo al la suno**

Kio pli bonas ol plena sun'  
ŝvebe pasanta sur alta voj'?'  
Varme ĝi brilas nun,  
por hom' vivoĝoj'.

Kiam ornamas kampojn mondajn  
sankta suno kaj vastojn ondajn,  
vekas teron kaj arbojn frondajn,  
regas alte la plena sun',  
varme ĝi brilas nun.  
Jen rigardojn ĝojrespondajn  
celas hom' al la suna voj'.  
Varme ĝi brilas, por hom' vivoĝoj'.

Sur montoj ĝiaj radioj brulas,  
glacion rompas kaj suben rulas,  
en valoj varme degel-nebulas,  
benas teron la plena sun',  
varme ĝi brilas nun.  
Belajn fruktojn la hom' okulas  
dense kreskajn sur monda voj'.  
Varme ĝi brilas, por hom' vivoĝoj'.

Ludas bestoj, floroj belas,  
folioj verdas, sed ŝipoj velas,  
al kamp' kaj maro viroj celas,  
kaj birdoj kantas en komun',  
varme ĝi brilas nun.  
Aromo tera dismielas,  
homoj ĝuas je ĉiu foj'.  
Varme ĝi brilas, por hom' vivoĝoj'.

Ĝoje malfermas la naturo  
mildajn brakojn en plezuro,  
kiam okule tra lazuro  
radiojn ĵetas la ora sun',  
varme ĝi brilas nun,  
lacon ne konas dum la kuro  
sur la fajranta ĉielvoj'.  
Varme ĝi brilas, por hom' vivoĝoj'.

Baldaŭ palos la bela tero,  
kolor' ĉiela kaj florapero,  
kiam en maron el aero  
ĵetas oron la bona sun';  
varme ĝi brilas nun;  
ĉiaj bestoj en la vespero  
ŝirmejon iras je sama foj'.  
Varme ĝi brilas, por hom' vivoĝoj'.

De l' sankta vorto jen deklaro:

egalas inde en komparo  
bela virin' dum nobla faro  
kaj lumdonanta ora sun';  
varme ĝi brilas nun.  
Pri ŝiaj pur' kaj anima klaro  
raportoj iras tra l' monda voj'.  
Varme ĝi brilas, por hom' vivoĝoj'.

Bela radi' de sankta pio  
brilas sur ŝin en harmonio,  
ŝia moral' kaj virta plio  
lumas daŭre el kora sun',  
varme ĝi brilas nun,  
alta kreo de man' de Dio  
la virtojn amas sur vivovoj'.  
Varme ĝi brilas, por hom' vivoĝoj'.

Amajn donojn en granda kvanto  
ŝi faras milde al bezonanto,  
preĝas arde kaj en konstanto,  
tiu virin' de kora sun';  
varme ĝi brilas nun.  
Riĉ' doniĝas sen ia vanto  
nun kaj jam kaj je ĉiu foj'.  
Varme ĝi brilas, por hom' vivoĝoj'.

Edzon brakumas kun varma amo,  
aromon donas la kora ĉarmo,  
li dormas pace sen arda flamo,  
sen ĉagreno kaj ĉia pun',  
varme ĝi brilas nun,  
feliĉon ĝuas en daŭra samo  
sur tiu geedza rekta voj'.  
Varme ĝi brilas, por hom' vivoĝoj'.

Idojn ŝi nutras kaj servistaron,  
moderon sekvas kaj solidaron,  
kvietigas la vort-amaron,  
sanon vartas el sia sun',  
varme ĝi brilas nun,  
triston mildigas, kaj solvan klaron  
donas al ĉiu mizera foj'.  
Varme ĝi brilas, por hom' vivoĝoj'.

Ŝia lumo, je l' tagofino,  
ne malkreskas je ilumino,

ĉio puras sen halucino  
sur ŝia viv-vojo de labor’;  
brilas sun’ en la kor’,  
estas feliĉaj vir’ kaj ino  
sidantaj apud tiu voj’.  
Varme ĝi brilas, por hom’ vivoĝoj’.

Tia virin’ malhavas oron  
materian, sed veran gloron  
de virtoj dignaj kaj puran koron  
posedas, kaj tial jam kaj nun  
indas kompar’ al sun’.  
Fermas mi kanton kaj adoron  
pri suno kaj ŝia suna voj’.  
Varme ĝi brilas, por hom’ vivoĝoj’.  
*(Baldur Ragnarsson, La Tradukisto 25, 1997.)*

## **Hallgrímur Pétursson:**

### **El la Pasiona psalmaro**

#### **El la 27-a psalmo**

9 Jesu’, vi estas reĝ’ en ver’,  
glorreĝ’ eterna de la ter’,  
reĝ’ de l’anĝeloj, reĝ’ al ni,  
majesta, ĉiopova Di’.

13 Jesu’, mi reĝo nomas vin,  
vi ree sklavo nomu min,  
ne ŝajnas ŝtata rang’ al mi  
komparebla al tio ĉi.

*(Stefán Jónsson)*

#### **El la 35-a psalmo**

9 La lingvon mian vi, Jesu’,  
mi petas lasu flori,  
kaj senerare pli kaj plu  
la krucan vorton glori,  
por vi honor’ per tuta kor’  
mi petas vin nin beni,  
dum grac’ de di’ lasas al ni

landon kaj vivon teni.

*(Stefán Sigurðsson, Agorde, 1991.)*

## **El la 44-a psalmo**

19 Estu vi, Dio, patr' de mi  
je nom' de Krist' savanto,  
gvidu min ĉie man' de vi,  
ke estu mi ne pekanto.

22 Vian la lastan vorton mi,  
Jesu', en kor' mi tenos,  
preĝ' mia lasta estu ĝi  
je morto min ĝi benos.

*(Stefán Sigurðsson; Agorde, 1991.)*

## **La 48-a psalmo**

### **Pri la flankvundo de Jesuo**

„Vespere iris al Pilato  
la Judoj, kiuj petis lin,  
ke la korpoj en morta stato  
sur la krucoj ne trovu sin,  
ĉar proksimiĝis la sabato.“  
Tiel la Skrib' instruas nin.

„La soldatoj obeeme  
rompis la kruojn de la du  
kiuj rapidmortis ĝeme,  
sed la membrojn de Jesu'  
ili ne tuŝis petoleme,  
tial ke li ne vivis plu.

Unu soldato tre kruela  
pikis la flankon de Jesu'  
per lanco ĝis la koro hela;  
elvenis tial granda flu'  
de sang' kaj akvo – pri la bela  
profetaĵo ne dube plu.“

Pri morta infanaro sia  
zorgas Dio – sola li;  
kvankam putriĝas karno mia,  
tamen konsoliĝas mi;  
ne plaĉas al l'amego dia,

ke disrompiĝu ost' al ni.

Kreis bona Dio mia  
pravirinon antaŭ ni  
el la flanko de la pia  
Adamo, dum dormegis li;  
sed post ekvekiĝo lia  
doniĝis bela nom' al ŝi.

Post l'ekdormo flankvundita  
Jesuo Kristo zorgas pri  
la kristanaro, konstruita  
el sang' kaj akvo de mem li;  
sed post la ĉielir' benita  
pli belan nomon havis ĝi.

Lernu, kiel la bapton puran  
kompreni ĝuste devas vi:  
Ni vidas korpe l'akvon nuran  
sed per la kredo vidas ni  
krome la sangon dinaturan  
de l'fil' de Dio – ĝojas mi.

Tomaso, apostolo via,  
feliĉa estis, fil' de Di',  
ĉar per propra mano sia  
flankvundon vian palpis li.  
Estu permesata tia  
vidaĵo al malsana mi.

Ĉiu vejn' de Kristo mia  
dum la sufer' malfermis sin;  
la sang' el lia korpo dia  
fluegis ĝis la krucofin'.  
Per elaĉeto bona sia  
la fil' de Dio savis min.

Ne fermis la Sinjor' la dian  
korvejnaron – glor' al li,  
por ke veran amon lian  
ekvidu kaj konfesu mi.  
Jen, tial kompategon sian  
Jesuo donas, hom', al vi.

La bestoj tra l'flankpord' eniris  
en l'arkeon de l'homar',

por ke ili – Dio diris –  
saviĝu sur la vasta mar’.  
Tiel sendanĝere spiris  
ĉio malgraŭ la ondar’.

La vivpordon de flanko sia  
malfermadas Krist’ al ni,  
por ke pri senhelpa mia  
animo bone zorgu li;  
se restados mi en tia  
estej’, neniam mortos mi.

Tra fenestro Noa vidis  
la ĉielon super ni,  
dum li tre malĝoja sidis  
pro l’ diluvo, sed post ĝi  
pro l’ sunlumobril’, li fidis  
al la konsolanta Di’.

La ĉielon, tra l’ dikoro  
de Jesuo, vidas mi;  
l’ amobrilon de l’ Sinjoro  
mi do ekscias; kaŭzas ĝi,  
ke la granda kordoloro  
malaperas for de ni.

Al Moseo rokfrapanta  
aperis pov’ de l’ dikompat’,  
pro l’ akvo freŝa elfluanta  
pliboniĝis do la stat’  
de ĉiu laca, soifanta  
malsana hom’ de l’ juda ŝtat’.

Kiam la koron de filo sia  
tre kolere frapis Di’,  
elfluis freŝa fonto dia  
tra tuta mondo tiu ĉi;  
apud hela puto tia  
benon kaj forton havas mi.

Soifanta, ĉe puto tia  
vere refreŝiĝos mi;  
en tiu ĉi kaŝejo dia  
mi ne timos – dank’ al Di’.  
Min feliĉigas kredo mia,  
la vundojn de Kristo palpas ĝi.

Mia kor', Sinjoro mia!  
malpurega faris sin;  
lavu ĝin per sango via,  
mi humile petas vin.  
Ho, vi kompatego dia,  
mizeregan savu min.

Miaj korovejnoj piaj  
amu, laŭdu, gloru vin,  
sed korosang' kaj vundoj viaj  
savu, ravu, benu min.  
Am' eterna! koroj niaj  
vin dankegu ĝis la fin'.  
*(Stefán Jónsson)*

## Pri la necerta tempo de la morto

1 Kreskas el kampa grundo  
ĉio kvazaŭ la flor',  
bela en virg fekundo  
je frumatena hor',  
dum momenteto pasas  
oni ĝin falĉas for,  
foliojn velkajn lasas,  
jen homa viv' kaj glor'.  
*(Baldvin B. Skafthell)*

## Pri la necerta tempo de la morto

Ho, kiel vegetaĵo –  
kreskanta kun odor'  
el verda ebenaĵo  
je frua matenhor' –  
subite senflorigas,  
se ĝin detranĉas vi,  
tiele estingiĝas  
la viv' de ĉiuj ni.

Jen, tiel l' infanaro  
kuradas al mortdom'  
kun lerta junularo  
kaj maljunega hom'.  
Certigas hom' neniu  
pri vivotempoprokrast',



sed submetigas ĉiu  
al l'agoniogast'.

La mort' similas certe,  
laŭ mia opini',  
al herbfalĉisto, lerte  
falĉanta ĉion ĉi:  
kreskaĵon kaj herbaron  
kun juna belflorar',  
li faras belrozon  
egala kun junkar'.

La homa viv' kuradas  
senhalte al la mort',  
la korpon do kaŝadas  
la tomb' – kruela sort'.  
Kondukas vojo ĉia  
al sama punkt', ho ve,  
al punkt' mi venos tia  
ĉu volas mi aŭ ne.

Nek estas haltigebla  
la morto per kutim'  
aŭ pov', nek aĉetebla  
momenta tempolim'.  
La mort' ne zorgas iam  
pri plaĉ' aŭ malplaĉeg',  
mildiĝas ĝi neniam  
je pet' aŭ kolereg'.

Malĝuste oni ĉiam  
eraras pri la sort',  
de kie, kiel, kiam  
alvenas nia mort'.  
Per unu voj' ni venas  
en mondon tiun ĉi,  
sed diversvoje prenas  
la morto nin al si.

La mort' perforte ĉie  
militas inter ni;  
ĉu estas lok' do kie  
nur min indulgos ĝi?  
Ho, l'Adamem' restadas  
en mia karnnatur',  
mi tial meritadas

fariĝi polvo nur.

La vivo nek haviĝis  
per rab' nek per kutim',  
nur prunte unuiĝis  
kun mia korp' l'anim'.  
La sian povas Dio  
postuli tuj de mi  
laŭ sia vol'. – Pro tio  
la morton sendas li.

Nu, tiel devigita  
en via nomo, Di'! –  
Al hom' en ter' kaŝita  
min ne komparas mi.  
L'alvoko kiam sonas,  
neniu savos sin;  
eĉ se la nokto tronas,  
ĝi ne timigos min.

Mi scias: vivas mia  
Savanto apud Di',  
regante ĉion dia  
Jesuo estas li.  
Sur kruco ja mortiĝis  
li mem, venkant' de l' mort',  
l'eterna viv' doniĝis  
al mi per lia fort'.

Per sia mort' la morton  
detruis tute li  
kaj venkis mortoforton –  
difektos min neni'.  
Dum mia korp' restadas  
malviva en la ter'  
en la ĉiel' festadas  
l'animo sen mizer'.

Interne kaj ekstere,  
dum tag' kaj nokto mi  
Jesuo amas vere  
kaj donas min al li.  
Min helpas forto lia,  
li vivplenigas min,  
per li dolĉiĝas mia  
morthor'. – Mi fidas lin.

Jesuo, mi vivadas  
kaj mortas en vi mem;  
eĉ se mi malsanadas,  
mi mortos sen timem'.  
Potenca mort', mi iras  
al vi sen tim' en kor'.  
En fid' al Krist' mi diras:  
Bonvenu via hor'.

*(Stefán Jónsson)*

## **Jón Vídalín:**

### **El Libro de predikoj**

#### **El Kristnaska prediko**

Mi ne volas preparoli la kruelajn minacon, kiuj sekvas kun la leĝo: „Se vi ne aŭskultos la voĉon de la Eternulo, via Dio,” diras Moseo, „tiam venos sur vin ĉiuj ĉi tiuj malbenoj kaj atingos vin. Malbenita vi estos en la urbo kaj malbenita sur la kampo. Malbenita estos via korbo kaj via pastujo. Malbenita estos la frukto de via ventro kaj la frukto de via tero kaj de viaj ŝafoj. Malbenita vi estos ĉe via venado kaj malbenita ĉe via elirado” kun alio plua kaj ĉiuj malfeliĉoj, kiujn malobeo al la leĝo ŝutas sur pekemajn homojn kaj kiujn nombri estas terure. Ho, kiel tio estas malsimila al li, kiu diris: „Venu al mi ĉiuj, kiuj estas laborantaj kaj ŝarĝitaj, kaj mi vin ripozigos.” Li akceptis impostistojn kaj pekulojn, manĝis kaj trinkis kun ili por akiri ilin por regno de Dio, suferis pro ili riproĉojn kaj kulpigojn de malbonuloj, li, kiu diris al la publike pekinta adultulino: „Se neniu kondamnis vin, ankaŭ mi ne vin kondamnas, iru, kaj de nun ne plu peku.” Kaj tiel ni devas rekoni kiel veron, ke la gracema Dio ne tro profetis pri sia solenaskita Filo: „Jen estas mia servanto, kiun mi apogas, mia elektito, kiun favoras mia animo. Mi metis mian spiriton sur lin; li disportos justecon al la nacioj. Li ne krios nek bruos kaj ne aŭdigos sur la stratoj sian voĉon. Kanon rompetitan li ne rompos, kaj meĉon senfajriĝantan li ne estingos. Laŭ la vero li faros juĝon. Li estos ne kverelema nek timiga, tiel ke li komencos sur la tero la juĝon, kaj lian instruon atendas la insuloj.”

Kiam vi nun komparas la unu kun la alia, miaj fratoj, kaj se vi sentas vin en io peka kontraŭ Dio, tiam estas kredeble, ke vi sentas en via koro, kiom ĝojiga estas la

naskiĝo de Jesuo. Al Judoj tiu ĉi evangelio estis unue prezentata, kio estis atendinda, por ke la profetaĵo plenumiĝu. Pri tio parolas Sankta Paŭlo kaj Barnabas, kiam ili diris al ili: „Estis necese paroli al vi unue la vorton de Dio,” sed ni aliaj poste ĝuis ĝin. Tial Jesaja profetas pri Jerusalemo tiele: „Mallumo kovros la teron, kaj krepusko la popolojn, sed super vi brilos la Eternulo, kaj lia majesto aperos super vi, kaj popoloj iros al via lumo.” Tion priskribas la anĝelo en sia parolo kun la paŝtistoj, kiam li diras: „Mi venigas al vi bonan sciigon de granda ĝojo, kio estos al la tuta popolo.” „Ĉi tie ne estas Judo nek Greko nek Skito, ne estas sklavo nek liberulo, ĉar vi ĉiuj estas unu en Kristo Jesuo.” „Lian instruon atendas la insuloj,” diras Jesaja. Tio estas paganoj, ĉar tiel la skribo ofte kutimas ilin nomi, kaj tion ni povas al ni preni nome kaj vere, ni, kiuj loĝas en tiu ĉi insuleto. Fakte la eterna prizorgo de Dio nin metis ĉe la ekstrema rando de la mondo, – eble ankaŭ al multaj ŝajnas, ke ni ne riĉevas la ĝustan parton de multaj bonaĵoj de la mondo, sed aliflanke ni ne spertas diversajn malavantaĝojn kaj mizerojn, kiuj aliloke en la mondo turmentas pekemajn homojn, kaj tial estas nia devo konfesi, ke Dio montris al ni favoron, se ni komprenus ĝin utiligi, – sed kiel ajn tio ĉi estas, li ne trompis nin je distribuo de la spiritaj aferoj, kio estas plej grave.

*(Ólafur Þ. Kristjánsson, Voĉo de Islando, I, 4.)*

## **El prediko por la dimanĉo inter la Novjartago kaj la Epifano**

Sed tiu, kiu estas kolera, li estas freneza. Kaj tial diras Horacio, ke ĝi estas iaspeca mallonga furiozo, signifante en tio, ke neniu diferenco estas inter tiu, kiu estas kolera, kaj la alia, kiu estas freneza, escepte de ke la kolero daŭras malpli longe, la furiozo pli longe, kaj tamen ekzistas ekzemploj de tio, ke iuj restis tiel longe koleraj, ke ili neniam fariĝis plenraciaj denove. La kolero estas satana fulmobato (Genezo 4, pri Kain). Ĝi kripligas ĉiujn la membrojn kaj artikojn de la homo, ĝi ekflamigas fajron en la okuloj, ĝi kaŭzas sangfluadon en la naztruo, inflamon en la vangoj, impeton kaj senbridecon en la lango, surdecon ĉe la oreloj. Ĝi farigas la homon grinci per la dentoj, flugigi la manojn, impeti per la piedoj. Ĝi ŝancelas kaj skuas la tutan korpon, kaj deformas ĝin, kvazaŭ kiam la maro estas malkvietigita de ventego. Kaj unuvorte dirite: Ĝi farigas el la homo monstron kaj enkarniĝitan diablon en la okuloj de tiuj, kiuj estas mense sanaj. Kaj se ĝi tiel kripligas la vizaĝon de la homo vidatan de aliaj homoj, kiel

ĝi tiam kripligas la animon vidatan de Dio? Informu min, kia diablo loĝas en tie, kie la aspekto de la homo fariĝas tiel deformita, kia fajro devas esti en tiu koro, kie li etendas sin tiamaniere en ĉiun artikon kaj membron. . .

Mi kelkfoje aŭdis la interparolon de tiuj, kiuj opinias, ke ili devas koleriĝi kaj imponigi sin al aliaj, por ne estiĝi abomenitaj, kaj ke ĉiu ajn altrudas al tiu, kiu havas neniun temperamenton, tial montras eminentecon kaj altrangecon se oni multe koleras, tiel ke tiuj cedas, kiuj onin kontraŭstaras. Tio ne ĉiam efektiviĝas en bona maniero, ĉar aŭ mi koleras kontraŭ mia superfortulo, aŭ kontraŭ mia egalulo, aŭ kontraŭ homo malpli forta ol mi. Se mi koleras pri tiu, kiu estas pli forta ol mi, tiam mi estas aŭdaca kaj surŝultrigas trabegon, ĉar tiel diras Sirako: Ne kverelu kun tiu, kiu estas via plipotenculo. Se li estas mia egalulo, do oni sciu, ke neniuj estas tia stultulo, ke li ne havas sian egalulon, kaj kiam oni batas per du ŝtonoj unu kontraŭ la alia, tiam estas malfacile antaŭvidi kiu el la du pli frue disrompiĝos. Se li estas malpli forta ol mi, tiakaze mi faras maljustaĵon al mi mem, se mi malbonigas min pro iu, al kiu mi ĉiam povas egaligi min senkolere, kaj se tio kaŭzas al mi ion penon, do mi pensu se mi estas kuraĝema, ke estas bagatele versi sian koleron super tiu, kiu ne potencas kontraŭstari, kaj tial mi opinias tion kiel pli feliĉiĝan kaj donantan pli bonan konsciencon, ke oni sekvu la konsilojn de Salomono (Sentencoj 25) kaj la apostolo Paŭlo (Rom. 12) kaj kolektu fajrajn karbojn sur la kapon de sia malamiko per bonfaroj, tiel ke li hontas kaj ruĝiĝas pro tio, ke li kondutis malbone...

La kolero certe estas nomita mallonga furiozo, sed tia ĝi ne estas ĉe ĉiuj. Ĉe pluraj ĝi ŝanĝiĝas en malamono, kaj neniuj malamas alian, kiu ne antaŭe koleras kontraŭ li. Al malmultaj, kiuj koleriĝas, ŝajnas ke ilia kolero estas maljusta, kaj tiamaniere ĝi fariĝas malamo en la koro de la homo, kaj fermentiĝas en tie, ĝis kiam ĝi difektigas la ujon, kaj tiam oni malbontraktas la templon de Dio (II. Kor. 6), farante el ĝi tian loĝejon de diabloj, ke Satano reĝas en tie kun sep spiritoj pli malbonaj ol li mem (Luk. 11), ĉar la kolero neniam estas sola. Envio, aroganteco, kalumnio, mensogado, misfamigo, gloramo, kverelemo, malkonsento kaj multaj aliaj kanajlaĵoj ofte sekvas ĝin.

*(Eysteinn Sigurðsson)*

## La historio pri Finna la antaŭvida

### Popolrakonto el la 17-a jarcento

Viro nomiĝis Prándur, li estis leĝisto. Lia edzino estis mortita kiam tiu historio okazis. Li estis maljuna homo kaj granda saĝulo. Li havis du infanojn, filon nomitan Sigurður kaj filinon nomitan Finna. Ŝi estis tre saĝa virino, kaj la onidiro estis ke ŝi scias pli ol la homoj diris al ŝi.

Iufoje, kiam ŝia patro rajdis al jurkunsido, ŝi diris:

– Mi suspektas, patro, ke en tiu vojaĝo iu svatos min, sed mi petas vin ke vi ne donos min kiel edzinon al iu ajn, escepte ke se via vivo dependos je tio.

Li promesis tion kaj forrajdis al la kunsido. Tie multaj nobluloj svatis Finna, sed li rifuzis al ĉiuj. Post la kunsido Prándur la leĝisto rerajdis survojen hejmen, kaj unu vesperon, kiam li rajdis sola antaŭ ĉiuj siaj servantoj, venis al li viro per batalanta aspekto. Li eldorsigis sin de la ĉevalo kaj prenis la bridrimenojn de la ĉevalo de Prándur kaj diris:

– Saluton, Prándur leĝisto!

Prándur respondis al lia saluto kaj demandis pri lia nomo. Li diris, ke li nomiĝas Geir, kaj ke li volas svati Finna la filinon de Prándur. Prándur diris:

– Mi ne donos ŝin al vi, ŝi decidis mem pri siaj aferoj.

Je tio Geir elingis glavon kaj metis ĝin antaŭ la brusto de Prándur kaj petis lin elekti unu el la du, doni al li la virinon aŭ esti tuj mortigata. Prándur ne vidis alian eliron ol promesi al li la virinon, kaj ili decidis ke li venos post duonmonato por edzinigi ŝin. Post tio Prándur rajdis hejmen, sed Geir iris sian vojon.

Kiam Prándur venis hejmen Finna staris ekstere kaj salutis sian patron kaj diris:

– Ĉu estas kiel mi antaŭsentas ke vi donis min al unu viro?

Li diris ke jes, kaj ke lia vivo estis dependinta je tio. Ŝi diris, ke tiel devige fariĝos, kvankam ŝi antaŭsentas ke tio ne portos al ŝi multe da ĝojo.

Je la decidita tempo Geir venis por haviĝi la virinon; li estis bone akceptata. Li diris ke li ne longe povas atendi, petis Finna haste pretigi sin, ĉar venontmatene li volas foriri. Ŝi faris tion, kaj forigis neniun homon kun si de sia patro krom sian fraton Sigurður.

Ili adiaŭis Þrándur kaj rajdis sian vojon tri kune, ĝis ili atingis al unu paŝtejo kie nenio estis krom bovoj. Finna demandis Geir kiu posedas tion. Li diris ke neniu havas krom li kaj ŝi.

La duan tagon ili venis al alia paŝtejo kie estis nur senida brutaro. Finna demandis Geir kiu posedas tion. Li diris ke neniu havas krom li kaj ŝi.

La trian tagon ili venis al la tria paŝtejo; en ĝi estis nur ĉevaloj. Finna demandis Geir kiu posedas tion. Li diris ke neniu havas krom li kaj ŝi. Poste ili rajdis la tutan tagon.

En la vespero ili venis al granda bieno; tie Geir eldorsigis sin de la ĉevalo kaj diris ke tio estas sia loĝejo. Finna estis bone akceptata, kaj ŝi tuj transprenis tie la dommastrumadon. Geir nur malmulte atentis pri ŝi, sed ŝi ne disturbiĝis pro tio. Sigurður, la frato de Finna, estis ankaŭ bone prizorgata tie.

En la Kristnaska antaŭvespero Finna volis igi lavitan la kapon de Geir; oni serĉis lin sed li nenie troviĝis. Finna demandis la vartistinon de Geir, kiu loĝis tie, ĉu tio estas lia kutimo. Ŝi diris ke dum longa tempo li neniam restis hejme dum Kristnasko, kaj ploregis pro tio. Finna petis ke oni ne serĉu lin; diris ke li revenos hejmen laŭ propra decido. Ŝi okazigis festenon laŭkutime kaj tute ne disturbiĝis pro la foresto de Geir.

Post la festeno, kiam la homoj jam dormis, Finna ekstaris kaj eliris kun Sigurður sia frato. Ili iris al la marbordo kaj surmarigis boaton kaj remis al unu insulo kiu estis ne malproksime. Finna petis Sigurður gardi la boaton dum ŝi surbordiĝos. Li faris laŭ ŝia peto.

Tiam Finna iris enlanden ĝis ŝi venis al malgranda domo, kvankam bone konstruita. La pordo estis duone malfermita. Estis lumo en la domo. Tie estis lito, bone aranĝita. Tie ŝi vidis Geir, sian edzon, kuŝante en la lito, brakumante virinon. Ŝi sidigis sin sur la planko, ĉe la lito, kaj eldiris strofon. Post tio ŝi eliris, renkontis sian fraton kaj petis lin remi allanden kaj rakonti al neniu kie ili estis. Li promesis tion. Ili tiam remis hejmen kaj kondukis kiel nenio okazis.

Post la Kristnaska festo Finna ekstaris frumatene kaj iris al la ĉambro, en kiu ŝi kaj Geir dormis kiam li estis hejme. Tiam Geir estis tie kaj iris tien kaj reen. Kuŝis infano tie en la lito. Geir demandis al Finna kiu posedas tiun infanon. Ŝi diris ke neniu havas krom ŝi kaj li. Ŝi prenis la infanon kaj portis ĝin al la vartistino de Geir por

prizorgado. Nun pasis tiu jaro sen okazantaĵoj.

La duan Kristnaskon ĉio okazis laŭ la sama maniero kiel la unuan, escepte ke tiam Finna sidigis sin sur la levigo ĉe la lito kaj eldiris unu strofon.

La trian Kristnaskon estis ankaŭ preparata festeno, kaj Geir estis serĉata kaj ne trovata. Finna petis ke oni lin ne serĉu. Post la festeno, kiam ĉiuj jam iris en siajn litojn, Sigurður kaj Finna remis al la insulo en kio ili antaŭe estis.

Je tiu fojo Sigurður petis Finna ke ŝi lasu lin surbordiĝi. Ŝi permesis tion al li, sed petis ke li ne elbuŝigu unu vorton. Ili iris al la domo. Tie Finna petis Sigurður atendi sin dum ŝi eniros. Li faris tion. Finna eniris, sidigis sin sur la litrandon kaj eldiris tiun strofon:

Sur tiu lito mi sidas,  
ĝojon ne plu mi vidas,  
bonulo en eraran vojon  
mian kondukis ĝojon,  
alia akiris l'amaton,  
ond' foje frapas boaton.

Geir tiam levigis sin el la lito kaj diris:

– Tiel ne plu estos.

Sed la virino, kiu kuŝis ĉe li en la lito, svenis je tio. Finna prenis vinon kaj gutumis ŝiajn lipojn; ŝi tiam rekonsciiĝis kaj estis belega virino. Tiam Geir diris al Finna:

– Nun vi liberigis min el granda malfacilaĵo, ĉar tiu estas la lasta jaro en kio eblas min malligi. Mia patro estis reĝo kaj regis Rusujon. Post la morto de mia patrino li edziĝis denove, al iu nekonata virino. Post ilia mallongedaŭra kunesto ŝi mortigis mian patron per veneno. Sed kiam mi kaj tiu mia fratino, kiu nomiĝas Ingibjörg, ne volis konduki laŭ ŝiaj konsiloj, ŝi sorĉis al mi ke mi havos tri infanojn kun mia fratino, kaj se mi ne haviĝos tiun edzinon, kiu scios pri tio kaj tamen prisilentos ĝin, tiam mi fariĝos vermo kaj mia fratino fariĝos nedresita junĉevalo kaj iros paŝtejen kun la ĉevalaro; kaj nun vi elligis min el tiu sorĉo, kaj nun mi volas edzinigi tiun mian fratinnon Ingibjörg al Sigurður via frato. Kun ŝi mi volas doni al li la tutan regnon kiun mia patro antaŭe havis.

Nun ili ĉiuj reiris alborden kaj al la bieno de Geir. Tie ili ekis novan festenon, kaj sendis venigi Þrándur, la patron de Finna, kaj trinkis fianĉan toston por Sigurður kaj



Ingibjörg. Post tio li iris al Rusujo kaj subigis ĝin al sia regado. Kaj oni prenis la duonpatrinon de Geir kaj ligis ŝin inter du ĉevaloj, kaj forŝiris ambaŭ sian duonon el ŝi. Sigurður kaj Ingibjörg regis Rusujon dum longa tempo, sed Geir fariĝis leĝisto post Prándur. Ili ĝuis infanojn kaj bonaĵojn.

*(Eysteinn Sigurðsson)*

## **Björn Halldórsson:**

### **Printempo**

Sin ornamas la printemp’  
ĉar vintro estas for,  
en arbo sidas gaja bird’,  
sur kampo bela flor’.

*(Baldvin B. Skaffell)*

## **Eggert Ólafsson:**

### **Saluto al Islando**

Lando promontora,  
nun mi nomas vin,  
kiu ĉe la koro  
karese portis min,  
laŭ aranĝ’ de alta Di’,  
fartu bone, benu vin  
bona nom’ de li.

*(Baldvin B. Skaffell)*

### **Sub sunplena bluĉielo**

Sub sunplena bluĉielo  
en hejmvial’ de milda belo  
koka kri’ sen paralelo  
korojn levis sur bien’,  
kantis pompe la kok’ sen pen’.  
Kaj sindone por orelo  
pliaj triloj pluis,  
la poeto dumlonge tion ĝuis.

*(Baldur Ragnarsson)*

## **Sveinbjörn Egilsson:**

### **„Vita varia“**

Roseroj oraj de mateno  
ne ĉiam brilas sur la flor',  
la birdmuzikon kaptas spleno  
kaj mondrideto mortas for.

Dio leĝis por la Ter':

Miksi mildon  
kun malmildo,  
bonas tiu ĉi afer'.

La neĝoblov' de glacipinto  
ne ĉiam taŭzas al herbar',  
nek fajfas ĉiam frosta vento  
al trema ter' kaj muĝa mar'.

Dio leĝis por la Ter':

Miksi mildon  
kun malmildo,  
bonas tiu ĉi afer'.

Leviĝas brov' dum helas tago  
kaj ĝoj' radias sur la vang',  
mallevas sin dum mensa plago  
kaj sunon kovras trista strang'.

Ĉesas baldaŭ la sufer',

malaperas  
ros' de tero,  
ĝis malseka la vesper'.

Se vi, frateto, ne ektimas  
dum barkon frapas onda rul',  
atende post la vent' proksimas  
kvieto dolĉa por bravul'.

Sed sin movas sub kviet'

malrapide  
ond' perfida,  
al gardo servu via pret'.

*(Baldur Ragnarsson, Norda Prismo, 3, 1956.)*

## Strofo

Flirtas blanka papili'  
ekster fenestreto,  
tie velas pli kaj pli  
sur la fjord' ŝipeto.

*(Baldur Ragnarsson)*

## Björn Gunnlaugsson:

### Pri la vivo

Ol ĉio Viv' valoras pli,  
altigas ĝi la eston;  
la lumon ja ornamas ĝi,  
mem kudras sian veston.

La viv', de Di' la ĉefa verk',  
ne detruig'as kerne;  
pli forta estas ĝi ol ĉerk'  
kaj daŭras ja eterne.

Amasoj ĉu naskiĝas kaj  
ĝojetas sur la tero  
por neniigi en malgaj'  
kvazaŭ aertubero?

Se al l'anim' ne donos Di'  
post mort' eternan daŭron,  
nur unutaga suno ĝi  
meritus ja bedaŭron.

Tre multajn jam en juna aĝ'  
la mort' el vivo tiras;  
sed perfektecon Dia Saĝ'  
de Sia verk' deziras.

Kreaĵo ĉiu estus nur  
ornam' sen intereso,  
se estus mort' en la natur'  
la fino kaj forgeso.

La vivo estus sen util'  
kaj la progres' neebla,

kiel en song' vizioj mil  
aŭ skribo nelegebla.

Ĉu l'mondojn tial kreis Di'  
kaj la sennombrajn terojn,  
se nur intencis fari Li  
sendaŭrajn viv-tuberojn?

Se l'vivon la plej digna man'  
al perfektec' ne gvidus,  
saĝecon serĉus ni en van',  
malsaĝon nur ni vidus.

Sed kvankam la hommensa ret'  
ĉe l' morto malfortiĝas,  
kvazaŭ kaŝita fajreret'  
ĝi poste revigliĝas.

*(Arni Böðvarsson kaj F.V.Lorenz)*

## **Jón Porláksson:**

### **Memore al pasero (Pri kanario mortinta pro maljunaĝo)**

Estas silent' en kanta ejo,  
amuza ulo estas for.  
Jen dorlotat' de mi en plejo  
estas nun kun senmova kor'.  
Se mi vivigi povus vin,  
tio en ver' ĝojigus min.

Loĝas en Roskild gento via,  
de tiu lok' devenis vi.  
En Kopenhag', urbego tia,  
rigardis vin la Alt-Soci'.  
Per birdokuloj sen vizi'  
ĝian imponon vidis vi.

Nornoj malice ne atendis,  
forigis vin el Kopenhag'.  
Maljunan vin ĉi tien sendis,  
hontiga estis tia ag'.  
En Island' estis via sort'  
homojn amuzi, poste mort'.

Antaŭe al Island' sendita  
vi senekzempla bontrezor'.  
La korpo pugne enkaŝita  
laŭtvoĉon tenis de valor'.  
Ornama via plumoar'  
kolororiĉis sen kompar'.

Natur' vin bele laŭtkantigis,  
fariĝis vi natura gem',  
vin nun naturo senvivigis,  
instruis vin naturo mem,  
vin la natur' kulturis pli,  
majstrverk' natura estis vi.

Ludis natur' poemojn bele  
per la belsona voĉokord',  
matenruĝ' kiam brilis hele,  
ĝojplene trilis vi laŭ ord',  
ĉar vintro frida estis for,  
ĝojiĝis ĉiu besta kor'.

Kial la morto tiel agas:  
forigi vin de vid' de ni?  
Birdaĉojn, kiuj forte plagas,  
prefere pereigu ĝi.  
Vi plezurigis pli en ver'  
ol ĉiuj korvoj sur la ter'.

Edziĝis ne vi en lando nia,  
tio okazi povis ne,  
ĉar se ekzistus filo via,  
kiu al vi similus tre,  
mi ne bezonus ĝeni min,  
konstante priplorante vin.

Mankas al mi plezuro tia,  
(la temp' al mi tiriĝas plu),  
kiam printempe en lito mia  
vekiĝas mi pro aĉa bru',  
jen sonas korva laŭta kri'  
kaj hundoj ilin pelbojas. Fi!

*(Stefán Sigurðsson; Agorde, 1991.)*

## Sigurður Breiðfjörð:

### Gronlandaj strofoj

Se Gronlandon venos vi,  
donu mi ekkonojn  
pri inoj, kiuj loke ĉi  
portas pantalonojn.

Ili harojn per lertec'  
alten volvas pinte.  
Kape belas in' laŭ dec'  
tiel aranĝinte.

Harvolvaĵon la edzin'  
ligas blurubande.  
Amindumu vi ne ŝin  
ne koketu dande.

Idnaskinte la fraŭlin'  
jam sen edzon havi,  
verdornamas harojn in'.  
Vin ŝi povus ravi.

Pale-ruĝe la vidvin'  
harojn ligas vere,  
turnas jam trankvile sin  
de la pomp' surtere.

Virgulin' sangruĝa per  
bendo harojn ligas.  
Tamen tio – estas ver' –  
ofte ja intrigas.

*(Stefán Sigurðsson; Agorde, 1991.)*

### Strofoj

Pri l' postmorta viv' kaj sort'  
pastroj donas scion.  
Ĉu ne miros post la mort'  
ili sperte tion?

Ĉu ne do humile ni,  
de ili prelegarojn

tralegante, tie ĉi  
montrus plumerarojn?

-----

Sunon klare sur ĉielo  
supre karan vidas mi.  
El la mara banobelo  
brilajn harojn kombas ŝi.  
*(Stefán Sigurðsson; Agorde, 1991.)*

## **Bjarni Thorarensen:**

### **Pralando de glaci'**

Pralando de glaci',  
patrujo kara, vi  
montbelulin',  
dum zonos teron mar',  
dum enamiĝos par',  
sun' brilos laŭ montar',  
ni amos vin.  
*(Stefán Jónsson, Voĉo de Islando, I, 1.)*

### **Festena verso**

Ne estas sane loĝi sur  
la mont' malvarma de l'moŝteco;  
nenia estas tie mur'  
kontraŭ la frosto, neĝo, ventmaldeco.

Ĉe l'monta flank' atingis mi  
jam alten, kvankam ne sufiĉe;  
malmilde ventas tie ĉi,  
valanoj sube vivas pli feliĉe.

Ne juĝu malfavore min  
do homoj, sana de moralo,  
ke mi vojaĝas laŭ inklin'  
kaj ludas iom en la ĝoja valo.

Amuzu nin ja kune ni,  
loĝantoj bonaj de la valo,

ĉar nur mallongatempe mi  
ĉi tie ludi povos sen fatalo.

Se iu pensas tie ĉi  
ke estas nia ĝoj' malbono,  
vivanta kaj mortinta li  
moŝtfroste sidu sur la alta ŝtono.

*(Árni Böðvarsson kaj F.V.Lorenz)*

## Belas ja la blua stel'

Belas ja la blua stel',  
ĝi suferigu vidon ne mian,  
ĉar steloj du de plia hel',  
okuloj jen je ĉarma bel'  
de Svava havas ravitecon plian.

*(Stefán Sigurðsson; Agorde, 1991.)*

## La vintro

Kiu rajdas laŭ  
lakta vojo,  
alte ĉiele,  
ĉeval' sur blanka,  
priskuante  
prujnan kolon,  
ĵetante fajron  
for de hufferoj.

Rajdante klimas  
griza kiraso,  
ŝild' de glacio  
ŝultre pendas.  
Vent' blovas frida  
pro fortsvingo glava,  
nordluma fasko  
sur kasko franĝas.

De mezonokta  
li mondo rajdis,  
monda fortputo,  
minaco de lukso –  
luks' kaj Printempo



ne trovas sin bone  
sur montoj magnetaj  
en mondo arkta.

Aĝon li ne sentas  
pli aĝa ol mondo  
al dio samaĝa.  
Vivos li pli longe  
ol iu ajn mondo  
kaj ĝia kadavr' surpasos.

Fort' plifortiĝas  
proksimece al li,  
hardigas li tute  
teron brakume,  
diamantiĝas  
ĝia sango  
kaj verda vilaj'  
vakas mantela.

La grandfortulo  
forte ne agas  
kontraŭ malfortaj  
infanoj de humo.  
Milde dormigas  
do ili ne sentas  
mizermorton  
de maljuneco.

Venas li tuta  
kaj teron premas  
tene ferbrake  
kaj teron kisas.  
Ŝi gravediĝas  
kaj grave elektas  
akuŝpatrinon  
Printemp' nomata.

Vintro (oni diras)  
de Printempo fuĝas,  
li fuĝas tamen ne  
sed foriĝas supren –  
Printemp' rampas suben,  
supre vintra brusto  
volbas elstaranta  
en vasta ĉielo.

Tamen la fama  
ne tiel foriĝas,  
ke li lasu  
la du finojn  
de akso tera  
aŭ forlasas  
ion ajn teran  
ĉeantan al ĉielo.

Tial vidiĝas  
vere somere  
sur montaj pintoj  
pompa belo vintra –  
ankaŭ tial ne  
Printemp' degeligas  
prujnon ĉielan  
sur kap' maljunula.

*(Stefán Sigurðsson, Agorde, 1991.)*

## La vintro

Kiu rajdas en galop'  
laŭ ponto de orbrilo  
trans volbon firmamentan  
sur ĉeval' neĝblanka,  
impete skuanta  
prujnhelajn kolharojn  
kaj fajron ĵetanta  
per ŝtalaj hufumoj.

Brilas kiraso  
de la Batalpreta,  
deŝultre ŝildo  
de glacio pendas.  
Venton malvarman  
glavsvingo blovigas,  
plumfasko nordluma  
ondfluas sur kasko.

Li de l'Noktmonda  
Mezo elrajdis,  
de la Fonto propra  
de Potenc' kaj Minaco –  
neniam Printempo

nek Lukso loĝados  
tie en la Nordo  
de la Montoj Magnetaj.

Ol la Mondo li aĝas  
pli, kaj kun Dio  
samaĝas, tamen junas.  
Transvivos li ĉiujn  
mondojn kaj pasos  
super kadavrojn iliajn.

Lia paŝ' proksimen  
plifortigas la fortajn,  
kaj brakumo Teron  
malmoligas halte,  
en diamanton  
ŝian sangon transformas,  
kaj la mantelverdon  
en grizon kaj nudon.

Tamen la Potenca  
ne la etajn perfortas  
verdajn infanojn  
de patrino Tero.  
Milde li dormigas  
tiel ke la morton  
pro maljuna aĝo  
ili tute ne spertos.

Venas li tuta  
kaj per fortaj ferbrakoj  
Teron ĉirkaŭpremas  
kaj Teron kisas.  
Pro tiuj premagoj  
ŝi fariĝas graveda,  
akuŝon spertas  
kun helpo de Printempo.

Fuĝigas Vintron  
Printempo laŭdire,  
ne fuĝas tamen li  
sed pli supren cedas –.  
Rampas sube  
Printempo, sed Vintro  
etendas bruston  
en la supra vastbluo.

Neniam tamen foras  
la Famulo tiom  
ke lasas li la finojn  
du de l' Mondakso,  
aŭ pri tiuj partoj  
de Tero cedas  
kiuj proksimas  
plej al ĉielo.

Tial en somero  
meza videblas  
ornamo de vintro  
sur ĉapeloj montaj –  
kaj tial en printempo  
ne fordegelas  
prujno sur kapo  
de homoj maljunaj.

*(Baldur Ragnarsson)*

## Oddur Hjaltalín

Neniu riproĉas  
al tiu kuŝanta  
viva sub rokoj  
rompita membre  
kaj ŝirita karne  
per ŝtonaj pintoj,  
ke li ne krias  
laŭ netaj notoj.

Miru neniu,  
se kuriozaj  
kreskas arbedoj  
el ter' kiun fajro  
de korĉagreniĝoj  
sube varmigas  
kaj ardaj larmpluvoj  
akvumas supre.

Tial neniu  
riproĉu al Oddur  
se li per vortoj  
ulojn ofendis.

Tio estis rozoj  
de frosto mortiga,  
ĉagrenoridoj  
kaj floroj senvivaj.

Ĉar ekde junaĝo  
avare sin montris  
al li la favoro  
de l' feliĉo daŭre.  
Mizero lin ĉiam  
dum iroj akompanis,  
sed hejme ĉagrenoj  
atendis plejofte.

Reĝkoron li tenis  
sed rimedojn simplajn,  
helpante mizerajn  
mizerigis sin mem,  
faris klopodojn  
por sanigi multajn,  
malsanis tamen  
mem li sen esper'.

Spiriton li havis  
riĉan –. Kaj bruston  
kiam premegis  
rokoj de misoj,  
ĝi rompe elfuĝis  
kaj rapide kreis  
koboldojn, feojn,  
da miroj abundon.

Ĉagrenojn sufokis  
liajn portempe  
komikaj ĉi tiuj  
figuroj de miroj.  
Ili ofendis  
al uloj, sed Oddur  
palacojn konstruis  
tra ploronuboj.

Nun li silentas,  
sed okuloj rigidaj  
sekvas animon  
al regno eterna.  
Tie ĝi mondon

tian posedas,  
ke iun pli bonan  
malindas konstrui.

Sed vi kiu dorme  
portiĝas suben  
sur vivorivero  
al mortelfluejo,  
neniam mallaŭdu  
la salmon kiu naĝas  
kontraŭ la fluo  
kaj saltas kaskadojn.

*(Baldur Ragnarsson, Norda Prismo, 4, 1964.)*

## **Jónas Hallgrímsson:**

### **Fino de vojaĝo**

Amostelon  
super Rokmonto  
nokta nub' vualas;  
ĝojbrilis antaŭe  
ĝi, sed triste nun  
sopiras knab' en valo.

Scias mi ja, kie  
l'esper' kaj mia mondo  
de Dia fajr' lumiĝas.  
Katenojn de l'menso  
mi rompas, kaj min tutan  
en viajn brakojn ĵetas.

Mergas min kaj vidas  
mi en vian animon,  
vivas vian vivon;  
ĉiun momenton  
je kiu Di' vin amas  
mi trovas en mia koro.

---

Kolektis mi sur monto  
– estis du kune –  
florojn sur deklivo,

plektis mi bukedon  
kaj en vian sinon  
metis dolĉajn donojn.

Sur mian kapon metis  
vi girlandojn aromajn  
de brilaj blufloroj,  
unu post alia,  
kaj ĉion admiris,  
dekaptis ilin tuj.

Ridis ni surmonte,  
ĉiel' sereniĝis  
bela super rokoj;  
feliĉon mi trovis  
nur ĉe tia vivo,  
sen tio plenmanko.

Ploris sur herbejo  
bonaj florfeoj,  
nian disiĝon komprenis;  
roso ni tion imagis,  
kaj malvarmajn gutojn  
ni kisis el krucherbo.

Vin tenis mi ĉevale  
en forta fluo,  
kaj trovis plensente  
ke tiun florburgonon  
mi povus protekti  
dum tuta mia vivo.

Kombis viajn harojn  
mi ĉe Porkrivero,  
zorge kaj intime;  
ridetis florldipoj,  
brilis okulsteloj,  
ruĝiĝis varma vango.

For nun troviĝas  
de via akompano,  
knab' en valprofundo;  
amostelo  
super Rokmonto  
brilas trans la nuboj.

Altajn sferojn  
disigas spaco,  
klingo eĝon kaj randon;  
sed spiritojn, kiuj amas,  
eterneco povas  
neniam disigi.

*(Baldur Ragnarsson)*

## Ho, kiom ĉarmas...

Ho, kiom ĉarmas kuno de kolegoj  
kreanta ĝojon luman de l'esper'  
simile forton de l'printempaj regoj  
vekantan vivon sur feliĉa ter'.  
Dum brilas larmoj vitaj sur pokalo  
kaj en l'animo varmas la nektar',  
plej certas, ke sin trovas la lojalo  
en sentoplana brust' de solidar'.

Ne indas fidi la mondecan gloron  
kaj larmoj falas foje sen atend'  
kaj portas temp' amikojn tuj en foron  
kaj velkas flor' dum unu frosta fend'.  
Evidu tial pompon kaj koleron,  
ne rompu ni lojalon al amik',  
kaj se ni vidas suni sur la teron,  
ni kunsidiĝu tuj por sinĝojig'.

*(Baldur Ragnarsson)*

## Kanto de Islandanoj

Kio pli gaja estas sur la tero  
ol ĝojradia amikara rond'?  
Kiel ekfloras arb' en frusomero,  
fariĝas viva sento de l' ĝojond'.  
Dum brilas larmoj vitaj kvazaŭ oro  
kaj flamon vekas la nektar' en brust',  
ni estu certaj, ke l' plej bela floro  
ekĝermas nur en kor' sen ia krust'.

Ne fidu ni al gaja bru' de l' mondo,  
subite falas roso de la plor',  
amikojn ŝiras temp' el nia rondo,



dum unu frosta nokto velkas flor'.  
Ne montru ni koleron nek fieron,  
kaj ne perfidu kison de l'amik',  
kaj se ni vidas sunan radieron,  
kuniĝu ni en kanto kaj muzik'.

*(Baldvin B. Skaftfell)*

## Am' de patrino

Bruas la monto kaj falas jam neĝ',  
blove kovriĝas altaĵo kaj heĝ'.  
Kuras neĝnuboj sub griza ĉiel',  
jam malaperis pro nokta malhel'  
voj' sur glacio malvarma.

Kiu ploranta jen paŝas sur krust'?'  
vojon ŝi serĉas kaj premas al brust'  
etan infanon, ĝin ŝirmas ĉe mam',  
forto perdiĝas, sed kreskas la am',  
brilas larmar' ŝia ĉarma.

Dormas etulo de mi en trankvil',  
egan mizeron bonŝance solfil'  
jam ne komprenas nek vidas ĝin vi.  
Helpu eterna, vi, filo de di'  
savi senkulpan infanon.

Fil' mia bona vi sonĝu en dorm',  
tion ja emus mi nokta en ŝtorm'.  
Flegas mi vin en terura malhel',  
por ke ne povu vetera kruel'  
preni la vivon nek sanon.

Bruas la mont' kaj pleniĝas etval',  
kreskas noktmeze terura neĝfal'.  
Ŝtorm' de blunigra la neĝnubegar'  
muĝe kuradas trans lando kaj mar',  
ĉio kuraĝon malhardas.

Nokt' terurega jam pasis ĝis fin',  
frosta troviĝas la mortintulin'.  
Kovris kadavron per neĝa vual'  
vintra kompat', sed ĉiela el hal'  
suno la knabon rigardas.

Ĉar li ridete ja vivas ĉe sin'  
sia de amo savinta patrin',  
varme kovrita per vestoj de ŝi,  
kiu lin ŝirmis, sed nun la glaci'  
palan dormantan ŝin kronas.

Brila fajrer' de kompato de di'  
pleje dolĉigas la vivon al ni  
am' de patrin', vi protekto de l'id'  
benu vin ĉiam en via solid'  
di', kiu frukton ja donas.

*(Stefán Sigurðsson; Agorde, 1991.)*

## Saluto el fremdlando

Afable blovas nun la suda vento,  
surmare levas sin ondeta bando  
kaj iras al la bela Glacilando,  
al bord' de mia hejm, al mia gento.

Al ĉiuj hejme, kun sincera sento,  
kaj al la fiŝkaptistaj boatetoj  
salutojn sendas mi per vi, ondetoj;  
ventet', belvangojn kisu, en silento.

Profet' printempa, ci birdet' fidela,  
fluganta alte tra l'lumpanoramo,  
en somerval' por kanti preta jam:

Se ci knabinon de belec' anĝela  
ekvidos, kun kufet' kaj ruĝornamo,  
salutu ŝin: Ŝi estas mia am'.

*(Árni Böðvarsson kaj F.V. Lorenz)*

## El epitafo

Kio estas viv' mallonga?  
Estas manko de ĝojĝuo,  
manko de bonagemeco,  
multo da malsaĝa dormo.  
Ofte okdekjara homo  
malpli vivis dum la vivo  
ol junulo dudekjara,

kiu estis laborema.

Kio estas longa vivo?  
Vivo riĉa je ĝojĝuo,  
plena je anima forto,  
plenumanta l'agodevojn.  
Ofte ja dudekjarulo  
vivis pli ol hom' dormema,  
eĉ se tiu ĉi atingis  
sepdek jarojn de la vivo.

*(Árni Böðvarsson kaj F.V. Lorenz)*

## El la poemo Al s-ro Paúl Gaimard

La plifortigo de la vol'  
kaj l'energio estas scienc',  
vekas esperon kaj ordon en mens',  
feliĉon donas al la popol' ...

*(Kristófer Grímsson, Paco nov. 1956, n-ro 36.)*

## Island' feliĉa land'

Island' feliĉa land',  
prujnblanka patrino prospera!  
Ĉu via antikva fam',  
fort' kaj liber' estas for?

Sur ter' estas ĉio pasanta,  
la famo kaj gloriga tempo  
kiel ekbrilo dum nokt'  
aperas en fora epok'.

La land' estis loganta bel'  
kaj neĝblankaj kampoj glaciaj,  
klara kaj blua ĉiel',  
kaj mar' estis brilanta lum'.

Tiam prapatroj kaj niaj  
la liberamantoj bonegaj  
venis de Skandinavuj'  
ĉi tien al ĉarma insul'.

Tie bienojn starigis  
en valoj kun ravaj kreskaĵoj,  
floris tuj famo kaj sport',  
kaj ĝojo per hejma labor'.

Alte supre sur lafo,  
kie Öxar-rivero ankoraŭ  
fluas en Almannagjá,  
nia situis Alþing.

Porgeir ĉi tien alvenis,  
kiam enkondukiĝis la kredo,  
jen estis Gissur kaj Geir,  
Gunnar, Héðinn kaj Njáll.

Herooj trarajdis kamparojn,  
kaj bravaj maristoj flosigis  
la ŝipojn ornamajn ĉe bord',  
por porti la varojn al hejm'.

Pasivo ja estas neebla,  
la homo ŝanceliĝadas,  
aŭ iom progresas do li,  
aŭ iĝas la mala okaz'.

Kiom da agoj faris ni  
somerojn sescentojn?  
Ĉu estis bonfarojn per ni?  
Ĉu estis senduba progres'?

La land' estas loganta bel'  
kaj neĝblankaj kampoj glaciaj,  
klara kaj blua ĉiel',  
la mar' estas brilanta lum'.

Sed supre sur lafo,  
kie Öxar-rivero ankoraŭ  
fluas en Almannagjá,  
Alþing jen estas ne plu.

Snorrabúð jam detruigis,  
kaj jaron post jaro jen bluas  
je beroj la sankta Lögberg,  
manĝo por korv' kaj infan'.

Ho, vi gejunular',

kaj vi, islandaj kreskuloj!  
Famoj prapatraj kaj glor',  
tiel do estas jam for.  
*(Ingimar Óskarsson)*

## Blanka vi bela Island'

Blanka, vi bela Island'  
kaj bone vivdona patrino.  
Fore pratempa la fam',  
far' de hero' kaj liber'.

Daŭras nenio laŭ norm',  
kaj tempo de fam' kiel torĉo  
lumas en longpasintec'  
laŭ fulmefiko dum nokt'.

Belis benriĉa la land'  
kaj blank-glaciejaj montpintoj,  
ĉarmis serena ĉiel',  
ĉie brilhelis la mar'.

Vele la patroj marvoje  
alvenis por serĉi liberon,  
trovis en tiu ĉi land'  
teron de ben' kaj feliĉ'.

Fondis jen hejmon je fid'  
en flora la sino de l'valoj,  
noblis je sport' kaj renom',  
novojn ja spertis en ĝu'.

Supre ĉe roko de laf'  
kie fendon enfalis kaskado  
staris pratempe de l'ŝtat'  
ŝtona en ej' parlament'.

Tie pratempe akcepto de  
kredo kristana okazis.  
Tie pritraktis ĉefar'  
temojn de leĝoj kaj juĝ'.

Rajdis hero' regione,  
en rod' pompis ŝipoj ĉe bordo,  
venis el vasta la mond',

varjon alportis trans mar'.

Stari ne povas ni strebe  
en stato la sama longtempe,  
aŭ progresadas la hom'  
aŭ por li malas la fakt'.

Kion do povis ni paŝe  
dum pli ol duona jarmilo?  
Ĉu nia gent' je progres'  
gajne iradis ĝis nun?

Belas benriĉa la land'  
kaj blank-glaciejaj montpintoj,  
ĉarmas serena ĉiel',  
ĉie brilhelas la mar'.

Supre ĉe roko de laf',  
kie fendon enfalas kaskado,  
alte sur Roko de Leĝ'  
staras ne plu parlament'.

Bov' tretas budon de Snorri  
kaj beroj sur roka sanktejo  
kreskas por ludo de korv'  
kaj por la gaj-infanar'.

Jen, vi junula la ar'  
kaj filoj plenkreskaj de l'lando,  
patran la famon popol'  
plene forgesis jam nun.

*(Stefán Sigurðsson; Agorde, 1991.)*

## Printempa saluto

Estas ĝoja la kor', vintro jam estas for,  
en la maro ĝi dormas profunde,  
sed dolĉa somer' venas bela en ver',  
brilas lumo vivdona surgrunde.

Velas ŝipo sur mar', kuras nun ĉevalar',  
venas birdo el sudo la varma.  
Estas ĝoja la kor', vintro jam estas for,  
nun gajigas somero la ĉarma.

*(Stefán Sigurðsson; Agorde, 1991.)*

## La insuleto de Gunnar (Gunnarshólmi)

Brilas sur landon sun' somerovoje  
kaj bluan pinton de glacia mont'  
fajre koloris en vespero foje.  
Sin levas tiu bild' je l' horizont',  
la grandiozan kapon vaste banas  
en la ĉiela, klare blua font'.

Muĝanta akvo kontraŭ rok' ĉikanas  
el alt' falanta sub glacia rando,  
kie trezorojn feoj lude manas.  
Sed transe firmas stare monta grando,  
kovrita nigre, la Pintomontoj mem,  
kun verda zon', simila al girlando,  
kaj kasko brila kiel diadem',  
rigardas ili bluajn akvojn plie  
celi almaren en fluanta trem',  
kie dometoj nestas idilie  
dise sur kampoj florumitaj tute.

Ĉe l' nordo Hekla pompas energie.  
Neĝo sur pinto, fajr' koleras brute,  
en fund' terura, forte katenitaj,  
minac' kaj morto restas kvazaŭmute.  
Sed el siliko, alte ĉiel-spitaj,  
montaj tegmentoj super nigra hal'.

De tie sternas sin vidaĵoj mitaj,  
ĉar rivereg' en bel-arbara val'  
zumas laŭ bordoj. Larĝe ambaŭflankas  
agroj maturaj, kampoj sen rival'.

Supre, deklive, bril-vuale blankas  
floroj etkreskaj, ĉarmaj rev-reale.  
Ungegojn flavajn, ĉar fiŝoj ne ĉe-mankas,  
agloj elmontras prete, kapt-fatale.  
Flirtas trembrile turda flugosvarmo,  
arbar' sonoras, kvazaŭ festivale.

Tiam ĉevaloj du de riĉa farmo  
ekirigitaj estas por vetur'  
de tiu loko, kien ond-alarmo  
atingas, ĉar de l' maro la susur'  
neniam ĉesas ĉe l' sableja arko  
kie ĝi ŝvelas en eterna kur'.

Je fortaj ŝnuroj kuŝas bela barko  
kun veloj alligitaj al la jard'.

Pruo turnita maren kiel marko.  
Per tiu ŝip' veturu ekster tard'  
fratoj disfor de patrolandaj domoj  
kaj longatempe vivu sen rigard'  
al hejma tero, inter fremdaj homoj  
elpelitaj, de amikoj for,  
tiel la sorto diktis, en tiomoj.  
Kune portita estas lanc' de glor'  
de fama biendomo, ĉar Gunnar brave  
ĝin tenas mane. Proksime, kun honor',  
lin akompanas frat' aŭdaca, glave  
armita, sur sangruĝa virĉeval'.  
Jen rajdas Kolskegg, homoj scias prave.  
Nun iras pluen fratoj sen egal',  
ĉevaloj celas laŭ river' kureme,  
Kolskegg rigardas maren kun lojal'  
sed Gunnar al la hejm-dekliv' korpreme.  
Ne timas morton la hero' de famo,  
kiun minacas juĝo anateme.  
„Ne kaptis min antaŭe tia amo  
al hejma ter', ŝafar' en disaj vagoj,  
ĉe kampo brilas roz' en ruĝa flamo.  
Ĉi tie daŭru miaj vivotagoj,  
ĉiuj de Di' senditaj, jen adiaŭ,  
frat' kaj amiko.“ – Tiel fin' de agoj.

Ĉar Gunnar volis fronti al la mort'  
pli ol forlasi hejmon, senrevene,  
kruela band' en lig' kun trompa vort'  
katenis honestulon firmotene.  
Kortuŝa tamen estas lia sort'  
ankoraŭ enmemora ĉi-terene,  
kie fieras daŭre ĉionspita  
eta verdejo, flore ornamita.

Kie antaŭe verdis kampa vast',  
river' ŝvelkura regas detruante.  
Ankoraŭ montoj vidas kia drast'  
misagas kontraŭ bela val' konstante.  
Mortis la feoj, fuĝis for en hast'  
ĉiuj mituloj, regas zorgoj kvante,  
sed la verdejon, kie sort' elektis  
turnon por Gunnar – stranga fort' protektis.

*(Baldur Ragnarsson, La Tradukisto, 13, 1993.)*



## La knabino en la turo

Foje estis malriĉa fiŝkaptisto kaj havis filinon. Ŝi estis juna kaj bela. Iun vesperon ŝi iris al la marbordo por scii ĉu ŝi ekvidos sian patron albordiĝi. Tiam vikingoj tie alsaltis kaj volis kapti ŝin kaj forigi kun si. Sed la knabino rapide forkuris laŭ sia tuta kurkapablo. Proksime staris malnova turo kelkflanke ekfalanta. Neniu aŭdacis proksimiĝi al ĝi ĉar oni kredis ke ĝi estis plena da fantomoj kaj furioj. Sed la knabino tiom timegis ke ŝi ne pensis pri tio kaj kuris en la turon kaj malsupren de ŝtuparo ĝis ŝi venis al entera ĉambro. Tie estis sangmakuloj sur la planko kaj ferkatenoj sur la muroj. Timigita ŝi kuris preter ĉiuj tiuj objektoj kaj supren de iu spirala ŝtuparo kaj tra pordo de iu ĉelo en la turo. Tie sidis granda kaj terura strigo kiu fikse rigardis al ŝi kaj fajro brulis el ĝiaj okuloj. La knabino sin returnis kaj intencis fuĝi. Sed ĝuste tiam falis la ŝtuparo.

„Vi nun devas resti ĉi tie,“ la strigo diras, „kaj vi tre bone fartos. Mi volas instrui al vi ŝati la nokton pli ol la tagon. Ĉi tie kuŝas kelkaj pomoj. Kiam vi manĝos unu el ili via malsato kaj soifo malaperos kaj ĉi tie estas lito en kiu vi povas dormi kiam vi volas. Mi dormas la tutan tagon kaj tiam vi ne movu vin por ke mi ne vekiĝu; se vi tion faros mi faligos vin tra la fenestra aperturo.“ Post tio la strigo forflugis sed la knabino postrestis ploranta.

Post mallonga tempo la strigo revenas kaj havas kun si grandan aron da vespertoj. Ili ĉiuj flugas preter la knabino kaj tra la muro rekte kontraŭ la fenestra aperturo. Ŝi ekstaris kaj trovis sur la muro okangulan truon kovritan per teksaĵo de domaraneo. Ŝi ŝtelrigardis tra tiu truo kaj vidis en longa distanco, kvazaŭ en nebulo, helan salonon kaj ĉio lumflamis kvazaŭ oni vidus arĝenton aŭ oron kaj multaj estaĵoj en brilantaj vestaĵoj sin movas tien kaj reen. Al tio ŝi longe fiksrigardis ĝis subite mallumiĝis. Poste ŝi eksidis kaj pensis pri tiu aferaĵo. Iom poste la strigo kaj la vespertoj ree flugas preter ŝi eksteren tra la fenestra aperturo. Kiam tagiĝis la strigo venas hejmen, eksidas en la angulo kaj dormiĝas. La knabino rigardis eksteren en la taglumon. Sed tiel alte ŝi estis ke oni ne povis vidi la teron sed nur la ĉielon kaj la ŝvelan maron. Kiam ŝi ekmalsatis ŝi iom manĝis de pomo kaj satiĝis de ĝi. Poste ŝi iĝis dormema kaj sin kuŝigis. Posttagmeze ŝi ree vekiĝis kaj rigardis la ĉielon kaj la maron

kaj la dormantan bestaĉon. Ŝi sidis tute senmova, ne aŭdacante sin moveti kaj opiniis ke tia vivo estas teda. La strigo vekigis kiam mallumigis kaj tiel ekparolis:

„Ĉu vi pli ŝatas la nokton ol la tagon?“

„La tagon,“ la knabino diris.

Tiam la strigo flugis eksteren kaj venigis la vespertojn. Poste ĉio okazis same kiel la lastan nokton kaj tiel daŭris kelkaj noktoj escepte ke ĉio proksimiĝis kaj klariĝis antaŭ ŝiaj okuloj, la lumanta salono kaj belaspektaj homoj en brilantaj vestoj kiuj manĝis bonegajn delikataĵojn ĉe bela tablo kaj abunde aranĝita. Ĉiuvespere la strigo demandis ŝin ĉu ŝi pli ŝatis la nokton ol la tagon. Sed ŝi ĉiam respondis ke ŝi pli ŝatis la tagon. Sed tamen ŝi ekhezitis pli kaj pli ĝis la strigo diras al ŝi: „Tuj kiam vi respondos al mi ke vi pli ŝatas la nokton tiam vi venos al la festeno kun mi kaj sidos tie ĉe la tablo kune kun la belvestitaj homoj kaj vi akiros same belajn vestojn kiel ili.“

La sekvantan matenon la knabino ne povis dormi kaj ĉiam pensis pri tio kiel ŝi respondu la strigon en la vespero. Tiam ŝi aŭdis malantaŭ si ke iu diris duonvoĉe:

„Knabineto, pli ŝatu la tagon kiel vi ĝis nun faris.“ Ne sciante kio estis tio ŝi turnis sin kaj demandis kiu parolis. „Ts, ts!“ la voĉo diris, „ne veku la strigon.“

Tiam la knabino flustris: „Diru al mi, kiu vi estas.“

Tiam la voĉo diris: „Mi estis juna viro kaj malfeliĉe mi devojiĝis ĉi tien kiel vi. Mi preskaŭ mortis de malĝojo kaj iun nokton mi iris kun la strigo, sed en la mateno mi transformiĝis en tiun vesperton kaj de tiam mi ne toleras rigardi la benatan taglumon. Mi volas vin savi. Tial mi nun kaŝis min. Ne laŭte parolu. Nun la bestaĉo vekigas.“

La strigo koleregis kiam la knabino respondis al ĝi ke ŝi pli ŝatas la tagon. Ĝi skuis la flugilojn al ŝi kaj fajro brulis el ĝiaj okuloj. Kiam la tuta aro estis fluginta en la muron tiam la vesperto revenis el ĝia angulo.

„Ĉu vi ne ankaŭ volas enflugi?“ la knabino diris.

„Ne,“ diris la vesperto, „tien mi neniam iros plu kaj mi petas vin ke vi ne iru al la truo por enrigardi.“

Tiam la knabino diris: „Ĉu ni neniel povos liberiĝi?“

„Jes,“ respondis la vesperto, „vi povos liberiĝi se vi kuraĝas mortigi la strigon. Vi devas ŝteliri al ĝi de malantaŭe kiam ĝi dormas, ĉirkaŭprenu ambaŭmane ĝian kolon

kaj ĝin sufoku. Sed se ĝi vekigōs antaŭ ol vi firmtenos la kolon tio kaŭzos al vi tujan morton.“

La knabino respondis: „Tedas al mi tiu vivo, tial mi volas provi.“

La sekvantan matenon, kiam la strigo dormis, ŝi malrapide ekstaris malgraŭ tio ke ŝi timtremis ke la strigo vekigŭ. Ŝi sukcesis alproksimiĝi la strigon kaj ĉirkaŭprenis la kolon tiel forte kiel ŝi povis. La malamiko furiozis, etendis la ungegojn, frapegis per la flugiloj kaj siajn okulojn tiel terure returnadis, ke la knabino pro timo preskaŭ ellasis ĝin. Tiam la vesperto venis kaj kovris ĝiajn okulojn per siaj flugiloj ĝis la strigo sufokiĝis. La knabino tiel elĉerpiĝis ke ŝi ne povis stari pro laceco. Sed sammomente la turo disfalis kaj neniigis, kaj kiam ŝi rekonsciiĝis ŝi staris sur verda herbejo en hela sunlumo. Apud ŝi staris juna viro kaj diris al ŝi: „Mi estas la vesperto kiu parolis kun vi kaj vi liberigis min. Mia patro estas riĉa reĝo. Ni iru al li kaj okazigu nian geedziĝon.“

Poste ili unue iris al la kabano de ŝiaj gepatroj kaj petis permeson geedziĝi kaj de tie ili iris al lia reĝolando, kie ili estis bone akceptitaj kiel vi certe povas supozi.

*La Tradukisto, 5 (1990).*

## El amuzletero

### Kiam la brita reĝino vizitis la francan reĝon

Iam antaŭ kelka tempo kiam la brita reĝino estis manĝanta la lunĉon, ĉar ŝi ĉiam manĝas lunĉon, tiam envenis ŝia edzo en la reĝinejon por diri bonan tagon.

„Dio donu al vi bonan tagon,“ diris la reĝino. „Kia estas la vetero?“ La edzo de la reĝino kliniĝis dirante: „Estis pluvnube matene, sed nun klariĝas. Mi ordonis kunrasti la fojnon kaj oni do povas kunligi ĝin, kvankam vi foriros. Ĉu vi ne foriros transen hodiaŭ, bonulino?“

„Jes,“ diris la reĝino. Li kliniĝis denove dirante: „Mi devas rapidi kaj alvenigi la ĉevalojn.“ „Faru tion,“ diris ŝi.

Nun la reĝino komencis sin vesti, ĉar ŝi intencis iri ferie Francujon por viziti la reĝon kaj la reĝinon kaj aliajn gekonatojn. Ŝi portis orajn ŝuojn, arĝentajn ŝtrumpojn kaj jupon el oro kun arĝentaj randaĵoj, oran antaŭtukon, sed la supran parton kovris arĝenta

kamizolo, ore brodita kaj arĝenta kufo kun pendaĵo el pura oro, sed tiu ĉi oro kaj arĝento estis kvazaŭ araneaĵo kaj pli malpeza ol lanugo, sed tamen varma.

La servistinoj ankaŭ estis bele vestitaj kaj ili kuniros kiel kutime, kiam la reĝino ien veturas.

Kiam la reĝino venis en la korton, ĉio estis preta: Ĉevaloj kaj gvidantoj kaj militistoj kaj la gastodonacoj sur ses ĉevaloj en arĝentaj kofroj kaj ĉambelano kondukis ĉiun ĉevalon. En la karavano ankaŭ troviĝis baronoj kaj komercistoj kaj multaj virinoj krom la servistinoj kaj sufiĉe da kunrajdantoj kaj ĉevalistoj, kaj ĉiu estis belvestita.

La reĝino sidis sur Orobuklino – estis pale ruĝa rapidkuranto kun orkolora kolhararo alvenigita el la suda mondo. Sed ŝia edzo rajdis ruĝan bonĉevalon, kiu estis propraĵo de li mem. „Donu al mi mian vipeton, karulo,“ diris la reĝino, kaj ŝia edzo kliniĝis kaj donis al ŝi la vipeton. Estis ora vipeto kun arĝentaj ringoj kaj platena tubero je la fino. Kaj nun oni ekiris.

La reĝino ĉiam estis en la antaŭo, ĉar neniu ĉevalo egalas Orobuklinon. Veninte al la marbordo oni surmarigis la reĝinan ŝipon. Ĝi havis silkajn velojn kaj eburan maston kunŝraŭbitan kaj ore najlitan, ĉio el kornaĵo kaj perlamoto, ŝipo rapidkura.

Kiam oni jam preteriris la ĉebordajn ŝtonojn kaj turnis la ŝipon, la reĝino trifoje alvokis ĉiujn sur la tero, petante ke ili bone prizorgu la fojnon dum sia foresto trans la Markolo. Poste ŝi sidigis sin ĉe la direktilo – nur por plezuro – sed la direktilo estas el arĝento kaj facile respondas al ĉiu manmovo.

La reĝo en Francujo havas sian hejmon sur la plej bona bieno, norde apud la maro. La kulturita kampo estis same ebena kiel la Hólmur en la distrikto Skagafjörður, ebenega kaj spegule klara, kaj tial la rastistinoj devas porti kalsonojn sube, – kaj tute ĉirkaŭita per arĝenta muro. La gehejmanoj estis laboranta je la fojno, ĉiuj escepte de la reĝo kaj la reĝino ĉar ili estis maljunaj. Ŝi sidis en iu angulo en la sidejo ŝpinante per ora ŝpinilo sed li sidis apude kun sia krono kaj ili diskutis la ŝtatan buĝeton kaj tutan ekonomion. Tiam eniris iu el la hejmanoj – sed ili konsistas el nure princoj kaj princinoj aŭ dukoj kaj ĉambelanoj kaj filinoj de episkopoj. „Siro Filipo,“ li diras, ĉar la reĝo nomiĝis Siro Filipo. „Ŝipo estas sur la markolo kaj ni kredas ke estas ŝipo de la transmara reĝino. La velo estas blua kaj ruĝa.“

„Ĉu vi aŭdas, edzino?“ diris la reĝo, „gastoj al vi venos. Mi iros malsupren al la maro, sed dume vi prizorgu ke oni balaos kaj varmigigos kafon kaj ankaŭ vi devas prepari iajn manĝaĵojn.“ „Mi estas tute konsternita,“ diris la reĝino. „Marmier mia,“ ĉar estis Marmier kiu envenis, li nun fariĝis duko – , „iru,“ ŝi diris, „kaj igu la malgrandan Guðmundur kuri al la najbara bieno por pruntopreni kremon.“

„Kie estas Guizot?“ diris la reĝo, elirinte. „Mi intencis ke li kuniru kun mi. – Guizot, Guizot! Kien en tutmondon malaperis la ulo?“ Sed Guizot ne aŭdis. – Li kuŝis kontraŭ sudo sub la muro legante sepjaran numeron de la revuo Skírnir, kiun la Literatura asocio en Islando ĵus sendis al li.

Venante al la tero la ŝipo glitis al la kajo, ĉar tie estas kajo kiel en urbo – , kaj la reĝino de Anglujo surbordiĝis. La reĝo iris renkonte al ŝi, demetis la kronon kaj sin klinis, sed ŝi kisis sur sian manon kaj ridetis, kaj poste ili interbrakiĝis, kaj la edzo de la reĝino kaj la tuta publiko ĉirkaŭstaris kaj observis en kia maniero ili salutis unu al la alia. „Salutu al la reĝo, karulo,“ diris la reĝino. „Mi prenis mian edzon kun mi, Siro Filipino. Estas plia plezuro havi lin kun si.“ „Ĝojo kaj neatendita honoro,“ diris Siro Filipino. „Sed nun ni iru hejmen, mi petas, por havi ian refreŝaĵon.“ Kaj tiam oni iris hejmen kaj la reĝo mane kondukis la reĝinon kaj la edzo de la reĝino kaj la tuta publiko kuniris kaj observis en kia maniero ili iris kune mano en mano.

Kiam la procesio venis hejmen sur la kampon neniu estis pripensinta ke ĝi estas klara kiel spegulo. Sed la vesto de la reĝino estis tiel longa, ke nenio rimarkiĝis, sed la aliaj virinoj iris kurbaj kaj kliniĝis en la genuoj, kaj kelkaj kaŭris ŝajnigante ke ili riparas sian ŝuon. La reĝo estis la unua, kiu rimarkis ĉi tion, kaj li ordonis ke oni ŝutu cindron sur la kampon, por ke la virinoj povu daŭrigi la iradon hejmen. Oni do ŝutis cindron sur la kampon kaj post tio ĉiuj iris hejmen.

La folio finiĝis, kiel ĉiu povas vidi. Mi ne scias ĉu iu volas daŭrigi la rakonton kaj preparoli la akceptadon hejme.

*(Ólafur Þ. Kristjánsson; tajpita laŭ sonbendo, kiun Aŭroranoj en Rejkaviko sendis al la Magnetofona servo de UEA en 1960, La Tradukisto, 33, 1999.)*

## Magnús Grímsson:

### Blua ond'

Blua ond'  
ĝis bord' leviĝas,  
mortas apud bord'.

Blua ond',  
vin bruanta maro tiras  
al si, kaj vi tuj foriras  
abision for de l' bord'.

Blua ond',  
ekĝemojn viajn  
resonas mia kor'.

Blua ond',  
ĉiuj viaj vivmomentoj  
estas viaj mortmomentoj,  
la mort' vin portas for.

*(Sigurður Kristófer Pétursson; Þórbergur Þórðarson:  
Alþjóðamál og málleysur, 1933, 164-5.)*

## Islandaj popolrakontoj

### La diakono en Myrká

Je antaŭaj tagoj estis iu diakono en Myrká en Eyjafjörður. Ne estas menciata lia nomo. Li amrilatis kun virino, kiu nomiĝis Guðrún. Laŭ diro de iuj ŝi havis hejmon en Bægisá trans la rivero Hörgá, kaj ŝi estis servistino de la pastro tie. La diakono posedis ĉevalon grizkolharan, sur kiu li rajdis ĉiam. Tiun ĉevalon li nomis Faxi.

Foje tiel okazis iom antaŭ kristnasko, ke la diakono iris al Bægisá por inviti Guðrún al kristnaska festeno en Myrká kaj promesis ŝin venigi je definitiva tempo kaj akompani ŝin al la festeno en la antaŭvespero kristnaska.

En la tagoj antaŭ ol la diakono iris por inviti Guðrún okazis granda neĝo kaj glacikovroj. Sed la saman tagon, kiam li rajdis al Bægisá, venis forta pluvo kaj degelado, kaj en la paso de la posttagmezo la rivero fariĝis netransirebla pro glaciflosumo kaj akvoŝvelado, dum la diakono restis en Bægisá. Kiam li iris de tie, li ne atentis tion, kio jam aliĝis dum la tago, kaj supozis, ke la rivero estas subglacia kiel

antaŭe. Li sukcesis transiri la riveron Yxnadalsá per glacia ponto. Sed kiam li alvenis al Hörgá, ĝi jam disrompis la glacieron. Li tial rajdis laŭlonge de ĝi, ĝis li venis kontraŭ Saurbær, la plej proksima farmejo malsupre de Myrká. Tie estis glaciponto super la rivero. La diakono rajdis sur la ponton, sed kiam li atingis ĝian mezon, ĝi krevis malsupren, kaj li falis en la riveron.

Sekvantan matenon, kiam la farmisto en Þúfnavellir leviĝis el la lito, li vidas ĉevalon selitan malsupre de l'kampoj, kaj li kredis tie koni la ĉevalon de l'diakono en Myrká. Li ektimas pro tio, ĉar li vidis preteriron de l'diakono en la antaŭa tago, sed ne rimarkis, ke li iris returnen, kaj tial baldaŭ suspektis, kio okazis. Li tial iras malsupren for de la kampoj. Estis ja, kiel al li ŝajnis, ke tie estis Faxi, tute malseka kaj malbone stata. Li poste iras malsupren al la rivero, malsupren en la landpinton, nomatan Þúfnavallarnes. Tie li trovas la diakonon senaniman sur la ekstremo de la landpinto. La farmisto tuj iras al Myrká kaj sciigas pri la okazaĵo. Kiam la diakono troviĝis, li estis tre difektita per glacitavolo je la malantaŭo de la kapo. Poste li estis portata hejmen al Myrká kaj enterigata en la semajno antaŭ la kristnasko.

De kiam la diakono iris de Bægisá ĝis la antaŭkristnaska tago, neniu sciigo pri ĉi tiu okazaĵo kuris inter Myrká kaj Bægisá pro degelado kaj akvoŝvelo. Sed en la antaŭkristnaska tago vetero estis pli kvieta kaj la rivero malŝvelis dum la nokto. Pro tio Guðrún pensis ĝoje al la kristnaska festeno en Myrká. En la posttagmezo ŝi komencis vesti sin por la festeno, sed kiam ŝi estis preskaŭ preta, ŝi aŭdis, ke oni frapis. Alia virino, kiu estis ĉe Guðrún, iris al la pordo, sed nenium vidis ekstere, kaj ankaŭ nek estis hele nek mallume, ĉar la luno naĝis en nuboj kaj jen aperis, jen kovriĝis. Kiam ĉi tiu fraŭlino reenvenis kaj diris, ke ŝi nenion vidis, Guðrún respondis: „Por mi la ŝerco estas farita, kaj mi nepre eliros.“ Tiam ŝi estis prete vestita, escepte, ke al ŝi restis surmeti la mantelon. Ŝi ekprenas la mantelon kaj surtiras la unu manikon, sed ĵetas la alian manikon antaŭen trans la ŝultron kaj tenis ĝin tiel. Kiam ŝi elvenis, ŝi vidis Faxi starantan antaŭ la pordo kaj ĉe li viron, kiun ŝi supozis esti la diakono.

Ne estas menciite, ke ili interŝanĝis vortojn. Li prenis Guðrún kaj levis ŝin sur la ĉevalon kaj poste eksidis mem antaŭ ŝin. Nun ili tiel rajdas kelkan tempon, ke ili ne interparolas. Fine ili venis al Hörgá, kaj estis laŭ ĝi altaj glacirandoj, sed kiam la ĉevalo ĵetiĝis de sur la glacirando malsupren, leviĝis la ĉapelo de l'diakono malantaŭe, kaj tiam

Guðrún ekvidas la kranion nudan. En la sama momento la nuboj forkuris de antaŭ la luno. Tiam diris li:

„La lun’ glitadas;  
la mort’ rajdadas.  
Ĉu vi ne vidas blankan makulon  
en nuko mia,  
Garún, Garún?“<sup>1</sup>

Ŝi ektimis kaj silentis. Sed aliaj rakontas, ke Guðrún levis lian ĉapelon malantaŭe kaj ekvidis la blankan kranion. Laŭdire ŝi tiam parolis: „Vidas mi tion, kio estas.“ Ne oni rakontas pri iliaj interparoloj pliaj nek la vojaĝo, ĝis ili venis al Myrká. Tie ili deiris de la ĉevalo antaŭ la animpordo.<sup>2</sup> Tiam li diras al Guðrún:

„Atendu ĉi tie, Garún, Garún,  
dum mi kondukas Faxi, Faxi,  
eksteren de l’baril’, bariloj.“

Dirinte tion, li foriris kun la ĉevalo, sed ŝi hazarde ekrigardis en la tombejon. Tie ŝi vidis tombon malfermitan kaj timis tre multe, sed tamen kaptas tiun rimedon, ke ŝi ekprenas la ŝnuron de l’sonorilo. Samtempe ŝi estas kaptata de malantaŭe, kaj tiam estis por ŝi feliĉo, ke ŝi ne trovis tempon surtiri la duan manikon de l’mantelo, ĉar tiel forte oni kaptis, ke la mantelo disŝiriĝis je la ŝultra kunkudro de tiu maniko, kiun ŝi surpronis. Sed tion ŝi laste vidis pri faro de l’diakono, ke li saltis transkapiĝe kun la ŝiraĵo de la mantelo, kiun li tenis, malsupren en la tombon malfermitan, kaj kunbalaiĝis la tero de ambaŭ flankoj super lin. Sed tio estas por rakonti pri Guðrún, ke ŝi sonorigis seninterrompe, ĝis la domanoj en Myrká elvenis kaj forhelpis ŝin, ĉar pro ĉio tio ĉi ŝi estis tiel timigita, ke ŝi nenien kuraĝis iri nek ĉesigi la sonorigadon, ĉar ŝi kredis, ke ŝi jen luktis kun la diakono fantomanta, kvankam al ŝi ne venis iu sciigo pri lia morto. Ankaŭ ŝi certiĝis, ke tiel estis, kiam ŝi povis paroli kun la loĝantoj de Myrká, kiuj rakontis al ŝi la tutan historion pri morto de l’diakono kaj ŝi kontraŭe al ili pri sia travivaĵo.

En ĉi tiu sama nokto, kiam oni enlitiĝis kaj estingis la lumon, venis la diakono kaj atakis Guðrún, kaj tio atingis tian gradon, ke la domanoj devis leviĝi, kaj neniu povis dormi tiun nokton. En duona monato post tio ŝi neniam povis resti sola, kaj oni devis gardi ŝin dum ĉiu nokto. Iuj diras, ke la pastro devis sidi apud ŝi sur la litrando kaj legi en la Psalmaro.



Nun oni venigis sorĉiston de okcidente en Skagafjörður. Kiam li venis, li igis elfosi grandan ŝtonon supre de la kampo kaj ruli ĝin al la posta fino de l'halo. En la vespero, kiam krepuskiĝis, venas la diakono kaj volas eniri la domon, sed la sorĉisto perfortas lin suden post la halfinon kaj tie metas lin enteren per forta sorĉado. Poste li superrulas la ŝtonon, kaj tie la diakono laŭdire ripozas ankoraŭ hodiaŭ.

Post ĉi tio ĉesis ĉiu fantomado en Myrká, kaj Guðrún ekresaniĝis. Iom poste ŝi iris hejmen al Bægisá, sed estas onidiro, ke ŝi neniam poste fariĝis la sama kiel antaŭe.

1 Fantomoj ne povas esprimi nomon de Dio nek ion, kio entenas Dio-nomon. Tial la diakono diras Garún anstataŭ Guðrún, ĉar Guðrún signifas „runo de Dio“.

2 Animpordo signifas pordon de la tombejo, tra kiu la kadavroj estas portataj al la tomboj. *La trad.* (Tradukis Þórbergur Þórðarson, *Alþjóðamál og málleysur*, 1933, 260-64; *Voĉo de Islando I*, 2, 1949.)

## La animo de mia Johano

### Islanda popolrakonto

*Ĉiu popolo havas sian apartan folkloron, siajn legendojn aŭ popolrakontojn el plej diversaj fontoj, kaj la motivoj (apartaj trajtoj en la rakontado) ofte estas internaciaj. En la islanda folkloro la rakontantaj maljunulinoj ĉe la radŝpinilo aŭ la trikiloj – je multaj generacioj – harmoniigis eksterlandajn legend-motivojn al la enlanda tradicia folkloro. – Islanda folkloro havas multajn apartajn trajtojn, sed tamen ĝi kompreneble memorigas pri la folkloro en la proksimaj landoj (Skandinavujo). Ĝi temas pri elfoj, gegigantoj, ĉiaj fantomoj kaj spiritoj, sorĉado, forpelitoj ktp. Krom tio ekzistas legendoj, kiuj nur malmulte dependas de la folkloro, kaj ofte tiaj legendoj havas siajn fontojn en la neplenumitaj deziroj de subpremitaj popolo kaj individuoj, deziroj por io pli bona kaj komforta al la homo ol la vera vivata vivo.*

*Jen ni aperigas unikan islandan legendon, kiu vere montras, kiel ordinaraĵoj homoj – mi kaj vi – eĉ povas fari kaj rakonti legendojn pri la plej sankta kaj grava, kvazaŭ pri iuj ordinaraĵoj. Á.B.*

Iufoje vivis kune maljunaj viro kaj virino. La viro estis iom nebona kaj malpopulara. Ankaŭ li estis maldiligenta kaj sentaŭga je laboro por sia hejmo. Tio tre malplaĉis al lia maljuna edzino, kaj ŝi ofte riproĉis lin dirante, ke li nenion povas krom konsumi tion, kion ŝi gajnis. Ŝi mem ĉiam laboradis kaj pripensis havigi al ili necesajojn, kaj ŝi ĉiam sukcesis gardi sian rajton kontraŭ ĉiu ajn. Sed kvankam ili ne bone harmoniis, ŝi amegis kaj bone prizorgis sian edzon. Kaj tiel longe daŭris.

Sed iam la maljunulo severe malsaniĝis. Lia edzino maldormadis ĉe li, kaj kiam la morto alproksimiĝis, ŝi ekpensis, ke li eble ne estas sufiĉe preparita por la morto, por

ke estu garantiite, ke li ricevos permeson eniri la ĉielon. Ŝi tial pensis kun si mem, ke plej konsilinde estas, ke ŝi mem provu antaŭenigi la animon de sia edzo. Ŝi prenis haŭtan saketon kaj tenis ĝin antaŭ la vizaĝo de la mortanto. Kiam lia animo foriris el la karno, ĝi eniris la saketon, kiun la maljunulino tuj fermis per ligilo. Poste ŝi ekiris al la ĉielo, portante la saketon en sia antaŭtuko.

Alvenis ŝi al la pordo ĉiela kaj frapis sur ĝi. Sankta Petro eliris kaj demandis pri la celo de ŝia veno.

„Bonan tagon, bonan tagon,“ ŝi diris. „Ĉi tien mi venigis la animon de mia Johano. Vi kredeble aŭdis pri li. Mi petas, ke vi enirigu lin ĉi tien.“

Petro respondis: „Pa, pa! Mi tion bedaŭrinde ne povas. Certe mi nenion bonan aŭdis pri via Johano.“

„Sankta Petro! Mi ne povas kredi, ke vi estas tiel senkompata. Kaj ĉu vi forgesis, kio okazis al vi antaŭ longe, kiam vi malkonfesis vian majstron?“

Aŭdinte ĉi tiujn vortojn Petro eniris kaj ŝlosis. La maljunulino staris ĝemante ekstere, sed baldaŭ ŝi denove frapis la pordon, kaj eliris Sankta Paŭlo. Ŝi salutis lin kaj demandis, kiu li estas, al kio li respondis. Poste ŝi petis lin, ke li gardu la animon de ŝia Johano. Li respondis, ke ĝi neniel koncernas lin, ĉar ŝia Johano neniun gracon meritas. Tiam ŝi koleriĝis kaj diris:

„Ĉi tion vi mem disponas, Paŭlĉjo. Mi dubas, ke vi plie meritis gracon, kiam vi antaŭ longe persekutis Dion kaj bonajn homojn. Mi kredas, ke estas plej bone, ke mi ĉesu peti vin.“

Rapidege Paŭlo ŝlosis.

Kiam la maljunulino triafoje frapis la pordon, Sankta Maria eliris.

„Bonan tagon, amikino,“ la maljunulino diris. „Mi esperas, ke vi permesos al mia Johano eniri, kvankam Petro kaj Paŭlo ne konsentas.“

„Bedaŭrinde, bonulino,“ Maria diris, „tion mi ne aŭdacas, ĉar estis tia fripono via Johano.“

„Pro tio mi ne riproĉas vin,“ la maljunulino diris. „Tamen mi kredis, ke vi scias, ke ankaŭ aliaj povas esti tiel ete pekemaj kiel vi. – Ĉu vi ne memoras, ke vi naskis unu infanon, kies patron vi ne povis nomi?“

Maria, ne deziranta aŭdi pli, ŝlosis kiel eble plej rapide, kaj kvarfoje la edzino

frapis la pordon. Tiam Kristo mem eliris kaj demandis, kion ŝi deziras. Ŝi diris humile:

„Mi petas vin, bona Savanto, ke vi permesu al tiu ĉi kompatinda animo trairi la pordon.“

Kristo respondis:

„Estas Johano! – Ne virino, li ne adoris min.“

Je sama momento li ekfermis la pordon, sed ŝi rapidis ĵeti la saketon kun la animo preter li, tiel ke ĝi bloviĝis longan vojon en la ĉielo-palaco, antaŭ ol la pordo ŝlosiĝis.

Je tio estis kvazaŭ falis ŝtono for de la maljunulina koro, ĉar ŝia Johano certe eniris la ĉielon, kaj ŝi ĝoje iris hejmen.

Nenion plian oni scias pri ŝi aŭ pri tio, kiel la animo de Johano fartis post tio ĉi.

*(Árni Böðvarsson, Voĉo de Islando, II, 1, 1950.)*

## La animo de mia Jón

### Islanda popolrakonto

Foje kunvivadis viro kaj virino. La viro estis iom nebridebla kaj malŝatata, krome li estis maldiligenta kaj sentaŭga en sia hejmo. Ĉi tion tre malŝatis lia edzino, kaj ŝi ofte riproĉis lin dirante, ke li nur elspezis tion, kion ŝi enspezis, ĉar ŝi mem estis tre diligenta kaj penadis altiri sufiĉajn vivrimedojn. Ŝi sciis efektiviĝi sian volon iel ĉe ĉiuj. Sed kvankam ili ne ĉiam interkonsentis ĉiurilate, la maljunulino tamen tre amis sian maljunan edzon kaj atente prizorgis, ke al li mankis nenio. Tiel longe daŭris.

Iun tagon la edzo severe malsaniĝis. La maljunulino maldormis apud li. Kaj kiam iom post iom la maljunulo kadukiĝis, ŝi ekpensis, ke eble li ne estas sufiĉe bone preparita por la morto, kaj estus dubinde, ĉu al li permesus eniron en la Ĉielon. Al ŝi ŝajnis, ke estus plej konsilinde, ke ŝi mem konduku la animom de sia edzo al la Paradizo. Tiam ŝi havigis al si felsakon en kiun ŝi kaptis la animon de sia edzo je lia lasta elspiro, jen tuj ŝi firme fermis la felsakon per ŝnuro. Post tio ŝi ekiradis ĉielen portante la felsakon en sia antaŭtuko. Ŝi venas al la Ĉielpordego kaj frapas la pordon. Tiam Sankta Petro eliris kaj demandis kia estis ŝia afero. „Saluton al vi,“ la maljunulino

diris, „mi alportas la animon de mia Jón, vi certe aŭdis pri li. Nun mi petas, ke vi envenigu lin ĉi tien.“ „Ho jes, ho jes,“ Petro diris, „sed bedaŭrinde ĉi tion mi ne povas. Mi ja aŭdis pri via Jón, tamen neniam oni menciis ian bonfaron lian.“ Tiam diris la maljunulino: „Neniam mi opiniis, Sankta Petro, ke vi estis tiel malvarmkora, kaj jam vi tute forgesis kio okazis al vi, kiam vi malkonfesis vian Mastron.“ Jen Petro eniris kaj ŝlosis la pordegon, sed la maljunulino restis ĝemante ekstere.

Post nelonga tempo ŝi refrapis la pordegon kaj tiam Sankta Paŭlo eliris. Ŝi salutis lin kaj demandis pri lia nomo. Li sin prezentis. Ŝi petis lin prizorgi la animon de sia Jón, sed li tute rifuzis kaj diris, ke ŝia Jón meritas nenian gracon. Tiam la maljunulino koleris kaj diris: „Ĉu decas por vi, Paŭlo? Eble vi mem pli meritis gracon antaŭe kiam vi persekutis La Sinjoron kaj bonajn homojn. Nepre mi ĉesu plorpeti vin.“ Tiam Paŭlo plej rapide ŝlosis la pordon.

Kaj kiam la maljunulino trian fojon frapis la pordon, la Virgulino Maria eliris. „Saluton, mia kara,“ diris la maljunulino, „mi esperas, ke vi permesas al mia Jón eniri, kvankam Petro kaj Paŭlo ne permesis.“ „Bedaŭrinde, karulino mia,“ diris Maria, „mi ne kuraĝas ĉar via Jón estis tia aĉulo.“ „Mi ne riproĉos vin pro tio,“ la maljunulino diris. „Tamen mi pensis ke vi sciis, ke aliaj ol vi povas esti malstabilaj, aŭ ĉu vi ne memoras, ke vi iam naskis infanon kaj ne povis difini la patron?“ Maria ne volis aŭskulti plion, tial rapide fermis la pordegon.

Kvaran fojon la maljunulino frapis la pordon. Eliris Kristo mem kaj demandis kion ŝi volas. Tiam ŝi humile diris: „Mi petas vin, bona Savinto mia, ke vi permesu al tiu mizera animo eniri tra la pordo.“ Kristo respondis: „Estas via Jón. Ne, virino. Li ne kredis je mi.“ Sammomente li volis fermi la pordon. Tiam subite la maljunulino ĵetegis la felsakon enhavante la animon tra la pordo, tiel ke ĝi forbloviĝis malproksimen en la Ĉielpalacon antaŭ ol la pordo klakfermiĝis. Tiam peza stono falis de sur la koro de la maljunulino, sciante ke Jón, malgraŭ ĉio, jam eniris la Ĉielon. Kaj post tio ŝi ekiris hejmen ĝoja. Kaj nun ni nek scias rakonti plion pri ŝi nek kiel fartas la animo de Jón post tiuj okazoj.

*(Guðmundur Frímannsson, Bulteno de Norda Stelo, Akureyri, apr. 1981.)*

## Tute senvestigu vin!

### Islanda popolrakonto

Iam loĝis en orientislanda bieno iom bonhava bienulo. Li posedis multajn ŝafojn, kaj por gardpaŝti ilin dum la vintro li dungis ŝafgardiston.

Okazis meze de iu vintro, ke la ŝafgardisto paŝtis la ŝafojn kiel kutime; nenio okazis ĝis li komencas enstaligi la ŝafojn je la vespero, sed tiam li vidas, ke mankas al li ses ŝafoj. Li tute ne komprenas, kiel tio ĉi okazis, ĉar li gardis ilin dum la tuta tago kaj ne rimarkis, ke iu el ili malaperis. Li enstaligis la aliajn ŝafojn kaj poste komencas serĉi la perditajn. La vetero estis iom minaca, frostoj kaj neĝfalado. Sufiĉe longe li serĉas, sed nenion trovas; iam post iam mallumiĝas kaj li tute ne scias kien li iras. Li paŝadas la tutan nokton ĝis tagmezo la venontan tagon; tiam heliĝis iomete. Li daŭrigas sian paŝadon, ĝis li venas en malvastan valon, laŭ kiu li iras. Kiam vesperiĝas, li alvenas al kulturkampa barilo kun pordego. Irante tra la pordego, li atingas la bienon. Lumo estis en ĉiu fenestro. Tre mallaŭte la ŝafgardanto alproksimiĝas al unu el la fenestroj por ekscii, kion li vidos interne.

En la sideoĉambro sidas du virinoj, unu maljuna, sed la alia juneca. Unu el la virinoj kudris, la alia trikis. Tie ankaŭ estis viro, kiu paŝis trans la plankon. Li portis tankoloran mantelon. La ŝafgardisto pensas, ke tiuj ŝajne estas la gemastroj de tiu ĉi bieno kaj la junulino estas ilia filino. Tiam li iras al alia fenestro. Tie li vidis junulinon ŝpinantan kaj tri virojn, kiuj kombis. Nun li meditas, ĉu li petu pri nokta restejo en tiu ĉi bieno aŭ restu ekstere dum la nokto.

La kompatinda ŝafgardisto estis kaj laca kaj malsata. Tial li decidis sin malkaŝi, ĉar li ankaŭ kredis, ke estis malinde por li pereji apud la bona muro. Li frapas je la pordo, kaj elvenas du viroj. Li salutas ilin kaj petas ilin demandi la bienulon, ĉu li povu tranokti tie. La viroj eniras kaj baldaŭ revenas kun la sciigo, ke gastigado estas permesata. Ili kondukas la gaston al la sideoĉambro. Li salutas la bienanojn. La bienulo tute ne respondas, sed la virinoj resalutas. La dommastrino ekstaras de sia lito kaj petas lin sidiĝi. Ŝi forlasas la ĉambron, sed revenas post mallonga tempo portante manĝaĵon: viandon kaj sangokolbason. Li prenas la manĝaĵon kaj komencas manĝi, sed malmulton manĝas. Tiam demandas lin la dommastrino, ĉu li estas soifa. Li jesas. Ŝi venigas por li selaktaĵon kaj petas, ke li sin ripozu, se li estas laca.

Nun pasas la vespero kaj oni nenion plu diras al li. Kiam alproksimiĝas tempo por enlitiĝo, la junulino ekstaras, paŝas al sia patro kaj ricevas ŝlosilon ĉe li. Tiam ŝi petas la gaston sin sekvi. Ŝi montras al li deflankan ĉambron en la alia fino de la sidoĉambro kaj diras al li, ke tie li restu tiun ĉi nokton, sed samtempe ŝi flustras: „Pro Dio, tute senvestigu vin!“ Nun oni ŝlosas la ĉambron, tiel ke oni neniel povas eliri. La ŝafgardisto ekmemoras la saĝan konsilon de la junulino kaj meditas, kion li faru. Ŝajnis al li, ke malbone aspektas pri savo, se li estas tute nuda kaj atako okazos. Fine li decidas sekvi la konsilon de la junulino, kaj li tute senvestigas sin, sed ne povas ekdormi.

Nun pasas mallonga tempo. Tiam li aŭdas, ke oni fingrumas la pordon, kaj iu venas en la ĉambron. Li ne scias, antaŭ ol la lanuga kovrilo estas fortirita de li kaj oni pripalpas lin de kapo ĝis piedo; tiam oni reĵetas sur lin la lanugan kovrilon kaj foriras. Tio ŝajnas al li strange, kaj nun li supozas, ke li tiufoje estas ekster ĉiu danĝero. Li ekdormas kaj dormas ĝis tagiĝo.

Venontan matenon, kiam li vekigis, la bienulo venas kaj deziras al li bonan tagon. Nun li aspektas pli ĝoje ol la antaŭan vesperon. La bienulo diras, ke la vetero estas minaca: neĝfalo kaj frostoj; li petas la gaston resti tie dum unu tago. Tiam li demandas, kien li estas iranta. La gasto diras la veron kaj dankas al la bienulo pro lia afableco. La neĝfalo daŭris unu semajnon, kaj la ŝafgardisto restis kiel favorito ĉe la bienanoj. Antaŭ ol li foriris, li treege deziris ekscii, kial la junulino konsilis al li demeti ĉiujn siajn vestojn. Iufoje li sukcesis ekrenkonti ŝin kaj demandi ŝin, pro kiu kaŭzo ŝi donis al li la konsilon tute senvestigi sin.

„Kiam mia patro estis juna,“ ŝi diris, „li kuniĝis kun kelkaj junuloj, kiuj sin transloĝis suden en la montaron kaj ekloĝiĝis tie. Iliaj samkamaranoj rimarkis la foriron kaj sendis spionojn por serĉi ilin. Okazis luktado, kaj verŝajne oni mortigis la spionojn. Sed poste mia patro estis malfidema al kamaranoj kaj ofte diris, ke se iu el ili restos ĉe li dum unu nokto kaj tute senvestigos sin, li ne estos spiono.“ Ŝi plue diris, ke ŝi tiel kompatis lin tiun vesperon, ke la penso pri eventuala danĝero, kiu lin minacis, estis al ŝi netolerebla. Tial ŝi konsilis tion al li.

Post unu semajno la vetero heliĝis, kaj tiam la ŝafgardisto preparis sin al foriro. La bienulo donis al li manĝaĵojn por la vojaĝo kaj petis lin reveni venontan printempon kiel laboranto, sed li devas kaŝi tion por aliaj. La ŝafgardisto ne rifuzas tion, salutas la

montanojn kaj dankas pro la gastamo. Tiam li ekiras kaj bone fartas dum la vojo. Kiam li alvenis hejmen, oni tre ĝojis revidi lin, ĉar neniu supozis, ke li iam revenu envive. La ŝafoj estis starantaj apud la stala pordo la matenon post la foriro de la ŝafgardisto. Oni nun eldemandis lin, sed li malmulton respondis. Li diris, ke li serĉis la ŝafojn kaj restis pro la neĝfalo en iu bieno en la najbara distrikto.

Nun pasis la vintro ĝis printempo; tiam la ŝafgardisto vendis tutajn siajn havaĵojn kaj aĉetis por ili ŝafojn. En la printempo, kiam oni pelis la ŝafojn al la montstepoj, li iris kiel la aliaj kun siaj ŝafoj, sed li neniam revenis. Li havis konatulon en la distrikto. Li konfesis al li ĉion pri sia vojaĝo la antaŭan vintron kaj pri sia intenco kiam printempigo, sed petis lin gardi tion kiel sekreton.

Post kelkaj jaroj li ree vizitis la konatulon. Tiam li diris, ke la filino de la montano nun estas lia edzino, ke lia bopatro antaŭ nelonge mortis kaj li mem heredis la bienon. Poste li reiris al la montoj. De tiam oni nenion aŭdis pri li.

*(Óskar Ingimarsson, el la legendaro kolektita de Ólafur Davíðsson; Voĉo de Islando, 4, 1950..)*

## Loftur, la sorĉisto

### Islanda popolrakonto

Loftur nomiĝis unu el la lernantoj ĉe Hólar.<sup>1</sup> Li sin okupadis pri nigra magio, kaj persvadis aliajn fari ĝin kun li, kvankam ili ne sukcesis atingi pli ol nuran fuŝaĵon. Loftur instigis siajn lernejratojn fari diversajn sorĉajn petolaĵojn al aliaj homoj, kaj li mem estis ĉiam la gvida iniciatanto. Foje Loftur vizitis siajn gepatrojn dum Kristnasko. Tiam li prenis iun servistinon de la episkopejo, ferumis ŝiajn plandojn, bridis ŝin kaj rajdis sur ŝi sorĉraĵe de la hejmo kaj rehejmen. Post tio ŝi longe kuŝis en lito pro vundoj kaj lacego, sed povis al neniu rakonti dum Loftur vivis. Alian fojon Loftur gravedigis domservistinon de la episkopejo, kaj mortigis tiun sian infanpatrinon per nigra magio. Ŝi havis la taskon porti la lignajn manĝvazojn<sup>2</sup> inter la kuirejo kaj la manĝosalono. Por akceli la laboron ili estis portataj en iaspeca trogforma ilo nomata vazflosa, kiu entenis plurajn vazojn samtempe. Loftur igis malfermiĝi koridoron antaŭ ŝi en mezo de muro<sup>3</sup> en kiun ŝi eniris, sed kaŭze de tio, ke la junulino ektimis kaj

hezitis, la sorĉo efikis, kaj la muro refermiĝis. Longtempe poste, kiam oni malkonstruis la muron, oni trovis en ĝi virinan skeleton rektestarantan kun amaso da manĝvazoj en la brakoj kaj neplenkreskaj infanostoj en la koksa pelvo. Preposto Þorleifur Skaftason admonis Loftur, ĉar li estis pastro de la katedalo en tiu tempo. Sed ĝi malmulte influis sur Loftur, kaj poste li kelkfoje faris malicajn ŝercludojn al la preposto, sed ne povis fari al li malutilon, ĉar li estis tiel granda piulo, kaj cetere klerulo, ke nenio malpura povis pereigi lin. Iun fojon la preposto rajdis al aneksia preĝejo kaj devis transiri la riveron Hjaltadalsá, kiu estis ŝvelinta pro degelakvo. La ĉevalo subite haltis kaj tiel ektimis ke la preposto devis salti de sur la selo en la mezo de la rivero. Li ekkaptis sian sutansakon kaj vadis al la bordo. Alie tio ne malutilis al li kaj li faris diservon la saman tagon. Loftur ne ĉesis, antaŭ ol li estis lerninta ĉion, kio estis en la libro „Grizfelo“<sup>4</sup> konante ĝin laŭ ĉiu punkto. Tiam li serĉis instruon ĉe diversaj sorĉistoj, sed neniu tiam sciis pli ol li. Li nun fariĝis tiel antikveca karaktero kaj incitiĝema, ke ĉiuj lernejoj timis lin. Ili ne kuraĝis kontraŭstari lian volon, kvankam ili sentis abomenon kontraŭ ĝi. Foje en frua vintro Loftur parolis kun unu el la lernejoj, kies kuraĝon li bone konis, kaj petis lin helpi al li elvoki la antikvajn episkopojn. Li rifuzis hezitante. Sed Loftur diris ke alie li mortigos lin. La lernejo demandis, kian utilon li povus fari al li, ĉar li tute ne scipovas sorĉon. Loftur diris ke li nur devus stari en la preĝeja sonorilejo tenanta la sonorilŝnuron, resti senmova, sed ĉiam rigardi al li, kaj ektiri la ŝnuron tuj kiam li faros al si signon per la mano. „Nun mi volas,“ diris Loftur, „precize konigi al vi mian intencon. Tiuj, kiuj ellernis sorĉon ĝis tia grado kiel mi, nur povas uzi ĝin por malbonfaro, kaj devas ĉiuj forperei poreterne, kiam ajn ili mortos. Sed se oni scipovas sufiĉe multe, la Diablo ne plu havas potencon super la homo, sed devas humile servi lin sen ia ajn rekompenco, kiel li servis al Sæmundur la multescia<sup>5</sup>, kaj ĉiu, kiu tiom multe scipovas, povas laŭvole uzi sian scipovon por kia ajn bonfaro. Tian scipovon oni nuntempe malfacile atingas, post la ĉesigo de Nigra-lernejo<sup>6</sup>, kaj post kiam episkopo Gottskálkur la kruela<sup>7</sup> igis entombigi kune kun si la sorĉlibron „Ruĝfelo“<sup>8</sup>. Tial mi volas elvoki lin kaj per sorĉo trudi lin elliveri al mi Ruĝfelon, sed tiam ĉiuj aliaj antikvaj episkopoj leviĝos el siaj tomboj, ĉar ili ne toleros tiom da sorĉaĵoj super si kiel Gottskálkur, kaj mi igos ilin diri al mi ĉion kion ili scipovis en sia tera vivo, kaj tio ne kostos al mi grandan penon, ĉar oni povas vidi el la mieno, ĉu la homo scipovas sorĉon



aŭ ne. Sed la lasttempajn episkopojn me ne povas elvoki, ĉar ili estas ĉiuj entombigitaj kun la Biblio sur la brusto. Montru nun vian taŭgecon, kaj agu precize kiel mi diras al vi, kaj sonorigu nek tro frue, nek tro malfrue, ĉar de tio dependas mia portempa kaj eterna bonfarto, poste mi rekompencos vin tiel bone ke neniu estu al vi pli supera.“ Tion ili fikse interkonsentis, leviĝis iom post la ordinara tempo de enlitiĝo kaj iris al la preĝejo. La luno brilis ekstere prilumante la preĝejon. La lerneĵano haltis en la sonorilejo, sed Loftur suriris la katedron kaj komencis la sorĉan elvokadon. Baldaŭ leviĝis homo el la planko kun serioza, sed tamen milda mieno portanta mitron sur la kapo. La lerneĵano konjektis ke tiu estas la plej antikva episkopo. Li alparolis Loftur: „Ĉesu, mizera homo, dum ankoraŭ estas tempo, ĉar pezaj estos por vi la preĝoj de mia frato Guðmundur<sup>9</sup>, se vi malkomfortigos lin.“ Tion Loftur ignoris, sed kontinuigis la sorĉan elvokadon. Nun leviĝis laŭvice ĉiuj la antikvaj episkopoj el siaj tomboj portantaj blankajn kitelojn kun kruca signo sur la brusto kaj bastono en la mano. Ĉiuj iomete alparolis Loftur, sed ne estas menciata, kion ili diris. Tri el ili portis mitrojn sur la kapoj, la unua, la lasta kaj tiu, kiu staris en la mezo (eble Guðmundur Arason<sup>9</sup>, kvankam necerte). Ne estis videbla sorĉpovo el la mieno de iu el ili. Gottskálk ĉion eltoleris nevenante. Tiam Loftur unue metis sian tutan energion en la sorĉadon turnante sian parolon al Gottskálk sola, li transturnis la Psalmaron de Davido al la Diablo, kaj faris konfesion pro ĉio kion li bone faris. Tiam staris la tri kronitaj episkopoj plej fore kun suprenlevitaj manoj turnante siajn visaĝojn kontraŭ Loftur, sed la aliaj forturnis siajn visaĝojn for de Loftur kaj rigardis ilin. Tiam aŭdiĝis tondra bruoj kaj suprenvenis viro kun bastono en la maldekstra mano kaj ruĝa libro sub la dekstra brako, li ne havis krucan signon sur la brusto. Li ĵetis malafablan rigardon al la episkopoj, sed rikane rigardis al Loftur, kiu nun kiel eble plej insiste sorĉadis. Gottskálk moviĝis iomete pli proksimen kaj diris per moka tono: „Bele vi kantas, filo, kaj eĉ pli bele ol mi atendis, sed tamen vi ne atingos mian Ruĝfelon.“ Tiam Loftur tute aliformiĝis kaj tiel furiozis, ke estis kvazaŭ li neniam antaŭe sorĉis. Li transturnis la „benan riton“ kaj „Patro-nian“ al la Diablo. La tuta preĝejo krake skuiĝis kaj tremegis. Ŝajnis al la lerneĵano ke Gottskálk iomete moviĝis pli proksimen al Loftur, kaj hezite etendis al li unu angulon de la libro. Antaŭe li estis sentinta timeton, sed nun li tremis pro teruro, kaj ĉio fariĝis nigra antaŭ liaj okuloj. Ŝajnis al li, ke la episkopo subite suprenlevis la libron kaj ke Loftur

eletendis sian manon, tiam li supozis ke Loftur faris al li signon, kaj ektiris la sonorilŝnuron. Tiam ĉio malaperis malsupren tra la planko kun susurega bruo. Loftur staris dum momento kvazaŭ ŝtoniĝinta en la kapo apogata en siaj manoj, sed poste li malrapide palpiris malsupren, kaj trovis sian kunulon. Li ekĝemis kaj diris: „Tio havis pli malbonan finon ol mi atendis, sed tamen mi ne povas ĵeti la kulpon sur vin. Mi bone estus povinta atendi la tagiĝon, tiam la episkopo estus lasinta la libron, kaj memvole li estus metinta ĝin supren al mi, ĉar ne estus por li valorinta la penon perdi la ŝancon reveni en sian tombon kaj ankaŭ ne permesite al li pro la aliaj episkopoj, ĉar kiam mi vidis la libron kaj aŭdis liajn provokajn vortojn, mi tiel freneziĝis, ke mi intencis ekhavi ĝin tuj per sorĉado, kaj unue mi reakiris mian memkonscion, kiam mi venis tiel proksime al la kulmina punkto, ke se mi estus eldirinta eĉ unu sorĉan strofon pli, la preĝejo estus forglutita de la tero, kaj estis tio, kion li intencis. Sammomente mi ekrigardis la vizaĝojn de la kronitaj episkopoj, sentis timon kaj sciis, ke vi falos svenigita ĉe la sonorilŝnuro, kaj la sonorilo sonoros, sed la libro estis tiel proksime al mi, ke ŝajnis al mi ke mi povus ekkapti ĝin, cetere mi tuŝis ĝian angulon, kaj nur mankis al mi sufiĉe firma preno, por ke mi ne perdu ĝin el la mano. Sed nun devas fariĝi laŭokaze, kaj jam estas antaŭvidebla la sorto de mia animo, sed vian rekompencon ni tamen tenu en sekreto.“ Loftur fariĝis post tio tre malgaja, kaj preskaŭ freneza, tiom ke li ne toleris esti sola, kaj oni devis eklumigi por li, kiam krepuskiĝis. Li komencis recitadi al si mem: „La dimanĉon en mezfasto mi estos en infero kaj la turmentoj.“ Oni konsilis al li serĉi rifuĝon ĉe pastro en Staĉarstaĉur. Li estis maljuniĝinta sed tre pia kaj bonega pastro. Frenezuloj resaniĝis, precipe tiuj, kiuj estis atakitaj de nigra magio, se li metis siajn manojn sur ilin. Loftur serĉis rifuĝon ĉe li. La pastro kompatis kaj akceptis lin. La pastro neniam permesis al li forlasi lin, nek nokte nek tage, ĉu endome ĉu ekstere. Loftur multe resaniĝis, sed tamen la pastro ĉiam timis pro li. Precipe abomenis lin ke Loftur neniam volis preĝi kun li. Tamen Loftur akompanis la pastron, kiam li vizitis malsanulojn kaj tentitojn, kaj tiam ĉeestis. Tio ja ofte okazis, kaj tial la pastro neniam forlasis sian hejmon, sen kunpreni sian sutanon, panon kaj vinon, kalikon kaj patenon<sup>10</sup>. Tiel pasis la tempo ĝis la sabato antaŭ dimanĉo en mezfasto. Tiam Loftur estis malsana, kaj la pastro sidis antaŭ li sur la litrando enkuraĝiganta lin per edifaj paroloj. Je la naŭa horo en la mateno venis al li sciigo de lia amiko en la paroĥo, ke li

estas morte malsana kaj deziras, ke la pastro donu al li la lastan sakramenton por prepari al li pian forpason. La pastro nek povis nek volis rifuzi tion. Li demandis Loftur, ĉu li povos akompani lin, sed li diris ke li tute ne povas sin movi pro doloro kaj senforteco. La pastro diris ke tamen taŭgus por li, se li ne eliros el la domo dum li forestas. Tion Loftur promesis. La pastro benis lin kaj kisis lin, kaj ekster la pordo de la domo li genuenfalis kaj preĝis kaj faris la signon de la kruco antaŭ ĝi. Oni aŭdis lin diri per mallaŭta voĉo: „Nur Dio scias, ĉu oni povas savi tiun homon, aŭ ĉu ne kasiĝas pli fortaj preĝoj kontraŭ li ol miaj.“ La pastro trovis la homon, al kiu li estis venigita, donis al li ĉiun servon kaj ĉeestis lian lastan elspiron. Tuj poste li ekiris hejmen kaj rajdis tre rapidkure, kio tamen ne estis lia kutimo. Post la foriro de la pastro de sia hejmo, Loftur baldaŭ resaniĝis. La vetero estis belega kaj tial li antaŭ ĉio deziris eliri. Ĉiuj viroj estis for je fiŝkaptado, kaj ne aliaj hejme ol virinoj kaj junuloj, kiuj ne povis reteni lin. Loftur nun iris al proksima farmbieno. Tie loĝis maljuna farmisto, ne multe ŝatata, kiu jam forlasis la fiŝkaptadon. Loftur instigis lin surmarigi boateton, kiun li posedis, kaj elremi iomete ekster la marbordo kaj elĵeti ŝnuron por fiŝkapti por plezuro. La farmisto cedis al lia deziro. La tutan tagon la vetero estis tute kvieta, sed nenian sciigon pri la sorto de la boato oni iam ricevis, kaj estis strange, ke ne flosis al la bordo eĉ splito el remilo. Ŝajnis al viro sur la marbordo, ke griza vila manego elvenis el la maro, kiam la boato venis iomete for de la bordo, ekkaptis ĉirkaŭ la pruo kie Loftur sidis kaj tiris ĉion en la profundon.

1 Hólar: en Hjaltadalur. Episkopa sidejo por la norda parto de Islando 1106-1801, fama pro sia kleriga lernejo (seminario por pastroj) kaj presejo.

2 Tiuj antikvaj manĝvazoj estis farataj el ligno, laŭ speciala formo, kaj ofte arte eltranĉitaj. Ĉiu hejmano posedis sian propran vazon.

3 Muro konstruita el teraĵo, tre dika.

4 Grizfelo estas mita sorĉlibro, la bindaĵo el griza felo.

5 Sæmundur Sigfússon la multescia (1056-1133) estis altinstruita pastro kaj historisto.

6 Nigra-lernejo estas mita nomo de lernejo en Parizo, kie studis Sæmundur la multescia; ĝi estis senfenestra kelo, kie oni instruis nur nigran magion, kaj la lernejmastro estis la Diabolo mem.

7-9 Gottskálk Nikulásson la kruela (mortis 1520) episkopo en Hólar (1498-1520); laŭ la tradicio li verkis aŭ kompilis la sorĉlibron „Ruĝfelo“, kiun li kunprenis en la tombon.

10 Pateno=oblatujo.

*La tradukinto.*

*(Baldvin B. Skaffell, Norda Prismo, 3, 1956.)*

## La foka felo

### Islanda legendo

Antaŭ multe da jaroj vivis iu homo ĉe la marbordo ie en Islando. Iufoje li iris marborden frumatene, antaŭ ol aliaj homoj ellitiĝis. Li venis al la bordo kie estis tre roka. Tie li vidis grotan pordon. El interne li aŭdis bruegon de dancantaj homoj, kiuj estis tre gajaj. Ekster la pordo troviĝis multaj fokaj feloj. Li prenis unu el ili, kaj kiam li revenis hejmen, li metis la fokan felon en ian keston, ŝlosis la keston kaj konservis la ŝlosilon en unu el liaj poŝoj. Poste li reiris al la grota pordo. Tiam sidis tie juna kaj bela virino. Ŝi estis tute nuda kaj multege ploris. Estis ŝia foka felo, kiun la homo prenis ĉe la grota pordo kaj konservis en la kesto. La homo donis al la virino vestojn kaj iris kun ŝi al sia hejmo. Ŝi estiĝis al li tre intima, sed aliaj homoj ne multe plaĉis al ŝi. Ofte ŝi sidis kaj rigardadis al la maro. Pasis nelonga tempo antaŭ ol ili geedziĝis, ili ekhavis infanojn, kaj inter ili estis intima rilato. La fokan felon li ĉiam konservis en sia kesto kaj la ŝlosilon en sia poŝo.

Multajn jarojn poste li iris surmaren por fiŝkapti. Tiam li forgesis la ŝlosilon sub sia kapkuseno, kaj kiam li revenis hejmen, li trovis la keston malŝlositan, kaj lia edzino estis malaperinta kun la foka felo. Ŝi ne povis resisti la tenton, kiam ŝi trovis la fokan felon. Ŝi adiaŭis siajn infanojn, surmetis la fokan felon kaj saltis kapantaŭen en la maron. Onidire ŝi murmuris al si mem:

Mi timas je mia faro,  
sep infanojn mi havas en la maro  
kaj sep infanojn sur la tero.

Laŭ onidiro la homo tre malgajiĝis. Kiam li fiŝkaptis, ofte foko vagadis ĉirkaŭ lia boato, kaj ŝajnis, ke larmoj torentis el ĝiaj okuloj. Ekde tiam li estis tre bonŝanca je sia fiŝkaptado, kaj diversaj objektoj albordiĝis ĉe li. Ofte oni vidis, kiam liaj infanoj promenadis ĉe la marbordo, ke foko naĝis proksime en la maro, kaj al ili ĝi ĵetis diversajn kolorajn fiŝojn kaj belajn krustojn. Sed neniam ilia patrino revenis al la seka lando.

*(Guðmundur Frímannsson, Bulteno de Norda Stelo, Akureyri, nov. 1980.)*

## La preĝeja konstruisto de Reyn

Iam loĝis homo sur la bieno Reyn en Mýrdalur. Tie li devis konstrui preĝejon, sed havis malfacilon pri havigo de ligno. Estis proksima la falĉsezono, kaj ne estis havigitaj konstruistoj, tiel ke li timis, ĉu la preĝejo estos finita antaŭ la vintro. Iun tagon li ĉirkaŭvagis sur la bona kampo en nigra humoro. Tiam alvenis al li homo kaj proponis konstrui por li la preĝejon. Estis kondiĉite, ke la farmisto divenu lian nomon antaŭ la fino de la konstruado; se ne, la farmisto translasu al li sian solan filon, kiu estis en sia sesa jaro. Pri tio ili interkonsentis. La alveninto komencis sian laboron. Li koncernis sin pri nenio krom la konstruado kaj estis malmultvorta, kaj progresis la konstruado mirinde rapide, tiel ke la farmisto antaŭvidis ĝian finiĝon ĉirkaŭ la fino de la falĉsezono. Ekhavis la farmisto grandajn zorgojn, sed povis nenion fari. En la aŭtuno, kiam la preĝejo estis preskaŭ finkonstruita, la farmisto vagis ekster la bienan kampon. Li ekkuŝis sur la flanko de iu altaĵeto. Tiam li aŭdis kantadon el la altaĵo, kvazaŭ patrino kantumus al sia infano, kaj estis tiaj la vortoj:

Baldaŭ Finnur alportos,  
via patro de la ruz',  
knabeton por amuz'.

Ĉi tiun kanton li aŭdis fojon post fojo. La farmisto multe ĝojis kaj iris hejmen al la preĝejo. Tiam la konstruisto ĵus estis tajlinta la lastan tabulon por la altaro kaj volis ĝin alfiksi. La farmisto diris: „Vi jam finos, Finnur mia.“ Je tiuj vortoj la konstruisto estis tiom surprizita, ke li lasis fali la tabulon kaj malaperis. Post tiam li ne estis vidita tie.

*(Baldur Ragnarsson)*

## La knabo, kiu ne volis loĝi kun feoj

Nordlande, en la distrikto de Þingey, iam malaperis knabo iom pli ol trijara. Post unu semajno li estis trovita sub altaj rokoj proksimaj al la bieno. Estis tiam tri fingromarkoj sur lia vango. Sed kiam li estis demandita, kie li estis, li diris, ke li estis en tiu bieno kaj montris al loko, kie ŝajne estis nuraj rokoj. Li diris, ke tie loĝas feoj kaj ke ili volis lin sorĉi, sed li diris, ke li ne povis manĝi tie, ĉar la tuta manĝaĵo ŝajnis plena de vermoj. La feoj tiam konstatis, ke nenio estis farebla pri li, kaj maljuna virino kondukis

lin for kaj diris, ke li portadu signon pri tio, ke li loĝis kun feoj kaj frapis lian vangon kaj poste foriris. Post tio la knabo plenkreskis, bone edukiĝis kaj fariĝis rimarkinda farmisto. Iam, kiam li jam estis maljuna, li rajdis preter la rokojn, sub kiuj li estis trovita kaj faris tiam jenan strofon:

Ĉi tiujn rokojn ja konis mi,  
estante tiam juna.  
Pordojn mi vidis pli kaj pli  
kaj ŝrankojn belajn de iluzi’.

*(Baldur Ragnarsson)*

## „Ni trenu, kaj ni trenu“

Du feinoj iam iris al iu bieno por ŝanĝpreni infanon. Ili alvenis tien, kie estis la infano, kiun ili volis preni. Ĝi kuŝis en lulilo. Neniu estis proksima krom alia infano dujara. La pli juna feino kaj la malpli singarda iras tuj al la lulilo kaj diras:

Ni trenu, kaj ni trenu.

Tiam diras la malpli juna:

Ne eblas, ke ni prenu,  
signoj garde ĉirkaŭlitas,  
dujarul’ apude sidas  
kaj nin vidas.

Je tio ili foriris kaj povis nenion fari, kaj pro la krucosignoj faritaj super la lulilo kaj sub la infano antaŭ ol ĝi estis metita en la lulilon, kaj pro la dujara infano, kiu sidis apud la lulilo kaj poste rakontis pri la okazaĵo.

*(Baldur Ragnarsson)*

## Dekok-infana patro en feomondo

Okazis en iu bieno en somero, ke ĉiuj homoj estis sur la marĉfalĉejo krom la mastrino. Ŝi estis hejme kaj gardis la domon kaj sian filon, kiu estis en sia tria aŭ kvara jaro. Tiu knabo estis kreskinta kaj prosperinta ĝis tiu tempo. Sed ĉar la virino devis zorgi pri multaj domaj laboroj krom la knabo, ŝi devis forlasi lin por tempeto kaj iris al rivereto proksima al la biendomo por lavi la laktuojn. Ŝi lasis la infanon dume en la pordejo, kaj ne estas io dirinda pri ĝi ĝis la virino revenis post longeta tempo. Kiam ŝi

alparolas la infanon, ĝi kriaĉas pli ŝire kaj malŝatinde ol ŝi atendis, ĉar antaŭe ĝi kondutis ĉiam bone kaj milde. Sed nun ĝi eligas nur hurlojn kaj malbelajn kriojn. Nun pasas kelka tempo tiel, ke la infano ne diras eĉ unu vorton, sed estis tiel plendaĉema kaj misagema, ke la virino ne sciis, kion fari kontraŭ tiu ŝanĝiĝo de maniero. Ĝi ankaŭ ne kreskas kaj kondutas tre stulte. La virino havis grandajn zorgojn pro tio kaj decidis konsulti sian najbarinon, kiu laŭdire estis saĝa kaj multescia, kaj rakontas al ŝi pri la sortofrapo, kiu ŝin frapis. La najbarino demandas ŝin detale, kiom longe pasis de kiam la infano estis kaptita de tiu absurdo, kaj kiel okazis tio laŭ ŝia opinio. La patrino de la knabo rakontis al ŝi ĉion, kio okazis. Kiam la multescia najbarino jam aŭdis ĉiujn flankojn de la afero, ŝi diras: „Ĉu vi ne kredas, bonulino mia, ke la knabo estas ŝanĝito? Ĉar mia penso estas, ke okazis al li ŝanĝopreno, dum vi estis for, lasinte lin en la pordejo.“ „Mi ne scias,“ diras la alia, „aŭ ĉu vi povas konsili min por tion eltrovi?“ „Tion mi ja povas fari,“ diras la virino. „Forlasu je okazo la infanon sola, kaj okazigu al ĝi ion eksterordinaran, kaj tiam ĝi diros ion, vidante neniun ĉirkaŭe. Sed vi subaŭskultu kaj provu kapti kion ĝi diras. Se vi trovos la dirojn de la knabo strangaj kaj suspektindaj, tiam batu lin senindulge ĝis io okazos.“

Tion kunparolinte ili disiĝis, kaj dankis la patrino de la knabo al sia najbarino pro la konsilo kaj iris hejmen. Hejmenveninte ŝi metis malgrandan poton tenilhavan meze sur la plankon de la kuirejo. Poste ŝi prenis multajn stangetojn, kunligis ilin ĉiujn ĉe la finoj, tiel ke la supro atingis ĝis la funelo de la kuirejo, sed ĉe la malsupro ŝi alligis la kirlilon kaj lasis ĝin en la poton. Poste ŝi alkondukis la knabon kaj lasis lin sola. Ŝi eliris el la kuirejo kaj haltis ekstere por subaŭskulti tiel ke ŝi povis vidi tra la duonfermita pordo en la kuirejon. Baldaŭ post ŝia eliro ŝi vidas ke la infano komencas paŝeti ĉirkaŭ la poton kaj esplori ĝin kaj la kirlilon kaj poste ĝi diras „Maljuna mi estas kiel pruvas mia barbo, dekok-infana patro el feomondo, kaj neniam mi vidis tiome longan stangon en tiel malgranda pot.“ Nun la virino reeniras la kuirejon portante grandan faskon, kaptas la ŝanĝiton kaj draŝas lin longe kaj senindulge. Li tiam krias terure. Kiam la virino jam batis la knabon dum kelka tempo, ŝi vidas, ke fremda virino eniras la kuirejon portante knabeton surbrake, sanaspektan kaj belan. Ŝi lin karesis kaj diras al la virino: „Ni ja faras diference. Mi karesas vian infanon, sed vi draŝas mian edzon.“ Tion dirinte, ŝi demetas la knabeton, la filon de la mastrino, kaj lasas lin tie, sed

kunprenas sian edzon kaj malaperis ili tuj. Sed la knabo plenkreskis ĉe sia patrino kaj fariĝis rimarkinda homo.

*(Baldur Ragnarsson)*

## La rakonto pri Lanvolvulo

### Islanda popolrakonto

Estis iam reĝo kaj reĝino en ilia regno. Ili havis unu filinon, kiu nomiĝis Ingibjörg. Estis ankaŭ viro kaj virino en ĝardenangulo. Ili havis unu filon, kiu nomiĝis Lanvolvulo.

La reĝo amegis sian filinon kaj opiniis, ke neniu homo ekzistus, kiu estus konvena edzo por ŝi. Kaj por timigi ĉiujn, kiuj eble volus svati ŝin, li anoncis, ke li donos sian filinon al neniu escepte tiu, kiu povus plenigi felsakon per vortoj.

La filo en ĝardenangulo aŭdis same kiel aliaj la anoncon de la reĝo. Iufoje li iras al la virino, sia patrino, kaj petas, ke ŝi pruntedonu al li siajn tondilon kaj kudrilon. Ŝi demandas, kion li intencas fari per ili. Li diras, ke li volas porti ilin en la reĝopalacon kaj ekscii, ĉu la reĝino kaj la reĝidino volus ekposedi ilin. La virino ridetas al sia filo kaj donas al li la ilojn. Poste li venas al sia patro kaj petas, ke li pruntedonu al li sian hakilon. La patro demandas, kion li intencas fari per ĝi. Li diras, ke li intencas porti ĝin al la reĝo. La patro donas la hakilon al sia filo.

Lanvolvulo iras nun al la reĝa restadejo kaj venas al la kastelo de la reĝidino kaj vidas, ke ŝi kudras. Li rigardas ŝin iom da tempo ĝis li diras: „Mia patrino ne kudras tiamaniere.“ „Kiamaniere do via patrino kudras?“ ŝi diras. „Ŝi apudmetas la kudrilon, kaj tiam ĝi kudras per si mem,“ li diras. „Kompatinda bubo, havigu al mi tian kudrilon,“ ŝi diras. „Kiom mi ricevos rekompence?“ li diras. „Kion vi deziras?“ ŝi demandas. „Dormi kune kun vi,“ li diras. „Foriru do,“ ŝi diras. „Nu, mi mem havos mian kudrilon, mi ne ŝatas transdoni ĝin,“ Lanvolvulo diras. „Ne malfrue kaj malbone,“ ŝi diras, „venu do ĉi tien.“ Tiam li donis al ŝi la kudrilon.

Poste li iras tien, kie la reĝino altranĉas veston. „Mia patrino ne altranĉas tiamaniere,“ li diras. „Kiamaniere ŝi altranĉas?“ diras la reĝino. „Ŝi surmetas la tondilon, kaj tiam ĝi altranĉas per si mem.“ „Kompatinda bubo, havigu al mi tian



tondilon,“ la reĝino diras. „Kiom mi ricevos rekompence?“ Lanvolvulo diras. „Tiom kiom vi postulas,“ la reĝino respondas. Li diras, ke li nenion volas escepte dormi kune kun ŝi. Ŝi diras, ke ŝi tion neniam permesos. „Mi mem havos mian tondilon,“ li diras, „mi neniel emas transdoni ĝin.“ „Ne malfrue kaj malbone,“ diras la reĝino. „Neniu ekscios, kvankam mi tion permesas al vi, via bubaĉo.“ Tiam li donis al ŝi la tondilon.

Poste li iras tien, kie la reĝo dehakas arbojn. Li rigardas la reĝon iom da tempo, ĝis li diras: „Mia patro ne hakas tiamaniere.“ „Kiamaniere li do hakas?“ la reĝo diras. „Li apudmetas la hakilon, kaj ĝi hakas per si mem,“ Lanvolvulo diras. „Havigu al mi tian hakilon,“ la reĝo diras. „Kiom mi do ricevos rekompence?“ diras la alia. „Diru al mi, kiom vi postulas,“ la reĝo diras. „Mi nur volas, ke vi deprenu la kronon kaj kisu min sur la nudan postaĵon,“ Lanvolvulo diras. „Tion mi ne povas fari,“ la reĝo diras. „Nun, tio ne estas pro mi farata,“ la alia diras. „Mi mem havos mian hakilon.“ Kaj li ŝajnis foriron de la reĝo. Tiam la reĝo alparolas lin kaj diras: „Aŭdu bubo, mi ja estas egale bona, kvankam mi farus tion, kion vi diris, se vi poste donos al mi la hakilon. Ni du estas nur ĉi tie, kaj neniu ekscios tion.“ Tiam la reĝo faras tion, kaj la bubo donas al li la hakilon.

Poste li iras hejmen en ĝardenangulo kaj rakontas al siaj parencoj ĉion kio okazis. Li petas, ke ili iru kun li la venontan tagon en la reĝan palacon, kaj li enbuŝigis al ili vortojn, kiujn ili devus diri al li, kiam ili estos venintaj tien, sed li respondus laŭvole. En la venonta tago ili tri iras al la reĝa restadejo, kaj kiam la tuta kortego estas enveninta en la palacon kaj sidas tie ĉetabele, ili tien envenas. Ili staras silentaj iom da tempo en la antaŭa parto de la ĉambrego ĝis la patrino de Lanvolvulo ekparolas kaj diras: „Lanvolvulo, mia filo, kiel vi liveris mian kudrilon?“ „Jen mi metas vortojn en felsakon. Mi donacis ĝin al la reĝidino,“ li diras. „Kaj kion ŝi donis al vi rekompence?“ la patrino diras. „Jen mi metas vortojn en felsakon. Mi kuŝis kune kun ŝi,“ li diras. „Sed kiel vi liveris mian tondilon?“ ŝi diras. „Jen mi metas vortojn en felsakon. Mi donacis ĝin al la reĝino.“ „Kion ŝi donis al vi rekompence?“ la patrino diras. „Jen mi metas vortojn en felsakon. Mi kuŝis kune kun ŝi,“ li diras. Tion aŭdi la reĝo trovas malbone, sed la reĝino kaj reĝidino sidis ruĝvangaj pro honto.

„Lanvolvulo, mia filo,“ diras la patro. „Kiel vi liveris mian hakilon?“ „Jen mi metas vortojn en felsakon. Mi donis ĝin al la reĝo,“ Lanvolvulo diras. „Kaj kion li donis

al vi rekompence?“ „Jen mi metas vortojn en felsakon. Li deprenis la kronon kaj. . . “  
„Huŝ, huŝ, la felsako estas plena, la felsako estas plenplena,“ la reĝo diras. Kaj kvankam li estis indigna kontraŭ Lanvolvulo, li ekpensas, ke la sola rimedo estas edzinigi sian filinon kun li, ĉar tiel hontinde ŝi estis aginta, sed la bubo ŝajnis esti nestulta. La reĝo ankaŭ ekpensas, ke li efektive ne povus esti severa kontraŭ siaj edzino kaj filino, ĉar li mem agis hontinde, kio preskaŭ famiĝis.

La reĝo nun prenas Lanvolvulon en sian hejmon kaj instruas lin, kaj kvankam li unue estis severa kontraŭ li, tio tamen ne daŭris longe, ĉar Lanvolvulo baldaŭ fariĝis lia amiko pro siaj inteligenteco kaj obeemo kune kun pli multaj virtoj.

Poste la reĝidino fariĝis edzino de Lanvolvulo, kaj tiam li ricevis duonon de la regno dum la reĝo vivis kaj ĝin tutan post lia morto. Sed la geviroj en ĝardenangulo havis abundecon kaj restis tie kontentaj dum ili vivis.

*(Stefán Sigurðsson)*

## Senkornulino

### (Búkolla)

Iufoje loĝis viro kaj virino en sia bieneto. Ili havis unu filon kiun ili tute ne amis. Ne estis aliaj en la bieneto. La viro kaj la virino havis unu bovinon. Estis la tuta brutaro. La bovino nomiĝis Senkornulino. Iufoje la bovino naskis idon kaj la virino mem prizorgis ŝin. Sed kiam la bovino estis naskinta kaj resaniĝinta la virino kuris en la domon. Post nelonga tempo ŝi revenis por prizorgi la bovinon. Sed tiam ŝi estis malaperinta. Nun ili ambaŭ, la viro kaj la virino, serĉas la bovinon kaj serĉadis longe kaj multloke sed vane kaj revenis hejmen. Ili tiam koleriĝis kaj ordonis la knabon foriri kaj ne reveni antaŭ siaj okuloj sen la bovino. Poste ili provizis la knabon kun nutraĵo kaj novaj ŝuoj kaj nun li ekiris ien en la venton.

Li longe iradis ĝis li sidiĝis kaj ekmanĝis. Tiam li diras: „Muĝu nun mia Senkornulino se vi ie estas vivanta.“ Tiam li aŭdas la bovinon muĝi tre malproksime. La knabo ankoraŭ longe iras, iradas. Tiam li denove eksidas por manĝi kaj diras: „Muĝu nun mia Senkornulino se vi ie estas vivanta.“ Tiam li aŭdas Senkornulinon muĝi iomete pli proksime ol antaŭe. Ankoraŭ la knabo longe iras, iradas, ĝis li venas sur ekstremo de

altega rokaro. Tie li eksidas por manĝi kaj diras: „Muĝu nun mia Senkornulino se vi ie estas vivanta.“ Tiam li aŭdas la bovinon muĝi sub siaj piedoj. Tiam li grimpas malsupren la rokaron kaj en ĝi li vidas groton tre grandan. Li eniras en la groton kaj tie li ekvidas Senkornulinon ligitan sur iu stala apartaĵo. Li tuj malligas ŝin kaj ŝin elkondukas kaj ekhejmeniras.

Kiam li jam iradis iun distancon, li vidas kie venas grandega gigantino post li kaj alia malpli granda kun ŝi. Li vidas ke la gigantinego tiel paŝegas ke ŝi tuj kaptos lin. Tiam li diras: „Kion ni faru nun, mia Senkornulino?“ Ŝi diras: „Prenu haron el vosto mia kaj kuŝigu ĝin sur la teron.“ Tion li faras. Tiam la bovino diras al la haro: „Mi sorĉdecidas ke vi transformiĝu je tiel grandega rivero ke neniu povos ĝin transiri escepte birdofluganta.“ Sammomente la haro transformiĝis je grandega rivero. Kiam la gigantino alvenis la riveregon ŝi diras: „Tiu ne utilu al vi, knabo. Rapidu hejmen, knabino,“ ŝi diras al la malpli granda gigantino, „kaj venigu la grandan bovon de mia patro.“ La knabino ekiras kaj revenas kun grandega bovo. La bovo tuj komplete eltrinkis la tutan riveregon. Tiam la knabo vidas ke la gigantino tuj kaptos lin ĉar ŝi estis tiel grandpaŝa. Tiam li diras: „Kion ni faru nun, mia Senkornulino?“ „Deprenu haron el vosto mia kaj ĝin kuŝigu sur la teron,“ ŝi diras. Tion li faras. Tiam Senkornulino diras al la haro: „Mi sorĉdecidas ke vi transformiĝu je tiel grandega fajro ke neniu povas ĝin transiri escepte birdofluganta.“ Kaj sammomente la haro transformiĝis je fajrego. Kiam la gigantino venis al la fajrego ŝi diras: „Tio ne utilu al vi, knabo. Kuru kaj venigu la grandan bovon de mia patro, knabino,“ ŝi diras al la malpli granda gigantino. Ŝi ekiras kaj revenas kun la bovo. Sed tiam la bovo pisegis la tutan akvon kiun ĝi antaŭe trinkis el la riverego kaj estingis la fajregon. Nun la knabo vidas ke la gigantino tre baldaŭ kaptos lin ĉar ŝi tiel grandpaŝa estis. Tiam li diras: „Kion ni faru nun, mia Senkornulino?“ „Deprenu haron el vosto mia kaj ĝin kuŝigu sur la teron,“ ŝi diras. Poste ŝi diras al la haro: „Mi sorĉdecidas ke vi transformiĝu je tiel grandega monto ke neniu povas transiri ĝin escepte birdofluganta.“ Tiam la haro transformiĝis je tiel alta monto ke la knabo nenion vidis escepte la klaran ĉielon. Kiam la gigantino alvenas la monton ŝi diras: „Tio ne utilu al vi, knabo. Venigu la grandan borilon de mia patro, knabino,“ ŝi diras al la malpli granda gigantino. La knabino ekiras kaj revenas kun la borilo. Tiam la gigantino boras truon tra la monto sed tro malpacienca kaj kiam ŝi travidis la monton sin

prempuŝis en la truon, sed ĝi estis tro mallarĝa kaj tial ŝi fiksiĝis en ĝi kaj fine ŝi ŝtoniĝis en la truon kaj tie ŝi ankoraŭ restas. Sed la knabo atingis sian hejmon kun sia Senkornulino kaj liaj gepatroj estis tre kontentaj.

*(Tradukita de la esperanto grupo en Laugarvatn je la vintro 1988-89; La Tradukisto, 2, 1989.)*

## La talera bareleto

### (Dalakúturinn)

Iufoje multaj homoj estis en vojaĝo. Ili starigis tendon je dimanĉa mateno sur bela kampo verda. Vetero estis hela kaj bela. La vojaĝantoj kuŝiĝis por dormi kaj kuŝis vice en la tendo. Tiu, kiu plej antaŭe kuŝis ĉe la pordo de l' tendo, ne povis ekdormi, kaj li rigardis tien kaj reen en la tendo. Tiam li vidis bluetan fumflokon super la viro, kiu plej interne kuŝis. La fumfloko glitis antaŭen laŭ la tendo kaj eksteren. La viro volis scii, kio ĉi tio povas esti kaj iris post la fumo. Ĝi glitis malrapide trans la kampon kaj fine alvenis tien, kie kuŝis nuda kaj malnova ĉevalkranio. Ĝi estis plena da viandmuŝoj, kaj ili zumis ege. La fumo glitis en la ĉevalkranion. Post sufiĉa tempo ĝi reeliris. Ĝi glitis tiam denove trans la kampon, ĝis venis ĝi al malgranda rivereto, kiu fluis tra la kampo. Ĝi iris malsupren laŭ la rivereto, kaj ŝajnis al la viro ke ĝi klopodas transiri ĝin. La viro tenis sian vipon kaj metis ĝin sur la rivereton, ĉar ĝi ne estis pli larĝa ol tiel, ke la tenilo atingis trans ĝin. La fumfloko tiam iris sur la viptenilon kaj glitis laŭ ĝi trans la rivereton. Poste ĝi glitis antaŭen en daŭro de kelka tempo kaj fine alvenis iun altaĵeton sur la kampo. Tie la fumo malaperis en la altaĵeton. La viro staris en mallonga distanco kaj atendis tion, ke la fumo revenu. Ĝi ankaŭ baldaŭ venis. Glitis ĝi tiam per la sama vojo returnen, laŭ kiu ĝi alvenis. La viro metis sian vipon trans la rivereton, kaj la fumo laŭiris ĝin kiel antaŭe. Nun ĝi iris rekte hejmen al la tendo kaj ne haltis antaŭ ol ĝi venis super la plej internan viron en la tendo. Tie ĝi malaperis. Tiam la viro kuŝiĝis kaj ekdormis.

Malfrue je la tago la vojaĝantoj leviĝis kaj prenis siajn ĉevalojn. Ili interbabilis multe dum ili sin pretigis. Inter alie diris tiu, kiu kuŝis plej interne en la tendo: „Mi volas, ke mi posedu tion, kion mi songis hodiaŭ.“

„Kio estis tio, kaj kion vi songîs?“ diris tiu, kiu vidis la fumon.

La alia diris: „Al mi ŝajnis, ke mi iris tie ĉi laŭ la kampo. Tiam mi venis al iu domo bela kaj granda. Tie estis amaso da homoj kunvenintaj, kaj ili kantadis kaj ludadis kun la tute pleja gajeco kaj ĝojo. Mi restis treege longe en la domo. Sed kiam mi elvenis mi iris longe laŭ ebenaj kampoj kaj belaj. Tiam mi alvenis iun grandan riveregon, kiun mi longe klopodis transiri, sed ne povis. Tiam mi vidis, kie venis terure granda giganto. Li portis grandegan arbon en la mano, kiun li metis trans la riveregon, kaj mi transiris laŭ ĝi. Mi iris ankoraŭ longe, longe, ĝis mi venis al granda altaĵo. La altaĵo estis malfermita, kaj do mi eniris ĝin. Tie mi nenion trovis krom granda barelo plena da mono. Tie mi restis sufiĉe longe rigardante la monon, ĉar tian amason mi neniam antaŭe vidis. Poste mi eliris kaj paŝis saman vojon returnen, laŭ kiu mi alvenis. Mi venis al la riverego, kaj tiam la giganto alvenis kun la arbo kaj ĝin metis trans ĝin. Do mi povis transiĝi laŭ la arbo kaj tiam reiris hejmen en la tendon.

La viro, kiu sekvis la fumon, ekgajiĝis kun si mem kaj diris al la viro, kiu songîs: „Venu, kamarado, ni tuj alportu la monon.“ La alia ekridis kaj pensis, ke li ne estas bonorda en la kapo, sed tamen iris. Ili nun marŝas laŭ la sama vojo, kiun la fumo iris. Alvenis ili la altaĵeton kaj disfosis ĝin. Tie ili trovis bareleton plenan da mono. Poste iri reiris al siaj kamaradoj kaj rakontis al ili la tutan historion pri la songîo kaj la fumo kaj montris al ili la taleran bareleton.

*(Þórbergur Þórðarson; La Tradukisto, 10, 1992.)*

## Deveno de Drangey<sup>1</sup>

En antaŭaj tagoj loĝis en Hegrane<sup>2</sup> du noktogigantoj. Estis viro kaj virino. Ne ekzistas multaj rakontoj pri ili antaŭ tiu ĉi. Iufoje ilia bovino iĝis bovavida. Ĉu ili ne povis sendi aliajn ĉu pro tio ke ili plej bone fidis al si mem ili forkondukis la bovinon antaŭ ol ĝi perdu la seksardan periodon. La viro bridtrenis ĝin sed la virino pelis kiel kutimas. Ili nun kondukis la bovinon norden laŭ Hegrane kaj ioman distancon en Skagafjordon. Kiam ankoraŭ restis konsiderinda vojo por esti en la mezo de la fjordo ili subite vidis la aŭronon en la intermontoj oriente de la fjordo kaj super la montpintoj. Ĉar kaŭzas tujan morton de noktogigantoj se la tago lumas en iliaj okuloj ili ne toleris la

taglumon kaj transiĝis en du rokoj kiuj nun staras, unu norde de Drangey, estas la viro, alia sude de Drangey, estas la virino. Post tiu evento kaj ankoraŭ nun tiuj rokoj estas nomataj Viro kaj Virino.<sup>3</sup> Sed el la bovino formiĝis la insulo mem kaj malgraŭ ne estas menciite ke la bovino dum la irado de la viro kaj virino jam bovrilatis ĝi tamen ĉiuprintempe iĝas por Skagafjordanoj laktodona bovino.<sup>4</sup>

Estas pramalnova kutimo kiu ankoraŭ ekzistas ke ĉiuj, kiuj unuan fojon vojaĝas al Drangey en la printempo, salutas ĝin kaj ankaŭ la Virinon kaj la Viron. La estro en ĉiu ŝipo komencas kaj diras: „Sanon kaj feliĉon (aŭ prospera estu) mia Drangey kaj ĉiuj viaj akompanantoj; sanon kaj feliĉon al vi mia Virino kaj ĉiuj viaj akompanantoj; saluton al vi mia Viro kaj ĉiuj viaj akompanantoj.“ Poste ĉiuj ŝipanoj eldiras la saman frazon. Kvankam kredeble oni faras tion pli por amuzo ol seriozeco oni opinias ke tia tradicio estas restaĵo de la malnova kredo al la nimfoj de Drangey kaj tiu tradicio daŭris tra la jarcentoj.<sup>5</sup>

<sup>1</sup> Drangey estas roka insulo kiu situas meze de Skagafjordo en norda parto de Islando.

<sup>2</sup> Hegrans estas duoninsulo kiu etendas eksteren de Skagafjordo de sudo.

<sup>3</sup> La Viro falis en la maron en granda tertremo kiu okazis je la jaro 1755.

<sup>4</sup> Ĉiuprintempe Skagafjordanoj tie kolektas ovojn de la marbirdoj kiuj estas multnombraj en la rokaro de la insulo.

<sup>5</sup> Nun tiu ĉi tradicio ne daŭras plu.

*(Kristján Eiríksson; La Tradukisto, 10, 1992.)*

## La fratoj de Bakki

(Bakkabræður)

### Nia patro vokas la bareleton

Sur tiu farmo, kiu nomiĝas Bakki en Svarfaðardalur, loĝis iu farmisto antaŭ longa tempo. Li havis tri filojn, Gísli, Eiríkur kaj Helgi. Ili estis disfamaj pro sia stulteco kaj estas multaj rakontoj pri iliaj stultaĵoj, sed nur malmultaj el ili estas ĉi tie rakontataj. Iam, kiam estis plenkreskintaj la fratoj, ili iris fiŝkapti kun sia patro. Tiam la maljunulo subite malsaniĝis kaj kuŝiĝis en la boato. Ili estis preninta kun si bareleton kun selakto kaj vokis la maljunulo post kelka tempo al siaj filoj, petante la bareleton, ĉar li volis trinki. Tiam diris unu el ili: „Gísli-Eiríkur-Helgi,“ ĉar tiel ili kutimis diri kiam iu el ili

parolis al la ceteraj, ĉar ili sciis nur tion, ke tiuj estas la nomoj de ili ĉiuj, „nia patro vokas la bareleton.“ Tiam diras la dua: „Gísli-Eiríkur-Helgi, nia patro vokas la bareleton.“

La samon faris la tria, kaj tion ili ripetadis ĝis kiam forpasis la patro, ĉar neniu el ili komprenis, por kio bezonis li la bareleton. Post tio la vortoturno „voki la bareleton“ signifas morti. Post tio okazo la fratoj remis alborden, preparis la kadavron de la patro kaj alligis ĝin sur brunan ĉevalinon, kiun posedis la patro, ekpelis ĝin survojen, dirante ke la maljuna Brunjo ja scias la vojon. Iom poste ili trovis Brunjon senŝarĝa kaj senbridila sur kampo, kaj tial konkludis, ke ĝi ja estis trovinta la ĝustan vojon, sed neniom ili klopodis eltrovi, kie Brunjo senigis sin de sia ŝarĝo.

### **„Kaŭri, Kaŭri“**

La fratoj loĝis sur la farmo Bakki post la morto de sia patro kaj estis alnomitaj laŭ la farmo aŭ la fratoj de Bakki aŭ la stultuloj de Bakki. Ili heredis de sia patro la ĉevalinon Brunjo kaj klopodis ĉiamaniere ĝin prizorgi. Iam, kiam fortege ventis, ili timis, ke Brunjo estos forblovita. Ili tiam ĝin ŝarĝis kaj ĉirkaŭbaris per tiom da ŝtonoj, kiom eblis. Post tio ĝi nek forbloviĝis nek ekstaris iam denove.

Dum la fratoj de Bakki ankoraŭ posedis Brunjon ili estis iam survoje sur glacio vintre. Unu el ili rajdis sur la ĉevalino, sed la ceteraj piediris akompane. Ili rimarkis, ke nekonata homo ĉiam rajdis flanke de la rajdanto. Sed tion ili trovis la plej stranga, ke tiu neniom parolis krom tio, ke ŝajnis al ili ke li diras je ĉiu paŝo de la ĉevalino: „Kaŭri, Kaŭri.“ Tion ili opiniis des pli stranga, ĉar ili sciis, ke neniu el ili portis tiun nomon. Tiam la rajdanto volis plirapidigi la rajdpaŝadon kaj postlasi tiun ulon. Sed ju pli rapide li rajdis, des pli ofte li aŭdis la diron: „Kaŭri, Kaŭri,“ kaj la ceteraj fratoj vidis, ke tiu nekonata akompananto ĉiam rajdis flanke de la rajdanto, egale ĉu li rajdas malrapide aŭ rapide. Fine ili atingis hejmen kaj vidis, ke kiam deĉevaliĝis la frato, tiam ankaŭ deĉevaliĝis la nekonato kaj enmetis la ĉevalon en la ĉevalejon samtempe kiel ili. Sed li tute malaperis, kiam ili eniris el la lunlumo.

Se iu el la fratoj devis iri iuloken, ili ĉiam iris ĉiuj kune. Iam la fratoj devis fari longan vojaĝon, daŭrontan ĉirkaŭ tri tagojn. Kiam ili estis irintaj du trionojn de la vojo,

ili ekmemoris, ke ili intencis deprunti ĉevalon por la vojaĝo. Ili tiam retroiris, ricevis la ĉevalon kaj ekiris denove sian vojon.

### **La fundo restas en Borgarfjordo**

La fratoj de Bakki aĉetis iam barelegon tie sude en Borgarfjordo kaj ĝin dispartigis por plifaciligi ĝian transporton. Hejmenveninte, ili rekunmetis la barelon kaj komencis kolekti en ĝin provizojn. Sed la ujego emis liki. Tiam la fratoj volis ekzameni, kio kaŭzas la likon. Diris tiam unu el ili:

„Gísli-Eiríkur-Helgi, ne mirindas, ke likas la barelo, la fundo restas en Borgarfjordo.“

Post tio oni uzas tiun diron kiel proverbon: „Ne mirindas, ke likas la barelo.“

### **La fratoj de Bakki konstruas por si domon**

La fratoj de Bakki estis rimarkintaj, ke la vetero estas pli malvarma en la vintro ol en la somero, kaj ankaŭ tion, ke ju pli multaj kaj grandaj estas la fenestroj, des pli malvarmaj la domoj estas. Ili tial konkludis, ke la frostoj kaj malvarmego devenas el tio, ke domoj havas fenestrojn. Ili tiel entreprenis konstruon de domo tute noveca tiel, ke ili ne almetis fenestrojn, kio kompreneble kaŭzis absolutan mallumon interne.

Ili ja vidis, ke jen estis ioma manko, sed konsolis sin per tio, ke en la vintro la domo certe estos varma, kaj ankaŭ opiniis, ke tiu manko estas korektebla iumaniere.

Ili do unu belan tagon, kiam brilegis la suno en la mezo de la somero, prenis sur sin elporti la mallumon el la domo per siaj ĉapoj, iuj diras per trogoj, elverŝis el ili la mallumon kaj reportis sunbrilon per ili en la domon kaj antaŭĝojis poste ĝui lumon interne. Sed kiam ili faris paŭzon en la laboro vespere kaj volis komforte ripozi en la domo, ili konstatis ke la mallumo neniom malpliis ol antaŭe.

### **Kiam la fratoj de Bakki konfuzis siajn piedojn**

Iu diris al la fratoj de Bakki, ke estas tre sanfortige por la piedoj lavi ilin de tempo al tempo per varma akvo. Sed ĉar kutime mankis al ili ligno por fari fajron, ili domaĝis hejti akvon por tio.



Iam tiel okazis, ke ili trovis varman fonton survoje. Ili do laŭdis sian bonŝancon, ke nun ili povos lavi siajn piedojn senkoste, deprenis la ŝuojn kaj la ŝtrumpojn kaj sidigis sin unu apud la alia ĉirkaŭ la fonto, tenante la piedojn en la varma akvo.

Kiam poste ili atentis, neniue el ili povis distingi siajn proprajn piedojn de la aliaj. Senkonsilaj ili trovis sin longe en tiu stato. Ili ne kuraĝis movi sin, ĉar ili timis, ke ili alprenos la piedojn de alia, tial ili plue sidadis, ĝis alvenis iu vojaĝanto. Ili alvokis lin petante ke li helpu al ili trovi siajn piedojn. La homo alpaŝis kaj frapis iliajn piedojn per sia bastono kaj tiam ĉiu el ili rekonis la siajn.

### **„Lasu nin je la paco de Dio“**

Kiel okazis de tempo al tempo la fratoj iufoje iris por transdoni la lupagon por la farmo Bakki al la posedanto. Estis vidvino, kiu posedis la farmon. Ili pagis al ŝi la ŝuldon kaj tranoktis tie. Matene ili ekiris hejmen, havante antaŭ si longan vojon por iri. Atinginte je duono de la vojo, ekparolas unu el ili, dirante:

„Gísli-Eiríkur-Helgi, mi memoras nun, ke ni ne petis la virinon lasi nin je la paco de Dio.“

La ceteraj konsentis, ke li pravas. Ili do retroiris al la vidvino, alvokis ŝin al la pordo kaj diris: „Lasu nin je la paco de Dio.“ Post tio ili denove ekiris hejmen. Sed kiam laŭdire ili estis irintaj duonon de la vojo, ili ekmemoris ke ili ne dankis al la virino pro la tranoktigo kaj por ke neniue priridu ilin pro tio, ili retroiris denove, renkontis la vidvinon, dankis al ŝi elkore pro la tranoktigo kaj poste hejmeniris.

### **Gísli perdas la kapon**

Iam la fratoj de Bakki iris por kolekti lignon sur kruta deklivo de monto. Ili elŝiris arbitaĵojn kaj kunligis ilin en faskojn, kiujn ili volis ruli malsupren. Tiam ili ekpensis, ke ili povos nek kontroli la farton de la faskoj dum la malsupren-ruliĝo, nek ilian postan lokiĝon malsupre de la deklivo.

Ili tiam eltrovis la rimedon enligi unu el la fratoj en unu el la faskoj, kaj gard-  
atentu li la faskojn dum la ruliĝo. Ili do prenis la fraton Gísli, enligis lin en unu el la faskoj, lasante la kapon elstari. Sed kiam Eiríkur kaj Helgi estis venintaj malsupren, ili

iris atenti pri sia frato, kaj mankis tiam al li la kapo, tiel ke li ne povis diri al ili, kiel fartis la faskoj dumvoje, nek kien ili lokiĝis.

Kvankam la fratoj Eiríkur kaj Helgi restis nur du, ili ĉiam diris kiel antaŭe, kiam unu parolis al la alia: „Gísli-Eiríkur-Helgi.“

### **La militŝipo sur la ĉielo**

Tion lastan ni aŭdis pri la fratoj Eiríkur kaj Helgi, ke ili vidis plenan lunon leviĝi el la maro kaj neniel povis kompreni, kio ĝi estas. Ili do iris al proksima farmbieno kaj demandis al la farmisto, kio estas tiu terura besto. La homo diris al ili, ke militŝipo ĝi estas. Tiu informo timigis ilin tiom, ke ili enkuris la bovinejon kaj kovris kaj la pordon kaj la fenestron por bari aliron de ĉia lumo, kaj estas dirite, ke ili tie malsatis ĝis morto de timo pro la militŝipo.

*(Baldur Ragnarsson, La Tradukisto, 13, 1993.)*

### **La rakonto pri Helga kaj ŝiaj fratinoj**

Iam loĝis viro kaj virino en sia bieneto. Ili havis tri filinojn. La unua nomiĝis Signy, la dua Vigny sed la tria Helga. Ŝi ĉiam estis en la cindrejo kaj oni ne permesis al ŝi esti kie ŝiaj fratinoj restis.

Iufoje okazis al ilia patrino ke la fajro estingiĝis kaj ŝi petas sian filinon, Signyn, ekiri por havigi fajron. Ŝi ekiras kaj nenio estas pri ŝia vojaĝo priparolinda antaŭ ol ŝi venas tien kie virino bakas panon. Tiam diras Signy:

„Baku panon virino,  
baku ŝi malbone,  
tiam ĉio al ŝi malprosperadu,  
– kaj ekhavi fajron mi volas.“

Tiam respondas la virino:

„La fajron vi ne ekhavos,  
sed iĝu unu okulo via  
kiel la plej granda pano mia,  
– kaj marŝu, marŝadu.“

Nun ekiras Signy kaj venas tien kie virino faras teksaĵon. Tiam diras ŝi:

„Teksu teksaĵon virino,

teksu ŝi malbone,  
tiam ĉio al ŝi malprosperadu,  
– kaj ekhavi fajron mi volas.“

La virino respondas:

„La fajron vi neniam ekhavos,  
sed iĝu nazo via  
kiel naveta tenilo mia,  
– kaj marŝu, marŝadu.“

Nun ekiras Signy kaj marŝas ĝis kiam ŝi venas tien kie virino faras kudradon.

Tiam diras ŝi:

„Kudru kudron virino,  
kudru ŝi malbone,  
tiam ĉio al ŝi malprosperadu,  
– kaj ekhavi fajron mi volas.“

Tiam diras la virino:

„La fajron vi neniam ekhavos,  
sed iĝu alia okulo via  
kiel la plej malgranda kudriltrueto mia  
– kaj iru hejmen.“

Signy nun ekiras hejmen, kaj nenio estas pri ŝia vojaĝo priparolinda antaŭ ol ŝi hejmen venas; ŝiaj gepatroj ektimis kiam ili vidis kiel ilia filino estis ŝanĝita ĉar ĉio iĝis kiel la virinoj diris.

Vivi sen fajro en la bieneto estis maleble kaj Vigny estis sendita por havigi fajron sed ĉio okazis same al ŝi.

Nun iras Helga al siaj gepatroj kaj petas permeson iri kaj havigi fajron. Ŝia patrino diras ke ŝi neniel ĝuas la ĉeeston de Helga post kiam ŝiaj fratinoj fariĝis tiaj kiaj ili estas kaj permesis al ŝi iri kien ajn. Nun Helga ekiras kaj ne haltas antaŭ ol ŝi venas tien kie virino bakas panon. Ŝi salutas ŝin kaj diras:

„Baku panon virino,  
baku ŝi bone,  
tiam ŝi prosperu, prosperadu,  
– kaj ekhavi fajron mi volas.“

Tiam la virino respondas:

„La fajron vi volonte ekhavos,  
kaj marŝu, marŝadu.“

Helga nun ekiras kaj venas al loko en kiu virino faras teksaĵon; tiam ŝi diras:

„Teksu teksadon virino,  
teksu ŝi bone,  
tiam ŝi prosperu, prosperadu,  
– kaj ekhavi fajron mi volas.“

Tiam la virino diras:

„La fajron vi volonte ekhavas,  
– kaj marŝu, marŝadu.“

Helga nun ekiras kaj venas al loko kie virino faras kudradon; tiam ŝi diras:

„Kudru kudron virino,  
kudru ŝi bone,  
al ŝi prosperu ĉiuj faroj,  
– kaj ekhavi fajron mi volas.“

„Volonte vi ekhavas la fajron,“ diras la virino kaj alportas la fajron al ŝi: „Mi ankaŭ donas al vi tiun kesteton kaj ne malfermu ĝin plu frue ol en via nuptotago; vi liberigis min kaj miajn fratinojn de granda problemo, ĉar per sorĉado tiel decidiĝis ke ni ĉiam devus labori ĝis iu savus nin de tiu mizero. Vi tion faris kaj vi edziniĝos al nia frato kiu ĵus fariĝis reĝo. Nun iru hejmen kunportante la fajron kaj ne sciigu al viaj fratinoj pri tio.“ Helga dankas la virinon kaj iras hejmen. Ŝi donas la fajron al sia patrino kaj ŝi fihumore akceptas ĝin, sed ŝiaj fratinoj plenis je kolero kaj malico ĉar ŝi hejmenvenis sendifekta.

Kiam la jaro estis forpasinta belaspekta reĝido de transmare venis en tiun landon. Li venas al la bieneto de la farmanto kaj demandas lin ĉu li havas iun filinon. La farmanto diris ke li havas du filinojn. La reĝido petis lian permeson vidi ilin. La viro foriras kaj revenas kun Signy kaj Vigny, sed la reĝido ektimis kiam li vidis tiujn monstrojn kaj li petis la viron forsendi ilin tuj. La reĝido nun demandas la viron ĉu li ne havas pliajn filinojn. La viro diras ke oni apenaŭ povas diri tion sed tamen li foriras kaj alvokas Helgan kie ŝi ŝvitlaboradis en la cindrejo. La viro diras ke jen venis reĝido kiu volas renkonti ŝin. Helga nun senhezite malfermis la kesteton kaj vidis en ĝi la plej belan reĝinan ornamaĵon. Ŝi surmetas ĝin kaj iras tiel vestita antaŭ la reĝidon. Kiam li ŝin vidas li ekstaras kaj iras renkonte al ŝi kaj diras ke ŝi estiĝu sia reĝino. Helga konsentis tion kun kontento. Poste marveturas la reĝido hejmen kune kun Helga kaj edziĝis al ŝi kaj ili amadis unu la alian. Sed pri ŝiaj fratinoj estas dirite ke ili mortis pro

malsato kaj mizero, kaj tiel mi finas nun la rakonton pri Helga, la farmistfilino, kaj ŝiaj fratinoj.

*(Tradukita de la esperanto grupo en Laugarvatn je la vintro 1992-93;  
La Tradukisto, 14, 1993.)*

## Fermiĝis frape pordo ĉe la kalkanoj

Foje antaŭ longe loĝis en suda parto de Islando homo nomita Sæmundur. Lia patra nomo estis Sigfússon ĉar lia patro nomiĝis Sigfús. Kiel kromnomo Sæmundur estis alnomita „la klera“ ĉar li sciis pli ol aliaj homoj kaj estis tiel elturniĝema, ke neniu povis lin superruzi. En ĉiu mistifika situacio li trovis taŭgan kontraŭrimedon. Por tio ĉiu kredis lin sorcisto, malgraŭ la fakto ke li estis pastro.

Raportindas la rakonto pri tio kiel Sæmundur fariĝis tiel multescia. Li eksciis ke eksterlande troviĝis lernejo nomita „La Nigra Lernejo“ kie oni povis havigi al si misterajn sciojn kaj sekretecojn. Kelkaj diris ke tiu lernejo troviĝis en Francio kaj aliaj ke ĝi estis en Germanio.

Sæmundur iris eksterlanden por serĉi la lernejon. Post longa kaj malfacila vojaĝo, li finfine staris antaŭ la pordo de La Nigra Lernejo. Super ĝi grandlitere gravuritis tiu frazo: „Vi rajtas eniri kaj ĉion lerni, sed se vi tie mortos via animo estas perdita por ĉiam.“ Tiu skribaĵo ne plaĉis al Sæmundur, sed li pensis ke li jam vojaĝis tro longe por tuj reiri. Do, kuraĝiginte sin mem, li puŝis al la pordon kiu estis peza kaj elfera.

Ĝi ne estis ŝlosita kaj malfermiĝis aperigante nigran abisman profundaĵon en kies malhelon kondukis ŝtuparo. Tiom longe Sæmundur iris malsupren ke li ne povis nombri la ŝtupojn kaj sentis ke li jam estis profunde en la interno de la tero. Finfine li venis al ebena planko, sed lumeton li ne vidis. Palpumante li longtempe daŭrigis sian iradon kaj fine videtis ruĝan fajron antaŭ si. Veninte pli proksimen li vidis sur tabloj malfermitajn librojn kun ardantaj literoj. Tie ne estis alispeca lumo. Kurbside silentlegis tiujn librojn ombromienaj viroj. Ne sciante kiel agi Sæmundur konfuzite hezitis kaj provis kutimiĝi al la malheleco. Subite forta profundsona voĉo alparolis lin islandlingve dirante: „Kion vi deziras lerni?“ Sæmundur ektimetis kaj pensis ke prefere li komence

lernu kiel reiri. Estis kvazaŭ la voĉo legus lian penson, ĉar responde ĝi diris: „Komence vi devas lerni resti en mallumo.“ Nun Sæmundur eksidis ĉe tablo kaj antaŭ li malfermiĝis libro. Raportebblas nek pri la enhavo de tiu libro nek pri tio de la aliaj libroj, kiujn legis Sæmundur.

Dum tri jaroj li restis en la lernejo. Neniam estis permesate al la lernantoj eliri subĉielen kaj neniam Sæmundur vidis iun instruiston. Se li nur pense deziris iun instruaĵon, sur la tablo aperis libro pri la sama afero. Ĉiun tagon venis vila griza aĉa mano tra la muro portante manĝaĵojn al la lernantoj.

Evidentis al ili ke la lernejestro estis neniu alia ol la ĉefdiablo mem, Kōlski.

Oni ankaŭ eksciis tie interflustre ke Kōlski proprigis al si tiun lernanton kiu laŭvice laste eliris post la ĉiuprintempa ceremonia diplomado. Proksimiĝis la diplomado de Sæmundur kaj lotdecidiĝis ke li laste eliru. Ĵus antaŭ la eliro li surmetis grandegan mantelon sen ĝin butonumi kaj sen enmanikigi la brakojn. Post tio li rapidis laŭ la ŝtuparo supren.

Baldaŭ li aŭdis piedpaŝon malantaŭ si kaj rapidis kiel eble plej. Kiam li proksimiĝis al la elirejo li sentis fortan prenkaptan al la mantelo kaj la forta profundsona voĉo diris: „Vin mi posedas.“ Tiam Sæmundur forĵetis la mantelon kaj daŭrigis sian rapidegan supreniron.

Vidante lumeton antaŭ si li kuregis tien kaj dume aŭdis la spiregon de Kōlski malantaŭ si. Li atingis la elirejon kaj la suno brilis tra ĝi. Tie Kōlski etendis la brakon por kapti lin. Sæmundur tiam montris al sia ombro dirante: „Mi ne estas la lasta. Ĉu vi ne vidas tiun kiu iras malantaŭ mi?“ Tiam Kōlski grimpis al la ombro kredante ke ĝi estas homo kaj Sæmundur eskapis, sed la fera pordo fermiĝis forte kaj tiel proksime al li ke ĝi vundis lin ĉe la kalkanaj ostoj. Tiam Sæmundur diris: „Fermiĝis frape pordo ĉe la kalkanoj.“

Ekde tiam tiu frazo fariĝis parolkutimo, sed Sæmundur estis senombra, ĉar Kōlski neniam liberlasis lian ombron.

*(Jón Hafsteinn Jónsson, La Tradukisto, 15, 1993.)*

## Kontrakto kun Satano

Iam viro faris kontrakton kun Satano pri tio, ke Satano prizorgu, ke li ne estos malkaŝita pro ŝtelado sed poste kiam li mortos Satano posedos lian animon. Tion Satano promesis kondiĉe ke la viro neniam ŝtelu multon je unu fojo. Nun tempo pasis kaj la viro neniam ŝtelis multon, sed li ofte ŝtelis. Finfine li ekpripensis sian situacion kaj li opiniis ke ĝi estas malbona. Li decidis ŝteli multon je unu fojo. Tiam oni serĉis la ŝteliston kaj lin trovis kaj li estis katenita kaj kondamnita al pendumo. En la nokto antaŭ ol li matene estu pendumita Satano venis al li dirante: „Vi nun rompis la kontrakton, sed ne mi, kaj mi montros al vi, ke mi volas ĝin teni.“ Satano tiam forprenis la feran katenon de la viro kaj metis ĝin sur sin mem, sed permesis al la viro foriri, kaj Satano petis la viron ke li pli bone zorgu pri la kontrakto ol ĝis nun. La Satano sidis en la kateno dum la nokto. En la mateno venas la ekzekutisto, prenas la arestiton kaj iras kun li al la pendigilo. Survoje la kaptinto ĉiam ripetadis tiujn vortojn: „Mi kredas ke mi liberiĝos.“ La ekzekutisto koloretis kaj diris: „Neniam vi liberiĝos.“ La alia daŭrigas sian ripetadon: „Mi kredas ke mi liberiĝos,“ ĝis la ekzekutisto ekkoleris kaj diris: „Satano posedu min se vi liberiĝos.“ Tiam la arestito ekkaptis la ekzekutiston, elartikigis lian kolon kaj prenis lin kun si kaj ne estis plu vidota. La viro, kiu eskapis, iris al la reĝo kaj akiris lian indulgon, plibonigis sian sintenon kaj iĝis bona homo.

*(Hilmar Bragason; La Tradukisto, 15, 1993.)*

## Pri Pastro Eiríkur, la sorĉisto

### Pri la pastro Eiríkur en Vogsósar<sup>1</sup>

(Li naskiĝis 1667 kaj mortis 1716)

### Eiríkur lernas sorĉadon en la lernejo

En la distrikto Biskupstungur iufoje estis farmetisto maljuna kaj antikva pensmaniere. Malmultajn interrilatojn li havis kun publiko. Li posedis du aĵojn, kiujn li trovis plej bonaj el sia havo. Tio estis libro, pri kiu aliaj homoj ne sciis, kion entenis, kaj bovidino, kiun li nutris treege bone. La maljunulo ekhavis malsanon gravan kaj sendis vortojn al la episkopo en Skálholt kaj petis lin veni renkonte al si. La episkopo ekiris

rapide kaj esperis favoran cirkonstancon por konverti la maljunulon, kaj li iras renkonte al li. La maljunulo diris: „Tiel staras la afero, sinjoro, ke mi baldaŭ mortos, kaj mi volas antaŭe fari al vi malgrandan peton.“ La episkopo jesis al tio. La maljunulo diris: „Libron mi posedas ĉi tie kaj bovidinon, kiun mi tre amas, kaj mi volas havi ambaŭ en la tombon kun mi, alie iros pli malbone.“ La episkopo diras, ke tiel estu, ĉar li trovis suspektele, ke la maljunulo alie reaperos. Poste la maljunulo mortis kaj la episkopo igis enterigi kun li la libron kaj la bovidinon.

Tio okazis longe poste, ke tri lernantoj en Skálholt<sup>2</sup> entreprenis lernadon de sorĉoscienco. Unu el ili nomiĝis Bogi, la dua Magnús kaj la tria nomiĝis Eiríkur. Al ili estis dirite pri la maljunulo kaj lia libro, kaj ili volonte deziris posedi tiun libron. Tial ili aliris iun nokton por elvoki la maljunulon, sen neniu sciis kie estas lia tombo. Tiel ili elektis la metodon sekvi la vicon kaj elvoki unu post la alia. Ili plenigis la preĝejon per fantomoj, kaj la maljunulo ne venis. Ili reirigis ilin en la tombojn kaj plenigis la preĝejon en la dua fojo kaj la tria, kaj tiam postrestis malmultaj tomboj kaj la maljunulo ne ankoraŭ venis. Kiam ili ree enterigis ĉiujn, elvokis tiujn ĉi kaj la maljunulo venis lasta kaj portis sian libron sub la brako kaj kondukis la bovidinon. Ili atakis ĉiuj la maljunulon kaj volis atingi la libron, sed la maljunulo ekkoleris, kaj ili povis nenion fari krom sin defendi. Tamen ili atingis el la antaŭo de la libro kelkan parton, lasis tion, kio postrestis kaj volis enterigi tiujn, kiuj restis en movo, kaj ili sukcesis en tio pri ĉiuj escepte de la maljunulo. Lin ili neniel povis superforti kaj li atakis ilin pro la parto de la libro. Sed ili sin defendis kaj havis sufiĉajn klopodojn. Tiel iris ĝis tagiĝo. Sed kiam tagiĝis, la maljunulo malaperis en sian tombon, sed ili murmuris sur ĝi sian sorĉformulojn, kaj la maljunulo ne vidiĝis de tiam. Sed la foliojn la kamaradoj utiligis kaj verkis laŭ ili tiun sorĉolibron, kiu nomiĝas Gráskinna kaj longe kuŝis sur lerneja tablo en Skálholt. Pri tio Bogi pleje laboris, ĉar li multe plej multe lernis.

La kamaradoj poste konsekriĝis al pastreco. Eiríkur iĝis pastro je Vogsósar en Selvogur, sed ne estas menciataj la lokoj de l' aliaj. Sed tion oni rakontas pri ili, ke Magnús edziĝis kun fianĉino de Bogi. Sed eksciinte tion, li iris renkonte al Magnús. Magnús tion sciis antaŭe kaj ankaŭ, ke tio estos lia morto, se Bogi lin vidus unue. Magnús iris en la preĝejon kaj staris post la pordo kaj petis diri al Bogi, kiam li rajdas al la pastrejo, ke li estas en la altarejo por fari siajn preĝojn. Bogi eniris la preĝejon kaj



enen laŭ la planko. Magnús lin vidas unue kaj tiam bonvenigas lin multe. Li akceptas tion ĝoje. Kiam Bogi forrajdis, Magnús akompanis lin iom da la vojo. Ĉe la disiĝo Bogi elprenas boteleton kaj proponas al Magnús ektrinki. Li akceptis, elprenis la ŝtopilon kaj ŝprucigis sur vizaĝon de Bogi, kaj li falis morta. Poste Magnús iras hejmen, kaj oni rakontas ne pli multe pri li.

Kiam Eiríkur en Vogsósar aŭdis pri tiu ĉi okazaĵo, li surpriziĝe diris: „Jes, jes, bona karulo“ (tio estis lia kutima alparolo) „ĉiuj ni estas infanoj kompare kun Bogi.“

Kvankam la kamaradoj tenis en sekreto sian sorĉlernadon, ne pasis longa tempo, ĝis tio famiĝis, ke Eiríkur en Vogsósar estas sorĉopova. Tial la episkopo ordonis lin renkonti sin kaj montris al li Gráskinna kaj petis lin diri, ĉu li scias ĝian enhavon. Eiríkur malfermis la libron kaj diris: „Tie ĉi mi ne konas unu literon“, kaj tion li ĵuris kaj iris hejmen poste. Tiel li diris post tio al sia konato, ke li sciis ĉiujn literojn en la libro escepte nur unu, kaj li petis, ke oni sciigu tion, kiam li estos mortinta, sed ne antaŭe.

<sup>1</sup>Vogsósar estas pastrejo apud la marbordo en sudokcidenta parto de Islando.

<sup>2</sup>Skálholt estas en la distrikto Biskupstungur. Tiutempe ĝi estis episkopejo kaj sidejo de gimnazio.

## La ritolibro

Multaj junaj viroj iris al pastro Eiríkur kaj petis lin instrui al si. Li elprovis ilin diversmaniere kaj instruis al tiuj, kiujn li trovis indaj. Inter aliaj estis iu knabo, kiu petis pri instruado je sorĉo. Eiríkur diris: „Restu ĉe mi ĝis dimanĉe kaj akompanu min tiam al Krýsuvík. Poste mi diros al vi jes aŭ ne.“

Ili ekrajdis je l' dimanĉo, sed kiam ili venis okcidenten en la sablejon, Eiríkur diris: „Mi ja forgesis la ritolibron. Ĝi estas sub mia kuseno. Iru kaj alportu ĝin, sed ne malfermu ĝin.“ La knabo iras kaj trovas la libron kaj rajdas en la sablejon. Tiam li deziras rigardi en la libron, kaj tion li faris. Tiam venas al li sennombraj diabletoj kaj demandas: „Kion fari, kion fari.“ Li respondas rapide: „Plektu ŝnurojn el la sablo.“ Eksidinte ili komencas, sed li iris pluen kaj atingis la pastron en la lavejo. Li prenis la libron kaj diris: „Vi malfermis ĝin.“ La knabo tion neis.

Ili nun iras laŭintence. Sed en la irado hejmen la pastro vidis, kie la diabletoj sidas sur la sablo. Tiam li diris: „Sciis mi tion, ke vi malfermis la libron, bona karulo, kvankam vi neis tion. Sed la plej brilan rimedon vi elektis, kaj estus inde instrui vin iom.“ Oni diras, ke li instruis lin.

### **La gantoj**

Alian knabon, kiu petis pri instruo, la pastro sendis en la tombejon kaj diris, ke li tie lasis siajn gantojn. La knabo iras kaj trovas la gantojn, sed kiam li volas ilin ekpreni, iliaj fingroj moviĝas. Li ektimis, reiras kaj rakontas al la pastro. Tiu respondis: „Iru hejmen, bona karulo, al vi mi ne povas instrui.“

### **La elvokito**

Du knaboj foje venis al pastro Eiríkur kaj petis lin montri al si, kiel li elvokas fantomojn. Li petis ilin iri kun si en la tombejon. Ili tiel faris. Li mallaŭte murmuris ion, kaj tiam venis terŝpruco el tombo. Sed la knaboj tiel eksurpriziĝis, ke unu ridis, sed alia ploris. Eiríkur parolis al tiu: „Iru hejmen, bona karulo, kaj danku, ke vi tenas la saĝon. La alian estus plezuro instrui.“ Sed oni ne mencias, ĉu tio estis plenumita.

### **La ĉevalido**

Iufoje du viroj venis al Eiríkur, kaj petis lin instrui al si sorĉon. Eiríkur diris, ke li ne scipovas sorĉon, „sed resti ĉe mi vi povas dum la nokto.“ Ili akceptis tion. En la mateno Eiríkur venas al la gastoj kaj petas ilin eliri kun si por plezuro. Ili tiel faris. Ili venis al ĉevalejo sur la kampo kaj eniris. Tie ili vidis iun ĉevalidon, kiu estis plenkovrita per ia ŝlimo kaj estis tre abomena. Tiam diris Eiríkur: „Vi devas forleki la tutan ŝlimon de la ĉevalido ĉi-tiea, viroj, por ke mi povu instrui al vi ion.“ Tiam diris unu el la gastoj: „Ne mi tiom deziras lerni sorĉon, ke mi volu min fordoni por leki tian diablon.“ „Ne mi kredas, ke mi hezitos je tio“, diris la alia kaj tuj volis komenci. „Estas ne bezono, karulo“, diris Eiríkur, „vi ne devas ion lerni, ĉar vi hezitos en nenio.“ La ceteran viron li instruis.

### **La virbovo**

Iufoje venis knabo al Eiríkur kaj petis lin instrui al si sorĉon. „Mi neniun sorĉon scipovas, bona karulo,“ diris Eiríkur, „sed vi povas resti tra la nokto.“ La knabo akceptis tion. Tio estis en vintro. En la vespera mallumo la pastro venas al la knabo kaj petas lin ligi sian virbovon, kiu liberiĝis. La knabo akceptas tion kaj iras en la bovejon. Tie estis longa kaj mallarĝa enirejo por trapaŝi, kaj enfalis en ĝin malforta brileto. La knabo aŭdis, ke la virbovo bruas kaj muĝis freneze. Spite al tio la knabo eniras. Sed kiam li venas en la enirejon, li vidas du virojn, kiuj staras ambaŭflanke apud la muroj de l' enirejo. Ili estis senkapaj kaj interbatiĝis per sangaj pulmoj. La knabo ektimis kaj elsaltis returnen, enkuris al Eiríkur kaj diris, ke la Diablo estas malligita en lia bovejo kaj ke li ne deziras iri en liajn manojn. „Nu, nu, bona karulo, do vi devas foriri morgaŭ.“

Alia viro poste venis kun la sama komisiono al Eiríkur, al kiu li metis la saman penon. Tiu ne montris grandan timon, sed diris, kiam li vidis la fantomojn: „Vi povas daŭrigi vian laboron, virĉoj, kvankam mi momente iros inter vi.“ Poste li ligis la bovon kaj sukcesis bone. Kiam li reeliris, li nenie vidis la fantomojn. Sed tie li vidis du lignŝtipojn, kie la fantomoj estis. Kiam li envenis, diris Eiríkur: „Ĉu vi ligis la boveton, bona karulo?“ „Ho, jes, certe mi ligis lin“, diris la viro. „Ĉu vi nenion vidis sur la vojo?“ diras Eiríkur. „Ne tio estas menciinda“, diris la viro. Tio placis tiom al Eiríkur, ke li akceptis la viron kaj instruis lin.

## **La vagulino**

Iufoje same kiel ofte antaŭe du viroj venis al Eiríkur de Vogsósar kaj petis lin instrui al si sorĉon. Li diras, ke li ne scipovas sorĉon, sed ili povas resti ĉe li dum la nokto. Ili akceptis tion. En la mateno Eiríkur petas la gastojn rajdi kun si por plezuro tra la kampo ĉirkaŭ la domoj. Ili faris tiel. Sed kiam ili venis mallonge de la domoj, ili renkontis iun maljunulinon praaĝan. Ŝi havis suĉinfanon kaj petis, ke Eiríkur iom helpu al ŝi. Eiríkur ekkoleris kaj diris, ke li tute ne al ŝi ion donos. La maljunulino diris, ke ŝi estas vidvino kaj troviĝas en tre malfavora cirkonstanco kaj plendis ege kompatinde. Eiríkur fariĝis despli kolera kontraŭ ŝi kaj diris, ke lin jam ektedis plendado de tiuj ĉi petbuŝoj, „kaj estus plej dece mortigi vin, malbenata almozvagulo.“ Ĉi tion kaj pli multe Eiríkur diris al la virino, sed ŝi petis lin despli insiste. Tiam Eiríkur diris al la viroj: „Vi devas mortigi por mi ĉi tiun maljunulinon, se mi devas instrui vin.“ Tiam diris unu el la

gastoj: „Neniam mi pensis tion, Eiríkur, ke vi estas tiom sendia homo, kaj mi neniam faros tian fiaĵon, kio ajn estus promesata.“ „Ne mi kredas, ke mi igos ĉi tion fortimigi min de pastro Eiríkur“, diras la alia gasto, „kaj volonte mi mortigos la maljunulinon, ĉar estas plenguste mortigi ilin, ĉi tiujn almozvagulojn. Mi opinias, ke ili devas danki, tiuj ĉi mizeruloj, ke ili povas liberiĝi de la vivo.“ Eiríkur forpelis ĉi tiun viron kaj diris, ke li estas nekonvinkebla instrui tiajn malbonulojn, sed la ceteran li akceptis kaj instruis. Eiríkur estis farinta viderarigon al la homoj por elprovi ilin, ĉar fakte ili vidis neniun maljunulinon.

### **La altaĵiro**

Iufoje juna viro petis pastron Eiríkur, ke tiu permesu, ke li iru kun li iun sabatvesperon, kiam la pastro foriros de la domoj. La pastro longe rifuzis kaj diris, ke li ne havos grandan utilon de tio. La viro despli fervoriĝis, kaj fine Eiríkur promesis iam plenumi lian peton. Iom poste iras la pastro kaj prenas la viron kun si. Tiam vetero estis bela kaj hela. Ili iris tra la kampo al iu altaĵo. La pastro frapis per bastoneto sur la altaĵon. Ĝi malfermiĝis tiam kaj elvenas virino iom aĝa. Ŝi salutas al Eiríkur familiare kaj petas lin eniri. Tie ankaŭ elvenis fraŭlino junaspekta, kaj ŝi petis la kuniranton de l' pastro enpaŝi. Ili faris tiel kaj envenis sidoĉambron. Ĝi estis mure lignotegita, kaj tie sidis multaj homoj ĉiuflanke. Eiríkur kaj lia kuniranto sidiĝis tuj apud la pordo kaj Eiríkur tamen pli interne. Neniu tie ĉi eligis unu vorton, kaj tion trovis stranga la kuniranto de l' pastro. La virinoj ambaŭ eliris kaj ree envenis post mallonga tempo. Tiam ili havis enmane tranĉilon kaj trogon kaj iris al la plej ekstera homo kontraŭe apud la pordo. Ili prenis lin kaj kuŝigis lin sur la plankon kaj lin buĉis en la trogon kiel ŝafon. Poste ili prenis la plej proksiman kaj tiel unu post alia laŭvice kaj ĉio iris sammaniere. Neniu provis sin defendi, kaj ĉiuj silentis. Ne estis videble je Eiríkur, ke li ekmiras pri tio ĉi, sed por lia kuniranto jam sufiĉis. Li vidis, ke ili, la virinoj, ne ĉesigos, antaŭ ol ĉiuj estas buĉitaj, ĉar kiam ili venis al Eiríkur, ili prenis lin kaj buĉis kiel la ceterajn. Tiam ekkriis la viro, eksaltis, kuris al la pordo kaj atingis eksteren. Li kuris hejmen al la domo kaj dankis al la piedoj sian vivon. Sed kiam li venis al la dompordo, pastro Eiríkur staris en la pordo kaj apogis la manojn sur la porda trabo. Li ekridetis, kiam li vidis la viron, kaj diris: „Kial vi kuras tiel furioze, karulo?“ La viro nenion sciis por diri,

ĉar li hontis pro tio, ke li nun vidis, ke la pastro faris al li viderarigon. Tiam diras Eiríkur: „Mi tion opiniis ĉiam, bona karulo, ke vi nenion kuraĝus vidi.“

### **La sorĉrajdo**

Iufoje malaperis pastro Eiríkur, kaj neniu sciis, kie li estis kelkajn tagojn. Intertempe estis du knaboj, kiuj estis por lernado ĉe li, sendataj en la preĝejon, kaj kiam ili malfermas ĝin, ŝajnas al ili, ke Eiríkur kuŝas senkapa sur la planko. Unu volas palpi lin, sed la alia severe malpermesas tion. Je unu tago poste revenis Eiríkur, kaj li dankis al la knabo, ke li lasis lin netuŝata. Li diris, ke li iris sorĉrajde en la okcidentajn fjordojn, por viziti siajn konatojn. „Se mi tiam estus tuŝata, mi neniam povus reveni en la antaŭan staton.“

### **La ĉevalŝtelo**

Pastro Eiríkur avertis ŝafgardistojn kaj aliajn bubojn en Selvogur ne preni liajn ĉevalojn senpermeso kaj diris, ke tio faros al ili malbonan sperton. Dank' al tio evitis ĉiuj ŝafgardistoj tuŝi liajn rajdĉevalojn. Du knaboj tamen deflankiĝis de tio ĉi. Sed tuj kiam ili eksidis surdorsen, la ĉevaloj ekkuris kaj sin direktis senpere hejmen al Vogsósar, kaj la knaboj ne povis regi ilin. Tiam ili volis sin faligi dedorse, kiam ili ne povis kvietigi la ĉevalojn, sed tio ankaŭ estis neebla, ĉar iliaj pantalonoj estis fiksjaj al la dorsoj de l' ĉevaloj. „Tio ĉi ne taŭgas,“ diris unu el ili, „ni devas nin liberigi de la ĉevaloj. Alie ni trafos en manojn de la pastro Eiríkur, kaj de tio ni ne iĝos eviindaj.“ Poste li elprenas tranĉilon kaj fortranĉas la tutan sidaĵon el sia pantalono, kaj per tio li povis deĉevaliĝi. Sed la alia aŭ ne havis lerton por fari tiun artifikon aŭ li ne kuraĝis difekti sian pantalonon.

La ĉevaloj kuris hejmen al Vogsósar, unu kunportante la knabon krianta, sed alia kun la sidaĵo fiksa sur si. La pastro estis eksterdome, kiam la ĉevaloj venis en la korton. Li forviŝis la sidaĵon de dorso de la libera ĉevalo, sed diris al la knabo, kiu rajdis sur la alia: „Estas ne bone ŝteli la ĉevalojn de la Eiríkur en Vogsósar. Sed dedorsiĝu, kaj prenu neniam plu miajn ĉevalojn senpermeso. Via kamarado trovis pli bonan rimedon ol vi, kaj indas ke al li estu montrata sorĉlitero, ĉar li estas sufiĉe esperiga junulo.“ Iom poste li ankaŭ venis al la pastro. Tiu montris al li la sidaĵon kaj demandis, ĉu li rekonas ĝin.

La knabo ne surpriziĝis kaj rakontis al la pastro kiel okazis. La pastro ridetis kaj invitis lin al si. Tion li akceptis danke. Li restis longe ĉe la pastro kaj fariĝis al li tre intima. Oni diras, ke la pastro instruis al li multe pri antikva sorĉarto.

### **La brandbareleto**

Iufoje venis al Eiríkur viroj, kiuj estis irantaj al fiŝistejo. Tiam estis malvarma vetero kaj frostoj akra. Ili petis la pastron doni al si glaseton da brando, sed li diris, ke li havas neniun brandon. Ili lin petis despli insiste kaj diris, ke ne estas senbrande en Vogsósar, se oni zorge serĉus. Al Eiríkur tedis ilia petado, kaj li diris, ke li ne memoras, ĉu postrestas malgranda guto en la bareleto, kiun li ricevis antaŭ kelkaj tagoj. Li foriras kaj alportas la bareleton kaj donas al ili. Li petas ilin esplori, ĉu io postrestas en la bareletaĉo kaj eltrinki el ĝi. Ili akceptis kaj aŭdis, ke iom gluglis en la bareleto. Ekĝojis ili pro tio kaj ektrinkis ĉiuj, sed ĉiam gluglis simile en la bareleto kaj eĉ post kiam ĉiuj el ĝi ektrinkis laŭvole. Eiríkur demandis, ĉu ili ne volas fortrinki ĉi tiun guteton, sed ili diris, ke ili ne tion povas per unu fojo. Li tiam demandis, ĉu ili ne volas porti la bareleton kun si. Tion ili akceptis kaj multe dankis al la pastro. Post tio ili ekiris. Ili trinkis el la bareleto, kiom ili deziris, kaj tamen ne estis aŭdeble, ke io malpliiĝis en ĝi. Kiam tio ĉi jam longe daŭris, unu el ili diris, ke tio ne estas natura kaj ke li kredas, ke Eiríkur faris ian artifikon kontraŭ ili. Li ekprenas do la bareleton kaj ĵetas ĝin sur ŝtonon. La bareleto disrompiĝis, kaj ĝi estis blanka interne pro ŝimaĵo. Estis ne videble, ke unu malseka guto envenis ĝin dum longa tempo.

### **Eiríkur kaj la perfidita fianĉo**

Iu viro, kiu iris en fiŝistejon tranoktis en Vogsósar. Li estis tre malĝoja. Eiríkur vokis lin flanken kaj petis lin diri al si, kio estas al li. Li estis nevola al tio, sed al li fine diris, ke lia fianĉino rompis la gefianĉecon antaŭ ol li foriris, kaj li petis Eiríkur pri helpo. Li diris, ke tio estas tre malfacila. Je la vespero Eiríkur igas unu homon kuŝiĝi en ĉiun liton, kaj laste li mem estas sola sur la piedoj. Nun estas frapite je la pordo, kaj Eiríkur iras porden. Tie estis veninta fraŭlino en ĉemizo kaj subjupo tramalsekaj, ĉar estis pluvo. Ŝi salutas la pastron kaj petas gastigon, diras, ke ŝi estas preskaŭ morta pro malvarmo. Li igas ŝin eniri kaj demandas pri kaŭzo de ŝia irado. Ŝi diris: „Mi eliris

duone senvestigita hodiaŭ vespere, ĉar venis al mi en la kapon ekscii, ĉu la lavaĵo estis enportita, kiam venis la pluvo. Mi volis iri tien, kie ĝi estis, sed perdis la vojon kaj fine atingis tien ĉi.“ Eiríkur diris: „Nun ne estas facile trovi rimedon. Tie ĉi estas dompleno da homoj, kaj vi nenie povas trovi lokon, escepte se vi volas kuŝi apud la viro tie en la lito“, kaj li montris al la vojaĝanto, kiu kuŝis ŝtonkvieta. Ŝi diris, ke ŝi volonte preferos tion ol morti pro malvarmo. Ŝi enlitiĝis trans la viron, kaj jen li ekkonis sian fianĉinon kaj ŝi lin. Ŝi restis ĉe li dum la nokto, kaj ili bone interkonsentis. Post tio ili geedziĝis, kaj fariĝis bona ilia kunvivado.

### **Eiríkur kaj la maljunulino**

Iufoje Eiríkur devis vojaĝi orienten trans la riveron Þjórsá. Dum la rajdado orienten, li venis en butikon en la urbeto Eyrarbakki, por havigi al si en la boteleton (ĉar li ŝatis ebriigaĵon). Enirante la butikon, vi vidis du maljunulinojn, kiuj sidis apud la butikmuro. Unu demandis, kiu tie iras. La alia respondas: „Ĉu vi ne konas la grizulon de Vogsósar. Li ja estas facile konebla.“ Ili ĉesigis sian parolon, sed Eiríkur daŭrigis siajn vojaĝon. Kaj kiam li venis orienten al la rivero Hraunsá, lia akompananto vidas maljunulinon veni kuranta post ili kaj petanta la pastron atendi. Li diris, ke la tempo estas tro mallonga por tio. Ili nun rajdas sufiĉe rapide, ĝis ili venis al rivero Þjórsá apud la transirprama loko de Sandhólar, kaj tie ili deĉevaliĝas. Tiam la maljunulino tien venas ankoraŭ kuranta kaj estis postkurinta ilin tien senripoze okcidente de Eyrarbakki kaj elĉerpita pro senspireco kaj laceco, demetinte ĉiujn vestojn escepte la subajn. Ŝi haltis ĉe ili dum ili atendis la pramon. Eiríkur sin turnas al la maljunulino dirante: „Iru returnen, bona karulino, vi jam vidis la grizulon de Vogsósar, sed ne moku plu senkulpajn homojn.“ La maljunulino tuj returnen iris, sed la pastro diris al sia kunvojaĝanto, ke li igis la maljunulinon postkuri por dekutimigi ŝin alnomi kaj moki homojn.

### **Eiríkur kaj la farmisto**

Kiam Eiríkur estis pastro en Vogsósar, estis iu farmisto en la paroĥo, kiu neniam vizitis la preĝejon. Por ĉagreni la pastron li remis al fiŝkaptado en ĉiu sankta tago dum la diservo, kiam ajn vetero permesis. Iufoje la pastro iris al la preĝejo por fari diservon.

Tiam la farmisto aranĝis tiel, ke li estis surmetanta la felvestojn fiŝkaptistajn, kiam la pastro preteriris. Tiu demandis, ĉu la farmisto ne volas fari laŭ siaj vortoj kaj ĉeesti preĝejon hodiaŭ. La farmisto respondis nee kaj komencis surpreni sian felpantalnon. Tiam la pastro foriris de li kaj faris diservon kaj poste iris la saman vojon hejmen. Renkontis li tiam la farmiston en la sama loko. Tiam li estis en unu el la krurumoj, sed ne en la alia. La pastro diris, ke li verŝajne fiŝkaptis bone, ĉar li estas jam alveninta. Hontis tiam la farmisto ege, kiam li devis diri la veron, ke li estis sidanta tiel, de kiam ili disiĝis. Petis li la pastron sin liberigi. La pastro diris: „Se vi trovas la Diablon tro tenema je vi nun, kio do poste fariĝos?“ Poste la pastro ordonis al la Diablo malteni la farmiston. Tiam li iĝis libera kaj vizitis sian preĝejon de post tio.

### **Eiríkur pagas ĉevalprunton**

Alian fojon gastis fiŝkaptistoj en Vogsósar kaj tien venis je vespero sabata. En la dimanĉa mateno pastro Eiríkur parolis al ili: „Virĉoj miaj, ĉu ja neniu el vi bonvolos prunti al mi ĉevalon por rajdi hodiaŭ al Krýsuvík kaj dume atendi ĉi tie?“ Tion ili trovis granda tempoperdo kaj rifuzis ĉiuj krom unu. Tiu estis juna viro. Ili priridis lin kaj foriris en la mateno al Krýsuvík. La pastro rajdis antaŭe kaj renkontis ilin dum la hejmenveturo. Li pluiris hejmen kaj dankis al la viro la ĉevalprunton. Li petis lin resti tra la nokto, „sed iru tuj morgaŭ kaj vi ricevos bonajn vojojn kaj veteron kaj atingos Grindavík. Sed ne venu al Krýsuvík.“ La viro agis laŭ lia konsilo kaj ricevis bonan veteron. Sed en Krýsuvík laŭvide estis neĝovento. La viro venis al Grindavík je la vespero kaj remis por fiŝkaptado plej proksiman tagon, la duan kaj la trian. En la vespero de tiu ĉi tago venis liaj kamaradoj, kiuj estis devigitaj resti tri tagojn en Krýsuvík pro neĝovento. Sed la viro jam ricevis pli ol centon da fiŝoj.

*(Þórbergur Þórðarson; La Tradukisto 18.)*

## **Du islandaj popolrakontoj**

### **Deveno de elfoj**

Pri deveno de elfoj troviĝas du rakontoj, kiel tie ĉi estas dirote.

Iufoje Dio ĉiopova venis al Adam kaj Eva. Ili akceptis lin bone kaj montris al li



ĉion, kion ili posedis endome. Ili ankaŭ montris al li siajn infanojn, kaj li trovis ilin tre esperigaj. Li demandis Evan, ĉu ili ne havas pli multe da infanoj ol kiujn ŝi jam montris al li. Ŝi neis tion. Sed tiel staris la afero, ke Eva ne estis lavinta iujn el siaj infanoj kaj tial hontis ilin vidigi kaj pro tiu kaŭzo subite kaŝis ilin. Ĉi tion sciis Dio kaj diris: „Kio devas esti kaŝita antaŭ mi, ankaŭ restu kaŝita antaŭ homoj.“ Tiuj ĉi infanoj tiam iĝis al homoj nevideblaj kaj loĝis en rokoj kaj altaĵoj, montetoj kaj ŝtonoj. De tie devenas la elfoj. Sed la homoj estas venintaj de tiuj infanoj de Eva, kiujn ŝi montris al Dio. Homaj homoj neniam povas vidi elfojn, escepte se ili mem volas, sed elfoj povas vidi homojn kaj igi ilin vidi sin.

Iufoje estis viro en vojaĝo. Li devojiĝis kaj ne sciis, kien li iras. Fine li venis al farmejo, kiun li neniel konis. Tie li frapis la pordon. Elvenis virino multaĝa kaj petis lin eniri. La domoj en la farmejo estis sufiĉe bonaj kaj puraj. La virino kondukis la homon en la sidoĉambron, kaj tie estis du fraŭlinoj, junaj kaj belaj. Li ne vidis pli da homoj en la farmejo ol la multaĝan virinon kaj la fraŭlinojn. Li estis bone akceptata, kaj oni donis al li manĝon kaj trinkaĵon, kaj poste li estis kondukata al lito. La viro petis ke li kunlitiĝu kun unu el la fraŭlinoj, kaj tio estis permesata. Ili nun ekkuŝas. Tiam la viro volis sin turni al ŝi, sed tie neniun korpon trovis, kie estis la fraŭlino. Li do ekkaptas al ŝi, sed nenio troviĝis inter liaj manoj. Tamen la fraŭlino estis senmova ĉe li en la lito, tiel, ke li ŝin vidis ĉiam. Li tial demandas ŝin, kiel tio povas esti. Ŝi respondas, ke li ne miru pro tio, „ĉar mi estas senkorpa spirito“, ŝi diris. Kiam la Diablo pratempe faris ribelon en la ĉielo, tiam li kaj ĉiuj liaj kunbatalantoj estis elpelataj en la ekstremajn mallumojn. Tiuj, kiuj postrigardis lin, ankaŭ estis forpelataj el la ĉielo. Sed tiuj, kiuj nek estis kun nek kontraŭ li kaj al neniun el la partioj aliĝis, estis pelataj sur la teron malsupren kaj ordonataj loĝi en altaĵoj, montoj kaj ŝtonoj, kaj ili nomiĝas elfoj aŭ kaŝitoj. Ili ne povas loĝi kun aliaj ol si mem. Ili povas fari kaj bonon kaj malbonon, kaj ja multe laŭ ambaŭ manieroj. Ili havas neniun tian korpon kiel vi homaj homoj, sed tamen povas aperi al vi, kiam ili volas. Mi estas unu el tiu ĉi partio de l' falintaj animoj, kaj tial ne estas supozeble, ke vi povas havi plian plezuron de mi ol jam estas. La viro kontentiĝis pri tio ĉi kaj poste rakontis, kio al li okazis.

## **Snorri en Svanshóll**

Mallonge post mezo de la 19-a jarcento tiel okazis, ke oni enterigu kadavron en Kaldrananes je Steingrímsfjörður. Tiam oni fosante trafis sur grandan ĉerkon. Ĝi estis levata supren, sed rompita estis tabulo el alia flanko de la ĉerko. Oni vidis, kiam la ĉerko venis supren, ke nenio estis en ĝi, escepte trikitaj virvestoj kaj rubo de rabotaĵo, sed neniuj restaĵoj de la kadavro, nek haro nek dento. La ĉerko estis el ruĝligno kaj malmulte putra. Unu el la ĉeestantoj estis parlamentano Torfi Einarsson de Kleifar. Oni nun komencis priserĉi, kies tombo tiu ĉi povas esti, kaj maljuna viro, kiu havis hejmon en Kaldrananes kaj estis multescia kaj verema kaj konis ĉiun tombon en la tombejo, estis alvokata. Kaj montriĝis, ke tio estis tombo de Snorri de Svanshóll en Bjarnarfjörður. Li tiam estis mortinta de preskaŭ 40 jaroj, sed tamen lin memoris la plej maljunaj homoj.

Snorri estis stranga viro kaj malsociema, kaj ĉiuj volis kiel eble malplej kun li interrilati. Ne facile li povis teni geservistojn. Iufoje okazis, ke al lia prizorgo estis transdonita virino de la komunumo. Ŝi estis malgrava persono. Ŝi estis tie dum la somero, sed malaperis aŭtune, kaj oni opiniis, ke ŝi pereigis sin mem.

Tiu famo rondiris, ke Snorri estis sorĉopova, kaj kiel signo pri tio estas, ke li neniam bezonis ian ŝafgardiston. Sed hundon li havis brunan, kiu estis stranga tiurilate, ke li neniam venis al la domoj kaj neniam pli proksimen ol sur la melkokampon. Neniam oni donis al li manĝaĵon. Li alkondukis la ŝafinojn kaj irigis ilin ĝis ili estis ellasataj, tiel alkondukis ilin matene kaj vespere, ke neniam okazis, ke mankis iu ŝafino. Sed kiam oni ĉesis melki la ŝafinojn aŭtune, la hundo malaperis, sed estis ĉiam reveninta en la tago, kiam oni kondukis la idojn for de la ŝafinoj je la printempo. Snorri havis la hundon dum ĉiuj siaj farmadjaroj.

Kiam Snorri kuŝis sur la mortlito, li estis tiel ordoninta, ke ne necesu, ke li estu veturigata al preĝejo, anstataŭe oni povu enkavigi lin tie hejme. Sed oni ne agis laŭ tio, kaj la kadavro estis prizorgata laŭ tiama kutimo. La ĉerko estis tirata de multaj homoj ĝis la monto, kiu estas inter Bjarnarfjörður kaj Steingrímsfjörður. Sed veninte tien, oni devis porti la ĉerkon supren sur la monton. Tiam ĝi estis tiom peza, ke oni miregis, kaj la portantoj preskaŭ devis cedi, antaŭ ol ili atingis supron de la monto. Kiam ili venis supren sur la monton kaj ili vidis la preĝejon, ili metis la ĉerkon teren kaj ripozis mallongan tempon. Sed kiam ili relevis la ĉerkon, ĝi estis malpeza kiel pajlero. Oni tiam

priparolis malfermi la ĉerkon kaj vidi, kia estas la kaŭzo, sed tio ne efektiviĝis, ĉar oni opiniis fiagon rompi pacon de mortintaj homoj. Poste la ĉerko estis enterigata.

Filo de Snorri, nomata Magnús, loĝis post li en Svanshóll. Li estis honesta viro kaj malsimila al sia patro en ĉio. Li bruligis ĉiujn liajn librocifonojn. Sed postan printempon venis la Brunulo kiel ordinare, kaj Magnús ne volis malakcepti la hundon sed igis lin gardi la ŝafinojn dum tiu somero. En printempo posta li ne venis kaj ne estis vidata de tiam.

Iom post tio la domoj en Svanshóll estis malkonstruataj. Tiam oni trovis en la muro inter provizejo kaj kuirejo virinan skeleton en plena formo, kaj oni opiniis, ke Snorri irigis en la muron la virinon, kiu malaperis.

Estas onikredo, ke la Diablo prenis Snorri.

*(Þórbergur Þórðarson; La Tradukisto 25.)*

## Ulfhildur – la feino

### Popola rakonto

Iam estis bienulo, li loĝis en Nordlando apud Kulolago. La lago estas tiom granda ke oni bezonas tutan tagon por ĉirkaŭiri ĝin.

Okazis foje komence de la falĉotempo, kiam ĉiuj laboris sur la fojnokampo, ke virino venas el la direkto de la lago al la bieno. Ŝi iras rekte al la bienmastro kaj petas permeson tranokti. La bienulo tion permesas. Li demandas pri ŝia nomo, sed ŝi nomiĝis Ulfhildur. La bienulo pludemandas de kie ŝi venas, sed ŝi ne donis respondon kaj ekparolis pri aliaj aferoj. En la vespero oni rastkolektis la fojnnon kaj Ulfhildur petis ke oni donu al ŝi rastilon. Evidentiĝis ke ŝi ne rastis malpli ol du virinoj mezkapablaj, eĉ elstaraj.

La sekvan matenon Ulfhildur volis denove ekrasti kun la aliaj laborvirinoj, sed la bienulo diras ke li tion ne bezonas kaj komprenigis al ŝi, ke ŝi prefere foriru. Je tio Ulfhildur ekploras. La bienulo do permesas al ŝi resti tiun ĉi tagon. La postan tagon la bienulo diris, ke ŝi devas nepre foriri, sed tiam ŝi ekploras; la bienmastro kompatis al ŝi kaj permesas ke ŝi restu la tutan semajnon. Je la fino de la semajno la bienulo sciigis al Ulfhildur, ke li ne plu povas ŝin havi, sed okazas same kiel antaŭe ke Ulfhildur ekploras. Tiukaze li permesas al ŝi resti la tutan someron kaj ŝi pro tio tre ekĝojas. Ulfhildur tre

plaĉas al ĉiuj gedomanoj ĉar neniu el ili iam konis pli laboreman, pureman kaj bonkondutan inon.

Aŭtune estas planite ke Ulfhildur restu ĝis la jarfino kaj iom pli poste oni petis ŝin resti la sekvan jaron.

Kiam kristnasko proksimiĝis, tiun sekvantan vintron, la dommastrino donis al ŝi ŝuledon sufiĉan por propraj ŝuoj kaj ankaŭ por la du dungitoj al kiuj Ulfhildur servis. Ŝi faris la ŝuojn por la viroj sed ne por si mem. En la kristnaska tago ĉiuj iras en preĝejon, krom Ulfhildur, kiu restas hejme sola. Okazas nenio rimarkinda ĝis la venonta kristnasko.

La mastrino donas al Ulfhildur ŝuledon kiel en la antaŭa jaro por ke ŝi faru kristnasko-ŝuojn, sed ŝi faras por la du laborviroj sed ne por si mem.

Je la kristnaska tago ĉiuj iras al preĝejo krom Ulfhildur, kiu restas hejme sola. En la antaŭkristnaska nokto ŝajnas al unu el la laborviroj, ke Ulfhildur foriras kaj li decidas, ke se li estos kun ŝi samdomo venontan kristnaskonokton, li bone priatentos ŝin.

Nun pasas kristnasko kaj la vintro. Ulfhildur ĝuas bonan amikecon de ĉiuj gedomanoj kaj ŝajnas al ili, ke ne estas konata ŝia egalulino. Okazas nenio priskribinda en la tempo ĝis la tria kristnasko. La dommastrino donas al Ulfhildur ŝufelojn, kiel kutime, kaj ŝi faras ŝuojn por la laborviroj kiel antaŭe, sed ŝuojn por si mem ŝi ne faris.

La dommastrino diras al Ulfhildur, ke ŝi nun devos iri preĝejon je kristnasko ĉar ŝi, la mastrino, devis aŭskulti riproĉojn de la pastro pro tio ke Ulfhildur ne ĉeestis diservojn. Ulfhildur malmulton diris kaj per tio silentigis ŝin pri la afero.

Kiam ĉiuj jam enlitiĝis en la antaŭkristnaska vespero, sed la laborviro antaŭe menciita maldormadas, Ulfhildur ellitiĝas tiel singarde, ke neniu aŭdas, kaj ŝteliras for de la domo kaj la viro postiras ŝin. Ŝi iras direkte al la lago kaj alveninte al la bordo ŝi elprenas gantojn kaj ilin kunfrotas; tuj estiĝas ponto super la lago. Ŝi suriras la ponton kaj la viro tujsekvas ŝin. Atinginte la alian bordon ŝi kunfrotas la gantojn, ke la ponto malaperu. Ulfhildur plueniras kaj ŝajnas al la viro ke ŝi malsupreniras en la teron kaj estiĝas mallumego kie ŝi iras. Tamen li povas ŝin vidi kaj konstante sekvas ŝin tute ĉekalkane. Ili longtempe iradas ĝis iom post iom la ĉirkaŭaĵo prilumiĝas.

Finfine ili venas al belegaj ebenaĵoj, estis tiel bele, ke la viro neniam antaŭe

vidis same admirindan lokon. Ambaŭflanke de la vojo aris belaj floroj kaj la tero ŝajnis helflava, dum suno brilis sur la leontodoj kaj fruktoj. La ŝafoj ludis sur la ebena kaj de tempo al tempo ili avide manĝis la florojn. La naturo entute estis surmetinta siajn plej belajn vestojn. Meze en la herbejo staris belega palaco kaj ŝajnis al la viro, ke estas reĝa palaco, tiel brilornamita ĝi estas. Tien iris Ulfhildur kaj en la palacon. La laborviro iris en ombran angulon ekstere. Ĉe la palaco staris preĝejo. Estis belega konstruaĵo.

Pasis nur tempeto. Tiam Ulfhildur iras el la palaco portante reĝinan kostumon kaj havas oran ringon sur ĉiu fingro. Surbrake ŝi portas infanon, sed kun ŝi iras viro kun krono surkape, portante reĝan veston. Imagas la laborviro ke ili estas reĝo kaj reĝino. Ili iras en la preĝejon kaj sekvas ilin homamasoj ĉiuj en belaj vestoj kaj gajmiene aspektas. La laborviro nun iras al la preĝeja pordo kaj neniu lin vidas. Ulfhildur nenion scias pri lia ĉeesto.

En tiu momento komenciĝas la diservo kaj oni povas aŭdi brilajn harpojn kaj belan kantadon. La infano, kiun braktenas Ulfhildur, maltrankviliĝas kaj krias. Ŝi tial donas al ĝi oran ringon de sia mano, sed la infano ĵetas ĝin laŭ la preĝeja planko, tiel ke la laborviro povas ĝin preni. Kiam finiĝis la diservo ĉiuj foriras el la preĝejo kaj Ulfhildur kun la belvestita viro iras en la palacon kaj ŝajnas al la farmlaboranto, ke ĉiuj aspektas tre malgaje.

Post mallonga tempo eliras Ulfhildur en vestoj kamparaninaj, kiujn ŝi antaŭe portis, iras rapide for de la palaco. Ŝi iradas reen la saman vojon, laŭ kiu ŝi alvenis kaj sekvis ŝin la laborviro. Pri cetero oni ne rakontas ĝis ili atingas la lagon kaj la vojo aspektas sammaniere kiel antaŭe estis priskribite. Ĉe la lago ŝi kunfrotas la gantojn kaj aperas la ponto. Ili iras laŭ ĝi trans la lagon. Tiam ŝi frotas la gantojn kaj la ponto malaperas. La viro iras hejmen laŭ sekreta vojo kaj enlitiĝas, sed Ulfhildur venas poste kaj ankaŭ sin senvestigas. Proksimiĝas jam nova tago.

Nun tagiĝas kaj la hejmanoj ellitiĝas. Diras tiam la mastrino al Ulfhildur, ke ŝi devas iri preĝejen hodiaŭ. La laborviro respondas, ke ŝi ja ne bezonas iri al preĝejo tiun ĉi tagon ĉar ŝi estis en preĝejo lastnokte. „Estu de ĉiuj homoj la plej feliĉa, se vi tion pruvos,“ diras Ulfhildur. Tiam la viro rakontas la tutan historion pri la okazintaĵoj lastnoktaj kaj montras la oran ringon kiel pruvon.

Nun Ulfhildur tre ĝojiĝas kaj rakontas pri siaj cirkonstancoj. Ŝi diras ke ŝi estas

reĝino el Feujo kaj disputis kun maljuna sorĉistino, sed ŝi sorĉis al Ulfhildur ke ŝi ĉiam devos resti ĉe homoj aŭ en Homujo, escepte se homo povos atingi kun ŝi Feujon en la kristnaska nokto, la unuan, duan aŭ trian post la sorĉo. La sorĉistino nur permesis al Ulfhildur renkonti sian edzon dum tri sinsekvaj kristnoktoj. Sed Ulfhildur diras, ke ŝi kontraŭsorĉis ke la maljuna ino falu morta se la sorĉo al Ulfhildur neniiĝos. Ŝi alparolas la laborviron: „Mi ĵuras, ke vi de nun estos feliĉulo, kaj morgaŭ vi iru al la lago, tie vi trovos du trezorujojn, vi posedu la malpli grandan sed viaj gemastroj la pli grandan.“

Poste Ulfhildur pretigis sin por foriro kaj ĉiuj amike adiaŭas ŝin. Ŝi rapidas al la lago kaj malaperas kaj neniu ŝin vidis de tiam, sed ĉiuj bien-hejmanoj bedaŭris ŝian foriron.

La postan tagon la laborviro iris al la lago kaj tie trovis du monsakojn, kiuj ambaŭ estis grandaj. En la malpli granda estis ormono, sed arĝenta mono en la pli granda. Laŭ onidiro la laborviro iĝis de tiu tempo feliĉulo ĝis la morto kaj tiel finiĝas tiu ĉi rakonto.

*(Hallgrímur Sæmundsson; La Tradukisto 25.)*

## La diabletfajfilo

Sæmundur la klera havis iun fajfilon kiu havis tian naturon kiam en ĝin estis blovita, ke tiam venis unu aŭ pli multaj diabletoj al tiu, kiu en ĝin blovis, kaj demandis, kion ili devas fari.

Iufoje postlasis Sæmundur la fajfilon en sia lito, sur la kaploko kie li kutime lasis ĝin dum la noktoj. En la vespero diris li al la servistino ke ŝi pretigu lian liton kiel kutime sed li avertis ŝin, se ŝi trovos ion nekutiman en la lito, ke ŝi ne havas permeson ĝin tuŝi, sed prefere lasu tion netuŝita en sama loko.

Nun la knabino ekpretigis la liton kaj iĝis tre scivolema, kiam ŝi vidis la fajfilon. Ŝi tuj prenis ĝin, rigardis ĝin zorgeme kaj fine ŝi blovis en ĝin. Tiam venis al ŝi tuj iu diableto kaj demandis:

"Kion devas mi fari?" La knabino ektimetis, sed ŝi ne montris ion. En tiu tago tiel estis, ke dek ŝafoj estis buĉitaj ĉe Sæmundur kaj ĉiuj ŝaf-feloj kuŝis ekstere. La knabino diris al la diableto, ke li devas nombri ĉiujn harojn sur la ŝaf-feloj, kaj se li faros tion pli rapide ol ŝi pretigos la liton, tiam povos li ŝin ekhavi.

La diableto foriris kaj strebis nombri la harojn kaj la knabino rapidis pretigi la liton. Kiam ŝi estis fininta tion, la diableto ankoraŭ ne finis nombri la harojn sur malgranda randoparto de unu ŝafofelo kaj la knabino tiel elsaviĝis.

Poste demandis Sæmundur la knabinon ĉu ŝi trovis ion en la lito. Ŝi rakontis ĉion kiel okazis, kaj Sæmundur tre ŝatis ŝian elturniĝon.

*(Lernantoj en esperanto-kurso en La Gimnazio en Laugarvatn; La Tradukisto 27.)*

## „Nun mi ja ridus, se mi ne estus morta“

### Islanda popol-rakonto de la speco humora

Iamtempe du virinoj kverele kontestis pri tio, kiu havas edzon la pli stultan. Fine ili interkonsentis elprovi, ĉu tiuj estas tiom stultaj kiom ili ŝajnas. Unu agis tiamaniere, kiam ŝia edzo venis hejmen de sia laboro, ke ŝi prenis lankombilojn kaj ŝpinilon, sidiĝis kaj komencis kombi kaj ŝpini, sed tamen nek la edzo nek iu alia povis vidi ajnan lanon inter ŝiaj manoj. Kiam la edzo tion rimarkas, li demandas al sia edzino, ĉu ŝi perdis sian prudenton, ke ŝi tiel grinc-frotas la kombilojn kaj turnsvingas la ŝpinilon ne havante lanon kaj petas ŝin diri al si, kion tio signifas. Ŝi diras, ke apenaŭ estas atendeble, ke li vidu tion, kion ŝi ŝpinas, ĉar tio estas ŝtofo tre delikata, el kiu ŝi volas fari por li vestaĵon. Li tion akceptas kaj daŭre miras pri tio, kiom lerta estas lia edzino kaj tre antaŭĝojas ekhavi tiun vestaĵon, kiu fariĝos tiom eksterordinare delikata kaj bela.

Kiam la virino ŝajnigas, ke ŝi jam ŝpinis sufiĉan kvanton por la vestaĵo, ŝi fiksas la ŝtofon sur la teksilon kaj ŝajnigas ekteksadon. La edzo venas al ŝi de tempo al tempo por admiri ŝian lertecon. Tio ŝin tre amuzas kaj ŝi rapidas finfari ĉion belmaniere. Nun ŝi ŝajnigas forpreni la ŝtofon de la teksilo kaj unue ĝin lavas kaj fulas kaj fine ĝin tajlas kaj kudras. Tion fininte ŝi petas sian edzon veni kaj surmeti la vestaĵon, sed diras ke ŝi ne kuraĝas lasi lin sola je la surmeto kaj ke ŝi volas lin helpi. Nun ŝi ŝajnigas meti sur lin la vestaĵon kaj kvankam la vireto ja estas nuda, li havas la imagon, ke la virino faris por li tiom delikatan vestaĵon kaj estas pro tio tiom feliĉa, ke li apenaŭ povas sin regi pro ĝojo.

Nun estas dirinde pri la alia virino, ke kiam ŝia edzo venis hejmen, ŝi demandas lin, kial li ne estas en la lito. La viro trovis stranga tiun demandon kaj demandas al ŝi,

kial ŝi tiel parolas. Ŝi konvinkas lin pri tio, ke li estas tre malsana kaj ke estas nepre, ke li tuj enlitiĝu. Li kredas tion kaj rapidas kuŝiĝi sur la liton. Post kelka tempo ŝi diras, ke ŝi volas prepari lian korpon por lasta ripozo. Li demandas, kial ŝi volas fari tion kaj petegas ŝin ne tion fari. Ŝi demandas, kial li tiel malsaĝe parolas, dirante ke li jam mortis en la mateno kaj ke jam estas urĝe ĉarpentiri por li la ĉerkon. La vireto do kuŝas tiamaniere ĝis kiam li jam estis metita en la ĉerkon. La virino nun decidas pri la tago de enterigo kaj alvenigas ses portantojn kaj petas la ceterajn geedzojn akompani sian edzon al la tombo. La edzino de la mortinto estis fariginta fenestretojn sur unu flanko de la ĉerko, tra kiuj li povos vidi tion, kio okazas. Kiam la tempo venis por porti la ĉerkon el la domo, alvenas tien la cetera edzo nuda, opiniante ke ĉiuj certe admiros lian delikatan vestaĵon. Sed tio okazis iom alimaniere, ĉar kvankam la ĉerkoportantoj ja estis en humoro funebra, neniu el ili povis deteni sen de ekrido je tiu vido, kaj kiam la enĉerkulo ekvidis la nudulon li elvokis tiom laŭte kiom li povis, dirante: „Nun mi ja ridus, se mi ne estus morta.“ Nun oni ĉesigis la enterigan ceremonion kaj la viro estis lasita el la ĉerko. Estis nun eltrovite, ke la virinoj trompis kaj delogis siajn edzojn kaj estis ili ambaŭ vergitaj en publiko pro siaj faroj.

*(Baldur Ragnarsson; La Tradukisto 33.)*

## **Benedikt Gröndal:**

### **El la Mortvojbatalo**

*Tiu verko estas eble la plej humura en la islanda literaturo. La aŭtoro verkis ĝin en Belgujo en 1859, kaj laŭenhave ĝi estas plejparte priskribo de la fama batalo de tiu jaro ĉe Solferino en Italujo inter la franca kaj la aŭstra armeoj. La humuro konsistas plejparte el tio, ke la aŭtoro troigas ĉion kaj samtempe kunmiksas detalojn el la simpla islanda bienvivo kaj eroj el glorigita reĝa vivo eksterlande, kiel rigardata per la okuloj de bienistoj en Islando. La ĉi-tiea ĉapitro priskribas la forvojaĝon de la franca imperiestro, Napoleon la 3-a, de Parizo. En antaŭa ĉapitro li jam malamikis kun la aŭstra imperiestro, Franc-Jozefo, kaj la Italoj en la Po-valo petis pri lia helpo kontraŭ aŭstra agreso. – La trad.*

Sed kiam la aferoj graviĝis, tiam Napoleono vidis ke oni devis fari ion, kaj ĉar li sentis ke li havis ion por venĝi, do li opiniis ke plej bone estos iri mem kaj militi. Li vekigis frue unu matenon; la suno jam leviĝis, bela kaj brilanta surĉiele, kaj brilis sur la



ranunkolojn kiujn Napoleono havis en florpotoj en siaj fenestroj; tiujn ranunkolojn Evgenia unufoje kolektis sur malsekkampo dum Napoleono ĉasis lagopojn.

Nun ili ambaŭ kuŝis en la lito, Napoleono kaj Evgenia, kaj Napoleono unue veketiĝis kaj prenis la brakon de Evgenia. – Kial vi pinĉas min? diris Evgenia.

– Mi intencas ekmiliti, diris Napoleono.

– Ĉu vi absolute bezonas pinĉi min pro tio? diris Evgenia.

– Vi devas ellitiĝi kaj kontroli miajn vestojn, Evgenia, diris Napoleono kaj iom eklevigis sin.

Tiam Evgenia unue suprengeuis kaj diris: – Jes, mi komence vestos min kaj akompanos vin survojen.

– Faru tion, diris Napoleono, – mi dume kuŝos ĉi-tie kaj pensos pri la milito.

Nun Evgenio transkruris Napoleonon, ĉar ŝi kuŝis ĉemure, sed la eta princo dormis en malgranda lulilo antaŭ la lito. Post tio ŝi alvenis sur la plankon; ĝi estis kovrita per arĝent- kaj kuprmoneroj kaj granda mirindaĵo.

Nun Evgenia unue vestigis sin en genukovrilon el blankega kaj molega lanteksaĵo, kiu estis farite oriente en Kaŝmiro; oni kudris ĝin dek-du fojojn, unu post la alia, kaj neniam plenŝatis ĝin; finfine ne eblis plu malkudri ĝin, kvankam oni sentis ĝin iom tro mallarĝa ĉe la koksoj, sed tiel ĝi devis esti. Tiam Evgenia surmetis silkan kalsonon ekster la genukovrilo, kaj post tio ŝi metis sian krinolinon, kiun ŝi kutimis renversigi sur la monerkovritan plankon dumnokte. Ŝi metis la krinolinon super ŝia kapo, sed la krinolino moŝte malleviĝis ĝis la talio de la imperiestrino kaj resonis.

Post tio Evgenia iris al la spegulo kaj kombis sin per ora kombilo, kaj metis la ringojn en siajn orelojn kaj sur la fingrojn; ĉiujn tiujn ringojn Napoleono donis al ŝi dum li kaptadis ŝin. Tiam ŝi surmetis ŝuojn sur la piedojn; tiuj ŝuoj estis faritaj el diamondo, kaj Napoleono forprenis la ŝuojn de fluganta drakmonstro, kiun li mortigis en Ameriko, kaj li donis al Evgenia la ŝuojn.

– Kiom longan tempon vi bezonas por vesti vin, Evgenia, diris Napoleono.

– Nun mi estas finita, diris Evgenia, – sed mankas ŝelkobutonon al via pantalono; mi jam nun surfiksos ĝin.

Post tio ŝi fiksas la butonon sur la pantalonon, kaj nun Napoleono ekvestis sin.

Evgenia antaŭeniris kaj informis, ke sia edzo intencis ekmiliti. Tiam dudek

ĝendarmoj envenis plene armitaj, kun kiraso, kaskoj, ŝildo, kirasŝrumpoj, lancoj kaj stalaj ĉapoj, tiel ke Napoleono povus elekti kion ajn li preferus por batali kontraŭ la Ĝermanoj. Nun Napoleono unue surmetis la kalsonon kaj la ŝrumpojn, temis kompreneble pri silkaj ŝrumpoj, sed supren li surmetis dikajn lanŝrumpojn, por ke li ne sentos malvarmajn piedojn survoje. Post tio Napoleono surmetis silkan pantalonon, kaj super ĝi dikan lanteksan pantalonon el la norda Skagafjörður; tiun pantalonon Gaimard donis al Napoleono kiel eksomera donacon, la saman tagon kiel Marmier donis al Lamartine la virŝafon, sed Gaimard havigis al si la pantalonon en la granda vojaĝo al Islando.

Napoleono surmetis terurajn militbotojn; ili plenkovris la gambojn kaj krakis tiel laŭte, ke oni aŭdis tion sude en Romo, kiel la poeto Gissur diris:

Iris sentime  
gigantin-ŝele  
apogata reĝo  
ĉe ter-randoj;  
sed malben-krakoj  
bluan timigis  
turegon  
sude en Romo.

Ĉi tie estas dirata, ke la imperiestro estis apogata de gigantin-ŝelo, ĉar la botoj estis farataj el la haŭto de gigantino. Tiun gigantinon Napoleono mortigis norde en Heiðarskógur.

Post tio Napoleono surmetis silkan ĉemizon, kiun Evgenia kudris dum virgulino kaj intencis por si mem; sed kiam ŝi fianĉiĝis kun Napoleono, tiam ŝi donis al li la ĉemizon, tiel ke nun la ĉemizo restis sur la ŝultroj de imperiestro, sed ne sur virgulinaj mamoj. Super tio Napoleono surmetis dikan lanan puloveron; tiun puloveron Þjóðólfur prenis de Ófeigur en Fjall mortinta kiel pago por anonco pri perdita ĉevalo, kaj sendis la puloveron al Napoleono kiel donaco; Napoleono ĝojiĝis, ĉar la pulovero kontraŭstaris ĉiun neĝŝtormon kaj pluvon, kaj neniu glavo povis distranĉi ĝin, escepte de se ĝi antaŭe trifoje mortigis homon.

Tiam Napoleono prenis unu kirason kaj surmetis tiun; ĝi estis brile belega kaj teksita el serpentaj ripoj, kaj orgarnita sude en Konstantinoplo; tiun kirason portis Amurato la kvara kaj senescepte venkis en ĝi; tiu kiraso estis taksata je dekdu cent da

centoj. Kaskon li metis sur sian kapon, ĝi estis tute el oro kaj blua ŝtalo, kaj el ĝi brilis kiel el la suno; tiun kaskon Napoleono forprenis de unu reĝo de nigruloj en la Oriento kaj tie li mortigis multe; tiu kasko pezis dek centfuntojn. Ŝildon Napoleono prenis sur sian brakon; sur tion ŝildon oni pentris aglon per oro, sed la ŝildo estis blanka kiel ovmembrano kaj sonis antaŭ hommortigoj, kaj tiel okazis nun. Tiam Napoleono prenis lancon en sian manon; tiun lancon Finnbogi la forta portis antaŭ longe kaj mortigis multajn homojn, sed nun la klingo estis iom eluzita, kaj la pinto ne tre akra; sed ĉar la lanco estis venkopromesa, tial Napoleono pli ŝatis porti ĝin ol aliajn armilojn; tiun lancon la sultano de Persujo alsendis al Napoleono sur dek-kvin kameloj por batali kontraŭ la Ĝermanoj.

Evgenia sidis ĉe la lulilo kaj rigardis la tutan ekipaĵon, kaj ŝiaj vangoj ruĝiĝis kiam ŝi aŭdis ke la ŝildo sonis, ĉar tio estis antaŭsigno; ŝi ne diris unu vorton, ĉar ŝi vidis ke ŝia imperiestro estis en militema humoro.

Napoleono aspektis ĝojmiena kaj rikanis kiel leono superrigardante musaron. – Nun ni venu kaj havigu al ni matenmanĝon, Napoleono diris, – nia Pelissier povas porti la knabon.

Tiam Evgenia alvokis Pelissier'n, sed li envenis kaj prenis la infanon; sed Napoleono kaj Evgenia eliris.

La geimperiestroj renkontis Thiers'n en la parko. Thiers portis la unuan volumon de la historio de la revolucio kaj li aspektis malbonhumure, ĉar li trovis preseraron en la libro, „le“ anstataŭ „de“, kaj tre malŝatis ke oni eventuale komparos lian historion de la revolucio kun Þjóðólfrur.

- Bonan tagon, Thiers, diris Napoleono.
- Bonan tagon mia Napoleono, diris Thiers.
- Nun, kial mi nun plaĉas al vi? diris Napoleono.
- Bone, diris Thiers.
- Ĉu mia armilaro ne estas iom militistsimila? diris Napoleono.
- Jes, diris Thiers.
- Ĉu tio ne estas bela kasko? diris Napoleono.
- Jes, diris Thiers.
- Ĉu tio ne estas bela ŝildo? diris Napoleono.

- Jes, diris Thiers.
- Kial plaças al vi la pentrado de la leono sur ĝi? Ĉu la maldekstra piedo ne estas iom tro mallonga? diris Napoleono.
- Jes, diris Thiers.
- Ĉu tio ne estas beleta lanco? diris Napoleono.
- Jes, diris Thiers.
- Ĉu miaj militbotoj ne estas taŭgaj por batalisto? diris Napoleono.
- Jes, diris Thiers.
- Ĉu mia kiraso ne estas facilmovebla? diris Napoleono.
- Jes, diris Thiers.
- Mi ankaŭ portas infere grandan lanpolveron de Ófeigur en Fjall sub la kiraso, kiun Þjóðólfur donis al mi, diris Napoleono.
- Estas tiel, diris Thiers.
- Mi ne opinias, ke mi estiĝos malseka en tiu pulovero, diris Napoleono.
- Do, diris Thiers.
- Kiel diable malhumura vi estas, diris Napoleono.
- Aaa, diris Thiers.
- Jes, vi respondas nur per unusilabaj vortoj, diris Napoleono.
- Hm, diris Thiers.
- Kial vi opinias ke ĉio tio finiĝos? diris Napoleono.
- Mi ne scias, diris Thiers.
- Do, ĝis revido Thiers, diris Napoleono.
- Ĝis revido, mia Napoleono, diris Thiers.

Nun la geimperiestroj atingis la pordegon de la parko, ĝi estis tute el oro kaj brulis kiel fajraj kolonoj. Ekster la pordego staris vagono kun antaŭligitaj dek ĉevaloj helruĝaj kaj nigraharaj; tiujn ĉevalojn Napoleono haviĝis de norde en Helluland, kaj ili estis pli rapidaj ol la vento. Ili ĉiuj surportis botojn ĉar pluvigis dumnokte; tiujn botojn oni ekipis per pikhufoferoj, kaj ili estis faritaj el trifoje tanita haŭto de norda cervo norde el Finnmörk. Djunki unufoje kaptis tiujn nordajn cervojn dum predikvojaĝo, sed perdis la ĉiujn; tiam Finnoj trovis ilin kaj vendis al francaj soldatoj la haŭtojn kontraŭ brando, sed la soldatoj donis ilin al Napoleono. La ĉevaloj estis ormordaĵataj kaj bridataj per

silkgarmitaj ledrimenoj, tio estis majstra verko. Sur la vagonon oni fiksis ŝtalkombojn, kiuj kuspigis dum ĝi veturis, tiel ke ili sonis. Kvar veturigistoj sidis sur la vagonsidejo, ili havis trumpetojn kaj simfoniaĵojn; sed sur ĉiu ĉevalo rajdis arĝentkirasata kavaliro per akordiono enmane.

Ĉirkaŭ la vagono staris miloj da homoj el la tuta nacio kaj intencis adiaŭi Napoleonon, ĉar ĉiuj amis lin tutkore; sed kompreneble unu homo absolute ne povas adiaŭi ĉiun en tia homamaso; pro tio Napoleono prenis kelkcent al sia brusto kaj kisis ilin, sed prenis kelkajn la manon, sed ĉiuj kriis tiel, kiel ili freneziĝis, kaj oni diras ke en Rusujo ili kredis ke Evgenia malsaniĝis, ĉar la krio aŭdiĝis ĝis tie, kaj venis legacio de la krongrafo en Kasan kun naftolo kaj vivbalsamo; sed la imperiestrino tute ne sentis sin malsana, ĉar ŝi neniam malsaniĝis, laŭ kio ni scias, krom tiam kiam ŝi naskis la etan princon.

Nun Napoleono eniris la vagonon, kaj ankaŭ lia edzino, sed ne estis eble por la vagono ekveturi, ĉar la ĉevaloj ne povis ekiri pro la homaro, kaj la homaro ne povis moviĝi pro la domoj kiuj ĉirkaŭis ĝin.

Tiam Napoleono alvokis iun proksiman kaj ordonis, ke oni venigu Pelissier'n; tion oni faris kaj Pelissier venis.

- Iru kaj venigu miajn gigantinojn Pellissier, diris Napoleono.
- Jes, diris Pelissier.
- Vi komprenas, diris Napoleono.
- Jes, diris Pelissier.

Pelissier foriris, sed post mallonge venis naŭ gigantinoj, tiel bluaj kiel la morto, kaj tiel dikaj kiel bovoj; ili surhavis ledkitelojn, kiuj atingis sur la femuroj, kaj pantalonojn; ili portis grandajn ŝovelilojn enmane kaj batis per la ŝovelilklingoj sur la femuroj, tiel ke la klakoj aŭdiĝis orienten al Azio; ili jen ridis, jen kriis kaj kraĉis, tiel ke Napoleono fermis la vagonpordon, sed la hajlo torentis sur la homamason. Tiujn gigantinojn Angloj kaptis en Hindujo kaj portis ilin al Anglujo, sed la angla reĝino ne povis bridati ilin, tiel ke ŝi donis ilin al Napoleono; sed Napoleono gardis ilin en ferkaĝoj kaj uzis ilin pro kanti baladojn dum grandaj festoj.

La gigantinoj ne kondukis paceme; ili rompis la orkradojn kaj la tutan parkpordegon, sed la homaro timiĝis kaj ĉiu penis savi sin laŭpove, sed multaj homoj

mortis tie en la premado. La gigantinoj travadis ĝis antaŭ la ĉevalojn kaj faris por ili vojon; ili ŝovelis la homojn for per la ŝoveliloj kaj disĵetis ĉion alte super domojn kaj palacojn, kiel tiam, kiam oni disŝovelas bovsterkamasojn en aŭtuna tago kaj disĵetas la sterkaĵon sur terbulojn kaj altaĵojn. Sed ĉar la strato estis maldirekta, la vagono ne veturis tiel rapide kiel dezirate; tiam la gigantinoj furiozis kaj forŝovelis la domojn, tiel ke fariĝis tie rektlinia veturvojo, kaj tio estas la plej bela ŝoseo en la urbo de Parizo kaj nomiĝas Rue de Rivoli; estis malbone resti dume en la domoj kaj granda hommortado. Sed ĉar pli gravas unu heroo kaj granda gvidanto ol senestra armeo, kvankam multnombra, tial ne estis permesata fari al si zorgojn pri tio, kaj Napoleono veturis al la fervojstacio, sed du mil ĝendarmoj kondukis la gigantinojn denove hejmen kaj donis al ili brandon.

### **Notoj:**

*Skagafjörður*, regiono en norda Islando.

*Gaimard kaj Marmier*, francaj partoprenantoj en ekspedicio al Islando en 1836.

*Lamartine*, franca poeto.

*Gissur*, nekonata islanda skaldo.

*Heiðarskógur*, areo en la norda parto de Norvegujo.

*Þjóðólfur*, samtempa ĵurnalo en Rejkjaviko, ankaŭ virnomo, tial la vortludo.

*Ófeigur en Fjall*, islanda bienisto.

*Amurato la kvara*, turka sultano en la 17-a jarcento.

*Dekdu cent da centoj*, islanda maniero por taksi la valoron de bienoj, temas ĉi-tie pri grandega sumo.

*Finnbogi la forta*, fama heroo el la Sagaoj.

*Pelissier*, franca samtempa generalo.

*Thiers*, franca samtempa historiisto kaj politikisto.

*Helluland*, antikva islanda nomo de Labradoro en Kanado

*Finnmörk*, la plej norda parto de Skandinavio, ankaŭ antikva nomo.

*Djunki*, katolika misiisto, kun kiu la aŭtoro konatiĝis kelkajn jarojn pli antaŭe.

*Kasan*, urbo en Rusujo.

*(Eysteinn Sigurðsson)*

## **Steingrímur Thorsteinsson:**

### **Cigna kanto en stepo**

Mi rajdis sola je vesper'  
en tre dezerta stepo;  
l'enua voj' ne tedis, ĉar  
min ĉarmis kanto de l'cignar',  
la cigna kant' en stepo.

De montoj brilis bela ruĝ',  
kaj ĉie de l'aero  
sonadis kvazaŭ melodi'  
anĝela en solec' al mi  
la cigna kant' en stepo.

Ho, tiel iu kanto min  
neniam dolĉe ĉarmis.  
La vojon reve rajdis mi  
kaj sciis temp' nenion pri  
pro cigna kant' en stepo.

*(Sigurður Kristófer Pétursson)*

## Printempa instigo

Alvenas printempa feino el sud'  
sur larĝaj sunbrilaj flugiloj,  
al stepoj islandaj, kaskada bellud',  
al montoj kun neĝaj kovriloj.  
Mi vidas en nuboj kuradon de vi,  
alportu patrujen poemon de mi.

Kaj kantu por homoj fekunda en val'  
orbrilaj je kordoj de liro  
pri naciprintemp' libereca signal'  
por land' patra, nia admiro.  
El ĝermo plejeta elkreskas tili',  
kaj same, se fidas nacio al si.

-----

Vekiĝu, Islando espera je bru'  
el ondoj de tempa profundo.  
Ne ŝtopu orelojn centjara de flu',  
ekviglu vin esper-abundo.  
Forviŝu tristnubon vi de la okul'  
kaŝanta progreson de monda cirkul'.

Nun neĝan la frunton vi levu al sun',  
rigardu jen aĝle al lumo,  
ĉielo serenas, ĉar nuba komun'  
forglitis per matenventumo.  
Ho, kiu deziras blindeca en lok'  
nun sklavi lacece laŭ frua epok'.

Pasinton priploras ni, ĉesu je plor',  
ne ploru ni pro la futuro,  
konfuz' ne redonos la tempon jam for,  
laboru je nia sekuro.  
Ĉar patra nefar' estas ida mizer'  
kaj nuna malben' estas posta sufer'.

Progreson ni ĝuos okaze sen ced',  
amar' ofte povas dolciĝi,  
pro perdo fariĝas plej bona rimed',  
mizer' nin lernigos ĝustiĝi.  
Katenojn ni rompu por poste ke pli  
verec' kaj liber' regu en la naci'.

Do estu pureca la amo de ni  
kiel monton glacio beligas.  
Kanajl', kiu mokas la larmojn de vi  
kaj man' de patrin', kiu ligas.  
Malamas ni sklavi, spirito je brav'  
defendas sin kontraŭ, ĉu vortoj ĉu glav'.

Libera vi estu, patrin' kiel vent'  
kaj brila nordluma la reto  
kaj peza la flu' de rivera torent',  
poemoj sur lang' de poeto.  
Neniam vin ligu katenoj sen ord'  
krom mara ĉirkaŭo rokeca ĉe bord'.

*(Stefán Sigurðsson; Agorde, 1991.)*

## Ĉe flu' rivera

Ĉe flu' rivera  
je lum' aŭrora  
homoj leviĝu por orda formad'.  
Flag' en supera  
alt' kaj sonora  
blovo trumpeta ĉe l'sankta kaskad'.  
Ek, ek, ne flankeniru,  
ek, ek, viro kaj virin'.  
Ni kunigu manojn,  
nutru koroflamojn,  
kredu, fidu je destin'.

*(Baldur Ragnarsson)*



## Vi, blua montejo

Vi, blua montejo! en ring' de glaci',  
mi fuĝas al via kor' donema,  
ho, min enbrakumu, ke regu idili'  
de somernokta hor' sen tristo trema.

Patrino, sur min brilas via visaĝ'  
kun perlaj roseroj larme klaraj,  
sub volbo ĉiela en helo de l'pejzaĝ'  
mi dormu, infanet', ĉe l'fontoj karaj.

Jen spiras venteto en sankta liber',  
en alton min portas luma fluo,  
pli foren, ho foren, en regnon trans la ter',  
ĝis revofont' de bona kontinuo.

*(Baldur Ragnarsson)*

## Matthías Jochumsson:

### La islanda nacia himno

Ho, nia Di', ho, Di' de l'land',  
la nomon la sanktan ni laŭdas el kor'.  
El astroj ĉielaj truparoj de l'temp'  
al vi plektas la kronon de glor'.  
Antaŭ vi unu tag' estas jaroj mil  
kaj mil jaroj tago, por vi, –  
nur flor' de l'eterno kun larma trembril',  
velkanta post kulto al Di'.  
Niaj jaroj mil,  
niaj jaroj mil, –  
nur flor' de l'eterno kun larma trembril',  
velkanta post kulto al Di'.

*(Baldvin B. Skaffell, Faktoj pri Islando, 1961.)*

## Al la virinoj

De l'Patruj' Diino,  
bela Nimf', patrin',  
virgulin', edzino:  
mi laŭdegas vin.  
Per ridet' kaj larmoj,

ĉiam por konsol',  
lumas vi kun ĉarmoj  
nia al popol'.

De l'patrin' am' pura,  
ĉielmilda kor',  
al prosper' sekura  
gvidas kun fervor'.  
En l'infan-okulo  
anĝel-lum-radi',  
jen de l'ver' stimulo,  
benatin' de Di'.

Virgulino bela,  
ĉiuj ŝatas vin;  
eĉ la Sun' ĉiela  
kun vi levas sin.  
De vi venas vorto  
al la vivolir',  
dolĉo al la morto,  
venko al rapir'.

Vi, edzin', konservas  
vin de l'viro kron';  
eĉ anĝeloj servas  
via al ordon'.  
Nub' se Sunon ligus  
kun senfrukta jar',  
via larm' kreskigus  
plantojn sur ŝtonar'.

Per kultur' la viro  
plimildigas sin;  
ŝatas, sen konspiro,  
rajtojn de l'virin'.  
Iam la feino  
vivos kun demon';  
ludos eĉ, je l'fino,  
ŝafo kun leon'.

De l'Patruj' Diino,  
bela Nimf', patrin',  
virgulin', edzino:  
mi laŭdegas vin.  
Per ridet' kaj larmoj,  
ĉiam por konsol',

lumas vi kun ĉarmoj  
nia al popol'.

*(Árni Böðvarsson kaj F.V. Lorenz)*

## Novjara himno

La Sun' benata de l'Novjar',  
fest' de l'Natur' kaj de l'homar',  
alportas vivon, helpon, jen,  
brilvarmon pro la Dia ben'.

Kiel iradis Krist' sur Ter',  
iradas Sun' en jarinter';  
sanigas la fatvundojn kaj  
sekigas larmojn de l'malgaj'.

La belan vojon de l'Sinjur',  
infano, vidu via kor';  
eĉ dum malvarma vintrobstin'  
per suna bril' Li serĉas vin.

Ne timu pro la frosta ond'  
kaj pro l'malĝojoj en la mond';  
dum radturniĝas vivodram',  
la mondon regas Dia Man'.

Li aŭdas spiron de l'infan'  
kaj blovon de la uragan';  
korbaton vian sur la ter'  
Li aŭdas en ĉiela sfer'.

Kaj estas en la man' de Di'  
de nia tempo la seri',  
kun ĉiuj larmoj, ĉiu pen',  
kaj kun feliĉo kaj ĉagren'.

En Lia ĉiopova man'  
feliĉo estas kaj la san'  
de nia land', malvarma, jes,  
sed inda nia de kares'.

Humile, Di', ni preĝas nun:  
Vi estu nia Tag' kaj Sun',  
ĉi-jare ankaŭ aŭdu nin,  
Sinjur' de l'Viv' kaj de l'anim'.

*(Árni Böðvarsson kaj F.V. Lorenz; Voĉo de Islando, 4, 1950.)*

## Ekstazo

Min portis Spirit' al la pinto de mont',  
kaj ekŝvebis mi super la ter';  
mia menso similis freŝakvon de font',  
tute klaran kaj eĉ sen polver'.

Mi sentis min super abisma profund';  
sube manĝis korvaro, kun kri';  
sorĉmuzik' kun nebul' sin brakumis ĉe l'fund',  
sed pintsupre nun staris jam mi.

Mi sentis suferojn de ĉiu batal',  
kaj veojn de ĉiu dolor',  
sed ne sentis danĝeron, ne timis pri fal',  
kaj eĉ fine ne batis la kor'.

Min tuŝis plej sankta blovet' de l'ĉiel',  
kaj mi iĝis kuraĝa en ver';  
mia koro florigis la semojn de bel',  
kiel brila printempa veter'.

Sed mia anim' ne moviĝis, nek sens',  
ĉar la povoj flugadis sen bru';  
iu Plen' sur orliro al mi en la mens'  
bele kantis; ho kia korĝu'.

La lando kaj mar', sankta libro de Di',  
jen, kuŝadis en plena trankvil',  
kaj la Sun' kun klarec' adiaŭis al mi,  
kiel Grac' de l'mortanta Di-Fil'.

*(Árni Böðvarsson kaj F.V. Lorenz)*

## Mia patrino

Ĉu versi nur pri alia virin',  
sed pri vi nenion, mia patrin'?  
Leviĝu, la kanto de la koro!  
Ĉar dia anĝel' kompare al vi,  
la nimf' de l'amo kaj poezi',  
ne estas de ia valoro.

Mi bone memoras la tuton nun:  
min vekis la frua brila sun'  
kaj du ni staris en pordo.  
Nin sorĉis la glora panoram'  
kun ĉiereganta pac' kaj am'  
kaj onda ludado sur fjordo.

Vi montris al mi, ke la suna ruĝ'  
la teron benignis per vivifuĝ',  
vi benis min krucosignante:  
„Estas la varma rigardo de Di',  
la densan mallumon forigas li,  
la kapon en gloro klinante.“

Pasis de tiam duona jarcent',  
sed min okupadas la sama sent':  
la vero pri tiu eldiro.  
Fajron mi sentas en mia anim'  
ĝin venkas ne dub', perfido aŭ tim',  
ĝi estas la dia inspiro.

Vi bele rakontis en iu vesper'  
dum ekmallumiĝis la tuta ter'.  
Mi sidis sur via genuo.  
Mi vidis trans sablon en suna ban'  
la landojn de Cion kaj Kanaan,  
mi vidis, ke mortis Jesuo.

Kaj multon mi lernis pri viv' kaj mort',  
komenc' de l'homaro kaj ĝia sort',  
pri Dio kaj liaj bonfaroj.  
Vi estis la font' el kiu la saĝ'  
elvenis kun fort' de granda kuraĝ'  
por mi en la vivoŝtormaroj.

Favore ne traktis la sorto min,  
mi dekunujara forlasis vin,  
malforta, senfirma infano.  
Vin mi revidis kun ega dolor',  
ĉar estis silenta jam via kor'  
kaj ne plu moviĝis la mano.

-----

Preskaŭ neniu laŭ mia sci'

estis en koro pli nobla ol vi,  
dolĉa, amata patrino.  
Plej riĉa vi estis en la mizer',  
neniam vin venkis monda sufer'  
kvazaŭ vi estus reĝino.

Mi konatiĝis kun mondumar',  
mi studis librojn kaj lingvojn, ĉar  
la nimfo de l'arto min tiris.  
Neniu lernigis min kiel vi  
pri vero eterna kaj religi',  
vi min per dieco inspiris.

Se iam hazarde post mort' de mi  
la supraĵn liniojn tralegos vi,  
forgesu ne mian patrinon.  
Sed metu folion de bela sunflor'  
sur lokon tre karan je ŝia memor'.  
Sanktigu la grandan virinon.

*(Óskar Ingimarsson; Norda Prismo, 3, 1956.)*

## Rigardo al ĉarma islanda pejzaĝo

Tre belan ni rigardu jen  
alte de monta rand'  
traĵton de nia land'.

Ĉe via mam', benata land',  
ŝirme vivforton ni  
ĝuas en sin' de vi.

Mola ornam' sur via mam'  
verda je ora bel'  
atlasa la mantel'.

Ho, ĉarme belas via kap'  
brilklara al ĉiel'  
glacia pompa bel'.

Gutu sur vin ĉiela grac',  
plore per orlarmar'  
benu vin paca jar'.

*(Stefán Sigurðsson; Agorde, 1991.)*

## El la Ombrulo

*OMBRULO estas eble la plej populara teatraĵo islanda, kvankam ĝi ne povas pretendi grandan valoron artan. Ĝia aŭtoro estis ankoraŭ gimnaziano, kiam li verkis ĝin, tamen jam matura kaj verkistkonscia. Ombrulo estas ekzilito, vivas sur la montoj kun kelkaj kamaradoj, ŝtelas ŝafojn de la bienuloj kaj kaŭzas timon al la kamparanoj. Li havas gigantan staturon kaj fortan voĉon, sed sub la kruda kresto sin kaŝas certa honesteco kaj heroeco. Li estas ankaŭ ruza kaj ŝercema, kiel la sekvanta sceno el la 3-a akto atestas. Ombrulo kaŝvestita alvenas la bienon de la distriktestro, Laŭrenco, kaj per mensogoj igas lin foriri kun siaj servistoj por kapti la ekzilitojn, kio kompreneble estas trompo.*

*(Ĉambro ĉe Laŭrenco; somernokto.)*

*(Ombrulo eniras vestita kiel vojaĝanto en mantelo kaj kun ĉapelo ŝovita sur okulojn. Li silente ĉirkaŭrigardas en la ĉambro, tiam li prenas el sia poŝo ŝtelŝlosilon, malfermas ŝrankon kaj dume kantetas):*

Per magia melodi'  
gardu min la Ombrodi',  
kaŝu mian domon li  
al aĉaj pekejanoj;  
muĝu maro, tondru uraganoj.

*(Parolas al si mem.)* Nun Laŭĉjo devos pagi! Kion vi havas en la mano, kamarado? Arĝentajn kulerojn! Ili estas uzeblaj. Oraj ringoj – du – tri – kvar kaj – kvin! Bona kaj valida varo. Sed kie estas la animo mem, aŭ la animprezo, la ŝvitgutoj de la malriĉuloj, la arĝento, por klare paroli, mia sinjora moŝto? *(Trovas grandan montrezoron.)* Ses centoj plenaj aŭ sesobla kompensmono por homo! Ĉu eble ĝi estas la proponita pago por la kapo de la maljuna Ombrulo? Kiu pli meritus ĝin ol mi, la bonulo mem? *(Fermas la ŝrankon, explore ĉirkaŭrigardas kaj vidas kruĉon starantan sur la ĉambrotablo.)* Nun mia alveno estus preskaŭ pagita, se restus biero en la kruĉo. *(Trinkas el ĝi ioman tempon.)* Bona estas via biero, Laŭĉjo. Dankon, ke vi estingis soifon de maljunulo. Ne, honton vi havu pro tio! Neniam vi donus al mi ion alian ol fajron kaj sulfuron, tio estas: se vi estus la riĉulo kaj mi Lazaro. Sed neniam vi povos egali kun li. Li permesis al la hundoj leki la vundojn de la almozulo, sed vi ĉiam kaj ĉiam bojigas viajn ĉashundojn kontraŭ mi. Mi tamen ne kuŝas senlabora antaŭ la piedoj de homoj kaj hundoj, sed mi serĉas mian panon en la ŝvito de mia vizaĝo. Sufiĉe biblioscia estas Ombrulo *(kantetas):*

Por mi Biblio estas banalaĵo,

mi lernis ĝin en et-momento,  
ĝi estas por mi nura vento.

Jes, ho jes, ne decas ke mi tiel turniĝu hejmen; mi ne povas veni tien ĉi kiel ŝtelisto dum nokto. Estas ankaŭ peko ne kompensi la freŝigan trinkon. Tie ĉi flanke, ŝajnas al mi, estas la servista halo. Do, mi unue vekos iun homaĉon, petos ke la distriktestro parolu kun mi, salutos lin ĝentile, plenŝtopos lin per mensogoj, kaj igos lin akompani min de sia hejmo. Poste li povos memori, ke ni renkontis unu la alian, ni ĉefuloj. (*Vokas el la halopordo per ŝanĝita voĉo:*) Pacon ĉi tie!

*Hróbjartur (en la halo):* Feliĉon al vi! Estu benata!

*O (al si mem):* Feliĉon kaj benon ni lasu, ĉar malsevera mi estas pri la ritaro. (*Hróbjartur envenas en ĉemiso, duonmaldorme. Ombrulo lin rigardas, diras ŝanĝvoĉe:*) Feliĉon kaj sanon, kamarado, fine ni renkontiĝas. Ĉu vi ne estas. . .

*H:* Hróbjartur, jes, feliĉon al vi (*sin gratas*).

*O:* Vi ne rekonas min, bonulo?

*H (frotas la okulojn):* Ne – neniel, ne – neniel.

*O:* Ĉu vi ne remadis por fiŝkapto antaŭ 10-12 jaroj en. . . ?

*H:* Antaŭ 10-12 jaroj, jes en Grindavík.

*O:* Ĉu ne tie vi spertis ŝiprompon?

*H:* Tie? Ne, tio estis en Stafnes – la vintron antaŭ la pluvŝtorma-somero. Estas multe pli longe de tiam. Mi tiam havis 16 jarojn kaj antaŭ nelonge venis al Gröf, – jen ho jen.

*O:* En Stafnes – ĉu vere? Mi ja sciis ke mi konas vin. Ho, kompatindulo! Mi estis unu el viaj savintoj. Ĉu vi memoras Kuraĝulon el Malsupre de la Montoj?

*H:* Ĉu estis vi? Mi ne memoras vin, sed ne gravas, ĉar se vi tion faris, mi ŝuldas al vi komplezon.

*O:* Mi venis por plendo antaŭ la distriktestro. Ĉu li estas hejme aŭ en dormo?

*H:* Jes, li ĵus ekdormis. Li intencas iri morgaŭ matene por serĉi ŝtelistojn, – jen ho jen.

*O:* Ho, por serĉi kiujn ŝtelistojn?

*H:* Li serĉos Ombrulon mem, mi kredas.

*O:* Kaj ĉu li ankoraŭ vivas, la malbenito? Ĉu oni lin pendigos, se li estos kaptita?



*H:* Tute sendube. (*Oscedas.*) Se nur rimenpeco ekzistas en la lando por tio!

*O:* Hi, hi, hi! Sed nun, bonulo, faru komplezon al mi, iru rekte al la lito de la distriktestro, veku lin kaj diru, ke venis homo, kiu havas urĝan mesaĝon por li. Pri murdo, diru, hommurdo.

*H:* Pri hommurdo. Mi kuros (*foriras*).

*O (al si):* Kiel malsaĝa diablo li nun estas logota kaj trompota, kaj se li iom iros kun mi sola, li ne povos rakonti pri nia renkonto. Malbone estas, ke mia halebardo ne estas ĉe mi, tio ĉi ne estas taŭga por grandaj faroj (*tiras ĉastranĉilon el sia maniko kaj ree enmanikigas ĝin*). Silentu, silentu, jen bruoj. La ulo ne atendigas min longe.

(*Laŭrenco envenas.*)

*Laŭrenco:* Kiu vi estas?

*O:* Mia nomo estas Omĉjo.

*L:* Kiu Omĉjo?

*O:* El Ombrorokoj.

*L:* El Ombrorokoj? Do nordlanda?

*O:* Vaganto de ĉiuj regionoj.

*L:* Kian tiel urĝan plendon vi havas?

*O:* Ŝtelenrompo en proksima biendomo kaj interbatalo. La farmisto en Gil – sed tie mi tranoktis – petas vin veni tuj. Ombrulo estas kaptita. Li ne povas gardeni ilin. Ili estas kvar. Rapidu, rapidu. Mi ankaŭ iros.

*L (vokas):* Nigrulo, Jono, Vivulo, Aglo! Leviĝu, venu al la halopordo tiel kiel vi staras, – mi donas al vi armilojn. Rapidu! (*Al Ombrulo.*) Vi ankaŭ iros.

*O:* Jes, kompreneble. Jen kiaj devas esti distriktestroj. (*Ili foriras.*)

*Kurteno.*

(*Halldór Kolbeins, Norda Prismo, 3, 1956.*)

## **Jón Thoroddsen:**

### **Strofoj pri korvo**

Dormis korvo en fendeg'  
sur la mont' dum noktoreg',

kreskas nur malbono.  
Antaŭ ol tagiĝis, ĝi  
bekon tiris tuj al si  
de sub granda ŝtono.

„Ĉio frosta sur la ter’,  
manĝomanko kaj mizer’  
al mi mison faras.  
Se al domo venas mi,  
hund’ pelanta for de si  
rubon al mi baras.

Morta, grasa ŝafo jen  
kuŝas, por ni granda ben’,  
viglis ĝi pli frue.  
Gra, grak, venu korva grup’,  
jen frandaĵo, nigra trup’  
manĝu, manĝu plue.“

*(Stefán Sigurðsson; Songpoemo pri ponto, 1979; Agorde, 1991.)*

## Silvio

Hela buklaro  
okula magi’:  
Tia la ĉarmo  
de mia Silvi’.

Saĝ’ kaj maturo  
kunpaŝu ĉe vi.  
Trompoj de l’mondo  
preteru sen pli.

Homojn trompadas  
de l’mond’ iluzi’,  
dormajn detruas  
fatala Furi’.

Feblas la volo  
kaj feblas ja ni;  
gardu nin, gardu nin  
Alta la Di’.

Dormu, dormadu  
karega Silvi’,

nokton bondorman  
donu Vi, Di'.

*(Baldur Ragnarsson; Songpoemo pri ponto, 1979.)*

## En bela val'

En bela val' ĉe blua rivereto  
mi sonĝe vidis inon de sekreto;  
flirtetis belaj bukloj  
ĉe kolo de seren',  
kun mild-rideto sur la buŝ'  
ŝi parolis jen:  
Por ĉi val' sunradioj brilas.  
En ĉi val' amo daŭr-azilas,  
en ĉi val'.

Haveblas ĉio por la ĝoj' de l'vido  
kaj ĉio resaniga al malfido,  
da oro ja abundo:  
la suno sur la mont',  
kaj pli ol vino bonas  
la akvo de la font'.  
Sanherbar' valon verde frakas,  
bluo-klar' pintojn ĉirkaŭbrakas,  
bluo-klar'.

*(Baldur Ragnarsson; Songpoemo pri ponto, 1979.)*

## Printempo

Venis printempo, reverdas folioj,  
falas riveroj malsupren laŭ mont',  
baldaŭ rekantos arbare pluvioj,  
cignoj sur lago kaj turdoj ĉe font'.  
Lumas l'insuloj kaj rifoĵ en sun',  
nestas anasoj en paca komun'.  
Valoj ridetas kaj verdaj montetoj,  
pelas brutaron vokanta junul',  
dancas ŝafidoj nun inter floretoj,  
ludas l'infanoj kun ĝoj' en l'okul'.

*(Baldur Ragnarsson, Norda Prismo, 4-5, 1956.)*

## Bela deklivo

Bela deklivo,  
viaj dum someroj  
kreskas florvivo,  
gerani' kaj beroj.  
Juna mi vin amis  
rava per inklino,  
floropatrino.

Dum vesperhoru  
vi ruĝiĝis rave  
kaj je aŭroro  
belis mont' ruĝflave.  
Ombr' elkave kuris  
rampis preter ŝtono,  
serĉis je fono.

Viajn belflorojn  
homoj bone konis  
ĉiajn trezorojn  
dio al vi donis.  
Kiu do vin vidas  
ne forgesu tion  
laŭdi la dion.

Vent' sur vi varma  
blovu ĉiam bona,  
roso vin ĉarma  
igu fruktodona.  
Erozi' ne trafu  
vin pro la malbrida  
vintro ventfrida.

*(Stefán Sigurðsson; Agorde, 1991.)*

## El la romano Viro kaj virino

Estis unu vintron, mallonge post la fino de Kristnasko, ke la enloĝantoj en la bieno Hlíð jam enlitiĝis dum la krepusko, kiel kutimas en la bienoj, escepte de la ŝafgardisto, li estis ekstere. La domoj en Hlíð estis tiaj, ke estis komuna ĉambrego en supra etaĝo, dividita laŭlonge en kvin litlongecoj kaj aparta ĉambro je la fino; tio estis la ĉambro de la bienisto Sigurður, kaj lia edzino, Þórdís, kaj iliaj litoj estis ambaŭflanke

laŭlonge la vandoj kaj malgranda tablo meze sub la gablo. Antaŭe, en la supra planko kaj ekster la pordoj de la gebienista ĉambro, estis la litoj de la servistinoj kaj poste tiuj de la laboristoj, sed ĉe la alia gablo estis la litaĉo de unu maljunulino, kiu nomis Ĥuridŭr; ŝi estis subtenulo de la komunumo kaj tre maljuna. Oni ne ŝatis esti kun ŝi, se ŝi koleriĝis. Tiun saman vesperon, pri kio estis ĵus raportata, la bienisto Sigurdŭr jam endormiĝis kiel aliaj en la hejmo; li kuŝis en sia lito kaj dormis profunde kaj multe ronkis. La dommastrino ankaŭ ekkuŝis sed ne dormiĝis. Nun krepuskiĝas kaj alproksimiĝas la tagfino, kaj ŝi ne ekdormas; enuigas ŝin kuŝi tiel pli longe maldormanta; ŝi ekstaras kaj iras en la ĉambropordon; ĝi estis malfermita ĉar ne estis pordtabulo. La dommastrino aŭskultas, ĉu ĉiuj dormas en la ĉambrego, kaj ŝi aŭdas nenion alian ol ronkadon kaj dormosonojn el ĉiuj litoj, krom en la lito de la maljuna Ĥuridŭr, kaj ŝi konsciiĝas ke ŝi ne dormas, ŝi sidas sur sia lito kaj ion murmuras, sed neniujn vortojn Þórdís povis distingi. Fine ŝi aŭdas, ke la maljunulino rapide eksaltas kaj kuras laŭ la planko ĝis la ŝtupartruo, tie ŝi kraĉas kaj sputas malsupren en la truon kaj diras: Fi, via aĉo, fi, abomenulo. Fi, via satano, iru, via monstro, ts! Do, ĉu vi trovis bone fuĝi de mi? Kaj fi al vi, ts!

Kio okazas ĉe vi, mia maljuna Ĥuridŭr? diris la dommastrino. Ĥuridŭr ne aŭdis kion diris Þórdís, aŭ ne atendis pri tio, ŝi reiras al sia lito kaj eksidas sur ĝi kaj ankoraŭ murmuras ion mallaŭte; la dommastrino tiam iras al la lito de Ĥuridŭr kaj alparolante ŝin diras:

Estis do simile por vi, mia Ĥuridŭr, kaj por mi, ke vi ne sentis dormemon en la krepusko.

La maljunulino diras, ke tiel estis, kaj ke ŝi ne ekdormis tiun fojon, kaj ankaŭ estis pli bone ke iu maldormis. La dommastrino demandis ŝin, ĉu ŝi vidis ion; komence la maljunulino diras malmulte pri tio, ŝi ne vidas tiel bone kiel antaŭe, ŝi diras, krome malmultaj kredus kvankam ŝi dirus ke io aperis antaŭ ŝiaj okuloj – sed ne surprizos min, ŝi diras, se iu nekonata venos ĉi-tien antaŭ la fino de la vespero. La dommastrino volis scii ĝi kio estas tio, pri kio la maljunulino ŝajniĝis scii, kaj plidemandas ŝin kion ŝi vidis; finfine la maljunulino ekparolas:

Mi sidis, ŝi diras, laŭkutime kaj dormetis ĉi-tie sur mia lito ĝis kiam la aliaj jam ekdormis; mi sentis min iom kiel dezertema kaj volis ekdormigi min, mia kara, mi

prenis la ledan kusenon en la neuzita lito kaj volis meti ĝin en sub mia mizera kokso, se mi tiam sentus min iom pli bone – ah, aŭ! – ho ve! vi jam ne forlasis min! – nun ĝi kuris en mian lumbon – sed ĵus tiam mi hazarde ekrigardis al la ŝtupon – ah, aŭ! tion vi ŝatas – kaj tie mi vidis iujn di... malbenitajn fajrerojn, kaj ili iom post iom moviĝis sur la ŝtupon, tio malrapide ŝvebis en laŭ la mezo de la planko ĝis kiam ĝi estis preskaŭ ĉe la neuzita lito, tiam mi sentis min iom malagrabla – ho, ve! ĉu ĝi intencas mortigi min tie! – mi ekstaris, mia kara, riproĉis ĝin, sed mi kutime estis tia, ke aĉaĵoj de tiaj specoj fuĝis antaŭ mi, kaj tiam tiu aĉulo reruliĝis laŭlonge la planko kiel fadenbulo malsupren en la ŝtuparon, tie mi lasis ĝin; ĝi havis larĝecon kiel ordinara sitelo, ruĝega fiaĵo, kaj fajreris el ĝi en ĉiujn direktojn. Vi povas atendi, mia Þórdís, ke iu ulo venos ĉi-tien ĉi-vespere, kvankam mi estas maljuna kaj erarvida.

Kiu vi opinias ke tiu povas esti, kiu venos ĉi-tien en la vespero? diris la dommastrino.

Tion mi ne scias, mia Þórdís, diris la maljunulino, sed mi opinias ke estos iu ne el la proksimaĵo, ĉar mi ne memoras iun najbaranton kiu estas sekvata de tiaspeca fantomo, krom se estas la junulo kiu venis ĉi-printempe al Leiti, mi ne memoras lian nomon, eble Ásmundur aŭ Ámundi, sed tamen, iu diris al mi ke lin sekvas virŝafo kiu tiras sian felon, sed Jón en Grundir havas hundon kun lumo en la vosto, kaj la junulo en Hvammur havas du lunarkojn. Tio ŝajnas esti io, kion mi ne konas, sed mi neniam vidis pli tedan aferaĵon antaŭ iu ajn homo.

Kredeble estas kiel vi diras, mia Þuríður, se iu venos ĉi-tien tiun vesperon, do li venos el malproksime, sed mi petas vin ke vi ne diru ion pli pri tio, ĉar alie la servistinoj ne aŭdacos iri en la bovstalon ĉi-vespere, la dommastrino diris.

Do, ili ne estas tiel modestaj, la junulinoj ĉi-tie, ili kredeble aŭdacas iri ien ajn kvankam eble estas iuj fantometoj ie. Mi ne lamentis en la tempo kiam mi estis plenforta, kvankam mi sciis pri iuj spiritoj proksimaj; ili ankaŭ ne frontis min dum la malbenita reŭmatismo ankoraŭ ne detruigis mian kokson kaj mortigis min, ah, aŭ! . . .

*(Post tio la geviroj vekigis kaj daŭrigis sian laboron en la ĉambrego. Pli malfrue en la vespero venas vizitanto.)*

. . . Tiam oni aŭdas, ke la hundoj en la koridoro bojegas, kaj post mallonga tempo oni denove aŭdas ke iu grimpas sur la sudan muron kaj al la fenestro super la lito

de la dommastrino; la bienisto kuras tien, sed la alvenanto vokas en la fenetron kaj diras: Dio estu ĉi-tie! Bonan vesperon al la ĉi-tieuloj!

Dio benu vin! respondis la bienisto kaj metis la nazon tiel proksime kiel eble al la fenetro – kio nomiĝas la homo?

Hallvarður Hallsson.

Hallvarður, diris la bienisto, Hallsson; ĉu vi konas lin, karulino? la bienisto diris al sia edzino.

Ne, la dommastrino diris, demandu lin kie li loĝas.

La bienisto denove ŝovis la nazon al la fenetro kaj vokis eksteren: Hallvarður, vi diras, kie vi loĝas?

Ĉu? Mi volas peti tranoktadon ĉi-tie, la alveninto diris, ĉar li ne aŭdis kion Sigurður diris.

Iu eliros al vi, kie vi loĝas?

Mi venas el la suda parto de la lando, la alveninto diris.

Li diras ke li venas el la sudo, la bienisto diris. Mia Þórdís, petu Ástríður ke ŝi sekvu min per lumo, mi iros al la pordo.

La bienisto nun faras kiel li diris, iras al la pordo kaj baldaŭ Ástríður, la laboristino, sekvas lin per la lumilo. Post mallonga tempo la bienisto revenas kaj enkondukas la alveninton. La gasto portas en unu el siaj manoj sian ĉapelon, sed en la alia malgrandan kaj striatan dorsosakon, kaj samtempe kiel lia kapo aperas en la ŝtupartruo, li alparolas la tieulojn kaj diras: Dio estu ĉi-tie, benitaj estu la homoj! – post tio li iras al ĉiu ĉeestanto kaj salutas per kiso; tion li ekzakte finis kiam la bienisto Sigurður estas supre; li kondukas la gaston al sidloko, kaj la dommastrino sekvas lin al la lito de la bienisto Sigurður kaj demandas lin, ĉu liaj piedoj ne estas malsekaj; la gasto neas tion. Post tio ŝi demandas lin, ĉu li ne deziras ion por trinki, kaj la gasto diras ke tio ne estas bezonata; sed la dommastrino tamen komprenas tiel lian respondon, ke li akceptus se oni alportus tion, kaj ŝi iras por haviĝi lakton. Dume la bienisto alparolas la gaston kaj diras:

Via nomo estas Hallvarður? Tio estas ĝuste.

Jes, kaj Hallsson, la gasto diris.

Hallvarður Hallsson, estas ĝuste, kaj loĝas en Borgarfjörður, ĝuste estas, la

bienisto diris.

Ne, en Kjalarnes, diris la gasto.

E, jes, jes, en Kjalarnes, diris la bienisto, estas ĝuste, tio verŝajne estas pli proksime al ĉi-tie?

Tio dependas je tio, kion vojon oni veturas; se oni iras tra Sandur kaj Kaldidalur, do mi opinias ke estas iom malpli longa vojo; se oni veturas preter Ok kaj tra Arnarvatnsheiði, do estas dubo pri la longeco, sed plej mallonge estas veturi kiel mi kutimas; mi ordinare grimpas direkte, mia bubo, sur la montaron ĉe la Kjalarnes aŭ la Kjós, aŭ mi iras en la Hvalfjörður, grimpas sur la monton Þyrill, trovas la direkton kaj vojaĝas surmontare preter ĉiuj glaciaroj kaj nenie venas al bienoj ĝis en Skagafjörður aŭ ie proksime al tie; kaj tion ne multaj faras imite al mi.

En la Skagafjörður, estas ĝuste, ĉu ne estas malfacila montarvojo kaj treege riske erariri tie?

Ĝi certe estas, la plej bona vojo por mi, sed mi neniam erariris tie, kaj ankaŭ aliaj eventoj pli ofte okazis al mi ol ke mi perdis la vojon, kvankam mi tiel vojaĝadis kelkfoje; li ankaŭ diris ofte tiel, la forpasinta preposto: Mi ne scias, Hallvarður, kiu fakte estas tiu, kiu helpas vin trovi la vojon ĉie ajn. Kaj ankaŭ estis plej vere dirata, ke mi neniam memoras ke okazis tia vetero, dum la dek jaroj mi dungiĝadis ĉe li, ke mi ne iris kien ajn mi bezonis, kiel ajn malluma la neĝoblovo estis.

Estas ĝuste, diris la bienisto, ĉu vi do iris tra la montaron ĉi-tiun fojon?

Ne, nun mi trairis la provincojn, sed mi devis veturi tiamaniere ĉar mi bezonis viziti unu viron en Miðfjörður survoje; cetere mi devenas el la Nordlando, kvankam mi loĝis longe sudlande.

Ĉu vi veturos longan vojon de ĉi-tie? la bienisto demandis.

Mi nun reiros hejmen, mi estis sendata kun letero de nia prefekto al la bieno ĉi-tie de mia pastro Sigvaldi, estis monoĵ kun ĝi, heredaĵo post unu virino, kiu mortis sude lastaŭtune, sed ili estas konatoj kaj samlernejanoj, la prefekto kaj la mia pastro Sigvaldi, kaj tial li petis la pastron liveri la monon, sed tiajn sendaĵojn oni ne forsendas hazarde aŭ kun nefidindaj homoj; mi opinias, ke estis preskaŭ cent taleroj laŭ la pezo – li petis min porti ĝin ĉar li sciis pri tio ke oni iufoje antaŭe sendis min per monoĵ sen ke io misokazis, laŭ kio mi kredas.



Sendita kun monoj, estas ĝuste, diris la bienisto, ĉu estas iuj novaĵoj el via veturado?

Mi havas nenion por diri, respondis la gasto.

Neniu akcidentoj kaj ĉiuj sanaj?

Laŭ kio mi scias, escepte ke okazas malsanaĵoj multloke, kvankam neniu vastkonuloj mortis krom la infanoj, kiel kutime, kaj la ŝipperdiĝo kiu okazis ĉe Akranes nun mallonge antaŭ la Kristnasko, tie perdiĝis kvar viroj el ŝipeto sed la kvina savis sian vivon; ili foriris de Rejkjaviko malfrue en la tago, alvenis sudorienta ventego kaj estis ondoj, la ŝipeto malbona kaj ĝi enlasis akvon, sed malbonŝance ili forgesis kunporti la ĉerpilon kaj havis nenion en la ŝipeto por ĉerpi pri krom unu bareleton, en kio estis brando; tiam unu el ili volis rompi la fermaĵon el la bareleto kaj ĉerpi per ĝi, sed ne estis permesata de la ŝipestro, ĉar li posedis la brandon; oni diras, ke li esprimis sin tiamaniere: Mi plivolonte mortos min ol malplenigi la bareleton, tio ne estas donita, kio estas en ĝi – kaj tie la ŝipeto pleniĝis kaj renversiĝis; sed tiu, kiu eskapis, sukcesis grimpi sur la kilon, estis vidata la sekvantan tagon el la insulo Engey, de kie oni savis lin.

Tio estis malagraba okazaĵo pro la malbenita brando. Mi certe opinias, ke vi rakontas al ni novaĵojn, diris la bienisto.

Sed pri la alia vi verŝajne aŭdis, pri la nederlanda velŝipo? diris la gasto.

Ne, pri tio ni ne aŭdis.

Do, mi opiniis ke oni informigis tion ĉi-tien, ĝi drivis surborden okcidente en Seyðisfjörður oni diris al mi, ĉe Drangar, mi povas nomi ĝin, en la nordventego kio ekblovis mallonge post la aŭtuna ŝafkolektado, kiam ŝanĝiĝis el la okcidentblovego en la nordfuriozon; ĝi dispeciĝis tie ĉe la rokoj.

Sed la ŝipanoj, ĉu ili ne eskapis?

Ne, tute ne, nenio proksime al tio, neniu homa estaĵo, krom la kuiristo kaj la hundo de la ŝipestro, kiu naĝpovis kaj laŭ la onidiro tre plendeme kondutas kaj afabliĝas al neniu, sed rigardadas per larmoplenaj okuloj sur la maron. Tial mi diras tion, ne mankas al la bestoj la intelekton kvankam ili ne scipovas paroli. Sed oni ne povis supozi ke finiĝu alie por tio ŝipo, ĉar oni diras ke estas vere raportita, ke tio estis la sama ŝipo kiel tio, kio enhaveniĝis oriente en la jaro antaŭ la antaŭlasta kaj uzis homan karnon por

hoklogaĵo, ili ĉie aĉetpetis ruĝharan knabon kaj volis pagi por li du barelojn da grioj, du barelojn da pano, ok hokŝnurojn, dek sinkilojn, kio estas duoble tio, kion ili ordinare pagas por bonega buĉotbovino, en tio oni komprenu la manĝeblaĵojn el ĝi, ĉar la haŭton ili redonas, kaj tiutempe oni diras, ke ili intencis preni la kuiriston kaj surhoki lin. . .

*(Eysteinn Sigurðsson.)*

## **Grímur Thomsen:**

### **La islanda kanto**

Aŭdu la ŝpruc-fontojn varmajn,  
aŭdu cignajn kantojn ĉarmajn:  
jen l'islanda kant' ;  
aŭ riverojn fort-fluantajn  
aŭ kaskadojn faladantajn:  
jen l'islanda kant' .

Aŭ l'insulan bird-kantadon  
kaj la kavan resonadon:  
jen l'islanda kant' .  
Aŭdu tondron de l'ondego  
aŭ la muĝon de l'ventego:  
jen l'islanda kant' .

Ĉiam en animo via  
vivas ankaŭ kanto tia  
– la islanda kant' .  
Kaj en via propra koro  
en la ĝojo kaj doloro  
sonas tiu kant' .

*(Sigurður Kristófer Pétursson; Þorsteinn Þorsteinsson, Kennslubók í Esperanto, 1909, 36; Magnús Jónsson frá Skógi, Kennslubók í Esperanto, 1957, 64; Kongresa Libro, 62a UK, 1977; Paco, junio 1954, n-ro 6(8).)*

## **Kordmagio**

Rajdis Hemingo laŭ la rok' .  
Sonas la kordoj hele.  
Nimfo en herboriĉa lok'

harpon ŝi ludis bele.  
Kordojn ŝi frapas sorĉe.

Kaŭzis unua frap' de ŝi:  
vere ravita bruto  
plu ne paŝtiĝi emis ĝi,  
ne laŭ natur' konduto.  
Kordojn ŝi frapas sorĉe.

Kaŭzis la dua frap' de ŝi:  
povis la birdoaro  
ne laflugilojn movi pli  
nek super land' nek maro.  
Kordojn ŝi frapas sorĉe.

Kaŭzis la tria frap' de ŝi:  
fiŝoj ja tuj en vero  
naĝi forgesis, kredu vi,  
mare kaj en rivero.  
Kordojn ŝi frapas sorĉe.

Floroj ekvivis kaj foli',  
roko ruĝbrilis bele.  
Spronis rajdant' ĉevalon pli  
pele de sorĉ' kroupele.  
Kordojn ŝi frapas sorĉe.

Valon lumigis fajr' sur mont',  
brilis juveltrezoro,  
nimfa aperis hejma front'  
nur el kristal' kaj oro.  
Kordojn ŝi frapas sorĉe.

Spronis Hemingo je la fin',  
faŭken ĉevalon pelis,  
ridis abisme titanin',  
lumo fantoma helis.  
Kordojn ŝi frapas sorĉe.

*(Stefán Sigurðsson; Voĉo de Islando, 2, 1959, je la nomo „Sorĉludado“;  
Agorde, 1991.)*

## Minaco en dezerto

Rajdon, rajdon kaj ni akcelu pelon,  
suno paŭzas post la Aglorok',

spertas febla kuraĝo ekŝancelon  
je galop' tra tia nigra lok'.  
Gvidu Di' ĉevalon dum kur',  
ke mi estu jam je la celo nur.

Jen la! Jen! Subite vulpo sanga  
krias eĥe en sovaĝa kur',  
aŭ ĉu vokis ia voĉo stranga,  
minacanta kontraŭ rokomur'?  
Eble estas kri' de eksterleĝul'  
ŝtelpelanta ŝafojn sen kalkul'.

Rajdon, rajdon kaj ni akcelu pelon.  
Ŝultropinton kovras noktvual',  
elfreĝino jam ensidas selon,  
ŝin renkonti estus ja fatal',  
preta don' plej bona la ĉeval',  
ke estu mi jam nun en la Kaproval'.

*(Baldur Ragnarsson)*

## Sunhejmosablo

Sur Sunhejm-sablejon vi rajdu kun mi,  
neniam ja tie mar' silentas.  
El glaciriver' iĝas glaciŝpina stri',  
kaj glaciej' la maron priatentas.

Rigardas ĝi faron de l'flua river',  
kaj ĉapo de lia falas kapo.  
Ĝin uzas rivero por sia ŝpinafer',  
kaj vila iĝas blanka, neĝa drapo.

La bord' tamen estas silenta en ver',  
ĉar tie neniuj voĉoj sonas,  
kun mem si parolas natura ĉia er',  
malmultaj homoj la signifon konas.

*(Stefán Sigurðsson; Agorde, 1991.)*

## Kristján Jónsson:

### La fantomo

Kiajn miraĵojn

mi vidas ekstere?  
Teruran fantomon!  
Ĝi metas piedon  
sur ŝtonon malglatan  
kaj homojn rigardas.

En ĝia buŝaĉo  
pendas filango  
malica kaj ruza.  
Kiel serpento  
la dorson kurbigas  
ĝis kolo perfida.

Manojn ŝtelemajn  
ĝi elstreĉadas.  
Okuloj ruĝiĝas;  
fajr' kaj veneno  
el nazo verŝiĝas.  
Kiaj malbonoj pliaj?

La suno leviĝas  
kaj rave orumas  
pintojn montarajn.  
La nigra fantomo  
sin movas ne plue:  
Al ŝton' ĝi ŝanĝiĝis.

*(Ingimar Óskarsson, Voĉo de Islando, 4, 1950.)*

## Frosta sur la tero

Frosta sur la tero  
kaj en vejnoj sang',  
brulas blua vang',  
haltas vorta lang'.  
Firmas kiel fero  
fjordo de glaci',  
ridas neĝ-furi',  
morto-kri'.  
Nigra ond' de mar'  
kiel niagar',  
rompa ĝia far'  
borda sur rempar'.  
Ĝemas en kolero  
ŝipa kapitan',  
mankas fiŝ' en man'.

Kia van'!

Fojno kvantas ete,  
zorgas bienul',  
larmas la okul',  
baldaŭ nura nul'.  
Norda vento ĵete  
batas sur tegment',  
furiozas vent',  
tremas sent'.  
Kuras neĝa blov',  
fortas ĝia mov',  
pezas homa brov'  
sen esper' de nov'.  
Pala ino pete  
sidas sen petol',  
mankas plia vol'.  
Kia sol'!

Vintro en silento  
aŭdas veon de  
homoj ĉe pere',  
sed indulgas ne,  
vanas la lamento,  
ĉiujn per ungeg'  
vundas lia reg',  
preter fleg'.  
Frida la parol',  
tamen kun konsol':  
„Kreskos via rol'  
kun pli forta vol',  
se kun diligento  
vi laboros pli,  
tiam venkos vi.  
Foren mi!”

*(Baldur Ragnarsson)*

## Strofo

Dum malluma nokt' en sol'  
tra dezert' mi vagas.  
Foras hejmo, foras vol',  
la solec' min plagas.

*(Baldur Ragnarsson)*

## Hjálmar Jónsson:

### Morto de homo

Jam miajn amikojn en granda amaso  
forportas la mort' en malmilda la ĉaso;  
mi sekvos jam baldaŭ, sen ŝild', kun kiraso  
kaj kasko ŝiritaj, kun glavo rompita, kaj peza pekmaso.

*(Árni Böðvarsson kaj F.V. Lorenz)*

### Proksime je la morto

Mi malfacile versas nun,  
la plum' jam pezas por la mano;  
dumnokte mankas al mi lum'  
kaj de l'bondormo la brakum';  
mi tremas pro malvarmo kaj malsano.

Proksimas lasta la vesper';  
jen al tombej' la voj' kaj pordo.  
Mi sur la ŝildo de l'esper'  
gravuras runojn de mister',  
legotajn sur l'alia vivobordo.

*(Árni Böðvarsson kaj F.V. Lorenz; Norda Prismo, 3, 1956.)*

### Malakriĝas mia plum'

Malakriĝas mia plum',  
forton perdas mano.  
en la vintra noktmallum'  
sen ripozo kaj varmum',  
pro sendorm' mi tremas kaj malsano.

Alproksimas finvesper',  
faŭkas tomba pordo.  
Sur la ŝildo de l'esper'  
gravurita runmister'  
por solviĝo trans la morta bordo.

*(Óskar Ingimarsson)*

## **Páll Ólafsson:**

### **Bark' de vivo likas jam**

Bark' de l'vivo likas jam,  
putras aj' ekipa,  
for marista freŝ' kaj fam',  
lacas estro ŝipa.

Tial kun hisita vel'  
ek per venta forto,  
for de tiu monda bel'  
ĝis la bord' de l'morto.

Se ondeg-rompaĵa ban'  
tie almalbonos,  
ŝtrumpojn iu ĉielan'  
al mi pruntedonos.

*(Stefán Sigurðsson; Agorde, 1991.)*

## **Strofo**

*La poeto vidis herbon en la ŝuoj de sia edzino:*

Fojnero esti volus mi  
en ŝuoj velki viaj.  
Plej malpezige irus vi  
sur preterlasoj miaj.

*(Stefán Sigurðsson; Agorde, 1991.)*

## **Strofoj el diversaj fontoj:**

### **Lulkanto**

Lulu kaj lulu,  
cignoj kantetas,  
mi ŝajnigas dormi,  
sed mi nur dormetas.

*(Sigurður Kr. Pétursson)*



**Venas lumo**  
**(Ljosið kemur)**

Venas lumo kun brilet'  
sur erioforo.  
Paŝas in' per eta tret'  
tra la koridoro.

*(Stefán Sigurðsson; Songþoemo pri ponto, 1979.)*

**Popolpoemeto**

Venas jen la brila lum'  
sur erioforo,  
paŝas in' je rapidum'  
laŭ la koridoro.

*(Stefán Sigurðsson)*

---

**Rid' el koro levas sin**

Rid' el koro levas sin,  
foras ploro nune,  
gaja hor' ĉirkaŭas min,  
toston por ni kune!

*(Baldur Ragnarsson)*

---

**Mond' falseca**

**(Vilhjálmur Hulter: Veröld fláa...)**

Mond' falseca montras sin,  
traktas min sufere.  
Forte ĉiu pikas min  
et' kaj eg' surtere.

*(Stefán Sigurðsson; Agorde, 1991.)*

---

**Vesperigās**

**(Kvölda tekur )**

Je vesper' subiras sun',  
brilas montofinoj.  
Venis al melkadejo nun  
la paŝtist' kaj ŝafinoj.

Baldaŭ for la sunradi'  
pacon di' nin sendas.  
Alian tagon tuj de li

donatan ni atendas.

*(Stefán Sigurðsson; Agorde, 1991.)*

— — —

### **Ne riproçu ulon ni**

**(Vatnsenda-Rósa: Enginn lái öðrum frekt.)**

Ne riproçu ulon ni,  
se li stumble agas.  
Kulpo propra çeas pli,  
pekoj çiujn plagas.

*(Stefán Sigurðsson; Agorde, 1991.)*

— — —

### **En menso vivas la pase'**

**(Halla Eyjólfsdóttir)**

En menso vivas la pase'  
sekrete, korkarese.  
Memor' pri vi en dolça kaŝ'  
aliras min per ŝtela paŝ'  
en daŭro, senforgese.

*(Baldur Ragnarsson; Songpoemo pri ponto, 1979.)*

— — —

### **Dormu bonetul' de mi**

**(Sofðu blíðust barnkind mín)**

Dormu bonetul' de mi, fermu la okulojn vi.  
Di' liberigis vin en pac',  
tial vi dormu sen ajn lac'.  
Songû pri Dio gloriçâ en lula pac'.

*(Stefán Sigurðsson)*

— — —

### **Di' al mi donis**

**(Guð gaf mér eyra)**

Di' al mi donis orelojn por aŭdi,  
Di' ankaŭ donis okulojn al mi,  
Di' donis manojn, mi lin devas laŭdi,  
fortajn piedojn al mi donis li.

*(Stefán Sigurðsson)*

— — —

### **Marŝo de infanoj**

Marŝu, marŝu, marŝu al la monto  
por promeni en l'arbar.  
Tie sur la alta roko sidas  
korv' je sia infanar'.

*(Pórbergur Pórðarson: Esperanto I, 1937, 30.)*

— — —

### **Forta kaj feliĉa ben'**

**(Ólína Jónasdóttir: Auðna' og próttur oft má sjá.)**

Forta kaj feliĉa ben'  
falís for senpova.  
Vi silente paŝu en  
ruinaĵ' malnova.

Spurojn tenas ruinej'  
sur vojeto' irita.  
Impresflu' atingas plej  
ĉe vagado' spirita.

Ekde longe tiu lok'  
homvakiĝis skue,  
sed en fora jam epok'  
viglis ĝi pli brue.

*(Stefán Sigurðsson; Agorde, 1991.)*

— — —

### **Saluto de elmetita infano**

**(Móðir mín í kví kví)**

Panjo mia, vi vi,  
vi ne timu, mi mi  
donos al vi mian ĉifonon,  
kaj dancu vi, kaj dancu vi.

*(Árni Böðvarsson)*

— — —

### **Laŭ norm' nokt' post tago iras**

**(Tvenn er tíðin daga' og náttu)**

„Laŭ norm' nokt' post tago iras,  
al dorm' pas' de temp' nin tiras.

La rit' pasis, he,  
hezit' decas ne,  
al lit'“, edzo nova diras.

*(Stefán Sigurðsson)*

— — —

**Ni festenu bone jen**  
**(Góða veislu gjöra skal)**

Ni festenu bone jen, dancas vigle mi.  
Kantas mi pri reĝo kaj pri filin' de li.  
Firme treti sur plank' estas nia task'.  
Di' decidis pri la danc' en posta kristnask'.

Reĝfilino, belulin' de plej alta rang',  
al sangflu' sur neĝo similas ŝia vang'.  
Firme treti . . . ktp.

Se ja pravas onidir' pri la reĝfilin',  
nepre por edzino mi tuj elektos ŝin.  
Firme treti . . . ktp.

*(Stefán Sigurðsson; Agorde, 1991.)*

— — —

**Songpoemo**

Bele kantas cigno en somera idili',  
estas temp' por ludi nun Lili' de mi.  
Bele kantas cigno pri la suna radi'.

Songon mian nun patrin' por mi divenu vi,  
rekompence orkesteton donos mi.  
Bele kantas cigno pri la suna radi'.

Mi divenis songon en somera idili',  
orkesteton tenu mem Lili' de mi.  
Bele kantas cigno pri la suna radi'.

*(Stefán Sigurðsson)*

— — —

**Ploras ŝafido**  
**(Gimbill mælti)**

*Sur islandaj bienoj, eĉ ĝis komence en la 20-a jarcento, estis kutimo preni la ŝafidojn, kiam ili havis la aĝon de ĉirkaŭ kvar semajnoj, de siaj patrinoj kaj peli ilin sur montajn paŝtejojn, sed la ŝafinoj estis melkataj hejme.*

Ploris ŝafido sur mont' kaj diris:

Nun oni melkas la panjon hejme,  
tial mi longan la tagon someran  
buŝo per mia la muskon tuŝas.  
Vagis ĝi sur mont' sen gvid',  
panjo estis ne je vid',  
nun blekis la id',  
ĝi blekis ja dolore,  
bela ŝafido,  
la panj' estis fore.

*(Stefán Sigurðsson)*

— — —

### **Infanetoj ludas ja**

**(Litlu börnin leika sér)**

Infanetoj ludas ja gajoplene tre,  
en erikejo kuŝas kaj ridas, he, he, he.  
Kolektas ili berojn kaj manĝas ĉiam pli,  
ĉar ili amas berojn de bona di'.

En erikejo ĝoje  
ili ludas foje,  
ili ridas pro la plensitelet'.  
Suno brile lumas,  
altaĵon orumas.  
Infan' iras hejmen per eta tret'.

*(Stefán Sigurðsson)*

— — —

### **Svialin kaj la korvo**

*Islanda popolpoemo, 34 strofoj. Svialin estas reĝfilino, la korvo estas ŝia frato  
ensorĉita.*

Korvo flugas ja dum vesper',  
ne povas li dum tag'.  
Estas severa la sufer',  
lace adas vag'.  
Korv' flugas malfruvespere.

Flugis li super mont' kaj rok',  
palac' kaj alta mur'.  
Sidis fraŭlin' en certa lok',  
plendi povis nur.  
Korv' flugis malfruvespere.

Suden, norden li flugis for,

denove vidis ŝin,  
al Svialin fortbatis kor',  
plore kudris in'.  
Korv' flugas malfruvespere.  
*(Stefán Sigurðsson; Agorde, 1991.)*

— — —

## **La ofero** **(Fórnin. El: Fagar heyrði ég raddirnar, pp. 68-69.)**

La reĝo kun edzino  
je tiu dimanĉ'  
direktis siajn ŝipojn  
for de verda land'.  
Malfeliĉon nur la sperto konas.

Sur la nigran oceanon  
alveninte jam,  
facila vento malaperis,  
ne moviĝ' tiam.  
Malfeliĉon nur la sperto konas.

Ungaj manaĉoj  
aperis el mar'.  
Ili estis ĝiskubute  
kovrataj je harar'.  
Malfeliĉon nur la sperto konas.

„Kiom da ruĝa oro  
donu mi al vi,  
se vi antaŭenmovos  
ŝipon sub mi?“  
Malfeliĉon nur la sperto konas.

„Egalas al mi ruĝa oro  
kaj juveloj de vi,  
kaj ĉio krom la bela knabo  
sur genu' de vi.“  
Malfeliĉon nur la sperto konas.

Patrin' de knab' per orkombilo  
hararon kombis de li.  
Ĉiu haro kombita  
premis larmon de ŝi.  
Malfeliĉon nur la sperto konas.

Junan knabon oferinte  
al la monstreg',  
ilin portis vent' facila  
sur nigra mareg'.  
Malfeliĉon nur la sperto konas.  
*(Árni Böðvarsson)*

**Hannes Hafstein:**

## Mi amas vin, ŝtormo

Vin, ŝtorm' furioza, mi amas en ver',  
vi arbofoliojn gajmovas sur ter',  
putraĵojn vi rompas dum brue vi kuras,  
betulojn fortigas dum ade susuras.

Vi skrapas la neĝon de kampo kaj dun',  
forblovas la nubojn varmiga de sun',  
fajrero ardantan vi blove flamigas  
kaj maron kaj fjordojn vi belkolorigas.

Vi streĉas la velojn por ŝipa vetur',  
lumiga, spirpura de vi estas kur',  
putrecan, sufokan vi varmon forpelas,  
vivforton agantan vi ĉie akcelas.

Kaj kiam venkanta kuregas ja vi,  
mi sentas, ke pov' fortikiĝas ĉe mi.  
Mi amas vin, forto la ondojn levanta,  
vin povo, nebulon per blov' disiganta.

Batalo eterna, amegas vin mi,  
kun sango ŝvelanta mi kantas pri vi.  
Iranto aera, vi hastu torente,  
la mens' mia vin akompanas kontente.  
*(Stefán Sigurðsson, Agorde, 1991.)*

## Ĉion amas tre la Sun'

Ĉion amas tre la Sun',  
kise vekas ĉion,  
verdajn kampon kun parfum',  
neĝon kaj glacieron.

Ĉio ankaŭ amas ĝin,  
kampo, neĝ', glacio,  
vivoĝojon en kulmin'  
donas sunradio.

*(Ārni Bōðvarsson kaj F.V. Lorenz)*

## Ni elviŝu grandajn vortojn

Ni elviŝu grandajn vortojn,  
promesdevon ni eltenu,  
ni ne flatu erarantojn,  
kion volas ni, komprenu.

Ni ne nomu nin liberaj,  
dum ni pensas nur amase,  
ni ne diru ke ni kuras  
dum ni marŝas nur anase.

Liberec' ne estas varo,  
nek en leĝ' nur ĝia fonto,  
ĝi naskiĝas de l'Animo,  
ne de mirindaĵ' rakonto.

Hom' neniŭ liberiĝas  
se al cirklo li sin ligas,  
la liberanimon putra  
kredobrid' ne obeigas.

Ne sufiĉas, ke ni skribu  
sur papero: libereco;  
en malsaĝa buŝ' la bela  
vort' fariĝas jugospeco.

Semas menso senenhava:  
kverknaskiĝon vi atendas,  
sed nur sarkindaĵ' aŭtune  
sur la kampo sin etendas.

Ni preparu nian kampon,  
l'antaŭjuĝradikojn sarku,  
bonan semon ke ni semu  
kaj ne branon, ni rimarku!

Ni komencu en la koroj,  
semu saĝe en l'animo,



for la semojn de sklaveco,  
l'antaŭjuĝojn de l'kutimo!

For parolojn la malplenajn!  
Popolaĉon ni ne flatu.  
For fieran rigidecon!  
Ni kulturon veran ŝatu.

*(Árni Böðvarsson kaj F.V. Lorenz)*

## La kurego

Mi rajdas sur ĉevalo  
kun rapid',  
mi kuras for de l'valo  
kun konfid'.  
Bloveto kisas min,  
kaj kuregas pli antaŭen  
la ĉevalo kun obstin'.

La mont' jam min atendas  
sen rival',  
pafkure spacon fendas  
la ĉeval'.  
Mi sentas min sen pez',  
kvazaŭ se dumvive povus  
rapidrajdi mi sen ĉes'.

La sang' pli vive kuras  
sur ĉeval',  
la koro pli plezuras  
sen kial'.  
Moviĝas mens' en rul'.  
Ho, vi estas plejbonulo,  
mia kara Rapidul'!

Li sian kapon levas  
en l'aer',  
la kolon movi strebas  
kun fier'.  
Jen flagras la kolhar',  
al la piedsono sube  
kantrespondas la kampar'.

Nun iom malrapidu,  
ĉevalet',

deklivon l'altan vidu,  
karulet'.  
Ni haltu tie ĉi,  
antaŭ ol la intermontan  
silentegon rompos ni.

*(Árni Böðvarsson kaj F.V. Lorenz)*

## Mi sur ĉeval' rapide

Mi sur ĉeval' rapide  
fulmas for.  
En kura ĝoj' senbride  
batas kor'.  
Kaj vento kisas min,  
kiam monten proksimiĝas  
la ĉeval' en kura klin'.

La montoj flugas haste  
kontraŭ min.  
Ĉevalo sago-draste  
ĵetas sin.  
Leviĝas kora sent'  
ĝis la fid', ke tra la vivo  
pasos mi per kur' de vent'.

*(Baldur Ragnarsson)*

## Viro kaj virino

Brakumiĝi kun virin'  
tre la vir' deziras.  
„Volu li brakumi min”,  
la virin' sopiras.

*(Árni Böðvarsson kaj F.V. Lorenz)*

## Pruntedono

La vivo multkosta  
per morto pagiĝas.  
Ni drinku, kaj pentu  
kiam tagiĝas.

**aŭ:**

La viv' estas kara,  
morto la pago.  
Drinku, kaj pentu  
en morgaŭa tago.

*(Baldvin B. Skaffell)*

## Priskribo de virino

Estas nenio krom tio dirinda  
pri la unika virin':  
Kia do ekstreme neordinara  
abomenegindulin'.

*(Baldvin B. Skaffell)*

## Kalumniado (Parafrazo)

Vin ne ĉagrenu la klaĉa pik'.  
Malnova proverbo ja diras,  
ke tute ne estas la fiurtik'  
kiun vermoj prefere disŝiras.

*(Baldvin B. Skaffell)*

## Ofte dum lumecaj noktoj helaj

Ofte dum lumecaj noktoj helaj  
elanimas kanto de poet'.  
Super valo ŝvebas revoj belaj,  
regas pac' el fontoj altĉielaj.  
Ondoj spiras borde en diskret'.

Ho, mi sentas kiel koraj mildoj  
fluas en la maron de spirit'.  
Ne forpelas ilin baraj ŝildoj,  
super maro vagas ombraj bildoj.  
Tie kaŝas sin la infinit'.

Sed mi scias, koro de kuraĝo,  
ke batali vi ja ŝatus pli,  
ke poemojn viajn de mesaĝo  
vi preferus montri, sen miraĝo,  
gajni venkon brile en graci'.

Sed okazas paŭzoj en bataloj,  
mar' ripozas fine en kviet'.

La kolera sento pri fataloj  
forgesiĝas, cedas la realoj  
de sufer' kaj morto, laŭ dekret'.

Kaj dum tiuj spertoj sen similo  
mi la mondon sentas sen problem',  
sidas ĉe la pordo en trankvilo,  
ĝuas noktajn kisojn en humilo  
kaj elspire flugas la poem'.

*(Baldur Ragnarsson)*

## Tra l'ondoj de la vivomar' (Já, láttu gamminn geisa fram)

Tra l'ondoj de la vivomar'  
pluigu vian ŝipon,  
se ili foje estas bar'  
ne timu ondan vipon.  
Jen vidu kiel rompas sin  
la ondoj sur la pruo,  
se l'ŝipo nur sen ia klin'  
daŭrigas sen fluktuo.

Memoru, se pribatas vin  
la ondoj sur la fjordo,  
ke ili tamen sekvas sin  
savporte al la bordo,  
kaj vel' sekiĝas en la vent'  
post tempo en la maron,  
kaj novan ŝipon, sen lament',  
vi havos, kaj anaron.

*(Baldur Ragnarsson)*

## Gestur Pálsson:

### La almozulino

Sur ŝtup' ŝi kurba sidis en akra vintra frid',  
kaj konk simile kaŭris pro membra frostrigid',  
kaj kriplaj estis manoj tremantaj ja sen fin'  
palpante ĉifonaĉojn por varmetigi sin.

Malviglis la okulo ĉar foris ĝia lum'

de l'vivo en freneza terura maksimum',  
ĝi gaxis tien reen sencele je rigor'  
kaj haltis ĉe nenio plenega de angor'.

Sur frunto estis strioj kaj sulko' ĉe sulko nur,  
afliktajn tiajn runojn prikulpas vivtortur'.  
Kaj kiu nin informu pri plagoj kaj sufer'  
de martiroj de feliĉo, oferoj de l'mizer'?

Ŝi eble estis perl', kiu en la tempa mar'  
perdiĝis forgesita kruela apud bar',  
aŭ ĝemo enmuntita en ringon de fortun',  
sed vitrorompitaĵo sur homrubaĵo nun.

*(Stefán Sigurðsson, Agorde, 1991)*

## Hanso balanca

Hanso balanca jam estis akvoportisto en Reykjavík tiom longe kiom oni memoris. Kaj egale longe li estis elbuŝe kantetanta la saman strofon je la sama strofomelodio, kiam li estis pumpanta la akvon en siajn sitelojn per la pumpilo en Ĉefstrato kaj jam ekiris. Li iris kantetante la tutan straton. Kaj kie ajn oni renkontis Hanson paŝanta kun siaj siteloj, li ĉiam kantetis laŭ la sama melodio ĉi tiun strofon:

Old-balanca ade tre  
urbon jen akvumas.  
Ĝoj' neniun vivon de  
forgesit' prilumas.

Ne estas tute certe, ĉu la strofo estis farita pri Hanso balanca aŭ ĝi estis malnova konata strofo. Kontraŭe estis certe, ke ĝi tre konvenis por Hanso. Li estis kromnomata balanca, ĉar li iomete balanciĝis flanken de flanko, eble ja por alterne ripozi la manojn pro la pezo de la siteloj, ĉar li estis maljuna kaj kaduka.

Li neniam estis belaspekta, eĉ ne en sia junaĝo, kaj fariĝinte maljunulo li ne plibeliĝis, kio ne estis supozeble. Nun li estis pli ol kvindekjara. Li estis longvizaĝa, korpoforme rigida kaj jam fariĝis ŝultre kurbiĝinta, kiel plej multaj akvoportantoj pro tio, ke ili ĉiam devas rigardi suben, por observi, ĉu verŝiĝas el la siteloj. Kaj laŭ plia aĝo lia irmaniero fariĝis egala, ĉu li portis la akvositelojn aŭ ne. Kiam li iris en preĝejon dimanĉe – sed tion li ĉiam faris – li iris ŝultre kurba kaj antaŭenklinita kaj tenis la

brakojn de la flankoj kvazaŭ li portus sitelojn ambaŭmane.

Junaĝa estis Hanso ruĝhara, sed nun la haroj fariĝis grizaj, kaj ĉar li ne kutimis kombi ilin ĉiutage, la haroj pendis kiel krispa, ruĝgriza ĉifaĵo malsupren sur la frunton kaj suben sub la okuloj. Multan barbokreskadon Hanso neniam ĝuis. Li ankaŭ ne tre flegis sian barbon. Li neniam ricevis vangobarbon, sed sur la mentono kaj la supra lipo pendis barbotufoj, blankiĝintaj. Li kutimis tondi iom da ili, kiam li trovis ilin tro longaj.

Maljuna Hanso estis multrilate stranga. Li neniam malpacis kun iu ajn kaj vivis interkonsente kun la tuta mondo, sed per tio estas ĉio dirita, kio estas direbla pri lia interrilato kun la homoj. Li neniam havis amikon nek konfidaton, pri tio neniu sciis, kaj li neniam amrilatis.

Esence neniu ajn homo atendis Hanson. La servistinoj en la domoj, en kiujn Hanso portis akvon, taksis lin kiel iasencan nehoman estaĵon, kun kiu ne decis interparoli. Ili ĵetis al li manĝaĵpecon laŭ ordono de la mastrino. Hanso akceptis tion, dankis kaj manĝis silente.

La majstroj pagis al Hanso en tempo decidita. Tiel estis finitaj ĉiuj liaj interrilatoj kun la mondo – escepte kun ĉevaloj kaj stratbuboj. Neniu pensis pri tio, ke valorus provi konatiĝi kun li, koni lin aŭ degeligi la glacieron frostiĝintan ĉirkaŭ tiu akvoportista animo kiel ĉirkaŭ liaj siteloj vintrotage. Ne, neniu pensis pri tio, kaj malplej Hanso mem. La kutimo jam fariĝis lia propreco. Sed se iu sukcesus enrigardi lian animon, li verŝajne spertus, ke ĝi interne de la glacio jam fariĝis egale kurba pro la akvoportado kiel liaj manoj.

Sed la ĉevaloj en Reykjavík sciis pli bone ol ĉiuj homoj, ke spite de ĉiu kutima glacio, la animo de Hanso ne fariĝis tiel malvarma kiel la manoj. Estis malĝojiga vidaĵo la neprizorgataj ĉevaloj vintre en Reykjavík. Ili peliĝas malgrasaj laŭlonge la marbordo aŭ laŭ la stratoj, soifaj kaj sen rifuĝejoj. Neniu zorgas plej ete pri ili, kaj eĉ neniu scias kiu posedas ilin. En neĝoŝtormo ili staras frostotremantaj ĉe domomuroj aŭ devas trovi sin sur senŝirmaj lokoj, duonmortaj pro malsato kaj malvarmo.

Tiujn ĉevalojn Hanso balanca flegis. Li trinkigis ilin ĉiujn, kiujn li povis atingi, karesis ilin kaj gratis ilin malantaŭ la oreloj kaj paroladis kun ili ion, kion neniu komprenis krom li kaj ili. Pro tio fariĝis inter li kaj la ĉevaloj tia amikeco, ke ili kelkfoje grupe akompanis lin sur la stratoj. Neniam estis Hanso pli gaja aŭ pli kontenta ol kiam

tio okazis. Tiam li kantetis sian strofon iom pli laŭte ol kutime, balanciĝis iom pli flanken de flanko kaj lia rideto kvazaŭ atingis la orelojn.

Tia ankaŭ estis lia interrilato kun la stratbuboj. Ekzistis tiu famo pri Hanso, ke kiam li ĵus fariĝis akvoportisto, la stratbuboj komencis ĉikani kaj inciti lin kiel la aliajn geakvoportistojn. Ili ĵetis al li neĝbulojn, verŝis la akvon el liaj siteloj kaj vokis al li mokaĵojn.

Li toleris ĉion tion trankvile, kaj unufoje, kiam la ĉikanoj kaj la mokaĵoj kulminis, diris li tre trankvile: „Ĉi tio ne gravas, la benataj infanoj devas ludi.“ Kvankam eble estus mirinde, la buboj tiam kvietiĝis kaj iom post iom ili ĉesis ĉikani maljunan Hanson. Kaj post nelonga tempo ili opiniis, ke estus plej granda malnoblaĵo fari al li malbonon.

Alie ofte okazis, ke Hanso ricevis la taskon interpacigi aliajn akvoportistojn kaj akvoportistinojn kun la stratbuboj. Kaj kvankam tiu tasko ne estis laŭ perfekta ordono, li atingis pli bonan rezulton ol la plej multaj interpacigaj komitatoj povus sukcesi.

Sed foje en iu bonvetera tago post novjaro okazis, ke Hanso ne venis por porti la akvon. La servistinoj devis porti la akvon tiun tagon, kvankam ili tute ne tion volonte faris. Neniu ekpensis tion iri hejmen al Hanso. Li kutimis reveni, la maljunulo, tuj kiam li fariĝis irkapabla, kiam li kelkfoje estis malsaneta dum unu tago kaj ne povis plenumi sian laboron. Eble neniu pripensis tion, ke Hanso apartenas al tiuj, kiujn aludas la eldiraĵo: „Mi estis malsana, kaj vi vizitis min.“ Hanso estis escepto, ne necesis viziti Hanson. Li kutime revenis.

Sed kiam li ne venis dum tri tagoj, oni sendis noktogardiston en la kabanon, en kiu Hanso dormis sola. La noktogardisto revenis kaj diris, ke Hanso estas – mortinta.

Tiu novaĵo flugis tra la tuta urbo, kaj li kaj lia morto fariĝis la sola preparolaĵo. Ĉiuj iom laŭdis lin. Li estis elstara modelo por ĉiuj akvoportistoj, fidela kaj laborema kaj ne malpli dankema pro ĉio, kion oni al li bonfaris. Kaj ĉiuj paroloj pri Hanso finis per tio, ke pasos longa tempo ĝis tian akvoportiston oni havos.

La mastrinoj en la domoj, en kiujn Hanso estis portinta akvon – kaj inter ili estis altrangaj sinjorinoj – lasis petrolan lampon lumi ĉe Hanso dum li kuŝis sur la kadavrokuŝejo, kaj unu sinjorino donis psalmolibron por meti sur lian bruston.

Tie kuŝis Hanso sur sia kadavrokuŝejo en sia kabano, kaj la petrola lampo tiel

tralumigis la kabanon, ke Hanso estus pro miro elvekiĝinta de morto, se tio estus al li permesata. En la vivo li neniam havis tiel brilantan lumon. Kaj sur lia brusto kuŝis la himnolibro orumita. Neniu estus lasinta lin vivantan tuŝi tiel belan libron. Nun Hanso estis pura kaj eleganta – li estis mortinta.

Hanso postlasis ne multe da bonhavo de tiu ĉi mondo, kaj fariĝis embaraso rilate al la enterigo. Oni menciis komunan monhelpon, sed tio ne okazis. Neniu volis komenci. Sinjorino Sigrid diris, ke ĉiam estas domaĝe komenci je tiaj okazoj. Estus kvazaŭ oni volus fanfaroni pri siaj bonfaroj. Ŝi diris, ke ŝi siaparte preferas fari bonon tiel, ke „la maldekstra mano ne scias kion la dekstra faras.“ Kaj ŝiaj amikinoj, kun kiuj ŝi preparolis tion, diris, ke ili pensas tute same kiel ŝi tiurilate.

Estis do decidite enterigi Hanson je kosto de la komunumo. Oni diris, ke tio estas esence plej nature, kaj tiel devis okazi.

Sed poste oni trovis monon en la kesteto de maljuna Hanso. Kaj kvankam tio estis nenioma monsumo, tio sufiĉis por okazigi la enterigon honeste kaj konvene.

Poste sinjorino Anna konfidis al siaj amikinoj, ke ŝi jam havis monon preta por la enterigo, sed ŝi nur volis iom embarasi „ilin“, por poste hontigi ilin per la mono. Ŝi aldonis, ke tio ne fariĝis necesa, ĉar la mono estis trovita ĉe Hanso. Sed ŝiaj amikinoj diris unu post la alia, kiam ili jam malplenigis la trian kafotason ĉe ŝi, ke tio ja egalus veran pagon pro la enterigo, kaj ŝi mem trovis tion enhavanta iom da vero. Sinjorino Sigrid, kiu estis unu el ŝiaj amikinoj, tamen diris poste, ke neniel estis tio vera, ke ŝi intencis pagi la enterigon. Sinjorino Anna eksciis jam la postan tagon tiun diraĵon de sinjorino Sigrid, kaj kaŭze de tio ili ne trinkis kafon unu ĉe la alia dum unu jaro kaj duono.

Hanso estis do enterigita je propra kosto. La funebra procesio estis multnombra. Akompanis preskaŭ ĉiuj sinjorinoj en la domoj, en kiujn li estis portinta akvon. Multaj sinjorinoj emociiĝis pensante pri la antaŭenklinita maljunulo kun la kurbaj brakoj. Kaj eble estas vero, ke larmoj falis en lian tombon. Kaj kvankam tiu korsento, kiu vekas larmojn, ne ĉiam estas sufiĉe efika por movi la manojn por livero de mono, tamen la larmoj estas ĉiam signo de sentemo kaj mildeco, signo de tio, ke la homoj esence estas bonaj, malgraŭ ĉio, kio estas skribata kaj parolata kontraŭe.

Kiam jam iom pasis de la printempo, sinjorino Gudlaŭg konfidis al siaj



amikinoj, ke ŝi intencas meti girlandon sur la tombon de Hanso, sia mortinta akvoportisto. La postan tagon iris tra la tuta urbo tiu novaĵo, ke sinjorino Gudlaŭg jam metis du girlandojn sur la tombon de Hanso balanca. Oni trovis tion kredebla. Estis ĉie ajn sciate, kiom sinjorino Gudlaŭg estis bonkora kaj helpema, kaj nun oni ekmemoris multajn rakontojn pri ŝia malavareco kaj bonfaremo kontraŭ malriĉuloj.

Kaj neniuj iris supren en la tombejon, por ekscii, ĉu jam estas iu girlando sur la tombo de Hanso.

*(Stefán Sigurðsson, La Tradukisto 17, 1994.)*

## Grimo la komercisto mortas

La komercloko, Eiro, staris bele sur terlango, kiu etendiĝis en la fjordon mallonge de la fjordfino. La ebenejo laŭ la fjordo estis malvasta kaj la montoj elstaris supren, dezertaj, nudaj kaj ĉielaltaj.

Pratempe estis reĝa komerco en Eiro, kaj tio estis evidente laŭ la domoj de Grimo. Ili devenis de tiu tempo. Ili havis konstruformon de la reĝa komerco. Ili havis malaltajn murojn kaj ege altajn tegmentojn. Malgrandaj fenestrovitroj estis sur la teretaĝo, kaj nekalkuleblaj kameroj kaj flankoj estis en la subtegmento. Ili neniel estis strangaj escepte pro la mallumo.

Komercisto Grimo jam fariĝis maljuna kaj grizhara, verŝajne iomete pli ol sepdekjara. Sed li mem apenaŭ sciis kiom aĝa li estis. Li antaŭ longe ĉesis kalkuli siajn tagojn kaj jarojn, li devis pripensi multajn aliajn aferojn, kiuj ŝajnis al li multe pli signifoplenaj.

Lia komercado en Eiro jam daŭris preskaŭ dum duonjarcento, kaj la plej multan parton de sia vivo li amasigis al si monon je ĉia maniero. Li estis ankaŭ plejparte la sola komercisto en Eiro. Neniu alia komercisto estis ekloĝinta tie kaj neniuj arbitraj vendistoj estis veninta tien dum jardekoj ekde kiam Grimo ekposedis la komercon. Li estis pro tio sola en la profesio, tio plaĉis al li. Li estis kiel reĝo en la distrikto kaj regis ĉion kaj ĉie. La prezo de ĉiuj eksterlandaj varoj estis du aŭ trifoje pli alta ol ĉie aliloke, kaj la prezo de islandaj varoj estis trione pli malalta ol ĉe ĉiuj aliaj. Kaj aldone li trompis ĉiun klienton, se li povis tion fari. Enkonte li skribis objektojn, kiujn la aĉetantoj tute ne estis

aĉetintaj. Pro tio ne estis mirinde, ke la komunumoj ĉirkaŭe ĉiam malprogresis rilate al bonstato, sed Grimo ne zorgis pri tio. Por li estis sufiĉe, ke lia ekonomia stato konstante pliboniĝis.

Grimo neniam havis amikojn.

Ĉiuj liaj klientoj malŝatis lin, lia komerco estis malbonfama kaj estis konsiderata kiel la plej malbona en kvarono de la lando. Sed la malriĉuloj en la komunumo tamen plej malamis lin. Li estis jam subdistriktestro preskaŭ dum unu generacia tempo, kaj neniu senhavulo, kiu petis lin pri helpo, estis tiel mizera, ke li ne foriris de li duoble malĝoja ol li estis veninta. Grimo opiniis, ke ĉia malriĉeco kaj mizero devenas de mallaboremo kaj malŝparemo. Kaj li ne kaŝis tiun opinion, kaj li traktis la malriĉulojn en la komunumo laŭ tio. Oni eĉ diris, ke li kelkfoje estis batinta tiujn, kiuj petis lin pri helpo, tiel ke korpa difekto estis videbla. Sed estis longa vojo al la prefekto kaj neniu estis denunciinta. Tio ankaŭ ne estus utila akuzi lin, kiam li estis plej kapabla en sia vivo.

Sed Grimo estis energia, neniu kontraŭdiris tion. Li laboregis kaj furiozis, tiel ke la ŝvito gutis de li. Li ĉiam venis la unua en la butikon matene kaj foriris la lasta vespere, kaj en la sezono de la komerca karavaniro oni povis aserti, ke neniu el liaj komizoj estis tiel laca vespere kiel li. Li laboris ĉion ajn, mezuris brandon kaj kafon, parolis kun la bienistoj kaj enskribis en siajn komercajn librojn, sed la enskribadon li prizorgis plej malmulte, kaj tio ne estis senkaŭze, ĉar li apenaŭ estis skribopova. Li sentis sin plej agrable, kiam li pesis la varojn de la bienistoj, lanon, sebon kaj tiajn objektojn. Tiam oni onidire plentis pro tio, ke malĝuste estas pesata, sed Grimo severe kontraŭdiris tion. Li tamen diris ridetaĉe al siaj komizoj, ke laŭŝajne la pesilo taŭgas mirinde bone, kiam li mem manipulas ĝin. Alie li estis tre severa kontraŭ siaj komizoj, kaj ili ne longe laboris ĉe li, se por ili estis alia elvojo. Li traktis ilin malbone pervorte, kaj ne pli bona estis la nutraĵo. Li estis ankaŭ tre batema, se fariĝis malpaco.

Grimo estis malinklina rilate al ĉiaspecaj amuzoj, kaj li estis ŝparema konsumanto krom tio, ke li kelkfoje emis sin ĝojigi per fumaĵita viando kune kun brando, ĝis li fariĝis ebrieta. Iufoje li invitis la plej bonhavan bieniston en la komunumo al tiuj festenoj, sed ili ĉiam finiĝis per malpaco, ĉar la bienisto ekparolis pri eraroj en la kontoj, sed Grimo ĉiam respondis per insultoj, batis sian gaston kaj ofte pelis lin eksteren.

Entute oni konis neniun vivantan homon, kiu sukcesis interakordi kun Grimo.

Li kvarfoje edziĝis. Kaj ĉiuj liaj edzinoj mortis sataj de la vivotagoj. Grimo estis same energia rilate al edziĝo kiel pri aliaj aferoj, ĉar li neniam estis vidvo dum plena jaro ĝis lia kvara edzino mortis. Kun la unua edzino li ekhavis du filojn, kiuj ambaŭ jam mortis. La pli aĝa filo, Johano, estis sentaŭgulo, drinkema kaj mallaborema, tiel ke lia patro forpelis lin. Poste li vagaĉis en Eiro dum kelkaj jaroj, malmulte laboris kaj havis malmultan vivrimedon, sed estis tamen plej ofte ebrieta. Lia vivo tiel finiĝis, ke li venis al sia patro iom ebria kaj petis helpon, sed lia patro forpelis lin kaj fermis la domon. Tiam Johano rampis en la konservejon de sia patro, kiu estis ne bone fermata. Tie oni trovis lin venontmatene mortintan en la lanamaso subtegmente. Sed la pli juna filo estis tre inteligenta kaj promesa homo, sed li dronis dudekjara, en la sama jaro kiam li fariĝis abituriento, kaj Grimo en la unua fojo en sia vivo ŝanĝis sian animstaton laŭ oniscio.

Ĉiun alian perdon de amatuloj, morto de edzinoj kaj filo li toleris tre trankvile. Nur kelkfoje li priparolis, kiel multekosta estas enterigi mortintojn en tiu ĉi lando – kaj kiel ĉiuj enterigaj kutimoj estis stultecaj. Li diris, ke oni agu kiel estas kutimo en Francujo. Tie la kadavroj estas enkudrataj en littukojn kaj poste enterigataj silente sen pago al iu pastro.

La lasta edzino de Grimo nomiĝis Gudrun kaj estis multe pli granda mastrino ol liaj antaŭaj edzinoj. Kiam Grimo edziĝis kun ŝi, li jam ekkadukiĝis kaj lia entrepreno malprogresis. Sed kiam Gudrun ektuŝis la aferon, estis kiel nova vivo kaj viglo enpenetris ĉion. La komerco reprogredis kaj ĉio iris pli regule. Ŝi ankaŭ sciis inspekti. Multfoje ĉiutage ŝi iris en la butikon por esplori la laboron de la komizoj. Ŝi ekzamenis la komercajn librojn, parolis kun la klientoj de Grimo kaj iom multe partoprenis en la librotenado, ĉar ŝi estis iom klera kaj buŝe kaj mane. Sed ŝajnis al Grimo, ke ŝi devis havi iom multe inter la manoj, kaj ŝi tamen ne estis malŝparema. Ŝi estis grandanima kaj volis bone trakti siajn gelaboristojn, sed Grimo nomis tion tutsole elĵetego kaj estis lia dirmaniero, kiam ŝi petis pri mono. „Vi iros inferen kun tiu mia eta havaĵo kiam mi estos mortinta.“

Sed tio ne fariĝis vera antaŭdiro. Gudrun mortis post dek jara geedziĝo, kaj Grimo vivis dum multaj jaroj poste.

Grimo kaj Gudrun ekhavis neniun infanon. La sola nepo, kiun Grimo havis en

sia maljunaĝo estis filo de Johano, kiu nomiĝis Markuso, juna knabo ankoraŭ ne konfirmita. Li estis inteligenta sed atonia kaj ne forta laŭ konduto. Maljuna Grimo prenis lin, kiam lia patro mortis, tiel ke li ne estus prizorgata de la komunumo.

Kiam Gudrun estis mortinta, ŝajnis kiel Grimo estis persekutata de la malfeliĉo. Li havis al si mastrumistinojn unujn post la aliajn, sed ĉio iris malbonege en la domo. La mastrumistinoj nenion povis direkti, kaj ili ankaŭ nenion kuraĝis decidi, ĉar Grimo estis kaj suspektema kaj timis la ŝtelistojn. La konduto estis tamen pli malbona en la butiko. La komizoj ne plu sentis timon antaŭ Grimo. Ĉiu prenis tion en la butiko, kion li deziris kaj preterlasis enskribi ĝin, kaj ĉiu faris sole tion, kio plaĉis al li. La alia restis nefarita. Kiam la maljunulo ekkoleris, la komizoj prenis lin kaj firmitenis lin ĝis li malkoleriĝis.

Aldone al tio ĉio fariĝis okazaĵo, kiu tute detruis la entreprenon de Grimo. Du novaj komercistoj establis novajn komercojn en Eiro, kaj la klientoj amase forlasis Grimon. Li malaltigis la prezojn de la eksterlandaj varoj, tiel ke ili fariĝis pli malaltaj ol ĉe la novaj komercistoj, kaj li plialtigis la prezojn de la islandaj varoj tiel multe, ke ili fariĝis konsiderinde pli altaj ol ĉe la aliaj. Sed nenio helpis. Ŝajnis ke la fido al Grimo tiel tute malaperis, ke neniu bienisto emis pro iu profito enveni denove en la ungegojn de li. Grimo tamen irigis la komercon pro ia aparte-opinia obstineco kaj malprofitis el ĝi grandan monon ĉiujare.

Sed ĉio tio afekciis Grimon kaj plidire multe. Ŝajnis, ke la tuta mono kiun li malprofitis el la komerco estis karno de lia karno kaj sango de lia sango. La forto de la korpo rapidege elĉerpiĝis, kaj ia stulta apatieco kuŝiĝis sur lian menson. Li havigis al si du novajn komercajn direktorojn aŭ ĉeflibrotenistojn, unu post la alia, por inspekti la komercon dum la ĉefa komerctempo. Sed tio nur kaŭzis, ke la klientoj pli malmultiĝis, kaj la malordo kaj eraroj plimultiĝis en la komercaj libroj. Tiuj librotenistoj pli emis prizorgi aliajn aferojn ol korekti la komerclibroj. Ili uzis la tempon por babili kun la maljunulo kaj akiri favoron ĉe li. Ili laŭdis lin pro ĉiaspekaj aferoj kaj komplimentis lin ĉiumaniere ĝis li fidis al ili kiel al nova reto, kvankam li estis suspektema kontraŭ ĉiuj aliaj. Ili ankaŭ nomis lin en ĉiu dua vorto: „Mia kara Magnussen“ aŭ „Amata Magnussen mia.“ Kaj estis onidiro, ke ili entute estis profitintaj mirinde multe pro la restado ĉe Grimo kaj konsiderinde pli multe ol ili enskribis en komerclibroj.

Fine Grimo ricevis maljunan mastrinon, kiu plaĉis al li. Ŝi nomiĝis Maria kaj estis multe pli ol kvindek jara. Ŝi estis jam mastrino ĉe multaj viroj. La kaŭzo de tio, ke ŝi bone plaĉis al Grimo estis precipe la fakto, ke ŝi estis malinklina kontraŭ ĉio, kion li nomis afekteco. Ŝi neniam lavis plankon escepte antaŭ grandfestoj kaj neniam balais la ĉambrojn escepte dimanĉmatene. Ŝi ankaŭ tute preterlasis lavi sin mem. Al ĉiuj vestbrosoj kaj tiaspecaj servistaĵoj estis permesate festi ripoztagojn en la tuta tempo dum ŝi restis en la domo. Ŝi ankaŭ estis komplezema kaj obeema al Grimo. Ŝi rakontis al li ĉion, kion oni parolis pri li aŭ rilate al li kaj eksterdome kaj endome, en la butiko, en la komunumo kaj ĉie, kaj ankaŭ multon, kion ŝi neniam aŭdis. Ŝi aludis pri ĉiuj, kiujn Grimo malplej malfidis, alportis al li iliajn vortojn malĝuste aŭ tiel vualitaj, ke li povis ilin miskompreni. Kaj ŝi komprenigis al li, ke ĉiuj intencis ŝteli de li, kiam ajn ŝi ne ĉeestis por malhelpi tion. Ĉi tion Grimo trovis tiel kredebla, ke li fariĝis duoble suspektema ol antaŭe. Li opiniis, ke ĉiuj volas intrigi kaj ruinigi lin escepte Maria. Li sincere fidis al ŝi. Ŝi ankaŭ ne estis malŝparema, almenaŭ ne tiel komprene, ke ŝi multekoste traktis la hejmulojn je manĝo aŭ alia prizorgado. Estis dirinde, ke malsato okupis honoran sidlokon en la domo ekde tiu tago, kiam ŝi envenis. Majstre sukcesis al ŝi detrui ĉiun manĝaĵon. En la ĉambro, en kiu Grimo tage sidis, kiam li ne iradis tien reen en la butiko iel senorde, miksiĝis haladzo de putrinta viando kaj odoraĉa rajo, tiel ke tie ne estis eble resti por tiuj, kiuj ne kutimis al tio.

Sed Maria plejparte plaĉis al siaj kunuloj. Ŝi eksterordinare flatis per mielaj vortoj, kun kiu ajn ŝi parolis, kaj ŝi estis bonega kontraŭ infanoj. Ŝi ankaŭ mirinde bone povis kredigi al ĉiu ajn en la hejmo, ke ŝi parolis favore pri li kontraŭ Grimo kaj ĉie ajn provis bonfari.

Sed Grimo ĉiam fariĝis malpli riĉa. Spite de la nova mastrino li konstante malriĉiĝis. Li posedis malnovan skribomeblon el mahagona ligno, kiu staris en lia ĉambro. Tie li konservis sian monon. En la jaroj, kiam ĉio boniris, estis ĉiuj tirkestoj sub la meblokovrilo plenaj da oraj kaj arĝentaj moneroj, kaj antaŭ la tirkesto kuŝis saketoj, malegale grandaj, plenaj kaj duonplenaj da mono. Sed en tiuj ĉi jaroj ili malmultiĝis iom post iom ĝis neniu postrestis. Ankaŭ malaltiĝis en la tirkestoj kaj kelkaj malpleniĝis.

Iun tagon aŭtune mallonge post la ŝafkolektado, kiam la aliaj komercistoj en

Eiro jam faris multan aŭtunan komercon kun la bienistoj, sed Grimo neniun tian, okazis ke lin atakis apopleksio en la butikoj, kaj li falis teren ŝajne morta. Oni tuj portis lin en la domon kaj kuŝigis lin en sian liton. Kaj la kuracisto estis venigata.

La kuracisto estis juna homo, nove veninta de la universitato al sia ofico. Lia ofica restadejo estis en la komercloko en Eiro, tiel ke ne estis longa vojo venigi lin. Kiam la kuracisto venis, Grimo kuŝis senkonscia. La kuracisto sidis ĉe li dum la tuta nokto kaj matene li iom ekviviĝis.

Grimo litkuŝis ege longe, sed fine li ekrampis el la lito kaj vestite trene paŝis en sian sidoĉambron kaj restis tie mallonge ĉiutage. La kuracisto flegis lin sincere. Li ankaŭ havis bonan reputacion, kvankam kelkaj ne multe fidis lin, ĉar laŭ onidiro li estis nenia piulo.

Grimo neniam estis fidinta al kuracistoj, kaj li ne bezonis helpon de ili dum sia vivo, ĉar lia sanstato ĉiam estis bonega. Sed li tuj multe fidis al kuracisto Thordo, kaj ĉiufoje, kiam li envenis, la krustiĝinta, sulka vizaĝo de Grimo fariĝis iel dolĉe varmea.

La unuan tagon kiam Grimo malfacile paŝis en la sidoĉambron li sidiĝis en sian malnovan apogseĝon kaj sidis tie tute silente iom da tempo. Li ankaŭ estis paralizita unuflanke en la buŝo, tiel ke oni malfacile komprenis lin, kvankam li nur elbuŝigis solajn vortojn kaj duonfrazojn interripoze.

Fine li petis Marian legi por li iun predikon el la predikaro de Johano Vidalino, kaj Maria prenis la libron el sia tirkesto kaj komencis la legadon. Sed tiel iel okazis, ke en tiu ĉi legaĵo estis nur menciita kolero de dio kaj diablo kaj infero, kaj Maria ne legis duonon de la prediko, kiam Grimo ordonis al ŝi ĉesi.

„Diabla maliculo tiu magistro Johano – altrudi al oni inferon, kio ne ekzistas.“  
Kaj Grimo alrigardis Marian tiel kolere, ke ŝi ne sciis, kion fari.

Kaj la humileco kaj timemo antaŭ Grimo, kiu rigardis ŝin per severaj okuloj, kaj la pentado pro tio, ke ŝi trafis tiun legopecon pri infero, tiel forte premis ŝin, ke ŝi kunfeksiĝis, tiel ke ŝi aspektis kiel amaso en la seĝo apud la fenestro kaj trikis ŝtrumon, kiun ŝi embarase prenis, kiam Grimo ordonis al ŝi ĉesi la legadon.

Sed Grimo ne diris pli. Li sidis tute senmova, krom tio, ke iom post iom aperis spasmoj sur lia vizaĝo, tiel ke timego kaptis lin. Tiam li ĉirkaŭrigardis kaj palpis per la manoj ŝajne por ion forpeli.

La dormoĉambro de Grimo situis apud la sideoĉambro, kaj tie Maria, la mastrino, ankaŭ dormis.

Kiam Maria senvestigis Grimon tiun vesperon, ŝajnis al ŝi, ke li estis pli malforta ol matene.

Tiun vesperon Grimo malfrue ekdormis. Estis kiel li neniam povus fermi la okulojn. Li direktis sian rigardon tien kaj reen en la ĉambro ege maltrankvila laŭ trajto, ruliĝis de unu flanko al alia, senripoza, intertempe li ekĝemis mallaŭte kaj balbutis ion duonvoĉe.

Apud la lito de Grimo staris malgranda tablo, kaj tie brulis lumo ĉiunokte ekde kiam li malsaniĝis, sed Maria ŝraŭbis la meĉon malsupren, por ŝpari la petrolon, tiel ke la lumo fariĝis tre malgranda. Ŝajnis, ke Grimo trovis la lumo tro malgranda tiun nokton, ĉar li ĉiam fingrumis la lampon kaj ŝraŭbis la meĉon supren, kelkfoje tamen ŝajnis, ke al li ŝokis la malŝparo, kaj li reŝraŭbis malsupren, sed li baldaŭ ŝraŭbis la meĉon supren denove.

Maria intencis teni sin maldorme ĝis Grimo ekdormus kiel ŝi kutimis. Sed tiufoje la atendo estis tro longa. Ŝi ne povis sin regi kaj estis ekdormonta, kiam Grimo diris:

„Manjo, Manjo.“

„Jes.“

„Ĉu vi opinias – ke mi mortos pro tio ĉi?“

„Ĉu vi mortos? Ne, vi ĉiam resaniĝas. Vi baldaŭ fariĝos tute sana.“

„Jes, mi resaniĝas – mi baldaŭ fariĝos sana – mi ne mortos.“

Grimo eksilentis, kaj Maria estis ekdormonta denove, kiam li revokis ŝin:

„Manjo, Manjo.“

„Jes.“

„Ĉu vi kredas, ke al mi okazos malbonego – se mi mortos?“

„Ĉu al vi okazos malbonego? Dio pardonu al vi pro tia penso. Ne, estas ne danĝere, ke vin trafos malbonego.“

„Ne, al mi ne okazos malbonego.“

Tiam Grimo silentis longan tempon, sed ĉiam suprenŝraŭbis la meĉon de la lampo.

„Manjo, Manjo.“

„Jes.“

„Ĉu mi faris ion malbonan – faris iuspecan pekon – grandan pekon?“

„Ne, ne, ne. Vi la benata bonkorulo, kiu neniam faris domaĝon al alia homo.

Estas aliaj, kiuj pekis kontraŭ vi, kiuj volis ruinigi vin kaj trompi vin ĉiumaniere.“

„Jes – aliaj homoj pekegis kontraŭ mi – ĉiuj malbenataj trompuloj.“

Sekvis denove silento.

„Ĉu vi ne kredas – ke ili restos en infero – kiuj trompis min?“

„Estas ja strange, se al iuj el ili ne okazos malbono.“

„Tio estas sendube – diru, ke tio estas sendube – dio devas venĝi min – li devas vidi, ke mi mem tion ne povas – alie ekzistus nenia justeco.“

Tiam Maria ellitiĝis kaj komfortigis ĉirkaŭ Grimo. Ŝi metis du kusenojn malantaŭ lian dorson, tiel ke li duonsidis kaj povis vidi tra la tuta ĉambro. Tion farinte ŝi enlitiĝis denove, kaj Grimo fermis la okulojn kaj kuŝis iom da tempo, tiel ke ŝi opiniis, ke li jam dormis. Sed subite li malfermegis la okulojn kaj fiksrigardis la angulon ĉe la fenestro kaj kriis:

„Kio estas en la angulo? Lumon – lumon – eklumigu – helpu min.“

Maria saltis el la lito kaj lumigis alian lampon, tiel ke estis tiel lume en la ĉambro kiel en helluma tago.

Sed la ŝvito fluis akre malsupren la visaĝon de Grimo. Li provis viŝi la ŝviton per la mandorso kaj la maniko de la ĉemizo, sed nova fluaĵo da ŝvito torentis sinsekve. Li direktis la rigardon tra la tuta ĉambro, supre kaj sube, tien kaj reen, reen kaj tien. La haroj pendis neĝoblankaj, ĉifone sur la frunton, kaj sube de la ŝvitokrustoj sur la brovoj radiis la okuloj, akraj kaj malkvietaj, ŝajne pro stranga fuĝa angoro.

„Manjo, Manjo.“

„Jes.“

„Ĉu vi kredas, ke infero ekzistas?“

„Ĉu infero ekzistas? Ĝi ekzistas same kiel dio ekzistas.“

„Se jes, vi ankaŭ iros tien – la malbenata stultulino – tien iros ĉiuj homoj – ne eblas eviti tion – se ĝi ekzistas.“

„Ne, eble ĝi ne ekzistas.“



„Ne, ĝi certe ne ekzistas – ĝi ne ekzistas.“

Poste Grimo turnis sin kontraŭ la muro kaj fermis la okulojn.

„Vi devas maldormi – dum la tuta nokto – kaj priatenti la lampojn – lasi lumi – lumi.“

La maljuna Grimo kelkfoje vekiĝis, kaj kiam li vidis, ke Maria sidis, kaj ambaŭ lampoj lumis, li fariĝis pli kvieta, kaj fine li ekdormis. Li dormis ĝis pasis longa parto de la tago. Kiam li jam ellitiĝis kaj estis eksidanta en sia seĝo en la sideoĉambro, la kuracisto venis.

Li demandis kiel Grimo fartas kaj poste priparolis diversajn aferojn. Sed ŝajnis, ke Grimo estis distrita, ĉar li diris nur jes kaj ne. Fine estis paŭzo en la parolo kaj Grimo rigardis la kuraciston kaj provis rideti per la sana buŝangulo:

„Ili diras, ke vi estas – malpiulo.“

„Malpiulo. Neniu homo estas tute nekreda, mia Grimo.“

„Mi mencias – mencias – ke vi ne kredas al – ne kredas al – la diablon.“

„Al la diablon, ne, mi ne kredas al la diablon,“ diris kuracisto Thordo kaj mokridetis.

„Mi mencias – mencias – ĉu vi kredas, ke li ekzistas.“

„Ne, mi firme kredas, ke li ne ekzistas.“

„Ne ekzistas – jes – ne ekzistas.“

Tiam li provis rektigi sin en la seĝo kaj ekprenis la brakon de la kuracisto, kiu sidis apud li.

„Tion mi sciis – li ne ekzistas, kaj – la infero, do ankaŭ ne.“

„Ne, diablo kaj infero ne ekzistas, pri tio mi estas konvinkita.“

„Jes, tion vi sendube scias – vi, kiu tiel multe konas la scienccon.“

„Jes, la scienco nenion konas pri tio, ke diablo kaj infero ekzistas.“

„Ĉar la scienco tion diras – tio estas ĉerte.“

Tiam maljuna Grimo klinis sin malantaŭen en la seĝo, fermis la okulojn, kaj ŝajnis, ke la vizaĝo fariĝis varmeteca pro ĝojo. Li ripetadis kun si mem tiel mallaŭte, ke oni apenaŭ aŭdis la vortojn:

„Ne ekzistas – la scienco tion diras – la scienco tion diras – ne ekzistas – ne ekzistas.“

Poste li denove malfermis la okulojn, rigardis al la kuracisto iom da tempo je iaspecaj embarasaj okuloj, tiel ke li serĉus iun penson, kiun li ne povis trovi, sed pretendis helpon de la kuracisto.

Sed la kuracisto ŝtone silentis kaj rigardis al Grimo. Estis kiel li emis legi sur tiu ĉi vizaĝo, kiu nenion povis kaŝi ne pli ol infano, ĉiun etan partumon, kiu ankoraŭ eraris malantaŭ ĉi tiuj nebulaj okuloj.

Fine ŝajnis, ke lumo aperis por maljuna Grimo. Li ekprenis denove la brakon de la kuracisto kaj diris:

„Ne eble – neniŭ alia vivo ekzistas – kion diras la scienco?“

„La scienco ne povas pruvi, ke alia vivo ekzistas. Tio nur rilatas al la kredo.“

„Ĉu vi kredas je alia vivo?“

„Ne.“

„Kompreneble ne – nenio ekzistas – – nenio ekzistas – la scienco diras tion – nenio ekzistas.“

Poste la maljuna Grimo sidis silenta iom da tempo, movigis la kapon flanken de flanko, kontinue malfermis la buŝon kaj fermis ĝin tuj denove. Fine strangaj trajtoj aperis sur la vizaĝo, kiel li volis ridi per la sana buŝangulo, sed ne povis tion pro la malforto en la vizaĝo.

„Ridinde, ridinda absurdaĵo – tio pri la bilanckalkulon – bilanckalkulon.“

„Ĉu vi mencias tiun frazon, ke oni devas prirespondi pri ĉiuj siaj vortoj kaj agoj? Laŭ mi tio ne estas ridinde. Mi ĉiam opiniis, ke tiu esprimo devenas de konvinko de ĉiu homo kaj la tuta homaro, ke la vivo mem donas kalkulon pro vortoj kaj agoj pli frue aŭ pli malfrue.“

„Nun mi ne komprenas – ne komprenas – ne unu vorton.“

„Vi tamen komprenas, se mi dirus al vi, ke estas mia kredo ke ĉiu homo ricevas pagon pro ĉiuj siaj faroj kaj vortoj en tiu ĉi vivo, rekompencan pro bono kaj punon pro malbono.“

„En tiu ĉi vivo – en tiu ĉi vivo – tio ne estas eble – ne eble.“

Ŝajnis, ke Grimo fariĝis distriĝema pro teruro. Li ekpemis la seĝbrakojn ambaŭmane kaj rigardis la kuraciston per timegaj okuloj.

„Ne – ne – vi ne diras veron – vi reprenas tion – kion diras la scienco pri tio? –

la sciencoj ne povas tion diri – vi mensogas je la sciencoj.“

„Ĉi tio neniel rilatas al la sciencoj. Tio estas nur mia kredo, kiu sole devenas de mia propra sperto kaj mia propra opinio pri la vivo,“ diris la kuracisto Thordo, ŝajne por mildigi siajn vortojn. Evidente timigis lin, kiel liaj vortoj impresis la malsanulon, ĉar maljuna Grimo klinis sin malantaŭen, la okuloj estis malfermitaj, kaj li rigardis konsternite tien kaj reen en la ĉambro. La vizaĝo estis multe pli flave pala ol kutime, kaj la brakoj pendis malfortaj malsupren laŭ la seĝoflankoj.

„Via kredo – via kredo.“

„Nur mia kredo. Estas mia kredo, ke la homo ricevas ĉion repagita en tiu ĉi vivo kun rentumo kaj rentorentumo.“

Maljuna Grimo tute malfermis la okulojn kaj fikse rigardis la kuraciston, tiel kiel li volis konvinki sin pri tio, ke estis li, kiu diris tion.

„Kun rentumo – kaj rentorentumo – rentorentumo – malbela kredo – la malbela kredo,“ kaj Grimo skuis la kapon.

La kuracisto vidis, ke tiu interparolo ne estis bona por la malsanulo. Tial li pretigis sin por iri kaj tiel ĉesi la konversacion.

„Vi devas, mia Grimo, antaŭ ĉio provi eviti ĉion ajn emociion, provi pensi pri nenio krom komforte sidi kaj kuŝi, por ke vi fariĝu sana kiel eble plej baldaŭ.“

„Jes – jes.“

La kuracisto salutis kaj foriris.

Maljuna Grimo postsidis en la ĉambro. Li rigardis la kuraciston dum li malaperis tra la pordo. Poste li rigardis ĉirkaŭ sin. Li provis sidi tiel en la seĝo, ke li povis vidi tra la tuta ĉambro.

Tiam Maria envenis.

„Voku Malkuson – al mi tedas – tedas.“

Maria vokis la etan Markuson. Li esence loĝis en malgranda ĉambro en supra etaĝo. Li jam antaŭlernis por la gimnazio kaj penige lernis la gramatikon latinan, kiun la pastro en Eiro igis lin ripeti ĉiun duan tagon.

Markuso iris malsupren al sia avo kun la gramatiko kaj eksidis tie en angulo. Kiam Grimo vidis lin, ŝajnis ke li fariĝis iom pli trankvila, li fermis la okulojn kaj provis dormi, sed ree kaj ree li ekskuiĝis kaj vokis:

„Malkus, Malkus, ĉu vi estas ĉi tie?“

„Jes, mia avo, mi estas ĉi tie.“

Post tio la malgranda Markuso restis en la sidoĉambro ĉe sia avo dum la tagoj. Maljuna Grimo ne pli malsaniĝis, sed li ankaŭ ne pli saniĝis. Pasis kelkaj tagoj.

La kuracisto venis ĉiutage por esplori Grimon. Ŝajnis al li, ke la plisaniĝo daŭris longan tempon, sed li ne priparolis tion al Grimo. Ili ne plu parolis pri religiaj aferoj. Kelkfoje Grimo provis ektuŝi tion, sed la kuracisto ĉiam turnis la konversacion en alian direkton. Grimo kutime sidis trankvile en sia seĝo. Iufoje li vagis en la butikon, en kiun estis endoma irejo el la loĝdomo. Li enmiksitis sin en nenion tie krom tio, ke la malnova kolera trajto aperis subite sur lia vizaĝo, kiam ŝajnis al li, ke la komizoj tropesis aŭ tromezuris ion, kion ili liveris. Tiam li kelkfoje provis svingi al ili per la mano, ŝajne por ataki ilin kaj diris ĉiam samtempe:

„Pli malmulte – mezuru pli malmulte – pli malmulte.“

Kaj kelkfoje li vagis tien kaj reen en la butiko kvazaŭ distriĝinta kaj parolis kun neniu homo, escepte ke li intermite murmuris senĉese: „Pli malmulte,“ kvankam oni nenion pesis nek mezuris.

Sed li neniam restis longe en la butiko. Li iel estis plej kontenta resti en sia sidoĉambro. Tie li vagis tien kaj reen sur la planko en sia malnova mantelo, kiu estis brilumita sur la brustrandoj kaj manikoj. Li portis ĉapelon el ŝafidfelo sur la kapo, kaj la manoj, kiujn li ĉiam konservis en la poŝoj, estis kovritaj per pugnogantoj. La piedojn ŝirmis grandaj ruĝaj matenŝuoj, kiuj treniĝis post li, tiel ke knaretis kiam li iris sur la planko.

Iufoje li haltis meze sur la planko, paŝis tie sur la sama loko, eble dum preskaŭ plena horo, rigardis la fenestron, movis la kapon ambaŭflanken, plej ofte silenta, sed kelkfoje li murmuris kun si mem preskaŭ duonvoĉe:

„Kun rentumo kaj rentorentumo – rento kaj rentorentumo.“ Poste li skuis la kapon, eksidis en sian seĝon, fermis la okulojn kaj ekdormis.

Ankaŭ okazis, ke li tuj stariĝis denove, kiel terura malkvieteco suferigis lin, kaj poste li paŝis surloke, fiksrigardis tra la fenestro kaj murmuradis. Sed foje li tamen estis tute alie ol milda laŭ temperamento.

Estis precipe Markuso, kiu ŝpertis tion, ke la temperamento de Grimo estis la

sama kiel antaŭe, kvankam li multe ŝanĝiĝis.

Kiam li sidis enpeninta kaj silenta aŭ murmurante, tiam povis okazi, kiam oni plej malmulte atendis, ke li kriis:

„Malkus, Malkus, kie vi estas, bubo?“

„Jen mi estas, mia avo,“ diris la malgranda Markuso kaj rapidegegis duontremante el sia angulo al sia avo.

„Ĉu vi ion faras, via sentaŭgulo?“

„Mi legas la gramatikon, mia avo.“

„La glammadikon – la glammadikon – kiu tion ordonis al vi – ĉiam senlabora – senlabora – mezuru duonrafinitan sukeron,“ kaj li svingis al li la manon ŝajne por doni al li vangofrapon, sed Markuso ŝirmis la orelojn ambaŭmane, tiel ke la frapo malmulte efikis.

Poste malgranda Markuso kuregis kiel sago en la butikon kaj revenis en la sidoĉambron pene portante plenan sitelon da duonrafinita sukero kaj papersaketoj, kiujn li plenigis per sukero kaj pesis ilin per malgranda pesilo, kiu staris sur la tablo.

„Ne mezuru tro multe, bubo – lasu manki – manki.“

„Jes, mia avo.“

Tiam la distriĝ-krepusko atakis lin denove. Sed povis okazi, ke li ree kriis post mallonga tempo:

„Kus, Malkus, kie vi estas, via stultulo?“

„Jen mi estas, mi estas jen, mia avo.“

„Kion vi faras?“

„Mi mezuras sukeron.“

„Sukeron – sukeron – kiu tion ordonis al vi? Vi devas legi – kie estas la glamadiko? – Malbenata sentaŭgulo – pretendas esti lernema – la sentaŭgulo – estas nenio ol la maldiligenteco.“

Malgranda Markuso do penege portis la sukeron en la butikon kaj eksidis legante la gramatikon denove. Ĉi tio povis okazi fojon post fojo.

Ĉe maljuna Grimo duonrafinita sukero kaj gramatiko tiris Markuson inter si kaj estis laŭ neniu regulo, kiu venkis.

Iufoje kiam Grimo fartis iom pli bone ol kutime, li pelis Markuson eksteren kaj

firme fermis la pordon post li. Post tio li ŝovis la manon en sian poŝon kaj elprenis ŝlosilaron. Estis la ŝlosiloj por la granda skribmeblo. Tiujn li neniam disigis de si. Kiel malmulta estis lia konscio, li ĉiam memoris ordoni, ke oni prenu ilin el la poŝo vespere kaj metu ilin sub lia kapkuseno.

Poste li iris al la skribmeblo, malfermis ĝin, eltiris la tirkestojn unu post alia. La plej multaj el ili estis malplenaj, sed en kelkaj tintis iomete da moneroj. Li rigardis en ilin ĉiujn, enŝovis ilin kaj murmuris ĉiam ripete kun si mem: „Nenio restas – ĉio for – ĉio for.“

Fine li malŝlosis grandan tirkeston, kiu estis sube de la montirkesto kaj eltiris ĝin. En ĝi estis nenio krom unu libro iom maldika. Li staris iom da tempo, alternative levante la piedojn kaj rigardis la libron. Poste li deprenis la gantojn, levis la libron tre singarde, iris al la fenestro, deprenis la ŝafidfelan ĉapon kaj metis ĝin sur la tablon. Poste li malfermis la libron. Li ne malfermis ĝin por leĝi en ĝi. Li eĉ ne rigardis la titolan folion. Tio ja ne estus por li multe utila. La libro estis: „Cæsar de bello Gallico,“ en kiu Johano, lia pli juna filo, estis lerninta antaŭ ol li komencis lernadon en gimnazio.

Ne, li ne legis en la libro. Li nur turnis la kartonon kaj rigardis la ŝirmfolion. Tie estis skribita diletante: „Johano Grimsson“ (filo de Grimo).

Li longe tenis la libron kaj fikse rigardis la nomon, ĝis li ne plu povis distingi la interspacojn de la literoj, ĉar la larmoj gutadis unu post alia, pezaj kaj grandaj, sur la nomon kaj la ŝirmfolion. Li forviŝadis ilin egalrapide per la malpura, glacea maniko de sia ĉifona mantelo.

Poste li fermis la libron, metis ĝin tre malrapide en la tirkeston kaj ŝlosis la skribmeblon. Tiam li surmetis la ŝafidfelan ĉapon kaj la gantojn kaj vagis tien kaj reen en la ĉambro, tiel ke knaretis la ruĝaj pantofloj. Foje li haltis ŝanceliĝe apud la fenestro, firme rigardis eksteren kaj ĉiam de tempo al tempo murmuris al si mem:

„Kun rentumo kaj rentorentumo – kun rento kaj rentorentumo – eble vere. – “  
Kaj tiam lia sulkigita, rigoreca vizaĝo akiris strange malĝojan mienon.

Sed okazis vespere malfrue en la aŭtuno, ke malgranda Markuso venis ploreante en la kuirejon al Maria kaj diris, ke avo estas mortinta en la seĝo.

„Li apenaŭ estas mortinta, la maljunulaĉo. Oni certe devas ankoraŭ longe klopode servi al li,“ Maria murmuris al si mem survoje en la sidoĉambron.

Maljuna Grimo kuŝis sur la planko. Evidente li ricevis novan atakon de apopleksio kaj estis falinta malsupren de la seĝo, sed Maria vidis tuj, ke li ne estis tute mortinta. Ŝi lasis lin porti en la liton kaj venigis la kuraciston.

La kuracisto venis post momento.

Grimo kuŝis tute senkonscia en sia granda lito kun fermitaj okuloj kaj ne povis movi iun ajn membron. La mieno de la kuracisto montris seriozecon, kaj kiam Maria demandis lin, ĉu estus iu espero pri vivo por Grimo, li nenion respondis. Li volvis lian kapon per malsekaj tukoj kaj poste elfluigis al li sangon. Sed Grimo kuŝis senmove kaj senkonscie dum la tuta nokto kaj la tutan postan tagon.

Vespere tiun tagon li iomete ekmalfermis la okulojn, movis ilin flanken kaj rigardis ĉirkaŭen. Malgranda Markuso sidis sur kesto apud la ĉepieda tabulo de la lito de Grimo kaj rigardis kun larmoj en la okulojn de sia avo. Maria staris apud tablo ĉe la fenestro kaj ordigis ion tie.

Maljuna Grimo fermis la buŝon, kiel li volis paroli kaj murmuris ion, sed neniuj vortoj estis distingeblaj krom: „Rent – rentumo.“

Poste li refermis la okulojn kaj kuŝis iom da tempo. Sed subite li malfermis la okulojn denove kaj firme rigardis malgrandan Markuson apud la piedfino de la lito.

„Ku – Ku – Kuso – Malkus.“

Markuso salte ekstaris.

„Jen mi estas, mia avo.“

„Ki – ki – kion – fa – fa – fari?“

„Nenion, mia avo, mi nenion faras.“

Ŝajnis, ke la okuloj de Grimo elsaltus el la kapo, la vizaĝo sange ruĝiĝis kaj li kriis, kvankam distingo de la vortoj estis malklara:

„Malben – sentaŭg –.“

Tiam ŝajnis, ke li uzis ĉiun vivoforton, kiu restis en li, li malfermis la buŝon, kiel li volis diri pli kaj sammomente eksidis en la lito. Sed li falis dorsen subite malforta.

Maria kaj Markuso ambaŭ rapidis al la lito.

„Nun, ja – nun li estas mortinta,“ diris Maria.

Malgranda Markuso ĵetis sin sur la keston kaj ploregis, kiel li krevus pro singulto.

Maria staris iom da tempo kaj rigardis la kadavron, ŝajne por konvinkiĝi pri tio, ke maljuna Grimo estis mortinta.

Poste ŝi ŝovis manon sub la kusenon kaj eltiris la ŝlosilaron de la skribmeblo. Tiam ŝi iris en la sidoĉambron kaj zorge fermis la pordon inter la sidoĉambro kaj dormoĉambro. Ŝi iris al la skribmeblo kaj malfermis ĝin. Ŝi uzis longan tempon por malfermi la tirkestojn, ĉar ŝi ne konis la ŝlosilojn. Poste ŝi eltiris la tirkestojn unu post alia, sed plej multaj estis malplenaj.

„Malplena, diable, ĉio malplena,“ Maria diris al si mem dum ŝi kolektis la monerojn, kiuj kuŝis sur la fundoj de kelkaj tirkesto kaj metis ilin en sian poŝon. Fine ŝi volis refermi, sed tiam ŝi rimarkis la grandan tirkeston plej sube. La mieno de Maria montris kontentecon.

„Unu restas, la plej granda kaj la plej suba.“

Ŝi longe serĉis la ŝlosilon, ĉar ŝiaj manoj tremis. Fine ŝi trovis ĝustan ŝlosilon kaj malfermis la tirkeston. Tie estis nenio krom maljuna Cæsar.

„Libro, libraĉo. Kia aparta karakteraĉo konservi libraĉon en la plej suba tirkesto.“

Pro sia kolero ŝi prenis Cæsaron kaj ĵetis ĝin en la fornon, kaj tie maljuna Cæsaro flame brulis. Poste ŝi zorge fermis la skribmeblon kaj reiris en la dormoĉambron. Tie malgranda Markuso kuŝis sur la kesto, plorante kiel antaŭe.

Ŝi metis la ŝlosilaron malrapide sub la kusenon de Grimo, iris eksteren kaj lasis la pordon malfermita. Ŝi iris en la butikon, vokis la komizojn kaj ploretante informis ilin, ke maljuna Grimo estas mortinta kaj petis ilin veni por konvene kuŝigi la kadavron.

Ŝi akompanis la komizojn en la dormoĉambron, iris al Markuso, klinis sin tre afable super li kaj kondukis lin kun si eksteren.

„Ne ploru mia benata infano, ne ploru,“ kaj ŝi milde frotkaresis lian vangon, kaj eta Markuso metis brakon ĉirkaŭ ŝian kolon.

„Nun li estas mortinta, nia bonkorulo,“ diris Maria per ploreca sono. „Ni ambaŭ perdis multe, mia kompatinda Markuso, sed al ni estos permesate vidi lin denove. Dio estas bona, li permesos, ke ni revidu lin, se ni vivos honeste kaj laŭ lia benata volo. Nia bonkorulo. Li fartas bone. Nun li restas ĉe savituloj en paradizo.“

*(Stefán Sigurðsson.)*



## La ribelo en la bieno Brekka

En Brekka estis absoluta monarkio same kiel en Rusujo. Kaj kiel kelkfoje okazis en Rusujo, la monarkio en Brekka estis nun je la ina flanko.

La bienisto Jon estis dufoje edziĝinta. La unua edzino, kun kiu li ricevis la bienon kaj multajn aliajn bonaĵojn, kiuj apartenas al ĉi tiu mondo, nomiĝis Anna, kaj ŝi estis sesdekjara vidvino, kiam ŝi levis sian laboriston, Jonon sur sian potencoseĝon, por ke li regu kun ŝi la bienon. Jon neniam fariĝis mastro en la bieno dum Anna vivis, escepte laŭ nomo. Ŝi estis kiel antaŭe absoluta monarko, kaj oni neniam nomis Jonon alie ol *Jon la edzo de Anna en Brekka*.

Iun bonveteran tagon okazis tio, ke Anna falis teren mortinta, kaj Jon restis poste kun la tuta bieno kaj la tuta potenco.

Estus verŝajne, ke Jon estus nun kontenta, sed tio estis tute male. Li emis reedziĝi, kaj li jam promesis al si mem longe antaŭ ol Anna mortis, ke se tio okazis, ke dio liberigus ŝin de ĉi tie, li tuj edziĝu denove, kaj tiam li havigu al si virinon, kiu estus kaj juna kaj bela.

Kiam Anna estis enterigata, ĉeestis amaso da homoj, kaj dum ili staris ĉirkaŭ la tombo, Jon rigardis al la ĉeestantoj por eventuale trovi estontan edzinon, sed estis vere, ke neniu el tiuj virinoj ŝajnis al li sufiĉe bela. Jon jam fariĝis riĉega, tiel ke li havis kaŭzon esti postulema.

En la venonta printempo li vidis Sigridon, kiam ŝi estis konfirmaciita en la pentekosto. Ŝi estis malriĉega sed tre bela fraŭlino, ne altstatura sed delikatforma kaj gracia, la okuloj estis malhelbluaj kaj la manoj kaj piedoj negrandaj kaj belaj. Tuj kiam Jon vidis ŝin li pripensis, ke li ekhavu ŝin aŭ alie neniun. Kontraŭe ŝi promesis al si mem edziniĝi kun riĉulo aŭ tute ne edziniĝi. Ŝi estis spertinta sufiĉan malriĉecon kaj mizeron dum siaj kreskojaroj la kompatinda junulino.

Poste Jon petis ŝian manon, kaj la afero estis facile plenumata, kaj post unu monato ekde Jon vidis Sigridon la unuan fojon ili geedziĝis per multa pompo, granda festeno kaj ĝenerala ebrieco.

Jon tre ametis sian junan kaj belan edzinon, kaj ŝi faris ĉion por kontentigi lin.

Sed li baldaŭ sentis, ke ŝi estis tre regema, kaj ne pasis longa tempo ĝis ŝi fariĝis diktatoro en la bieno, kaj Jon nenion kuraĝis fari nek ordoni escepte demandi ŝin antaŭe. Ĉiuj ankaŭ sciis tion, kaj oni nomis Sigridon „Sigrid la grandregulino“, sed Jonon oni nomis „Jon la edzo de Sigrid la grandregulino“, kaj tio estis lia nomo ĝis morto.

Jon estis tamen en si mem tute ne kontenta pri tiu rezultato. Li tre ŝatis trinki vinon, kaj ĉiam estis lia esprimo kiam li estis ebria: „Mi estas mastro en mia hejmo.“ Kaj malgraŭ tio, ke kaj dio kaj homoj sciis, ke estis male, li tamen ĉiam elbuŝis tiun babilon kaj kelkfoje aldonis blasfemajn vortojn por pli bone tion akcenti kaj konfirmi.

Iufoje Jon okaze restis en la komercloko. En la domo de la komercisto oni diskutis pri edzinregado. Tie ankaŭ sidis Jon kaj trinkis punĉon kun la aliaj. Li diris tuj, ke tiu homo estas kaj timegulo kaj kompatindulo, kiu permesas al la edzino regi eĉ plej etan partumon en sia hejmo. „Mi estas mastro en mia hejmo, iru tio en la inferon,“ li aldonis dum li trinkis tion kio restis en lia punĉujo. La ĉeestantoj priridegis tiujn vortojn de Jon, kaj kelkaj eĉ esprimis dubon pri vereco de tio. Jon tion bone komprenis, kvankam li jam fariĝis iom ebria. Li tuj kuris eksteren, vokis sian laboriston, Svein, kiu estis kun li, kaj ekrajdis hejmen.

Svein laboristo estis beleta junulo en la bieno de Jon, kaj plej multaj opiniis, ke Svein estus posteulo de Jon rilate al edzino kaj bieno, per kio tia opinio povus esti bazita.

Jon rajdis galope sur la hejmenvojo, tiel ke Svein apenaŭ povis lin akompani. Jon batis la flankojn de la ĉevalo per la kalkanoj kaj aldone vipobatis ĝin jen malantaŭe jen antaŭe, tiel ke la kompatinda ĉevalo ĉiam galopis, pli rapide ĝi ne povis kuri.

Kiam Jon venis hejmen, li tuj kuris en la biendomon surŝmirita per argilo kaj koto kaŭze de la rapidega rajdado. Li batis la tablon per la vipo, vokis Sigridon, la grandregulinon, sian edzinon, kaj ordonis, ke ŝi alportu al li fumajitan viandon por manĝi.

Sigrid toleris tion ĉion ege trankvile. Ŝi rigardis lin kaj demandis, ĉu li estas freneza. Tiel finiĝis ĉi tio, kaj Jon neniun manĝaĵon ricevis.

Sed Jon ne estis trankvila. Li furiozis tra la tuta domo, blasfemis kaj malbenis, tiel ke estis granda feliĉo, ke la biendomo ne subteriĝis kune kun ĉio, kio estis tie interne, kaj li diris, ke li estas mastro en sia hejmo.

Li pelis la laboristojn el la litoj kaj ordonis al ili iri eksteren por falĉi, kaj li batis la servistinojn kaj ordonis, ke ili iru eksteren kaj melku la brutaron, sed tiam estis jam nokto.

Fine Svein prenis lin kaj kuŝigis lin en lian liton. Dum Svein komforte kuŝigis lin, li diris iom malklere: „Mi estas mastro en mia - - -“, li ne povis diri pli, ĉar li tiam jam ronkis.

Kiam Jon vekigis venontan matenon, li ektimegis pro la furioza konduto en la antaŭa vespero, kaj estis vere, ke pasis longa tempo ĝis li kuraĝis malfermi la okulojn.

Li aŭdis piedpasadon kaj brueton en la ĉambro, kie li dormis, tiel ke li malfermis la okulojn kaj ĉirkaŭrigardis.

Sigrid la grandregulino staris apud sia vestkesto kaj feste vestis sin. Kiam Jon estis sobra, li efektive ĉiam sentis timon antaŭ sia edzino, sed neniam pli ol kiam ŝi portis festan kostumon. Kiam ŝi portis ĝin, estis al li kiel la tero brulas sub liaj piedoj.

Jon ne povis diveni kiakaŭze lia edzino tiel vestis sin, sed timego kaptis lin, iu nekomprenebla paniko, kiam li vidis, ke ŝi lasis sian novan drapan jupon moviĝi de supre malsupren.

Jon nenion kuraĝis diri, ĉar li timis, ke ĉio tia malbonigus lian staton.

Fine li tamen diris: „Hieraŭ mi aĉetis en la butikoj unu fundon da sekvinberoj por vi, mia koro, ĝi estas en la poŝo de mia jaketo.“ Efektive li intencis doni ĝin al la geservistoj okaze de tio, ke li prenis la regadon en la hejmo.

Malvarmo trakuris sub lia haŭto, kiam li pensis pri la stulteca ribelo la antaŭan vesperon.

„Estas bone,“ diris Sigrid tre mallonge.

Estis same kiel Jon estus ricevinta vangofrapon, tiel malvarma li trovis la respondon.

Li longe pripensis ion por mildigi la animstaton de sia edzino. Fine li trovis rimedon.

„Hieraŭ mi mendis lulilon ĉe Jon lignaĵisto, karulino mia.“

„Lulilon?“ diris Sigrid.

„Mi bone sentas, mia koro, ke mi povas morti ĉiam ajn, kaj mi pensis pri tio, mia amatino, ke dio donus, ke vi ne longe devos suferi en vidvineco. Tial mi mendis

lulilon, mia koro.“

„Estas bone, Jon,“ Sigrid diris, kaj tiam ŝi jam finis sin vesti, kaj poste ŝi iris eksteren.

Neniu estas tiel terura kiel tio, kion oni ne scias kio estas. Neniu homo iam atendadis pli tima ol bienisto Jon tiufoje. Li tute ne sciis, kion lia edzino intencis fari, sed estis al li klare, ke tio sendube estas io timegiga.

Li ruladis sin en la lito de unu flanko al la alia kaj revokis en la memoron diversajn, belajn preĝojn, kiujn li sciis.

Kiam jam pasis iom pli ol du horoj, Sigrid revenis kaj pastro Hannes kun ŝi.

Tiam Jon sciis, kiun direkton la afero estis prenanta, kaj li trovis plej bona la rimedon tute kapitulaci.

La pastro prezentis al li, kiel terura estis lia vivo, veni hejmen ebria, malbeni kaj blasfemi, bati la servistaron kaj ataki sian edzinon – kaj *tian* edzinon.

Jon ne diris eĉ unu vorton krom promeso pri reboniĝo kaj pli bona konduto. Kaj li diris, ke li dum la tuta mateno preĝis al dio pri kuraĝo por kontraŭstari la intrigojn de la diablo.

Poste la servistaro venis kaj komencis memvole kaj neinstigite atesti kontraŭ Jon. Estas la malnova historio, kiu ĉiam ripetiĝas ĉe grandpotencoj, malgrandaj regnoj kaj servistaro, ke neniu volas esti amiko al falinto, sed ĉiuj volas amikiĝi kun la venkinto.

Jon silentis kiel ŝafido buĉota kontraŭ tio ĉio, sed kiam Sigurd, lia filo, bubeto en la sepa jaro, kuris al la pastro kaj diris: „Paĉjo estis porke ebria hieraŭ,“ tiam malsekiĝis la okuloj de la kompatindulo en la lito.

Poste la pastro foriris, kaj Svein, la laboristo, envenis por paroli kun la mastrino. Jon vidis, ke ŝi metis la manon tre varmece kaj mole sur lian brakon, kaj li trovis ŝian rigardon terure amikeca kaj koreca.

Jon ne povis tion rigardi, sed fermis la okulojn kaj turnis sin al la muro.

Tiam ŝajnis al li, ke aŭdiĝis ŝmaco kiel kaŭze de kiso aŭ io tia, sed Jon haltigis la spiron kaj ŝajnis dormi aŭ esti mortinta. Poste ili iris eksteren, la edzino kaj Svein.

Kiam Jon poste rakontis pri tiu okazaĵo – sed tion li neniam faris escepte ebria – tiam li ĉiam diris: „Tiufoje mi montris plej grandan animan forton en mia vivo, ĉar mi

estas mastro en mia hejmo, je diablo.“

Poste Jon neniam ekpensis pri tio ekkapti la regadon en Brekka. Kiam li estis ebria li diris: „Mi estas mastro en mia hejmo,“ sed sen plia ago.

Sed kiam pastro Hannes parolis pri ideala hejmo kaj ideala kunvivo de geedzoj, tiam li ĉiam menciis Brekkan kaj la geedzojn en Brekka. Li diris, ke tie oni povas vidi unuecon de la spirito en la ligo de paco.

*(Stefán Sigurðsson, La Tradukisto 17, 1994.)*

## **Einar H. Kvaran:**

### **Pardono**

Malgranda Sinjo kuŝigis sin pli profunden en la lito, kontraŭpiede al unu el la servistinoj. Ŝi tiris la maldelikatan, malpezan kaj malmolan kovraĵon super la kapon kaj premis sian pupaĉon al la brusto. Ĉiam antaŭe ŝi povis ekdormi havante sian pupon inter la brakoj. Sed tion ŝi ne povis nun.

Ĉar mortinta estis Olavio, la mastrino.

Negrave estis, ke Olavio jam mortis. Almenaŭ malgranda Sinjo ne sentis ian mankon pro ŝi. Nun Gunjo, la servistino apud kiu kuŝis malgranda Sinjo, fariĝos mastrumistino – tion ŝi mem diris. Kaj Gunjo neniam traktis ŝin malbone, kaj ankaŭ ŝi promesis ne trakti ŝin malbone estonte.

Ne, estis nenia domaĝo al malgranda Sinjo, ke Olavio jam mortis. – – Sed Olavio estis tiel malbona, tiel treege malbona. Estis videble al malgranda Sinjo, ke ŝi neeviteble iros en la malbonan lokon.

Olavio ofte diris al ŝi, la malgranda Sinjo, ke ŝi irus al infero post la morto, se ŝi agus malbone aŭ parolus ian malbelaĵon. Kaj Olavio mem faris multon malbonan kaj estis ĉiam diranta tiom da malbelaĵoj. – – – Kaj nun ŝi estis mortinta. – – –

Malgranda Sinjo ankaŭ iam aŭdis legite el la religia legolibro – aŭ ŝi aŭdis, ke iu tion diris, sed kiu, ŝi ne memoris – ke Jesuo Kristo iam diris, ke kion la homoj faras al iu el liaj plej malgrandaj fratoj, tion ili al li mem faris. – – – Cetere ŝi ne estas frato de

Jesuo Kristo, kompreneble, sed lia fratino ŝi nepre estas. Kaj ne povas esti pli bela ago prihati malgrandajn knabinojn ol malgrandajn knabojn – tiel treege kiel Olavio ŝin pribatis.

Kaj ŝi en nenio estis kulpa. – – – Lavante la tasaron, ŝi ne povis eviti, ke la subtasoj rompiĝis. Antaŭe ja estis fendeto tra la tuta subtasoj. Tion ŝi mem ekvidis antaŭ la lavado. Ĝi nenion povis elteni. Kiel ŝi do povus esti evitinta, ke la subtasoj dispeciĝu, kiam ŝi viŝis ĝin?

Kaj tiam Olavio ŝin tiel batis sur la vangon, ke ŝi renversiĝis kaj falis sur la manĝaĵojn plankon; kaj poste ŝi surdorse batis ŝin kuŝantan sur la planko; kaj ankaŭ ŝi tiel piedpremis ŝian piedon, ke ĝi poste doloris dum longa tempo.

Ne estas bele tiel bati Jesuon Kriston kaj tiel premi lian piedon, – kaj ŝi estis kvazaŭ traktinta lin tiel, ĉar ŝi tiel traktis malgrandan Sinjon, kvankam tiu ne estis lia frato, sed nur lia fratino. Estas do evidente, kio okazos al Olavio, ĉar ŝi estis tiel terure malbona.

Kaj ĉu ŝi povis eviti, ke ŝi estis tute malseka vespere, ĉar oni ĉiam ordonis al ŝi alporti akvon? Ŝi ja ne ŝerce igis la akvon elŝpruciĝi el la sitelo sur sin kaj portis malsekajn vestaĵojn dum la tuta tago kaj vespere ricevis insulton kaj eĉ batojn pro tio, ke ŝi estis malseka.

La infana menso hardiĝis kiel animo de malnova pekulo. Malgranda Sinjo tute forgesis sian pupon kaj rulis sin de unu flanko sur alian en la lito, sen plej malgranda zorgo pri ĝi.

Ŝi rememorigis al si, kiel malbone Olavio ĉiam agis al ŝi, de post kiam en la kruftago [la 14-a de majo] antaŭ unu jaro ŝi alvenis kun sia malgranda vestaro alligita al la selo, al kiu ŝi mem estis alligita, kaj kun la pupo alligita al la ŝaŭto, kiu kuŝis sur ŝiaj ŝultroj.

„Vi ja estos prihatata, bubino, se vi ĉi tie montros ian nebonan konduton,“ Olavio diris al ŝi la unuan vesperon. „Mi ja antaŭe havis infanojn por la komunumo, kaj scias, kiaj ili estas, precipe kiam ili ĵus venis de sia patrino, kaj mi ankaŭ scias ilin disciplini. Mi ilin nur pribatas, se ili montras ian nebonan konduton, ilin nur pribatas!“

Kaj malgranda Sinjo kaŝe rigardis ŝiajn manojn – grandajn, bluruĝajn, ostecajn manaĉojn, kaj al ŝi ekŝajnis, ke Olavio estus ilin neniam uzanta por io alia ol prihati

malgrandajn infanojn.

Ofte ŝi sonĝis pri ĉi tiuj bluruĝaj manoj, – sonĝis, ke ili venas tra la muro apud la lito, intencante fortiri la litkovraĵon por pribati ŝin, – ke ŝi staras ekstreme sur montroko, kaj ili venas supren sur la randon intencante faligi ŝin malsupren, – kaj multe, multe pli ŝi sonĝis pri ili. Sed ĉiam ili deziris fari domaĝon al ŝi.

Kaj maldormante ŝi ne timis ilin malpli ol en dormo. Ŝi ĉiam penis esti kiel eble plej malproksime de ili. Estis plej bone, se oni ŝin sendis ien for de la domo, sed la manoj restis en la sidejo aŭ en la manĝaĵejo, – bonege esti devigata alporti akvon, se ŝi nur ne estus ricevanta batadon pro tio, ke ŝi malsekiĝis. Kaj ŝi kaŝis sin for de ili, se ŝi trovis ian eblecon, premis sin en iun angulon, se tiu troviĝis proksime, kiam ajn la manoj preteriris.

En la vespero antaŭ la morto de Olavio ŝi eniris, dum malgranda Sinjo manĝis sian kaĉon el la kaĉujo, kaj la unua mano ekprenis ŝin je la brusto, sed la alia forprenis la kaĉujon de ŝi, kaj ankoraŭ ŝi sentis doloreton en la brusto pro la mano. Kaj Olavio kliniĝis al ŝia orelo, kaj malgranda Sinjo sentis kvazaŭ malvarmo enirus en la orelon, en la kapon kaj malsupren sur la ŝultrojn kaj tra la tuta dorso. Kaj Olavio duonflustris al ŝi:

„Morgaŭ mi pribatos vin, knabinaĉo, ĉar vi montris malfidecon kaj lasis al la ŝafinoj eniri la domkampon. Mi pribatos vin iom pli severe ol mi kutimas. Vi do povos pripensi ĉi vespere en la lito kaj ankaŭ venontmatene dum via vestado, kiel sentiĝos esti pribatata iom pli severe ol mi kutimas pribati vin.“

Tamen ŝi ne povis malhelpi, ke la ŝafinoj eniru la domkampon. Ili ja eniris, dum ŝi portis la torfon el la hejtajejo en la kuirejon. Kaj ŝi portis la torfon laŭ ordono.

Sed ŝi ne estis pribatata la morgaŭan tagon. Kiam ŝi vekigis matene kaj ekpripensis, ke hodiaŭ ŝi estos pribatata pli severe ol antaŭe, tiam ŝi rimarkis, ke la domanoj, kiuj estis en la dormejo, mallaŭte parolis kaj irante paŝis sur la piedpintoj. Kaj Gunjo venis al ŝi kaj diris, ke ŝi jam dormis tre longe, la mizera korpo, neniu memoris veki ŝin. Estis pro tio, ke Olavio jam mortis, subitmortis en la nokto.

„Ĉu vi deziras vidi ŝin, malgranda Sinjo?“ demandis Gunjo.

„Ĉu oni kapablas pribati, kiam oni estas mortinta?“ tiam demandis malgranda Sinjo. Sed Gunjo diris, ke ŝi ne parolu tian nekompereblan malsaĝaĵon, ĉu ŝi ne komprenas, ke Olavio estas mortinta kaj alveninta al Dio. Kaj malgranda Sinjo tuj

komprenis, ke tio estas nekomparebla malsaĝaĵo: neniu kapablas pribati, kiam li estas mortinta.

Kaj Gunjo prenis ŝin el la lito kaj esprimis sin preta porti ŝin. Ŝi estas ĉiam tiel bona al malgranda Sinjo. Ŝi portis ŝin en la dormejon de Olavio. – Tie kuŝis Olavio sub litkovrilo sur lignaĵo, kaj malgranda Sinjo vidis la formon de ŝiaj piedoj. – Terure grandaj ili estas kaj peze ili pasis sur korpo de oni. Tuko kuŝis sur ŝia vizaĝo, kaj Gunjo ĝin fortiris. – Kian grandan nazon ŝi havas. La manoj restas sub la kovrilo. Estis bone, ke Gunjo ilin ne malkovris.

Malgranda Sinjo rimarkis malfermitan libron sur la brusto de Olavio. „Por kio estas ĉi tiu libro tie?“ ŝi demandis, „Olavio ja neniam legas en libroj.“

„Estas la Pasiona Kantikaro, infano,“ diris Gunjo. „Ĝi estas tien metita, por ke nenio malpura povu veni al la mortintino.“

„Kia malpuraĵo? Neniaj malpuraj vestaĵoj?“

„Ne, infano! Neniaj malbonaj spiritoj.“

Estis bone, ke Olavio jam mortis. Tion ŝi ja meritis. Nun ŝi ne povos plu pribati malgrandan Sinjon, ĉar oni ne kapablas pribati, kiam oni estas mortinta. Nun ŝi jam estis forportita en la gastoĉambron kaj metita en ĉerkon. Sed ankoraŭ ne estas kovrilo metita sur la ĉerkon. Tio estos farata morgaŭ, Gunjo al ŝi rakontis. Kaj tiam oni forveturigos Olavion kaj metos ŝin en tombon. – – Kaj la malbelulaĉo ŝin prenos el la tombo kaj venigos ŝin al sia hejmo. – – Ne estis vero, kion diris Gunjo, ke Olavio estas alveninta al Dio. Tion malgranda Sinjo bone sciis, ĉar Olavio estis tiel malbona. Kaj tio bone konvenis por ŝi, ĉar ŝi estis tiel malbona. Kaj ŝi ja estas en la ĉerko en la gastoĉambro, sed ne ĉe Dio.

Estas terure malbone restadi ĉe la malbelulaĉo – terure varmege. – Verŝajne tiel varmege kiel en la gejsero apud la domkampoj. – – Aŭ kiel en bolanta kaĉpoto. – – Kaj oni povos neniam eliri – – – absolute neniam. – – Kaj tie oni verŝajne ne povas dormi eĉ unu malgrandan momenton, devas maldormi tage kaj nokte – – tie kie estas tiel timige, terure, terurege varme. – – Kaj povi neniam eliri.

Sed, mia bona Dio. – – – Oni nepre devas igi, ke Olavio ne eniru tien en la gejseron aŭ en la kaĉpoton, de kiam ŝi neniam povos eliri. Ŝi ne estis *tiel* malbona. Ŝi ne estis *ĉiam* pribatanta ŝin. Ŝi donis al ŝi manĝaĵon. Kaj iam, kiam ŝi estis *terure* malseka



kaj al ŝi estis *terure* malvarme – pli malvarme ol iam ajn alifoje – tiam ŝi ne pribatis ŝin kaj ne traktis ŝin malbone, sed ordonis al ŝi enlitiĝi kaj helpis al ŝi senvestigi sin kaj kovris ŝin per la littukaĉoj kaj donis al ŝi varman lakton en la liton.

Ne, ne, – en nenia okazo devus Olavio iri en la malbonan lokon.

„Jesuo Kristo, faru tion por mi; ne igu ŝin tien iri.“ Kie do estas la pupo? Ŝi forgesis ĝin. Ŝi ĉiam povis ekdormi, havante la pupon apud si. Estas strange, ke ŝi tion ne povas nun. La pupo troviĝas tre profunde en la lito, kaj Gunjo kuŝigis unu el siaj piedoj sur ĝia kapo. – Mirinde, ke ĝi ne sufokiĝis, la kompatinda pupo.

Iam Olavio intencis forpreni ĉi tiun pupon de ŝi – igi ŝin postteni nenion el ĝi krom la kapon. Ŝi diris, ke estas pli konvene, ke ŝi surĵetu ĉi tiujn ĉifonojn sur iun truon de siaj vestaĉoj. Tiam malgranda Sinjo eksentis teruran timon. Kiel povus la pupo esti nura kapo? Neniu infano estas nura kapo. Tiam ĝi ne plu estus ia pupo.

De tiam malgranda Sinjo neniam prenis sian pupon tage, por ke Olavio ĝin ne ekvidu, ne ekmemoru. Ŝi kaŝis ĝin sub la matraco en la lito de Gunjo kaj nur prenis ĝin, kiam ŝi estis kuŝiĝinta vespere. Estas tiel bone ekdormi kun ĝi inter la brakoj.

Se ŝi nun irus kaj donacus la pupon al Olavio, metus ĝin en ŝian ĉerkon, ĉar ŝi estas dezirinta posedi ĝin. – Tiam povus bone okazi, ke ŝi pli facile ekdormus en la malbona loko. – Ne estas tro multe por ŝi, la kompatindulo, povi ekdormi. – Al ŝi la pupo estus bonvole donota.

Ne, ne, – la pupon! – donaci la pupon al Olavio! – Doni sian pupon en ŝiajn bluruĝajn, grandajn manojn. – Igi ŝin foriri kun ĝi en la malbonan lokon kaj tie ĝin malbone trakti. – Ne, tiel ŝi neniam agus. Tio ankaŭ neniel helpus. Olavio ne interesiĝis pri pupoj. Ŝi ne povus pli facile ekdormi, se ŝi havus pupon. Ŝi tute ne deziris havi pupon. Ŝi intencis nur disŝiri la vestaĵon de ĝi kaj tute disŝiri ĝin mem por havigi flikaĵojn por vestaĵoj. Kaj malgranda Sinjo premis la pupon al sia brusto pli firme ol iam ajn antaŭe.

Sed kion fari? Olavio ne iru al la malbona loko. Al malgranda Sinjo tio ŝajnis ĉiam pli kaj pli terura; ŝi sentis ĉiam plian kaj plian timon je la penso.

Ŝi eldiris Patro-Nian kaj la Benvortojn kaj faris krucsignon antaŭ si. Pli multe ŝi ne estis lerninta. Kaj ŝi aldone diris:

„Jesuo Kristo, faru tion por mi; ne igu ŝin iri en la malbonan lokon. – Tiuokaze

mi ĉiam eldiros Patro-Nian vespere kaj ĉiam kondutos bone. Neniel gravas, ke ŝi min malbone traktis, ke ŝi min piedpremis, ke ŝi min pribatis. Igu ŝin ne tien iri, kvankam ŝi tion ĉi faris. Mi pardonas ĉion ĉi al ŝi.“

Si tute ne estis certe, ke Jesuo Kristo kapablos malhelpi, ke Olavio iru en la malbonan lokon. Li ja ne loĝas malsupre en la tero. – Sed la malbelulaĉo loĝas malsupre en la tero. Tion ŝi ofte aŭdis. Kaj ankaŭ ŝi mem lin aŭde rimarkis, kiam ŝi iris ĉiprintempe suden al la tertruo. Tiam ŝi aŭdis lin de tre malproksime malsupre. Li diris „gol-l, gol-l,“ ĉiam tion ĉi ripetadis. Kaj ŝi terure ektimis kaj kuris hejmen kaj rakontis ĉion al la servistinoj. Kaj la servistinoj al ŝi diris ke plej verŝanje tio estis la malbelulaĉo kaj ke plej bone por ŝi estas neniam plu iri al la tertruo. – Kaj la malbelulaĉo, kiu loĝas malsupre en la tero, posedas ĉiujn malbonajn homojn, kiam ili estas venintaj en la tombon, kaj venigas ilin al sia hejmo. – Tion ĉi Olavio mem rakontis al ŝi. – Kiamaniere do povus Jesuo Kristo helpi al Olavio?

Denove pliiĝis la timego de malgranda Sinjo. Denove ŝi forgesis sian pupon, rulis sin de unu flanko sur alian en la lito, eĉ eksidis kaj atente aŭskultis la spiradon kaj ronkadon de la gedormantoj en la dormejo, kvazaŭ ŝi intencus de ili aŭdi, kion fari.

Ŝi denove kuŝiĝis, ĉirkaŭpremis la pupon, puŝis sin kiel eble plej profunde en la liton kaj tiris la kovrilon super la kapon. Sed ekdormi ŝi ne povis. Ŝi ne trovis ian ajn rimedon certigi sin en la pripensado, kia malfeliĉo estus por Olavio, se la malbelulaĉo ŝin forprenus malsupren en la teruran varmegon, kaj se ŝi neniel povus iam ajn ekdormi kaj absolute neniam eliri.

Post longa penado ŝi ekrememoris la Pasionan Kantikaron. Gunjo ja diris al ŝi ke ĝi estas metata sur la bruston, por ke malbonaj spiritoj ne povu veni al oni. Sed ĝi ne estis metita sur la bruston de Olavio en la ĉerko. La domanoj kantis el ĝi kaj poste ĝi estis metata sur breton super ŝia lito.

Nun ŝi komprenis, kion fari, por ke la malbelulaĉo ne povu veni al Olavio en la tombo, sed Jesuo Kristo povu trovi ian rimedon venigi ŝin al si.

Ŝi eliĝis el la lito, tre kviete, por ke Gunjo ne vekiĝu. Kaj ŝi senbrue ŝteliris tra la dormejo kaj en la ĉambron de Olavio, kiu nun estis senhoma, kaj vekis neniun. Ŝi grimpis sur ŝian liton kaj streĉis sin al la breto por la Pasiona Kantikaro. Post momento ŝi estis alportinta ĝin en la gastoĉambron.

Tukaĵo kovris la ĉerkon. Malgranda Sinjo ĝin fortiris. Tie kuŝis Olavio portanta subvestaĵojn. La manoj trovis sin kruce malsupre de la brusto. Bluruĝaj ili ne plu estis, sed blublankaj. Malgranda Sinjo ilin tute ne timis.

Ŝi metis la libron supre ĉe la manoj.

La jam leviĝinta suno printempa enbrilis tra la gastaĉambra fenestro kaj ĵetis la saman radion sur la blondan kapeton de malgranda Sinjo kaj sur la blublankajn manojn de Olavio. Ĉar Dio igas sian sunon brili sur bonulojn kaj malbonulojn.

Gunjo ekmoviĝis en la lito, kiam malgranda Sinjo ŝin tuŝis per siaj malvarmegaj piedoj, sed ne plene vekigis. Kia ĝuo por malgranda Sinjo veni en la varmon. Kaj nun ŝi trankvile ekdormis kun la pupo inter la brakoj.

*(Ólafur P. Kristjánsson, Voĉo de Islando I, 1, 1949.)*

## Seka vetero

Malseka vetero estis estinta dum la pasinta duonmonato. Ne pluvegoj, plej ofte. Sed la nebulo estis movetiĝinta malgaje laŭ la montpintoj kaj pendinta ĉie en la aero kaj griziginta la tutan vivon. De tempo al tempo ĝi faligis el si pluveton aŭ verŝis pluvegon sur la fojnon kaj ĉion alian sur la tero, tiel ke ŝtonoj nur malofte sekiĝis, sed herbo neniam.

Ŝajnis al ni iom tede en la butikoj. Interesus min scii, kian karakteron havas tiu homo, kiun interesus restadi tie. La butikoj estis de la komencigo de la lasta jarcento, gudroŝmirita, karbonigra domaĉo, kiu jam fariĝis oblikva kaj kaduka, la fenestroj malaltaj kaj malgrandaj kun etaj vitroj. Kaj estis mallonga spaco de la planko ĝis la plafono. Ĉio estis aranĝita kvazaŭ oni penus zorge eviti, ke ni rigardu aŭ pensu alte tie en la butikoj.

Kaj nun neniu envenis al ni en la butikojn, eĉ ne iom maldiligentaj sensalajruloj, kiuj plej ofte sin vivtenis per parazitado en la vilaĝo kaj ĉiutage okazigis kunvenojn ĉe ni, sed ne kutimis ion aĉeti. Ni ofte blasfemis pri ili pro la ĉiama starado en la butikoj. Nun ili estis jam prilaborantaj fojnon. Ni sentis nun, ke ili ofte estis interesaj. Ili rakontis pri multaj kuriozaĵoj kaj alportis al ni diversajn novaĵojn pri la najbaroj. Kaj nun ni blasfemis pri ili pro tio, ke ili ne venis.

Ni sidis tie kaj fumis kaj rigardis la duone malplenajn bretojn kaj tremetis en la malvarmiga ĉirkaŭaĵo. Ne estis forno en la butikoj, nek vintre nek somere, kaj la forno en la kontoro eligis fumnubojn en ĉiujn direktojn, escepte de supren laŭ la fumtubo, se oni faris fajron en ĝi. Nur iam en la vintro oni eligis el ĝi la fulgon, kaj ni ne emis tion fari meze de la somero.

Ni penis eligi la menson el la butikoj, eksteren al la popolo. Poste ni faris unu al la alia grandsagacajn notojn pri tio, ke la farmistoj ricevas abundan akvumon sur siajn kampojn kaj ke estas domaĝe, se nun komenciĝas longdaŭra malseka vetero, ĝuste en la komenciĝo de la falĉadsezono. Poste ni ne havis pli por aldoni al tiu afero, sed diris tion ofte dum la sama tago kaj tagon post tago.

Per malmultaj vortoj: ni ne estis gajhumoraj kaj parolis malŝate pri ĉio.

Ĝis kiam komenciĝis la seka vetero.

Iun matenon je sudorienta marko [t.e. ĉirkaŭ la naŭa horo] la nebulo komencis ekmoviĝi. Unue venis en ĝi manplate granda truo en oriento, kaj malantaŭe estis lazura makulo. Poste venis alia truo, kaj tie aperis la suno.

Ni sciis, kio tio estas nomata. Kaj poste ni diris unu al la alia:

„Tio estas nur sudorienta helmakuliĝo.“ La nebulo komencis maldensiĝi kaj kirliĝi eksteren laŭ la montaro kontraŭ ni. Poste ĝi amasiĝis en profunda breĉo malproksime ekstere, kvazaŭ novtaŭzita, blanka lano. La montoj elstaris ambaŭflanke de la breĉo, lazure bluaj kaj ĝojecaj, kaj apenaŭ ekrigardis la nebulon. Kaj super ni estis nur bluo, sunbrilo kaj lazuro – kiam ni eligis la kapojn el la butika pordo.

La homoj trans la fjordo aspektis, vidite de ni, kvazaŭ etaj vojgvidiloj – escepte ke tiuj vojgvidiloj ja ĉiuj moviĝis. Ili moviĝis vice unu post la alia laŭ la kampoj. Ŝajnis al mi, ke mi sentas la fojnodoron. Sed tio ne povis esti io alia ol imago. Kaj ŝajnis ankaŭ al mi, ke mi aŭdas la ridon de la junulinoj. Precipe de unu el tiuj, kiuj estis trans la fjordo. Mi estus oferinta multe por esti trans la fjordo, turnanta fojnon kun ŝi.

Mi ne intencas rakonti pli detale pri tiu ĉi temo. Mi ne intencas rakonti iun amromanon. Almenaŭ ne laŭ ordinara kompreno.

La sekvetero daŭris. Ni, la komizoj, alternis resti eksterdome ĉiumomente kaj „trinki el la sunhela fonto de l' ĉielo.“ En la tria sekvetera tago, posttagmeze, mi iris al la kuracisto dum mia promenado. Mi estis iom laca pro la promenado kaj la senlaboreco

kaj antaŭĝojis pro baldaŭa sidiĝo sur la lanuge molan kanapon kaj aŭskulto al la parolo de la kuracisto.

„Cigaron?“ diris la kuracisto.

„Jes, cigaron,“ mi diris. „Hodiaŭ mi ne fumis pli ol ses cigarojn.“

„Bieron aŭ viskion kaj akvon?“ diris la kuracisto.

„Iomete da viskio,“ mi diris.

Mi ekbrulis la cigaron, aligis la fajrekstremon al la sensorganoj kaj lasis la fumon eniĝi en la nazon, metis la cigaron en la buŝon, suĉis ĝin iom firme kaj ellasis la fumon el la nazo. Poste mi ĝemis pro kontento. La cigaro estis bonega.

Poste ni malrapide ektrinkis la viskimiksaĵon. Mi apogiĝis al la apogilo de la kanapo, etendis la gambojn, sentis, ke mi fartas bonege, kaj sendis la menson momente trans la fjordon, tien kie ĝi preferis resti.

La kuracisto estis viglega. Li parolis pri la japanoj kaj rusoj, la plej novaj radioj, kiujn oni eltrovis, kaj la plej novaj teorioj pri tio, kia estas la sento de mortanto.

Aŭskulti aliajn homojn estas ago pli taŭga por mi ol io alia. Mi mem neniam ekpensas ion, kio ŝajnas al mi inda temo. Sed me preskaŭ povas diri, ke mi povas aŭskulti eĉ genie. Mi scias silenti kun atenta mieno. Kaj krome mi povas de tempo al tempo eldiri notetojn, ne por esprimi iun opinion aŭ scion de mi mem – mi nenion tiaspecan povas liveri – sed ekskluzive por igi la parolanton paroli pri novaj temoj, por ke la parolo ne fariĝu tro simpla kaj la homo ne ekenuu aŭdi sin mem paroli.

Mi fartis bonege tie sur la kanapo. Precipe interesis min, kiam la kuracisto ekrakontis al mi, kia estas la sento de mortanto. La morto estas ĉiam iel agrable ekscita, – kiam ĝi estas sufiĉe malproksima. Kaj ĝi estis tiel ĉarme malproksima de la fumodoro, la viskigusto kaj la ripozo sur la kanapo. Sed kiam mi igis la menson ŝvebi trans la fjordon al ŝi, pri kiu mi ne intencas rakonti – tion mi faris de tempo al tempo, malgraŭ la tuta atento, – tiam la morto tiel malproksimiĝis, ke mi apenaŭ povis ekkompreni la priskribojn pri tio, kia estas la sento de mortanto.

Meze en tiu kontentotrankvilo, kiun mi sentis, kaj la informoj, kiujn la kuracisto estis ŝutanta sur min, la pordo estis malfermata iom subite. Mia dorso frontis al la pordo, kiam ĝi estis malfermata, kaj mi supozis, ke tio estas unu el la infanoj de la kuracisto.

Sed estis la viro Þórður el Krókur.

Mi bone konis lin. Li estis iom pli ol kvindek jara, alta homo kaj grandosta, kun densa hararo kaj dika nazo. Mi sciis, ke li havas multajn infanojn. Iun fojon mi venis sur la korton de lia hejmo. Tiam la infanoj kuris kaj trotis kaj balanciĝis kaj rampis kaj ruliĝis el la farmeja pordo por min rigardadi. Ŝajnis al mi, ke mi ne povas kalkuli tiun svarmon pli facile ol grandan grupon da ŝafoj. Kaj mi sciis, ke neniu estas en la farmejeto por perlabori iliajn necesajojn, krom li kaj lia edzino; kaj krome iuj el liaj infanoj verŝajne estis jam iom kreskintaj. La posedanto de la butiko, kiu loĝis en Kopenhago, severe malpermesis al mi prunti al tiaj homoj kiel li; li ankaŭ ŝuldis pli ĉe ni ol li iam povos pagi.

„Li eĉ ne frapas la pordon, la viraĉo,“ mi diris al mi mem.

Li aspektis iom kurioze. La tuta vizaĝo estis bluruĝa, sed tiel ĝi ne aspektis ordinare, kaj la okuloj strange glaceis kaj estis tamen malĝojecaj. Ŝajnis al mi, ke liaj piedoj estis iom malfortaj.

„Ĉu la viraĉo drinkas sin ebria dum la krakanta seka vetero, meze en la falĉadsezono?“ mi diris al mi pense.

La kuracisto evidente ne ekkonis lin.

„Saluton al vi, mia homo. Kio estas la celo de via veno?“ li diris.

„Mi nur volis ricevi tiujn kvar kronojn,“ diris Þórður.

„Kiujn kvar kronojn?“ diris la kuracisto.

Þórður laŭtigis la voĉon. „Tiujn kvar kronojn, kiujn vi ŝuldas al mi.“ Ne kaŝiĝis plu, ke estis malfacile al li stari.

Mi faris al mi mem noton, ke diable la viro drinkis sin ebriega. Mi miris pri tio; mi neniam aŭdis, ke li estas drinkema. Li loĝis en la deklivo, iomete supre de la vilaĝo. Kaj mi komencis mediti pri tio, kie li ricevis la brandon, per kiu li estis ebriiginta sin. Li ja ne ricevis ĝin en la butiko ĉe ni.

„Kiel vi nomiĝas?“ diris la kuracisto.

„Nomiĝas? Ĉu vi ne scias, kiel mi nomiĝas? Ĉu vi ne konas min? Þórður. Þórður el Krókur. Mi preferas ekhavi mian monon tuj.“

„Jes, tute vere – vi estas Þórður el Krókur,“ diris la kuracisto. „Kaj vi jam ellitiĝis? Sed mia karulo, mi neniom ŝuldas al vi. Vi iomete ŝuldas al mi. Sed tio ja

neniom domaĝas.“

„Tute indiferente al mi. Mi preferas ekhavi mian monon tuj,“ diris Þórður.

„Ĉu mi rajtas ekpreni vian manon momente?“ diris la kuracisto.

Þórður lasis al li la manon. Sed ŝajnis al mi, ke li faris tion senkonscie. Li rigardis en la aeron, kvazaŭ li pensus pri tute alia afero – aŭ pli ĝuste kvazaŭ neniuj pensoj ekzistus en lia kapo.

Mi vidis, ke la kuracisto palpis lian manradikon.

„Vi estas malsana, mia homo,“ li diris.

„Malsana? Jes, certe mi estas malsana. – Ĉu mi pagu al vi tiujn kvar kronojn? Mi ne havas ilin nun.“

„Ne pensu pri la kronoj. Kial vi ellitiĝis en tia stato? Ĉu vi ne memoras, ke mi diris al vi, ke vi devas kuŝi, kiam mi venis al vi antaŭ nelonge?“

„Kuŝi? Kiel en la diablo mi povus kuŝi? Diru tion ĉi al mi!“

„Vi devas ne ellitiĝi, kiam vi estas morte malsana. Kaj plue vi ja deliras.“

„Malbenata azeno vi estas. Ĉu vi ne scias, ke estas seka vetero?“

„Jes, mi scias, ke estas seka vetero,“ diris la kuracisto. Estis evidente neklare al li, kiel tio koncernas al la afero. „Sidiĝu. Poste ni parolos pri la seka vetero.“

„Sidiĝi? Ne. Kiu tiam prizorgu la sekigon de la fojno? Mi jam falĉis iomete, antaŭ ol mi malsaniĝis. Kial vi diras, ke mi ne faris tion? Kaj la infanoj iom falĉetis. Kiu prizorgu la sekigon de tio? Guðrún, mia edzino, ja ne povas tion fari. Ŝi ja ne povas fari *ĉion*. La infanoj? Ĉu vi supozas, ke ili ion scias pri sekigo de fojno? Kiu tion faru? Ĉu vi intencas tion fari?“

„Io pliboniĝos al vi,“ diris la kuracisto embarase.

„Pliboniĝos? Nenio iam pliboniĝis al mi.“

Fluis al mi malvarma akvo inter la haŭto kaj la karno. [Islanda esprimo: Mi tre emociiĝis.] Mi sciis, ke li diris tute vere: al li nenio iam pliboniĝis. Turniĝis al mi la kapo, rigardante en la profundaĵon de la kadukeco. Kaj ŝajnis al mi momente, ke pli koncernas min la vero en tiu ĉi delirobabilo ol la tuta saĝo de la mondo.

„Ĉu mi do ricevos tiujn kvar kronojn, kiujn vi ŝuldas al mi?“ diris nun Þórður. Tremis al li la ostoj, kaj la dentoj tintis.

La kuracisto prenis kvar kronojn el sia monujo kaj liveris ilin al li.

Þórður metis ilin sur la tablon kaj ŝanceliĝis al la pordo.

„Vi forlasas viajn kronojn, homo,“ diris la kuracisto.

„Mi ne havas ilin nun,“ diris Þórður, li ne rigardis malantaŭen, sed ŝanceliĝis plue eksteren. „Mi pagos ilin, kiam mi povos.“

„Ĉu ne estas senhoma lito en la subtegmentejo de la butikoj ĉe vi?“ diris la kuracisto al mi. distancon, li tute renversiĝis.

„Jes,“ mi diris. „Ni akompanos vin en la butikojn, Þórður.“

„Akompani min? Ne, estu tio malbenata. Mi iros por prizorgi la fojnon.“

Ni eliris kun li kaj rigardis post li de la domo. Kiam li estis irinta mallongan

Poste ni portis lin en la subtegmentejojn de la butikoj.

Post kelkaj tagoj li estus povinta doni informojn pri tio, se iu estus povinta paroli kun li, ĉu la plej novaj teorioj pri sento de mortanto estas ĝustaj aŭ ne.

Sed kiu nun prizorgu la sekigon de la fojnoj ĉe lia hejmo?

*(Ólafur S. Magnússon, Voĉo de Islando, 1959, 2.)*

## Esperoj

Antaŭen. Antaŭen. Antaŭen kontraŭ la vento sune saturita, arde varma, kiu blovetas al la enmigrinto, se li ŝovas la kapon tra la fenestro de la vagono. Antaŭen tra la ebena, nemezurebla, senfina, plena de paco, memorigante pri la ripozo eterna.

Antaŭen al la mirinda lando, la promesa lando, la lando, kie amikoj kaj samlandanoj atendas onin, malpacience por bonvenigi onin, ĉirkaŭbraki kaj kisi onin, la lando, kie la riĉeco kaj kontenteco kaj la feliĉo kaj la libereco kaj la respekto atendas onin kaj kuras enbraken al oni tuj kiam oni alvenas; la lando pri kiu la oficistoj diris, ke ĝi estas infero kaj la enmigrintagentoj, ke ĝi estas paradizo. Antaŭen, antaŭen.

Kaj antaŭen rapidegas la vapormaŝino kun la tuta vico da enmigrintaj vagonoj post si. Vapormaŝino siblanta, anhelanta kaj krieganta kvazaŭ ĝi atentigas homojn pri tio, ke ili ankaŭ povu suferi sur la ebena, kaj ke la vivo povus ilin mistrakti, kvankam la rega ĉenaro ne subpremas.

La liberecon oni ankoraŭ ne akiris, kaj ankaŭ neniujn aliajn bonojn de Ameriko. Kaj la islandanoj neniam spertis tian malliberecon, kian ili nun devas toleri.



Ili ec ne rajtas stari sur la peronoj inter la vagonoj. Se ili haltas tie, venas momente viro kun kupra ŝildo sur la ĉapelo kaj direktas ilin enen – diras kutime nenion, kontraŭe prenas per unu mano la ŝultron de oni kaj montras per la alia mano al la pordo de la vagono.

Kaj oni devas eniri, vole nevole eniri en la sufokan varmon, manĝaĵodoron, en al la proviantkestoj, litaĵo, infanoj ridegantaj kaj ploregantaj, al la virinoj kun nudaj, ruĝbrunaj, multelsuĉitaj mamoj, kaj al la viroj, fumantaj, maĉantaj, kraĉantaj aŭ ronkantaj.

Kaj ĉiu ajn homo sopiras eksteren, eksteren el la premeco, por rektigi la genukavojn, skui la ridigecon el nervoj kaj artikoj, eksteren en la aeron larme puran kaj aroman, eksteren en la vivon, la laboron kaj la bataladon aŭ la diboĉon kaj senordon, por batali kaj venki, aŭ por ĝui la vivon por skui de si ĉiujn ligilojn, aŭ por des pli bone esti ligita de la plej fortaj ligiloj, la ligiloj de la amo.

Tial resonis en ĉies menso dum la tuta vojaĝo: Antaŭen, antaŭen. Ĉiufoje kiam la trajno haltis dum tempeto, oni bedaŭris tion. Sed krom tio la pasaĝeroj jam fariĝis malpaciencaj, ili estis obseditaj de la malkvieteco, kiu ĉiam sekvas tion, ke oni mem nenion povas fari, sed estas tamen proksime al la celo. Jam estis iom post tagmezo, kaj la pasaĝeroj eksciis, ke la trajno venos al Winnipeg je la kvara en la sama tago. Malmultaj el tiuj, kiuj ne dormis povis sidi trankvile. Ili devis iom movi sin, kvankam ili ne multe povu iri. Kaj kvankam ili nenion povus vidi tra la fenestroj escepte la ebenon, kaj kvankam fenestro estis ĉe ĉiu ajn sidloko, ili iris laŭlonge la tutan vagonaron por trarigardi fenestron tie. Kaj kvankam ĉiuj egale malmulte konis tiun vojon, kaj kvankam ĉiuj sciis, kiam finos la vojaĝo, tamen demandis ĉiuj unu la alian ripete kaj ripete:

„Ĉu vi ne opinias, ke ni baldaŭ venos al Winnipeg?“

Pro tiu ĉi irado tien kaj reen kaj tiuj ĉi demandoj fariĝis ioma knarado kaj murmurado en la vagonoj kaj ĝeno por tiuj, kiuj alie povis sin reteni kaj atendi kun proporcia pacienco.

Tamen estis unu homo, kiu nenion perceptis – ne pli ol, se li estus sola en la trajno. Li sidis senmova apud unu fenestro kaj rigardis en sian sinon. Tiel li estis sidanta preskaŭ tiun tutan tagoparton sen diri eĉ unu vorton. La aliaj ripete alparolis lin. Ili

nomis lin je ĉiuj nomoj, je kiuj li iam ajn estis nomata: Olav Jonson, Oli, Laŭvi, Labbi, Longa Oli, Longa Laŭvi, Longa Labbi kaj Longul' – sed ĉio estis vane. Aŭ Olav nenion aŭdis aŭ li nenion volis aŭdi.

Ĉiam li rigardis en sian sinon. Kaj la belaj, senkulpecaj, malhelecaj okuloj fariĝis ankoraŭ pli belaj, ankoraŭ pli senkulpecaj, ankoraŭ pli malhelecaj, ĉar li ne provis firme rigardi al io, tiel ke la pupilo ne kuntiriĝis. Li nenion vidis, almenaŭ ne per la okuloj. Kaj li nenion eksciis pri tio, kvankam la trajno subite ekirus en nigregan tunelon, kio tamen estas malagrabra ŝanĝiĝo por tiuj, kiuj ne kutimis al tio.

Li pensis pri ŝi, kiu promesis al li fidelecon ĝis la morto, kaj kiun li nun baldaŭ vidos, pri la ununura fraŭlino, kiu iam ajn estis bona al li, la ununura fraŭlino, kiu li iam ajn deziris, ke montru al li afablecon.

Li pensis pri tio, kiel strange estis efektive, ke li akiris la amon de ŝi, kaj tion li ofte estis pripensinta. Ŝi, kiu estis tiel beleta kaj tiel inteligenta kaj tiel vigla. Li ofte, ja multfoje vidis, kiel ĉiuj junaj farmlaboristoj rigardis al ŝi el la altarejo, precipe kiam la pastro preskaŭ findeklamis sian predikon kaj ili ekenuis. En la ŝtalgrizaj, duonridaj okuloj ili serĉis distron. Kaj al li pikis en la brusto ĉiufoje, kiam ŝi rigardis per tiuj okuloj al iu alia ol li el la altarejo – precipe se ŝi tiam ĵetis la kapon supren kaj malantaŭen, kiel ŝi ofte faris. Li tiel timis, ke ŝi tiam emis montri al tiu viro sian plaĉe dikan kolon. Li sentis doloron pro tiu kolo, kaj li timis pro ĝi, ĉar li trovis, ke neniuj loko nek en ĉielo nek sur tero havas tiel grandan altirpovon, kiel ŝia kolo, eble escepte ŝiaj lipoj.

Neniam ŝi estis senvorta rilate al la demandoj de la pastro, eĉ ne en la sesa ĉapitro. Ĉiun tiun nekompreneblan komplikaĵon en la geknaba lernolibro de Balleso pri devoj rilate al ĉio imagebla en la ĉielo kaj la tero, ŝi povis analizi senhezite kaj parkere. Li neniam spertis, ke ŝi embarasiĝis, kio ajn okazis. Se iu diris iun al ŝi, kiun estis neeble respondi, kio ajn ĝi estis, ŝi nek ruĝiĝis nek balbutis, ankaŭ ne kverelis kaj ne mienis fihumore, kontraŭe ŝi ĵetis la kapon iomete supren kaj malantaŭen kaj ridis. Poste ŝi kutime ekkantis.

Sed de ĉiuj mallertuloj, kun kiuj ŝi konatiĝis, li mem estis unu el la plej grandaj fuŝantoj. Li bone sciis tion, ĉar multaj diris tion al li, kaj ŝi kaj multaj aliaj. La religia lernado – la ununura afero, pri kiu oni instruis lin – sukcesis tre malbone. Kiam li estis

konfirmata, li ja sciis la kateĥismon plejparte, ĉar li estis diligenta kaj konscienca. Li nur ne povis memori dum tempeto, kio akordis. Se li devis klarigi „zorgon pri la korpo,“ li ofte ekfantaziis pri „instruantoj“ kaj „aŭdantoj.“ Kaj se oni demandis lin pri io rilate al „animo de la najbaro,“ li povis facile erari en „interna“ kaj „ekstera kulto.“

Kaj tiel ĉio iris al li inverse – escepte tio akiri la amon de Helga. Se li interluktis kun iu alia, li kutime malvenkis, kvankam la kontraŭulo estis malpli granda. Se iu ĉikane traktis lin, li neniam povis sin venĝi. Se li tion provis, li ĉiam estis priridata, tiel mallerte li agis. Kaj ĉio, kion li devis labori, li faris egale fuŝe. Iam aŭtune lia mastro diris, ke li dum la pasinta somero rompis pli multajn ilojn ol siaj laborantoj faris entute, ekde li fariĝis bienisto. Kaj tamen li estis maljuna bienulo.

Li estis tiel bonŝanca, ke li dungiĝis al la sama bieno, kie Helga estis servistino, en la jaro antaŭ ol ŝi vojaĝis al Ameriko. Kaj ŝi fianciniĝis kun li. Li eble fariĝis venkinto de ĉiuj, kiuj deziris ekhavi Helgan, ĉar li estis la plej submetiĝema el ili. Ŝi povis nome havi tiel efikan potencon super li, kiel oni havas super fidelaj kaj obeemaj hundoj. Liaj kunsvatantoj almenaŭ tiel klarigis tiun aferon.

Kaj unu post la alia pasis antaŭ lia menso la horoj de tiu jaro, dum kiu li restis kun ŝi. Iujn el ili sekvis paralizeca angoro kaj timo, iujn intima malĝojo kaj aliajn ekstaza ĝojo. Sed ili ĉiuj estis trapenetritaj de tiu sama pasio.

Ĉiun ŝian subitridon pro lia mallerteco, ĉiun ĉikanan vorton, kiun ŝi ĵetis al li kaj pri li, ĉiun dolĉan vorton, kiun ŝi flustris al li, ĉiun rideton, kiun ŝi sendis lin – aŭ aliajn virojn – ĉion tion li egale bone memoris kiel tio okazu en la hodiaŭa tago. Li preskaŭ povis memori ĉiun ajn puŝmovojn de ŝia kapo supren kaj malantaŭen. Nur la kisojn, kiujn ŝi estis doninta al li, li ne povis distingi en la menso. Ili ofte estis tiel multaj samfoje.

Preĉipe li detale kaj longe pripensis specialan tagon kiun ili kunestis. La falĉado de la nekulturita kampo plejparte pasis, kaj la tago jam iom mallongiĝis. Sed laŭ lia opinio, li ne estis unu kokinpaŝo pli proksime al la celo ol antaŭe. Ŝi estis eĉ iom pli malagraba al li en tiu tago ol iam ajn antaŭe kaj samtempe pli komplezema al la aliaj viroj.

Ĉi tio okazis multmaniere dum la tuta tago. Interalie kiam la laborantoj estis manĝontaj la matenmanĝon apud unu el la fojnostakoj. Ili jam eksidis escepte li kaj

Helga. Tiam li eksidis tiel, ke vaka loko estis ambaŭflanke de li, esperante, ke ŝi eble eksidu tie unuflanke. Sed kontraŭe ŝi enpemis sin malfacile kaj penige inter alia viro kaj unu el la servistinoj. Li sidis rektgambe sur la tero. Liaj piedoj estis nekutime longaj tamen kompare pli larĝaj. Li vidis, ke ŝi subitrigardis liajn piedojn kaj tiam ŝi ekparolis pri tio, ke estas strange, ke iuj viroj havas piedojn egale grandajn kaj samformajn kiel mezgrandaj potkovriloj. Li ekskuiĝis kaj tiris aŭtomate al si la piedojn. Sed tiam ŝi ekridegis kaj diris: „Kio estas? Ĉu viaj piedoj iel malbonas, Laŭvi?“

Kaj tiam ĉiuj aliaj rigardis liajn piedojn kaj ridaĉis laŭte.

Tiumaniere ŝi agis dum la tuta tago. Ŝi ĉiam turmentis lin kaj pikis lin per sarkasmoj kaj mokaĵo. Kiam li iris hejmen vespere, li estis kvazaŭ distriĝema pro kolero kaj malespero.

La laboruloj malfruis en la falĉejo, kaj preskaŭ mallumiĝis, kiam ili ekiris hejmen. Ili estis gajece viglaj spite de la laceco. La junaj viroj ĉirkaŭprenis la virinojn kaj ili hujis kaj kriis, sed ne liberigis sin. Tiam la viroj lasis ilin memvole. Poste iu ekdeklamis rakonton, kaj al li sukcesis atentigi la aliajn. La petolaĵo ĉesis kaj oni eksilentis, por ke ili perdu nenion vorton. Helga neniel partoprenis la gajecon, kaj Olav kompreneble ankaŭ ne. Kiam la rakontado komencis, Helga iom postiris sola. Sed kiam la rakonto tiel daŭris, ke ĉiuj aŭskultis per tuta povo de vivo kaj animo, tiam iu prenis la brakon de Olav de malantaŭe. Li turnis sin, kaj tie staris Helga antaŭ li. La aliaj iris antaŭen kaj nenion rimarkis, kaj tiam jam interiĝis altaĵo.

„Kion vi volas de mi?“ diris Olav.

Sed ŝi nenion respondis. Ŝi nur ĉirkaŭbrakis lian kolon, tiris lin al si malsupren, kaj poste ŝi donis al li longan, longan kison per duone malfermitaj lipoj sur la buŝon. Sekvis poste multaj kisoj unu post la alia ĉiuloke sur la vizaĝon, laŭpove rapide.

Ĉiun angoron, ĉiun malĝojon, ĉiujn mokvortojn, ĉion pri kio li jam aŭdis inter ĉielo kaj tero, ĉiun ajn eron Olav forgesis dum tiuj momentoj. Li nur sentis malklare, kiel la tuta sango fluis al la kapo. Li estis absorbita de senzorga, senbrida ĝojo.

Baldaŭ poste ŝi ekmenciis, ĉu ili transloĝu al Ameriko. Estus tiel longa tempo ĝis ili povus geedziĝi en Islando kaj havigi al si farmon, tiaj malriĉuloj, kiaj ili estas.

Sed la vojaĝo kostis preskaŭ tricent kronojn por ili ambaŭ kaj mankis multo, por ke Olav posedu tiel grandan sumon.

Helga posedis nenion, tute nenion krom la vestoj, orelingoj kaj tombakringon kun kolorita vitro, kiun oni nomis ŝtono.

Tiam li diris, ke estas neeble por ili vojaĝi tien.

„Ne estas neeble por ni vojaĝi tien,“ Helga diris kaj ekĝemis.

Sed tamen ŝi ĉiam priparolis tion denove kaj ree. Ŝi klarigis al li, kiu diferenco estas vivteni sin en Ameriko ol en Islando. En Ameriko viro ricevas 8-10 kronojn ĉiutage. Kaj kvankam viroj kelktempe ne povus ricevi laboron, virinoj ĉiam povas dungigi sin kiel servistinoj, kaj ili ricevas 80 kronojn monate. Li pensu pri tio – 80 kronoj. Ion oni povus fari per 80 kronoj ĉiumonate. Kaj kiam ajn ili dezirus fariĝi bienistoj, li povus ricevi bienon senpage. Tia malriĉulo, kia li estas povus fariĝi propraĵa bienisto, kaj plidire sur pli bona bieno ol ekzistas en Islando. Li nur uzu la prudenton – ĉu li ne akceptus tion, se iu proponus donaci al li la plej bonan bienon en Islando. Jes, certe li akceptus tion. Kial li do ne akceptus, kiam oni proponas al li bonegan bienon senpage en Ameriko.

Li diris ĉiam same, ke estas neeble por ili vojaĝi tien.

Sed tiuj provoj persvadi lin enradikiĝis en lia menso. Ŝi estis tiel fluparola, sed li neniam ekpensis alie ol tiel same, ke estas neeble por ili vojaĝi tien. Sed tamen li komencis pripensi la aferon tiel malmultflanke kiel lia menso pleje kapablis. Kaj tiam li ekdeziris, deziregis vojaĝi okcidenten trans la maron kun ŝi kaj vivi tie kun ŝi kiel riĉulo kiel ĉiuj faris en Ameriko. Sed kiel ili iru tien? Li neniujn rimedojn povis trovi.

Sed foje en dimanĉa vespero okazis, ke ili estis solaj kune kiel multfoje. Ŝi eĉ nekutime multe karesis lin, ŝi ĉirkaŭbrakis lin, volvis sin ĉirkaŭ lin, kisis lin per multminutaj kisoj kiel ŝi volus elsuĉi el li ĉiujn ajn erojn da volo kaj prudento kiuj restis en li.

Fine ŝi diris al li gajece kaj normale:

„Sed se mi iru antaŭe, Olav.“

Li fariĝis tiel konfuzita, ke unue li ne komprenis kion ŝi estis dirinta.

„Kiel do?“ li diris.

„Mi pensas pri tio,“ ŝi diris, „ke en Ameriko virinoj ĉiam povas gajni monon.

Tie estas tiel granda manko de virinoj. Kaj kiam oni ricevas 80 kronojn ĉiumonate, tiam oni povus fari ion per tiel multa mono. Ne daŭrus longe ĝis mi estus ŝparinta tiel multe,

ke mi povus aĉeti bienhavaĵon. Kaj tiam mi pagus la pruntaĵon kun rentumo,“ ŝi diris ridete.

Nun li komprenis, kion ŝi aludis. Li transdonu al ŝi sian tutan havaĵon, ĉar li posedis nur vojaĝmonon por ŝi. Poste li devu disiĝi de ŝi, perdi ŝin trans la mondmaron kaj ne vidi ŝin dum longa, longa tempo. Ne, ne, ne, tion li ne povis pripensi.

Kaj li demandis ŝin, ĉu ŝi povus esti tiel severa iri for de li kaj lasi lin sola. Li sentis esence tiel, kiel li restus sola en la lando, kiam ŝi estis foririnta. En la momento li ne memoris pri iu ajn homo krom ŝi.

Ŝi respondis, ke li povu imagi al si, kian doloron tio kaŭzus al ŝi. – Kaj tiam ŝi metis la brakojn ĉirkaŭ lian kolon kaj kisis lin longe, longe, multfoje, multfoje. – Sed ne ekzistas alia rimedo. Ŝi neniam povu ion laborgajni en Islando, kaj ili ambaŭ fariĝus grizharaj antaŭ ol ili povus geedziĝi, kaj verŝajne tiu ilia mizero metus ŝin en la tombon. Jes, ŝi estis tute certa, ke tiu mizero metus ŝin en la tombon – tute certa pri tio. Kaj tiam ŝi ekploris.

Li provis konsoli ŝin, volvi ŝin al si kaj forkisi ŝiajn larmojn. Sed tiam ŝi nur ploregis pli. Kaj ŝi diris, ke ŝi tiel bone vidas, tiel senekzemple bone, ke li neniam amis ŝin. Li taksis ŝin sufiĉe bona por ludi kun ŝi, kiam neniu alia virino volis amritali kun li. Sed se li devu fari ion por ŝi, li alie kondutas – tiam li ne volemas liveri 130 kronojn, kvankam li certe ricevos ilin repagitajn, multfoje repagitajn. Kaj nun ŝi ploregis pli senbride ol antaŭe.

Olav ekhavis konscienciproĉon. Li bone sciis, ke ne estas ekskluzive pro la mono, ke li ne volas lasi ŝin foriri. Li ankaŭ bone sciis, ke estas malplej pro la mono, ke li malŝatas tiun vojaĝon. Sed li sentis, ke li ne estas tute senkulpa, li ekpensas pri perdo de la mono, pri la risko. Malplej multaj islandanoj liveras 130 kronojn samfoje, sen ekpensi pri kaj timi pro ili – kaj kvankam la sekurigo estus pli ol ĉi tie.

Sed li hontegis pro tio. Li sentis, ke estas neelportebla malhonoro, ke ŝi estis leginta tiel malnoblajn pensojn en lia menso, kiel li domaĝis pro 130 kronoj, kvankam ili estas lia tuta havaĵo. Li estis nur 19 jara.

Lia memestimo venkis. Li facile venkis la penson pri la mono. Sed li ankaŭ venkis tion, kio estis pli malfacila. Li venkis la antaŭtimon esti senigita de Helga, kvankam tiu disigo estu nur dum mallonga tempo. Sed por ke tiu lia memestimo povu

parte superi lian pasion, li devis pligrandigi ĝin, tiel ke neniu ekvilibro estis inter ĝi kaj aliaj liaj animfortoj. Li volis mem foroferi ĉion. Ŝi proponis sendi monon al li, kiam ŝi estos tiel multe gajninta, ke por tio li povu veni post ŝi kaj al ŝi. Sed tion li tute rifuzis. Li volis atenti ĝis li mem estus gajninta tiel multe, ke li povu vojaĝi okcidenten. Li supozis, ke li ekhavos iujn rimedojn tion fari post du jaroj. Baldaŭ estis decidite pri tiu afero. Li devis liveri al ŝi la vojaĝmonon kaj krome ĉion, kion li povu disigi de si kaj ŝi povu utiligi. Li ankaŭ devis veni post ŝi kiel eble plej frue. Sed rekompence ŝi devus dume ami lin, pensi pri li maldormante kaj dormante kaj edziniĝi al li, kiam li venos okcidenten. Ili nenion volis elspezi de ilia eta havaĵo por aĉeti ringojn. Sed pro bona ordo li gratis en ŝian tombakringon per la vitra plato iun korvospuron, kiu devis signifi „Olav“.

Kiam ŝia vojaĝo estis decidita, la afero estis definitive preparolita, tiel ke ili nenion novan plu diskutis. Sed tamen ili neniam laciĝis parolante pri tio ripete kaj ripete, precipe Olav. Kiel ŝi sentu sin? Espereble bone, ĉar estas tiel bone loĝi en Ameriko. – Ĉu ŝi ne enuu, ĝis li venos? – Jes, kompreneble ŝi enuas, sed ŝi vivos en la espero. – Ĉu estas tute, *tute* certe, ke ŝi ne ununuran tagon forgesu lin? – Jes, tio estas *tute, tute* certe. Kaj ŝi forkisis la dubon, kiam ajn ĝi ŝtelrigardis.

Kaj en la posta somero ŝi foriris.

— — — Pasis du jaroj ekde ŝi vojaĝis. Kaj nun li sidas en la vagono, rigardas en siajn mankavojn kaj pripensas tion, kion nun estis rakontita, kaj multon, multon alian, pri kio ne estas rakontita. La tempo treniĝis antaŭen, kaj li trovis tiujn jarojn nepriskribeble longaj kaj enuaj. Sed nun la esperoj fine efektiviĝos, nun la sopiro fine kontentiĝos.

Kaj la demandoj ariĝis unu post la alia en lia menso, naivaj, malpaciencaj por akiri respondojn, trafenitaj da espero, amo kaj sopiro. Kiel ŝi aspektu post tiu tempo? Ĉu ŝi ankoraŭ portas la islandan kostumon? Ĉu ŝi ankoraŭ portas la ringon? Ĉu la ŝtono ne jam elfalis el ĝi kaj eble maltroviĝis. Ĝi estis ĉiam malbone muntita. Ĉu lia nomo eble jam estas elfrotita el ĝi interne. Kiom multan monon ŝi jam gajnis? Ĉu ŝi nun restas en la enmigranta domo? Kiel li salutu ŝin, se ŝi estos tie? Kiel ŝi salutos lin? Ĉu ŝi tuj kisos lin je vido de ĉiuj? Aŭ ĉu ŝi konduku lin ien flanken por ĉirkaŭbraki lin tie? Ĉu ŝi

iel povu havigi al li liton por la unua nokto?

Sed kiam la demandoj plimultiĝis, tiam la sopiro fariĝis pli efika. Kaj fine ĝi estis tiel drasta, ke ĝi forviŝis ĉiujn demandojn kaj ĉiujn definitivajn pensojn. Ĝi absorbis la tutan homon kaj malfortigis lin. Estis kvazaŭ ĉiuj liaj animfortoj kunligiĝis kaj fariĝis malpacienca, sendifina, senforma ekscita atendo je feliĉo.

Kelkaj akutaj sonoj, akraj kaj fajfaj el la vapormaŝino, abrupta skuo malantaŭen kaj poste alia, malpli forta skuo antaŭen – kaj la vagonaro haltis norde de la pli ol duonbrulitaj ruinoj sur *Common Street*, kiuj nomiĝas *Dominion Government Immigration Agency*.

Winnipeg staris kaj rostiĝis en la suno. Flavblankaj, grizblankaj, kotgrizaj, nigraj kaj nigre striaj la dometoj sude de la enmigranta domo – verŝajne la plej abonmeninda kabanaĉaro, kiu ekzistas en Kanado – staris vaste malfermitaj ambaŭfine, oscedante je trablovo, kiu estis nehavebla, ne ekzistis en la urbo. En ĉiu kabana pordo staris iu ĝemanta kaj viŝanta de si la ŝviton, iuj per poŝtuko, aliaj per la nuda mano kaj ankoraŭ aliaj per la maniko de sia ĉemizo. Unuloke estis grupo da buboj, nudkapaj, nudpiedaj, kun nigraj piedoj kaj vizaĝoj, ruĝbrunaj pro polvo kaj sunbruleco, iuj kun eble plej multe de la mano en la buŝo, la brakoj de aliaj pendis suben laŭ la flankoj. Sed ili ĉiuj gapis direkte al la enmigranta domo. Aliloke staris viro, nuda ĝis la talio kun longtenila lignohakilo enmane kaj lignostipo antaŭ si. Gutanta de ŝvito li ĉesas haki kaj rigardas samdirekten. En la tria loko estas maljunulino tenante bubeton je la ŝultro per la maldekstra mano kaj batante lin per tiu la dekstra. Ŝi ĉesas bati sen lasi la bubon, sed rigardas kiel la aliaj al la enmigranta domo. La bubo eĉ ĉesas ploraĉi, frotadas per unu mano la plej karnoriĉan parton de sia korpo, sed per la alia mano li viŝas siajn okulojn. Li rektiĝas, streĉas sin, tiras la buŝon flanken al la alia vango kaj gapas al la enmigranta domo kiel ĉiuj aliaj.

Ĉar la islandaj enmigrintoj jam venis.

Ili elfluas el la vagonoj, seriozaj, ŝvelitaj, lacaj kaj – antaŭ ĉio – eksterlande aspektaj. Ne kiel popolo el alia mondparto, sed de alia planedo. La plej multaj viroj portis lankoltukojn – tre malmultaj nudkolaj – kaj ili portis tiujn nepriskribeblajn islandajn, senformajn, lanŝtofajn pantalonojn, kiuj estas egale vastaj, kie oni rigardas ilin. Tamen la virinoj estis multe pli strange aspektaj. Iuj portis grandajn rajdoĉapelojn



kun longaj vualoj pendantaj malsupren dorse, aliaj kun la pendaĵoĉapo ĉe la alia vango aŭ malantaŭe ĉe la nuko kaj ankoraŭ aliaj nudkapaj, nekombitaj.

Iuj portis la malvastan jaketon kun elipsoforma, blanka makulo sur la brusto kaj ruĝecan aŭ bluecan rubandon ĉirkaŭ la kolon sube. Aliaj portis vastajn noktokamizolojn, flavecajn, bluecajn aŭ ruĝecajn. Iuj havis du harplektaĵojn, pendantajn sur la dorso kaj kunligitaj la finaĵoj. Aliaj havis duoblan harplektaĵon – la finaĵoj ree pingle firmigitaj al la kapo – kvazaŭ dika flikaĵo estis kunkudrita sur la kolon kaj la ŝultrojn malantaŭe. Sed ili ĉiuj estis pendigintaj sur la koksojn tiujn nigrajn, molajn, vastajn kaj pezajn jupojn, kiuj precipe donas al la islanda virina kostumo tiun malgracian trajton, kiun ĝi havas kaj dum jarcento post jarcento penis tiri la koksojn de islandaj virinoj malsupren – kion al ili verŝajne sukcesos.

Kaj la geviroj penas antaŭen sub la vestoportaĵo, kiun ili surhavas kaj sub aliaj portaĵoj. Iu viro kun malsanega virino enbrake, iom multaj aliaj kun infanoj malsanaj kaj plorantaj. Plej multaj portas sakojn enbrake. Iuj portas grandajn sakojn, aliaj malgrandajn. Plej multaj portas grandajn sakojn. Ili iras antaŭen al la enmigranta domo. Sed tie antaŭ la pordo islandaj Winnipeg-loĝantoj jam kolektiĝis je du vicoj – malvasta irejo por la enmigrintoj estas inter la vicoj. Ĉiuj la atendantoj estis malpeze vestitaj, viroj kaj virinoj, tamen precipe la virinoj. Ili ĉiuj estas ĝojaj kaj duonridetantaj, kaj estas nuanco de boneco kaj moko en la rideto – tamen pli da boneco. La amerikaj islandanoj sentas tiel intime, kiel la islandaj islandanoj staras sur pli malalta nivelo ol ili mem. Ili kun ĉia sia naiveco, sia malriĉeco, siaj pendaĵo-ĉapoj kaj siaj koltukoj. Kaj la amerikaj islandanoj volas tiel sincere helpi, gvidi kaj instrui kaj ĝui la kontentecon, kiu sekvas tion ricevi realan pruvon pri tio, ke ekzistas estaĵoj, kiuj estas pli signifikaj, pli malprotektitaj kaj pli naivaj ol ili mem. Kaj oni rigardas zorge en ĉiun vizaĝon. Ĉu oni vidos iun malnovan kamaradon aŭ kamaradinon? Ĉu tiu homo aŭ tiu homo aŭ tiu homo, kiu estis atendata, venas en tiu grupo? aŭ ĉu li venos pli poste? aŭ ĉu li ne povis veni, kiam li volis realigi la vojaĝon? Kiel aspektas tiu kaj tiu, pri kiu oni bone scias, ke li venas en tiu ĉi grupo?

Kaj la irejo malvastiĝas iom post iom pro la scivolema fervoro. Kaj la sakoj puŝas al tiuj vivantaj muroj. Sed ĉiufoje kiam ili tuŝas iun robon, tiam viŝas la virino per sia poŝtuko tiun lokon, kiu estis tuzita, kvankam neniu polvo restis tie. Ili forviŝas la

islandecon, kiu algluiĝis al tiuj sakoj.

La enmigra domo pleniĝas de enmigraĵoj kaj rigardantoj. Kaj nun ili kunmiksiĝas unuj al la aliaj. Blankbluaj „mousselin“-roboj kaj flavblankaj „grandin“-roboj frotiĝas al nigraj kaj helbrunaj, lanaj jakoj. Nigraj drapŝtofaj kaj lanŝtofaj jaketoj kaj helecaj, malpuraj noktomeziloj frotiĝas al brilblankaj veŝtoj kaj orkoloraj ĉenoj. La silka, islanda ĉapopendaĵo pendas apud rektranda, blankpluma pajloĉapelo, kaj la branĉoj de ege malpezaj sunombreloj kroĉiĝas al varmigaj, islandaj lankoltukoj.

Sed laŭ la muroj sidas virinoj sur benkoj kun infanoj enbrake. Iuj dormas, aliaj suĉas, sed la plej multaj ploras. Kaj maljuna, alta kuracisto kun granda nazo kaj longa vangobarbo iras laŭ la benkoj kaj tenas kuleron en unu mano kaj grandan glason da medikamento en la alia. Li haltas ĉe ĉiu infano, kiu ploras, kaj diras: „*Sick?*“ Kaj ĉiam la respondo estas: „Jes.“ Kaj tiam li ĉiam verŝas tiun saman medikamenton el tiu sama glaso, unue en la kuleron kaj poste en la infanon. Ĉiu infano perdas tiam la spiron dum tempeto kaj streĉas sin malantaŭen – kaj ploras nun multe pli kortuŝe ol antaŭe.

Kaj supren de la homamaso leviĝas murmurado, kiu kuŝiĝas sur onin peza kaj plena. Ĝi dormigas ĉiun penson, malfortigas la kapablecon rimarki ion apartan kaj distingi ion, faras el oni kretenon ĝis parolsono de iu aparta persono aŭ iu aparta krio ŝoviĝas tra la mumurado, tra la oreloj en ĉiun nervon kaj skuas kaj turmentas onin iom da tempo. Tiam oni reboniĝas denove.

Ĉio moviĝas, kvankam oni nur povas antaŭeniri unu piedlarĝon post longtempa peno. Tie staras iu, kun kiu oni povas nepre kontakti. Nun oni ekpensis pri iu, pri kiu oni nepre devas demandi. Kaj tiam oni tretas sur piedojn de la apudstaranta ulo. Li ekkrias, kaj tiam oni paŝas malantaŭen denove.

Sed tamen la buŝoj moviĝis proporcie plej multe. Iuloke la konatoj ariĝis kaj eldiris rimarkojn. Aliloke homoj salutas reciproke kaj demandas pri novaĵoj. Kaj la rimarkoj kaj la demandoj kaj la sono kaj hujo interplektiĝas en unu tumulto. En la sama momento sonas en la oreloj de oni: Venu vi benata kaj feliĉa – estu vi bonvena – ĉu ŝi ne venas? – neniuj kreskaĵoj ankoraŭ – glacio ekstere – *halloh* – *how do you do* – *you bet* – *Oh my* – *dear me* – ĉu vi portas blankan robon, Gunjo – *good graces* kaj *confounded*.

Olav staris tie en la homamaso premo kaj rigardis ĉirkaŭ si. Al li estis malkviete. Li estis inter espero kaj timo, ĉar li opiniis, ke Helga ekaperis ekstere, sed li ne estis

certa pri tio. La fraŭlino, kiu ŝi alie estis, malaperis sammomente. Kaj li rigardis kaj rigardis. Ĉu ŝi ne estas ĉi tie? Estas neprobable, ŝajnis al li, ke ŝi ne venis por gaje akcepti lin, ĉar tiel multaj homoj estis venintaj en sama intenco. Ŝajnis al li, ke ĉiu homo jam renkontis ĉi tie sian amikon aŭ familianon.

Jes, tie ŝi estas – ja ĉu tio estas certe? Ĉu tiu ne estas alia knabino, kiu mirinde similas al ŝi, sed tamen tute iu alia? Kaj li gapis al ŝi, rigardis tiel firme, ke li pretervole etendis sin en la direkton, kie ŝi staris, kaj tamen li vidis sin bonege, ĉar li estis pli alta ol la plej multaj en la domo, tiel ke nenio malhelpis al li ŝin vidi, kaj krom tio ŝi staris proksime.

Ne, tiu ne estas Helga. – Estis neeble, ke tiu fraŭlino estas Helga. Tiu mirinde bela knabino portante la blankan robon kun la ruĝaj ĵabotoj kaj la blankan ĉapelon kun la ruĝa plumo estis multe pli pala ol Helga. Helga estis ruĝvanga, sed la vanga koloro de tiu fraŭlino estas pli hela. Helga estis bela, sed egale bela kiel tiu fraŭlino Helga verdire apenaŭ estis. Tiu fraŭlino en la blanka robo estas iel tiel, ke estas neeble, ke li tuŝu ŝin. Ion tiaspecan li neniam sentis rilate al Helga.

Aŭ ĉu estas nur la blanka robo kun la ruĝaj ĵabotoj kaj la blanka ĉapelo kun la ruĝa plumo, kiujn li prefere evitus tuŝi ol la jaketo kaj la ĉapo kun la pendaĵo? Sed ili estas senekzemple similaj, Helga kaj tiu knabino. La sama dika korpoformo, la sama mallonga, rekta nazo, la samaj viklecaj, ŝtalgrizaj okuloj. Jes, tiu estas Helga.

Ne, tiu certe ne estas Helga. Tiu fraŭlino ĉiam parolas angle – nur angle. Li trovis verŝajne, ke Helga jam tiel scipovas la lingvon, ke ŝi estas kapabla paroli ĝin tiel flue. Sed, ke ŝi venas ĉi tien en la enmigrantan domon, por renkonti siajn samlandanojn, nove venintaj de Islando kaj parolas nenion alian ol la anglan lingvon – ne, tute ne, tio estas neeble. Bedaŭrinde, tiu ne estas Helga. Ŝi certe ne venis. – Sed senekzemple similas tiu knabino al Helga.

Tiam li aŭdas, ke iu diras flanke de ŝi: „*Say Nellie.*“ Kaj tiam tiu knabino rigardas flanken kaj diras: „*Eh?*“ Tion li estis aŭdinta ŝipanojn diri, kiam oni alparolis ilin kaj ili kionis. Kia stultulo li estas, stari ĉi tie kaj gapi al tiu knabino kaj ekpensi, ke tiu estas Helga. – Tiu kiu evidente estas angla knabino, kiu nomiĝas Nellie.

Sed estas mirinde, kiel tiu fraŭlino similas al Helga, ekzemple kiam ŝi rigardis flanken, tiam ŝi svingis la ŝultrojn iomete samtempe – egale tiel, kiel Helga kutimis fari,

kiam ŝi rigardis flanken.

Ĝis nun la fraŭlino tenis la manojn malsupre ĉe la flankoj, tiel ke Olav ne vidis ilin. Nun ŝi movas la dekstran manon al la lipoj – neĝblanka sunombrelo kun longa franĝo pendas je la mano, kaj ŝi tiras la montran fingron laŭ la lipoj. Tiam Olav ekpensas pri la ringo kun la vitra plateto, en kiun li estis skrapinta sian nomon. Ŝi portis ĝin sur la dekstra mano. Ĉu tiu knabino portas ringon? Sed tion li ne povas vidi, ĉar ŝi portas ganton sur la mano.

Tamen al li baldaŭ sukcesis vidi tion. La maldekstra mano ankaŭ venas supren. Tiam ŝi metas la sunombrelon en la akselon. Poste ŝi ektiras la ganton de la dekstra mano. Olav senspiriĝas. Jes, certe estas ringo sur la mano, sur la sama fingro, sed tiu ne estas la sama *ringo*, tute malsimila ringo kun multaj, grandaj, ardaĵ ŝtonoj. Kie ŝi ricevis tiun ringon? Ha, estas vere, tio ne koncernas al li. Tiu fraŭlino ne estas Helga, kontraŭe ŝi estas angla knabino, kiu nomiĝas Nellie.

Nun iu diras ion mallaŭte al tiu knabino, kiu nomiĝas Nellie, ion strangan, ĉar ŝi ĵetas la kapon supren kaj malantaŭen kaj ridas. Tiun subitmovon li estus ekkoninta, kvankam li ne estus vidinta ĝin dum kvindek jaroj. Ĝi enbruliĝis en lian animon en lia preĝejo hejme en Islando, kaj la signo de ĝi fariĝis neforviŝebla, ĉar ĝi rilatis al la plej dolorplena sento, kiu ekzistas en koro de juna homo – la ĵaluzo. Nun li finfine klare vidas, ke tiu estas Helga. Kaj li tute ne komprenas, kiel li povis dubi pri tio dum unu momento.

Kaj nun li ne povis reteni sin, li ne povis atendi unu sekundon. La amaso estis tiel densa ĉirkaŭ li, ke li ne povis momente veni al ŝi. Sed li kriis pretervole laŭte akute:

„Helga, saluton.“

Ŝi ekskuiĝis, rigardis lin rekte en la vizaĝon kaj ruĝiĝis – la unuan fojojn, kiam li vidis ŝin ruĝiĝi subite. Ŝi staris apud la pordo. Ŝi ne atendis, sed en la momento rapide malaperas tra ĝi.

Li tuj ekpensas, ke ŝi ne volas saluti lin ĉi tie en la domo, kiel li opiniis antaŭe tiutage en la vagono. Kaj tio plaĉis al li. Li ege sopiris ĉirkaŭbraki ŝin, premi ŝin al si kaj kisi ŝin longe, longe. Kaj li hontetus fari tion antaŭ la okuloj de la homamaso.

Tiam li subite forŝovis ilin, kiuj staris antaŭ li kaj kuregis post ŝi trans la pordo. Kiam li venis eksteren, li vidis la blankan ĉapelon kun la ruĝa plumo malaperi trans

angulo de unu el la kabanoj sudoriente de la enmigranta domo. Li ekpensis, ke ŝi mirinde rapidis for de la domo. Li opiniis ke ŝi atendu lin ekster la pordo kaj poste ili povus iri kune en iun flankan lokon. Sed li ne donis al si tempon por konsideri tion detale, sed li rapidkuris al la angulo de la kabano, kie malaperis la blanka ĉapelo. Li supozis, ke ŝi atendu trans tiu angulo. Sed ŝi ankaŭ ne atendis tie. Ŝi iris antaŭen orienten kaj plidire iom rapide. Tamen li baldaŭ atingis ŝin.

„Ĉu vi ne intencas saluti min, Helga,“ li diris, kiam li venis flanken al ŝi.

Unue ŝi rigardis lin, ne al la vizaĝon, sed al la brusto de li. Poste ŝi rigardis subite ĉirkaŭ si. Neniu estis videbla, la strato ne estis trafika. Tiam ŝi turnis sin al li kaj diris:

„Jes, kompreneble. Saluton, Olav. Kiel vi fartas?“

Olav sentis spontane, ke estas afekta kaj embarasa gusto de la voĉo. Tio efikis lin kaj ligis liajn sentojn. Li deziris diri iom el tio, kion li havis enkore, sed li ne povis tion. Li nenion povis diri krom tio: „Ja, sufiĉe bone – mi dankas.“

Poste li iris flanke de ŝi iom da tempo, kaj ili ambaŭ silentis. Ili estis neneigeble malharmoniaj kunirantoj kiel ili paŝis tie sur la ebena. Li, longa, kurbŝultra, kripla kaj lia sintenado estis tre malbona. Li kun lana islanda kaskedo sur la kapo, koltuko glitnode ĉirkaŭita la kolon, lanŝtofa jako kaj la lanŝtofa pantalono, senforma kaj islandaj ledaj ŝuoj sur la piedoj. Ŝi, ne altstatura, iomete dikstruktura, elegante vestita je blankaj somervestoj laŭ plej novaj modgazetoj kun neĝblanka, longfranĝa sunombrelo super la kapo.

Kiam ili jam iris tiel dum iom da tempo, ŝi maltrankviliĝis. Ŝi ekrigardis ĉirkaŭen, ĉar ili proksimiĝis kvartalon de la urbo, kie estas konstanta trafiko. Kiel ŝi povu liberiĝi de li? Ŝi estis en granda embaraso. Ŝi hezitis alparoli lin. Sed ŝi plifortigis sin, ĉar iuj rimedoj estis necesaj.

„Aŭdu, kien vi intencas iri, Olav?“ Li estis duone distrita.

„Mi ne scias,“ li diris. „Kien ni iru?“

Ŝi aŭdis per tio, ke li ne intencis lasi ŝin. Ŝi ne volis esti severa kontraŭ li, ĉar ŝi duone kompatis lin. Sed ŝi timegis, ke iu vidu ilin kune, eble iu angla homo, kiun ŝi konas, kaj ŝi trovis, ke ŝi ne povus elteni tiun honton. Li estas tiel burleska kaj ridinda.

„Estas plej bone, ke vi reiru al la enmigranta domo,“ ŝi diris, „vi povus alie

vojerari.“

Tiam li elreviĝis. „Vi do ne volas tuj forlasi min, la unuan tagon,“ li diris.

„*Good graces*, Olav,“ ŝi diris senpacience. „Ĉu vi kredas, ke mi havas tempon por restaĉi ĉe vi la tutan tagon, mi jam restis tro longe ekstere.“

Tiu akcepto estis tiel tute alimaniere ol li supozis, ke li fariĝis obsedita de teruro, timego.

„Vi do ne, ne, ne intencas perfidi min. Mi ne lasas vin.“ Poste li haltis antaŭ ŝi kaj manprenis ŝian brakon.

Li certe premis la brakon pli forte ol li intencis, ĉar ŝi vekriis.

„Olav, Olav. Ĉu vi freneziĝis, Olav?“ kriegis ŝi.

Li malfortigis la premon, sed ne tamen lasis ŝin. Ŝia unua reago, kiam malpliigis la doloro estis, ke ŝi ĉirkaŭrigardis. Kaj tiam jam okazis tio, kion ŝi plej timis en la mondo. Angla homo, kiun ŝi konas, staras sur la trotuaro aliflanke de la strato kaj mokridetas.

Ŝi fariĝis tiel malĝoja kaj kolera, ke ŝi emis kaj plori kaj bati lin. Ŝi trovis, ke estas nepriskribeble malbona ago de li kaŭzi al ŝi tiun honton, ĉar ŝi tamen vere kompatis lin. Ŝi emis superŝuti lin per multaj, multaj insultaj vortoj, longe, longe, sed ŝi trovis neniujn vortojn en sia menso krom tiuj:

„Mi abomenas vin, via viraĉo. Kaj se vi ne lasas min en ĉi tiu momento, mi vokas la policon por aresti vin.“ Tiam ŝi deŝiris sin de li kaj forkuris.

Tie li staris konsternite, ne malĝoja kaj ne kolera, sed malfortigita. Neniu penso ekzistis en lia menso, ne pli ol en la lumfosto, kiu staras apud li. Li estis tute senpensa kaj sensenta. Li rigardis post si, sen koncepti, kie li estas nek kion li rigardas. Poste ŝi malaperis trans stratangulo. Li sentis malklare, ke io tiam ŝanĝiĝis, sed li ne sciis, kio ŝanĝiĝis – kaj li daŭris rigardi samdirekten. Tiam ekstaris antaŭ liaj okuloj vagono kun ĉevalo antaŭe. Li ekrigardis la vagonon. Poste oni veturigis la vagonon. Tiam li ekrigardis kretostrekon sur ligna vando trans la loko, kie antaŭe staris la vagono. Kaj li rigardis longe la kretostrekon. Ĝi ne forkuris de li.

Sed li laciĝis starante en la samaj spuroj. Li eksentis doloron en la tibikarnoj kaj ĝis la poplitoj. Pro tio li ekmovis sin kaj ĉesis rigardi la kretostrekon. Kaj nun li iom post iom elreviĝis. Li ekmemoras malklare, ke Helga estis ĉe li kaj malbontraktis lin.

Kaj poste li subite eksentas terure klare, kiel estas la stato.

Li ekiris en tiun fremdan urbon sen scii plejete, kien li iras. Kaj nun amasiĝis la pensoj en lia menso, tamen ne tiel rapide, kiel antaŭe en tiu tago. Unue li pripensis, kiel nepriskribeble bela Helga estis antaŭ liaj okuloj tiutage. Tiu ŝia nekonata beleco, kie ŝi staris portante la blankan robon kun la ruĝaj ĵabotoj, kaj portante la blankan ĉapelon kun la ruĝa plumo kaj kun la blanka sunombrelo – tiu beleco tute potencis lin dum iom da tempo. La malĝojo cedis pro la admiro.

Tiam venis la vantaĵo. Tiu fraŭlino, tiel eksterordinare bela kiel ŝi estas, tiel multe pli bela kaj delikata ol iu ajn knabino, kiu edziniĝis kun iu ajn bienlaboristo, kiun li konis – ŝi estonte fariĝu lia edzino. Ŝi ja estis ĉirkaŭbrakinta lin, kisinta lin longtempe, ofte kaj multfoje. Li pugnigis la manojn pro kolero pro tio, ke tio ĉi ne plenumiĝis, ke anstataŭ ĝui tiun pompon kaj plezuregon li estis forpelata kiel hundo.

La monafero ankaŭ plektiĝis en tiun okazaĵon. Ne tiel, ke li efektive bedaŭris la perdon de la mono. Li eĉ ne akceptus ĝin kvankam ĝi estus nun al li proponata. Kontraŭe li trovis, ke li estis stultulo doni ĝin al ŝi. Li ekpensis, ke liaj konatoj moku lin pro tio. Kaj nun li domaĝis tion.

Sed tiuj pensoj estis nur antaŭaĵo de la malĝojo, nepriskribebla vakeca sento, la sento pri tio, ke la tuta plezuro, la tuta espero pri plezuro estis forprenita el lia vivo. La sento pri tio, ke ĉio kion li antaŭe esperis kaj sopiris, ĉio, kion li amis, ĉio pri kio li ŝonĝis maldormanta kaj dormanta – tio efektive ne ekzistas, kaj tio neniam plu ekzistos. Kaj en tion enplektiĝis la konscio, stari tie sola en fremda lando, inter nekontataj fremdaj homoj kun nenio antaŭ si krom la laborego, malriĉeco, senkonsoleco, dezerto de la vivo. Kaj nun ariĝis en lia menso rememoro pri amaso da ĉarmaj esperoj – kiuj nun mortis – kiel ankaŭ ĉiuj esperoj mortas – kaj same de pompaj aerkasteloj, kiujn la hodiaŭa tago pritraktis kiel la vivo pritraktas ĉiujn aerkastelojn – tiujn la hodiaŭa tago faligis kaj forblovis en la profundaĵon de la senekzistado.

Li rememoris kiel li intencis porti ŝin surmane tra la vivo, kiel bonega li intencis esti al ŝi. Nenion ŝi laboru krom tio, kion ŝi mem emis fari, kaj neniam li imagis al si, ke tio fariĝu multe. Kaj kiam ili fariĝu riĉaj, li intencis donaci al ŝi oraĵojn, ĉenojn, orependaĵojn kaj ringojn, ĉar li sciis, ke ĉion tian ŝi tre emis posedi. Sed precipe li desegnis en sia menso la domon, en kiu ili loĝu, kiam ili fariĝis pli aĝaj kaj riĉegaj. Ĝi

estu pli bela ol iu ajn domo de islanda komercisto kaj plena de belaj bildoj. En tiu domo ŝi sidu ĉarme vestita de mateno ĝis vespero. Kaj kiam li venu de la laboro vespere – ĉar li mem neniam intencis ĉesi labori – tiam laŭ lia plano, ŝi staru en la pordo kaj kisu lin kaj poste enkonduku lin al granda tablo staplita per frandaĵo.

Kaj pro tiu metito kaptis lin angora timego. Kiu scias, ĉu ne la esperoj plenumiĝos – nur, ke iu alia ol li venos hejmen al la bela domo, iu alia ol li kisos Helgan kaj iu alia ol li eksidos ĉe la frandaĵa tablo. Kaj li ekpensis pri la nova ringo, kiun li vidis sur ŝia mano hodiaŭ. Jes estis ja kompreneble, ke Helga ne estos senedza dum la tuta vivo. Ekzistas pli multaj junuloj ol li – kaj nun ŝi ne amas lin pli ol aliajn virojn – amas lin ne pli. Ŝi mem diris, ke ŝi *abomenas* lin, kaj ŝi minacis igi la policon aresti lin.

Kaj li trovis, ke li estas tiel malgranda kaj la malĝojo tiel granda, tiel terure grandega – simila al senmezura granda monto, kiun iu monstra spirito rulas super lin por tie sube kontuzi lin, senkulpa. Li ne povis klarigi al si, kiu estas tiu spirito, ĉar lia pensoforto konsiderinde malfortiĝis. Sed li iel flaris iun nepriskribeblan severecon kaj maljustecon, per kiu oni traktis lin, senkulpa kaj sendanĝera.

Li trovis, ke fariĝis pli malmola sub la piedoj ol antaŭe. Li tretis sur herbo anstataŭ lignotabuloj. Sen scii tion, li estis trairinta la urbon kaj iom okcidenten sur la ebenon.

Li haltis kaj ĉirkaŭrigardis. La ebena ĉirkaŭis lin, verda proksime kaj brile flava malproksime, senfina norde kaj okcidente. Sude ĉe la horizonto estas arbara zono. Supre de ĝi kumulusoj similaj al nekalkuleblaj montopintoj, kiuj estas helaj nordokcidente, malhelaj oriente. Kaj la kumulusoj proksimiĝis, kunligiĝis kaj disiĝis denove tiel senbrue kaj pace. La ĉielo norde estis serena, escepte ke longega nublango etendas sin orienten kiel ĝi intencas leki la nebuleton super la urbo. Sed sube de la suno okcidente estis maldensaj, ruĝecaj nuboj, inter kiuj estis bluverdaj strioj kaj makuloj. Neniu brilaj koloroj estis sur la ĉielo, sed ĉio estas pala kiel la ĝojo en homa koro, kiam forta malĝojo, pri kiu la homo jam kontentiĝas, malantaŭas kaj paligas ĝin.

Sur la ebena neniu voĉo, neniu sono krom paciga sonorizado kiu atingis liajn orelojn el la urbo, ĉar sonorila tono atingas pli longen ol iu ajn alia bruo de urbo.

La paco de la ebena potencis lin. La pasioj disiĝis kaj kunligiĝis kiel la kumulusoj sur la suda ĉielo. Kaj pro tio ili perdas la pikilojn kaj pikas ne plu.



Sed anstataŭe li trovis, ke lia brusto ŝvelis, streĉiĝis kiel ĝi estas krevonta.

Kaj tiam li faligis sin sur la ebenon kaj ploris, ploris kiel infano, unue per fortaj puŝoj kaj laŭtaj plorsingultoj kaj poste modere, mallaŭte kaj malpeze. Tio ne estis virece, sed ne estis necese honti. Neniu aŭdis tion escepte la ebeno. – La ebeno, kiu ekde nun estu lia fianĉino, kaj ĝi estas pli bona ol la plej multaj fianĉinoj. Ĝi riĉigas homojn, sed multaj fianĉinoj malriĉigas ilin. Ĝi neniam turnas al oni la dorson, ĉar ĝi estas ĉiam juna kaj ĉiam sana. Kaj ĝi neniam mortas for de la homoj, sed kontraŭe ĝi ĉirkaŭbrakas ilin, kiam ili mem estas mortintaj, kaj ili estos ĉirkaŭbrakitaj de ĝi eterne.

La ebeno senmezurebla, senfina, kiu estas plena je paco kaj memorigas pri la eterna ripozo.

*(Stefán Sigurðsson.)*

## **Porgils gjallandi:**

### **Hejmosopiro**

La ĉevalgrupo disiĝis sur la bele verda paŝtejo sude de la kampo en la bieno Deklivo. La sudventeto movetis la graciajn herboflorojn, kaj la arbustaj folioj tremetis. La ruĝa mateniĝo verŝis siajn radiojn, ora kaj milde ridetanta ĝi krucosignis la valon kaj donis sian benon al la vivo.

La ĉevaloj estis tridek, malsataj kaj maldikaj post la longa vojaĝo; ili avide manĝis la herbon kaj iris tien-reen sur la paŝtejo, ruliĝis dorse kaj sin skuis, kaj poste denove ekkaptis la herbon same ardaj. Du iom kreskintaj knaboj gardis la ĉevalojn; ili vekigis du horojn antaŭ ordinara ellitiĝo-horo por gardi la ĉevalojn por la vojaĝantoj.

Nun estis la Skagafjordanoj finfine venintaj, kaj je tio la knaboj estis antaŭĝojintaj la tutan printempon; ili bone sukcesis vekigi por tiu ĉi laboro, kaj ili estis ĝojaj, kiam ili kuris ĉirkaŭ la ĉevaloj. Ili gardeme atentis ilin ĉiujn kaj intermite ekrajdis.

Sed kelkaj el la ĉevaloj estis nedresitaj kaj kelkaj tre dekuremaj; ili estis plej emaj iri tien kaj reen, kaj estis plej malfacile ilin peli, – kaj pro tio la knaboj ne povis venĝi al ili, ĉar estis neeble ilin bridati.

Tamen unu el la ĉevaloj estis plej moviĝema kaj malkvieta; estis videble forkuremo en ĝi. Ĝi ĉiam volis iri okcidenten al la rivero, kiu brue fluadis, rapida kaj glacieje griza, norden laŭ la valo; ĝi ne aspektis tiel, ke transiro estus facila, sed tamen ŝajnis al la knaboj, ke la palruĝa ĉevalino kun la helaj kolharoj kaj la blanka makulo aŭ „stelo“ en la frunto ne hezitus je transiro, se ĝi havus ŝancon tion fari.

„Ĝi tamen estas plej bela el la geĉevaloj. Ĝin mi plej ŝatus posedi, kvankam ĝi estas malbonkondata,“ diris la pli aĝa knabo.

„Tiel ankaŭ ŝajnas al mi,“ diris la pli juna knabo, „ĉu estas tiu, kiun paĉjo ricevos?“

„Mi ja deziras, ke tio estu . . . Cetere estus ĝojiga mem posedi monon por ĝin aĉeti. Ĝi estas bona, tion mi kuraĝas garanti: vidu kiel ĝi flugas antaŭe.“

„Jes, ĝi estas bona. Paĉjo ĝin aĉetos, io alia estas neebla,“ kaj poste ili ambaŭ rigardis Stelon (tiel nomiĝis la ĉevalino), kie ĝi kuris, alte tenante la kapon, kun moviĝantaj kolharoj, antaŭ la nedresituloj supren laŭ la krutetaĵo al la ĉevaloj, kiuj trankvile manĝadis herbon en la terbula kampo kaj la kavo supre.

Je tagmezo la ĉevalpaŝtistoj jam ellitiĝis, kaj post manĝado ili kaj ĉiuj viroj de la farmejo iris al la ĉevaloj. Tio ĉi estis la libertago de la servistoj en la farmejo Deklivo, kaj longe ili ĝin sopiris.

„Kiun el la geĉevaloj vi intencas vendi al mi, mia Ĥorkell?“ diris la farmisto kaj gardeme atentis la grupon.

„Vi elektu . . . , sed mi ekpensis proponi al vi tiun stelohavan ĉevalinon; por tio mi ĝin aĉetis.“

„Nedresita, ĉu ne?“

„Preskaŭ tia, – kutimiĝinta al brido. Mi du- aŭ trifoje surdorsiĝis sur ĝin etajn partojn de tiu ĉi vojaĝo. Ĝi ne perfidos, sed bonan furaĝon ĝi devos ricevi.“

„Gracia ĝi ja estas. Verŝajne maldikiĝis dum la printempo.“

„Ĝi estis idohava. Ĝi naskis ĉevalinon je la komenco de la somero; tiu estis kutimigata mamnutriĝi de alia ĉevalino, kiam mi fine ricevis aĉete la ĉevalinon. Neniu ĉevalo de tiu gento perfidas.“

„Kaj la prezo?“

„Ĝi kostas 28 speciojn.\* Vi ricevos ĝin por la sama prezo, por kiu mi ĝin aĉetis.“

[\* Specio estas malnova monunujo. – La trad.]

„Multekosta ĝi al mi ŝajnas. 25 pli ol sufiĉas por nedresita sesjara ĉevalino, antaŭ nelonge nutrita ĉevalidon. Aŭ ĉu vi ne diris tion?“

„Jes, certe ĝi estas multekosta. Oni jam proponis al mi 30, sed vi ricevos ĝin por 28, kiel mi jam diris. Cetere permesiĝas al vi elekti el la grupo.“

Poste ili prenis Stelon, kaj la farmisto ĝin selis; poste ili ambaŭ rajdis suden laŭ la kampo. Post la rajdo la farmisto aĉetis la stelohavan ĉevalinon por 28 specioj, kaj tiam la knaboj tre ĝojis.

„Sed mi supozas, ke ĝi estas forkurema, gardu ĝin bone, dum ĝi estas kutimiĝanta al la geĉevaloj kaj la paŝtejoj,“ diris Porkell kaj karesis la kolon de Stelo. „Mi deziras, ke ĝi estu utila al vi, kiel la maljuna ĉevalo Skagi, la bonon mi garantias.“

„La rivero malfaciligos al ĝi la forkuron, mi supozas, kaj krome ĝi estos iom gardata.“

Iom poste la Skagafjordanoj sin preparis al foriro. Ili foriris de Deklivo iom antaŭ vespermezo.

La hejmaj ĉevaloj kaj Stelo estis gardataj en stalo, dum la vojaĝantoj estis malaperantaj. Kiam oni venis al la stalo, aŭdiĝis blekado de la ĉevaloj, kaj la tumulto muĝis. Tie estis ĉio en malordo. Stelo luktis kun la maljuna ĉevalino Kinna, tiel ke aŭdiĝis muĝa krakado de la hufferoj kaj la ŝtonaj muroj. Plej multaj el la ĉevaloj ĝenis Stelon, sed ĝi neniam hezitis, sed luktis kaj lerte kaj malmolnake.

La proksiman semajnon la antaŭaj piedoj estis kunligitaj al ĉiu el la geĉevaloj, sed la ligilo dolorigis al Stelo la piedojn. Ĝi ne sciis salteti kiel la aliaj, kiuj jam kutimiĝis al piedligilo.

En la dimanĉo matene la geĉevaloj estis pelataj hejmen kaj metataj en enfermejon; tiam oni sin preparis al meso. La farmisto selis Stelon, – nun estis ŝanco provi ĝian bonon.

Tiam ne estis tempo de abstino, kaj la valanoj stimulis la animon per diservo kaj la korpon per vino. Deklivanoj venis ebriaj kaj ebrietaj hejmen kaj apenaŭ atingis tien antaŭ enlitiĝhoru; estis varme al iliaj ĉevaloj; la pasinta tago lasis al ili neniun ripozon kaj malmultan ĝojon, nek en la ĉevala enfermejo nek ĉe la ligoŝtonoj.

Stelo ne malvigliĝis ĉe la rapida rajdado. En la mateno ĝi kuris plej rapide el ĉiuj

la ĉevaloj, sed pli malfrue en la tago la ĉevalo Snæringur ĝin antaŭis en ĉiu kuro, kaj tio ne estis stranga, ĉar ĝi estis en la plej bona aĝo, elefante forta kaj matura ĉevalo. Tio tamen ne plaĉis al la farmisto, ĉar Stelo ja komencis tiel bone.

„Ĝi ne forkuros en tiu ĉi nokto, kvankam ĝi estos neligita; tiel malsata kaj laca, ĝi certe ĝojos pro la ripozo. Nun ĝi ankaŭ iom al kutimiĝis al la aliaj geĉevaloj,“ diris la farmisto, prenante de la ĉevalino la bridon kaj karesante ĝian makzelon. Ĉiuj la ĉevaloj estis lasataj neligitaj.

La domanoj de Deklivo dormis trankvile kaj peze dum tiu ĉi nokto; ili pli malfrue ellitiĝis en la lunda mateno ol ili kutimis. Tiam Stelo estis malaperinta, kaj de tiam neniu plu iom sciiĝis pri ĝi. Grandaj serĉoj estis vanaj, kaj la farmisto restis ĝin bedaŭranta, kaj la knaboj kun malsekaj okuloj.

---

Kiam la ĉevaloj jam ruliĝis dorse kaj manĝadis dum tempeto, Stelo iris sola el la grupo kaj trotis malsupren al la rivero. La rivero negrave baris ĝian iradon, kvankam ĝi estis rapidflua kaj malvarma, kaj estis faŭka profundaĵo inter la bordoj. Krutdeklivo malmulte malrapidigis al ĝi la iradon, kvankam multaj peziraj ĉevaloj tie malrapidigis, ŝvitis kaj glitis. La hejmosopiro portis Stelon rapide antaŭen, kvazaŭ donis al ĝi flugilojn. Ĝi celis en direkton grave pli sudan ol la pasejo. Direkten al la ĉevalgrupo hejme kaj la ĝojo en la somerpaŝteja libero, . . . kaj la bela ĉevalido malaperinta . . . Laŭta heno ekaŭdiĝis, nur unu – kaj la ĉevalino iradis silente okcidenten, sur ŝtonoj kaj altetaĵoj kaj malsekaj marĉoj.

Argilmakula kaj malpura ĝi kuris okcidenten sur la sablejojn, trans senherbajn vakejojn kaj dezertojn. La vasta glaciejo brilis en la sunbrilo. La rivero Kreppa fluegis norden, griza kiel kloakaĵo; transiro ne ŝajnis facila. En la verdherbejeto sur la orienta flanko de la rivero estis palruĝa ĉevalino, kiu manĝis herbon; – poste ĝi iris malsupren al la rivero, trempis la supran lipon en la akvon kaj nazbruis trifoje, poste ĝi deturnis sin de la rivero. Stelo pli timis la ŝaŭmoblankan fluegon nun ol kiam ĝi en la komenco transiris Glaciejriveron,\* la malsekaj marĉoj, sablejoj kaj senherbaj dezertoj kaj la malsato malpliigis la kuraĝon; la ĉevalino timis tiun ĉi riveron. [\*Tiel nomiĝas la rivero, trans kiun la ĉevalino jam iris. Ĝi devenas de glaciejo kaj ricevas sian nomon laŭ tio. Glaciejaj riveroj estas ĉiam tre malvarmaj. – La trad.]

Iom pli norde la rivero estis pli larĝa, kaj tie ĝi estis malpli rapidflua; sablokirlejoj estis ambaŭflanke. Tie Stelo sin turnis dum tempeto kaj flaris la akvon, poste ĝi saltis en la akvon; la kirliĝanta sablofundo ĝin akceptis; nun ĝi devis streĉi sian energion kaj lertecon, tie ĉi ĝi batalis por la vivo, kaj la peno estis malfacila. Ĝi ne povis sin turni, sed antaŭen ĝi movetiĝis, kvankam malrapide. La timo pliigis la forton; unu fajra atako, kaj la sablokirliĝo defundiĝis. Stelo venis siblanta de la subakvo, eknaĝis kaj sin movis okcidenten laŭ la rivero. La kapo, kolharoj kaj ŝultra hartufo antaŭeniĝis sur la surfaco, sed la dorso estis iomete sube. Stelo streĉis alte la kapon, kunpremis la dentojn, la naztruoj ŝvelis, kaj la spirega muĝo – kiel la spirado postulis –, rapida kaj malmola, superis la fluoplaŭdon. La naĝado prosperis bone, kaj tiu ĉevala kapo, kiu pasis okcidenten laŭ la rivero, kun akra mieno kaj brilantaj okuloj, estis bela.

Estis malpli da sablokirliĝo ĉe la okcidenta bordo; tamen tie okazis malfacilaj atakoj kaj angora peno, antaŭ ol la ĉevalino pasis sur la bordon. Stelo kuris iomete al sudokcidento; ĝi longe ruliĝis dorse en la sablo, ekstaris, kaj sin skuas. Poste ĝi reekiris antaŭen.

Iom poste ĝi venis al la lafo. Akra, kaverneta kaj hirta brulolafo. Ĝi serĉis lokon, kie transiro estus plej facila. Tie estis plej malalte kaj plej mallarĝe; okcidente de lafo flagris riveretoj, kaj tie ekvidiĝis la verda paŝtejo. Stelo ekiris en la lafon, paŝis malpeze, atenteme kaj flarante trans la ŝtonejon, kiu tiel suspektinde ofte frakasiĝis sub la piedoj. Ĝi tremis pro timo, kaj la koro batis rapide. Plej malbona estis la lasta parto de la pasejo, la ŝtonoj plej grandaj, plej malfirmaj kaj kavaj, – sed restis nur eta distanco, poste gruzokampoj kaj poste odoranta herbo.

La ĉevalino ekkaŭris kaj ekiris sur la ŝtonejon – nun la pasejo oblikvis malsupren; Stelo eksaltis, kaj samtempe frakasiĝis ŝtono sub la dekstra antaŭpiedo; – unu subita atako, kaj poste ĝi estos sekura. Tiam krevis la ŝtonaĵo sub la maldekstra postpiedo, kaj la piedo fiksiĝis en kaverneto. Tie la ĉevalino plate falis kaj baraktis en la pinta ŝtonejo. Sovaĝa furiozo de morte timanta, sentema besto; la sango fluis el ambaŭ vangoj, la vundoj plimultiĝis kaj pligrandiĝis. Estis pli malalte sub la antaŭa parto de la korpo ol sub la malantaŭa parto; la tuta pezo kuŝis sur la fiksiĝinta piedo. Atakoj kaj barakto kun etaj ripozoj intermite. – Mortangoro, kaj la turmento-ŝvito gutis de la ĉevalino en la suna varmego. La okuloj volbiĝis en la kapo, la spiregado kaj la kraka

susuro en la ŝtonejo interrompis la dezertan trankvilon.

Je unu el la atakoj ekkrakis. Stelo estis libera; la ŝtonoj jam forrompiĝis de la piedo. Nun restis por la ĉevalino peni ekstari.

Unu miraklo en vakejoj kaj dezerta silento: Stelo estis vivanta kaj kun nerompitaj ostoj. Tie ĝi staris en la gruzokampo okcidente de la lafo, sanga kaj tremanta, sur tri piedoj; sur la maldekstra postpiedo ĝi ne povis stari; la piedo estis ŝirita de la hufhartufo ĝis la kalkano; ĝi estis senforta. Longa tempo pasis, plena de timo de solulo. Poste la ĉevalino ekpasis okcidenten al la paŝtejo.

— — —

Ne mankas paŝtejoj en Hvannalindir, kiam la printempo estas bonvetera kaj la somero ridas antaŭe; sed la malbonveteroj, kiuj blovas de la glaciejo, estas furiozaj; ŝtormoj kun pluvego, neĝofalego kun frostiga vento kaj mortblovo.

Ĉi tiun fojon la printempo venis frue kaj estis brile bonvetera. La somero estis pli malbona, precipe ĝia malfrua parto. La kompatinda palruĝa ĉevalino, la solulino en Hvannalindir, estis maldika en la aŭtuno.

Ankoraŭ ĝi estis lamega sur la maldekstra postpiedo; aliaj vundoj kaj lezoj estis saniĝintaj. Nun ĝiaj okuloj estis malĝojaspektaj; la viglo, libersopiro kaj penego estis malaperintaj. Sole la hejmosopiro, forta kaj angora, estis nemalplia kaj ĉiam maldormanta.

La klaraj okuloj, akraj kaj puraj, estis nun trankvilaj, song- kaj lacaspektaj. Simile al tiuj homaj okuloj, kiujn turmentas grandaj malfacilaĵoj kaj pezaj larmoj.

La ĉevalino estis grave kadukaspekta en la aŭtuno. Sur tri piedoj ĝi ne povis iri laŭ la malfacila pasejo hejmen, kiel ajn dolore estis toleri la solvivon kaj elpelitecon. La komenco de la aŭtuno alportis al ĝi neĝblovon kaj frostegon, tiam frostiĝis la fontoj, kaj la plej bonaj paŝtejoj laŭlonge de la riveretoj kovriĝis per glacio. Poste la vintro pli malfaciligis la vivon al la ĉevalino per neĝo- kaj glacikovroj: unue manko de nutraĵo, poste la malsato kaj fine la tranĉanta malsatego.

En la dek-tria tago de kristnasko\* Stelo estis sur iu gruzaltaĵeto; ĝi estis ĉirkaŭata per akvo, kiu superfluis kaj nun frostiĝis en la malvarmo. Estis orienta ŝtormblovo. La ĉevalino sin deturnis de la ventego kaj tremis kiel arbedo. Krepuskiĝis, kaj la luno naĝis en nuboj. Estis malĝoje kaj fantome sur la interriveraĵo tiun nokton.

[\*Tiel oni nomas en Islando la festotagon de la Tri Reĝoj. – La trad.]

Mortstagnanta naturo kaj seninterrompa silento. La riveroj muĝis peze kaj kaduke; unu en oriento, la alia en okcidento. Kaj tiel staris Stelo, tremanta kaj kaŭranta, ĝis noktomezo; tiam ĝi levis la kapon: rigardis firme kaj longe al okcidento, ekvidis la belverdajn paŝtejojn, siajn junaĝajn restadejojn kaj la ĉevalgrupon; unue en nebulo kaj malproksime, poste ĉiam pli proksime. La ĉevalino sentis delikatan kreskaĵodoron. Fine – finfine ĝi estis venanta hejmen.

Milda, trankvila ĝojo brilis el la okuloj; poste ili iĝis akraj kaj trembrilantaj, simile al antaŭe, kiam la mondo ridis al Stelo.

Bela estis hejme.

Nun la vidaĵo pasis antaŭen laŭ la glacikovraĵo, super la ĉevalino kaj sur la altaĵeton. La helkolhara ĉevalido plej antaŭe. Stelo ekmoviĝis, ĝi intencis kuri kontraŭe, sed ĉe la moviĝo ĝi falis.

Fajfanta ŝtormblovo superkuris.

---

Malproksime de homloĝejoj, sur senherba ŝtonaltaĵeto, kuŝas la ostoj de Stelo. Blankaj kaj veterfrapitaj. Hajloj kaj neĝoblovoj, sunbrilo kaj pluvoj ilin transiras tagon post tago kaj jaron post jaro.

Pasas al mia koro la penso pri ĝi, kiu obeis al la voĉo de sia sento kaj la plej forta sopiro de la koro; deflankiĝis de la vojo kaj iris malfacilajn pasejojn.

Kiu tial turmentiĝis kaj toleris; sola, malaperinta kaj forgesita. En vakejo kaj dezerto.

*(Ólafur S. Magnússon, Voĉo de Islando I, 2, 1949.)*

## **Guðmundur Friðjónsson:**

### **La malnova fojnostako**

Malfrue en la vivotagoj de reĝo Kristiano la IX loĝis bienisto nomata Brando en la bieno Holo en la komunumo Tungo. Li estis iom riĉa kaj maljunega, kiam okazis ĉi tiu rakonto – maljuna laŭ aĝo kaj maljuna laŭ kutimo. Liaj najbaroj opiniis, ke li

posedas monon kaŝe servita, sed neniu sciis la veron pri tiu afero, ĉar Brando estis sindetena kaj nealirebla, kaj li permesis al neniu spioni pri sia domo aŭ posedaĵo. Kontraŭe ĉiuj de la enloĝantoj en la komunumo sciis, ke Brando havis abundon da fojnorestaĵoj. Tion vidis la preterirantoj.

Brando havis kutime restaĵojn en ĉiu fojnejo ĉiuprintempe. Kaj krom tio li posedis grandegan fojnostakon sur altaĵeto antaŭ la korto. Ĝi jam staris tie dum multaj jaroj kaj estis bone protektata. Brando iom post iom renovigis la stakon, tiel ke li konsumis de unu fino, kiam la fojno malnoviĝis kaj plenigis la malplenaĵon venontsomere.

Brando estis servema al siaj gastoj, kiuj vizitis lin pro necesaj aferoj, kaj li neniam postulis pagon pro helpo aŭ gastigo. Sed malmultaj vizitis lin, apenaŭ aliaj ol malnovaj konatoj de li, kiuj interrilatis kun li pri monaj aferoj. Brando pruntedonis monon al kelkaj homoj kontraŭ kvitanco kaj rentumo. Sed li konfidis sian monon al malmultaj, kaj li do neniam malprofitis oeron kaj des malpli pli multe. Al tiuj siaj klientoj li donis pokalon da brando regale. La biendomoj estis kadukaj, kaj tiel same aĉaj estis la mebloj. Neniu seĝo troviĝis en la domo, kaj en la loĝoĉambro estis terplanko, kaj ne panelumita ĝi estis escepte, ke tabuloj estis najlitaj al la vandoj de la litrando supren al la subtegmentaj traboj. En la loĝoĉambro estis horloĝo, sed neniu alia artaĵo estis videbla. Sed konatoj sciis, ke eltranĉita kesto iom granda estis sub la litkapfino de la maljunulo, kaj sur ĝi estis eltranĉita „Anno 1670“. Ĝi estis ŝlosita kaj peza. Sed neniam homo ne parenca vidis suben la kovrilon.

Laŭ onidiro Brando estis nehelpema kaj nealirebla. Tamen li vendis manĝaĵon el sia domo, se mono estis proponata kaj plie fojnon dum sufiĉis restaĵoj en fojnejoj. Li ankaŭ donis fojnon, kiam severa klimato printempa mildiĝis, kontraŭ promesataj ŝafoj rekompence, precipe kastritoj.

Sed la malnovan fojnostakon li neniam tuŝis, por helpi siajn najbarojn.

La maljuna Brando tiel paŝis laŭ la viva vojo, ĝis li fariĝis blinda, sed alie sana kaj li tenis kaj sian prudenton kaj sian karakteron nereduktitaj.

Li kutimis iri al la fojnostako ĉiutage dum li havis plenan vidpovon kaj paŝi ĉirkaŭ ĝi, rigardi ĝin supre kaj malsupre kaj premi ĝin per la manoj. Tion li ĉiam faris, se la vetero permesis al li iri el la domo. Kaj li tenis sin je tiu kutimo post kiam la



vidpovo neniĝis. Tiam li ankoraŭ iris ĉiutage eksteren sur la altaĵeton al la fojnostako, stumble paŝis ĉirkaŭ ĝi kaj tuŝis ĝin ĉiuflanke, kvazaŭ li volis konvinki sin mem pri tio, ke ĝi ankoraŭ staras tie rokfirmo kaj senmovite. Li etendis la manojn supren sur la finojn kaj kalkulis la terstriojn duonlaŭte.

Brando havis malmultajn geservistojn kaj profitis malnova bonhaveco. La bieno bone taŭgis, por ke la ŝafoj povu paŝti dumvintre, kaj estis facile havigi al si fojnon proksime al la biendomoj. Li neniam faris ion por plikulturi la bienon, la maljunulo. Sed li prenis dungitojn dum la meza parto de la somero kaj pagis per butero, sebo kaj ŝafaj ventrokarnoj. Li ne emis pagi multe, sed li pagis precize tion, kion li estis promesinta.

Brando havis unu filinon, kaj kiam okazis ĉi tiu rakonto ŝi jam edziniĝis al bienisto nomata Johano, kiu loĝis en la sama komunumo. Lia edzino, filino de Brando nomiĝis Gudrun. Li estis la ĉefa komitatano de la komunumo. Post kiam Brando edzinigis sian filinon, li loĝis kun mastrino kaj junulo, kiun li plejparte edukis, kaj oni diris, ke li estas filo de Brando. Sed tio ne koncernas ĉi tiun rakonton.

Iam, kiam Brando jam maljuniĝis, venis severa vintro, malvarmega kaj neĝoplana kun difektigaj malsekiĝoj kaj tro mallongaj degeloj, kio kaŭzis glaciĝon de la neĝamasoj, kaj neniam finiĝis veterŝanĝiĝo ĝis somerkomenco. Tiam la fojnoprovizo de la bienistoj forte malgrandiĝis, tiel ke ĉiu ajn bienulo en la komunumo estis egala al alia, ĉiuj senhelpaj, sed ne eble estis paŝti la ŝafojn, ĉar glacikrusto kovris la tutan paŝtejon. Tiam oni okazigis komunan kunvenon por trovi rimedojn pro la embarajoj. Kaj la ĉefa komitatano, Johano, iniciatis la kunvenon.

Kiam la bienistoj estis kunparolintaj, evidentiĝis, ke la brutaro estas mortonta „escepte, ke dio donu favoran veteron en la plej proksimaj tagoj,“ aŭ maljuna Brando disponigu la malnovan fojnostakon. Tio helpus, se oni dividu ĝin juste inter tiuj, kiuj estis plej mizeraj.

Oni antaŭtaksis la kvanton de la fojnostako, kaj laŭ la plano oni povus teni la brutaron de la bienistoj vivanta dum duonmonato, eĉ kvankam oni devus daŭre nutri ĝin endome.

Nun estis tasko de Johano petiri al la maljunulo, ĉar li estis ĉefkomitatano kaj bofilo de Brando.

Johano rajdis hejmen de la kunveno, kaj la vojo kondukis tra la bienkorto de

Brando. La vetero estis malvarma, sed kvieta, kaj vespersuna brilo lumigis la teron kovritan de glacikrusto. La glacio reĵetis varmetajn radiojn same ke ĝi ne volas vidi la sunon. Sed kie gruzo kaj ŝtonoj rigardis tra la neĝo, la glacitavolo disiĝis de la tero, ĉar tie degelis tagmeze, sed tamen nur en la suda direkto. Fontoj kaj akvofaloj silentis sub la kovrilo kaj dormis. Malvarmeca silento regis super la valo. Neniu birdo estis videbla, nenie movis sin neĝemberizo, nur du korvoj flugis inter la bienoj kaj eligis el siaj bekoj malsatecan blekon.

Kiam Johano venis al Holo, okazis tiel, ke la maljuna Brando staras ekstere ĉe la fojnostako, kaj nun li tuŝas ĝin zorgeme kaj kalkulas la terstriojn, tiel ke Johano bone aŭdis: „Unu, du, tri.“

Johano deĉevaliĝis, iris al Brando kaj salutis lin per kiso.

„Feliĉo al vi, dio benu vin. Kiu nun salutas?“

„Estas Johano en Bordo. Oni sendas saluton al vi.“

„Ho, jes. Ĉu mia Gudrun fartas bone?“

„Jes, tiel estis, kiam mi rajdis de hejme hodiaŭ matene. Nun mi venas de tiu dilema kunveno, kiun oni okazigis kaj vi certe jam priaŭdis.“

„Jes, jes, mi aŭdis pri tio – mi kredas tion, mi opinias tion, ke oni preparolas la fojnomankon kaj severecon de la vintro. Tiel estas. Ĉu vi povas rakonti iujn novaĵojn?“

„Ho, ne, ne iujn, kiujn oni povas nomi tiel,“ diris Johano, „escepte tiuj ĝeneralaj embarajoj kaj fojnomanko. Ĉiuj estas senhavaj aŭ preskaŭ tiel, neniu povas helpi, sed kelkaj havas fojnproksimume por si mem ĝis la komenco de majo.“

„Jes, tiel estas,“ respondis Brando. „Estas domaĝe aŭdi, certe domaĝe.“ Kaj Brando elspiris tiel, kiel li sufokiĝas pro amara fumo kaj malbona aero.

Nun ili ambaŭ silentis iom da tempo, tiel kiel ambaŭ timu ion aŭ alian, kiu kuŝas en la aero. Brando tuŝis per unu mano la fojnostakon, sed li tenis la alian manon en sia poŝo aŭ sub la antaŭkovrila parto de sia pantalone. Li ĉiam portis tiajn pantalonojn kaj neniam havis alispecajn vestojn ol estis kutime malnovtempe. Johano tenis la ĉevalon je la bridrimenoj kaj rigarde mezuris la fojnostakon. Poste li rigardis al Brando kaj diris:

„Estas kaŭzo de mia alveno ĉi tien, mia Brando, ke oni komisiis al mi provi vian helpemom rilate al la fojno – tiu malnova, granda stako, kiu staras ĉi tie, kaj peti pri ĝi por la komunumo, kompreneble kontraŭ pago. La komunuma komitato garantios al vi la

pagon. Ni priparolis tion ĉion.“ Kiam Johano eksilentis, Brando puŝelspiris, tiel kiel io tuŝas lian koron malagrabla, malmole kaj dolore. Li silentis mallongan tempon, sed poste diris:

„Nun ĉesu, nun ĉesu, homo. Kio estas, kion mi ŝajne aŭdis, por la komunumo? – por la tuta komunumo? Ĉu vi kredas, ke tiu malgrandaĵo estas por tuta komunumo? Ĉu vi kredas, ke tiu staketo sufiĉas por tuta komunumo? Mi kredas ke ne.“

„Ni taksis ĉion,“ respondis Johano, „ni faris planon pri tio, ke la fojnostako sufiĉos por la brutoj de la komunumo dum duona monato, se oni donos grenon kune, kaj la fojno estos dividata ekzakte inter tiuj, kiuj estas en plej malbona stato. Povas esti, ke ĝi sufiĉos dum tri semajnoj, se ĝi pezas multe, aŭ pli multe ol mi supozis. Ni esperas, ke tiam pliboniĝos la vetero, kiam tiom pasis la printempo.“

Tiam diris Brando:

„Vi jam taksis tion ĉion. Vi jam dividis la havaĵon ĉi tie, dividis ĝin ĝis lasta funto inter la bienistoj ĉi tie en la komunumo, vi fakte pesis ĝin tute hodiaŭ, tiel kiel ĝi estas. Kial do priparoli la aferon kun mi – kio alia ol preni la tuton kaj lasi ĝin en aeron kaj venton? Kio alia?“ Kaj tremis la voĉo de la maljunulo.

„Tio, kion oni devas fari unue,“ respondis Johano, „estas ekhavi vian permeson. Ni intencis – ni ne intencis – ni ne intencis agi alie ol peti vin pri la fojno. Ni ne intencis kaŭzi al vi ĉagrenon sed honoron. Estas honoro por vi savi la tutan komunumon el la danĝero.“

„Tio ĉio do estas farata kiel honoro por mi,“ diris Brando kaj ekridegis. „Vi evidente kredas, ke mi estas mense kadukiĝinta. Ne, maljuna Brando ankoraŭ iomete vidas malsupren preter sia nazo.“

Nun Johano fariĝis kolereta, kiam Brando malvarme priridis la embarĵon. La tiama stato de la komunumo ŝajnis al li ne ridinda.

Tiam li diris per kolereca voĉo, sed tamen parolis malrapide.

„Ĉu vi do intencas malpermesi al ni la fojnon – malpermesi al mi vendi ĝin plenpreze kaj kondiĉe, ke la komunuma komitato garantiu la pagon? Ĉu tio estas via firma decido?“

„Jes,“ diris Brando. „Mi ne fordonos tiun maĉaĵeton dum mi restas vivanta, kvankam vi promesas garantii kaj garantii la pagon. Kiu kapablos garantii ĝin, se tamen

la tuta brutaro mortos ĉi tie en la bienoj? Tiu severeca vetero povos daŭri ĝis komence de junio kaj eĉ pli longe, kaj tiuokaze la tuta brutaro mortos. Ne, sufiĉos ne longe tiu fojnostaketo por *tiel* multaj. Ne longe sufiĉos.“

„Sed por kio vi volas uzi la fojnon? Se mortos ĉies brutoj escepte viaj – kian kontenton la posedo de ĝi faros al vi kaj kian utilon?“ Johano demandis.

„Tio ne koncernas min,“ respondis la maljunulo. „Tio estas ilia afero. Ili decidis la multecon de sia brutaro dumvintra laŭ sia fojnoprovizo, sed ne mi. Ili tamen povus rikolti fojnon pasinttempe same kiel mi kaj certe pli facile, ĉar ili do havas la vidpovon, kiun mi ne havas. – Estas ilia afero. Trafas ilin mem la mallaboremo kaj senrimedeco. – Estas ilia afero. Trafas ilin mem.“

„Sed vi tamen ne kunportos tiun grandan fojnostakon en la eternecon,“ diris Johano. „Iam venos tempo, kiam vi devas postlasi ĝin. Tiam oni disdonos ĝin laŭ bezono. Kaj kian profiton ĝi donos al vi? Kiel vi volas uzi ĝin?“

„Mi intencas posedi ĝin,“ Brando respondis, „posedi ĝin ĉi tie sur la altaĵeto, posedi ĝin je okazo de bezono, se neniu fojno estos rikoltita dum la somero. Eble venos senherba somero, kaj povos veni erupcio, kiu venenigas la tutan herbon, kiel fariĝis en la densnebula severtempo. Ĉu vi nun komprenas min?“

Kaj Brando stumblete paŝis de la stako hejmen kiel signo de fino de la interparolo. Lia vizaĝo estis malvarmece kiel la vesperĉielo post sunsubiro. Kaj severecaj kuntiraĵoj karakterizis la trajtojn de la vizaĝo simile al la glacitavoloj sur la ŝtonoj kaj altaĵetoj, en kiujn la sunbrilo faris truetojn dum la tagoj.

Brando malaperis en la biendomon. Kaj Johano surĉevaliĝis. Malmultajn salutvortojn ili eldiris, kaj ambaŭ estis koleraj. La ĉevalo ekgalopis kaj estis hejmenirema. Ĝi kuris laŭ la neĝokrusto kaj plirapidis. La vento kontraŭblovis kaj plifortiĝis post la sunsubiro, tiel ke glacieca blovo kuris laŭ la valo kaj faris Johanon griza ĉirkaŭ la buŝo, kie la spira vaporo prujniĝis en la barbo. Johano estis ekscitita. Li estis ekscitema laŭ naturo. Oni ofte indignigis lin ekde kiam li ekregis la komunumon. La anoj de la komunumo egaligis tute al aliaj homoj. Ili kaŝe riproĉis la estraron de la komunumo, akuzis ĝin pro malsaĝeco kaj partiececo, sed la plej multaj pagis la komunuman imposton malfrue kaj maleme, kaj ne pli frue ol tuta jaro post la pagdato. Johano memorigis al si la tutan iradon de la afero kaj mense rigardis la vojon iritan. Li

estis lacega pro la ĉiuj penigaj malfacilaĵoj. Kaj nun la tuta komunumo pendis je unu sola, maldikega fadeno, super kiu la vetero havis potencon disŝiri ĝin aŭ ne. La malvarmo pikis la nazpinton kaj la vangostojn de Johano, kaj la ŝuoj premis liajn piedojn, kiam ili malmoliĝis pro la frosto. Kaj la varmo enbruste kaŭzita de la ekscitiĝo pikis lian gorĝon.

Veninte hejmen vespere li estis silenta, sed li tamen rakontis al sia edzino pri la interrilato de si kaj ŝia patro.

„Jes,“ la virino diris. „Mia patro fidus je la fojno kaj ne povas liveri ĝin, kiom ajn estas proponata rekompence. Li estas tiel laŭ naturo, mia maljuna patro.“

„Vi devas iri morgaŭ,“ Johano diris, „kaj provi ekhavi lian permeson per iuj ajn rimedoj. Estas al mi domaĝe perforte preni de li la fojnon, sed tion mi faros, se ne troviĝos aliaj rimedoj.“

Kaj la postan tagon ŝi iris por renkonti sian patron. La vetero estis ankoraŭ egale kiel antaŭe kaj montris neniun plimildecon. Estas nenio rakontita pri ŝia rajdado antaŭ ol ŝi venis al la bieno de sia patro. Ŝi deĉevaliĝis kaj eniris. Ŝi vidis neniun homon ekstere. Ŝi eniris la loĝoĉambron. Ŝia patro sidis sur sia lito kaj trikis maristan ganton kaj kantetis strofon por si mem. Tiu strofo temis pri la vetero kaj estis malnove konata en la komunumo.

Malproksime el aer’  
vente blovas neĝo.  
Nodojn forte laŭ sever’  
ligas ĉielreĝo.

Gudrun klinis sin suben al sia patro kaj salutis lin milde.

„Ĉu estas mia Gunjo?“ li diris.

Ŝi jesis tion kaj enŝovis duonbotelon da brando en lian manon.

La brovoj de la maljunulo leviĝis kaj li diris:

„Ĉiam vi ĝojigas min, mia Gunjo. Tion faras ne multaj lastatempe. Ne, ne. Ĉu vi alie diras iujn novaĵojn? Pasis longa tempo ekde kiam vi laste venis ĉi tien, certe plena jaro aŭ pli.“

„Mi diras neniujn novaĵojn escepte ĉi tion, kion ĉiuj konas, la severecon de la vetero kaj la fojnomankon de kie ajn oni priaŭdis, kiel estas supozeble. Fariĝis jam longa endoma nutrado, certe deksep semajnoj kaj kelkloke dudek.“

„Jes,“ diris Brando. „Tiel estas. Estas severa la vetero kaj ne ankoraŭ vidata fino de ĝi. Povas esti, ke tiel daŭros ĝis komenco de junio kaj eble ĝis la festo de sankta Johano. Venos poste senherba somero. Kaj fine de aŭgusto denove malvarmiĝos, kaj poste venos ege frosta kaj neĝoplana vintro kaj . . . “

Li estis daŭranta la malbonajn profetaĵojn, sed Gudrun interrompis lin kaj diris:

„Ne, ĉesu nun mia patro. Ne fariĝos tiel malbone, povus esti terure, kvankam ne tiugrade. Mi esperas, ke pliboniĝos pere de venonta apero de la luno. Tiam ni ekhavos lundan lunon, kiu ekaperos sudokcidente, kaj mi memoras, ke vi fidis je lundaj lunoj.“

„Jes,“ respondis Brando. „Kiam mi estis juna, la lundaj lunoj plej ofte estis bonegaj kaj plej fidindaj lunoj. Sed nun tio ĉi ŝanĝiĝis kiel pli multaj aferoj. Nun ili fariĝis tute la plej malbonaj lunoj, mia kara, kaj estas tute egale, kie la lunoj ekaperas, kiam la klimato estas tiel severa. Jes, tiel estas.“

„Ĉi tio ja estas bedaŭrinda stato,“ diris Gudrun, „ĉi tiu manko de fojno, kaj preskaŭ ĉiuj egalaj, neniuj kiu povas fordoni fojnon en ĉi tiu komunumo, escepte vi, mia patro.“

„Jes, tio estas kiel estas supozinde,“ respondis Brando, „kiel estas supozinde pri mi, blinda kaj kaduka. Sed kiel estas pri vi? Ĉu Johano havas sufiĉan provizon por si mem? Kion vi opinias pri tio? Ĉu li havas iom multe da fojno?“

„Jes, ni havas por ni mem,“ respondis Gudrun. „Sed tamen estas tiel, ke ni ne povas reteni ĝin. Mia Johano fordonas ĝis mankas al li mem kaj ĉio fariĝas neebla. Li pensas pri aliaj kiel pri si mem.“

„Kia malsaĝaĵo. Ĉu estas saĝe tiel kondukti? Estas ja plej inde por ĉiu ajn pensi pri si mem,“ diris la maljunulo.

„Jes, jes, sed tio ne sufiĉas. Li, kiel komisiulo devas pensi pri aliaj, li devas pensi pri la komunumo – kion oni malbonege dankas. Li estas kiel sidanta sur pingloj, li estis maldorma lastnokte kaj hodiaŭ matene li estis distrita. Tiel tiu stato turmentas lin.“

„Ha, li ne povis dormi lastnokte,“ Brando diris. „Al kio celas tio? Por kio maldormi tage kaj nokte pro ĉi tio? Nenio pliboniĝas pro tio. – Ne estas lia kulpo, ke ĉiuj estas senhavuloj.“

„Jes, estas vere,“ diris la virino. „Tio ne estas lia kulpo. Kaj nenio pliboniĝas, kvankam li maldormas. Sed li estas tiel laŭ karaktero. Kaj li jam fariĝis lacega pro tiu

aĉa komunuma regado kaj la maldankemo, kiu estas ĝia akompananto. Li devis malzorgi la hejmon pro tiu laboro. Kaj nun kulminas tio kaj neniu rekompenco pro la tuta peno kaj perdo de tempo. Lacega li estas kaj tio ankaŭ morte tedis min. Ni pensas pri forlaso de ĉio kaj transloĝi al Ameriko. Kaj mi kredas, ke tio tenis mian Johanon maldorma lastnokte.“

„Ĉu vi konsentas tion?“ diris Brando kaj ekkaptis la brakon de sia filino. – „Ĉu vi konsentas fordonadon de la fojno de via brutaro, kio faras vin senhelpaj? Ĉu vi konsentas iri for de mi al Ameriko, forlasi vian patron sur la rando de la tombo?“

„Jes,“ ŝi respondis. „Mi proponis tion unue. Se nia brutaro mortos, ni estos devigataj tion fari. Se ĝi vivos, sed la brutaro de aliaj bienistoj mortos, ni ne povos teni nin ĉi tie pro la malriĉeco kaj mizero. Jes, mi proponis tion, mi ne trovis alian rimedon.“

Nun Brando fariĝis kortuŝita kaj li diris:

„Mi kredis, ke mi povu morti ĉe vi kaj viaj infanoj. Mi ne estas plu kapabla resti tiel pli longe.“

„Ĉu vi intencis transloĝi de ĉi tie al nia hejmo? Ĉu vi intencas tion? Vi neniam menciis tion per unu vorto.“

„Ne, tion mi ne intencas – transloĝi de ĉi tie. Mi ne intencas iri de ĉi tie. Tio ne necesas. Mi opiniis, ke vi volus transloĝi ĉi tien. Tiuokaze mi transdonus al vi la havaĵon mian, mia Gunjo.“

„Sed la fojno, mia patro. Ĉu vi do disponigas al ni la fojnostakon? Ĉio dependas de tio.“

„La fojnon, la fojnon,“ diris la maljunulo. „Ankoraŭ vi ripetas tion pri la fojno, kio estas nenio kaj sufiĉas por neniu. Estas sensecaĵo, ke ĝi sufiĉas por tuta komunumo kaj ne estas parolinde. – Ne, estas senrezultate priparoli tion, mi ne fordonos tiun maĉaĵon en aeron kaj venton. Estas nenio por tiel multaj. Sed por mi ĝi estas konsolo, por mi sola. Ne, mi ne fordonos la fojnon dum mi vivas. Tion mi ne faros, mia Gunjo.“

Kaj la vizaĝo de Brando fariĝis neĝblanka, kaj la trajtoj malmoliĝis kaj rigidiĝis. Gudrun rigardis la vizaĝon de sia patro, kaj ŝi rekonis tiun signon de malnove kaj sciis, ke neeble estas turni lin, kiam tiel estis lia mensostato. Tiuj trajtoj montris samon kiel grize striitaj stratusoj, kiuj kuŝas super glacikovrita montaro – severecon.

Gudrun cedis. La okuloj pleniĝis de larmoj, kaj ŝi ĉirkaŭbrakis la kolon de sia

patro kaj diris:

„Saluton, mia patro, kaj pardonu, ke mi ofendis vin kaj nun kaj antaŭe. Mi ne revenos ĉi tien.“

La maljunulo sentis la larmojn, kiuj falis sur lian vizaĝon, varmaj kaj pezaj, kiel larmoj de virinoj povas esti plej varmaj kaj falantaj, kiam ili plivarmiĝis pro ĉagreno kaj kolero. Ŝi rapidiris el la loĝoĉambro kaj surĉevaliĝis. Sed Brando staris en la mallumo en la plenluma tago, sed li tamen vidis la fojnostakon sur la altaĵo. Li iris tien por tuŝi ĝin. Ĝi ankoraŭ restis tie. Gudrun ne kunprenis ĝin. Li aŭdis la knaron kiam la hufoferaj pintoj truetis la glacieron, kiam ŝi rajdis for. Li staris longe kaj aŭskultis la rajdobruon. – Poste li eniris. Li estis maltrankvila kaj paŝis tien kaj reen. La botelon da brando, kiun lia filino donis al li, li albuŝigis kaj eltrinkis per unu tiro. Li paŝis tien kaj reen dum la tuta tago kaj luktis kun si mem ĝis vespere.

Tiam li sendis sian edukfilon al la bieno de Johano kaj petis lin sciigi al la geedzoj, ke estas permesate, ke Johano prenu la fojnon venontan tagon, kiu estis lundo. Estas kondiĉo, ke ĉio estu for en unu sama tago kaj nek restu peco de terstrio nek terbulo.

Sed rapide povas ŝanĝiĝi la vetero laŭ malnova proverbo. En la venonta mateno la vetero jam turnis sin kaj ekblovis vento de sudo kun ŝanĝita klimato.

Johano sendis neniujn informojn al la komunumaj bienistoj nek sciigis, ke tiam estas la fojno havebla. Li volis ekscii pri daŭro de la degelo. La postan tagon la tuta komunumo estis netransirebla pro neĝokaĉo kaj akvofluo, kaj aperis tero pli kaj pli ĉiun ajn tagon.

Sed maljuna Brando paŝetis tien kaj reen en sia domo kaj demandis pri alveno de homoj: „Ĉu ili ne venos por preni la nutraĵon? Estas ja certe por ili jam bezono.“ Ŝajnis, ke li nun deziregis forprenon de la fojno.

Kaj en tiu tago li neniam iris al la fojnostako por tuŝi ĝin.

Kaj ekde tiam neniu ekhavis scion pri tio, ke li amas la fojnon. Ŝajnis, ke al li estis egale la posedo de la fojno en tiu momento, kiam li permesis fordonon de ĝi.

Brando ĉesis sian bredadon en la venonta printempo kaj volonte lasis sian bienon en la manojn de siaj filino kaj bofilo.

Li ankaŭ tute ĉesis tuŝi la fojnon kaj faris tion neniam plu. Li tamen vivis je



bona sanstato dum multaj jaroj kaj trinkis brandon ĝis morto kaj duonlaŭte eldiris religiaĵojn – psalmojn kaj bibliajn strofojn.

Nun li estas mortinta.

Sed la memoro restas kaj konserviĝas kiel ŝtono en vojeta fendeto, herbokreskita rulŝtono.

*(Stefán Sigurðsson.)*

## **Jón Trausti:**

### **La marlupo**

Viro nomiĝas Paŭlo marlupo. Vi eble ne aŭdis pri li, kara leganto, ĉu?

Mi ne scias, ĉu li estis konata ekster Grundarfjordo, kie li loĝis. Sed tie oni konis lin – pleje pro malbonaĵoj.

Ankoraŭ hodiaŭ estas al mi enigmo, kial li estis nomata marlupo. Eble la kaŭzo estis, ke la mentono kaj la malsupra parto de la vizaĝo havis marlupajn trajtojn, ion, kio memorigis pri ŝirdentoj.

Kompreneble li ĉiam fariĝis kolera, kiam li aŭdis, ke li estas nomata marlupo. Tamen oni nomis lin tiel, kaj kiuj tion faris, tiuj diris, ke li estas ja kolera, indiferente ĉu oni nomas lin marlupo aŭ ne. Plenkreskuloj ne nomis lin tio, escepte kiam ili estis pretaj lukti kun li. La buboj kriis la moknomon al li, kiam ili estis sufiĉe malproksimaj de li, por ke li ne ekkaptu ilin.

Sed ĝuste tial, ke li incitiĝis pro la moknomo, oni des pli ofte nomis lin marlupo.

Cetere mi ne volas malpliigi la famon, kiu estis plej ofta pri maljuna Paŭlo, ke li vere estas kanajlo, efektiva fihomo ĉiurilate kaj fripono al homoj kaj bestoj. Tia li estis dum sia tuta vivo kaj jam fariĝis maljuna kaj malbonhumora aldone al ĉio alia.

Krom tio li estis malbela – entute osteca kaj rigida, kaj li havis grandan kapon kaj severan mienon. Kaj tamen estis kelkiam ia abomena flateco en liaj mieno kaj sinteno, kio malbone konformis kun la marlupeca severo kaj la malbonhumoro.

Tamen mi ĉiam estis duone certa pri tio, ke maljuna Paŭlo ne estis tiel malbona kiel oni diris, ke li estas, kaj tio estis antaŭ ol mi bone konatiĝis kun li. Mi timis lin. Mi

ja ne spertis iun malbonon de li; mi ankaŭ neniam incitis lin aŭ nomis lin marlupo. Mi ne kuraĝis tion fari. Sed parte ŝajnis al mi nature, ke li estas malbona, ĉar ĉiuj estis malbonaj al li.

Sed gajnulo li estis. Energia kiel la diablo mem, senhonta kaj malbontrakta ĉe negocoj kaj ne evitis iujn rimedojn ĉe la fiŝkaptado. Li ankaŭ estis sufiĉe monhava.

Li loĝis sola kaj plej ofte laboris sola, escepte kiam li dungis al si ŝipanon dum la somero kaj foje helpknabon dum la frua parto de la vintro. Lia domo staris apud la herbejo ekster Stafnes. En unu el ĝiaj finoj, malsupre, estis lia litaĉo, apartigita per panelo, kaj ne tre pura. La tuta alia spaco malsupre estis por salo kaj salita fiŝo. Virinaĉo, kiu ĉe li servis kiel mastrumistino, dormis en la subtegmentejo – inter faskoj da fiŝkaptiloj kaj ĉiaspecaj aliaj objektoj rilatantaj al boata ekipo.

Tio estis la hejmo. Tia ĝi estis dum la tuta tempo, kiun mi memoris.

---

Iufoje Paŭlo marlupo estis mia mastro.

Tiutempe mi tute ne estis ia heroo, 15-jara kompatindulo, malforta kaj molkaraktera.

Miaj gepatroj dungigis min al la maljunulo por fiŝkapti per hokaroj kun li en la fjordo dum la aŭtuno kaj la frua parto de la vintro. Kian kontrakton oni faris pri mia salajro, mi ne scias. Tio estis afero inter mia patro kaj maljuna Paŭlo. Tio ne koncernis min.

Al mi similaĝaj knaboj, kiuj estis restintaj ĉe Paŭlo, tiel rakontis pri la restado, ke neniu deziris sin dungi tien. Mi iris tien laŭte plorante, sed devis tion fari. Kaj la unuan nokton, dum kiu mi dormis en lia ĉambro, mia sento estis simila al tiu, kiun mi opinias, ke havis la fabelaj herooj, kiam ili tranoktis en la halegoj de la gigantoj. Ŝajnis al mi, ke Paŭlo esprimis tion ĉi per la silento kaj rigardado: Estu trankvila ĉinokte, mia knabo, ĉar mi facile vekiĝas. Sed morgaŭ vi estos rostata sur ferstangeto.

Tamen Paŭlo neniam koleris al mi dum mia restado ĉe li, – escepte unu fojon.

---

La fjordo fariĝis plenplena da eglefino frue en novembro.

Preskaŭ senescepte la eglefino venis amase en la fjordon iam je tiu tempo. Kaj tiam oni vere ne ŝparis energie labori por surbordigi la eglefinon.

Ĉiuj jam ĉesigis fiŝkaptadon ekster la fjordo. La bonaj fiŝkaptiloj, kiujn oni faris en la somero kaj ankoraŭ estis uzeblaj en profunda maro, estis pendigataj por konservo ĝis venonta jaro. Nebonaj kaj preskaŭ eluzitaj hokaroj kun rustegaj hokoj estis kunligitaj en longaj ŝnuroj, tiel ke 1000 ĝis 1200 hokoj estis en ĉiu kunligaĵo. Por tio oni uzis kiun ajn haveblan logaĵon kaj metis ĉion en la fjordon antaŭ la nokto.

Oni povas facile diveni, ke estis malvaste en la fjordo, kiam 20-30 ekipistoj metis tiujn longegajn hokarojn ĉiujn en la saman spacon. Estis preskaŭ neeble eviti, ke io interkroĉiĝu.

Kaj oni diris pri Paŭlo marlupo, ke li ne bedaŭris, se lia hokaro interkroĉiĝis kun la hokaroj de aliuloj. Estis eĉ ĝenerala opinio, ke li metis siajn hokarojn oblikve super tiujn de siaj najbaroj aŭ proksime al ili, *por ke* ili interkroĉiĝu.

Kiam tiel okazis, estis plej grave elmarigi sian hokaron, *antaŭ ol* la aliuloj tion faros. Paŭlo ĉiam faris tion.

Kaj kiam li elmarigis la hokarojn de la najbaroj kune kun la sia, kaj ĉio estis kaose interkroĉiĝinta, tiam oni ja ne demandis, al kiu el la hokaroj la fiŝoj estis alfiksiĝintaj. Paŭlo prenis tiom kiom li povis atingi.

Se la hokaroj estis grave interkroĉiĝintaj, li detranĉis la tutan interkroĉiĝintan parton el la hokaro de la najbaro kaj enigis ĝin en sian boaton, kune kun la kaptaĵo, sed poste ĵetis la finojn en la maron. Okazis, ke tiuj, kiuj estis metintaj la hokarojn proksime al la lia, enboatigis ambaŭ ankretojn kaj etajn partojn el la hokaro ĉe ĉiu ankreto, sed la tuta mezparto mankis – kaj la tuta kaptaĵo.

Hejme Paŭlo trankvile ordigis la interkroĉiĝintajn hokarojn kaj poste alligis la hokarparton, kiun li estis atinginta de la najbaro, al *sia* hokaro. Povos ja alfiksiĝi fiŝeto al ĝi kiel la aliaj!

Kaj sen kaptaĵo Paŭlo neniam albordiĝis – escepte unu fojon.

Neniam mi forgesos ilin, la ĉarmajn, trankvilajn lunbrilnoktojn kun frosteto, kiam oni kaptis la eglefinon.

La fjordo estis glata kiel spegulo, nenie ondo, eĉ nenie ondeto sur la maro. Estis malfacile vidi limon inter lando kaj maro, ĉar ĉio kuniĝis en la flosantaj speguliĝoj kaj respeguliĝoj.

La montoj estis tute blankaj, kun malhelaj strioj kie troviĝis la rokaroj kaj

malhelbluaj ombroj de la interkrutejoj. Ili ĵetis la blankan lunbrilon sur la fjordon, kaj la fjordo reĵetis ĝin al ili mem. Plej alte ili kuniĝis kun la blankaj nuboj, tiel ke oni apenaŭ distingis inter ili. Super ĉio ŝvebis la altfilozofia vizaĝo de la luno en la steltrembrilanta ĉielbluo.

Kaj kia vidaĵo rigardi en la maron el la boato dum la elmarigo de la hokaro! – Tiel profunde kiel atingis la okulo en la botelverda maro trembrilis la arĝentaspektaj eglefinoj. Ili naĝis trankvile ĉirkaŭ la hokara ŝnuro, tiel malproksime de ĝi kiel atingis la hoka ligilo. Estis kvazaŭ trunketo de stranga markreskaĵo kun blankaj folioj, kiuj balanciĝis en la torento, streĉus sin de la fundo al la boato. La plej supra eglefino estis ĉe la boatrando. Ĝia skvamo trembrilis en la lunlumo. De tie vico streĉis sin malsupren, 10-20 naĝantaj blankaj ŝildoj en la maro, ĉiam pli kaj pli malklaraj ju pli profunde ili estis, ĝis ĉio kuniĝis en bluverda nigro ĉe la fundo. Unu eglefino post la alia falis plumbe peza en la boaton. Tie ĝi kuŝis silenta kiel ŝtono kaj senmova; ĝi eĉ ne provis barakti per la vosto. Ĝi nur glitis laŭ la glitigaj korpoj de siaj fratinoj, kiuj jam kuŝis en la boato, ĝis kiam ĝi ne atingis pli malsupren. Tie ĝi kuŝis senmove kaj trankvile atendis sian morton.

Unu eglefino post la alia eniĝis en la boaton, tiel peza kaj granda, ke la boato ekstremis. Sed ĉiam estis sufiĉe ekster la boato.

Eble oni devus albordiĝi, nur enboatiginte la duonan hokaron, por malŝarĝi la boaton.

— — —

Tiu „unu fojo“ okazis, kiam Jónas el Naustavík sukcesis ellitiĝi pli frue ol Paŭlo.

Jónas el Naustavík estis granda malamiko al li. Li estis egale lerta fiŝkaptisto kiel li kaj eĉ pli lerta, kaj estis li, kiu plej ofte incitis Paŭlon per la marlupa nomo.

Ni vidis Jónas en la antaŭa vespero. Li metis sian hokaron kelkajn klaftojn de la nia, iomete pli ekstere en la fjordo.

La ceteron mi nur sciis longan tempon pli malfrue, ke Jónas estis pafinta focenon antaŭ kelkaj tagoj kaj uzis por logaĵo al sia tuta hokaro putrintajn focenajn intestojn. Tio estis efika logilo al la eglefino. Kiam tia logaĵo estas en la maro, ĝi tute evitas alian logaĵon.

Estas kompreneble, ke Jónas volis elmarigi sian hokaron pli frue ol Paŭlo ĉi tiun

fojon. Li ankaŭ jam estis sur la fjordo, antaŭ ol ni ellitiĝis – je la tria nokte.

Mi ne forgesos la marlupecan mienon sur la vizaĝo de Paŭlo, kiam li tion vidis. Ne pasis longa tempo, ĝis kiam ni atingis nian naĝbareleton.

Jónas elmarigis sian hokaron mallongan distancon de ni. Du knaboj, similaĝaj al mi, estis kun li en la boato kaj remetis. Estis eglefino sur ĉiu hoko ĉe li.

Sed kiam Paŭlo estis elmariginta la ankreton, okazis la strangaĵo, ke ne vidiĝis unu sola eglefino sur la hokaro tiel profunde en la maro kiel atingis la okulo. La logaĵoj estis preskaŭ netuŝitaj.

Paŭlo momente faligis sin en la poŭpon kaj peze ĝemis. Poste li ekrigardis al Jónas kaj vidis lin hoki ĉe la boatrando unu eglefinon post la alia, ŝiri ĝin de la hoko kaj ĵeti ĝin en la boaton.

„Remu, remu!“ Paŭlo kriis al mi, kaj la voĉo tremis pro indigno. Samtempe li komencis enboatigi la „mortan“ hokaron.

Mi tremis pro timo. Mi komprenis, kion pensis Paŭlo. Li kredis, ke Jónas elmarigas lian hokaron kune kun la sia, ŝiras de ĝi la kaptaĵon kaj poste forĵetas ĝin. Tion li mem ofte estis farinta, do li sciis, kio tio estas. Nun li volis atingi al la boato de Jónas kaj vidi, ĉu tiel estas.

Mi antaŭenigis la boaton per ĉiuj fortoj. La remiloj estis tro pezaj por mi, kaj al mi malvarmiĝis la manoj ĉirkaŭ la teniloj de la remiloj. Mi ne multe helpis; tion mi konfesas. Sed pli mi ne povis.

Paŭlo duone antaŭentiris la boaton per la hokara ŝnuro, enigis kelkajn fiŝetojn, kiuj elmariĝis, sed eĉ ne momenton ekrigardis en alian direkton ol tiun, en kiu troviĝas Jónas kaj lia kaptaĵo.

„Marlupo, marlupo!“ aŭdiĝis de la buboj transe en la boato de Jónas. Paŭlo ŝajnis, ke li ne aŭdas tion.

„Remu, diabla vermo, aŭ mi elboatigos vin per bato!“ li kriis antaŭen al mi, kie mi sidis sur la boatbenko. „Vi ĉiam estas dormanta! – Remu, mi diras!“

La interspaco inter ni kaj Jónas iom post iom malpliiĝis. Jónas ja same rapide elmarigis la hokaron, sed la enboatigo de la eglefino malrapidigis la hokaran elmarigon.

Mi streĉis la remilojn per ĉiuj fortoj, sed estis perdonta la forton pro laciĝo.

„Mi ja vekos vin, vi malbenata ulaĉo!“ diris Paŭlo kaj kunmordis la dentojn pro

kolero. Sammomente li prenis sian pugnoganton, trempis ĝin en la maron kaj ĵetegis ĝin rekte en mian vizaĝon.

La ĉapo falis de mia kapo ĉe la ekpuŝo, kaj la glacie malvarma marakvo fluis malsupren laŭ mia nuda kolo, sub la vestaĵoj. Mi ekploris, sed tamen ne lasis la remilojn, sed penis viŝi la marakvon kaj larmojn el la vizaĝo per mia maniko. Mi ploris pro indigno pro la grandega maljusto, kiun oni faris al mi. Dio scias, ke mi faris tion, kion mi povis, kvankam tio ne sufiĉis. Kaj pense mi preĝis, ke li mem vidos tion.

Baldaŭ poste Paŭlo malrapidigis la elmarigon de la hokaro. Tiam li jam estis tiel proksima al la boato de Jónas, ke li devis vidi, ke Jónas ne elmarigas lian hokaron. Tion oni ankaŭ apenaŭ povus atendi de Jónas.

Sammomente *marlupo* ekaperis sur la hokaro de Paŭlo.

Estis eta marlupido, kune kun kapo kaj vosto ne pli ol proksimume 12-18 colojn longa, sed ĝi estis vigla kaj bone vivanta.

Paŭlo indigne kaj malestime ekrigardis tiun neinvititan kaptaĵaĉon. Ĉu do la manko de kaptaĵo ne sufiĉis? Ĉu nun tiu malbenata kreaĵaĉo nepre devis veni el la maro por inciti lin? Kaj nepre *tiu* markreaĵaĉo, per kies nomo oni moknomis kaj incitis lin.

La marlupo estis avidege englutinta la logaĵon kaj nur rimarkinta la hokon, kiam ĝi jam estis en la stomako. Poste ĝi estis peninta elvomi ĝin. Kaj ankoraŭ ĝi vaste malfermis la ŝirdentohavan buŝegon.

Paŭlo kelkfoje forte skuis la hokaran ŝnuron por de ĝi forigi la marlupidon, sed ĝi ne foriĝis, kaj la hoka ligilo ankaŭ ne disŝiriĝis. Li devis preni ĝin per la manoj.

Sammomente Jónas el Naustavík swingis dikan, grandan eglefinon sur sia hoko por inciti Paŭlon. Mi preskaŭ aŭdas la gajesprimojn en la boato de Jónas, se la knaboj tiam estus sciintaj, kion Paŭlo tenas en la manoj.

Paŭlo rigardis per avidaj okuloj transen al Jónas kaj momente tute forgesis sian situacion. Kaj sen pripenso li metis la nudajn fingrojn en la gorĝon de la marlupo por eligi la hokon.

Kion vi opinias, ke la marlupo faris?

Ĝi faris tion, kio kuŝis plej interne en la marlupa naturo. *Ĝi kunmordis la buŝegon.*

Paŭlo ekkriis pro doloro kaj indigno. Sed tio ne efikis al la marlupo. Per la tuta

fortego, kiu ekzistas en mortonta marlupa animo, ĝi kunpremegis la buŝegon kaj enigis la ŝirdentojn en la manon de Paŭlo. La okuloj fulmis pro kolero, la korpo estis rigida pro streĉo, kaj la tuta kapo ŝajnis fariĝi unu sola najlelprenilo.

Paŭlo malespere batpuŝis la marlupon al la boatrando por sin liberigi, sed li ne sukcesis en tio. La sango el lia mano jam gutis ĉirkaŭ la buŝego de la marlupo.

Fine Paŭlo sukcesis malfermi la buŝegon de la marlupo kaj liberigi la fingrojn. Poste li ŝiris la marlupon de la hoko, ĵetis ĝin sur la plankon de la boato kaj premegis ĝin per la kalkanumoj, tiel ke la kapo disrompiĝis.

– – Sed tamen Paŭlo mem estis jam ankoraŭ pli disrompita. Mi neniam vidis homon esti tiel absolute venkita.

Mi estis ĵus plorinta. Sed nun mi tamen apenaŭ povis ne ridi.

Kaj tamen mi kompatis Paŭlon.

Kredeble li neniam antaŭe vivis tiel dolorigan horon. Vidi homon plenŝarĝi boaton per bona kaptajo tuj apud lia boatrando kaj mem nenion ricevi! Tio streĉus la humoron ĉe homoj, kiuj estas pli molkarakteraj ol Paŭlo. Kaj krome tiu homo estis lia plej granda malamiko, kiu neniun okazon preterlasus por memori al li tiun hontigan kaj vanan marveturadon.

Kaj anstataŭ doni al li kaptajon, la kreinto sendas tiun – – tiun diablon sur lian hokaron por ankoraŭ pli turmenti kaj indignigi lin, kaj fine por mordi lin – aldone al ĉio alia.

Se Paŭlo estis farinta maljuston al multaj homoj, kio estas tre ebla, li almenaŭ treege suferis nun. Kaj tio ne estis pro maljusto de iu ajn homo; tio estis plej doloriga. Li havis neniun esperon, ke li povos venĝi.

Li komencis elmarigi la hokaron, kvankam la sango konstante gutis el lia mano. Sed nun li ekploregis.

Li ploris kun konvulsia intenso. Unue li penis kaŝi tion al mi, sed ne povis tion.

Subite li disŝiris la hokaran ŝnuron inter siaj manoj, ĵetegis la finon en la maron, eksidis kaj duone ĝemis al mi:

„Remu al la bordo.“

– – –

„Vi rajtas iri al via hejmo, mia etulo,“ li diris al mi kelkajn tagojn poste. Tiam

jam estis absceso en la vundo kaŭzita de la marlupa mordo, tiel ke li ne povis labori per la mano.

„Mi ne bezonas vin plu,“ li melankolie aldonis. „Estas tute sensignife por mi surmariĝi; mi eĉ ne plu kaptos fiŝeton. Estas malbeno kaj kondamno super mi kaj miaj kaptiloj. Povas esti, ke la kulpo estas mia; mi meritas tion. Sed mi neniam plu surmariĝos. Mi ankaŭ probable ne vivos longe de post nun. Estis verŝajne antaŭdiro al mi, ke mi ne sukcesis pli frue ellitiĝi ol Jónas el Naustavík. – Salutu de mi vian patron kaj diru, ke li povos preni vian parton el la kaptaĵo, kiam li deziros. Kaj jen, mia etulo, estas 20 kronoj kiel kompenso pro tio, ke mi koleris al vi. Mi scias, ke vi ne povis pli. Ilin vi mem havu. Kaj nun, adiaŭ!“

*(Ólafur S. Magnússon, Voĉo de Islando, II, 1, 1950.)*

## **Porsteinn Erlingsson:**

### **La ter' ornamojn stebas**

La ter' ornamojn stebas  
en sia flora hal',  
kaj mi malpeze ŝvebas  
tra l'larma vivoval'.  
Dum la aliaj vidas  
turmentajn barojn nur,  
min bona sorto gvidas  
ĉe rozoj kaj plezur'.

*(Árni Böðvarsson kaj F.V. Lorenz)*

### **La heredaĵo**

Popol' via, eble tre fama, sen mank',  
militis, kaj ŝvelis en vi nobelsang'  
je l'hor' de l'triumfo de l'viaj.  
La hejmon defendis malriĉa najbar',  
sed fine lin venkis la malamikar'  
per siaj plimulto furiaj.



Jen brilas tra l' dom' via naci-honor'.  
Por iĝi do nun de pli granda valor'  
provenka la festo palaca,  
ĉe l' drinko de vinoj bongustaj kaj rid',  
en pezaj katenoj milita kaptit'  
veniĝas, malĝoja kaj laca.

Vi, kiu ja havas la sangon en vi  
de l' sub tiranec' ĉagrena naci',  
la sangon malĝojaj de koroj:  
Vi sciu, ke sango ĉi tiu al vi  
alvenis herede de viv-tragedi'  
kaj multaj malĝojaj memoroj.

La patro sklavita, sen vest', en silent'  
suferis dolorojn de l' peza turment'  
de frapoj sur korpo kaj vango.  
En li, katenita, sen homa defend',  
ekbrulis deziro de venĝ' pro l' ofend',  
kaj brulas de l' fil' en la sango.

*(Árni Böðvarsson kaj F.V. Lorenz)*

## La kondiĉoj

Se ne timigas vin tumulto de l' diablar',  
nek de l' sentronigitaj moŝtoj brua deklar',  
nek krioj kontraŭ progresema mensa legi',  
mi kantos kanton de liber' kaj sidos ĉe vi.

Se vi malamas ĉiun agon kontraŭ liber',  
la sklavigantan tiranecon, koron el fer',  
abomenaĵojn de memam', de blinda envi',  
mi ankaŭ tion malamados kune kun vi.

Se amas vi la kateniton kiu, kun rid',  
la ĉenojn skuas kaj suferas pro la decid'  
ne kisi de l' tiran' la manon, – kia defi'!  
mi tiun homon ŝatos kaj lin amos kun vi.

Por koni de la Viv' la leĝojn kaj de l' Natur',  
se ilin studas vi ne nur per fremda mezur',  
sed per okuloj viaj propraj kaj kun raci',  
mi ankaŭ volas tiujn leĝojn lerni kun vi.

Se vi ŝipiros, malgraŭ forta bru' de l' ondar'

kaj se kuraĝa estos vi, sen tim', sur la mar',  
eĉ se ne brilos de l'sukceso plen-garanti',  
plezure mi sur mar' ŝipiros kune kun vi.

Se l'nigra nokto laste venos al nia pord'  
kaj sur la ŝip', kaj ne aperos lumo de bord',  
la ŝipon vi direktu firme kaj sen devi';  
sur nigra la profund' mi iros kune kun vi.

*(Árni Böðvarsson kaj F.V. Lorenz)*

## Nokto

Nun ŝvebu milde tra la mondo,  
ĉe via dolĉa lulubaj'  
kvietas ĉiu korofundo,  
serena, hela nokt' en maj'.

Amantoj viglas kaŝ-kunvene  
kaj ankaŭ nur konfidas vin,  
ho, gardu ilin ĝis matene  
en via kares-mola sin'.

La aventuroj al vi indas,  
alven' de sun' ilia fin'.  
Ho, kiu dum la tag' atendas  
plezure do salutas vin.

Amantoj ĝojas – fine iras  
la tago okcidenten for,  
kaj nigra bild' de nokt' aperas  
en orienta, paca glor'.

Printempa nokt', vi sola estas  
la edziĝfesta ĉeestant',  
la du amantoj ĉe vi restas,  
brakumas ilin via vand'.

Kaj iru al okcidenthaloj,  
amik', trankvile, laŭ destin',  
senkulpa am' en Islandvaloj  
por eterne benu vin.

*(Haraldur Jónsson, Voĉo de Islando, 1950, 1)*

## La bildo

Memoras vi la tagon: Ŝi staris kun ridet'  
kaj longe vin atendis en robo de koket'  
kun brakoj sopirantaj karesojn de junuloj,  
kaj ĉiun ŝi invitis al provo de l'ambruloj.

Vi sentis jen subite fajrerojn en la kor',  
ekkuris la piedoj kaj menso estis for.  
Al via ĝuofonto mallonga ŝajnis vojo,  
kaj bela via kara kaj peno nura ĝojo.

Vi domĉirkaŭon lasis, sed foris la knabin',  
vi tra la kampoj vagis, kaj ŝi evitis vin.  
Sed iro tamen dolĉis malgraŭ la paŝoj kromaj  
tra novaj regionoj kaj lokoj fremdanomaj.

Vi tiam rerigardis, – jen via mortokrim':  
La viglo forvaporis kaj belo trans esprim',  
kaj la kamparo vasta, sufiĉa laŭ bezonoj,  
fariĝis ombra valo kun montaj ĉirkaŭzonoj.

Neniam ŝi returnis, la bildo trans esplor',  
kaj tial vi rigardas al monto je l'aŭror'.  
Vi trovas valon prema kaj nigra vian vivon  
kaj baldaŭ mem naniĝas en taŭgan perspektivon.

Ĉielo tamen logas, – ĉar altas ĉiam ĝi,  
dum premas mondo sube kaj eta dimensi'.  
Kaj kiam frua vento nebulon disforpelas,  
fojfoje vian menson ĝi ankaŭ kunŝovelas.

Kaj jen la mont' ankoraŭ defias al ignor'  
pri sama ĉi-mistero: jen kio trans esplor'?'  
Ĉar eble estas valo je novaj montobaroj,  
sed eble ankaŭ bordo ĉe vastaj, vastaj maroj.

Milokcentjarajn paĝojn trapalpas trema man',  
revelacion serĉas pri transo, – estas van'.  
Vi eble tie trovas beldirojn kaj saĝumojn,  
sed ĉi-geografio ne tenas akvozumojn.

Ĉar kiu la monton timas kaj sin turnadas for,  
neniam solvi povas l'enigmon trans esplor'.  
Sed tiu, kies vivo celadas transobelon,  
grimpadas sur la monton, en sunan pintohelon.

(*Baldur Ragnarsson, Voĉo de Islando, 1959*)

## Bondola kasa

La perlo trembrilas sur la rando de la vualo kiam la suno brilas sur ĝin, kaj ravas la okulon. Sed ĝi ankaŭ estis egale bela en la konko sur la marfundo kiam neniu vidis ĝin. Tiel belaj estas la milionoj, kiuj troviĝas sur la marfundo en la mallumo. La perlkaptisto trovas unuopajn, la ceteraj restas, kiujn neniu iam ajn vidas. Se ĉiuj estus videblaj sur la fundo, tiam ne trembrilus malpli da steloj en la Persa Golfo kaj la Ruĝa Maro ol sur la firmamento supre.

Juveloj kaj orpecoj troviĝas dise en la tero kiel sekvinberoj en pano. Ni iras sur la krusto kaj vidas nenion escepte kiam bonŝancoj kaj hazardo alportas unuopajn supren el la amaso kiu troviĝas sube trankvila kaj silenta.

Ĉu la saĝeco kaj scienco ne estas kiel la perlo, juvelo kaj orpeco? Pacienco kaj diligentaj manoj elfosas unuopajn el antikvaj ekzemploj, sed sennombra amaso da diamantoj kaj perloj estas konservata en antikvaj sciencaj libroj kaj kelkaj neniam troviĝos, ĉar la libroj perdiĝas.

Unuopaj eroj atingas pro bonŝancoj kaj hazardo en la taglumon kaj trembrilas en nia verkaro kiel la perlo sur la vualo.

Se la *Mala Gamba* poemoj ne estus trovitaj en la templa muro tiam estus forgesitaj ĉiuj rakontoj pri la *Valoa Valo*. Tiel kortuŝaj kaj krome instruaj. La loknomoj estus misformitaj kaj ilia senco kripligita aŭ perdita. Manieroj kaj naciaj moroj estus deduktitaj de tute aliaj premisoj ol ĝuste estas, kaj pri la formiĝo de tiu bela kaj malofte vidata monta florigardeno troviĝus eble nun novaj rakontoj anstataŭ la aliaj, kiuj estas antikvaj kaj veraj.

Antaŭ ol la *Mala Gamba* poemoj troviĝis oni opiniis, ke ĉiuj katoj havas tie rifuĝejon, ĉar ili foje savis la Valoa-anoj de atakoj de musoj, kiuj kelkfoje venas amase kiel lokustoj el Faihe, kiam estas severvetera printempo. Kaj pri tio ĉi estis farata longa musrakonto, kiu estis nura elpensajo, kvankam ĝi estis sufiĉe interesa. Ĉu oni ja ne ankaŭ opiniis, ke la malgrandaj lagoj sub la deklivoj ambaŭflanke troviĝas tie pro tio, ke estis iu kavo en la tero kaj ke la akvo poste kunfluis tie same kiel en aliajn lagunojn?

Tamen tio estis grandega abismo kaj nenia akvo en la deklivoj, kiu povis flui en la lagunojn. Sed tion oni ja opiniis sen pripenso, kaj tamen tio estis la profundaĵoj, kiuj formiĝis, kiam la bienoj subakviĝis tie, sed ĉiuj, kiuj tiam restis vivantaj, forfuĝis el la valo, konsternitaj. Kaj oni certe dum multaj jarcentoj rakontadis pri ĉiuj ĉi mirindaĵoj. Sed ĉio ĉi finfine malaperas kaj ankaŭ tio, pri kio ni opinias, ke ni neniam povas ĝin forgesi.

### **La transloĝiĝo**

Nun ĉio estas tiel facile komprenebla, kaj pro kio troviĝas tiuj strangaj lagoj kaj ankaŭ kiel la katoj fariĝis tiel sanktaj bestoj ĉe la Valoa-anoj oriente laŭlonge de ĉiuj montoj kaj riveroj de Hindujo, ĉar la Mala Gamba poemoj tiel klare rakontas pri Milohaja, ke estas kvazaŭ li estus loĝinta en la plej proksima bieno al la nia kaj ni estus ĉiam povintaj rigardi lin el nia korto kaj Nardodd, lian edzinon, malaltan kaj dikan kaj konstante iradanta eksteren kaj internen kun io en la manoj.

Ili estis junaj kaj antaŭ nelonge geedziĝintaj, kiam ili transloĝiĝis de Kra en la Valoa-valon. La Kraanoj apenaŭ memoras tiujn geedzojn escepte de ilia staturo. Milohaja estis iom alta, malmulte intermiksita sin en la aferojn de la hejmo kaj malmulte parolis endome, ankaŭ ne bezonis tion, ĉar lia edzino diris ĉion, kion oni bezonis diri en la hejmo. Ŝi havis la decidon pri plej multaj aferoj, kaj ŝi decidis pri tio, ke ili finfine transloĝiĝis de tie al Valoa.

Sed la kaŭzo de tio estis, ke iun printempon ili aĉetis bovinon; ĝi estis multekosta, kaj oni diris, ke ĝi estas tre bona, sed ĝi montriĝis doni malmulte da butero, kaj preskaŭ ne venis lakto el unu el ĝiaj mampintoj, kaj tial ne estis io alia por fari ol repeli ĝin al la antaŭa posedanto, sed Nardodd ne fidis al sia edzo, ke li sufiĉe forte admonos lin kaj tial ŝi intencis mem fari tion.

Li ankaŭ sendube ricevis sian porcion da admonoj, kaj devas esti ke Nardodd tute malplenigis sin, ĉar alie ne povus troviĝi spaco en ŝi por tiel multe da laŭdo pri la beleco kaj boneco de la tero de la Valoa-valo kiel el ŝi fluis, kiam ŝi revenis hejmen. Tie la ŝafoj travadis la altan herbon, kiu atingis ĝis la mezo de ilia trunko, ŝi diris, kaj krome estis la arbaro kaj ŝirmo, kaj tie neniu kuraĝis loĝi pro sentaŭgeco kaj superstiĉo. Ili

loĝaĉas ĉi tie en kaduka bieneto en tiu malfekunda tereno, ŝi diris, sed en tiu fruktoĝardenon venas nur junaj ŝafoj kaj ĉevaloj.

Kelkajn tagojn poste Milohaja devis hufferumi ĉevalon kaj ekiri por rigardi la terenon. Montriĝis, ke Nardodd estis dirinta la veron pri la valo. Oni preskaŭ ne povis tro multe laŭdi ĝin. Ŝi estis plej multe admirinta la bonon de la tero, sed nun li plej multe miris pri la beleco, tian florornamon li neniam antaŭe vidis kaj apenaŭ estus ekpensinta, ke tiel varia beleco de floroj ekzistas sur tiu ĉi terglobo. La rivero serpentumis laŭ la herbejoj kaj la arbaretoj laŭ la altaĵetoj kaj supren laŭ la valetaj deklivoj, sed la spegule puraj lagetoj estis sub la deklivoj, kvar unuflanke sed unu ceterflanke, kaj ĉiuj ĝuste tie, kie estis la plej bela loko por bieno.

Estis ja vere. Estis nekomprenebla manko de energio igi ĉiun ĉi fekundecon esti neuzita, kvankam la valo estas ja iom izola. Unue li ekpensis, ke la vintra severeco estas la kaŭzo, sed tio ne eblis, ĉar aliaj valoj estis tie multe pli altaj, kiuj atingis multe pli norden kaj en la montojn. Li poste parolis pri tio kun siaj plej proksimaj najbaroj, kaj ĉiu el ili sciis la kaŭzon, ĉar la valon posedis Bondola kasa, unu el la plej malbonaj spiritoj, kiuj troviĝas en la tuta montaro. Kaj se Gulu, la reganto de la spiritoj kaj protektanto de la gregoj, ne estus ĉiam gardinta lin, tiam eĉ ne unu besto paŝus vivanta en la valon. Sed, diris la najbaroj de Milohaja, nun ili ne estas en danĝero tie, ĉar li ne kuraĝas tuŝi eĉ unu haron de iu besto pro Gulu. Sed neniu tamen ekpensus havi tie brutaron en somerpaŝtejo kaj des malpli starigi tie bienojn. Tion provis kvar viroj, sed Bondola kasa subterigis la bienojn kun ĉio, kio apartenis al ili, al plej profundaj abismoj, kaj tie troviĝas nun kvar lagoj en la okcidenta flanko de la valo, kie subteriĝis tiuj bienoj.

Fine tre lerta sorĉisto, kiu nenion timis, starigis al si bienon en la orienta flanko de la valo, kaj Bondola kasa agis tre malrapide kaj igis lin ordigi sian bienon laŭplaĉe, sed poste iu fremdulo komencis de tempo al tempo veni al li kaj demandi lin pri tio, kvazaŭ ŝerce, ĉu ne estus kurioza kaj stranga sento malsupreniĝi kune kun sia bieno en la teron kaj iom strange vidi brileti la taglumon tra tiu senfina, nigra fumtubo.

Kompreneble tio estis Bondola kasa mem kaj amuzis sin, incitante la viron. La viro verŝajne ankaŭ estis preskaŭ decidinta foriri pro instigo de siaj amikoj, sed poste

iun tagon ĉio estis malaperinta, la viro kaj la bieneto, kiam vojaĝanto iris tien, sed estis nigra kavo en la tero kaj nenio escepte de mallumo.

Ek de tiam jam forpasis 12 generacioj, kaj la kavo ankoraŭ ne estas plena kiel oni povis vidi, ĉar la akva surfaco estas plej malalta en ĝi, kaj tamen ĝi estas pli profunda ol ĉiuj la aliaj. Interne de la valaj interkrutejoj neniu homo plu konstruos por si bienon.

Tion ja diris la plej proksimaj najbaroj.

Milohaja konis Bondolan kasa kiel ĉiuj aliaj, tiun spiritaĉon, kiu estis la plej malbona el ĉiuj maliculoj kaj havis same grandan emon turmenti homojn kaj mortigi kiel havas knabino por iri al balo. Li ja ne opiniis, ke tio estas vera ĝis pli alta grado ol ordinaraj fabeloj, sed tamen ŝajnis al lia edzino, ke li estas kaptata de iu timo al la aĉulo kaj ke li tute ne montras tiel multe da entuziasmo pri la transloĝiĝo kiel li devus fari kiel mastro, kaj tio multobligis la entuziasmon de ŝi, tiel ke duobligis ŝiaj laboro kaj antaŭzorgo, kaj tiel entuziasme ŝi eklaboris pri tio ĉi, ke ili antaŭ la ordinaraj tagoj de transloĝiĝo jam estis transportintaj ĉiujn siajn posedaĵojn al Valoa kaj konstruintaj sufiĉe bonajn somerloĝejojn, kie plej bele estis en la valo, kaj tiel energia estis Nardodd, ke ŝi ne pli frue ĉesis persvadi siajn fraton kaj bofratinon ol ankaŭ ili estis transloĝiĝintaj tien kun siaj brutaro kaj infanoj, kvankam ili multe hezitis en tio.

Kaj la ŝanĝo de bienoj ne montriĝis esti al malbono, ĉar tie en Valoa la bofratinoj melkis siajn bovinojn trifoje ĉiutage dum la printempo, antaŭ ol iliaj amikinoj en Kra havis iun ajn kremon por siaj buterigiloj.

Ĉio ĉi komenciĝis feliĉe ĉe la bofratoj, kaj post du jaroj ili tiel bone ordigis siajn bienojn, ke jam plaĉis al ili. La ŝafinoj kaj kaprinoj disiĝis supren laŭ la deklivoj, multaj kaj sufiĉe dikaj kaj kolektis la nutraĵoriĉan herbon inter la arbetoj aŭ en herboriĉaj kavoj kaj en la eriksektoroj supre. La arbaro formis tie amasojn da arboj, arbetoj kaj zonoj en la deklivoj kaj oblikvaĵoj malsupre, sed sur la ebenaĵoj laŭlonge de riveroj kaj lagoj paŝtiĝis la azenoj, ĉevaloj kaj krome la bovinoj, kiuj estis kun longaj mamoj kaj maldiligente movis sin. Sed supre ĉe la lago sub la deklivo staris la biendomoj, belaj kaj bone prizorgitaj.

Estis kvazaŭ ĉiuj, kiuj tien iris, sentus, ke riĉeco kaj prospero baldaŭ ekestos tie. La timo al Bondola kasa malpliĝis kaj iom post iom foriĝis el la konscio de la homoj

kiel malbona sonĝo, kiu ĉesis varmigi la personon kaj jam fariĝis kvazaŭ sendanĝera fantomo, kiu estas formortonta.

La bofratoj ne estis loĝintaj tie pli ol du jarojn, kiam diversaj el iliaj malnovaj najbaroj el Kra ekpreparis sin por transloĝiĝi al ili, kaj du aŭ tri estus venintaj en tiu printempo, se malgranda okazaĵo ne estus malhelpinta tion.

### **La fremdulo**

Tiel okazis, ke Dadda, la plej aĝa filo de la bofrato de Milohaja, ilia sambienano venis iun tagon hejmen de la ŝafinoj malĝoja kaj maltrankvila kaj diris, ke iu vojaĝanto venis al li kaj iris kun li laŭ la deklivoj, demandis lin, kiel plaĉas al ili loĝi tie, kiel ili fartas kaj ankaŭ pri ilia stato ktp. kiel oni kutimis fari, ĝis kiam li subite demandis lin kvazaŭ rikanante, kiel li opinias ke plaĉus al li, se li iun tagon sentus, ke la bieno ekmoviĝus kune kun ĉiuj domanoj malsupren en la teron, kelkajn klaftojn aŭ simile kaj poste pli kaj pli malsupreniĝus, ĝis kiam oni nur iomete povus vidi la ĉielon tra senfina nigra fumtubo.

Dadda apenaŭ memoris, kion li respondis al la viro, sed diris, ke li havis senton, kvazaŭ li fariĝos malsana kaj ke li ekhavis tiel grandan antipaton al tiu viro, ke li volis liberiĝi de li kaj iri hejmen, sed tiam la viro turnis sin en saman direkton kaj akompanis lin preskaŭ al la bieno. Li fojon post fojo aludis al tio kaj demandis, ĉu li ne malsatus morti tiel juna ktp., kaj ĵus antaŭ ol li forlasis lin, li demandis, ĉu li iam aŭdis la nomon Bondola kasa. Al tio Dadda ne respondis kaj ekkuris rapide hejmen.

Dadda estis kapabla kaj inteligenta junulo, inter 13 kaj 14 jara, kaj ĉiuj kredis lian rakonton, kiu influis plej multajn escepte de Nardodd. Ŝi diris, ke tio certe estis iu envianto, kiu venis por timigi ilin kaj la infanojn kaj ke ili ne havu zorgojn pri tio kaj ne timu kaj ke estas plej bone igi tiajn personojn veni al la hejmo.

Milohaja multe ektimis pro tio ĉi kaj tamen ne igis aliajn multe rimarki tion, kaj li eĉ jam iom forgesis tion, kiam servisto de li, junulo, venis kun la sama rakonto hejmen el la arbaro; li diris, ke la viro venis tie al li kvazaŭ el unu arbeto kaj faris al li la saman demandon pri la fumtubo. Tiam la junulo demandis lin, pro kio li demandas pri tio aŭ ĉu li povas subterigi la bienon, kaj tiam la alia rikanis kaj diris, ke tio jam okazis ĉi tie antaŭe kaj povus facile okazi ankoraŭ. Pli klare li ne respondis al tio, sed iom



poste demandis la junulon, ĉu li foje aŭdis la nomon Bondola kasa, kaj al tio la junulo respondis jes, kaj tiam la alia faris grimacojn kaj ridis malvarme kaj poste denove foriris en la arbaron.

Laŭ la priskribo tio estis la sama viro, kiun Dadda renkontis, alta viro kaj dika, mezaĝa, kun tre malhela vizaĝo kun maldelikataj trajtoj kaj malbela nazo kaj povis direkti rigardon per blankaj okuloj rekte antaŭ si, kiam li rikanis.

Nun la timo forte atakis la domanojn kvazaŭ sorĉa neĝblovego kaj fariĝis tiel granda, ke la noktoj donis malmulte da ripozo al la domanoj; la bofratino malsaniĝis pro maldormo kaj angoro, kaj finfine la geedzoj foriris kun siaj infanoj kaj bovinoj en la printempo, sed lasis la domojn kaj eĉ parolis pri eventuala reveno.

Sed Nardodd ne multe kredis je tiu reveno. Ŝi diris, ke tiaj malkuraĝuloj ne meritas prosperon kaj ke devas okazi tio, kio okazos, ĉar ili ja havos la sorton morti pro sentaŭgeco, sed ke ŝiaj enviantoj havu ion alian por priridi ol ke ili timigos ŝin kaj ŝiajn hejmanojn tiel ke ili forlasos tiun ĉi lokon por reiri al la malsato kaj manko de vivrimedoj en Kra.

„Mi ja devus renkonti lin, tiun aĉulon, kiu snufadas ĉi tie en la ĉirkaŭaĵo kaj timigas vin,“ ŝi diris al la infanoj, „kaj provi, ĉu li venos la sekvantan tagon.“

Ŝi estis tiel kolera al siaj frato kaj bofratino pro la forrapido, ke ŝi eĉ diris erarojn pri ĉio ĉi, kio tamen okazis iom malofte al ŝi, sed tiel granda estis ŝia ĉagreno, ke ŝi elĵetigis la katon de siaj frato kaj bofratino, kiam ĝi venis al la doma pordo en la vespero post ilia foriro.

La kompatinda kato estis vaginta tra la domo maltrankvile kaj embarase, kiam oni komencis forporti la meblojn kaj litaĵojn, kaj kiam oni volis preni la katon, ĝi barakte liberigis sin el la manoj de la knabino kaj forvadis ien ajn kaj ne estis trovebla, kiam la karavano ekiris. Sed kiam ĝi revenis hejmen, la mastrino akceptis ĝin tiamaniere kaj diris, ke ĝi iru post siaj gemastroj kaj ke tio estas pli bona por ĝi ol igi subterigi sin kiel ili.

La kato ŝteliris for kaj kaŝis sin, sed Nardodd forte skrapis la kaĉopoton kaj ĵetis la skrapaĵojn en la cindrujon kaj blasfemis pri tiu aŭ tiuj, kiu fortimigis ŝian fraton, kaj diris kiel pli ofte, ke li devus renkonti ŝin, tiu aĉulo.

Tion li ankaŭ faris kaj ne longan tempon poste, kaj tiam ne estis kribrita nek mezurita en buŝplenoj tio, kion li ricevis super sin.

„Mi povus vidi vin mem subterigata kaj bolantan gudron verŝata en la kavon post vi,“ diris la virino. „Subterigu la bienon tuj, se vi povas kaj estas io pli ol la fanfarono kaj kalumnio, vi aŭ Bondola kasa,“ diris Nardodd kaj multe pli ne malpli forta, kaj ŝi verŝegis super lin blasfemojn kaj vortojn de spitado de kiam li venis al ŝi ĉe la lago, kie ŝi estis lavanta, ĝis kiam li foriris. Li eĉ apenaŭ povis mencii la nigran fumtubon, kaj tiam li tuj ricevis la verŝegon super sin. Li faris iom da grimacoj kaj rikanis, sed ŝi ne multe atentis pri tio. Li evidente ne estis atendinta tian akcepton kaj iom hontis kaj diris forirante, nur por diri ion, ke li venis por igi ŝin lin vidi, por ke ŝi sciu, kiu li estas, se ŝi foje vidos lin sur la ekstremo de tiu fumtubo.

„Ke vi subterigos nin,“ diris Nardodd, „mirinde, ke la hundoj ne rajdas en selo!“

Tio estis la salutoj, kaj la mastrino estis eksterordinare gaja kaj babilema, kiam la domanoj revenis hejmen post la forlanigo de la ŝafoj, kaj ŝi rakontis al ili, ke ŝi renkontis la aĉulon kaj sufiĉe forte insultis lin. Sed ŝia edzo kaj la aliaj domanoj tre ektimis aŭdinte tiun rakonton, kaj la infanoj ne volis manĝi eĉ unu peceton en la vespero, kaj tiam ilia patro diris, ke kvankam tio nur estus pro la infanoj, li jam findecidis foriri de ĉi tie, eĉ jam iun proksiman tagon, ĉar li diris, ke li ne volas, ke la infanoj perdu sian mensan aŭ korpan sanon pro kelkaj kaprokapoj aŭ buterpecoj.

### **Bondola kasa**

Pro tio ĉi fariĝis granda kverelo inter la geedzoj, ĉar kvankam la virino suspektis, ke ŝia edzo jam havas ideon pri foriro, ŝi pensis, ke li neniam kuraĝos malkaŝe diri tion, kaj diris fine, ke li povas tiam iri kun la infanoj kaj ke estas plej bone, ke ŝi subteriĝu sola kune kun la kabanoj kaj ke estus ja plej malmulte da perdo, se ŝi pereus. Al tio ŝia edzo ne respondis, kaj fariĝis silento, kaj oni iris por dormi, kaj estis kvazaŭ faciliĝus al ĉiuj havi okazon foriri kaj eĉ al Nardodd ankaŭ, kaj tamen sole pro la infanoj.

Sed en la sekvanta mateno okazis, ke ili ĉiuj vekiĝis pro tio, ke Gogo, ilia maljuna hundo eksaltis supren murmurante kaj bojante kaj rigardis al la pordo, sed ĉe la mato, kiu pendis antaŭ la pordo, aperis kapo, treege malbela, kaj rikanis al ili tiel

malice, ke ili ĉiuj kvazaŭ perdis la forton pro timo. Neniu dubis pri tio, ke tie jam troviĝas Bondola kasa kaj kio nun atendas ilin. Sed ŝajnis, ke li iom ektimis, kiam li vidis la hundon, kaj la spirito rigardis ĝin tiel terure akre, ke la hundo ektimis kaj malantaŭeniris, sed la kapaĉo malaperis. Sed tre baldaŭ la mato estis forigata kaj en la pordo aperis viro kun tute freŝa kapra krurosto en la mano kaj volis ellogi la hundon al si.

Tio estis la plej ŝatata manĝaĵo de kompatinda Gogo, sed la viro ja estis fremda kaj la hundo ankoraŭ kaptita de timo, kaj krom tio Milohaja suspektis, ke tio estas Bondola kasa en formo de nova figuro kaj ke li pro Gulu neniel kuraĝas subterigi la hundon kun ili. Milohaja tial logis la hundon al si, kaj tion la hundo preferis kaj iris al la lito de sia mastro kaj tamen bedaŭris perdi la viandoston.

Tiam la viro kun la osto eliris sen ion diri, sed baldaŭ malgranda, bruna hundo aperis en la porda aperturo, flaradis kaj eliris denove bojante. Kontraŭ tio Gogo ne povis rezisti, kaj ĝi kuregis el la malfermita pordo, antaŭ ol la domanoj orientis sin pri tio ĉi kaj antaŭ ol Milohaja sukcesis kapti la hundon.

Nun Milohaja jam orientis sin pri la situacio, kaj la danĝero donis al li tiom da forto, ke li salte ekleviĝis kaj vokis al sia edzino, al la pli aĝaj infanoj, al la servisto kaj servistinoj, ke ili forsavu sin el la domo, sed kaptis mem unu el la du plej junaj infanoj, sed lia edzino kaptis la alian, kaj ili sukcesis kuri al la balkono. Tie estis granda spaco, kie oni dum la plimulto de la tago restas en la somera varmo, sed supre la balkono estis kovrita per tolaĵoj. Sed pli longan distancon ili ne sukcesis fuĝi, ĉar sammomente Bondola kasa jam troviĝis en la porda aperturo en sia plej malbela formo, kaj ili forkuris en la domon preskaŭ frenezaj pro timo.

Sed nun Bondola kasa ekparolis en tiel incita voĉo, ke li fariĝis preskaŭ pli terura ol antaŭe kaj diris:

„Terure vi rapidas. Vi devas prefere proponi al la posedanto de la tereno, kiun vi utiligas, eniri en la domon por trinki iomete da akvo; li ja permesis al vi loĝi ĉi tie du jarojn sen postuli iun lupagon de vi kaj ne intencas preni iun alian pagon ol rigardi vin por plezuro mallongan tempon, nur por vidi, kiel plaĉos al vi malgranda ŝanĝo, kiun li volas fari ĉi tie al sia posedaĵo, la saman kiun li faris al siaj farmantoj ĉi tie antaŭe. Nu, estu nun trankvilaj intertempe, la kadukuloj.“

La spirito tamen agis tre malrapide, ordigis sin sur la kovrilo en la koridoro, ekbruligis sian pipon, kaj poste li diris:

„Do, jen, nun komenciĝas la plezuro,“ kaj samtempe la domoj ekmoviĝis kaj malrapide malsupreniĝis en la teron. Estis teruraj momentoj, kiam la fenestroj malleviĝis kaj iom post iom kovriĝis.

La servisto, servistinoj kaj plej aĝa infano kuŝis en siaj litoj, kvazaŭ ili estus apatiaj aŭ ne sciis, kio okazas. Milohaja estis haltinta ĉe la pordo kun unu el la du plej junaj infanoj en la brakoj, sed Nardodd klinis sin en la lito super la plej juna.

Subite estis kvazaŭ ŝi akirus novan forton, kiam la fenestroj estis malaperantaj; ŝi suprensaltis kun la infano, preterkuris sian edzon al la koridoro, fleksiĝis tie sur ambaŭ siajn genuojn antaŭ la spirito kaj plorante petegis lin per kortuŝaj vortoj indulgi la infanojn, ĉar ili estas ja senkulpaj, kaj ne fari tiun malpian fiagon.

„Estu iomete pli trankvila, karulino,“ diris Bondola kasa, „vi ja ankoraŭ ne havis multe da ĝeno, sed povas esti, ke vi iom baldaŭ orientos vin pri tio, ke vi devus esti pli afable akceptinta min hieraŭ, kiam mi venis je la tria fojo por averti vin. Ne ĉiuj posedantoj de bienoj tiel ĝentile forigas siajn farmantojn, ke ili trifoje avertas ilin, kaj la infanoj, mia kara, ili ne koncernas min, vi ja estas tiu, al kiu ili devas danki ĉion ĉi, do, tio estas afero inter vi kaj ili.“

Tion diris la spirito kaj fie ridetis, tiel ke terure estis tion rigardi, kaj tie li kuŝis kaj fumis kiel eble plej plezure kaj rigardis de tempo al tempo al la aliaj kvazaŭ por amuzi sin per ilia angoro. Sed ĝuste kiam la tegmentaj fenestroj estis malaperantaj, li ekstaris, streĉis la kapon el la koridoro, forigis la lignan tegmenton de la domo ĉe tiu flanko dirante:

„Vi devas ja tamen havi okazon vidi la fumtubon, infanoj, kiel mi promesis al vi.“

Tiam fariĝis denove hele en la domo, kaj tiam ŝajnis esti tri klaftoj ĝis la tersurfaca ekstremo. Tiel profunden la domo malleviĝis en tiuj momentoj, kiuj estis pasintaj, ĉar ĉio ĉi okazis pli rapide ol oni povas ĝin rakonti.

En la momento kiam lumiĝis en la domo aperis malgranda infankapo de sub la kovrilo en la infana lito. Estis la malgranda knabino Dodi, kiu estis inter kvin kaj ses jara. Ŝi estis ektiminta, aŭdante la petegojn kaj plorsingulton de sia patrino, prefere ol ke

ŝi komprenis, kiu danĝero minacas ilin, kaj ne estis malpli scivolo ol timo en ŝia rigardo. Sed apud ŝia vango aperis samtempe kapo de kato de sub la kovrilo, kaj la kato elrampis de tie ĝuste en la momento, kiam la spirito enrigardis al ili kaj estis memoriganta ilin pri la nigra fumtubo.

Li tuj ekvidis la katon, kaj neniuj kredus tion, kiel lia tuta vizaĝo povis ŝanĝiĝi en unu momento. Li subite fariĝis tiel humilmiena kiel subigita infano kaj diris, kvazaŭ li estus parolanta al si mem:

„Mi humile petas vin pardoni al mi, ĉiopova kaj ĉion scianta Gulu, mi ja ne tuŝos eĉ unu haron sur ĝi. Tio okazis tute sen mia scio.“

En la sama momento Bondola kasa streĉis sin supren kaj li tiel longiĝis, ke li atingis per ambaŭ manoj al la rando de la fumtubo kaj ŝajnis premi ĝin kaj samtempe iom suprenlevi sin, kaj tiam okazis, ke la domoj tuj leviĝis al la tersurfaca nivelo.

Nun li komencis ellogi la katon el la domo diversmaniere per peco da fiŝo kaj aliaj manĝaĵoj, kiujn ĝi plej ŝatis, kaj fine li ŝanĝis sin en figuron de pasero kaj flugis eksteren kaj internen tra la koridoro, kaj tiam la kato saltis ĝis la sojlo, sed tute ne eblis forlogi ĝin pli longan distancon, ĉar tuj kiam la pasero flugis eksteren, la kato iris denove en la liton de sia amikino kaj jen lekis sin jen oscedis kaj daŭre sidis. Tiam Milohaja ankoraŭ leviĝis kaj intencis uzi la okazon por kuri eksteren, sed Bondola kasa tuj venis kaj puŝegis lin tiel krude malantaŭen, ke tiu eliro estis finita. Tiam jam foriĝis de la spirito ĉia rideto, kaj li aspektis tiel terure, ke la indigno kaj kolereco radiis de li.

„Vi pensas, ke tio savos vin, viaj aĉuloj,“ li diris, „vi tamen vidus tion, ĉar vi ja ĉiuj malsupreniĝos kaj ne malpli pro tio ĉi.“

En la sama momento la spirito estis malaperinta, sed muso kuris laŭlonge de la planko al la direkto eksteren; la kato jam ekvidis ĝin, kaj nun ĝi ne rigardis oscede, sed ĝi agis tre malrapide, kvazaŭ ĝi tute ne intencus okupi sin pri ĝi aŭ atendus, ke la muso malrapidigus la kuradon. Tion la muso ankaŭ faris, ĉar ĝi iris des pli malrapide ju pli ĝi alproksimiĝis al la pordo kaj eĉ momente haltis ĉe la rando de la mato. Sed tion ĝi ne devus esti farinta, ĉar en la sama momento la kato kuregis al la pordo kaj en la pordan aperturon mem, kaj tie ĝi enhakis ungon en la muson ĉe spaceto egala al mana larĝeco, kiu mankis al tio, ke la domo estu en la nivelo de la tersurfaco kiel antaŭe.

Sed jen okazis io stranga, ĉar estis kvazaŭ la kato estus mordinta pecon da ardaĵo, ĉar ĝi ĵetegis la muson el la buŝo kaj komencis snufegi kaj eligi ŝaŭmon el la buŝo kaj rigardis malĝoje, sed la musa kadavro estis malaperinta, kaj post tio neniu vidis ĝin kaj ankaŭ ne Bondolan kasa. Sed estas konate, ke se spiritoj ŝanĝas sin al figuro de iu besto kaj se tiu besto estas mortigata, tiam ili ja ne mortas, ĉar ili ne havas tiun naturon, sed ili restas poste en la figuro de tiu besto ĝis la fino de la mondo, kaj tiel estas ankaŭ pri Bondola kasa, kaj kelkfoje oni vidis muson, kiu estis tre klinita antaŭe, kaj tio estas la malbela kaj kruela Bondola kasa.

Pasis iom da tempo antaŭ ol la domanoj orientis sin pri la okazaĵo kaj ke ili jam liberiĝis de ĉia danĝero, sed mallongan tempon poste ĉiuj eliris sur verdan herbejon kaj laŭdis la feliĉon plorante pro ĝojo pro la liberiĝo de tiu monstraĉo.

Ĉiuj volis tuj iri al malgranda Dodi por ĉirkaŭbraki ŝin, kaj ŝi devis sepfoje rakonti tion, kiel la kato rampis al ŝi sub la kovrilon en la vespero kiam ŝiaj gepatroj estis kverelantaj, kaj ŝi kaŝe donis al ĝi peceton de sia fiŝo kaj ĉirkaŭbrakis ĝin kvazaŭ konsolanton dum la timo kaj maltrankvileco, de kiuj ĉiuj estis kaptitaj kaj sukcesis endormiĝi kun la manoj ĉirkaŭ ĝi.

Oni ankaŭ ne forgesis beni Gulun, la indulgeman protektanton de la gregoj, kaj promesi al li montri helpemon kaj indulgon al ĉiuj bestoj.

Sed plej bone oni memoris pri la kato. Ĉiun fojon kiam la maljuna Nardodd rakontis pri la afero, ŝi ploris pro tio, kiel krude ŝi elĵetis la katon en la vespero antaŭ la mirindaj okazaĵoj, kiam ĝi serĉis ŝirmon en la domo, kaj ŝi konfesis tion kun granda bedaŭro, kiel malbone ŝi estis ĉiam traktinta ĉiujn katojn kaj insulteginta ilin pro perfido, malfideleco kaj malbona naturo, sed laŭdeginta la fidelecon de la hundo, kiu neniam perfidas. Nun ĝuste la fideleco kaj persisto de la kato savis ilin ĉiujn, kiam homoj kaj hundoj ne taŭgis. Kaj tiuj paroladoj ĉiam finiĝis per tio, ke Nardodd iris al la provizejo kaj prenis la kremon de la supraĵo de unu angulo de unu laktotrogo kaj metis ĝin en la tason de la kato.

Tiamaniere ĉiuj traktis la katon, kaj ĝi estis ĉiam post tio ĉi tre honorata kiel protektanto de la domo kaj ricevis abunde da ĉiaj bonoj, kiujn ĝi povis ĝui ĝis la fino de sia vivo, sed longe oni vidis sur ĝi postsignojn post sia luktado kun Bondola kasa, ĉar

estis kvazaŭ la tuta buŝo de ĝi estis brulumiĝinta interne, kaj longe ĝi devis multe peni por lektrinki sian lakton, sed tamen tio finfine pliboniĝis. Kaj neniu kato, pri kiu troviĝas rakontoj, fariĝis tiel fama, ĉar oni venis por vidi la katon kaj de la maro en sudo kaj el oriento de Tar, Ĉung kvo kaj Ĉaho-sin.

Okupis iom da tempo, ke la maltrankvileco de Nardodd kaj de ili ĉiuj tute malaperu, sed tamen Milohaja decidis, ke ili restis tie en Valoa, kaj finfine venis lia bofrato kaj multaj aliaj, kiam ili vidis, kiel multege da riĉaĵoj Milohaja sukcesis kolekti tie kaj kiel fidela la feliĉo estis al li. Ĉiuj rigardis lin la ĉefo de la regiono, kaj oni neniam forgesis lian aventuron, ĉar oni ankaŭ longe vidis la randon ĉirkaŭ la domoj, kie mankis al la nivelo de la tera surfaco.

Sed plej bone oni memoris la katon, kaj plej multe oni dankis al ĝi, ĉar ĉiu hejmo en la valo havis tiaspecajn protektantojn, kaj la katoj ĝuis tie specialan favoron kaj ĉiam poste ĝuis tion, kaj ĉiu infano povas rakonti tion, ke la amikoj rifuĝis, eĉ la hunda fideleco ne rezistis kaj igis sin forlogi, sed la kato plej bone rezistis, ĝia fideleco al la malnova loĝejo estis plej sincera kaj la tuta temperamento plej firma.

La Mala Gamba poemoj rakontas, ke tiaj estas katoj ankaŭ en aliaj landoj, sed ke tiel malmultaj homoj atentis pri tio, escepte se oni de tempo al tempo rakontas al ili pri tio ekzemple similajn rakontojn al tiu ĉi.

*(Ólafur S. Magnússon, Voĉo de Islando, 1959.)*

## **Stephan G. Stephansson:**

### **Mara magio**

Sur ondar' blankiĝas barb',  
flagras haroj torde,  
brilojn faras luma garb',  
plaŭdas maro borde.

Spronas min el borda seĝ'  
ŝvela sin' min lanĉi,  
kun filinoj de marreĝ'  
ŝipofine danci.

Sub ĉielo de minac'  
ni ekvelu brave,  
dancu bele laŭ surfac'  
ondoŝvela kave.

Ventpelataj ondoj sin  
ĵetas batoprete  
al boat' kaj lekas min  
sur manplat' kokete.

Stangoŝove kreskas vent',  
maron blov' stimulas,  
ondojn bone en torent'  
frida povo rulas.

Al haven' mi lasas min,  
ondoplen' min puŝas.  
Mara ben', en via sin'  
kun seren' mi kuŝas.

Maston stringas venta lang',  
sonas klinga velo,  
voĉojn svingas el la stang'  
ŝtormofingra pelo.

Jen falango de malsek'  
kontraŭ sang' aŭrora.  
Benu vangon via lek'  
ondo langfervora.

*(Baldur Ragnarsson)*

## Ĉu trans ter' aŭ ĉielo

Ĉu trans ter' aŭ ĉielo  
flugas via pensar',  
vin en revo sorĉadas  
la islanda montar'.  
Vi posedas insulon  
je la mar-ekstremaj',  
printemplandon sennoktan,  
kun la bel-transvidaĵ'.

*(Óskar Ingimarsson, Paco febr. 1955.)*



## El Paŭzo de batalo

Kelkajn horojn ĉesis la pafado,  
dum rezisto kaj atako haltis.  
Por kadavroj ambaŭ partoj devis  
fari paŭzon en la hombuĉado.  
Ne atingis unu la alian,  
pro amasoj de la mortigitoj.  
Neirebla estis la kaoso  
de kadavroj tute putriĝantaj,  
kie formikaroj daŭre festis.

Oni tial faris batalhalton  
kelkajn horojn por la purigado.  
Tiam ree oni ekbatalu  
ĝis la fin', sur ordigita kampo,  
restu dume en la sama loko  
ĉiu peco en la buĉa ŝako.  
Inter plej antaŭaj batalantoj  
paroleble estis trans la kampo.  
Unuflanke inter arbetoj  
sin levigis laca atakanto.  
Sangan malpuraĵon li kraĉadis  
dum la kugloj flugis ĉiuloke.  
Tutan nokton kuŝis en la koto  
en malvarm' aŭtuna duonmorta.

Ĝojis li en sia junuleco  
ree vidi pacon kaj sunbrilon.

Aliflanke aĝa defendisto  
ekrigardis supron de l'tranĉeo.  
En malsekaj vestoj, sangmakulaj,  
mem li tamen estis nevundita.

Kuŝis li dum longaj tagonoktoj,  
sola inter putraj faligitoj.  
Dekstre: lia juna filo morta  
kaj maldekstre lia veramiko,  
lin ĉirkaŭis odoraĉaj korpoj,  
sible flugis densaj elsputiloj.

Nun li tempon havis por sidiĝi  
kaj piedojn siajn elstreĉigi  
sur la rand' de sia propra tombo.

Al la viro kiun nun li vidis,  
al kruela, fremda malamiko,  
kiu penis preni lian vivon  
kaj mortigis eble lian filon,  
kunulece tamen li salutis,  
ĉar li estis kiel kamarado,  
de la sama malo suferanta.

„Bonan tagon, kara kamarado,  
la ripozo faras al ni bonon“,  
diris li en lia nacilingvo.

Kiam tiel gaja la alia  
aŭdi soni sian propran lingvon  
tuj heliĝis liaj junaj vangoj.  
Kaj la vortoj iĝis pli kortuŝaj  
pro l'akcento de la stranga voĉo,  
kiu havis la distritan sonon  
de malofte parolata lingvo,  
plejokaze de la pliaĝuloj.  
Kiel ofte faras la infanoj,  
imitante vortojn plenkreskulajn.

„Mi per bondeziroj“, li respondis,  
„vin salutas, malamik' antaŭe,  
patro nun.“

„Mi tuj vin nomu filo,  
ĉar vi min per patra nom' salutas.  
Tamen sole mia filo estas  
tiu, kiu ĉi apud mi kuŝas  
morta en la tombo de ni ambaŭ.  
Ne signifas tio, ke ni estas  
malamikoj.“

„Dum la batalhalto,  
al vi, maljunulo, defendanta  
tiel bone vian patrolandon,  
riverencas mi, la malamiko.“

„Ne meritas tion mia ago.  
Mi ne havas pecon de patrujo!  
Ne por ĝi mi portas la pafilon.  
Dum jarcentoj mia familio  
estas nur dungitoj, sen havaĵo.  
Iu diktatoro de la lando

rabis de ni niajn posedaĵojn,  
kaj nobelon sian ĉion donis  
por heredi. Tion oni diras.

Certe restas hejme mia mastro  
sen danĝero, dum mi bataladas  
tie ĉi kaj perdas miajn filojn.  
Ĉu la patran hejmon vi defendas?“

„Patran, ne, ĉar loĝas mi en urbo,  
merkataĵo estas nur de tiuj,  
kiuj regas prezon kaj laboron  
kaj posedas ĉiujn laborilojn.

Vi senpense ekmilitis, patro,  
pro la batalem' de via lando,  
al ĝi mankas pacaj batalantoj  
kiel havas ni. Ĉar nialande  
estas multaj pacopredikantoj,  
alvokante Dion per donacoj.“

„Ne batalas mi, ĉar al ni mankas  
pacpromesoj tute sen plenumo, –  
ni ja estis inter la unuaj  
por ricevi Nobel-pacpremion.  
Tamen kiel krudan domrabiston  
ni mortigis nian paciganton.  
Tiu, kiu sole estis fama  
pro riĉeco, nia riĉularo,  
montrompante ĝiajn alfidulojn,  
maljunaĝaj tute pacemiĝis,  
por ke ne la vera humaneco  
forgesigu ĝian vivofaron.

Nu ĝi ŝanĝis sian opinion,  
diras, ke nur estas plejnatura  
la milito, kaj la finatesto  
pri fidelo ĝia al la paco.  
Eble viaj pacoparolantoj  
ne agadis tiel kontraŭvorte?“

„Same por ni taŭgis la poetoj.  
Ili faris kantojn pri la paco,  
akordiĝo, amo inter homoj,  
– de kristanoj tre uzataj vortoj. –  
Sed kriadis tuj la militkantojn,

kiam tondris la unua pafo;  
ĝis en landoj dise tra la mondo  
kunkriadis ĉiuj poetaĉoj.  
Militinstigantoj, kiuj solaj  
dum jardekoj vane agitadis,  
je la novaj, militemaj kantoj  
pro kontento preskaŭ silentiĝis.

Nialande estas maljunulo,  
dediĉante sian tutan vivon  
al l'afero de la laboristoj,  
la malriĉaj mondoprizorgantoj,  
postulante pacon, liberecon.  
Lin malamis, mokis la granduloj,  
tamen li fidele bataladis  
por neigi tian frenezajon.  
Nia devo estis lin subteni,  
sed obstine kun levitaj pugnoj  
ni ekscite kriis: Vi silentu!

Tio estis por li katastrofo;  
maljunaĝa, distra suferanto,  
sola vagas li sur tomba rando.

Oni diras, ke preĝejojn viajn  
difektigas nova nekredco,  
malefika estas l'eklezio  
kontraŭ via forta pajenismo.  
Ĉu vin, patro, tiu cirkonstanco  
pelis al milito senvolonte?"

„Ne pro jenaj kaŭzoj mi batalas.  
Samflankitaj en la kruciradon  
tutkonsente iras du partioj:  
la kristanoj kaj la nekreduloj.  
Niaj pastroj preskaŭ unuvoce  
laŭtpredikas uzon de armiloj –  
kiel mia propra paroĥestro;  
kiu en predikoj dumkristnaskaj  
kvindek jarojn pacon fanfaradis,  
dum neniu iris al batalo.  
Kiam sonis tra la tuta mondo  
la unua krio de l'milito,  
tiu sama, paca paroĥestro  
laŭte vokis homojn al batalo  
por defendi kredon kaj moralon.

Li nomigis ĉiujn nevolantojn  
perfidulojn al la kristanismo.

Povas esti, ke en via lando  
eklezio sankta kaj potenca  
la armilojn tute malakrigas.“

„Ne, ĉar estas eta diferenco  
inter ĝia solvo kaj la via.  
Ĝiaj pastroj, patroj de kristanoj,  
mem armitaj falis en batalo.  
eĉ la sankta moŝto nialande  
ĉefo de l’popolo dikredanta,  
li laŭdire en la procesio  
portis la idolojn plej famigajn,  
sur genuoj tiel li sanktigis  
regimenton al batal’ irantan.  
Oni diras, ke la ateistoj  
nun fariĝas veraj dikredantoj,  
kaj preĝejoj staras tute plenaj  
de popolo, kiu laŭte pentas.

Ĉu vi eble iris en batalon  
esperante pian restarigon?“

„Jam sanktigis nia eklezio  
la armilojn – miajn kaj aliajn,  
sed mi mem ne estas perpleksita  
pro la vanaj krioj de pentado.  
Ĉu mi serĉu mian rifuĝejon  
for de homa paco kaj frateco,  
en la sin’ de dumiljara kredo,  
kiu nin reformis tiel bone  
kiel jen atestas nia kampo?  
Ĉar la sperto estas plej verdira.

Sed laŭ leĝoj en patrujo mia  
vizitadis mi la murdlernejon;  
ĝi ne estis por mi diferenta,  
ni devige studas hombuĉadon.  
Post incito de militaj faroj  
mi ordone estis enskribita.  
Pro perfido ĉiu rifuzanto  
tuj kondamne estis mortpafita.

Ĉar mi estas patro de infanoj,

mi preferis iri al batalo.  
Tie oni ofte trovas savon,  
sed neniam en milita juĝo.

Vi plej certe estis enskribita  
sen devigo, kiel volontulo?“

„Ŝajne estas mia partopreno  
el similaj kaŭzoj devenita.  
Mialande estis oftaj strikoj,  
altaj kostoj, manko de laboro.  
Superfluis ĉio ekster mono,  
la malsaton kaŭzis tromulteco.  
Kreditoroj en la tuta mondo  
sciis la ruzecon diplomatan:  
daŭre ekspluati la popolon,  
kaj infanojn jam nenaskiĝitajn  
katenigi kiel ŝuldkaptivoj  
por profito certa al mondfino.

Vidu jen l'unuan antaŭsignon  
de milito: manko de multeco.  
Preskaŭ ĉiuj tamen ne atentis.

Cedis tuj al arma fabrikado  
la uzinoj pace okupataj  
por prizorgi homajn bezonaĵojn.  
Mia sorto estis senlaboro.  
Niaj majstroj tamen duonpagon  
tuj promesis al dungitoj siaj,  
se volonte ili foreniru  
por batale savi la patrujon.  
Mi nur vidis tiun vivrimedon,  
ĉar la ŝtato pagas al soldato,  
kaj subteni devis mi la panjon.  
Vidvin' soldata estas ŝi dumlonge,  
mia patro el milit' antaŭa  
hejmenvenis laca kaj vundita.

Falspromese lian pensionon  
prenis for ŝparanta registaro,  
ĉar atingis mi la junulecon  
kaj prizorgo estis mia loto.

Sed dum vivas mi kaj batalpovas,  
ne al panjo mankas monsubteno;

ĉar la ŝtato povas ne komence  
endangeri tiel la prestiĝon,  
dum ĝi varbas milojn por batali.  
Se ne volas iu enskribiĝi  
kaj hezitas, li suferi devas  
malestimon de la hejmrestantoj;  
ĝi tormentas plej la junan homon.

Pro bezono mi kun vi batalas,  
sed armilon prenis vi laŭleĝe.  
Oni diras, ke monarko via  
ekbruligis la militan flamon.“

*(Óskar Ingimarsson, Paco, febr. 1955 kaj feb.-mar. 1962)*

## **Káinn (Kristján N. Júlíus)**

### **La regemulo**

El longa sperto lernis tion mi,  
en dormo lasi ĉion nur al Di'.  
Sed maldormante emas mi memfidi,  
kaj mem por ambaŭ volas ja decidi.

*(Baldvin B. Skaftfell)*

## **Nova lulilkanto**

Iru dormi infaneto mia,  
eksilentu la buŝaĉo via.  
Ne montru la diablan fi-obstinon!  
Honoru vian patron kaj patrinon.

*(Baldvin B. Skaftfell)*

## **Örn Arnarson:**

### **Tiam mi estis juna**

Bubo paŭperulo  
plankon pene tretis  
tiu etblondul',  
tie en angulo  
paŝe li stumpletis,

amikmanka ul'.  
Li ricevis malmult-taksan diron.  
Lia manĝoemo vekis miron.  
La kompat' patrin' de vi  
kaj am' al mi  
helpis al mi ekiron.

Larmoj vangojn lavis,  
ĝojon vekis multo,  
salto de etul'.  
– Mi junaĝon havis. –  
„Aĉa brutumulto“,  
kriis maljunul'.  
Ŝajnis ke neniu ajn komprenis  
takson, kiun infanmond' entenis.  
Al vi, panjo, fuĝis mi,  
ĉar mild' de vi  
ĉion tuj divenis.

Trut'en rivereto,  
sur paŝteĵ' pluvio,  
verda herb' kaj ber',  
arane' en reto,  
mev' kaj numenio,  
mar' ĉiel' kaj ter'.  
Tiu mirindaĵo ravis plene,  
tion ĉi mi primeditis pene.  
Panjo, vin demandis mi  
kaj mild' de vi  
helpis min diveni.

Ĉe markolo bela  
– maron tre admiris –  
sola restis mi.  
Al revad' fidela  
laca hejmeniris  
je vesperradi'.  
Via amo ĉion faciligis,  
tagan pezon mian vi senigis.  
Al vi panjo venis mi,  
indulg' de vi  
kore min dormigis.

Multon fari devis  
man' ĝis troa grado,  
laca pro labor'.



Absorbato revis,  
ofte pro pensado  
forgesiĝis hor'.  
„Malfervor' kaj mank' de em' malbonis.“  
Tiel ĉiam la parolo sonis,  
krome nur patrin' de mi,  
indulg' de vi  
la revanton konis.

Aŭdis mi resoni  
dorme kaj maldorme  
inda melodi'.  
Versojn emis koni  
kaj lirikon forme,  
strofojn verkis mi.  
Tio ne pliigis famon mian,  
ĉar mallaŭdis ĉiuj agon tian.  
Estis panjo ŝirm de mi,  
indulg' de vi  
instigis filon vian.

Vokas viva forto.  
La cindrul' leviĝas  
el la cindrokav',  
revas pri bonsorto,  
ĉien malfermiĝas  
vojo de la rav'.  
– Ofte mankis ŝirmoj kiuj bonis,  
ec se via kor' rimedojn donis.  
De patrin' foriris mi,  
sed mild' de vi  
mian vivon kronis.

Mi maljuna estas,  
multo malutilas,  
baldaŭ sunsubir'.  
Vund' malnova restas,  
tamen ade brilas  
longa vivoir'.  
Enlitiĝi estas nun konvene,  
post irado mi ripozos plene.  
Panjo, tiam volus mi  
ke mild' de vi  
min dormigus bene.

*(Stefán Sigurðsson, Agorde, 1991.)*

## Multe kostas

Multe kostas tersekur',  
se ni veron diras,  
ke post longa vivo nur  
tombon ni akiras.

*(Stefán Sigurðsson, Agorde, 1991.)*

## Maro, blua maro

Maro, blua maro, menson logas,  
kio estas trans la horizont'?'  
Tien rekta vojo emon vokas,  
al la land' de mia revo-font'.  
En la velo vent'  
por vigliga sent',  
plu rapidu ŝip' tra ond'.  
Kuru velo ŝvele  
for de l' bordo cele,  
antaŭ pru' ĉiel' kaj maro-mond'.

*(Baldur Ragnarsson)*

## Jakob Thorarensen:

### Renaskiĝo

Li enigis ŝtonojn en siajn poŝojn kaj sin deponis al rezigno kaj necerteco.

La vivo ne plu havis valoron; la espero de restariĝo estis nur abomena sedimento en la animo – nuraj mensogoj de la biersedimentoj kaj nenio alia. Kaj se li foje estis „normala“, kiel oni nomis tion – ŝajnis al li, ke ĉiuj muskoloj kaj nervoj severe akuzis lin pro persista interrilato kun la veneno, kvankam la organoj plie postulis, ke li daŭrigu.

Ŝajnis al li, ke ĉio estis neebla. Se li iutage kuraĝigis sin kaj volis aliĝi al grupo de sanaj, agantaj homoj, neniu laboro estis havebla. Ŝajnis, ke ĉiuj malŝatis kaj malfidis lin la lastajn monatojn. – „Labori! Nu, vi estas tiel aspektanta, kamarado!“ unu de la laborestroj ekzemple diris al li antaŭ nelonge. Kaj alia snufis tabakon kaj tute ne respondis.

Ankaŭ Gudfinna, la servistino en la plej supra etaĝo, kie li loĝis, ne plibonigis la aferon. Ŝi insultegis lin preskaŭ ĉiam, kiam ŝi ekvidis lin en la koridoro, kiam li venis hejmen aŭ iris for de la hejmo, – ŝajnis, ke ŝi ne toleris la odoron, ekscitiĝis pro la malbonodoro. Kaj se li estis tro malmulte ebria, li tre ofte sentis tiom da troinklino en la animo, ke li ektiriĝis for de la maliceco – kvazaŭ li timis la balailon kaj la lavsitelon.

Antaŭ proksimume du jaroj Finna estis ŝtonsilenta kaj sincere liveris liajn ŝuojn, brile brositajn, ĉiun dimanĉmatenon. Li ankaŭ estis direktilisto tiatempe, iomete pli honorama kaj pli zorgema pri la vinoj, kaj lia konduto estis pli ĝentila.

Li subaŭdis, ke li estas nomita Simbi „ĉiamebria“ – ankoraŭ unu kun tiu titolo. Ĉi tio tre ofendis lian ambicion, ĉar malgraŭ sia humileco li posedis sufiĉe da aroganteco. – Ĉiamebria! Kia malbenita stultaĵo. Li, kiu efektive devis esti forta direktilisto kun bona reputacio – jes, kaj li eble ankoraŭ estus direktilisto, se li ne estus ricevinta tiun ne atenditan gajnon en la loterio de la vivo. Sed nun li ree estis senmona, tute senmona, ĉar li tiel honte kondukis, ke kiam lia patro mortis, li tute ne povis kontroli sian amuzemon, kaj dum la malmultaj jaroj, kiuj nun estis pasintaj de tiam, li estis malŝparinta la tutan heredaĵon de la patro, ĉiun moneron, kaj poste li perdis sian okupon.

Sed ĉi tio estis bagateloj aŭ flankaj aferoj. La ĉefa afero estis, ke la diablo de venenaj sedimentoj estis gorĝpreninta lian vivon tiel fortege, ke li retropaŝis for de la antipatio kaj la malsukceso, li fuĝis sin mem – ŝteliris laŭ la plej maloftiraj stratoj en mallumo de la aŭtuna nokto, ĝis la maro, kie li enigis ŝtonojn en siajn poŝojn.

Kaj kiam li faligis sin malsupren de la kajo, kiam la vivfino alproksimiĝis kaj estis kvazaŭ la plaŭdo kaj la malvarma akvopremo volis krevigi la oreltamburojn, li sentis, ke la ebrieco ne multe ŝanĝiĝis. Li ne estis naĝipova, sed dum li estis forgesanta sin mem, li ege gestadis aŭ senvole sin manremis en la direkton, kie li en la mallumo kaj la profundo supozis, ke la bordo estas – la bordo aŭ la vivo, kiun li nun estis adiaŭinta. Sed baldaŭ ĉio estis finita, kaj post tempeto la konscio fariĝis tute senaktiva kaj kelkaj aervezikoj sur la mara surfaco konfirmis la okazaĵon.

La luno estis brilinta antaŭ mallonga tempo, sed ĝi ankaŭ fariĝis senaktiva, ĝuste en tiu ĉi momento. Estis kiel ĝi tute ne volis vidi tion. Ŝajnis, ke ĝi ne posedis sufiĉan kuraĝon por rigardi la mizeron de morto, kaj tial ĝi tiris nubvualon antaŭ siajn okulojn.

Kontraŭe la malfluso daŭrigis sian laboron, – torenta grandmalfluso, tiel ke unu bordŝtono post la alia aperis, aŭ rustruĝaj kruĉegaĉoj senvualiĝis, zonoj, botelfragmentoj, malnova benzinbarelo kaj diversspeca alia aĵaĉo sur la fundo de la maro, tiu parto, kiu estis plej proksime al la bordo kaj kiun la tajdo superregis. Baldaŭ la kadavro aperis inter du bordŝtonoj, la kapo estis levigita de alteta algamaso, kiu estis kvazaŭ mola, starigita kuseno. Dum ioma tempo la ondoj plaŭdetis aŭ karesis ĉi tiun senhelpan amason, sed ili havis preskaŭ neniun tempon por haltado, ĉar la malfluso estis tiel rapidega kaj grandioza.

La silento de la aŭtuna nokto brakumis landon kaj maron, kaj la nuboj iam kaj iam kovris la lunon. Kaj kion lumigis nun la palaj lunradioj? Nenion decidan la unuan horon, ĉar la luno ĉiam balanciĝis aŭ longtempe kaŝis sin malantaŭ la nuboj. Intertempe ĝi mirinde brile lumigis la aĵojn.

Sed kio estis okazanta? Movo? Jes, estis klare, ke la kadavro iomete moviĝis dum unu momento. Sed tuj ĉio reiĝis kiel kutime: neniun movo estis videbla; nur la luno mem ŝajnis moviĝi, – jen ĝi malsuprenfalis, jen suprenleviĝis en la plej altaj ĉieloj kaj kun frosta rikano ĝi rigardis la feliĉon kaj la malfeliĉon de la malluma, dormema tero.

Ne – efektive neniun certa movo estis videbla tie la plejan parton de la nokto. Sed iom post iom tamen nova, stranga konscio ekaperis, dolora, mizera konscio, kiun okazigis la forta salecŝveliĝo en la stomako kaj la mara akreco en ĉiuj sentumoj. Tia estis la morto aŭ tio, kio troviĝis trans la kurteno. – Aŭ – estis – ?

Kio estis? Ĉu li ne estis morta? Kiaj baraĵoj estis survoje, kiuj malrapidigis ĝustajn kaj dezirantajn ŝanĝojn de la ekzistado? Ĉu li efektive vivis ankoraŭ? Ĉu li en la mortstreĉoj estis rampaĉinta tro proksime al la bordo, aŭ malfidis lin la maro, kiam li bezonis ĝin kiel neniam antaŭe? Ĉu li nur estis perdinta la konscion dum ioma tempo kaj nun ree vekiĝis, aŭ estis – estis?

Estis evidente, ke la kadavro movis sin, palpis ĉirkaŭ si, konigis la situacion al si kaj manpalpis la aĵojn. Tio estis ŝtono, tie estis algamaso, tie kuŝis fragmento de barelono kaj tie estis – ne, li certe vivis ankoraŭ.

Ree ekkaptis lin iu marasmo aŭ perfekta indiferenteco pri tio, ĉu li estas morta aŭ viva. Sed la vivo aŭ la ĉirkaŭaĵo ne longe lasis lin indiferenta. Iom post iom tagiĝis. Aŭtomobilo fajfis en ioma malproksimeco kaj diversaj aliaj signoj de la vekiĝanta tago

alproksimiĝis pli kaj pli. Kaj vole nevole la konscio samtempe pli kaj pli bone klariĝis kaj komencis fari iuspecajn, duon-neklarajn aranĝojn. Kafo – varma, fortega kafo – tio ŝajnis esti la unua deziro de tiu ĉi nova, malĝoja konscio, la unua postulo al la malnova vivo, kiu dum mallonga tempo neeviteble devis iom daŭriĝi. Poste oni supozeble povis elekti pli profundan akvon aŭ pli certajn cirkonstancojn – iam poste, jes – sed nun estis plej necese ekhavi fortan, bolante varman kafon. Kaj la konscio eĉ rezonis, ke en unu poŝo ekzistus moneroj, kiuj estis sufiĉaj por aĉeti tiun necesajon.

Kaj tiu ĉi malhela neformaĵo malsupre sur la marbordo tre bonŝanĉe ne estis kadavro, tio evidentiĝis, sed ĝi estis vivanta homo, kiu estis perdinta la konscion dum ioma tempo – forta, tolerema viro, kiu ja estis trinkinta grandan kvanton da mara akvo, sed feliĉe estis eliginta la plejon de ĝi en tiu ĉi milda, malfrusomera nokto. Ĉu li povis stari, aŭ estis malpermesita al li sin teni sur la piedoj? Li rapide ekstaris iomete kolere; li ja unue sufiĉe ŝanceliĝis, sed tamen ne falis; li piedfrapis la teron kaj sin frapis per la manoj dum mallonga tempo, kaj sufiĉe da varmo tuj trairis liajn malvarmajn membrojn. Jes, estis diable granda fluso, feliĉe, ke iu el la ŝtonoj ne mortigis lin, ĉar la akvo efektive estis tre malprofunda. Tiam li rampaciis supren sur la kajon kaj ekiris hejmen.

Jam estis brila tago kaj la laboro estis komenciĝinta. Ekster la pordo de unu el la varejoj, kiu situis aparte apud mallarĝa strateto, estis du aŭ tri laboristoj penegantaj kun grandega varkesto, kiu ŝajne devis esti portota endomen, antaŭ ol la pluvo ekfalas. Ĉu estis muzikinstrumento en tiu kesto, aŭ kia egaĵo ĝi estis? Ho, ve, tio tute ne koncernis lin. La dentoj preskaŭ tintis en lia buŝo.

„Helpu nin, Simbi,“ la laborestro kriis al li, kiam li alproksimiĝis.

„Mi – mi bezonas kafon,“ li respondis distrita.

„Kion vi bezonas? Kiel vi aspektas! Vi estas kurbe klinata kaj malseka kiel hundo. Ĉu vi kuŝis en la koto lastan nokton?“

„Falis – mi falis,“ li diris. „Kafon – mi bezonas kafon.“ Lia animo estis inerta kaj malplena kaj ĉiam turnis ĉirkaŭ la sama afero.

„Helpu nin unu momenton kun la diabla kesto,“ diris la laborestro. „Poste vi povas kuri ien kaj trinki ion varman. Sed revenu post tempeto; ĉi tie estos sufiĉa laboro, almenaŭ hodiaŭ kaj morgaŭ. Nu, Simbi, helpu Gudlaugur levi la kestantulon.“

Kaj tion li faris, li siaparte trenis tiun ĉi grandegan keston ĝis la fundo de la varejo, antaŭ ol li povis plenumi la unuan postulon de sia nova vivo: Varma, fortega kafo.

—

La sekvantajn monatojn li kvazaŭ estis kurigata de unu laboro al alia. Unue li laboris ioman tempon apud la haveno, tiam li ekhavis laboron ĉe cementkonstruado. Sed kiam printempigis, li okaze vagiris al la plej proksimaj kamparoj orientpartaj, kie li unue laboris ĉe terplibonigo, sed poste ĉe fojnakiro. Dum tiu ĉi vojaĝo li havigis al si grandan energion de restariĝo. Tamen li revenis al la urbo, kaj sekvantajn duonjarojn li laboris pri io ajn. Li estis energia laboristo, kiu nenie malpli taŭgis ol la aliaj.

Gudfinna estis silenta, kaj nun ŝi ree liveris liajn ŝuojn, brile brositajn, ĉiun dimanĉmatenon. Oni povis distingi sufiĉe da respekto aŭ humileco en ŝia vizaĝo kaj ŝia konduto, kiam pasis la tempo, kaj ŝi ĉesis cii lin, sed tion ŝi ĉiam faris, kiam ŝi estis tre ekscita. Kaj kiam ili estis tute solaj, eĉ povis okazi, ke ŝi iomete parolis pri edziniĝo aŭ io simila – almenaŭ ŝajnis tiel – sed tio estis tute senutila. Jes, aŭ li volis nenion tiaspecan en sia vivo, aŭ iun, kiu estis iom pli kvalita ol Finna, la humila servistino.

Kaj ili, kiuj plej bone konis Simbi „ĉiamebria“ diris, ke estis diable strange, kiel subite tiu ĉi homo ŝanĝiĝis. Multo aludis tion, ke li iam estis trodrinkinta, tamen nenio pruviĝis, sed oni estis scivolema pri tio, kia speco de trinkaĵo kapablis fari tiel kompletan ŝanĝon de vivmaniero. Kaj kvankam la alnomoj kutime estas persistaj kaj firmaj, kie ili estas enradikiĝintaj, estis preskaŭ neeble daŭre nomi tiun unikan sobremulon „ĉiamebria,“ kaj fine la tiamuloj rezignis al tiu entrepreno – kaj la alnomo vaporiĝis, estis forgesita, kaj laste ĝi tute malaperis.

Du jarojn post la elmara renaskiĝo li ree atingis la direktistan okupon, kiun li malgajnis en tiu tempo, kiam li perdis sian memkontrolo, kaj dum proporcie mallonga tempo li atingis la tri rangojn: direktisto, ŝipestro, direktoro.

Sed longan, longan tempon li tamen memoris la malfrusomeran nokton malluman, kiam li sin mortigis, – li estis seriozema homo kaj rememoris tion kun teruro kaj malpleneco. Sed kiam li pliaĝiĝis kaj la sango kvietiĝis, li pripensis la aferojn kun plia gajeco kaj tiam li kelkfoje ridetis al si mem, pro la malnova stulteco kaj la eraraĉoj, precipe kiam li estis respektinda, renoma homo kaj membro de la urbeŝtraro.

*(Óskar Ingimarsson, Norda Prismo, 3, 1956.)*

## Guðmundur Guðmundsson:

### Printempa feino

Lumo de l' espero supera al oro  
levas min ĉielen en flamo kaj gloro.  
En helec' sunmara ho kara vi vivas.  
Brilo via geme kaj treme aktivias.

Fajron super mondon brilonde vi ĵetu,  
portu mildan varmon kaj ĉarmon almetu.  
Venu fandi neĝon, mi preĝas, feino,  
maron liberigu el liga destino.

*(Baldur Ragnarsson, Songpoemo pri ponto, 1979.)*

## Hulda:

### Arbara kvieto

Kiel ŝipoj de elfoj luliĝe kuŝantaj  
dormetas sur lago lilioj neĝblankaj;  
el bosko proksima per nigraj okuloj  
rigardas la ombroj al kampoj ĉeflankaj.  
Ĉio atendas – atendas sen faro  
rideton de l' lun' en kvieta arbaro.

*(Baldur Ragnarsson.)*

### Se estus mi Aŭrora

Se estus mi Aŭrora  
mi flugus al vi je l' mateniĝo,  
kovrus viajn songojn per roza vualo  
kaj vidus vin rideti – en la dormo.  
Kun ĝojo mi permesus al vi ĝui ripozon  
kaj songojn ĝis la tagiĝo,  
aŭskultus vian spiradon.  
Atendus  
kaj vidus kiam vi malfermas viajn okulojn matene brilajn.  
Vin kiskus kaj flugus for.  
Se mi estus la vespera suno

mi sternus la plej belajn radiojn  
sur vian kuŝejon  
kaj restus ĉe vi en la nokton  
kun silenta preĝo.

Eĉ se mia animo estus anĝelo en la ĉielo,  
ĝi sopirus al la tero – kaŭze de vi,  
ĝemspirus kaj preĝus al Dio  
ke ĝi povu akompani vin,  
protekti vin kaj beni.  
Tio estus la plej feliĉa feliĉo.  
En via proksimo  
la silento iĝas bela kaj riĉa  
kaj revas ke ĝi estas libera  
el la eternaj katenoj.  
Via animo havas por ĝi la saman valoron  
kiel la printempo por la malvarma tero.  
Mi amas la silenton ĉirkaŭ vi.  
Se mi povus eldiri al vi mian tutan menson  
vi ja aŭskultus,  
trovus miajn vortojn ferakonto;  
sed nur la kvieto povas porti al vi  
tonojn el miaj landoj.  
Se mi estus la nokto,  
mi dirus al vi mian deziron en sonĝo.  
Se mi estus libera,  
mi transpaŝus vian sojlon  
en mateno kaj vespero,  
venus al vi se vi estus malsana kaj laca,  
portus al vi varmon kaj prizorgon de via patrino,  
ridetus kaj demandus pri nenio,  
nur aŭskultus –  
aŭskultus al ĉiu vorto kaj ĝemo,  
kiuj volus min serĉi,  
– donus al vi la solecon  
se vi estus feliĉa.  
Atendus kaj preĝus por vi  
ĝis vi revenus al mia hejmo  
kiel mateno post nokto.  
La plej gloraj floroj de la tero  
bezonas la plej varman sunon kaj la plej pezajn roserojn  
por kreski al maturo kaj porti kronon.  
Somero!  
benu vi mian mirindan lilion.

*(Baldur Ragnarsson.)*



## Sigurður Sigurðsson frá Arnarholti:

### Hodiaŭ

Hodiaŭ mi riĉas – kaj emas sen brido  
perlojn disŝuti por ĉies ŝovel’.  
Prenu plenmanojn laŭ via avido,  
ĝis satas l’ animo er pufa ŝvel’.  
Ĉion kaptu for, for,  
kun pasia fervor’ –  
kaj ŝparu la dankojn, ĉar vantas la or’!

Hodiaŭ mi povras ĉar mankas la mono,  
almozpetanto, ŝirita la vest’.  
Sola espero ke helpu pardono  
de l’ povoj ĉielaj en gracia bengest’.  
Ŝajnas vipa destin’  
peti manĝon kun klin’!  
Vin kial naŭzegas eksid’ apud min?

Hodiaŭ mi ĝojas kaj kantas plenskale  
kaj dancos tra nokton kun ajna virin’.  
Kun reĝ’ kaj vagisto tintigas egale,  
titolo aŭ nomo koncernas ne min.  
Vin mi tenas, sinjor’,  
sinjorin’, ĉe la kor’ –  
kambiojn surdorsas laŭ ĉies humor’!

Hodiaŭ kolero fuĝigas rezonojn,  
vokas min rompi ĝis era muel’,  
pafi kanajlojn, pendumi friponojn.  
Teron dronantan surkraĉu ĉiel’!  
Brulu vi en Infer’!  
Forskuiĝu la Ter’  
dis de l’ orbito - jen la prefer’.

Hodiaŭ mi oldas – mi estas ja laca,  
tremas veante sen trezor’.  
Kie la pel’ kaj pugn’ minaca?  
Kie la fajr’ de l’ frua glor’?  
Jen la fin’! Kia pun’!  
Miaj haroj de jun’  
pro l’ ventoj de l’ vivo blankiĝis jam nun.

*(Baldur Ragnarsson, Songpoemo pri ponto, 1979.)*

## Jóhann Gunnar Sigurðsson:

### Printempa saluto

Ke suno printempa jam venis  
mi scias, ne kaŝu vin.  
Rigardu tra la fenestro,  
pro Dio, vi kisu min.

Aliaj malmultaj ŝatas  
nun resti jen ĉe mi.  
Estu nun delikata,  
la sorton ne scias vi.

Ĉar estas alie deziri  
vivon al si je fidel'  
ĝoje povi ĝui  
sanon freŝan de bel'.

*(Stefán Sigurðsson, Agorde, 1991.)*

### Vesperpreĝo

Diin' de dolĉaj sonĝoj  
gardu infanon vian.  
Fermu maldorman  
okulon mian.

Lulu, karesu  
ĝis dormas la ido.  
Brakum' de vi estas  
pacema mildgvido.

Vi delikatmane  
en sonĝon min tiras.  
Ankaŭ mi ion  
forgesi deziras.

*(Stefán Sigurðsson, Agorde, 1991.)*

### Mi amis

Mi amis la vivon kaj lumon pasie,  
ĝi kuŝas enfosita ĉie.

Miaj esperoj antaŭe flugontaj,  
iuj jam mortis, aliaj mortontaj.  
*(Stefán Sigurðsson, Agorde, 1991.)*

**Jóhann Jónsson:**

## Sopiro

Kie la tagoj de l' vivo perdis koloron?  
La kantoj fluintaj en via sang' de song' al songo,  
kie forkaptis ilin veter', ho infano kredinta  
vin naskita kun la font' eterna  
de mirindec' en brusto!  
Kie. . . ?

Je tiaj strangaj vortoj  
de iu voĉ' lokitaj  
sur vojon nian – aŭ ŝajne  
trablovis la stratojn nur vento,  
resentas ni, de kutimo dormantoj, la vivon  
en niaj membroj dum iom da tempo.  
La susuro seneca moliĝas en niaj oreloj.  
Enuo laŭŝajne vaporas el mens' elĉerpita,  
jen io vekige spiretas sur niajn palpebrojn  
movanta nin momenton: komprenfrapita,  
konscie sobra krias jen  
animo nia:  
Kie?

Ho, kie? Ĉu perdita ne estas perdita?  
Ne gravas, ĉu polvas pasinton jar' aŭ eterno.  
Permesu nur dum temp' al mi memoron ĝui,  
travivaĵ', vokanta voĉ',  
ho restu!

Sed ve, kiu povas vin per manoj teni,  
sankta trompiĝo!  
Kiel flugila mov' de ŝveb-angeloj  
en okuloj de vekigantaj infanoj  
vi malfirmas al ni, la sklavo de ĉiutageco. . .  
kaj samtempe kun sia apero via mirindo dronas  
en la ĝojbruo kaj furiozo de l' amaso.

Tiam ni daŭrigas nian vojaĝon, ĉiu aparte  
en sia viv' erarvojanta, ekstera homo;  
la okuloj kaptitaj kaj la koroj ĝenitaj  
de kutimo daŭraĉa: mensogi al si mem ĝis la morto.

Sed silenton, silenton – konscienco profunde ja dormas,  
sed tamen kantetas la tutan tagon  
en oreloj senripozaj  
io simila je aŭtuna zumad' en vento,  
io simila je l' kantad' de nia mortinta patrino  
el mara murmuro fora. . .  
Kaj seneco-penetrata  
flustras nia koro  
mallaŭte en malplenon:  
Kie? . . . Ho kie?

*(Baldur Ragnarsson, Norda Prismo 3, 1956)*

## Postperda sopiro

Kie la tagoj de via vivo sian koloron perdis?  
Kaj la poemoj fulmintaj tra via sango de rev' al revo,  
kie la vent' ilin perdis, ho infano, kredinta  
vin naskita kun fonto neelĉerpebla  
de mirindeco en la brusto!  
Kie. . . ?

Je tiaj strangsonaj vortoj,  
kiujn faligas iu voĉo  
sur nian vojjon – aŭ kiel ŝajne  
la vento disblovas sur la stratoj,  
nin forlasas, la rutinajn somnambulojn, por temp' unuspira  
l'inerto de l' membroj rigidaj.  
Kaj la zumo ŝpinada de l' vakeco malpli laŭtsonas  
en niaj oreloj. Kaj l'enuo paciĝas en nia mens' elĉerpita.  
Kaj io, simila al vekigo, sur niajn palpebrojn spiras,  
ni momente orientiĝas, duone, kaj senco-frapitaj  
krias en sobra konscio  
animo nia:  
Kie?  
Ho kie? Ĉu perdita ne estas perdita?  
Ĉu gravas pri la pasinta, ĉu jar' ĉu etern' ĝin kaŝas?  
Tenu min prefere por tempet', ke mi memoru,  
vokanta voĉ', rememor',  
ho restu.

Sed ve, kiu povas vin pluteni,  
sankta iluzio!  
Kiel flugila flirto de ŝvebantaj anĝeloj  
en l'okuloj de infanoj eldormiĝantaj  
estas vi efemera al ni, la sklavo de l' ĉiutageco. . .  
Kaj tuj je nia prikonsciiĝo, jam dronis via mirindo  
en la frenezo de l' homamaso kaj la gajobruo.

Poste ni pluiras, ĉiu laŭ sia voj' erare,  
ĉiu en sia propra viv' perdiĝinta, fremdulo fakte;  
kaj niaj okuloj estas tenataj kaj niaj koroj perturbataj  
de rutino kaj longtradicia kutimo: sin primensogi morten. . .

Sed silenton, silenton – kiomajne nia konscienco dormas,  
ĉe niaj oreloj senripozaj  
kantetas por ni tra tiu tago tuta  
io, kvazaŭ ekis aŭtuna son' en la vento,  
io, kvazaŭ kantas nia morta patrino  
el la mara zumad' malproksime. . .

Kaj plena de sent' dezerteca  
flustras nia koro  
seneĥe en la vakuon:  
Kie? . . . Ho kie?

*(Baldur Ragnarsson, La Tradukisto, 10, 1992)*

## **Jón Thoroddsen:**

### **La perlo**

La juna viro serĉas la valoran perlon.  
Mi estas malriĉa, diras la juna viro. Donacu al mi. Mi volas  
aĉeti la valoran perlon.  
Kaj multo estas donacata al li.  
Tiam li renkontas la melankolian knabinon.  
Donacu al mi, diras la juna viro. Mi volas aĉeti la valoran  
perlon.  
Tiam diras la melankolia knabino:  
Ve al vi, viro. Mi estas la sufero. Mi nur havas la strangan  
floron.  
Donacu al mi, diras la juna viro kaj li akceptas la donacon.  
Tio estas stranga floro, diras la juna viro. Mi volas porti ĝin  
proksime al mia koro.

Kaj li iras sian vojon.  
 Tio vere estas stranga floro, diras la juna viro. Mia brusto  
 doloras.  
 Kaj li iras antaŭen, kaj multo estas donacata al li.  
 Kiel riĉa mi estas, ekkrias la juna viro. Nun mi nepre aĉetu la  
 valoran perlon.  
 Kaj li serĉas, serĉadas, sed la perlo nenie estas trovebla.  
 Fine li aŭdas pri la saĝulo, kiu posedas la valoran perlon kaj li  
 serĉtrovas la saĝulon.  
 Vidu, kiel riĉa mi estas, ĝojkrias la juna viro. Mi volas aĉeti la  
 valoran perlon.  
 Ĝi ne vendiĝas, diras la saĝulo.  
 Tiam la juna viro frotas siajn manojn kaj ekkrias:  
 Kiel utilu mia riĉaĵo, se mi ne povos aĉeti la valoran perlon.  
 Kaj li iras for, la melankolia viro.  
 Donacu al mi, diras la homamaso, kaj la melankolia viro  
 donacas.  
 Donacu al ni, diras la homamaso, kaj li donacadas grandajn  
 donacojn.  
 Poste li reiras al la saĝulo.  
 Vidu kiel malriĉa mi estas, diras la melankolia viro. Donacu al  
 mi la valoran perlon.  
 Ĝi ne donaciĝas, diras la saĝulo.  
 Tiam la melankolia viro fortunigas sian rigardon en silenta  
 malĝojo, sed la saĝulo kaŝe palpebrumas kaj demandas:  
 Ĉu vi donacis ĉiujn viajn donacojn?  
 Jes, diras la melankolia viro.  
 Ĉu vi ankaŭ fordonis la strangan floron? Tiel demandas la  
 saĝulo.  
 Tiam esploras la melankolia viro. Li amas la strangan floron.  
 Bone do, tenu ĝin, diras la saĝulo.  
 Mi amas la strangan floron, ekkrias la melankolia viro. Sed  
 kion mi faru per ĝi? Jen, ankaŭ ĝin mi volas fordonaci.  
 Kaj li prenas la strangan floron. Sed ve, ĝi estas kreskinta en  
 lian bruston.  
 Malgraŭ tio li ekeltiras la strangan floron. Kaj jen, inter ĝiaj  
 radikeroj, kuŝas la valora perlo.

*(La Tradukisto 1, 1989.)*

**Jóhann Sigurjónsson:**

**Karulin' ekdormu ni**

Karulin' ekdormu ni,

teron pluv' akvumas.  
Ilojn, grandvalor' de vi,  
panjo bone zorgas pri.  
Veki ne devas ni dum nokt' mallumas.

Scias multon la malhel',  
pezas menso mia.  
Ofte nigra, sabla ŝvel'  
kampon kovris je akcel'.  
Faŭkas en glaciej' ravino kria.

Dormu en trankvila hor'.  
Dum la tempo iras  
lernos baldaŭ de dolor'  
vi, ke homoj pro angor'  
amas kaj perdas, ploras, postsopiras.

*(Stefán Sigurðsson)*

## Dormu, dormu, mia flor'

Dormu, dormu mia flor',  
pluvo triste zumas.  
Viajn ludojn lasu for  
dum malvarma nokta plor'.  
Dormi ni devas dum la ter' mallumas.

Kaŝas multon nokta fel',  
pezas menso mia.  
Ofte kampon sabla ŝvel'  
razis for en venta pel'.  
Faŭkas en glacimont' ravino kria.

Dormu longe en sekur'  
dum la temp' peziras.  
Baldaŭ en la vivokur'  
vin instruas sortodur',  
ke amas la homoj, perdas, plorsopiras.

*(Stefán Sigurðsson, Songpoemo pri ponto, 1979, Agorde, 1991.)*

## Lulkanto

Dormu dormu, etknabin',  
dum la nokta vento.

Hom' en lito kaŝu sin,  
blov' ne povos trovi vin  
kun ruza bruo de abisma fendo.

Dormu dormu, etulin',  
eĉ se bruo tiras.  
Se mallumo vokas vin,  
vi ne timu, fidu min.  
Homoj vivas, amas kaj sopiras.

Dormu dormu, karulin',  
dormu en trankvilo.  
Dum la nokt' etendas sin  
mia amo gardos vin.  
Dormu dormu ĝis matena brilo.  
*(Árni Böðvarsson.)*

## Hejmsopiro

Fuk' vagas senradika,  
drivas en vasta mar',  
tien kaj reen iras  
pere de flu' sen bar'.

Birdoj flugis ĉi-supre  
kun ĝojo kaj flugilbru',  
– ili tuj malaperis  
fore en ĉielblu'.

Fuko rigardis l' aron,  
tristiĝis pro la sopir'.  
Ond' kiu ĝin kunportis  
sangiĝis je sunsubir'.  
*(Stefán Sigurðsson, Agorde, 1991.)*

## Funebro

Ve, ve, pro la urbo detruita!  
Kie estas viaj stratoj,  
viaj turoj,  
kaj la lummaro, ĉarmo de la nokto?  
Kiel koralo en profunda maro  
vi estis sub la blua ĉielo,



kiel buko el arĝento reliefa  
vi kuŝis sur la mamoj de la tero.

Ve, ve!  
En mallumaj putoj serpentoj maldormas,  
kaj la nokto kompatas ruinojn viajn.

Ĉevalhufa polvonubo de la vivo kirliĝas al ĉielo,  
viroj en jungilaro,  
frenezaj virinoj en oraj ĉaroj.  
– Donu al mi salon por manĝi, por ke la lango krustiĝu  
en mia buŝo  
kaj mia funebro silentiĝu.

Sur blankaj ĉevaloj ni galoprajdis supren sur la bluan  
ĉielarkon  
kaj pilkludis per oraj globoj;  
ni pendis en la kolharoj de l' mallumo,  
kiam ĝi sin verŝis tra la abismon;  
kiel lunradioj ni dormis sur la ondoj maraj.

Kie estas tiuj montoj kiuj falu sur mian funebro,  
altaĵoj kiuj polve kovru mian nudon?  
En la nigra mallumo de la eterneco flugas ruĝa drako  
kaj ŝprucigas venenon.  
Suno post suno faladas gutope  
kaj naskas novan vivon kaj novan funebro.

*(La Tradukisto 4, 1990.)*

## **Einar Benediktsson:**

### **Jen alportas de l'Temp'** **(Sjá, hin ungborna tíð)**

Jen alportas de l'Temp' ĵus naskita Printemp'  
ŝtormojn, luktojn kun juĝ' de l' pasinta agar',  
por malriĉa la klas' en sufer', la temppas'  
la homrajtojn postulas, kun justa ripar'.

Ĉiu filo de Di', rajtegala al ni,  
vivu, de la naskiĝ' ĝis la tomb', en liber'.  
Jen la leĝ' de promes' de l' homara progres';  
flagru ĝiaj standardoj sur mar', sur la ter'!

Ĉe l' matena lumflu' ekaŭdiĝas sonbru'.  
Estu homoj kuraĝaj, laboru kun ĝu',  
ne kun sklava kortim', sed kun vigla anim',  
helpu, helpu do ĉe l' ruinar-rekonstru'.

*(Ārni Bōðvarsson kaj F.V. Lorenz)*

## La granda tago

Li kuŝas sur ligno ĉe pala tol'.  
Kandelo bruletas en morna sol'.  
Kvietas kabano kun sankto kaj paco,  
ĉar ne plu turmenton posedas la ter'  
por tordi mortinton trans monda mizer'.  
Neniu maldormas preĝante por graco  
Proleto forpasis je fino de l' tag'.  
Pro ŝuldoj de l' vivo jen estas la pag'.  
Nun gapi li povas en ostaj rigoroj.  
Li gapi antaŭe, pro kio doloroj.  
Ripozas sur brusto, sen varmo, sen ag'  
la mano fuŝinta je ĉiuj laboroj.

— — —

Li vidas, rigardas al volba hel',  
simila surfacon de suba ŝvel',  
ripozo de l' fortoj membrane prizonas  
la cerbon de Dio – kiu scias sin mem  
kaj ĉion ampleksas de fajro al sen',  
komprenas kaj amas kaj vivon kre-donas.  
Perceptas l' eternon subite la mens',  
senmortan kreaĵon de Dia la Pens',  
jen spertas ludinto de l' vivtragedio  
facilon eskapi de l' korpa funkcio,  
ne plue spiriton allogas terdens',  
ĉar ĉio malvivas sen varto de Dio.

Nun levas li vidon al Ĉiopov'.  
Eterna silento sur Ties Brov'.  
Zonumas la Mezon svarmego kometa,  
sed blindo de l' nokto sub Ties Pied'.  
La Koro trakosma sunara lumret',  
forĝejo prakrea de fluo magnetata.  
La Penso fulmbrilas kaj tondras la Vok'.  
Mondaron tennutras la Forto-Prastok'.  
La Kanto krekirlas la muĝon de l' ventoj,

tra l' Sango gutegas stelaraj taĉmentoj.  
Flubrilas radioj kaj benas je lok'  
lumanta sub Graco de brilotorentoj.

Kaj Di' vidas *enen*, tra l' mondo-mond',  
al Li sin direktas la kosmorond',  
de kerno kristala ĝis koro anĝela  
trabrilas la fortoj per lia vivlum',  
kaj ĉia doloro, pekemo, prium'  
vaporas disfor kiel falo brulstela.  
La karno pereas kaj perdas sin mem,  
sed tamen validas ne tia ekstrem',  
ĉar viv' estas vero kaj morto mensogo.  
Ĉe Dio troviĝas nek cedo nek logo.  
La Forto potenca, la suno kaj sem',  
estas fluo lumanta, trakosma apogo.

Li sentas nun pulson de ĉia kre'  
kaj timon pro l' spaca svenigo-ve'.  
Viveroj blovitaj en ĉiun solidon  
ĝin tute plenigas ĝis lasto kaj lim',  
prilumas en foro kaj tuja proksim'  
ĝis fin' de la celo de Dio – trans vidon.  
La grandoj nuliĝas ĉe l' vivo-zenit',  
la vido sin levas al nova orbit',  
ĉar l'Esto Eterna stelsvarmojn pelanta  
priscias sin *sola* tra kosmo ŝvelanta,  
sur tero okupas la korpon spirit',  
la Kosmon l'animo de Dio celanta.

En mondo spirita la tempo ne  
troviĝas nek jaroj aŭ tagide'.  
Senfina mirindo de rond' okazara  
videblas sur tero laŭ er' sole nur.  
Paseo, nuntempo kaj ankaŭ futur'  
samtempas ĉe Dio sen limo disbara.  
En sankto silentas senfina sistem',  
l'animo de l' homo sen timo kaj trem'  
rigardas jen super sunaran la ŝpinon  
kaj vidas en gloro en lumosenfinon.  
Sur tero la vivo rapidas laŭ em',  
ĉar lumo pli alta konservas destinon.

– – Li guton similas en vasta mar',  
en sum' de l' animoj: la Dio-Klar'.  
Silentas inklino mortiga, ruina,

movinta sin kontraŭ la fluon de l' viv'.  
Nenio li mem. Li forsaltas el driv'  
en regnon de Dio kun ĝojo senfina.  
Ĉu viva ĉu morta la individu',  
de tia la sion forrabos detru'.  
Al ombroj turniĝas dividoj kaj limoj.  
Komprenas li fine pri sanktaj maksimumoj,  
pri ĉeloj de l' tuto kaj vivevolu',  
pri eroj celantaj al kun' de l' animoj.

— — —

Ripoze li ŝvebas en lumoglit',  
ekvidas ĉe sia lasita lit'  
la pastron priumi kun falsa humilo  
je lasta vizito ĉe l' povra naŭzul';  
konsolodezire kun larmoj de brul'  
atentas vidvino pri lia babilo.  
Fihomo malinda! Vizaĝo-esprim'  
perfidas pri tedo kaj fi-malestim'.  
Li aŭdas eksoni ŝlosilojn, serurojn,  
li vidas vilbrovojn kaj sulko-trakurojn. —  
Kaj tiam brakumo de lumo sen lim'  
lin prenas kaj portas en tagajn purpurojn.  
(*Baldur Ragnarsson, Norda Prismo, 5, 1959.*)

## Prujno

Sur fenestr' en fridvetero  
glaciflor' kun rektaj tigoj  
fluas laŭ angiaj ligoj  
fort' kaj nutro de l' eter'.

Sur frostvitro florrideto  
belas supre de glacio  
kiel preĝ' al bona dio  
rima preĝ' de infaneto.  
(*Stefán Sigurðsson, Agorde, 1991.*)

## Oceano

Al vi mi sopiras, dezerto de glor' kaj teruro,

vizaĝo de l'nordo en dolĉo kaj dura severo.  
Ĉe vi la deziroj de koro leviĝas en puro.  
Marego – vi portas plej fortan memoron de l' vivo.  
– Mi vidas vin kuŝi en vasta brakumo de l' rokoj;  
mi aŭdas vin spiri sur malprofundo ĉe l' rifoj.  
Sub via brov' hejmas mildo kaj muĝa kolero;  
al loko modesta vi donas econ enorman,  
kie la ondoj akordas kun altorenta rivero,  
sed prenas sinteno de l' homoj aspekton vi-forman.

Bildoj kaj ombroj sin ŝvelas sub via potenco.  
– Sentempas memoro pri via brusto pez-onda  
levita kur-spire kontraŭ la nigro transmonda,  
mallumon vi verŝe altrinkas sur ondajn hordojn.  
Fermiĝas okuloj sub frunto de nigra fajenco,  
per tukoj kadavre palaj vi ligas la bordojn.  
Grizaj fantomoj ŝvebas en mornaj disvagoj,  
ŝerĉantaj sin mem, al kiuj vi juĝis dron-sorton,  
– kaj dormaj vizaĝoj kuŝantaj sur lacaj brakoj  
revidas kiujn vi nutris kaj ĵetis en morton.

Marajn profundojn transiras vido sendrive, –  
kie viveblas nek sono nek lumo de l' tago.  
Simile al ventoj pelantaj ŝafojn deklive  
marajn loĝantojn direktas kurenta malvago.  
Okuloj lumozaj spionas tra l' maraj malbriloj,  
kie disvagas mar-hordoj minac-kondute,  
pretaj al reciproko per tuja mort-ago  
lertaj pri luktoj, singardaj, duraj aktive,  
kreskaĵojn drivantajn dishakas avido-glute  
per dentoj mordantaj kaj akraj kiel falĉiloj.

Al ter' emas mara viv'. La rokon vi signas,  
vidigas vin mem, kun flirtaj, fluaj vualoj,  
tien kaj reen, dum firmas la ŝtonaj ŝtaloj,  
la algajn arbustojn tremigas la onda gluto.  
Sinkas en maron river', kiel en puton guto.  
Laŭ majstra ordon' vi tamen nord-roke rezignas.  
Vi voĉon altigas kaj vokas de bordo al monto,  
de rok' katenita eĥadas defia saluto.  
Senrajta libero de l' ondo-falega fronto,  
mi aŭdas vin detruadi, relevi en tuto.

Mi ofte memoras la mondon de bildoj fluktuj  
en grupoj venantaj-irantaj en urboj kolosaj,  
urboj de bruoj portataj per ventoj forfluj,

kun vakaj vizaĝoj ondantaj sur placoj ĥaosaj.  
Ondoj ĝemadas kaj mortas en homa amaso.  
Troviĝas ne du sango-gutoj ekzakte samaj,  
kaj samas pri ĉiu ond-larmo kaj ĝemoj ĉiamaj  
grandkvante kuniĝaj en via mar-flua son-maso.  
Sed trovos fin-lokon ie ĉi-signoj vivdramaj,  
kaj iu kord' de memoro poemon post fina paso.

En nokto de meza somero restas sun-oro.  
Aĝiĝas ne tiam vivo de flor' kaj koro.  
– La granda silento de l' maro sur nestoj en rokoj,  
rebrilo surfaca sur mil dormantaj okuloj.  
En fjordo vivsignas okaze balen' aŭ la fokoj,  
kaj bordoprosime fiŝvostoj plaŭdetas en ruloj.  
Ĉe fjordaj luliloj ondetoj ne provas kant-vorti,  
nur unu strofeton flustras ĉe l' flu' eltrilanta.  
Senmovas la tempo. Ĝi staras kun lumo brilanta  
kaj gardas pri ĉio ne jam volanta formorti.

Se pleje vi grandas fiere en ŝtormo aŭtune.  
Vi draŝas ŝirmejojn. Batas la bordon ŝtonume.  
La nuboj pendas ĉifitaj sur nigra ĉielo. –  
La domoj knaregas pro tiro de l' venta ribelo.  
Glacion vi maĉas de l' pruoj boataj ŝirmeje.  
Sur fjordo tremige muĝas ondegoj en ŝvelo.  
Pli fore la maro ŝanĝemas tumulte pli-pleje.  
Vi furiozas. Volas ke sin suprenlevu  
viaj profundoj ĉielen kaj sorĉoj krevu.

Mi vin memoras ĉiam dum lunaj noktoj;  
la stelojn rigardas rokoj kaj ombroj insulaj  
sin brakumantaj geajn gigantojn simile, –  
sed diste susuras kurentoj mikse kunfluaj.  
Apenaŭ sin movas brusto, nure facile  
sin levas kontraŭ la spacon sopire, trankvile.  
Sendorma maro, sur viaj brilantaj bordoj  
sola mi staras en stela palaco de revoj  
kaj vian lumon revivas per mensaj kordoj. –  
Sin kaŝas infanaj spuroj ĉe viaj fjordoj.

Ho, suno vespera sur brilaj speguloj de l' maro!  
Insulo sin vestas per drapoj de roza klaro.  
Regas kvieto. Sed ondoj rompiĝas ĉe rokoj  
kaj tondre disbruas dum mallumiĝanta alfluso.  
Mi tiam komprenas ke vivas ĝis fin' de l' epokoj  
pagana kredo, palace en norda profundo.

Ĉe l' mara dio diboĉas la korteganoj,  
praaj poemoj elsonas de marofundo.  
Plaŭdoj ondaraj parolas per kanto magia, –  
leviĝis plej alte la raso en saĝo pradia.

Saĝo prasankta instruas pri fort' kontraŭ forto,  
sed tamen ke forton venkas finfine la Vorto.  
Kantas la dioj per ritmo de ondoj kaj ventoj  
kaj frapas per timo la bruston de l' nigra potenco.  
Martelo de *Toro* defias la Volon Plej Altan;  
forfuĝas rikano el pordo de la Mara Dio.  
*Loki* sin kaŝas per spito, megalomanio.  
Li amas, suferas en mem-altruditaj katenoj, –  
memoras ridetojn de dolĉaj diinaj mienoj  
kiel etan esperon en nokto sen ajna radio.

Maro, vi koron nobligas kaj ĝin silentigas.  
Vi ĝojon kovras per muto kaj ĝin riĉigas.  
De plor' universo, nenio al vi egalas.  
Ĉe vi la vol' sin konas, forkuras la duboj.  
La maro sen bordo de malproksimo fama,  
reganta vastan regnon fositan en nuboj.  
La brusto frostas kaj la espero disfalas,  
sed via potenco eterne ja estas sama,  
ĉar trans vi ne atendu hometoj havenon.  
Tie nur eterno proponas lastan prenon.

Infanojn simile ludantajn sur via bordo  
per konkaj ŝetitaj tien el via sinego,  
viajn sonojn mi ĝuas el via bruanta rego,  
profundo ploranta, tamen sen ajna koro.  
Misvidoj, ombroj, dormanta insulo en foro,  
metamorfozoj viaj en akompana ordo.  
Kvankam malvarmas sur via brusto brilaĵo  
kaj rokojn vi alvokigas sen ajna respondo,  
ĉio per vasto via farita unu tutaĵo  
mian animon prifluas kiel masiva ondo.

*(Baldur Ragnarsson, La Tradukisto 23, 1996.)*

**Ora nubo**

. . . Li kuŝis kun la manoj sub la kapo en la tuta plezuro kaj gloro de printempa vespero, antaŭ la malnova kaj maltalta biendomo, kun la fenestraj vitraĵoj verdigitaj de la suno, de multjara suno kaj la diversaj koloroj de la ĉielo. . .

La Sinjoro de la Ĉielo estis jam kompata, kiel riĉega aŭtokrato, kiu emas esti malavara, kiam tio al li plaĉas. La tero kuŝis bele vestita ĉe la piedoj de sia kreinto, kaj la maro suĉis al si la ridetantajn radiojn de la potenca belega sundio. La naturo estis tute ŝveligita pro la amo. Ĉio estis tiel milda, tiel riĉa pro tiu silenta, profunda ĝojo vivi, spiri kaj sin movi, kiu sin etendas de tempo al tempo super la teron.

Li sentis la kvaliton de la naturo flui tra siaj nervoj kaj vejnoj, tiun duoblan kvaliton, kiu sopiras vivi sed devas morti.

Jes, li sentis la forton de la vivo kiel ankaŭ ties malforton en- kaj elspiri laŭvice, tien kaj reen, kiel la pendolo en horloĝo, kiu movas la montrilojn, sed samtempe detruas la dentojn kaj aksojn de la radaro.

Li jam dum longa longa tempo rondirigis tiun imagon en la kapo, dum li estis malsana. Aŭ ĉu ĝi ja estis imago? Iufoje ŝajnis al li, ke lia plej profunda, plej ena kompreno troviĝis ne en la cerbo, sed en la nevideblaj harsimilaj nervoj, kiuj etendiĝas tra la tuta korpo. Sed kio ajn ĝi estis, ĝi tiam venis al li ĉiam ankoraŭfoje, kvazaŭ kuŝis super li preskaŭ la tutan vekigtempon lian, tiu ideo pri la interludo de la du praaj movoj de la vivo. Tiam ĝi vekis en li duonfaritan malkomforton tian, kian sentas tiu, kiu forgesis ion, sed tamen ne povas konstati, kio ĝi estas.

Estis la nervaro kaj la cerbo, kiuj, laŭ lia trovo, laboris pro sia propra instigo sen la bezono laborigi ĝin per la volo – labori por solvi la plej malfacilan enigmon, kiun la homoj klopodis fari. Kaj nun tiu ideo aŭ kiu ajn ni ĝin nomu, estis al li ne plu malagraba. Nun li trovis, ke li memoras kaj komprenas tiel senfine multan kaj li konstatis, ke estis pro tio, ke li ripozas sur la tero mem, spiras la saman aeron kiel la herboj de la kampo kaj vidas la ĉielon en ĉiu ĝia nedirebla gloro sen tio, ke la sunbruligitaj fenestrovitraĵoj rompu la radiojn, antaŭ ol ili penetros la okulojn.

Liaj volo, scio kaj sento laboris kiel unuo, kvazaŭ la kordoj de muzika instrumento, kiujn oni silentigis ĝuste en la sama momento. Li sentis kvazaŭ lia vivpovo sin etendis pli kaj pli vaste tra la naturo, kiu ripozis milda kaj paca ĉirkaŭ li – aŭ pli ĝuste kvazaŭ tiu povo siblus tra ĝi tien kaj reen, kiel pulsobato.



Esti apuda, tio estas kompreni, senti ion plene. Ju pli vasta estas la spaco, super kiu la perfekta sento pasas, des pli potenca kaj ampleksa estas la vivo de la sentanto. Tion li trovis tute klara. Ŝajnis al li ke li unuigis sin kun la ekstera naturo, turnis sin, por tiel diri, en la naturon mem aŭ en multajn el ĝiaj partoj.

Kaj ŝajnis al li, kvazaŭ la susuro de la ondoj sur la marbordo kaj la eĥoj de la flugiloj de la tempo venas el li mem.

Sed ĉiuj tiuj puraj, profundaj belaĵoj de la ĉielaero mem, kiu helis kiel brilanta diamanto en liajn okulojn – ĉu tiu ne havas hejmon en lia propra animo? Ĉu la ĉielo ne volbas ĝuste interne de la okulo, kiu ĝin rigardas? Ŝajnis al li, kvazaŭ lia animo estus neniel tro alta kaj neniel tro malalta. Li glutis spirflueton el la fonto de la aero, kaj igis sian koron bati kontraŭ la tero. Li amis ĉion kaj malamamis nenion.

Sed plej alte super la krutegaj rokoj de la monto, kiuj sin levis por renkonti la vesperajn radiojn, sur la alia flanko de la fjordo, tie ripozis ora nuboj sur la flugiloj, tute senmova nemezureble longan distancon super ĉio, kiu loĝas surtere. Ĝi estis kvazaŭ bukedo kunligata de nevideblaj manoj kun radiaj fingroj. Supren el tio sin etendis oraj folioj kaj densaj, brilantaj lumpintoj ĝis eĉ pli altaj punktoj ol kiujn liaj okuloj povis ĝisvidi.

Li ree suprenrigardis por povi vidi pli profunden kaj rigardi pli longe en tiun ĉielan bildon, sed li trovis, ke la vivfluo en liaj vejnoj kaj nervoj ne povas atingi al la lumfloroj, kiuj nutriĝis per la flamoj de la suno tra nevideblaj radikoj.

Fajrantaj folioj kaj brilantaj burĝonoj fulmis en liaj okuloj, kun la ŝanĝiĝantaj koloroj de la sunsubiro kaj la lumpovo de la aŭroro – sed li ne povis plene kompreni ĝian kvaliton. La ora nuboj estis tro alta super li – kaj li ne kapablis ĝin ami.

Li aŭdis la sibladon en sia propra sango; ĝi sonis alterne laŭte kaj mallaŭte kvazaŭ muĝantaj ondoj, – li sentis nun, ke liaj koro kaj menso estas malliberaj. Kien ajn li rigardas, etendiĝas antaŭ li la marbordoj de la nekonata lando, kie ĉiuj ondoj frakasiĝas kaj malaperas en sin mem.

Sed ĉu ne estis agrable pensi al si, ke *li* estas sentata kaj komprenata plene de alia pli altranga animo kun pli sentemaj nervoj kaj pli fortaj pulsobatoj, – kiuj eble kapablas flui de marbordo ĝis marbordo tra la etera maro longe longe preter lia menso? Oni ne aŭdis la muĝadon de tiu maro, kvankam li fermis la okulojn kaj aŭskultis per la

koro, kaj ne vidis ĝiajn ondojn frakasiĝi, kvankam li igis la lumon de siaj plej internaj kaj profundaj songoj brili kun ĝia tuta helo. Ne, li ne povis ami tiun animon, eĉ se ĝi estis apud li, ĉar li ne povis ĝin tuŝi per la menso, kaj lia koro tremis pro troa peno, kiam li volis kapti en ĝi koncepton pri tiu animo. Ne estis amo, multe pli ĝuste estis timo, kiun li sentis. Sed ĉu li ne estis amata, same kiel la tero, kontraŭ kiu li igas la pulson bati? . . .

„Jam venis la vespero kaj ekmalvarmiĝas“ – iu diris mallaŭte kun tremanta voĉo tute apud li – la velkinta sulkita mano viŝis la ŝviton de sur lia frunto.

Li stariĝis kaj iris tre malrapide en la biendomon preter la sunbruligitaj fenestroj, kiuj tenis la tagon ekstere kaj la nokton ene.

*(Hugh Martin, Norda Prismo, 5, 1955.)*

## **Stefán frá Hvítadal:**

### **Erla**

Erla, bona Erla,  
vin devas luli mi,  
ŝvebu en la dormon  
per kant' de emoci',  
mia vesperkanto,  
jam vesperiĝas pli.

Elfoj sur glacio  
ekrajdas en aŭtun'.  
Lumas sur la domo  
la pala bril' de lun'.  
Erla, kara Erla,  
vi bonas ege nun.

Ardas la juneco  
je forta aventur'.  
Ravas min ensorĉe  
en nokt' ĉiellazur'.  
Ĉu ekdormas Erla?  
Spirad' malpezas nur.

Dormu, provu dormi

okuloj kovraj kun.  
Neĝo mallumiĝas,  
kaj velkas lum' de lun'.  
Nigras la sidloko.  
Vi kara dormas nun.

Proprajn mi pripensas  
afliktojn ĝis kulmin'.  
Ruĝfluaĵo kuras  
tra harda vivdestin'.  
Vagas ja fantomoj.  
Vi dormas, etulin'.

Kor' de hom' severas  
pensante plej pri si.  
Nigras la vespero  
min do kompatas mi.  
Glore, dorme songu,  
vin benu bona di'.

Sanktan ja kristnaskon  
sopiras koro nun.  
Mi emas genufleksi  
ĉe dia trono nun.  
Super fajr' de tago,  
ja, super monda sun'.

*(Stefán Sigurðsson, Agorde, 1991.)*

## Dipatrino

Ho, estu benata ĉiel-reĝin',  
benata vi di' - kaj hompatrin',  
vin indulgulin' mi adoras.  
Jaroj pasis kaj ĉiam dum  
jarcentoj pli freŝe je preĝa lum'  
vivanto laŭdege vin gloras.

Benata vi sankta virgulin',  
vi mondon brile lumigas ĝis fin',  
vin, sun', dia graco benas.  
Se neĝas dum nokt' kaj malvarmas pli  
beligas ĉion brilsankte vi,  
ĉar jen la kristnasko venas.

Vi dia floro kaj diamant',

vi sankta patrino de savant',  
vi stel' de ĉielo kaj krono.  
Ne generiĝis je peko vi,  
prezentis anim' via bildon de di'  
komenco de ĉia ajn bono.

La dia graco vualis min,  
-- vualo sama ornamas vin, --  
min volis karigi bene.  
Baptita estis mi infan',  
per edziĝtol' min beligis man'  
de milda dio solene.

Pri ĉielgraco mankis kon',  
edziĝa tolaĵo nur ĉifon',  
kaj plibonigoj malmultas.  
Animo mia sangvundas jen,  
alvenas al ĉiu kuraĝkunven',  
sed tio vane rezultas.

Patrino benata, mi petas vin,  
patrino benata, subtenu min,  
laŭdegas mi vin elkore.  
Kompatu min kaj lumigu al mi,  
konduku min al la fil' de vi,  
frato kaj dio, favore.

Doloron faras vundegoj de mi,  
bandaĝas, sanigas ilin li  
kaj kulpojn de mi forigas.  
Je eŭkaristio paciĝas mi,  
tie ricevas absolvon de di',  
li levas, malligas kaj ligas.

*(Stefán Sigurðsson, Agorde, 1991.)*

## **Davið Stefánsson:**

### **Iris mi sola**

Iris mi for de  
drinko kaj ludoj,  
glasopecoj,  
venenaj gutoj.

Iris mi sola, –  
aliul' prenis  
sin, pro kiu  
mi tien venis.

sed daŭru ne plori,  
mia koro!  
Nun ili kuniros  
al lumo kaj oro.  
— Sed vi gvidus ŝin  
al nebula angoro.

*(Gísli Halldórsson, La Tradukisto 11, 1992.)*

## Panjo volas ekdormi

Kara fratineto,  
sidu ĉe mi.  
Kvietaj devas esti  
ĉi-vespere ni.

Ĉi-vespere ni estu  
tute sen bru',  
ĉar panjo en la krepusko volas  
dormi en ĝu'.

Panjo volas ekdormi,  
kaj panjon premas lac'.  
Funebrojn povas ŝanĝi  
la dorm' al mensa pac'.

Iujn premas zorgoj,  
kaj iujn la sopir',  
kiun nur plenumas  
la sonĝo-delir'.

Ĉi-vespere ni estu  
en plena kviet'.  
Panjo volas ekdormi,  
kara fratinet'.

*(Baldvin B. Skaftfell)*

## Abba-labba-lu

Abba-lu ni nomu ŝin,

Abba-labba-nigrulin'.  
Ŝi loĝis en kabano  
sub arboj ekster riĉoj,  
kaj kredis je fetiĉoj.

Mistero ja, de kie  
ŝi venis al arbar';  
ja mister' pro kio do  
ŝi ridis sen kompar',  
mistero ja pro kio do  
ŝi frapis sen deklara'.

Abba-lu ni nomu ŝin,  
Abba-labba-nigrulin'.  
Ŝi ĉiujn frenezigis  
kaj ŝanĝis al ruin'.  
Per sovaĝ-besta sango,  
per sovaĝ-besta sango  
vivis ŝi, la nigrulin'.

Iam mi ŝin vidis,  
Abba-labba-lu.  
Kurdancis en l'arbaro ŝi,  
supla laŭ bambu'.  
Varmiĝe mia koro  
ŝin vokis tra vaku',  
Abba-labba,  
Abba-labba,  
Abba-labba-lu.

Ŝi kuris al mi kun rideg'  
kaj kisis min sen vort',  
mordis min kaj suĉis el mi  
sangon – ĝis la mort'.

Kaj vokas mi fantome nun  
super la mara blu':  
Gardu vin, malfortular',  
gardu vin, malfortular',  
je Abba-labba-lu.

*(Baldur Ragnarsson)*

## Abalabalaŭ

Abalabalaŭ, la in'

nigrebrova ravis min.  
Ŝi loĝis en kabano arbara de kondiĉoj  
kaj kredis je fetiĉoj.  
Abalabalaŭon mi vidis foje, ĉar  
ŝi dancis nigrebrova kaj belis en arbar'.  
Mi iĝis kortusita kaj vokis laŭ la laŭ':  
Abalaba, Abalaba, Abalabalaŭ,  
Abalabalaŭ.

*(Stefán Sigurðsson, Agorde, 1991)*

## Lumu, lumturoj!

Lumu, lumturoj! Fortaj viroj staras  
ĉe l' direktil', sed ĉie nokt' malklaras.  
Lumu! Ĉe l' sabla bord' la nomojn diras  
de l' mardronintoj l' ondoŝaŭma ĉen'.  
Lumu al ĉiuj, kies kor' sopiras  
pri l' hejmeven' kaj pri l' haven'!

*(Árni Böðvarsson kaj F.V.Lorenz)*

## Eksilentis la ŝpiniloj

Jam la ŝpinil' silentas kaj regas nun trankvil'.  
Krucosignu vin kaj ekdormu, mia fil'.

Krucosignu kaj okulojn etajn fermu vi,  
por ke vin ne trompu la malluma iluzi'.

Lulu, kara mia, kaj montru ne al ĝi,  
kiel bluaj estas la okuloj de vi.

Lulu kaj ekdormu en panja prokitektum'.  
Baldaŭ venos tago kun benata sia lum'.

Baldaŭ venos tago kun paco kaj trankvil',  
tiam panjo kantos pri suna bril'.

*(Stefán Sigurðsson, Agorde, 1991.)*

## La grundo dormas

Nun somerverda dormas ter'  
je plenumiĝ' de preĝafer',

profunde spiras en trankvil'  
en blua julinokta bril'.

Nun dormas sun' ĉe horizont'  
kaj elf' en ĉiu eta mont',  
en junko dormas cignidar'  
kaj truto en river' kaj mar'.

Noktsune brilas biendom',  
ĉe patrinmam' plej juna hom'  
ricevas jen en efektiv'  
plej bondonacon de la viv'.

River' fluadas al estont',  
dormante perle brilas font'.  
La profundaĵo sonĝas pri  
la maltrovita poezi'.

Reflektas mare sin ĉiel',  
en roso loĝas ĉielbel',  
animo dormas en floret',  
sekret' en ĉiu sableret'.

Nun sonĝe regas pacinklin'  
ĉe animpordo de l'tagfin'  
kaj ĉie ĉarmas belsomer'  
kaj dia paco sur la ter'.

*(Stefán Sigurðsson, Agorde, 1991.)*

## La forĝejstro

En fajron li puŝas la feron,  
la flamojn altigas per blov'.  
La karboj brulante krakegas,  
la balgon muĝigas manŝov'.  
Plenigas polvoj kaj fumo  
la regnon de lia labor'.  
Li forĝas sur sia amboso  
la ŝtalon de ruĝa kolor'.

Aktivas jen viro potenca,  
krepova kaj saĝa kolos'.  
El ŝtalo fajreroj dissaltas,  
frapegojn resonas l'ambos'.  
La granda klakbruo atingas



l'orelon de l'preterpasant'.  
La man' la martelon levanta  
estas vejna kaj fremda je gant'.

Li mem sian sorton decidis.  
La devojn plenumas sen tim'.  
Dum nigras la korpo de fulgo  
estas brava kaj pura l'anim'.  
Prenilojn li tenas plej firme,  
la langon indulgas per pac'.  
La frapoj surfalas l'amboson  
ĝis tremas la mano de lac'.

La leĝojn skribitajn per fajro  
de l'vivo respektas la vir'.  
La ŝtala malmol' lin instruis  
promesojn plenumi laŭ dir'.  
Li lernis labori lojale,  
neniun ĉagreni laŭ vol';  
se tiel kondutas la miloj,  
savita ja estus popol'.

Objektojn el ligno faritajn  
en teron kondukos detru'.  
Kaj ĉion ĉizitan el ŝtono  
konsumos pere-kontinu'.  
Rompiĝos neprege la vitro,  
perdiĝos fatale la or'.  
La ŝtal' estis kiun la majstro  
elektis por sia labor'.

La man' la martelon levanta –  
ĝin movas interna dezir',  
flegema spirit' kiu celas  
facilon de ĉies vivir'.  
En liaj krefaroj kaŝiĝas  
futuraĵ prirev' kaj esper',  
ke ĝuu la postenaskitoj  
la fruktojn de l' forĝa sever'.

Tratage li daŭre martelas  
la ŝtalon en ardo kaj ŝvit'.  
Al lia fervol' ĝi obeas,  
al lia potenca spirit'.  
Ja sankte laboras la mano,  
ja forte elkreas la mens',

kiuj frapas kaj ĉizas en ŝtalon  
sian grandon kun tia intens'.

*(Baldur Ragnarsson, Norda Prismo, 2, 1964.)*

## **Sigurbjörn Sveinsson:**

### **Trans la riveron**

La vetero estis varma kaj trankvila, sed nuboj kovris la sunon. La bovinoj el la bieno Tunga paŝtiĝis apud la rivero; sed tiam la bovinoj el la bieno Hvarf subite venis al la cetera bordo de la rivero kaj blekis laŭte.

La dommastrino petis min kaj Steini'n, ke ni nepre venigu la bovinojn, antaŭ ol ili transiros la riveron. Ni kuregis al la rivero, sed tamen ne venis sufiĉe frue. La bovinoj estis meze en la rivero, kiam ni venis al ĝi.

Nun ni staris sur la bordo, ne sciante kion fari; ni ne kuraĝis transvadi la riveron, ĉar ĝi estis tiel profunda. Ni kriis post la bovinoj kaj minacis al ili, se ili ne tuj venos returne, sed ili nur svingis la vostojn, kiam ili eliris el la rivero, kaj poste iris trankvile suden laŭ la riverbordo, kune kun la bovinoj el Hvarf.

Ni saltis en la riveron; ni jam iom ekkoleris. Steini fakte iom protektis min, ĉar li estis supre de mi en la rivero. La rivero pli kaj pli profundigis, tiel ke nia kolero malpliigis. Ni iris malrapide kaj singarde. Ni sciis, ke fariĝus malfacile al ni re-ekstari, se ni falus.

Nun ni staris meze en la rivero, sen havi eĉ bastoneton por apogi nin. La akvo jam estis tiel profunda, ke ŝajnis al ni, ke ni baldaŭ leviĝos de la fundo. La afero jam fariĝis iom serioza. Ni ne kuraĝis antaŭeniĝi, ĉar se la rivero nur iomete profundigus, tiam tio estus nia fino. Nun ni intencis iri returne; sed estis jam tro malfrue fari tion. Se ni estus provintaj tion, la fluo estus tuj kaptinta nin.

„Ho, Dio, helpu al ni!“ diris Steini, kaj estis facile aŭdeble, ke tiu preĝo estis sincere eldirata.

„Adiaŭ, mia amata panjo!“ mi diris mallaŭte, ĉar mi jam iom timis, ke mi neniam plu vidos mian panjon en tiu ĉi vivo.

Tie ni staris, silentaj kiel ŝtonoj, meze en la rivero Víðidalsá kaj rigardadis la bluan torenton. Ho! kiel dolorige estis por junaj kaj viglaj knaboj rigardi en la okulojn de la morto, dum la vivo ankoraŭ ridetas al ili kaj la mondo estas tiel hela kaj bela el ilia vidpunkto. Tion ĉi mi kaj Steini spertis nun.

Finfine ni decidis daŭrigi la iradon je la nomo de Dio, kiuj ajn estos la sekvoj. Ni tenis unu la alian fikse manon en mano. Ni nepre ne intencis lasi la manon unu de la alia, kvankam la torento renversus nin, ĉar tiam ni intencis konduki unu la alian en la landon de la eterna aŭroro, tute en la paradizon.

Ni daŭrigis malrapide kaj klopodis fiksi la piedojn inter la glitigaj ŝtonoj en la fundo. Mi laŭdis Dion pense, kiam mi rimarkis, ke la rivero ekmalprofundiĝis. Baldaŭ poste ni troviĝis sekuraj sur la alia bordo de la rivero. Ni kuris suden laŭ la riverbordo, kaj la akvo eliĝis el niaj ŝuoj.

Kiam ni trovis la bovinojn, ni pelis ilin rekte en la riveron en loko, kie ĝi estis malfacile transirebla; sed mi kaj Steini tute ne timis. Kiam la unua bovino ekiris en la riveron, mi saltegis kaj kaptis ĝian voston per ambaŭ manoj. Steini estis ĉiam tie en la batalo, kie la danĝero estis plej granda, kaj tial li atendis ĝis kiam la lasta bovino ekiris en la riveron; tiam li kaptis ĝian voston.

Mi tute ne sciis, kiel Steini fartis; sed rilate al mi mem, mi tuj falis, venante en la riveron, kaj mi subakviĝis ĝis la mentono. Tiamaniere mi duone flosis kaj duone subakviĝis la tutan distancon trans la riveron.

„Tio estis interesa!“ diris Steini, kiam ni eliris el la rivero. „Mi nur kelkfoje tuŝis la fundon.“

„Mi neniam tuŝis la fundon,“ mi respondis; „tio ja estas pli interesa.“

Kiam ni venis hejmen kun la bovinoj, la dommastrino vokis nin al la provizejo kaj donis al ni varmigitan lakton. Poste ŝi ekkompatis nin, ĉar ni aspektis tiel malbone, kaj petis nin nepre neniam plu vadi trans la riveron.

„Ho, neniŭ fariĝas pli malbona pro tio, ke li malsekiĝas,“ Steini respondis.

„Sed vi povus ankaŭ per tio eniĝi en grandan danĝeron,“ diris la mastrino fervore. „Ne estas infana ludo vadi trans la riveron Víðidalsá.“

*(Ólafur S. Magnússon, Voĉo de Islando, dec. 1960.)*